

Bernhard Pabst

Berlina Komentario

pri la

Fundamento de Esperanto

BK I

Unua Parto

**Antaŭparolo, Gramatikoj
kaj Ekzercaro**

3a plilarĝita eldono

Berlino 2015

Bernhard Pabst

Berlina Komentario

pri la

Fundamento

de

Esperanto

Unua Parto

**Antaŭparolo, Gramatikoj
kaj Ekzercaro**

Esperanto-Akademio

3a plilarĝita eldono

Berlino 2015

Propono por citado: „Berlina Komentario, vol. I 2015-04, marĝena numero
aŭ „BK I (2015-04), marĝena numero“

Pabst, Bernhard. Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto. Unua Parto – Antaŭparolo, Gramatiko kaj Ekzercaro. 3a plil. eld. Berlino: Esperanto-Akademio 2015.

Stato. 2015-04-12. © Bernard Pabst 2014-2015.

Kontakto: bernhard.pabst[ĉe]gmx.de (anstataŭigu „[ĉe]“ per „@“).

En sama formo aperis Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto. Dua Parto – Vortaro Oficiala. Berlino. 5a eld. stato 2015-04-14. Ambaŭ volumoj estas senkoste elŝutebla de

<http://esperanto-akademio.wikispaces.com/eniro>.

Memore al Helmut Welger (1946-2008)
Iniciinto de Norma Esperantologio

Enkonduko

Centra demando en ĉiu lingvo estas „**kiel oni diras aŭ skribas ĝuste?**“. Ĝi estas la kerno de ĉiu instrua sistemo. Intuice aŭ konscie ĉiu lingvo-uzanto daŭre komparas tion, kion iu *diras*, kun tio, kiel oni *diru* – la faktan lingvo-uzon kun iu „ideala“ modelo. Tiu modelo estas la normo, la aro de lingvaj reguloj, la „leĝoj“ de iu lingvo pri ĝia ĝusta uzo. Sen ili ne eblas decidi, ĉu iu fakta uzo estas bona aŭ malbona, ne eblas doni lerneajn notojn, ne eblas fari ekzamenon pri lingva kapableco.

La **lingva normo** pri ĝusta kaj bona povas esti ŝtata normo. Tiel estas ekzemple pri la ortografiaj reguloj en multaj ŝtatoj. Por atingi unuecan skribadon de la nacia lingvo en administracio kaj lernejoj multaj landoj kreis regulojn pri ortografio kaj faris ilin devigaj por ĉiuj ŝtataj servoj, precipe en instruado. Ekzemploj estas la Imperiestra Germanio, fondita en 1871 per la ortografio de reformo de 1901, soveta Rusio (fondo 1917 – ortografia reformo 1917) aŭ moderna Pollando (1918 – 1936).

La lingva normo ofte ankaŭ estas iu **referenc-verko**. Kelkaj ŝtatoj havas naciajn lingvo-akademiojn, kiuj eldonas „akademiajn vortarojn“, ekz. Hispanio. En Germanio ekzistas vasta konsento, ke en dubaj okazoj oni sekvu la regulojn troveblajn en la privata, komerca, sed tre disvastigita „Vortaro de la Germana Lingvo“, de Konrad Duden. Temas pri „kvazaŭnormo“. La Duden-vortaro ne estas ŝtata leĝo, sed ĝi funkcias simile: Lernanto ĉiam povas argumenti, ke li ne faris „eraron“, ĉar li obeis al la reguloj de Duden. En multaj naciaj lingvoj la normoj (kriterioj pri „ĝusta“ kaj „bona“) ankaŭ estas la „ĝenerala uzo“, kiel ajn oni konstatas ĝin.

Simile kiel ĉe malobeo al ŝtata leĝo, ankaŭ ĉe malobeo al lingva „leĝo“ minacas negativaj konsekvencoj, „**punoj**“ – malsukceso en ekzameno, neakiro de diplomo, deviga ripeto de lerneja jaro k.t.p.

Same kiel ĉiuj lingvoj, ankaŭ Esperanto bezonas kaj havas normon, regulojn, lingvan „leĝon“. Ĉar Esperanto ne estas la oficiala lingvo de iu(j) ŝtato(j), kiu(j) difinas ĝiajn lingvajn normojn, la esperantistoj mem devis kaj ĉiutage denove devas interkonsenti pri tio, kio estas „ĝusta“ Esperanto. La normo de la senŝtata, planita Esperanto estas la verketo nomita „**Fundamento de Esperanto**“. En 1905 ĝi (denove) fiksis la regulojn parte aplikitajn jam de 1887, parte evoluitajn inter 1887 kaj 1905. Ilin ni trovas en la tri partoj Gramatiko, Vortaro kaj Ekzercaro. Nove la Fundamento kreis (nur) kvaran parton, la Antaŭparolon. Ĝi enhavas la bazajn principojn kaj metodojn, laŭ kiuj la normoj de Esperanto daŭre kaj kontinue estu pluevoluigitaj, plukonstruitaj. Lastan fojon tio okazis en 2007. La aktuala versio de la Fundamento do estas sufiĉa nuntempa kaj moderna.

La plej gravan de tiuj principoj ni trovas tuj en la unua frazo de la **Antaŭparolo** (kiu poste ĝin ripetas plurfoje): „**unueco** pli gravas ol ĉia (ŝajna aŭ eĉ vera) pliboniĝo“. Kaj evidente: se ĉiu ŝanĝus la lingvon laŭ sia bontrovo, Esperanto ĥaosigus, ĉesus esti planita lingvo, perdus sian komunikan funkcion kaj sian plej gravan avantaĝon kontraŭ la materie tiel pli fortaj naciaj lingvoj, nome sian eksterordinaran regulecon kaj relativan facilecon.

Por gardi la lingvan unuecon kaj dokumenti la atingitan staton de komuna interkonsento pri ĝusta kaj bona Esperanto, la Antaŭparolo kreis institucion, la nunan **Akademion** de Esperanto. Manke de ŝtata instanco, la Akademio estas kvazaŭ „lingva registaro“ de la memorganizita komunumo de esperantistoj. Laŭ la idealo de la Antaŭparolo ĝi estu la *sol*a „leĝdonanto“ pri ĝusta kaj bona Esperanto (ĝi havas monopolon), samtempe la plej alta „juĝejo“ pri dubaj lingvaj demandoj

kaj la „notario“ de la lingvo. Fakte ĝi daŭrigu la laboron de Zamenhof. Ĝi – ĉiam laŭ la ideoj de la Antaŭparolo – estu neniu alia ol lia institucia posteulo.

Dum ĉ. 100 jaroj, la Akademio fidele plenumis tiujn siajn taskojn - ne ĉiam tute konsekvence kaj ofte pli intuicie ol konscie, sed tamen ĝenerale ja. Ĉu oni prave ankoraŭ povas aserti tion pri la „Akademio“ en la jaro 2014, estas dube (kaj diskutite en ĉi tiu komentario). Ĝia nuntempa fakta stato ofte malkontentiga estis la impulso por verki la **Berlinan Komentaron pri la Fundamento de Esperanto**. Ĝi penas klarigi la normojn pri ĝusta kaj bona Esperanto kaj la vojojn, laŭ kiuj ili kontinue estu adaptitaj al novaj lingvaj defioj, tamen restonta unueca „Esperanto“.

Priskribo de la rolo kaj funkcio de la Fundamento estas relative simpla afero. Zamenhof bezonis nur dekunu mallongajn alineojn en la Antaŭparolo. Ni mem provis resumi ilin sur la paĝo, kiun vi ĵus legis. La detaloj – neeviteble – estas pli kompleksaj. Por klarigi ilin ni tial elektis la formon de **komentario**, do de konsult-verko, kiun oni kutime ne legas de A ĝis Z, sed en kiu oni cel-konscie serĉas respondon al iu specifa konkreta demando. Oni do ne lasu sin fortimigi de la amplekso de la Berlina Komentario (ambaŭ volumoj kune nuntempe havas ĉ. 500 paĝojn). Kvankam ni kompreneble ĝojus, se vi tute legus ĉi tiun unuan parton, vi espereble ankaŭ profitos, se vi – ekz. – nur legas la „**superrigardojn**“, per kiuj multaj ĉapitroj kaj subĉapitroj estas enkondukitaj.

Kion vi **nepre legu**, estas la **Antaŭparolo** kaj la klarigoj pri ĝi. Sen kono kaj kompreno de la Antaŭparolo vi simple havas nur malprecizan ideon pri la lingva esenco de Esperanto. Pro tio ni esperas, ke la Berlina Komentario instigos instruistojn-pedagogojn estontece antaŭvidi ĉapitron aŭ lecionon pri la Antaŭparolo en iliaj lernolibroj kaj kursoj por progresintoj.

Krom la Antaŭparolon tiu ĉi unua parto de Berlina Komentario (ĵargone „**BK I**“) traktas (aŭ espereble iom traktos) ĉiujn aspektojn de la Fundamento, kiuj transpasas la sferon de unuopa vort-elemento. Komentojn pri unuopaj vortoj vi trovas en la dua parto pri la Vortaro Oficiala („**BK II**“). Kontraste BK I komentu la ĝeneralajn aspektojn kaj demandojn de la Bulonja „Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo“, de Antaŭparolo, Fundamenta Gramatiko, Ekzercaro, Universala Vortaro, Akademaj Korektoj, la naŭ Oficialaj Aldonoj, aliaj oficialaj decidoj kaj rekomendoj de la Akademio k.t.p.

Tiu ĉi **unua eldono** de la unua parto BK I ankoraŭ estas fora de tiu celo kaj multloke **ankoraŭ nekompleta**. Kiel ĉiu komentario ĝi estas nur etapo, kaj eĉ nur la unua. Jam ĝi fiksas la bazan strukturon de la verko kaj kelkajn demandojn traktas detale. Por aliaj ekzistas nur la menciitaj „superrigardoj“, por ankoraŭ aliaj apenaŭ pli ol ĉapitro-titoloj. Pro tio la leganto ne miru, ke li ankoraŭ trovas indikojn kiel „[daŭrigota]“ aŭ simile. Ĉar ĝi en la nuna stato aperas nur kiel elektronika publikigaĵo en versio 1.0, estas pli grava la ebleco, ke la legontoj povas jam nun kritike reagi, ol ia (ĉiukaze neniam atingebla) kompleteco. Pri ĉiuj rimarkoj pri misoj kaj mankoj ni jam nun antaŭdankas.

Danki ni volas ankaŭ al tiuj, kiuj per siaj engaĝitaj diskutoj jam pasintece kontribuis al la ekesto de Berlina Komentario, kiel ĝi nun estas. Estas ĉefe la esperantistoj, kiuj kun nin instiga intereso akompanis la serion pri la Fundamento en la retejo „Ipernity“¹. Apartan dankon meritas doktoro Andreas Kück. La ĉapitro pri la Oficialaj Aldonoj en tiu ĉi verko vaste baziĝas sur lia detala tiutema studo².

La demando „**kiel oni diras aŭ skribas ĝuste en Esperanto?**“ en 2014 estas same aktuala, kiel ĝi estis en 1905. Manke de ŝtata subteno Zamenhof trovis tre

¹ Superrigardo en <http://www.ipernity.com/blog/bernardo/232493>.

² Oficialaj Lingvo-Elementoj de Esperanto („OLEO“). 2008.

originalan, tre modernan, kaj daŭre ĝisdatan solvon, kiu distingas Esperanton de plej multaj, eble de ĉiuj aliaj lingvoj – solvo memadministra, demokrata kaj ... fascina.

Malkovru ĝin!

Berlino en Julio 2014

Bernhard Pabst

Resümee (deutsch) – Resumo (germane)

Pabst, Bernhard. Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto. Berlino: Esperanto-Akademio 2012-2015. Zwei pdf im Format A4 zum Download von <http://esperanto-akademio.wikispaces.com/eniro>. Signatur ÖNB, Wien

Bd. 1, 1. Aufl. (2014-07-07), 142 p.: 2032345-C.1

Bd. 2, 3. Aufl. (2014-06-20), 358 p.: 2032345-C.2

Unua Parto – Antaŭparolo, Gramatiko kaj Ekzercaro. [3a eld.] 332 p. (2015-04).

Dua Parto – Vortaro Oficiala. [4a eld.], 358 p. (2015-04).

Jede Sprache hat Normen, ein Regelwerk, anhand dessen beurteilt wird, ob ein Ausdruck in dieser Sprache „richtig“ oder „falsch“ ist. In Nationalsprachen sind dies z.B. staatliche Vorschriften (Gesetze, Verordnungen) zur Rechtschreibung in Behörden und Schulen, ein Wörterbuch einer Sprachakademie, ein allgemein akzeptiertes kommerzielles Werk oder einfach der „Sprachgebrauch“, wie immer er festgestellt wird.

Die geplante Sprache Esperanto verfügt nicht über sie schützende staatliche Einrichtungen. Als Ersatz haben sich Esperanto-Sprecher auf Vorschlag des Sprachinitiators L.L. Zamenhof (1859-1917) schon früh auf ein Regelwerk geeinigt, das „Fundamento de Esperanto“ (1905). Es enthält Regeln, Modelle und Empfehlungen, die definieren, was „richtiges“ Esperanto ist. Darüberhinaus beschreibt es Verfahren zur Auslegung seiner Regeln und zur Weiterentwicklung der Sprache (Öffnungsklauseln). Schließlich hat es Sprachpflegeinstitutionen geschaffen, die heutige „Akademio“, die den einheitlichen Gebrauch des Esperanto sichern und den Konsens darüber, was „richtiges“ Esperanto ist, durch „Oficialaj Aldonoj“ („Amtliche Ergänzungen“ - OA) kontinuierlich erweitern soll. Zuletzt ist dies 2007 geschehen.

Das Fundamento ist eine über 18 Jahre gewachsene, sperrige Expertenlektüre. Es enthält Teile von 1887, dem Jahr der Erstveröffentlichung des Esperanto, (Grammatik - FG), andere von 1893 (Basiswörterbuch - UV), 1898 (Übungen) und 1905 (Verfahren, Auslegung und Organisation). Die Teile sind nicht in jedem Detail kohärent. Grammatik und Wörterbuch sind in historischem, oft nicht mehr gebräuchlichem Französisch, English, Deutsch, Russisch und Polnisch geschrieben. Die Übungen (Ekzercaro – FE) sind zumeist wenig zahlreich und sehr knapp gehalten. Auf Grund der Lückenhaftigkeit des Fundamento sieht der Verfahrensteil (Antaŭparolo – A) ein komplexes System von ergänzend zu berücksichtigenden Quellen vor, insbesondere das Werk Zamenhofs. Hierzu zählen u.a. seine sprachlichen Gutachten (Lingvaj Respondoj – LR) und von ihm verfasste oder kontrollierte Lehr- und Wörterbücher sowie Literaturübersetzungen. Die neun Aldonoj der Akademie (1909-2007) sind teilweise in weiteren Referenzsprachen verfasst (Spanisch, Portugiesisch, Italienisch, Katalanisch). Weder die OA, noch sonstige Entscheidungen der Akademio wurden jemals in die Urfassung von 1905 eingearbeitet. Einen konsolidierten Normtext gab es bisher nicht.

Der im Aufbau befindliche zweibändige Berliner Kommentar zum Fundamento des Esperanto (BK 2012 ff) will ein Nachschlagewerk zu allen Fragen um die „Sprachverfassung“ des Esperanto sein. Der weitgehend abgeschlossene zweite Teil (BK II) beinhaltet die ca. 5000 offiziellen Wortelemente. Er bringt erstmals einen konsolidierten Text des aktuellen „amtlichen Wörterbuchs“ (Vortaro Oficiala – VO) und erläutert Herkunft, Bedeutung und Zweifelsfragen einzelner „Wörter“. Der derzeit noch lückenhafte erste Band (BK I) behandelt Grammatik, Übungs- und Verfahrensteil sowie lexikalische Fragen, die über die Sphäre einzelner

Wortelemente hinausgehen und z.B. Wortgruppen oder die Entstehung der OA betreffen. Zielgruppe sind fortgeschrittene Esperanto-Sprecher, die sich rasch über den offiziellen Stand einzelner Fragen zum „richtigen“ Sprachgebrauch informieren wollen.

Der Berliner Kommentar ist überzeugt, dass das Fundamento nach wie vor unverzichtbare und sehr hilfreiche Grundlage zum einheitlichen Gebrauch der Sprache ist. Seine Prinzipien sind überraschend modern und zeitlos. Zahlreiche „ewige“ Diskussionen im Esperanto, die zum Teil schon in dessen Frühzeit vor dem ersten Weltkrieg geführt wurden und bis heute mit weitgehend gleichen Argumenten geführt werden³, lassen sich bei konsequenter Anwendung des Fundamento und insbesondere seiner Interpretationsregeln im Antaŭparolo relativ einfach lösen. Eine Rückbesinnung auf die Erfolgsgeschichte des Fundamento und die (Re-)popularisierung seiner Inhalte und Grundentscheidungen erscheinen wünschenswert und geboten.⁴

Antaŭparolo al la 3a eld. Aprilo 2015

La plej okulfrapa novaĵo de tiu ĉi eldono de Aprilo 2015 estas, ke ni per bluaj kestoj grafike disigis citaĵojn (ekzemple la tekstojn de la Lingvaj Respondoj) de niaj propraj komentoj. Ni esperas, ke tio faciligas rapidan konsultadon. Baza listo de la literaturo konsultita de ni, kiu ankoraŭ mankas en la eld. de Sept. 2014, intertempe estas aldonita.

Enhaven multaj demandoj nun estas traktitaj per ekspertizetoj por la unua fojo, ekzemple:

- R 0: ĉu h-skribo kiel ordinara skribo anstataŭ diakritoj?
- R 2.1: personaj nomoj de virinoj je –a (*Marta, Sara*).
- R 5, FE 16.2: ci, cia
- R 6.2ĉ: Ĉu „–us pro ĝentileco“?
- k.a.

Pliaj dokumentoj estis aldonitaj al BK I, i.a. la *Berlina Manifesto por la Unueco de Esperanto* de Julio 2014. Ĝi nun ankaŭ troveblas en la nova retejo de la Berlina Komentario (adreson vd. en la kolofono).

La unua kaj dua volumo de la Berlina Komentario, BK I kaj BK II, formas ne disigeblan paron. Aldonoj en unu parto kutime ankaŭ eĥas en la alia. Tiel ekzemple pluraj Lingvaj Respondoj, ĝis nun provizore notitaj ĉe unuopaj vortoj en BK II nun trovis sian pli taŭgan kaj definitivan lokon en BK I (nome tiuj Respondoj, kiuj koncernas pli ol unu vorton, t.e. tutan vort-grupon).

Kiel en la pasinteco, la instigo trakti temon ekestis pro diskutoj en internet-forumoj, okaze ankaŭ pro recenzado de esperantologia literaturo (ekz. de la *Leksikaj Vagadoj* de la iama akademiano kaj nuna akra kritikanto de la Akademio André

685

³ Einige Beispiele: Gebrauch des „ŭ“ vor Vokalen? – Ergänzung der Tabelwörter durch die Reihe aliu, alio usw.? – Esperantisierung von Eigennamen? – Bedeutung der passiven Partizipien –at und -it? – Übernahme von Fremdwörtern oder Eigenbildung für neue Begriffe? usw.

⁴ In deutscher Sprache s. nunmehr auch: **Pabst**, Bernhard. Das Fundamento als Maßstab sprachlicher Richtigkeit im Esperanto. In: **Brosch**, Cyril; **Fiedler**, Sabine (Hrsg.). Beiheft 21 „Interlinguistik im 21. Jahrhundert“. Beiträge der 23. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 29. November 2013 – 01. Dezember in Berlin. Berlin: GIL 2014, S. 45-60. – Im Internet auf www.interlinguistik-gil.de.

Cherpillod el 2012). La temoj estas do ĉerpitaj el la lingva praktiko kaj *neniel* kabinetaj teoriaĵoj. Al ĉiuj seriozaj diskutantoj ni sincere dankas.

La „Akademio de Esperanto“ mem en la pasinta duona jaro pri Esperanto nenion komunikis al la publiko. Male ĝi nun eĉ rifuzas publike diskuti kun la esperantistoj⁵. Ĝi okupas sin pri sia nova statuto. La malneto de la reform-propono, verkita de la prezidanto Christer Kiselman kaj la sekretario Renato Corsetti kaj publikigita en Dec. 2014, formovos tiun cirklon eĉ pli de la Fundamentaj taskoj de „aŭtoritata centra institucio“.

Berlino en Aprilo 2015

Bernhard Pabst

Antaŭparolo al la 2a eld. Septembro 2014

Ĉi tiu dua eldono de la Berlina Komentario - Parto Unua havas preskaŭ duoblan amplekson kompare al la unua. Multaj el la „eternaj“ diskutoj pri lingva ĝusteco de Esperanto jam estas traktata. Tamen BK I ne volas konkurenci kun la gvidaj gramatikoj PAG 1985 kaj PMEG 2013. Ili havas alian aliron, nome *priskribas* Esperanton, kiel ĝi – laŭ la impresoj de siaj aŭtoroj – fakte estas. Multloke ambaŭ gramatikoj ne severe distingas inter la diversaj gradoj de devigececo, kiun *preskribas* la Fundamento (oficiala, Akademia, Zamenhofa, antaŭfundamenta, postfundamenta, aliaj aŭtoroj), sed miksas la diversajn nivelojn. Same bedaŭrinde ankaŭ faras la Akademio, ekz. en OI 19 de 2012-07-13⁶. BK kontraste klopodas konsekvence apliki la regulojn troveblajn en la Deklaracio pri la esenco de la esperantismo kaj la Antaŭparolo al la Fundamento. Pri multaj demandoj ĝi venas al samaj rezultoj, tamen kun pli Fundament-bazita argumentado.

Pro la specifa strukturo de Esperanto ĉiuj vortelementoj inkluzive de la afiksaro kaj gramatikaj markiloj estas aparte listigeblaj kaj listigitaj en la Vortaro Oficiala („vortara lingvo“). Pro tio la sama temo ofte estas plurloke traktita en la Fundamento kaj ekestas la demando, kie (ĉefe) trakti ĝin en la Komentario. La diskuto pri la landnomoj ekzemple rilatas al § 15 Gramatiko, al la afikso –uj, klarigita en § 40 Ekzercaro kaj en UV je –uj, krome al la diversaj rekomendoj de la Akademio pri landnomoj. La paralelaj formoj je –ĥ- aŭ –k- (arĥitekturo / arkitekturo) rilatas (almenaŭ) al la oka alineo de la Antaŭparolo (formoj novaj), al la alfabeto (FG 0, FE 1), al la 8a Oficiala Aldono kaj al UV. Kie la konsultonto intuitive serĉos kaj atendas klarigojn? Unu sola respondo en tiuj kaj multaj aliaj okazoj ne eblas. Ĝenerale ni ĉefe traktas temojn tie, kie ili laŭ la ordo de la Fundamento estas aparte traktita por la unua fojo, la ĥ/k-formojn pro tio ĉe A 8, la landnoman diskuton ĉe FE 40, kiu klarigas la uzon de –uj. Ĉe la aliaj eblaj pozicioj ni laŭforte enigis referencojn al tiu ĉefa artikolo. Neeviteble tamen ekestis (parte) duoblaj klarigoj en diversaj partoj. Inverse la manko de plusendo ne necese signifas, ke pri iu temo ne estas troveblaj klarigoj aliloke, kadre de alia aspekto. Povas do esti helpa serĉi en ambaŭ partoj de la Komentario kaj en BK I sub diversaj ŝlosilvortoj.

Berlino en Septembro 2014

Bernhard Pabst

685

⁵ Vd. la ne-datitan „Informon pri la fermo de la listo AdE-diskuto“ en la retejo de AdE kaj pri la fono la komenton „Akademio plendas, ke esperantistoj citas la Fundamenton“ de 2014-03-11 en la blogo de Bernardo en www.ipernity.com.

⁶ Pri la demando „La gazetoj ne trovas necesa [aŭ ĉu necese?] eniĝi en tion, pri kio ili skribas.“

Superrigarda Enhavo

Unua Libro: Bulonja Deklaracio, Antaŭparolo (BD, A)

A.	Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo (1905)	31
B.	La Fundamento - Enkonduko	39
C.	Antaŭparolo (1905)	46
D.	La Akademio	75

Dua Libro: Fundamenta Gramatiko (FG)

A.	La Fundamenta Gramatiko	99
B.	§ 0 [Alfabeto]	105
C.	§ 1 [Artikolo]	124
D.	§ 2 [Substantivo]	127
E.	§ 3 [Adjektivo]	131
F.	§ 4 [Numeraloj]	137
G.	§ 5 [Pronomoj]	142
H.	§ 6 [Verbo]	153
I.	§ 7 [Adverbo]	174
J.	§ 8 [Prepozicio]	177
K.	§ 9 [Prononco]	178
L.	§ 10 [Akcento]	183
M.	§ 11 [Kunmetitaj vortoj]	187
N.	§ 12 [Negacio]	206
O.	§ 13 [Direkto]	207
P.	§ 14 [Prepocizio]	210
Q.	§ 15 [Fremdaj vortoj]	214
R.	§ 16 [Apostrofado]	242

Tria Libro: Fundamenta Ekzercaro (FE)

A.	La Fundamenta Ekzercaro (FE 1898)	247
B.	Analizo laŭ lecionoj	261
C.	Unuopaj aspektoj	302

Kvara Libro: Universala Vortaro, Oficialaj Aldonoj (UV, OA)

A.	La Universala Vortaro (UV)	309
B.	La Akademiaj Korektoj de la Universala Vortaro	335
C.	Oficialaj Aldonoj (OA 1909-2007)	337
D.	Baza Radikaro Oficiala (BRO 1975)	364
E.	Unuopaj Aspektoj de la Vortaro Oficiala	370

Kvina Libro: Zamenhofa Stilo, Misinterpretoj (Z)

A.	Zamenhofa lingvaĵo	377
B.	Kelkaj misinterpretoj kaj devioj de la Fundamento	382

Berlina Komentario – Dua Parto (BK II):

Vortaro Oficiala (VO) - vd. apartan volumon

Detala Enhavo

Unua Libro: Bulonja Deklaracio, Antaŭparolo (BD, A)

A.	Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo (1905)	31
I.	Superrigardo.....	31
II.	La norm-hierarkio de Esperanto.....	31
III.	Analizo laŭ alineoj.....	32
1.	Alineo 1: [Difino de Esperantismo].....	32
2.	Alineo 2: [Esperanto kiel solvo de „lingvo neŭtrale homa“].....	33
3.	Alineo 3: [Principo de egaleco kaj „la bonaj verkistoj“].....	33
4.	Alineo 4: [La Fundamento kiel ĝenerala interkonsento]	34
5.	Alineo 5: [Difino de „esperantisto“].....	37
6.	Projektitaj, sed de la Kongreso ne aprobitaj alineoj.....	37
B.	La Fundamento - Enkonduko	39
I.	Superrigardo.....	39
1.	La rolo kaj funkcio de la Fundamento	39
2.	La kvar partoj de la Fundamento	39
3.	Principa samrangeco de FG, FE kaj UV – la „ideoj“ de A	39
4.	Kunbinditaj eksterfundamentaj tekstoj	39
II.	Interpret-helpaj, eksterfundamentaj dokumentoj.....	41
1.	Enkonduko	41
2.	Lingvaj Respondoj (sep eldonoj 1910-1990)	42
3.	Vortaro Esperanto-Franca de De Beaufront (Beau 1901).....	44
4.	La germanaj vortaroj (EG 1, EG 2, GE 1, GE 2)	45
C.	Antaŭparolo (1905)	46
I.	Superrigardo.....	46
II.	Analizo laŭ alineoj	46
1.	Alineo 1: [Defioj kaj rimedo – netuŝebla interkonsento]	46
2.	Alineo 2: [De silenta al eksplicita komuna interkonsento].....	47
3.	Alineo 3: [„Oficiala“ (deviga) kontraŭ „privata“ (nur rekomendita)]	48
4.	Alineo 4: [Interpretado per kunteksta komparo].....	48
5.	Alineo 5: [Fundamento kiel gvida kontrol-dokumento].....	53
6.	Alineo 6: [Evoluipovo malgraŭ netuŝebleco]	54
7.	Alineo 7: [„Novaj vortoj“]	54
8.	Alineo 8: [„Formoj novaj“].....	55

9.	Alineo 9: [Monopolo por plivastigo de la Fundamento - efektiva neceseco].....	59
10.	Alineo 10: [Resumo]	60
11.	Alineo 11: [Propono al UK 1; la „ideoj“ de la Antaŭparolo]	60
III.	Lingvaj Respondoj de Zamenhof pri la Fundamento.....	63
IV.	„Prauloj“ de la Antaŭparolo.....	64
1.	Antaŭparolo al la Fundamenta Krestomatio 1903.....	64
2.	Aldono al la Dua Libro [DL-Ald 1888].....	65
V.	Cirkulera Letero al la ... LK pri Neologismoj (1906).....	69
	I-a Parto.....	69
	II-a Parto.....	69
D.	La Akademio	75
I.	Superrigardo	75
II.	Ekesto de la lingvaj institucioj.....	75
1.	1889 – La planita „Tutmonda Ligo de Esperantistoj“ (TLE)	75
2.	1905 – „Lingva Komitato“ (LK).....	76
III.	„Institucio“	78
1.	Jura statuso.....	78
2.	„Institucio“ en la senco de la Antaŭparolo.....	79
IV.	„Aŭtoritata“ Institucio	79
1.	Superrigardo.....	79
2.	„Interna“ aŭtoritato	79
3.	„Ekstera“ aŭtoritato	80
V.	„Centra“ Institucio	80
VI.	Zamenhof pri la rolo de la Akademio	81
VII.	La Statutoj de la Akademio.....	83
1.	Superrigardo.....	83
2.	Analizo de la Statuto de 2009	83
3.	La „Propono pri nova Statuto“ de Dec. 2014.....	88
VIII.	Periodaĵoj kaj publikigaĵoj de la Akademio	88
IX.	Oficialaj Tekstoj ne troveblaj en la retejo de la Akademio.....	90
X.	Membroj de Lingva Komitato kaj Akademio.....	90
XI.	Ĉu la Akademio en 2014 agas kiel ACI en la senco de la Antaŭparolo?	92
1.	Indicoj kontraŭaj.....	92
2.	Berlina Manifesto por la Unueco de Esperanto.....	92
3.	Propono por Fundament-konforma Statuto de la Akademio	94

Dua Libro: Fundamenta Gramatiko (FG)

A.	La Fundamenta Gramatiko	99
I.	Superrigardo.....	99
II.	La „tri kolonoj“ de la relativa facileco de Esperanto	99
III.	La Strukturo de la Gramatikoj.....	102
IV.	La lingvaĵo de la Gramatikoj.....	103
V.	La nekompleteco de la Gramatikoj.....	103
B.	§ 0 [Alfabeto]	105
I.	Tekstoj de la Gramatikoj kaj FE 1.....	105
II.	Superrigardo.....	106
III.	Diskutataj aspektoj de la alfabeto.....	108
1.	La majuskloj	108
2.	La diakritaj literoj	108
3.	Kombinebleco de la 28 literoj.....	109
IV.	La 11a litero „ĥ“	109
V.	La 12a litero „ĵ“	110
VI.	La 25a litero „u“	110
VII.	La 26a litero „ŭ“	110
1.	Prononco de „ŭ“	110
2.	Ĉu la 26a litero „ŭ“ simbolas la sonon [w]?.....	111
3.	Ĉu „ŭ“ nur post vokaloj?.....	111
VIII.	La 27a litero „v“	114
IX.	Statistikoj pri literofteco	114
X.	Surogataj skriboj (ch, cx, c^ k.s. anstataŭ ĉ).....	114
1.	h/u-surogata skribo	114
2.	Ĉu h/u-skribo kiel ordinara skribo anstataŭ diakritoj?.....	117
3.	Teknikaj surrogataj skriboj (-x-, ^, morsa, brajla k.t.p.).....	121
XI.	La neesperantaj literoj q, x, y.....	122
XII.	La neesperanta litero w	123
C.	§ 1 [Artikolo]	124
I.	Tekstoj de la Gramatikoj.....	124
II.	Komentoj.....	124
1.	Superrigardo	124
2.	Difinita artikolo (R 1.1 – la, l')	125
3.	Nedifinita artikolo (R 1.2 „ne ekzistas“).....	126
D.	§ 2 [Substantivo]	127

I.	Tekstoj de la Gramatikoj	127
II.	Tekstoj de Ekzercaro kaj UV	128
III.	Komentoj.....	128
1.	Superrigardo.....	128
2.	R 2.1 (o-markilo, nominativo)	129
3.	Substantivoj sen la markilo –o	129
4.	R 2.2 (j-markilo, pluralo).....	130
5.	R 2.3 („Kazoj ekzistas nur du“)	130
6.	R 2.3-4 (n-markilo, akuzativo).....	130
E.	§ 3 [Adjektivo]	131
I.	Fundamentaj Tekstoj.....	131
II.	Komentoj.....	131
1.	R 3.1 („-a“)	131
2.	R 3.4 („el“).....	136
3.	R 3.4-5 („ol“)	136
F.	§ 4 [Numeraloj]	137
I.	Fundamentaj Tekstoj el 1905	137
II.	OA 8 pri „nul“ (aldono al R 4.1).....	138
III.	Deklinaciaj numeraloj	138
IV.	Komentoj.....	139
1.	Superrigardo.....	139
2.	R 4.1: Arabaj ciferoj.....	139
3.	Fermita listo de numeraloj	139
4.	„nul“	139
5.	R 4.4 (“obl“)	139
6.	R 4.5 („on“)	139
7.	R 4.6 („op“)	139
8.	R 4.7 („po“)	140
9.	Kompleksaj numeraloj	140
10.	Pri la dato	140
11.	Pri la indiko de la horo	141
G.	§ 5 [Pronomoj]	142
I.	Fundamentaj Tekstoj.....	142
1.	Gramatikoj	142
2.	Ekzercaro kaj UV pri „ci“	142
II.	Komentoj.....	143
1.	R 5.1: Fermita listo de pronomoj.....	143

2.	Apudmetitaj personaj pronomoj („li-ŝi“, „ŝi-li“ k.t.p.)	143
3.	R 5.1: Senpersona „ĝi“	143
4.	Pri „si“ kaj „sia“ (refleksivaj pronomoj)	143
5.	„ci“, „cia“ (FE 16.2).....	149
6.	Pri la „vortoj kun senco pronoma“ (iu, kiu, tiu, ĉiu, neniu).....	152
H.	§ 6 [Verbo]	153
I.	Gramatikoj	153
II.	Ekzercaro kaj Universala Vortaro.....	156
III.	Komentoj	156
1.	Superrigardo	156
2.	R 6.2 lit. ĉ (us)	157
3.	R 6.2 lit. f (ant)	159
4.	R 6.2 lit. g (int)	159
5.	R 6.2 lit. ĝ (ont).....	159
6.	R 6.2 lit. h-ĥ: La ata/ita-disputo („aspektismo“ – „tempismo“).....	159
7.	R 6.4-5 [„de“ post pasivaj participoj].....	172
I.	§ 7 [Adverbo]	174
I.	Tekstoj.....	174
1.	Gramatikoj.....	174
2.	Aliaj partoj de la Fundamento	174
3.	Lingvaj Respondoj.....	174
4.	Dua Libro 1888 (eksterfundamenta interpret-helpo).....	175
II.	Komentoj.....	175
1.	Superrigardo	175
2.	Derivitaj adverboj (e-vortoj).....	175
3.	Simplaj adverboj.....	175
J.	§ 8 [Prepozicio]	177
I.	Gramatikoj	177
II.	Komentoj.....	177
K.	§ 9 [Prononco]	178
I.	Gramatikoj	178
II.	Komentoj.....	178
1.	Superrigardo	178
2.	Prononco de „c“, „ĉ“, „ĝ“	180
3.	LR 70 (1893) [Prononco de „i“ kontraste al „j“].....	180
4.	LR 70 (1893) [Prononco de „u“ kontraste al „ŭ“].....	180
5.	LR 69 B (1888), LR 69 A (1889), LR 70 (1893) [Prononco de „ŭ“]... 180	

6.	LR 71 B (1912) [Prononco de „v“].	180
7.	Duoblaj konsonantoj („nonoismo“)	180
8.	–dĝ– kaj –tĉ– (budĝeto, matĉo)	181
9.	– dz – (frandzi)	181
10.	pf- (pfenigo)	181
11.	–h– (Budho, budhismo)	181
12.	R 9 en kunludo kun R 16.1	181
13.	–ngk– (nazaloj, Hongkongo - Honkongo)	181
14.	–ts– (Botsvano – Bocvano)	182
15.	Evitstrategioj	182
L.	§ 10 [Akcento]	183
I.	Gramatikoj	183
II.	Komentoj	183
M.	§ 11 [Kunmetitaj vortoj]	187
I.	Fundamentaj Tekstoj	187
1.	Gramatikoj	187
2.	UV (enkonduko 2)	188
3.	FE 27	188
4.	Dua Libro 1888 (eksterfundamenta interpret-helpo)	189
II.	Komentoj	189
1.	Superrigardo	189
2.	Historio de la disputoj pri vortfarado	190
3.	La Akademiaj „Konstatoj“ pri la vortfarado	192
4.	Kritiko de la metodo, laŭ kiu la Akademio venis al la „Konstatoj“	200
5.	Devioj inter la bazaj formoj en VO kaj la interpreto en BRO /AV....	203
6.	Aliaj modeloj por klarigi la esperantan vortfaradon	204
7.	Malkoheraĵoj pri la vort-kategorioj en VO	204
8.	Principo de sufiĉo kaj neceso	204
9.	Elinterna aŭ ekstera vortuzo (skemismo – naturalismo)	205
N.	§ 12 [Negacio]	206
I.	Fundamentaj Tekstoj	206
II.	Ekzercaro (FE 28.9 – 11)	206
III.	Komentoj	206
O.	§ 13 [Direkto]	207
I.	Fundamentaj Tekstoj	207
II.	Komentoj	207
1.	Superrigardo	207

2.	Rolvortetoj sekvata de direkto-indikilo –n	208
3.	Ĉu direkto-indikilo post „ekster“?	209
P.	§ 14 [Prepocizio]	210
I.	Fundamentaj Tekstoj.....	210
II.	Superrigardo.....	211
III.	Analizo laŭ frazoj	212
1.	R 14.1 („difinita kaj konstanta signifo“).....	212
2.	R 14.2 („je“)	212
3.	R 14.3 – R 14.4 (motivoj por „je“).	212
4.	R 14.5 (n-markilo anstataŭ „je“)	213
Q.	§ 15 [Fremdaj vortoj]	214
I.	Fundamentaj Tekstoj.....	214
II.	Komentoj.....	215
1.	Superrigardo	215
2.	R 15.1 („vortoj fremdaj“).....	216
3.	R 15.2 („pli bone“).	220
4.	R 15 – permeso, sed ne devigo	221
5.	R 15 en la kompreno de Zamenhof.....	221
6.	Elekstera kaj elinterna lingvaĵo ĉe Zamenhof (R 15 kontraŭ R 11)	221
7.	Testo de <i>Kück</i> pri internacieco en la senco de R 15	224
8.	Testo de <i>Derks</i> pri internacieco en la senco de R 15	224
9.	Propraj nomoj	225
10.	Etimologie identigeblaj afiksoj	234
11.	Analoga apliko de R 15 (internaciaj simboloj)	237
12.	Studoj pri esperantigo de vortoj fremdaj laŭ devenlingvoj	239
13.	Anekso: Indiko de fremdlingvaj sonoj per esperantaj literoj.....	239
R.	§ 16 [Apostrofado]	242
I.	Fundamentaj Tekstoj.....	242
1.	§ 16 Gramatikoj	242
2.	Ekzercaro kaj UV.....	242
II.	Eksterfundamentaj interpret-helpoj	242
1.	Kromdeklaro pri la nomoj Zamenhof kaj Vaŝington (OI 22 de 2013) 242	
2.	Lingvaj Respondoj 84 A - C	243
III.	Komentoj	243
1.	Tekst-historio	243

Tria Libro: Fundamenta Ekzercaro (FE)

A.	La Fundamenta Ekzercaro (FE 1898)	247
I.	Superrigardo	247
1.	Eldon-historio	247
2.	La Dua Libro (DL 1888), la „Pra-Ekzercaro“	247
II.	La tekst-specoj de la Ekzercaro.....	254
1.	Alfabeto (§ 1 FE).....	254
2.	Ekzercoj de legado (§§ 2 – 4 FE)	254
3.	Ekzerco-frazoj.....	255
4.	Gramatikaj reguloj.....	255
5.	Interpret-reguloj.....	255
6.	Lecion-finaj vort-listoj	255
7.	Vortoj ekster la lecion-finaj vortlistoj, precipe propraj nomoj.....	256
8.	Literaturaĵo: La Feino.....	256
9.	Proverboj kaj sentencoj.....	260
B.	Analizo laŭ lecionoj	261
1.	La kvazaŭa antaŭparolo de la Ekzercaro.....	261
2.	§ 1 - ALFABETO.....	262
3.	§ 2 - Ekzerco de legado.....	263
4.	§ 3 - Ekzerco de legado.....	263
5.	§ 4 - Ekzerco de legado.....	264
6.	§ 5 [R 1 – artikolo]	264
7.	§ 6 [R 1 – artikolo]	265
8.	§ 7 [R 2: deklinacio, R 8: prepozico kun nominativo]	265
9.	§ 8 [R 2: deklinacio, R 8: prepozico kun nominativo]	265
10.	§ 9 [R 2 – substantivo: pluralo, akuzativo].....	265
11.	§ 10 [R 3 – adjektivo]	266
12.	§ 11 La feino.....	266
13.	§ 12 [R 4 – numeraloj].....	266
14.	§ 13 La feino (Daŭrigo)	267
15.	§ 14 [R 4 – numeraloj: da, -obl, -on, -op, po]	267
16.	§ 15 La feino (Daŭrigo)	268
17.	§ 16 [R 5 – personaj pronomoj].....	268
18.	§ 17 La feino (Daŭrigo)	269
19.	§ 18 [Pronomoj: deklinacio; si, sia]	269
20.	§ 19 La feino (Daŭrigo)	270

21.	§ 20 [R 6: -as, -is, -os, -us, -u, -i].....	270
22.	§ 21 La feino (Daŭrigo).....	270
23.	§ 22 [R 6: -anto, -into, -onto, -ato, -ito, -oto].....	270
24.	§ 23 La feino (Fino).....	271
25.	§ 24 [R 6: verboj –as, -is, -os]	271
26.	§ 25 [R 6: -at, -it, -ot; R 7: adverboj]	271
27.	§ 26 [R 13: -n por indiki direkton; R 8, R 14; R 6, interjekcioj]....	272
28.	§ 27 [R 1: artikolo, R 16: apostrofado, R 11: kunmetado]	273
29.	§ 28 [R 8: prepozicioj, R 13: direkto kun -n, R 12: neado].....	273
30.	§ 29 [R 14 – „je“ aŭ n-markilo].....	274
31.	§ 30 [Tabelvortoj, korelativoj]	274
32.	§ 31 [R 11: Ŝanĝo de vortkategorioj, kunmetaĵoj]	277
33.	§ 32 [R 11: -ist', da].....	278
34.	§ 33 [R 11: mal-, -in].....	279
35.	§ 34 [R 11: -il, -ar]	280
36.	§ 35 [R 11: -aĵ, -ec, „nelogikaj“ esprimoj]	281
37.	§ 36 [R 11: ge-, bo-, -id, edz]	281
38.	§ 37 [R 11: -an, -estr, -ist, -ul].....	284
39.	§ 38 [R 11: -et, -eg, -ĉj, -nj]	287
40.	§ 39 [R 11: -iĝ, -ig]	288
41.	§ 40 [R 11: -ad, ek-, -ej, -uj, -ing].....	289
42.	-uj kiel indikilo por land- aŭ provincnomoj	291
43.	§ 41 [R 11: -ebl, -ind, -em, -er].....	300
44.	§ 42 [R 11: -um; alparolo; resumo: „sano“].....	300

C. Unuopaj aspektoj 302

I.	Interpunkcio.....	302
1.	Superrigardo	302
2.	Uzo de unuopaj interpunkciaj signoj.....	303
II.	Religia lingvaĵo en Ekzercaro kaj Fundamento	304
III.	Eblaj alludoj al personaj kaj familiaj cirkonstancoj	305
IV.	Cenzuro	305

Kvara Libro: Universala Vortaro, Oficialaj Aldonoj (UV, OA)

A. La Universala Vortaro (UV) 309

I.	Enkonduka teksto al UV.....	309
II.	Superrigardo.....	310
III.	Fremdaj vortoj laŭ R 15 FG.....	310

IV.	Propraj nomoj en la Fundamento.....	311
1.	Personaj nomoj	312
2.	Familiaj nomoj	314
3.	Religiaj kaj mitologiaj nomoj	314
4.	Geografiaj nomoj (toponimoj)	314
V.	Mezurunuoj en UV	314
VI.	Majuskloj kaj minuskloj	315
1.	Tagoj, monatoj, sezonoj.....	315
2.	Landanoj kaj adjektivoj derivitaj de etnonomoj	315
3.	Religiaj festoj kaj personoj	317
4.	Honoraj titoloj.....	317
VII.	Vortoj uzataj ĝenerale en pluralo	318
VIII.	Enhavaj (semantikaj) ŝanĝoj	319
IX.	Mallongigoj en la Fundamento	319
1.	Superrigardo.....	319
2.	Akronimoj	320
X.	Vortinternaj ellasoj (aŭtomobilo – aŭto)	322
XI.	Idiotismoj kaj esperantismoj	323
XII.	La referenc-lingvoj de la Fundamento	324
1.	Superrigardo.....	324
2.	La franca	324
3.	La angla	326
4.	La germana	328
5.	La rusa	330
6.	La pola	330
XIII.	Aliaj lingvoj kun ebla influo sur la VO.....	331
1.	Greka antikva.....	332
2.	Jida.....	332
3.	Hebrea.....	333
4.	Hispana	333
5.	Latina	333
6.	Litova	333
7.	Okcitana.....	333
8.	Volapuko.....	333
B.	La Akademiaj Korektoj de la Universala Vortaro	335
I.	Ekesto kaj interpreta valoro	335
II.	Pri la unuopaj Akademiaj Korektoj.....	335

1.	Francaj AK (1914 / 1922).....	335
2.	Anglaj AK (1914 / 1922).....	335
3.	Germanaj AK (1914 / 1923)	335
4.	Rusaj AK (1914 / 1923).....	336
5.	Polaj AK (1914 / 1923).....	336
C.	Oficialaj Aldonoj (OA 1909-2007)	337
I.	Superrigardo.....	337
II.	La 1-a Oficiala Aldono de 1909 (OA 1)	338
1.	Enkonduko	338
2.	Prezent-maniero.....	338
3.	La francaj tradukoj en OA 1.....	338
4.	La anglaj tradukoj en OA 1	339
5.	La germanaj tradukoj en OA 1	339
6.	La rusaj tradukoj en OA 1	340
7.	La polaj tradukoj en OA 1	340
8.	La neklara noto ĉe <i>astrolog'</i> (fako-aganto-paroj)	340
III.	La 2-a Oficiala Aldono de 1919 (OA 2)	341
1.	Superrigardo	341
2.	Unua listo de OA 2 (OA 2.1).....	341
3.	Dua listo de OA 2 (OA 2.2).....	343
IV.	La sufikso <i>ism'</i> (1919).....	344
1.	Superrigardo	344
2.	Preparaj dokumentoj	345
3.	Kritiko	345
V.	La 3-a Oficiala Aldono de 1921 (OA 3).....	347
1.	Superrigardo	347
2.	Ortografiaj misoj en la referenc-lingvoj hispana, portugala kaj pola 348	
VI.	La 4-a Oficiala Aldono de 1929 (OA 4).....	350
VII.	La elemento „mis-“ (1929).....	352
VIII.	La 5-a Oficiala Aldono de 1934 (OA 5).....	354
1.	Fontoj de OA 5 de 1934 kaj OA 6 de 1935	354
2.	OA 5 de 1934	354
IX.	La 6-a Oficiala Aldono de 1935 (OA 6).....	355
1.	Fontoj de OA 5 de 1934 kaj OA 6 de 1935	355
2.	OA 6 de 1935	355
X.	La elemento „end“ (1952).....	355

XI.	La 7-a Oficiala Aldono de 1958 (OA 7)	356
1.	Ĝeneralaj informoj.....	356
2.	Deklaroj pri Fundamenteco	356
XII.	La 8-a Oficiala Aldono de 1974 (OA 8)	360
XIII.	La 9-a Oficiala Aldono de 2007 (OA 9)	361
D.	Baza Radikaro Oficiala (BRO 1975)	364
E.	Unuopaj Aspektoj de la Vortaro Oficiala	370
I.	„Eraroj“ en la Vortaro Oficiala	370
II.	„Kaŝitaj“ neoficialaj vortoj en la Vortaro Oficiala.....	370

Kvina Libro: Zamenhofa Stilo, Misinterpretoj (Z)

A.	Zamenhofa lingvaĵo	377
1.	Superrigardo.....	377
2.	Diversaj Gradoj de Zamenhofeco.....	377
B.	Kelkaj misinterpretoj kaj devioj de la Fundamento	382
I.	Superrigardo	382
II.	Optimala Esperanto-Ortografio (O.E.O., 1978).....	382
III.	Analiza Skolo (1973, 1985).....	382
IV.	Itismo, Piĉismo	384
V.	Meta-gramatika interpreto (1990)	384
VI.	Bonlingvismo (1989)	385

Berlina Komentario – Dua Parto (BK II):

Vortaro Oficiala (VO) - vd. apartan volumon

Literaturo

La listo notas nur la ĉefajn konsultverkojn. Pliaj indikoj pri faka literaturo troveblas komence de la koncernaj ĉapitroj.

Artikoloj en periodaĵoj estas cititaj laŭ la formato „jaro:volumo:kajero, paĝo[j]“, ekz. „L'Espérantiste 1901:04:48 (de 1901-12-31), p. 291-294“, t.e. L'Espérantiste, 4a jaro 1901, n-ro 48 de la 31a de Decembro 1901, paĝoj 291 ĝis 294.

Pliajn fontojn vd. en la ĉapitro „Literaturo“ en BK II.

Aktoj I (1968). Aktoj de la Akademio 1963-1967. s.l. [presejo en Rotterdam] s.j. [1968],

Aktoj II (1975). Aktoj de la Akademio 1968-1974. s.l. [presejo en Blackburn] s.j. [1975].

Aktoj III (1992). Aktoj de la Akademio 1975-1991. s.l. [presejo en Sablé-sur-Sarthe]. 1992.

Cherpillod, André (2012). Leksikaj Vagadoj. Courgenard: La Blanchetière 2012.

EBEA. [Pabst, Bernhard]. Elektronika Bibliografio de Esperantaj Artikoloj. En: <http://www.esperantoland.org/ebea/>.

EdE (1933-1934). Enciklopedio de Esperanto. 2 vol. Budapesto: Literatura Mondo 1933-1934.

EeP (1974). Lapenna, Ivo; Lins, Ulrich; Carlevaro, Tazio (red.). Esperanto en Perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo. 1974.

Göhl, Hermann (1932). Ausführliche Sprachlehre des Esperanto. Lehr- und Nachschlagewerk für Fortgeschrittene. Berlin 1932. Fotomekanika repr. Berlin [Orienta] 1973.

LD. [Itô Kanzi (ed.)]. Ludovikologia Dokumentaro. s.l.: editoro. – cit. laŭ volumoj kaj ties aperjaroj, ekz. LD XV (1996) = repr. de la periodaĵo L'espérantiste 1901-1902.

LI. Lingvo Internacia. Periodaĵo. Repr. en LD.

Lippmann, Walter (1921). Dr. Zamenhofs Sprachliche Gutachten. Lingvaj Respondoj in deutscher Bearbeitung mit Ergänzungen und Erläuterungen. Leipzig 1921. Senŝanĝa repr. Saarbrücken 1984.

LR (1992). Waringhien, G[aston] (ed.). Zamenhof L.L. Lingvaj Respondoj. Konsiloj kaj Opinioj pri Esperanto. 7a eld. s.l. 1990 (PVZ kromkajero 8).

LZ (1948). Waringhien, Gaston. Leteroj de Zamenhof - la tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Paris 1948.

Malovec, Miroslav (1988). Gramatiko de Esperanto, Třebíč 1988.

OB. Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto.

OI. Oficiala Informo de la Akademio de Esperanto.

PAG (1985). Plena Analiza Gramatiko. 5a eld. Rotterdam 1985.

PIV. Waringhien, Gaston (red.). Plena Ilustrita Vortaro. Paris 1970; rev. eld. 2002; denove rev. eld. 2005; interreta eldono, samteksta kun tiu de 2005 en 2012.

PMEG (2013). Wennergren, Bertilo. Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko. Stato 2013-06-14 en <http://bertilow.com/pmeg/index.html>.

PVZ. [Itô Kanzi (ed.)]. iam kompletigota verkaro de I. I. Zamenhof [t.e. Plena Verkaro de L.L. Zamenhof]. kioto: eldonejo ludovikito [t.e. ed.].

- kajero 8 (1980) - por kaj kontraŭ reformoj!

Seppik, Henrik (1937). La tuta Esperanto. Gramatiko por Progesintoj. Gvidilo por Kursestroj. Orlová 1937. Senŝanĝa repr. Sofia 1971.

Waringhien, Gaston. Vd. LR, LZ, PAG, PIV.

Willkommen, Dirk (2001). Esperanto-Grammatik – eine Lerner- und Referenzgrammatik. Hamburg 2001.

Unua Libro

**Bulonja Deklaracio
Antaŭparolo**

(BD, A)

A. Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo (1905)

I. Superrigardo

- 1 La Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo aŭ alinome Bulonja Deklaracio (BD) estas verkita de Zamenhof (Z) samtempe kun la Antaŭparolo de la Fundamento (A) en Julio 1905, mallonge antaŭ la unua Universala Kongreso (UK) en Bulonjo ĉe Maro (Francio). Ĝia lingvaĵo kaj la terminoj estas la samaj kiel tiuj uzataj en A. La kongresanoj havis kaj BD kaj la ĵus presitan Fundamenton (F-to) en la manoj.
- 2 BD esprimas la politikan volon de la kongresanoj kiel „representantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo“ (BD 0). Laŭ BD 4.3 la F-to estas kvazaŭ aldonaĵo, anekso al BD. En jura lingvaĵo oni priskribas la metodon de interligado inter BD kaj F-to per la termino „enkonduka“ aŭ „konstitucia leĝo“ (BD) kaj „leĝo“ (F-to), kiu enhavas la detalojn por realigi la ĝeneralajn principojn esprimatajn en la konstitucia leĝo.
- 3 El tio sekvas norm-hierarkio: La F-to ne povas nuligi principon de la pli altranga BD, ĝi povas nur detaligi tiun principon. Inverse la principoj kaj ĝeneralaj celoj de BD devas – se necese – esti konsiderataj dum interpretado de la konkretigaj normoj de la F-to. BD kaj A reciproke sin kompletigas kaj devas esti interpretitaj kiel unu tutaĵo.

II. La norm-hierarkio de Esperanto

- 4 Al la „oficialaj“, t.e. devigaj reguloj de BD kaj F-to 1905 aldoniĝas ĉiuj suplementoj de la origina teksto de la Fundamento de 1905 aldonitaj al ĝi per oficialaj decidoj de la Akademio (Ak) kaj ĝia antaŭulo la Lingva Komitato (LK). Kvante plej gravaj fontoj estas la t.n. naŭ „**Oficialaj Aldonoj**“ (OA 1909-2007). Alivorte oni povas paroli pri BD kaj F-to 2007. Akademias (nedevigaj) interpret-helpoj krome estas la t.n. „**Akademias Korektoj**“ (AK 1922-1923). Pri ambaŭ vidu detale la Kvaran Libron de tiu ĉi Unua Parto.
- 5 Se tiuj fontoj ne sufiĉas por decidi pri ĝusta aŭ malĝusta Esperanto, oni serĉu, ĉu oni trovas (nedevigajn) modelon en la **verkaro de Zamenhof** (vd. BD 4.6 kaj A 3.4 – A 3.6, komentitaj malsupre). Aparte gravaj estas la t.n. „**Lingvaj Respondoj**“ (LR), per kiuj Z klarigis plurajn regulojn en la F-to. Gravaj por ĝusta interpreto de la oficialaj tekstoj ankaŭ estas la (neoficiala) traduko de la Gramatikoj al Esperanto pere de Z (1903) kaj la Zamenhofaj verkoj, kiuj estas „antaŭuloj“ de la posta F-to, precipe la **Unua Libro** (UL 1887), la **Dua Libro** (DL 1888) k.a. (vd. malsupre la superrigardon en la enkonduko al la F-to), fine ĉiuj aliaj tekstoj verkitaj de Z. (vortaroj, literaturaj tradukoj, leteroj k.t.p.).
- 6 Se ankaŭ tio ne sufiĉas, oni klopodu konstati iun ĝeneralan uzon, kiel ĝi estas trovebla ĉe „**la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj**“ (BD 3.3 – konsult-verkoj kiel gramatikoj kaj vortaroj, sed ankaŭ originala kaj tradukita literaturo beletra aŭ faka, detalojn vd. malsupre).
- 7 Tiu norm-hierarkio estas **deviga**, ĉar la principoj kaj reguloj de BD kaj A, kiu preskribas ĝin estas devigaj. Ĝi samtempe preskribas la devige kaj necese aplikendan **proceduron** por veni al respondo pri lingva demando. Almenaŭ mense oni devas ekzameni ĉiun ŝtupon de la normaro de supre malsupren:

deviga

1. Principoj de la Bulonja Deklaracio
2. Fundamento laŭ la stato de 2007 (do inkluzive de la postaj Oficialaj Aldonoj), inkluzive de la principoj de la Antaŭparolo

Oficialaj Aldonoj), inkluzive de la principoj de la Antaŭparolo

rekomendata 3. Verkaro de Zamenhof

4. Ĝenerala uzo kiel trovebla ĉe la plej bonaj kaj talentaj verkistoj

Pli malsupra ŝtupo principe ne povas nuligi rezulton trovitan pere de pli supra ŝtupo. Tamen okaze eblas la konstato de arkaigo.

III. Analizo laŭ alineoj

Literaturo (selekto): Albault 1963, p. 31-37.

Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo

(Akceptita en la lasta laborkunsido de la Bulonja Kongreso:
Kunsido de 9-a de Aŭgusto 1905)

[0.] Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso Esperantista en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon [BD 0]:

- 8** La enkonduka frazo (BD 0) detaligas la titolon de la Deklaracio: Ĝi klarigas, kio estas kaj kio ne estas „Esperantismo“. La klarigon donas ĝiaj multnaciaj „reprezentantoj“. Ili mem estas „esperantistoj“. La nocio „esperantisto“ estas difinita en BD 5.

1. Alineo 1: [Difino de Esperantismo]

1. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu « ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn », ¹ donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, ² kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu ³ povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj [BD 1.1]. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas [BD 1.2].

- 9** **BD 1.1** enhavas pozitivan difinon de „Esperantismo“, do de tio, kio ĝi estas, **BD 1.2**, negativan, do de tio, kio ĝi ne estas.
- 10** La esenco de la Esperantismo estas „penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa“. Ke tiu lingvo povas esti nur „lingvo arta“ kaj ke inter la diversaj lingvoj artaj nur povas temi pri Esperanto, diras BD 2.1.
- 11** BD 1.1 krome nomas tri aplik-sferojn por tiu „lingvo neŭtrale homa“: 1. internacia „kompreniĝado“, 2. multlingvaj nacioj kun lingvo-konfliktoj kaj 3. verkoj interesaj por multnacia publiko. Ĉe la dua kaj tria aplik-sferoj temas pri kompromiso: La ĉefa intereso de la juda ŝtatano de carista Rusio Zamenhof estis la dua sfero, dum la okcident-eŭropaj, ĉefe francaj, raciismaj intelektuloj akcentis la trian, nome la ideon de internacia lingvo por scienco kaj kulturo.
- 12** La ideo de „**paciga lingvo**“ laŭvorte nur koncernas la duan sferon kaj tie nur la lingvo-uzon en „publikaj institucioj“. La esperantistoj tamen dekomence aplikis ĝin kiel fona gvidilo de la Esperantismo ankaŭ al la du aliaj sferoj. La vortumo „paciga lingvo“ pro tio estas la kerno de la poste tiel nomata „**interna ideo**“.

- 13 La frazo-parto en citiloj („ne entrudante ...“) enhavas nean difinon. Ĝi eksplicite rifutas la malĝustan aserton, ke Esperanto volas forigi ĉiujn aliajn lingvojn por fine fariĝi la sola lingvo en la mondo.
- 14 **BD 1.2** disigas la Esperantismon de ĉiuj aliaj penadoj sociaj, politikaj, reformaj k.t.p. Se iu per Esperanto strebas – ekzemple – al socialismo, li rajtas fari tion (BD 5.1); lia strebado tamen ne estu atribuita al la Esperantismo.

2. Alineo 2: [Esperanto kiel solvo de „lingvo neŭtrale homa“]

2. Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj, faritaj en la daŭro de la lastaj du centjaroj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj pleje taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto [BD 2.1], tial la amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciante ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam de longe ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo [BD 2.2].

- 15 **BD 2.1** konkretigas, ke „lingvo neŭtrale homa“ povas esti nur „lingvo arta“ kaj inter tiuj nur Esperanto (vd. jam ĉe BD 1.1). Ĝi ne (plu) estas teoria projekto, sed jam „lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj pleje taŭga“.
- 16 **BD 2.2** konstatas, ke de nun la periodo, dum kiu oni serĉis la plej taŭgan „lingvon neŭtrale homan“, finiĝis. Ne plu necesas „teoria disputado“, pri iuj lingvo-projektoj. Komenciĝis la periodo por „laborado praktika“ por la trovita solvo, nome por Esperanto. Ĝi okazas en du direktoj: horizontale per „disvastigado“, do formado de pliaj esperantistoj, kaj vertikale per „riĉigado de ĝia literaturo“, do per ampleksigo de la praktikaj aplikeblecoj. La nocio „literaturo“ en la lingvaĵo de Z ne nur signifas beletraj verkoj, sed ĉiuspecaj, do inkluzive de lernolibroj, vortaroj, fakaj kaj sciencaj verkoj.
- 17 **BD 2.2** unuflanke estas resumo de la labor-metodo de Z. Ekz. dum la reform-diskuto de 1894 li preparis la tradukon de Hamleto. Ne per longa teoria argumentado, sed per konkreta, palpebla, praktika laboraĵo li fine konvinkis la plimulton. La metoda principo „praktika agado pli gravas ol teoria ĝusteco“ troveblas multloke en liaj Lingvaj Respondoj kaj estu gvida orientiĝo ankaŭ por interpretado de la Fundamento.
- 18 **BD 2.2** aliflanke fariĝis kvazaŭ la labor-programo por ĉiuj internaciaj, naciaj kaj regionaj Esperanto-organizaĵoj: Varbi novajn interesitojn, instrui al ili la lingvon kaj plibonigi la praktikajn eblecojn apliki ĝin per grandigo de tio, kion la lingvo „ofertas“.

3. Alineo 3: [Principo de egaleco kaj „la bonaj verkistoj“]

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas « nenies propraĵo », nek en rilato materiala, nek en rilato morala [BD 3.1].

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj [BD 3.2]; kiel spirita mastroj de tiu ĉi lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo [BD 3.3].

- 19 Jam en la Unua Libro (UL 1887) troviĝas atentigo sur la malantaŭa flanko de la titola paĝo, kiu tekstas en la germana eldono:

„Die internationale Sprache soll, gleich jeder nationalen, ein allgemeines Eigentum sein, weshalb der Verfasser für immer auf seine persönlichen Rechte darüber verzichtet.“

Nia traduko: „La internacia lingvo estu, same kiel ĉiu nacia, ĝenerala propraĵo; tial la aŭtoro por ĉiam rezignas pri siaj personaj rajtoj je ĝi.“⁷

La rezignon pri ĉiuj aŭtor-rajtoj Z jaron poste ripetis en la Aldonaĵo al la Dua Libro (ambaŭ de 1888).

- 20 **BD 3.1** krome akcentas la **egalecan karakteron de la Esperantismo**. Ĉiuj esperantistoj en la senco de BD 5 estas samrajtaj. Tiun principon „en rilato morala“ konkretigas BD 4.1 kaj BD 4.2.
- 21 **BD 3.2** konkretigas la konsekvencojn, kiuj sekvas el la rezigno pri aŭtor-rajtoj fare de Z.
- 22 **BD 3.3** enkondukas la nocion de „spiritaj mastroj“, sinonime „la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj“ en Esperanto. Estas tiuj esperantistoj, kiuj laŭ la juĝo de la esperantista kolektivo plej sukcese „riĉigadis la literaturon“ (BD 2.2 supre). Por esti rigardebla kiel „bona verkisto“ esperantisto devas bone koni (kaj obei) la Fundamenton (A 5.4 – A 5.5) kaj krome la stilon, do la verkaron, de Zamenhof (BD 4.6), por ke li povu kontribui al la unueco de Esperanto. El BD 3.3 sekvas la ofta formulo de la Akademio „kiel uzate de Zamenhof kaj la bonaj verkistoj“.
- 23 BD 3.3 donas gvidon por interpreti la 7an alineon de la Antaŭparolo, kie tekstas „konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo“ (A 7.1, pli detale vd. tie).
- 24 BD 3.3 fine ankaŭ eĥas en artikolo 10 de la Akademia statuto (2009-03-15), kiu preskribas la necesajn kondiĉojn por fariĝi Akademiano. Elekteblaj estas esperantistoj, [...] „ĉefe: la sendiskute rekonitaj esperantologoj; la eminentaj pedagogoj aŭ leksikologoj, kiuj per siaj laboroj grave helpis al la instruado de Esperanto [kp. BD 2.2 „disvastigado“] kaj la aŭtoroj, kies Esperantaj verkoj, originalaj aŭ tradukitaj, efektive kontribuis sur la beletra, teknika aŭ scienca kampoj al la kultura riĉiĝo de nia lingvo [kp. BD 2.2 „riĉigado“].“

4. Alineo 4: [La Fundamento kiel ĝenerala interkonsento]

4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniuj aparta homo [BD 4.1]. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniuj devigan [BD 4.2]. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo «Fundamento de Esperanto», en kiu neniuj havas la rajton fari ŝanĝon [BD 4.3]. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj « tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto » [BD 4.4]. Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la «Fundamento de Esperanto», ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo [BD 4.5]. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble

685

⁷ Sub la ruslingva cenzura noto. En moderna germana estas „Eigentum“ anstataŭ „Eigenthum“ kaj „daran“ anstataŭ „darüber“. La noto pri la rezigno de la aŭtoraj rajtoj mankas en la Zamenhova traduko de la Unua Libro, trovebla en FK 1903.

plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton [BD 4.6].

a) Superrigardo

25 BD 4 estas la alineo, kiu enhavas la **centrajn prilingvajn principojn** kaj enkondukas la Fundamenton. Ili estas jenaj:

- BD 4.1: „Leĝdonanto“ de Esperanto ne estas Zamenhof, sed la kolektivo de esperantistoj
- BD 4.2: La verkaro kaj opinioj de Z ne estas devigaj reguloj, sed nur personaj rekomendoj
- BD 4.3: Deviga (alivorte „oficiala“) estas nur la Fundamento
- BD 4.4: Konsiloj de Z ne povas nuligi aŭ superregi „regulojn kaj modelojn“ de la Fundamento.
- BD 4.5: Kion oni ne povas adekvate esprimi per la materialo de la Fundamento, oni rajtas esprimi laŭ propraj preferoj
- BD 4.6: En la intereso de l' unueco de la lingvo estas konsilite laŭeble imiti la „stilon“ de Zamenhof.

b) BD 4.1 [Esperanto kiel kolektiva verko]

26 BD 4.1 realigas la deziron de Z, ke Esperanto fariĝu sendependa de lia persono. Tiun ideon li jam esprimis en la Aldono al la Dua Libro (ambaŭ de 1888). Ĝi estis konfirmita per la sorto de Volapuko, kiu estis tro ligita al la persona sorto de sia iniciinto Schleyer. Kvankam jam malnova penso de Z, ĝi ricevis novan urĝon komence de 1905, kiam Z estis vokita milit-servi kiel kuracisto en la rusa-japana milito en Siberio – devo, kiun li povis nur eviti pro sia tiujare jam malforta saneco.

27 BD 4.1 klarigas, ke Esperanto estas kolektiva verko. Egalece (BD 3.1) la esperantistoj, ne iu unuopa persono (Z) estas ĝia „leĝdonanto“ (ĝia suvereno). La jura nocio de „leĝo“ aŭ sinonimoj poste aperas 14 fojojn sur la nur seppaĝa (dekunualinea) Antaŭparolo.

c) BD 4.2 [La kontrasta paro oficiala – privata]

28 BD 4.2 konkretigas la ideon de 4.1 (principo de samrajteco de ĉiuj esperantistoj inkluzive de Z). Tiun principon ripetas, detaligas kaj konfirmas A 3.4 ĝis A 3.6 (ekz. „ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem [A 3.4]“).

29 Krome BD 4.2 enkondukas la kontrasto-paron **privata** (proponita, rekomendata, nedeviga) – **oficiala** (deviga, netuŝebla). Tiu distingo estas unu el la bazaj principoj de A kaj tie plurfoje ripetita, ekz. en A 5.4 („... kio en nia lingvo estas *oficiala* kaj *netuŝebla*, por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn *oficialajn*, [...], de la vortoj kaj reguloj *rekomendataj private*, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble *ne de ĉiuj* estas *aprobataj* ...“). Ĝi servas por gardi kernan minimumon de devigaj reguloj por ĉiuj esperantistoj kaj per tio la unuecon de la lingvo (A 1.1) kontraŭ anarkia reformemo.

d) BD 4.3 [La netuŝebla Fundamento kiel sola oficiala lingvo-leĝo]

30 BD 4.3 enkondukas la principon, kion A nomas „**netuŝebleco**“ („por ĉiam deviga“, „en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon“). Nur („sola“) la „verketo“ F-to eterne („por ĉiam“) difinas per interkonsento de la esperantistoj, kio estas ĝusta aŭ

malĝusta Esperanto. En la projektita teksto la vortumo estis: „... fari eĉ la plej malgrandon ŝanĝon“.⁸

31 Pro tiu centra rolo de „la **verketo** «Fundamento de Esperanto»“ estas aparte grave, el kiuj partoj ĝi konsistas. BD 4.3 ne difinas ĝin mem, sed per la „verketo“-vortumo referencas al la Antaŭparolo, kiu detaligas BD.

32 A 2.1 difinas: „1.) La 16-regula gramatiko [FG]; 2) la « Universala Vortaro » [UV]; 3) la « Ekzercaro » [FE]. A 3.5 ripetas: „Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj“, A 4.1 denove ripetas („la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro“). Kontraŭ la malĝusta instruo de la iama „Analiza Skolo“ estas do ne serioze analizeble kaj nuntempe ĝenerale akceptite, ke ĉiukaze FG, FE kaj UV estas partoj de la „netuŝebla“ F-to.

33 Multaj (superflujaj) disputoj tamen ekzistas ĝis en niaj tagoj pri la demando, ĉu ankaŭ la Antaŭparolo kaj ĝiaj principoj estas „netuŝeblaj“. A 11 tekstas:

„[11] La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto, prezentas dume nur mian privatan opinion [11.1]. Leĝan sankcion ili ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 11.2].“

Pro la vortumo „kune kun sia antaŭparolo“ estas klarigita, ke ankaŭ la „ideoj“, t.e. principoj kaj valor-kriterioj, de la Antaŭparolo apartenas al la Fundamento kaj estas „por ĉiam netuŝeblaj“. Por pli detala diskuto vd. la komentojn ĉe A 11.

e) BD 4.4 [La kontrasto-paro „regulo“ – „modelo“]

34 BD 4.4 enkondukas la kontrasto-paron de Fundamentaj „reguloj kaj modeloj“. Al ili aldoniĝas la nocio de „stilo“ (BD 4.6). [Daŭrigota].

f) BD 4.5 [Rajto esprimi sin laŭ propraj preferoj]

35 BD 4.5 estas necesa konsekvenco el BD 4.1 – ĉar „la esperantistoj“ estas la leĝdonantoj de Esperanto, ĉiu esperantisto principe estas (kaj devas esti) libera esprimi sin „en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta“. Tiu „ĝenerala esprim-libereco“ de la individuo tamen estas limigita duoble: *Devigaj* por ĉiu individuo estas la reguloj kaj modeloj de la Fundamento, do la atingita interkonsento de la kolektivo de esperantistoj. *Rekomendate* estas imitado de la Zamenhofa stilo (BD 4.6), kiel gvida modelo de lingva unueco.

g) BD 4.6 [Imitado de la Zamenhofa stilo]

36 BD 4.6 preskribas, ke la Zamenhofa stilo, kvankam ĝi ne estas *deviga*, tamen ludu gravan rolon *unuécigan*. Tiu ideo estas ripetita en A 3.6: „... ĉio alia, kion mi [Z] verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas k. t. p., estas nur verkoj privataj, kiujn la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero - povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6, niaj elstarigoj].“

37 BD 4.6 kun A 3.6 per tio kreas la norm-hierarkion de Esperanto, klarigitan supre. Ĝi estas **necesa**, ĉar la Fundamento traktas nur la kernajn demandojn de la lingvo kaj por multaj detaloj nek havas regulojn, nek modelojn. Ĝi krome estas tre konciza kaj ofte ofertas nur malmultegajn ekzemplojn por regulo, kiuj ne ĉiam klare donas respondon al lingva demando. Kiel tuto la Fundamento neniel estas elĉerpa. Por eviti disputojn pri en la F-to netraktitaj aŭ ne sufiĉe sendubige traktitaj demandoj, estas do dezirinde havi plian orientiĝon, nome la verkaron de Z kaj de la plej bonaj verkistoj.

685

⁸ Unua Universala Kongreso de Esperanto : (Boulogne-sur-Mer, 5-13 aŭgusto 1905). Esperantista dokumentaro 1. Paris: Esperantista Centra Oficejo 1906, p. 32.

- 38** Anstataŭ la metaforo de ŝtupa hierarkio, oni ankaŭ povas uzi la metaforon de **arbaraj jar-ringoj** por komprenigi tiun sistemon de BD kaj A.

Unua ringo (kerno): La „reguloj“ de la Gramatiko (FG) kaj la „reguloj“ de la Ekzercaro (FE).

Dua ringo: La „modeloj“ de FE

Tria ringo: La „stilo“ de Z, se ĝi efikas unuecige

Kvara ringo: La „stilo“ de la plej bonaj verkistoj, se ĝi efikas unuecigi

Kvina ringo: La individua „stilo“ de unuopa esperantisto.

Kvankam la ofta aserto „Nur la Fundamento estas la oficiala bazo de la lingvo Esperanto“ estas ĝusta, ĝi ne estas kompleta. BD kaj la Fundamento *devige* preskribas, ke – se la F-to ne rekte helpas – oni unue serĉu modelojn ĉe Z kaj la bonaj verkistoj antaŭ ol esprimi sin en tia maniero, kiun oni trovas plej ĝusta.

5. Alineo 5: [Difino de „esperantisto“]

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas [BD 5.1]. Apartenado al ia aktiva Societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga [BD 5.2].

- 39** El la principo de egaleco (BD 3.1) sekvas, ke ĉiu kiu uzas Esperanton estas „esperantisto“. Nek gravas por kio li uzas la lingvon, nek ĉu li estas membro de Esperanto-organizaĵo aŭ ne.

6. Projektitaj, sed de la Kongreso ne aprobitaj alineoj

- 40** La origina propono de Z al la Kongreso ampleksis sep alineojn. La kvinan kaj sepan la Kongreso ne aprobis kaj forstrekis, tiel ke la sesa alineo (difino de „esperantisto“) fariĝis la posta kvina. Kvankam § 5 kaj § 7 Propono **ne** estas **oficialaj**, ni dokumentas ilin tie ĉi, ĉar ili helpas kompreni la Zamenhofan intencon kaj sistemon.⁹

- 41** **§ 5 Propono [Centra Komitato Esperantista]**

§ 5 Propono [Centra Komitato Esperantista]: „Pri ĉiuj duboj, kiuj aperas pri la uzado de la lingvo Esperanto, decidus ĉiam la Centra Komitato Esperantista, elektata de la esperantistoj de la tuta mondo en la internaciaj kongresoj esperantistaj. Ĉiuj decidoj de la Centra Komitato, tuŝantaj la dubajn demandojn de la lingvo, estas devigaj por ĉiuj uzantoj de la lingvo Esperanto; ĉiuj decidoj, tuŝantaj la manieron de praktika agado, estas devigaj nur por tiuj personoj, kiuj deziras aparteni al la aktiva organizacio esperantista.“

Propono de Z pri memorganizado de la esperantistoj kun kvazaŭa „registro“ malsukcesis jam en la reform-diskuto de 1894 kaj denove dek unu jarojn poste en 1905. Nur meze de la Ido-krizo en 1908 estis fondita Universala Esperanto-Asocio (UEA).

- 42** **§ 7 Propono [Kolekto Aprobata]**

§ 7 Propono [Kolekto Aprobata]: „Por faciligi al la komencantaj esperantistoj la elekton de fideblaj libroj kaj gardi ilin kontraŭ uzado de libroj, kiuj instruas tute eraran lingvon, estas eldonita serio da libroj, kiuj portas sur si la aprobon de la aŭtoro de la lingvo. Tiu ĉi aprobo tamen havas nur la signifon de konsilo por la komencantoj, sed ĝi havas en si nenion devigan. Ĉiu esperantisto povas libere uzi ĉiun libron au gazeton, kiun li deziras.“

- 685**

⁹ Unua Universala Kongreso de Esperanto : (Boulogne-sur-Mer, 5-13 aŭgusto 1905). Esperantista dokumentaro 1. Paris: Esperantista Centra Oficejo 1906, p. 32.

En 1901 Zamenhof, danke al perado de Louis de Beaufront, subskribis kontrakton kun la granda eldonejo *Hachette* en Parizo pri eldono de **Kolekto aprobata de d-ro Zamenhof**, en kiu poste aperis lernolibroj kaj vortaroj por francoj kaj multaj literaturaj verkoj (ekz. la F-to mem, la FK 1903 kaj la vortaroj de Beaufront 1901 kaj Cart 1903¹⁰). La Kolekto enhavis nur verkojn ekzamenitajn de Zamenhof mem. Hachette ricevis ekskluzivan monopolon por ilin eldoni. Sed baldaŭ ĝi pretendis, ke ĝi sola havis la rajton eldonadi Esperanto-verkojn, kio ne trovis ĝeneralan konsenton. Tiuj diskutoj probable rezultis en la malaprobo de § 7 Propono. Zamenhof en 1905 ĉesigis la „kolekton aprobitan“. De tiam Hachette eldonis nur liajn proprajn verkojn.

B. La Fundamento - Enkonduko

I. Superrigardo

1. La rolo kaj funkcio de la Fundamento

- 1 La funkcion de la Bulonja Deklaracio kaj la Fundamento laŭ BD 4 Zamenhof klarigas en pluraj Lingvaj Respondoj, vd. post la „Analizo laŭ alineoj“.

2. La kvar partoj de la Fundamento

- 2 Laŭ la Antaŭparolo la Fundamento konsistas el jenaj kvar partoj: Antaŭparolo (A), la kvin Gramatikoj (FG) en la franca, angla, germana, rusa kaj pola, la Ekzercaro (FE) kaj la Universala Vortaro (UV). Por detala diskuto vd. la ĉapitron „Antaŭparolo“.

- 3 La **kronologia** ekesto de la diversaj partoj de la Fundamento estas malsama al la aranĝo en la libro, nome jena:

FG – enhave de 1887 (Unua Libro – UL)

UV – parte de UL 1887, parte de RE 1888, MV 1888 kaj malmultaj vortoj de 1893

FE – manuskripto de 1893, aperita 1894, prilaborita por la 2a eld. 1898

A – Juli 1905 kun pli fruaj ideoj, parte de DL-Ald de 1888.

3. Principa samrangeco de FG, FE kaj UV – la „ideoj“ de A

- 4 Laŭ la Antaŭparolo ne ekzistas iu norm-hierarkio inter FG, FE kaj UV, Ili principe estas **samrangaj**, Malsame estas pri A mem. Fundamentaj nur estas ĝiaj „ideoj“ (principoj, kriterioj kaj valor-sistemo), sed ne ĝia lingvaĵo. Detalojn vd. en la ĉapitro „Antaŭparolo“.

- 5 Malgraŭ la principa samrangeco eblas dubi pri la **sama fidindeco** de FG, FE kaj UV ĉefe pro du kialoj.

Unue oni povas supozi, ke la **pli novaj** partoj de la Fundamento, do la Ekzercaro estas pli fidinda ol la pli malnovaj, precipe la UV. Fakte, tio ne malofte tiel estas. Tamen ĝenerala regulo ne ekzistas. Dependas de la unuopa detal-demando. Ekzemplojn vd. en la ĉap. „Ekzercaro“.

Due oni povas supozi, ke la interpreta forto de la kvin **referenc-lingvoj** FG, FE kaj UV eble estas malsama. Ja la rusa estis la ĉefa, hejma, eduka kaj universitata lingvo de Zamenhof. Ja en la germana li studis en Vieno, dum de franca kaj eĉ malpli angla li havis nur lerneajn konojn (pri lia posedo de la pola detal-studo ne estas konata). En dubaj kazo de kontraŭdiroj inter la diversaj tradukoj oni do povus imagi iun regulon, ke – ekzemple – pli gravas la rusa traduko ol la angla. Ankaŭ tiu-punkte tamen dependas de la unuopa demando kaj neniu ĝenerala regulo estas difinebla.

4. Kunbinditaj eksterfundamentaj tekstoj

- 6 Albault jam en 1963 konstatis, ke al la Fundamento **ne** apartenas jenaj partoj, kiuj estas kunbinditaj de la eldonejo *Hachette* en la unua libro-eldono de 1905 al la oficiala teksto kiel voĉdonita de la unua Universala Kongreso per la Bulonja Deklaracio, nome:¹¹

685

¹¹ Vd. la komenton de Albault en la Fundamento, 10-a eld. Pizo 1991, p. 26-27: „... Aliparte, de la volumo de 1905, ni [= Albault] forigis ĉion, kio ne strikte apartenas al la

- la titolpaĝo (frontispico)
- la tabelo de enhavo
- la reklamo por la Fundamenta Krestomatio.

7 En tiuj tekstoj aperas jenaj radikoj („vortoj“), kiuj mankas en la teksto de la Fundamento kiel aprobita per la Bulonja Deklaracio. Ili pro tio estis ne- aŭ eksterfundamentaj ĝis la Akademio ilin poste oficialigis:

vorto	kunteksto	trovloko	Oficialigita per
dan'	Danujo	titolpaĝo	OA 8
ital'	Italujo	titolpaĝo	OA 8
sved'	Svedujo	titolpaĝo	OA 8
kompani'	„kompanio Hachette“	reklamo	OA 1
krestomati'	Fundamenta Krestomatio	reklamo	OA 2

8 Ĉar la **Tabelo de Enhavo** ne apartenas al la oficiala teksto de la Fundamento, kvankam ĝi aperas en la sama libro, la uskleco de la popol-nomoj en la Tabelo de Enhavo (p. 233) estas eksterfundamenta. Eĉ ne estas klare, ĉu ĝi estas Zamenhofa aŭ ne simple verkita de kunlaborinto de la eldonejo *Hachette*. Tamen Albault, kiu prave konstatis la eksterfundamentan karakteron de la Tabelo de Enhavo en 1963 plurfoje referencas al ĝi en sia „Antaŭvorto al la 10-a eldono“ en 1991, per kiu li argumentas por uzo de majuskloj ĉe nomoj de landanoj kaj faris „ok korektojn“:

[1] Preparante tiun ĉi eldonon de la Fundamento, ni [Albault] faris al la 9-a eldono [1963] entute ok korektojn [!], specife al la etno-nomoj en paĝoj 142, 163, 165, 168, 205, 212, 226. Tiel "angl' (o)" fariĝas "Angl' (o)", "franc' (o)" fariĝas "Franc' (o)", ktp. [= Germano, Hispano, Polo, Ruso, Turko].

[2] Tiu korektado, nome la majuskligo de la etnonomoj, estis farita konforme al la vort-listoj kuŝantaj sur paĝoj 50 (104), 70 (124) kaj 74 (128), kaj ankaŭ al la *Tabelo de Enhavo* [!] sur paĝo 179 (233).

[3] La etno-nomoj estas kolektivaj propraj nomoj aŭ „apelativoj“, laŭ la termino sub kiu mi [Albault] priskribis aliloke tiun nom-klason: kiel tiaj ili ricevu majusklon konforme al la Fundamento.

[4] Plie estas pli bone kaj ofte pli klare, kiel montris Waringhien (PIV) kaj kiel sugestas la *Tabelo de Enhavo* [!] de la Fundamento mem, ke la rekte derivitaj adjektivoj konservu tiun majusklon.

[5] Ekz-e la Angla, la Franca: cetero neniu povas nei, ke lingvo-nomoj estas veraj propraj nomoj, eĉ se ni plej ofte disponas nur pri adjektivoj por ilin nomi: tamen estas kelkaj ŝatindaj substantivoj, kiel *Esperanto*, *Sanskrito*, *Latino*, por citi nur la plej konatajn.“

La *Tabelo de Enhavo*, al kiu Albault referencas dufoje en paragrafoj [2] kaj [4], **ne** apartenas al la Fundamento kiel li mem konvinke montris. Temas pri eksterfundamenta argumento, kvankam Albault insinuas, ke ĝi estus argumento surbaze de la Fundamento. La ceteraj argumentoj estas aŭ eksterfundamentaj konsideroj pri oportuneco („pli bone kaj ofte pli klare“) aŭ baziĝas sur la etno-nomoj en la lecion-finaj vort-listoj de la Ekzercaro. El ili tamen nenion eblas

687

Fundamento difinita de Zamenhof mem en la *Antaŭparolo* (A 11, 2): *Gramatiko*, *Ekzercaro* kaj *Universala Vortaro* kune kun la *Antaŭparolo*. Do, ni devis eljeti reklampaĝon kaj la ĝeneralan titolpaĝon, reklamtekston pri la *Fundamenta Krestomatio* ... kaj fine la *Tabelon de enhavo* ... Ilia ĉeesto klarigas, kial Wüster (1923) kaj pli frue Stojan (1912) erare alkalkulis unu kaj eĉ du pliajn vortojn (*krestomatio* kaj *kompanio*) al la nombro de la Fundamentaj vortoj. ...“.

konkludi, ĉar pri tiu demando la Ekzercaro estas kontraŭdira, eĉ kaosa. Detalan diskuton pri majuskloj kaj minuskloj en la Fundamento vd. malsupre.

II. Interpret-helpaj, eksterfundamentaj dokumentoj

1. Enkonduko

- 9** La Fundamento de 1905 baziĝas sur pli fruaj tekstoj. Dubaj demandoj krome estis interpretita jam en sam-epokaj dokumentoj, verkitaj post 1905. La malsupra tabelo donas superrigardon por ĝuste enordigi la Fundamenton en ties historian ekeston kaj pluan sorton. Detalojn pri la diversaj interpret-helpaj dokumentoj vd. en la postaj ĉapitroj.

Jaro	Verko	Rimarko
1887	Unua Libro (UL)	La tieaj Gramatikoj fariĝis - lingve adaptitaj, sed enhave neŝanĝitaj - la postaj FG.
1888	Dua Libro (DL)	La unua libro tute en Esperanto kaj praversio de la posta FE, kiu tamen forte ŝanĝis ĝiajn tekstojn. Speco de „Lingvaj Respondoj“
1888	Aldono al la Dua Libro (DL-Ald)	La lasta eksplicita ŝanĝo de la lingvo fare de Zamenhof: El tian, kian, ĉian, nenian, ian fariĝis tiam, kiam, ĉiam, neniam, iam. Enhavas kernon de la posta Antaŭparolo de 1905
1889	Plena Vortaro Rusa-Esperanta (RE)	La unua ampleksa vortaro de Zamenhof, bazo de la preskaŭ samtempa MV
1889	Meza Vortaro Esperanto-Germana (MV)	Kerne ekestis per inversigo de RE sen la internaciismoj kaj rusismoj plus kelkaj alifontaj aldonoj
1893	Universala Vortaro (UV), 1-a eld.	Sur la titolpaĝo erare indikita „1894“. Kerne ekestis per aldono de franca, angla, rusa kaj pola al MV.
1894	Reform-diskuto	La plimulto rifuzas reformojn. Post la decido publikigo de verkoj pretaj, sed haltigitaj pro la diskuto.
1894	Ekzercaro (FE), 1-a eld.	Inspirita de DL 1888, sed profunde reverkita. Submetita al la cenzuro samtempe kun UV en aprilo aŭ majo 1893
1896	Universala Vortaro (UV), 2-a eld.	Preskaŭ identa kun la 1-a eld. de 1893. Plej konata malsamaĵo: vipero / vipuro. Fariĝis Fundamenta en 1905. Poste senŝanĝaj represoj: 3-a 1900, 4-a 1901, 5-a 1904, 6-a 1906 ¹²
1898	Ekzercaro (FE), 2-a eld.	Kontrolita kaj korektita eldono, kiu fariĝis Fundamenta en 1905
1900	Ekzercaro (FE), 3-a eld.	Senŝanĝa represo de la 2-a eld. 1898

¹² Cit. laŭ Albault, 1963/1991, p. 347, kie oni trovas pliajn detalojn.

1904	Ekzercaro (FE), 4-a eld.	Senŝanĝa represo de la 2-a eld. 1898, poste tri stereotipaj eldonoj ĉe Hachette, 5-a 1906, 6-a 1907, 7-a 1910 ¹³
1901	Vortaro Esperanta-Franca de Beaufront (Beau)	Antaŭparolo de 1899. Klarigas multajn dubajn vortojn en UV per korespondado kun Z. Fariĝis bazo de la francaj AK kaj grava fonto de EG 1 kaj OA 1.
1903	Fundamenta Krestomatio (FK), 1-a eld.	Enhavas zamenhofajn tradukojn de FG kaj UL
1904	Esperanto-Germana de Jürgensen, 1-a eld. (EG 1)	Grava bazo por OA 1, OA 2 kaj postaj.
1905	Fundamento (FdE)	Kunigas FG (baze) 1887, FE 1898 kaj UV 1893 kaj aldonas Antaŭparolon (A 1905).
1906	Akademiaj Korektoj (AK)	La laboro pri AK komenciĝas laŭ taskigo en la 2-a Universala Kongreso (UK)
1907		Ido-skismo
1907	Taschenwörterbuch (TW)	Kerne prilaborita eldono de MV 1889 laŭ la nova germana ortografio de 1901
1907	Esperanto-Germana de Jürgensen, 2-a eldono (EG 2)	
1909	Unua Oficiala Aldono (OA 1)	La plej ampleksa OA aldonas multajn internaciismojn forstrekitajn 1889 survoje de RE al MV kaj aliajn zamenhofajn vortojn surbaze de la konkordanco de Wrackhill
1910	Difin-vortaro de Kabe	La unua difin-vortaro de Esperanto klarigas multajn dubajn vortojn de UV.
1914	AK	AK, krom la rusaj, estas pretaj, sed ne jam publikigitaj
1914	OA 2	OA 2 estas preta, sed ne jam publikigita
1914-1918		Unua mond-milito. La laboroj de Akademio kaj Lingva Komitato stagnas, gvidaj personoj mortas, nova generacio eklaboras postmilite
1917		Morto de Zamenhof
1919	OA 2	Publikigo de OA 2
1922	AK	Publikigo de AK francaj, anglaj kaj germanaj
1923	AK	Publikigo de AK rusaj kaj polaj, la rusaj uzas la novan ortografion de 1918

2. Lingvaj Respondoj (sep eldonoj 1910-1990)

Literaturo (selekto): **Hankel**, Marie. La hejveturado. En: Universo 1910, n-ro 6. **Lippmann**, Walter. Pri la lingvaj respondoj de Doktoro Zamenhof. En: La

¹³ Cit. laŭ Albault, 1963/1991, p. 347-348, kie oni trovas pliajn detalojn.

Vendreda Klubo. Leipzig 1921, p. 49-63 (rete konsultebla). **Lippmann**, Walter. Dr. Zamenhofs sprachliche Gutachten. Lingvaj Respondoj in Deutscher Bearbeitung. Leipzig 1921 (repr. Saarbücken 1984). **Waringhien**, Gaston (ed.). Lingvaj Respondoj. 7a eld. Kioto 1990.

10 Lingvaj respondoj (LR) en strikta senco estas ekspertizoj, nome privataj, sed aŭtoritataj respondoj pri lingvaj demandoj, *verkitaj* de Zamenhof dum tri epokoj *por publikigo* en periodaĵoj:

- **1889-1893** en *La Esperantisto* (antaŭfundamenta)
- **1906-1908** en *La Revuo* (ĉirkaŭ la Ido-krizo)
- **1911-1912** en *Oficiala Gazeto Esperantista*

Krome Z donis lingvajn respondojn en *privata* korespondado, ekzemple okaze de lingva kontrolado de vortaroj aŭ tradukoj. Tiuj respondoj parte estis publikigitaj dise en liaepokaj gazetoj kaj libroj (ekz. se la adresitoj de la respondoj sendis ilin al periodaĵoj), parte nur post lia morto retrovitaj kaj publikigitaj (ekz en LZ 1948). Plia fonto estas publikaj paroladoj de Z, precipe en la Londona postkongreso de UK 3 (Kembriĝo 1907), en UK 4 (Dresdeno 1908) kaj UK 6 (Vasingtono 1910). Fine ekzistas respondoj („malrektaj“ LR en plej vasta senco, „nur atestitaj“ LR), kiujn Z laŭaserte donis buŝe kaj kiujn la alparolito notis el la memoro kaj publikigis (ekz. Hankel 1910). Estas evidente, ke la fidindeco de respondo varias laŭ la okazo kaj laŭ la rekta aŭ malrekta vojo, sur kiu ĝi atingis la publikon.

11 Ekzistas sep eldonoj de la neoficiala kolekto „Lingvaj Respondoj“ en libro- aŭ broŝur-formo plus diversaj senŝanĝaj represoj. La respondoj en strikta senco, do tiuj dekomence verkitaj por gazetoj, krome estas troveblaj en tiuj. Ĝenerale oni povas diri, ke la kolekto fariĝis pli ampleksa laŭ la progreso de esperantologiaj esploroj - dum la jardekoj oni remalkovris pliajn LR.

Oni devas distingi jenajn libro-eldonojn:

A = **1910**: Paris 1910, 30 p. (48 respondoj el La Revuo 1906-1908).

A' = **1912**: senŝanĝa represo 1912 de A (1910).

B = **1913**: Lingvaj Respondoj (Nova Serio), Paris 1913 (29 respondoj el La Esperantisto 1889-1893 kaj 13 respondoj el OGE 1911-1912).

C = **1925**: Lingvaj Respondoj (Plena Kolekto), Paris 1925 (kombino de A kaj B, plus 14 pliaj, intertempe remalkovritaj)

D = **1927**: 2-a eld. de C (1925), preskaŭ senŝanĝa, tamen kun korekto de pluraj preseraroj kaj aldono de novaj.

E = **1936**: Lingvaj Respondoj (Plena Kolekto), Tria Eldono. Paris 1936 (= D + 19 novaj respondoj, intertempe remalkovritaj; sume 119 eroj)

F = **1962**: Lingvaj Respondoj - Konsiloj kaj Opinioj pri Esperanto. Sesa Eldono, Marmande 1962, kiun preparis Waringhien. Ĝi enhavas 176 erojn, la nove enmetitaj estas precipe el la intertempe eldonitaj „Leteroj de Zamenhof“ (2 vol. 1948).

G = **1990**: samtitola, **7-a eld.** Kioto **1990** (kun multaj pliaj respondoj intertempe malkovritaj kaj publikigitaj en PVZ)

D' = **1992**: Plena Kolekto, Jekterinburg 1992, 53 p., ed. A. Korĵenkov, represo de D (1927)

F' = **1995**: Vieno 1995 = repr. de F (Waringhien, Marmande 1962).

La filologie plej fidinda kaj kompleta estas *nur* la 7a eld. 1990, laŭ kiu oni kutime citas LR kun la tie troveblaj identigaj numeroj. La eldono D 1927 fariĝis la bazo de pluraj internetaj eldonoj.

- 12 En la pasintaj 25 jaroj estis trovitaj kelkaj malmultaj pliaj LR en la verkaro de Z kaj publikigitaj en PVZ, LR kiujn ne jam listas la 7a eld. 1990. Ili pro tio en BK ne havas identigan numeron. Krome ekzistas tre malmultaj pliaj en la germana prilaboro de LR fare de Lippmann 1921 (repr. 1984). Ilin Waringhien kredeble ne registris, ĉar Lippmann ne redonas la originalan Zamenhofan vortumon de la LR en Esperanto, sed nur germanan resumon (regeston), kaj ĉar la originaloj aŭ perdiĝis aŭ Waringhien ne disponis pri ili. Temas ĉefe pri poŝtkarto de 1910-10-08 al Max Butin (1888-1960) pri vipero / vipuro (Lippmann 1921, n. 110; detalojn vd. en BK II) kaj buŝaj respondoj de Z, kiujn raportis Marie Hankel (1844-1929).

3. Vortaro Esperanto-Franca de De Beaufront (Beau 1901)

Literaturo (selekto): **Beaufront**, Louis de. Pri la ‚Kolekto aprobita de d-ro Zamenhof‘. En: L'Espérantiste 1901:04:48 (de 1901-12-31), p. 291-294 (repr. LD XV, 1996). - **Albault** 1963, p. 17.

- 13 Specifa kazo de Lingvaj Respondoj estas la vortaro Esperanto-Franca de Louis de Beaufront (1a eld. 1901, 2a eld. 1902, 3a rev. eld. 1903, [4a plil. eld.] 11a milo 1904¹⁴, Kolekto Aprobita n-ro 2). Beaufront korespondis pri Zamenhof i.a. pri dubaj tradukoj en la UV al la franca kaj detale klarigas ilin en sia vortaro.¹⁵ Li mem priskribas tion je 1901-12-31 jene:

„Nia propra opinio estas, [...] ke la unuaj verkoj kiujn oni devus traduki ĉie estas tiuj, kiujn eldonas nun la firmo Hachette sub la titoloj: *Grammaire et exercices de la langue internationale Esperanto* (Gramatiko kaj ekzercoj de la lingvo internacia Esperanto [de Beaufront]), — *Dictionnaire Esperanto-Français* (Vortaro Esperanta-Franca [de Beaufront]), — *Dictionnaire Français-Esperanto* (Vortaro Franca-Esperanta [de Th. Cart]). La unua aperis [do en 1901], kaj ĝia *dua eldono* estas eĉ jam en presado, ĉar en unu monato estis foraĉetitaj ĉiuj ekzempleroj de l'unua eldono. Oni finas nun la presadon de l'vortaro Esperanta-franca, kiu eliros *post kelkaj tagoj*, kaj la vortaro franca-Esperanta [de Cart] estos eldonita tre rapide [tamen aperis nur en 1903]. Se mi konsilas la tradukon ĉiulingvan de tiuj verkoj, mi ne faras tion ĉi pro amo al miaj produktaĵoj, sed sole ĉar ili estas la frukto de pacienca, tre longa kaj zorgoplena laboro. Oni ricevos ideon pri tio ĉi, kiam oni scios ke ni konsiliĝis kun doktoro Zamenhof tre detale pri multego da vortoj aŭ pri la tute preciza kaj ĝusta senco kiun ili posedas. Per difinoj, per ekzemploj ni ĉion klarigis tiel plene, ke la tradukanto scianta bone la lingvon francan sentos nenian dubon aŭ malcertecon pri tiu aŭ alia punkto. Plie la vortaroj enhavas radikojn kaj kun ili multon da vortoj internaciaj tre akceptitaj de Esperanto kaj uzataj de ĝi, sed kiujn oni ĝis nun neniam trovis kolektitajn en vortaro. La grandvalora helpado de doktoro Zamenhof kaj la aprobo kiun li konsentas doni al tiuj verkoj faras do el ili la plej bonan kaj plenan ilaron kiu ĝis nun aperis por la lernado kaj akiro de Esperanto.“

- 14 Ĉar la korespondado perdiĝis, ne plu estas konstateble, ĉu Beaufront fidele tradukis kaj redonis la respondojn de Zamenhof. Malgraŭ tio kaj kvankam ĝi estas eksterfundamenta fonto, la vortaro de Beaufront estas grava helpilo por interpreti

685

¹⁴ La „Suplément au dictionnaire Esperanto-français“ de 1902 ne enhavas pliajn vortojn, sed estas eseo pri la fono de la esperanta vortrezoro (internacieco, 15a regulo, vortkreo per afiksoj k.t.p.).

¹⁵ LZ I, p. 22-23, 48.

kelkajn dubajn kazojn de la Fundamento. Jen ekzemplo de tiuspeca „lingva respondo“:

lud, jouer.

ludo, jeu (1° Action de se livrer à un amusement. Ex. : *La infanoj ŝatas la ludon*, les enfants aiment le jeu. — Amusement soumis à des règles où l'un perd, tandis que l'autre gagne. Ex. : *Li elspezas sian tutan monon en la ludo*, il dépense tout son argent au jeu. — 3° Ce qui sert, à ces amusements. Ex. : *Ludo de kegloj*, jeu de quilles. — 4° Façon dont on joue, Ex. : *Via ludo estas tre lerta*, votre jeu est très habile. — 5° Maniement des instruments de musique. Ex. : *La ludo de l'fortepiano, de l'violono, de l'gitaro*, etc., le jeu du piano, du violon, de la guitare, etc. — 6° Manière dont un acteur joue un rôle. Ex. : *Lia ludo estas tre nobla*, son jeu ost très noble. Le verbe *ludi* a naturellement les acceptions correspondantes).

- 15** La vortaro de Beaufront poste fariĝis la ĉefa fonto de la **francaj Akademijaj Korektoj** (AK – vd. Kvaran Libron de BK I), kiel montras multaj artikoloj en BK II (tie cit. „[Beau]“). Beaufront komence, ĝis sia transiro al Ido, mem laboris pri AK-fr. Sed eĉ post lia rezigno, lia posteulo daŭre uzis la vortaron.
- 16** La Beaufront-vortaro krome forte influis la t.n. „germanajn vortarojn“ (vd. tuj mal-supre) kaj kune kun tiuj fariĝis grava fonto de la **Unua Oficiala Aldono** (OA 1, 1909).

4. La germanaj vortaroj (EG 1, EG 2, GE 1, GE 2)

Literaturo (selekto): Novaj vortoj en la dua eldono de la Esperanta-germana vortlibro. En: *Lingvo Internacia* 1907, p. 120-123. Borel, Jean. Rememoroj el 1903. En: *Germana Esperantisto* N-ro 2, 1924, p. 23.

- 17** Nur iom post la korespondado kun Beaufront, Z ankaŭ korespondis kun la franc-lingva svizo Jean Borel (1868-1946), de 1903 vivanta en Berlino, pri la t.n. „germanaj vortaroj“, kiuj aperis sub la nomo de Hermann Jürgensen en la Kolekto Aprobata. Simile kiel la Beaufront-vortaro, precipe EG 1 kaj EG 2 poste fariĝis grava bazo de OA 1, sed ankaŭ de la postaj OA 2 ĝis OA 4.
- 18** 20 jarojn poste Borel priskribas la ekeston de EG 1 jene: „dum monatoj Hermann Jürgensen kaj mi dediĉis ĉiun vesperon al la verkado de ia manuskripto, kiu estis sendata al D-ro Zamenhof por fina revido“. [Daŭrigota].

C. Antaŭparolo (1905)

I. Superrigardo

- 1 La Antaŭparolo (kune kun la Bulonja Deklaracio) estas la ŝlosila teksto por la kompreno kaj ĝusta interpretado de la Fundamento. Ĝi estas respondo al tri defioj:
 - Gardi la unuecon de la lingvo kaj malhelpi disfalon en dialektoj.
 - Malligi la plian sorton de Esperanto de la persona sorto de ĝia iniciinto Zamenhof.
 - Trovi ekvilibron inter kontinueco kaj evoluipovo.
- 2 La rimedo kontraŭ disfalo estas severa malpermeso arbitre ŝanĝi la Fundamenton („netuŝebleco“) – ĝi havas „eternan“ karakteron. La nocio „Fundamento“ estas metafora sinonimo de „ĝenerala interkonsento de la esperantistoj pri la bazaj ecoj de la lingvo“. Tio fariĝas evidenta, se oni anstataŭigas ĉiujn trafojn de „Fundamento“ per „interkonsento“ aŭ „komuna konsento“: La senco de la teksto per tiu anstataŭigo ne ŝanĝiĝos.
- 3 La rimedo kontraŭ troa ligiteco al la persono de Zamenhof estas kreo de „aŭtoritata centra institucio“, la Akademio, kiu daŭrigu la ĝistiaman laboron de Zamenhof (juĝeja povo).
- 4 La rimedo por atingi ekvilibron inter stabileco kaj ebleco disvolviĝi estas kreo de monopolo de la Akademio. Nur ĝi rajtas plilarĝigi la Fundamenton, t.e. la ĝeneralan interkonsenton, alivorte la komunan volon de la esperantistoj, per aldonoj de novaj vortoj aŭ reguloj al la Fundamento (leĝdona povo).
- 5 La ideoj, kiujn Zamenhof esprimas en la Antaŭparolo, ne estas novaj. Similaj proponoj troveblas jam en la Aldono al la Dua Libro (ambaŭ de 1888), la antaŭparolo al la Fundamenta Krestomatio 1903 kaj aliloke.

II. Analizo laŭ alineoj

1. Alineo 1: [Defioj kaj rimedo – netuŝebla interkonsento]

[1] Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, - estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo [A 1.1]. Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj [A 1.2]; sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta [A 1.3]. Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! [A 1.4] Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto [A 1.5].

- 6** **A 1.1** nomas la du ĉefajn ekzisto-kialojn de la Fundamento: Unue gardi la unuecon inter esperantistoj dum iu donita historia momento (horizontala unueco) kaj inter diversaj generacioj de esperantistoj (vertikala unueco aŭ diakrona unueco); due ebligi „bonan kaj regulan“ progreson, do ne rompan, detruan aŭ anarkian evoluon.
- 7** La rimedo por gardi la unuecon estas komuna interkonsento, nomita „Fundamento“, kun „eterna“ kvalito („neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla“). La kerna ideo de neŝanĝebleco troveblas entute 18 fojojn (!) en la Antaŭparolo, krome en BD 4.
- 8** A 1.1 plie enkondukas la nocion de „klareco“ („klare difinita“ Fundamento). Ankaŭ ĝi poste estos plurfoje ripetita (vd. precipe A 3.1, A 3.2) kaj menciita entute sep fojojn (!).
- 9** **A 1.2** priskribas la situacion post la „fina venko“: La ĉefaj ŝtatoj de la mondo interkonsentas enkonduki internacian lingvon kaj fiksas ĝiajn detalojn per leĝo, tiel ke la danĝero de disfalo pro „personaj kapricoj aŭ disputoj“ ne plu ekzistas. En tiu okazo „aŭtoritata komitato“, do reprezentanta organo de la ŝtatoj, rajtas fari „ĉiujn deziritajn ŝanĝojn“. Sed eĉ en tiu fincela situacio la ŝanĝoj ne estu arbitraj, sed okazu nur se ili „montriĝos necesaj“. Tiun ideon de „efektiva neceseco“ por „ĉia « perfektigado » de la lingvo“ ripetis poste A 9.3 por la periodo antaŭ la akceptiĝo de la Internacia Lingvo fare de la ŝtata komunumo.
- 10** **A 1.3 ĝis A 1.5** priskribas la solvon por gardi la unuecon de Esperanto en la epoko, kiam la ŝtatoj ankoraŭ ne protektas ĝin per „speciala leĝo“. La esperantistoj kreas „kvazaŭ-leĝon“, kiu „surogate“ transprenas la taskon de ankoraŭ mankanta ekzisto-garantio de la ŝtata komunumo. Ili faras tion per esprimo de memdeviga komuna volo, do kiel memadministrata kolektivo. Ili estas rajtigataj fari tion, ĉar ili estas „reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo“ (BD 0). La kvazaŭ-leĝo, laŭ kiu funkciis la „Esperantismo“ ĝis anstataŭo fare de interkonsento de la ŝtatoj, estas la „verketo ‚Fundamento de Esperanto‘“ (vd. jam BD 4.3).

2. Alineo 2: [De silenta al eksplicita komuna interkonsento]

[2] Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1.) La 16-regula gramatiko; 2) la « Universala Vortaro »; 3) la « Ekzercaro » [A 2.1]. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj [A 2.2]; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3].

- 11** **A 2.1** konstatas, ke la Fundamento neniel ŝanĝas la lingvon. Ĝi nur eksplicitas jam ekzistantan multjaran „silentan interkonsenton“ en skriba formo, do faras el „silentan“ („kutimjuran“) interkonsenton skriban („leĝojuran“). Samtempe ĝi nomas la verkojn, sur kiu baziĝas la interkonsenteno: La Gramatikoj (FG) el la Unua Libro de 1887, la Universala Vortaro (UV) kun partoj de 1887 kaj aliaj de 1889, en la formo de 1893, fine la Ekzercaro (FE) de 1894 laŭ la prilaboro-stato de 1898.
- 12** **A 2.2** enkondukas la nocion „leĝo“, kiu estas ripetita dufoje en A 2.2 kaj A 2.3 kaj aperas – foje esprimita per sinonimoj - entute 14 (!) fojojn en la nur sep-paĝa aŭ dekunu-alinea Antaŭparolo.

3. Alineo 3: [„Oficiala“ (deviga) kontraŭ „privata“ (nur rekomendita)]

[3] Por ke ia regno estu forta kaj glora kaj povu sane disvolviĝadi, estas necese, ke ĉiu regnanto sciu, ke li neniam dependos de la kapricoj de tiu aŭ alia persono, sed devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj kaj en kiuj neniu havas la rajton fari arbitre laŭ persona bontrovo ian ŝanĝon aŭ aldonon [A 3.1]. Tiel same por ke nia afero bone progresadu, estas necese, ke ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝodonanto por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko [A 3.2]. Tial, por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, kaj por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto, kaj li petas, ke la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li, sed al tiu ĉi libro [A 3.3]. Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidis alie, ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem [A 3.4]. Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5]; ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas k. t. p., estas nur verkoj privataj, kiujn la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero - povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6].

13 Per komparo el la sfero de konstitucia juro, **A 3.1** enkondukas la principon de la laŭleĝeco (sinonime: principo de la regado de juro), kiu validu „tiel same“ (**A 3.2**) por Esperanto.

14 A 3.5 kaj A 3.6 enkondukas la kontrasto-paron „oficiala“ – „privata“, kiu egalas al la sinonima paro „deviga“ – „modela / rekomendata“. Oficiala estas nur FG, FE kaj UV, dum ĉiuj aliaj verkoj de Zamenhof, inkluzive de la lingvaĵo (malsame al ties konceptoj, „ideoj“) de A kaj BD, estas nur privataj. La ideo troviĝas ankaŭ en § 4 de la Bulonja Deklaracio – BD 4 - en inversigita sinsekvo (vd. supre):

[BD 4.3] La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo «Fundamento de Esperanto», en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon.

[BD 4.2] Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniu devigan.

[BD 4.6] Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

4. Alineo 4: [Interpretado per kunteksta komparo]

[4] Havante la karakteron de fundamento, la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1]. Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2]. Mi permesis al mi nur korekti la preserarojn; sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata

[A 4.3]. La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj [A 4.4]. La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovas la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5]; sed senkompare pli grandan danĝeron prezentus la ŝanĝado de la traduko de ia vorto, ĉar, perdinte la severan netuŝeblecon, la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, kaj, trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon [A 4.6]. Al ĉiu, kiu montros al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi respondos trankvile: jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti netuŝebla, ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, en kiu neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon [A 4.7].

a) Superrigardo

15 Alineoj 4, 5 kaj 6 rifutas tri – ankoraŭ nuntempe oftajn - objetojn:

- [A 4]: La Fundamento ne estas senerara kaj ne plene kohera.
- [A 5]: Ekzistas pli bonaj lernolibroj ol la Fundamento.
- [A 6]: Pro la Fundamento la lingvo ŝtoniĝas kaj ne povas evolui.

Alineoj 7 pri „novaj vortoj“ kaj 8 pri „formoj novaj“ detaligas la rifuton el alineo 6 kaj kune kun alineo 9 (monopolo de la Akademio) montras sur kiuj vojoj la lingvo - malgraŭ aŭ eĉ ĝuste pro la Fundamento - povas tamen evolui.

16 **A 4.1** ripetas la nun jam ofte elstarigitan principon de netuŝebleco, do la malpermeson semi dubojn pri la atingita stato de komuna konsento pri la ecoj de la lingvo. La frazo krome ripetas, ke tiu interkonsento aŭ komuna volo estas reprezentita per la tri verkoj FG, FE kaj UV, verkoj neniel novaj, sed nur „represitaj“.

17 **A 4.2 ĝis A 4.4** solvas la latentan konflikton inter „ĝusteco“ kaj „konstanteco“ favore al konstanteco. A 4.5 ĝis A 4.7 klarigas tiun decidon por „konstanteco antaŭ ĝusteco“ kaj donas argumentojn kaj motivojn, kial ĝi estas – ankoraŭ nuntempe - ĝusta. A 4.5 krome preskribas la interpretan metodon por eltrovi la „veran sencon“, do la „ĝustan“ sencon, nome per kunteksta komparo.

b) Eraraj tradukoj en la Universala Vortaro (A 4.2)

18 **A 4.2** referencas al la „unua eldono de la « **Universala Vortaro** »“, do la eldono, aperigita en aŭgusto 1893, kvankam sur la titol-paĝo estas indikita la eldon-jaro 1894. Fakte la Fundamento en 1905 represas la duan eldonon de UV de 1898. La nura diferenco inter ambaŭ eldonoj tamen estas la sola „vipuro“ (2-a eld.) kontraste al „vipero“ (1-a eld.), tiel ke la aserto baze estas ĝusta.

19 A 4.2 krome atentigas pri la facile konstatebla fakto, ke precipe la **anglaj** tradukoj enhavas relative multajn erarojn kompare al la tradukoj al la aliaj lingvoj. Tio ne estas surprizo. Estas konate, ke Zamenhof tiel malmulte regis la anglan, ke li petis helpon de iu „J. St.“ por traduki la anglan pra-UL. Okaze de intervjuo dum la 6a UK en Vaŝingtono 1910 li, en la komenco de l'intervjuo, konfesis angle, zorge elektante ĉiun vorton: „Mia kono pri la angla estas teoria. Mi ne povas interparoli per tiu lingvo. La vortoj venas tre malrapide. Mi preferas uzi mian propran“ [do Esperanton].¹⁶

20 La atentigo de Zamenhof eksplicite koncernas nur UV, sed ĝi estas same konstatebla ankaŭ por la angla FG kaj - malpli forte - la anglaj tradukoj en FE. El

685

¹⁶ Kataluna Esperantisto 1910, p. 100.

tio sekvas, ke la anglaj tradukoj havas malpli gravan valoron por eltrovi la „veran sencon“ de vorto (vd. A 4.5). Ilin oni devas aparte zorge kontroli, ĉu ili ĝuste esprimas la deziratan sencon. Detalojn vd. en la ĉapitro „la angla en la F-to“, ekzemplojn (*fabriko, pantalono* k.t.p.) vd. en la vortara parto.

c) Korekto nur de la preseraroj (A 4.3)

- 21 Detalojn pri ŝanĝoj inter la unuaj kaj duaj eldonoj de FE kaj UV raportas Albault 1963. BK atentigas pri ili ĉe la koncernaj ĉapitroj aŭ vortaraj artikoloj. Pri la metodo kp. ankaŭ la Antaŭparolon al FK 1907 malsupre.

d) Interpretado de la vera senco per kunteksta komparo (A 4.5)

- 22 **A 4.5** preskribas la plej gravan **interpret-regulon** por ĝusta kompreno de UV: Oni devas eltrovi la „veran sencon“ de vorto per kunteksta komparo, precipe kun la tradukoj al la aliaj referenc-lingvoj. Farante tion, oni tamen konsideru, ke la anglaj tradukoj estas malpli fidindaj ol la tradukoj al la aliaj lingvoj (A 4.2).
- 23 Kvankam A 4.2 eksplicite, sed nur kiel plej okulfrapa ekzemplo, mencias la „unuan eldonon de la Universala Vortaro“, la interpreto-regulo de A 4.5 estas aplikenda same al la interpreto de la lecion-finaj vortoj en FE. A 4.5 parolas pri la „nacia traduko de tiu au alia vorto“ sen specifi en kiu parto de la Fundamento tiu traduko estas registrita. Ne ekzistas senc-hava motivo por limigi la interpret-regulon de A 4.5 nur al la UV kaj eble interpreti FE laŭ iu alia metodo (kiu?). La funkcio de la interpret-metodo estas la sama por ĉiuj tri partoj de la Fundamento laŭ la stato de 1905 kaj por ĉiuj postaj aldonoj (OA): Gardi la „konfidon kaj apogon“ de la subtenantoj de Esperanto.
- 24 Ke la interpret-regulo de A 4.5 estas aplikenda al la Fundamento kiel tuto, sekvas ankaŭ el jena konsidero: Kiel denove kaj denove ripetite de la Antaŭparolo, la Fundamento estas „leĝo“ (kodekso). Leĝojn oni interpretas precize tiel, kiel ordonas ĝin A 4.5, nome serĉante la „veran sencon“ per kunteksta komparo. Kvazaŭjura karaktero de la Fundamento kaj preskribita interpret-metodo perfekte harmonias.
- 25 Kunteksta komparado okazas laŭ klare difinitaj rutinoj:
1. Elirpunkto ĉiam estas la vortosenco (interpreto laŭ **vortosenco** – kion ĝenerale signifas vorto?).
 2. La rezulto de la interpretado laŭ la vortosenco estas kontrolenda per la kunteksto, en kiu nocio estas uzata (interpreto laŭ la **kunteksto** – en kiu ĉapitro aperas vorto, ĉu ĝi estas uzata ĉiam en la sama signifo, ĉu vortoj kombinitaj kun ĝi klarigas la intencitan signifon?).
 3. La rezulto el la du unuaj metodoj estas kontrolenda laŭ la celo de iu regulo (interpreto laŭ la **celo** aŭ **teleologia** interpreto – ĉu la rezulto de la interpretoj laŭ vortosenco kaj kunteksto estas senchava, racia, praktikebla, konforma al la bazaj celoj de la tuta tekstaro?)
 4. Subtene oni povas esplori la ekeston de iu regulo kaj kontroli, ĉu ties ekesta historio konfirmas la rezulton trovitan laŭ metodoj 1. ĝis 3. (interpreto laŭ **ekesto** – ĉu pri iu regule okazis diskuto kaj ĝi estas ties rezulto, aŭ inverse ĉu iu demando simple ne estis konsiderita?).

e) La nocio „logiko“ ĉe Zamenhof

- 26 En multaj prilingvaj diskutoj esperantistoj argumentas per „logiko“¹⁷, referencante al la iom ofta uzo de tiu termino ĉe Zamenhof. Li tamen uzas la vorton malprecize, metafore kaj erarige. Kutime li celas „raciigo“, „koherigo“ aŭ „prudenta reguligo“ en planlingvo, kontraste al la historie kreskitaj neraciaĵoj en etnaj lingvoj, kiel montras ekzemple kaj i.a. la sekvantaj Lingvaj Respondoj (selekto):

LR 111 (1890) [Pri “estu timata”]: „... En ĉiu vivanta lingvo estas permesita uzi nur tiujn formojn, kiujn aliaj personoj jam uzis antaŭ vi; sed en la lingvo internacia oni devas obei sole nur la *logikon*. La *logiko* diras, ke *ĉia* verbo povas havi pasivon, se nur la *senco* ĝin permesas. Sed en la verbo “timi” la *senco* tute bone permesas pasivon, kiel en aliaj verboj. ...“ [LR 111. La Esperantisto 1890, p. 32] — „logiko“ legu: „racio“.

LR 66 A (1893) [Pri la divido de vortoj en la skribo]: ... Eĉ se vi dividus ekzemple “aparteni-s”, ni vidus en tio ĉi nenion malregulan, kvankam la aliaj lingvoj (tute *sen ia logika kaŭzo*) ne permesas tian dividadon.“ [LR 66 A. Esperantisto, 1893, p. 32]. — Legu: „sen ia racia kaŭzo“.

LR 44 (1905) [Pri idiotismoj en Esperanto]: La esprimon *vidiĝi* anstataŭ *elrigardi* mi trovas tute bona. Mi esperas, ke iom post iom ĉiuj idiotismoj malaperos kaj cedos sian lokon al esprimoj tute *logikaj* kaj internaciaj. Tamen laŭ mia opinio ni devas fari tian anstataŭigadon nur en tia okazo, se ni povas tion ĉi fari tute *oportune*; sed en okazo, se ni por ia idiotismo *ne* trovos pli bonan esprimon *pure logikan*, tio ĉi ne devas nin ĉagreni; kaj la idiotismo povas tute oportune resti kiel “esperantismo”, se ĝi nur estos komune *akceptata*. [LR 44. Let. al Couturat. *Lingvo Internacia*, 1905, p. 545].

LR 101 (1907) [Pri “ioj”, “tioj”, “kioj” k.t.p.]: Teorie la ĵus diritaj formoj tute bone povas havi multenombro tiel same, kiel ili havas akuzativon; sed en la *praktiko* mi ne konsilas al vi uzi la diritajn vortojn en multenombro, ĉar laŭ mia opinio ilia *senco* tion ĉi ne permesas. “Tio” prezentas ja ne ian difinitan objekton, sed ian *bildon* (aŭ abstraktan ideon), kaj bildo restas ĉiam ununombra sendepende de tio, ĉu ĝi konsistas el unu objekto aŭ el multaj. Tamen se aperas ia tre malofta okazo, kiam la *logiko postulas*, ke ni uzu la diritajn vortojn en multenombro, tiam la *gramatiko* de nia lingvo tion ĉi ne malpermesas. ... [LR 107. Respondo 18, *La Revuo*, 1907, Junio].

LR 121 A (1911) [„ambaŭ“ anstataŭ „la ambaŭ“]: ... Kvankam mi ofte uzis la formon “la ambaŭ”, tamen mi opinias nun, ke *pli logike estas* uzi la vorton “ambaŭ” *sen* artikolo. [LR 121 A. Respondo 54, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 221]. — Legu: „pli racie“, „pli konsekvence“, „pli laŭsisteme“, „pli kohere“.

LR 110 (1911) [Ĉu „okupita“ aŭ „okupata“?]: ... Sed eble la formo estas *kontraŭlogika*? Ne. Se iu ion okupas (en la *senco* “prenas en posedon”), tiam en

685

¹⁷ Vd. ekz. PAG⁴1980, ⁵1985, § 39: „El la nomoj de la tempodividoj Zamenhof majuskligis nur la monatonomojn (Junio, Decembro ktp.), sed ne la nomojn de sezono (somero, vintro ktp.) nek de tago (lundo, dimanĉo). [...] Ŝajnus pli simple kaj logike skribi per minusklo ĉiujn tiujn vortojn, [...]“ - Schwartz ĉ. 1962, p. 17: „... La fama postulaĵo, multe citita dum la [ata-ita-] batalo, estas de Zamenhof mem: “*En artefarita lingvo oni devas obei sole la logikon.*” [malpreciza citaĵo el LR 111 (1890), vd. tuj en la teksto]. — La ideoj de tiu ĉi ĉapitro baziĝas ĉefe sur Velger, Kontribuoj 1999, ĉap. 7 „Pri la rolo de la logiko“.

tiu momento la io estas okupata de la iu; ekzemple kiam la malamikoj okupas nian urbon, ĝi estas en tiu momento okupata de ili; se mi estis tute libera, sed en la nuna momento oni donas al mi ian laboron, kiu min ekokupas, mi povas diri, ke mi estas nun okupata de tiu laboro, t.e. ĝi forprenas en sian posedon mian tempon; sed se mi parolas pri laboroj, kiuj estis donitaj al mi jam *antaŭe*, t.e. se mi parolas ne pri la *ago* de ekokupo mem, sed pri la *stato*, en kiu mi troviĝas, tiam mi devas diri "mi estas okupita". Estas vero, ke, transformante la pasivan formon de la citita frazo en aktivan, ni ofte uzas la formon *nuntempan* ("laboroj min tre okupas"), sed tion ni faras por tio, ke la formo "okupis" ne pensigu, ke mia okupiteco jam pasis. En la *pasiva* formo ni ne bezonas timi tiun malkompreniĝon, ĉar "mi estas okupita" montras, ke io min okupis kaj la okupiteco ankoraŭ *daŭras*. La senco de "okupi" havas du nuancojn: *preni* en posedon kaj *teni* en posedo; per la formo "mi estas okupita" ni esprimas samtempe *ambaŭ* nuancojn, dum la formo "mi estas okupata" esprimus nur la *unuan* nuancon. Cetere pri la vorto "okupi" mi devas ripeti tion, kion mi diris pri multaj aliaj lingvaj demandoj; ĉiufoje, kiam la logiko ne donas al ni respondon tute klaran kaj senduban, kiu ne ofendus nian lingvan senton, ni devas peni konformigi nin al la ekzistantaj *kutimoj*; kaj la kutimo de la popoloj, kiel mi supre montris, postulas, ke ni diru "mi estas okupita". [LR 110. Respondo 48, *Oficiala Gazeto*, III, 1911, p. 293].

- 27 En strikta senco „logiko“ havas jenan signifon¹⁸: Por veni al konkludoj, oni bezonas premisojn. Se la konkludo estu normo (regulo), tiam almenaŭ unu el la premisoj jam devas esti normo (regulo). Sole el faktoj oni ne povas dedukti normojn. (Ni ĉi tie parolas pri sociaj normoj, ne pri la t.n. „naturoleĝoj“, kiuj nur metafore povas esti nomataj „leĝoj“.) La Fundamento estas por ni Esperanto-parolantoj la „libro de normaj premisoj“. La demando pri la ĝusteco de tiuj premisoj ne stariĝas, ĉar ĉe normoj ne temas pri ĝusteco aŭ malĝusteco, sed pri valideco aŭ nevalideco. Ĉiuj normoj de la Fundamento estas leĝe validaj ekde la 9-a de agosto 1905, kiam la unua internacia kongreso de Esperanto-parolantoj decidis tion. Logika konkludo el tiuj premisoj ne estas kreado de novaj reguloj, sed nur la eksplicitigo de eventuale implicitaj, jam estantaj reguloj. La logiko ne povas krei ion esence novan.
- 28 Oni devas konsciiĝi, ke la solvo de lingvaj demandoj ofte ne eblas per logika deduktado, ĉar la Fundamento simple ne entenas la bezonatajn premisajn normojn; tiel ke oni devas *racie* inventi novajn (ĝenerale neoficialajn) regulojn. Ekzemplo estas la formato de dato, skribita nur per ciferoj. La Fundamento ne havas regulon aŭ modelon pri tio. Tial ne eblas „logike“ - per apliko de normo - decidi, ĉu la ĝusta formato estu „15.12.1859“ aŭ „1859-12-15“ aŭ iu alia. La demando ne estas devige decidebla surbaze de „komune homa logiko“. Temas pri (malsamaj) kutimoj.
- 29 Interpretantoj de la Fundamento ofte ne sufiĉe zorge konsciiĝas al si, kio fakte troviĝas en la Fundamento, kaj pri kio ĝi silentas. Ili projekcias siajn proprajn ideojn, pensokutimojn, subkomprenaĵojn, „memkompreneblaĵojn“ en la Fundamenton, kaj poste „logike“ eltiras ĉion ĉi tion el la teksto - prestidigitista artifiko, kiu ofte restas nerimarkata de tiuj interpretantoj.¹⁹
- 30 Kiam Zamenhof uzas la vorton „logiko“, la kunteksto ĝenerale montras, ke ne temas pri strikta deduktado el donitaj premisoj, sed pri io, kion oni prefere nomu „**raciigo**“, „**koherigo**“ aŭ „**prudenta reguligo**“. La esprimo „sen ia logika kaŭzo“ en LR 66 A pri la vort-interna divido ekzemple signifas „sen komunikada neceseco“. Estiĝas tipaj miskomprenoj kaj senĉesaj polemikaj debatoj, kiam oni tiun procedon de raciigo kaj prudenta reguligo simple identigas kun strikta logika deduktado. Sub la sugestio de la prestiĝa nocio „logiko“ iuj erare opinias, ke ili povas „logike pruvi“

685

¹⁸ La sekvantaj komentoj baziĝas sur Velger, Kontribuoj, 1999.

¹⁹ Ekzemplo de tia agado estas multaj diskuteroj en la ata-ita-disputo, vd. ĉe R 6.

sian pravecon, dum fakte temas nur pri certaj konsideroj prudentaj, kiuj principe neniel povas estigi „la unusolan, tuthomaran, nerefuteblan veron“. Ne temas ĉi tie pri „la unika, universala, al ĉiuj homoj komuna logiko, kiu estas tiu de la scienco“ (Ŝulco 1985).

- 31 Velger prave rekomendas uzi la vorton „logiko“ nur tiam, kiam temas en strikta, teknika senco pri logiko. Oni ne sekvu la ekzemplon de Zamenhof, kiu bedaurinde ofte uzis ĝin en sufiĉe vasta, nepreciza senco. Kie li skribis „logiko“, oni ĝenerale legu „racio“.

5. Alineo 5: [Fundamento kiel gvida kontrol-dokumento]

[5] La « Fundamento de Esperanto » tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto [A 5.1]. Ho, ne! [A 5.2] Kiu volas perfektigi en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, multe pli bonajn kaj pli vastajn, kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj por ĉiu nacio aparte kaj el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj tre bone kaj zorgeme, sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo [A 5.3]. Sed la « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto kiel konstanta gvida dokumento, por ke li bone ellernu kaj per ofta enrigardado konstante memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla, por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, kiuj devas troviĝi en ĉiuj lernoverkoj de Esperanto, de la vortoj kaj reguloj rekomendataj private, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobatataj [A 5.4]. La « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco [A 5.5].

- 32 La ĉefa rolo de la Fundamento estas tiu de „konstanta kontrolilo“ (A 5.5). Ĝi do alivorte estas „kodekso“, „leĝo“ aŭ „mezurilo“ de la ĝenerala prilingva interkonsento de la esperantistoj. Nur ĝi decidas pri lingva „ĝusteco“ aŭ „malĝusteco“. Ĝia funkcio estas gardi la unuecon de la lingvo (A 1.1 kaj multloke).
- 33 La Fundamento male **ne** „devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto“ (A 5.1). Tiu jam en 1905 evidenta konstato estas konsekvenco el jenaj konsideroj: La tri partoj de la Fundamento precipe decidas pri dubaj demandoj. Oni povas kompreni ĝin kiel kolekto de „lingvaj respondoj“. Tiuj respondoj estas donitaj en laŭeble konciza formo, donanta nur la finan esencon de diskuto. Ofte ekzistas nur unu au du ekzemploj pri iu problemo. Tio por instruaj celoj kutime estas tro malmulte. Tial ne nur estas permesate, sed eĉ dezirate, ke lernolibroj profundigu per pliaj klarigoj la esencajn instruojn, kiujn fiksas la Fundamento. Kerna celo de la Fundamento krome estas trovi ekvilibron inter stabileco kaj evoluipovo. Se oni miskomprenu opinius, ke ekzemple la UV estas la plej bona vortaro de Esperanto, tio rekte lezus la principon, ke la lingvo havu la eblecon evolui.
- 34 **A 5.3** aludas la „Kolekton aprobitan de d-ro Zamenhof“ (Paris: Hachette 1901-1905), sed ankaŭ ekz. la „germanajn vortarojn“ de Jürgensen (1904-1905). En la origina propono de Z al UK 1, la projektita, sed poste de la Kongreso ne aprobita teksto de BD enhavis alineon 7, kiu eksplicite menciis: „Por faciligi al la komencantaj esperantistoj la elekton de fideblaj libroj kaj gardi ilin kontraŭ uzado de libroj, kiuj instruas tute eraran lingvon, estas eldonita serio da libroj, kiuj portas sur si la aprobon de la aŭtoro de la lingvo. ...“. Detalojn vd. ĉe BD 6.
- 35 **A 5.4** difinas, kio estas „bona esperantisto“, nome esperantisto (BD 5), kiu bone konas la Fundamenton en ĝia aktuala versio, do kun ĉiuj OA (A 8, A 10.4) kaj la principoj de A (A 11.2). Pro tiu kono li povas distingi inter vortoj kaj reguloj „oficialaj“ (devigaj, netuŝeblaj) kaj private rekomendataj (vd. supre A 3).

- 36 La vortumon „**kiuj devas troviĝi en ĉiuj lernoverkoj de Esperanto**“ oni devas interpreti en la kunteksto kun A 5.3 kiel apelon al la verkistoj de lernolibroj kaj vortaroj prezenti al lernantoj Fundamentan Esperanton kaj ne iujn privatajn variaĵojn de ĝi.

6. Alineo 6: [Evoluipovo malgraŭ netuŝebleco]

[6] Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara [A 6.1]. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos ... [A 6.2] Ho, ne! Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante pliboniĝadi kaj perfektigiĝadi [A 6.3]; la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektigado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga rompado kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuzaj kaj sendanĝeraj [A 6.4]. Pli detale mi parolos pri tio ĉi en la Bulonja kongreso [A 6.5]; nun mi diros pri tio ĉi nur kelkajn vortojn, por ke mia opinio ne ŝajnu tro paradoksa [A 6.6]:

- 37 A 6 ripetas, ke la Fundamento ne volas malhelpi kaj ne malhelpas „konstantan pliboniĝadon kaj perfektigadon“ (A. 6.3) de Esperanto. Ĝi nur malhelpu, ke la evoluo okazu per arbitra kaj detrua maniero (A 6.4).
- 38 La anonco, ke Zamenhof detaligos siajn ideojn pri la evoluipovo en la Bulonja kongreso (A 6.5), ne realiĝis. Pro tempo-manko dum la kongreso li devis prokrasti la planon. Li tamen uzis sian preparitan materialon por „Cirkulera Letero al la ... Lingva Komitato - Pri Neologismoj“ de 1906-11-22 [LZ I 299]. Ĉar ĝi estas grava interpretilo por la ĝusta kompreno de alineoj 7 ĝis 9 ni republikigas ĝin fine de tiu ĉapitro.

7. Alineo 7: [„Novaj vortoj“]

[7] 1) Riĉiĝadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun, per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo, kaj zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo; sed tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj; oni devas ilin uzadi nur en la literaturo; sed en korespondado kun personoj nekonataj estas bone ĉiam peni uzadi nur vortojn el la « Fundamento » ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro [A 7.1]. Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel « Aldonon al la Fundamento » [A 7.2].

- 39 A 7 ĝis A 9 enhavas la kernajn preskribojn por garantii „naturan, senkonfuzan kaj sendanĝeran“ evoluon (A 6.4) kaj detaligas la preskribojn de A 6 (kp. A 6.6). La Antaŭparolo distingas inter „novaj vortoj“ (A 7) kaj „formoj novaj“ (A 8) kaj kreas monopolon de la Akademio por plilarĝigi la Fundamenton per novaj vortoj aŭ formoj novaj, krome per „novaj reguloj“ (A 9).
- 40 Kvankam la uzo de la terminoj „novaj vortoj“ kaj „formoj novaj“ en la Antaŭparolo estas preciza, ekzistas ofta konfuzo en nuntempaj diskutoj. Sinonime por „formoj novaj“ („A 8-vortoj“) Zamenhof uzis la vorton „neologismo“, dum la nuntempa ĝenerala lingvo-uzo kutime celas per „neologismo“ (aŭ „novvorto“) „novajn vortojn“ („A 7-vortojn“) aŭ eĉ „fremdvortojn“ (internaciajn vortojn) laŭ R 15 FG aŭ sendistinge ĉiujn tri specojn. Por eviti ĉian konfuzon, pro tio estas konsilinde aŭ uzi la oficialan terminaron de la Antaŭparolo kaj R 15 aŭ paroli ĵargone pri **A 8-**, **A 7-** aŭ **R 15-vortoj**. La distingo estas grava, ĉar „fremdaj vortoj“ (R 15) dekomence

estas parto de Esperanto, „novaj vortoj“ (A 7) estas afero tute senproblema, eĉ „banala“ (Zamenhof), dum „formoj novaj“ (A 8) subfalas pli striktajn regulojn, ĉar ĉe ili la danĝero detrui la unuecon de la lingvo estas pli forta. Detalojn de tiu „**Fundamenta semaforon**“ (R 15 „verda“, A 7 „flava“ kaj A 8 „ruĝa“ - LR 54) vd. ĉe R 15.

41 [Daŭrigota].

8. Alineo 8: [„Formoj novaj“]

[8] 2) Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova [A 8.1]. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo [A 8.2]. Sed, prezentante parton de la fundamento, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, kaj tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektigado la unueco de Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj [A 8.3].

a) Superrigardo

- 42 „Formoj novaj“ estas nocio, kiu ampleksas **kaj vortojn** novajn **kaj regulojn** novajn. Ili plej forte menacas la unuecon de Esperanto kaj inter esperantistoj (A 1.1, A 8.3 kaj multloke). Pro tio ekzistas monopolo de „aŭtoritata centra institucio“ (ACI) por enkonduki ilin en formala proceduro. Tio distingas ilin de vortoj fremdaj laŭ R 15 kaj novaj vortoj laŭ A 7, kiujn ĉiuj esperantistoj povas ekuzi sen peki kontraŭ „ĝusta“ Esperanto. En la triklasa „Fundamenta semaforo“ de „neologismoj“ formoj novaj estas la plej alta, „ruĝa“ ŝtupo.
- 43 A 8 estas resumita en **A 10.4**. Ambaŭ normoj devas esti interpretataj kune. Por decido pri formoj novaj la Statuto de la Akademio preskribas plimulton de du trionoj de ĉiuj membroj (seĝoj), do kutime de 30 el 45 voĉoj (**art. 23**), kontraste al la „absoluta plimulto de la voĉdonantoj, se almenaŭ du trionoj de la membroj voĉdonis“ (do 16 el 30), sufiĉa por decidoj pri vortoj laŭ R 15 aŭ A 7.
- 44 En diskutoj pri vortoj por novaj ideoj ofte ekzistas **terminara malklareco** (vd. supre ĉe A 7). Zamenhof uzis la terminon „neologismo“ sinonime (nur) por „formo nova“ (A 8-vorto), dum ofte diskutantoj ne distingas inter „vortoj fremdaj“ (R 15), „novaj vortoj“ (A 7) kaj „formoj novaj“ (A 8), nomante ĉiujn kategoriojn „neologismoj“. Tiu uzo estas evitenda, ĉar ĝi nebuligas la klaran Fundamentan sistemon triklasan.
- 45 A 8 mem ne **difinas** la nocion „formo nova“. La difino estas konkludenda el la kontrasto kun „vortoj novaj“ (A 7) kaj „vortoj fremdaj“ (R 15) laŭ la klarigoj de Z (plej grava en LR 54). Klasikaj **ekzemploj** estas uzo de „navo“ (en la senco de akvoveturilo) anstataŭ la samsignifa „ŝipo“ (LR 54), proleto (formo nova) anstataŭ proletario (formo malnova), arkitektur- anstataŭ arĥitektur- (OA 8), „spontan-“ anstataŭ „spontane-“ (ne jam decidita de la Akademio) k.t.p. Temas do pri samsignifaj nocioj, kiuj estas esprimitaj per malsamaj *unuradikaj* vortformoj aŭ per *unuradikaj* malsamaj vortoj (**unuradikaj sinonimoj**). *Plurradikaj* sinonimoj (kanon-anstataŭ paŭ-il-eg-, frid- anstataŭ mal'varm-) *ne* estas formoj novaj laŭ A 8, sed novaj vortoj laŭ A 7.
- 46 Pro la aparta strukturo de Esperanto kiel „vortara lingvo“ (ĉiuj lingvoelementoj inkluzive de la gramatikaj markiloj estas memstare notitaj en la Vortaro Oficiala) nova elemento samtempe povas esti formo nova aŭ **regulo nova**. La Akademio

ekzemple aldonis la numeralon „nul“ al la Vortaro Oficiala. Per tio ĝi samtempe grandigis la regulon de R 4 pri la numeraloj.

b) Ĉefaj grupoj de vortformoj novaj

- 47 Kiel menciite en la superrigardo, la Fundamento parolas nur pri (vort-)formo nova en la senco de A 8, se temas pri *unuradika sinonimo* (proletari- → prolet-; klasifik- → klasif-; spontane- → spontan-). La unua ĉefa apliksfero pro tio estas **retroevoluigitaj radikoj**, kiuj elĵetas fremdlingvajjn pseŭdosufiksojn (ekz. vortoj finiĝantaj je la latinaj -aci, -ici, -uci, -ifik, -ari k.m.a.) kaj reduktas radikon al ĝia kerno. Dua grupo estas vortformoj, kiuj anstataŭigas la literon kaj sonon -ĥ- per -k- (arĥitektur- → arkitektur).

aa) Retroevoluigitaj radikoj

Literaturo (selekto): Christaller, Paul. 1a eld. 1910, 2a plil. eld. 192xx. - Christaller, P[aul] (1914). Evoluo de Esperanto. En: Festschrift anlässlich des 9. Deutschen Esperanto-Kongresses in Leipzig 1914, p. 321-329.

- 48 La fenomeno delonge estas konata kaj jam detale priskribita de Christaller antaŭ la unua mondmilito.

bb) Vortformoj kun -k- anstataŭ -ĥ-

- 49 Vd. ekz. en OA 8 la formojn je ark- (arkivo) apud la formoj je arĥ- (arĥivo). [Daŭrigota].

c) Problemoj de sinonimeco

Literaturo (selekto): Vatré, Henri. Neologisma Glosaro.

- 50 puĉ- → golp-. [Daŭrigota].

d) La struktura problemo de A 8

Literaturo (selekto): Kück, Andreas. Ne oficialigitaj, sed oficiale tolerataj almenaŭ kondiĉe: "un" kaj similaj formoj novaj. En: Ipernity (2012-10-31).²⁰

- 51 Formo nova kiel tia estas kontraŭfundamenta, do laŭdifine „malĝusta“ Esperanto. Kiu ekzemple nuntempe uzas la formon novan "spontan-a" anstataŭ la F-tan "spontane-a" en laŭvorta interpreto de A 8 faras lingvan eraron. Ĉe la unua apero de la formo nova la Akademio devus deklari ĝin "malĝusta". Sed ĉar multaj homoj kaj vortaroj nuntempe kaj de jaroj preferas la formon novan, pli kaj pli ekestas komuna interkonsento, ke *spontan-a* ne (plu) estas malĝusta, sed allasebla, tolerebla (aŭ eĉ preferinda) apud la F-ta *spontane-a*. Ekestas dilemo: A 8 volas gardi la unuecon de la lingvo, tamen ne malebligi la evoluon de modernaj formoj. Neeviteble ekzistas kontraŭfundamenta stato dum la periodo ĝis la Akademio oficialigas la formon novan.
- 52 Por mallongigi tiun "maturiĝan periodon" la Akademio en 1967 evoluigis la rimedon de „**tolerdeklaro**“. Ĝi forprenas de la formo nova la stigmon de "malĝusteco" kaj ebligas liberan konkuradon de du "ĝustaj" formoj, nome de la formo malnova oficiala kaj de la formo nova tolerata, sed ne jam oficiala. Tio helpas al la Akademio ekscii, ĉu la formo nova vere estas vivipova. En la kazo de "konversi" apud "konversacii tio ekz. ne ŝajnas tiel esti. Tolerdeklaro estas kvazaŭ kandidata ŝtupo por posta oficialigo (t.e. laŭdifine eterne ĝusta Esperanto). Se "kandidato-vorto" ne sukcesas en la testo, nenio malavantaĝo okazas, ĝi mem fariĝas arkaismo kaj falas en forgeson. Inverse estas malavantaĝo: Kvankam multaj homoj preferas "spontan-" oficialaj ekzamenoj devus jughu ĝin

685

²⁰ <http://www.ipernity.com/blog/55667/424985> (2014-09).

"malghusta". La ebleco krei formojn novajn estus barita, A8 ne plu havus aplik-sferon.

- 53** Tolerdeklaroj estas **Fundament-konformaj**. Se la Akademio laŭ A 8 havas la rajton eĉ oficialigi formon novan (t.e. doni al ĝi la statuson de eterne ĝusta Esperanto), tiam ĝi kompreneble ankaŭ havas la rajton doni al ĝi malpli fortan statuson, nome la elprovan, kandidatan (la rajto je la pli forta rimedo inkluzivas la rajton je la pli malforta - *argumentum de maiore ad minorem*). Tio servas por entute ebligi en laŭorda (do ne ĥaos-a) maniero aplikon de A 8 kaj realigas la principon de klareco.
- 54** Ĝis nun la Akademio faris tolerdeklarojn pri jenaj formoj, ĉiuj datitaj 1967-06-20 (Aktoj I, p. 73). Plej multaj el 1967 estis sep jarojn poste, en 1974, oficialigitaj (detalojn vd. en BK II):

tolerata formo	oficiala formo	komento
buĝet-o	budĝet-o [OA 3.1]	oficialigita per OA 8 (1974)
dekor-i	dekoraci-o [OA 3.2]	ankoraŭ nur tolerata
feder-i	federaci-o [OA 1]	oficialigita per OA 8 (1974)
-i	-uj (landnomoj) [UV]	ankoraŭ nur tolerata
kemi-o	ĥemi-o [UV]	oficialigita per OA 8 (1974)
koncentr-i	koncentr-a [OA 1]	oficialigita per OA 8 (1974)
konvers-i	konversaci-o [OA 3.2]	ankoraŭ nur tolerata
mekanik-o	meĥanik-o [UV]	oficialigita per OA 8 (1974)
prolet-o	proletari-o [OA 3.2]	oficialigita per OA 8 (1974)
rivel-i	revelaci-o [OA 3.2]	oficialigita per OA 8 (1974)

En BRO, Aktoj II 1975, p. 39, krome legeblas jena piednoto 3 ĉe „unu“: „La eliziita formo un' estas tolerebla en nombrado kaj en ordonaj esprimoj el la tipo de: „un'! du! un'! du!“ en ekzercoj dancaj, gimnastikaj, militistaj, ks.“ Kŭck 2012 nomas la elizitan formon *un'* „formo nova kondiĉe tolerata“. Kiel diskutite en la ĉapitro pri BRO malsupre, ni tamen opinias, ke tiaj „kaŝitaj“ kaj „surprizaj“ decidoj rande de alicela verko ne plenumas la F-tajn kondiĉojn pri oficialaj decidoj. Ni rigardas la formon *un'* pro tio kiel (senĉava, sed) privata tolerdeklaro, ne kapabla forigi oficiale la statuson de kontraŭfundamenteco. Kp. ankaŭ la formon „deks“ tuj poste.

- 55** „Kandidatoj“ por estontaj tolerdeklaroj (aŭ rektaj oficialigoj, sen „maturiĝa periodo“) estas ekzemple la sekvaj (detalojn vd. en BK II):

tolerinda formo	oficiala formo	komento
deks'	dekstr-a [UV, FE 28]	tolerebla en ordonaj esprimoj el la tipo de: „deks'! liv'! deks'! liv'!“ en ekzercoj dancaj, gimnastikaj, militistaj, ks. kiel proponita de Albault en 1969 ²¹
firma-o	firm-o [UV]	firmao jam en EV 1923. Laŭ PIV 2005: „ <i>Firmao</i> estas nun pli ofte uzata ol <i>firmo</i> .“
kamera-o	kamer-o [UV]	tiel la preferata formo de PIV 2005 (nur) por la senco de fotoaparato, trovebla jam en PIV 1970
kaos-o	ĥaos-o [UV]	formo kun k- trovebla jam en EV 1923 ĝis PIV 2005

685

²¹ Deks! Liv! Deks! Liv! En: Scienca Revuo vol. 20 (1969), n. 3-4 (79-80), p. 81-92. Rete legebla en <https://scienca-revuo.info/issue/view/77>.

korus-o	ĥor-o [UV]	propono de Z de 1906-11 al la LK, LZ I 315.
meteologi-o	meteorologi-o [OA 2.1]	uzata almenaŭ de la Meteorologia terminaro (1961) ²² ĝis PIV 2005.
spont-a aŭ spontan-a	spontane-a [OA 3.2]	laŭ PIV 2005 prave: „ <i>spontana</i> estas nun pli ofte uzata, ol la oficiala <i>spontanea</i> “; sponta jam en Christaller 1910, 1923
un’	unu [UV, R 4]	tolerebla en nombrado kaj en ordonaj esprimoj el la tipo de: “un’! du! un’! du!” en ekzercoj dancaj, gimnastikaj, militistaj, ks. kiel proponita de Albault en BRO 1975

Ĉar decidoj de la Akademio ĉiam ankaŭ baziĝas sur lingvo-politikaj „modoj“, la Vortaro Oficiala rezulte ne ĉiam estas „teorie-ideale“ kohera kaj konsekvenca. Apenaŭ ekzistas racia kialo, kial – ekzemple - kemio apud ĥemio estas „ĝusta“, sed kaoso apud ĥaoso laŭ la stato en 2014 oficiale ne. Tiaj fenomenoj estas klarigeblaj nur per eksterlingvaj cirkonstancoj. Dum la „franca periodo“ antaŭ la unua mondmilito la ĉefaj agantoj en la Akademio estis malfavore al –ĥ–, ekzemple la prezidanto Th. Cart mem (vd. BK I ĉe R 0 – alfabeto). En la periodo post la dua mondmilito denove estis parolantoj de ĉefe okcident-eŭropaj lingvoj, kiuj dominis la Akademion, dum pro la politika situacio („Fera Kurteno“) estis nur malmultaj slavoj, ofte malpli kritika kontraŭ la ĥ-formoj. Intertempe la pendolo resvingis kaj vortformoj kun –ĥ– denove estas pli ofte uzataj. Jam ĉirkaŭ la centjara jubileo de Esperanto en 1987, je kies okazo oni multe okupiĝis pri la fruepokaj tekstoj, oni „remalkovris“ la malnovajn formojn kun –ĥ– kaj elmontris sian eruditecon subite uzante la tiam jam tre ekstermodajn formojn. Tion bone spegulas la elkrioj de la anglalingvano Akademiano Bernard Golden: „La ĥo-malsano atakas "Heroldo"! (1986) kaj denove „La ĥo-malsano atakas ankoraŭfoje!“ (1987).²³

Akademio konscia pri siaj devoj kaj propra historio devus distancigi sin de tiaj modoj kaj peni je laŭeble granda kohereco de VO. En la kadro de A 8 tio signifas, akcepti la realon kaj agnoski, ke la fakte vaste uzataj formoj *kaoso* kaj *spontana* ne plu estas rigardataj kiel „eraroj“.

e) „tro neoportuna“

- 56 La nocio de „troa neoportuneco“ estas interpretenda en la kunteksto de A 9.2-3, kiu preskribas:

„Sed en la praktiko ni (pro kaŭzoj jam multajn fojojn preparolitaj) devas kompreneble esti tre singardaj kun ĉia « perfektigado » de la lingvo [A 9.2]: a) ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco [A 9.3].“

- 57 Ambau esprimoj "troa neoportuneco" kaj "efektiva neceseco" estas t.n. "**necertaj juraj nocioj**"²⁴ Temas pri nocioj kun nedifinitaj, plursencaj signifoj, kiuj bezonas konkretigon por esti aplikeblaj. La plej konata necerta jura nocio estas "bona fide" (lat.) (*Treu und Glauben, good faith, bonne foi, redelijkheid en billijkheid*): Kontraktoj estas plenumendaj bonafide. Necertaj juraj nocioj kutime estas neeviteblaj, ĉar la leĝdonanto (la esperantistoj en UK 1 kaj poste konstante konfirmita per fakta uzado en la konvinkiĝo de la kvazaŭjura devigecko) ne povas antaŭvide reguli ĉiun eble iam okazontan kazon. Li do regulas nur la principon kaj konfidas la konkretigon al la juĝisto (pri demandoj de lingva ĝusteco do ACI). Ambaŭ esprimoj do estas neeviteblaj kaj lauleĝaj; ili donas al la Akademio vastan

685

²² Lewin, Maurice. Meteorologia terminaro. En: Jarlibro de UEA 1961, dua parto, p. 129-191. Rete legebla en <http://www.eventoj.hu/steb/vortaroj/meteorologio/meteorologia-terminaro.html>.

²³ AkSt 1986, p. 25-26 kaj Filologo 1987:33-34 (Jun.), p. 4-7.

²⁴ Germane „unbestimmter Rechtsbegriff“, angle „vague legal concept“.

juĝokapablon (konsider-eblecon, bontrovon) pri tio, kion ĝi rigardas "neoportuna" kaj "efektive necesa".

- 58** La limo de ĝia bontrovo estas la malpermeso de **arbitraj, surprizaj decidoj**. Tio sekvas el la principo de laŭjureco. Ankaŭ pri la demando, kiel detale ACI motivigas decidon, ĝi havas vastan propran bontrovon. Preciza regulo rekte objekte legebla el la normo ne ekzistas (kaj neniam ekzistas ĉe necertaj juraj nocioj). Ĝenerale oni povas diri jenon:
- Ju pli forta mezuro estas, des pli granda estas la devo doni detalajn motivojn.
 - Ju pli diskutita demando estas, des pli granda estas la devo eviti ĉiujn supozojn, ke eble temas pri arbitra decido, donante detalajn motivojn kaj elmontri poziciojn pri la diversaj argumentoj de la diskuto.
 - Ju pli mezuro celas en la kernon de la lingvo, des pli bone kaj detale estu la klarigoj por mezuro.

9. Alineo 9: [Monopolo por plivastigo de la Fundamento - efektiva neceseco]

[9] Mi montris en principo, kiamaniere la severa netuŝebleco de la « Fundamento » gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, ne malhelpante tamen al la lingvo ne sole riĉiĝadi, sed eĉ konstante perfektigi [A 9.1]. Sed en la praktiko ni (pro kaŭzoj jam multajn fojojn priparolitaj) devas kompreneble esti tre singardaj kun ĉia « perfektigado » de la lingvo [A 9.2]: a) ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco [A 9.3]; b) fari tion ĉi (post matura prijuĝado) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4].

- 59** A 9.3 difinas centran kondiĉon por ĉia „perfektigado“ de la lingvo, nome la esperantistoj („ni“) rajtas fari tion nur en „okazoj de **efektiva neceseco**“. El tio sekvas la devo klarigi ĉe ĉiu planita suplemento, ĉu entute kaj se jes, kial ĝi ŝajnas esti *efektive*, do el vidpunkto de praktika utilo, necesa. La regulo enhavas la devon doni **motivojn** por ke oni povu prijuĝi la necesecon de „perfektigado“.
- 60** La ideo de „ŝanĝoj montriĝontaj necesaj“ troviĝas simile jam en A 1.2 por estonta komitato de la ĉefaj regnoj. Tie ĝi estas kontrastita al „ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj“. El tio ni devas dedukti, ke nuraj personaj preferoj por iuj suplementoj ne sufiĉas por plenumi la kondiĉon de „efektiva neceseco“. Kio validas por interŝtata komitato, des pli validas por la „kvazaŭŝtata“, memadministra esperantistaro (t.n. „argumentum de maiore ad minorem“, „des pli-argumento“).
- 61** Pliajn detaligojn kaj konkretigojn de la nocio „efektiva neceseco“ **Zamenhof** donis en sia „Cirkulera Letero al la ... LK pri Neologismoj (1906)“ (vd. malsupre). Ankaŭ en siaj Lingvaj Respondoj li plurfoje (neeksplicite) referencas al A 9.3, vd. – i.a. - ekz.:

LR 1908: „Mi tute konsentas kun vi, ke “lakto” kaj “laktumo” havas inter si preskaŭ nenion komunan, kaj ni havus plenan rajton uzi por “laktumo” ian vorton tute memstaran. Sed ĉar en multaj lingvoj por ambaŭ diritaj vortoj estas uzata la sama radiko, kaj ĉar la vorto “laktumo” estas ne malpli oportuna, ol ĉia tute memstara vorto, kaj ĉar tiu vorto jam troviĝas en la “Fundamento de esperanto”, tial ekzistas absolute nenia neceseco, ke ni forĵetu la oportunan vorton jam konatan kaj devigu la Esperantistojn lerni novan vorton. (LR 34, Respondo 37 b, *La Revuo*, 1908, Majo).

LR 1910: „La plej grava leĝdonanto estas la uzado. Ĉar la plimulto jam de longe uzas „Rumanujo“ kaj „Bukareŝto“, kaj ĉar ekzistas nenia grava kaŭzo por tion ŝanĝi, tial mi konsilas lasi la formojn ĝisnunajn.“ [LR 64 A. Pk. al d-ro Kimel (1910-01-06), OV, p. 573].

- 62** **A 9.4** ripetas la monopolon de „ia centra institucio“ (la Akademio), menciita jam en A 7.2 kaj A 8.1. Ankaŭ ĝi ne rajtas fari „perfektigadojn“ „facilanime“, sed nur „post matura prijuĝado“. Komunikante siajn pripensojn kaj motivojn, tia institucia gajnas kaj gardas „nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro“.

10. Alineo 10: [Resumo]

[10] Mi finas do per la jenaj vortoj [A 10.1]:

1. pro la unueco de nia afero ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la fundamenton de nia lingvo [A 10.2];

2. la fundamento de nia lingvo devas resti por ĉiam netuŝebla [A 10.3];

3. ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidus pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [A 10.4].

- 63** A 10.1 enkondukas la resumon, la esencon de la Fundamento, do de la „ĝenerala interkonsento pri la ecoj de la internacia lingvo“.

- 64** Ĝia plej grava celo estas gardado de la unueco de l' lingvo [A 10.2], kp. jam A 1.1 kaj ripetita multloke. Tio necese postulas, ke ĉiu esperantisto devas povi distingi inter vortoj kaj reguloj oficialaj, t.e. devigaj, kaj vortoj kaj reguloj privataj, t.e. nur rekomenditaj (ideo el A 5.4). Alivorte, li devas bone koni la ĝeneralan konsenton – kaj akcepti kaj obei ĝin (netuŝebleco).

- 65** En la intereso de la unueco la ĝenerala interkonsento, la „lingvo-konstitucio“ devas „eterne“ resti akceptita („por ĉiam netuŝebla“) [A 10.3]. Ĝi mem tamen povas pluevolui: Dum la intertempo ĝis la oficialigo per la ĉefaj ŝtatoj laŭ la vojoj priskribitaj en A 7 ĝis 9, en la momento de la oficialigo per la komunumo de ŝtatoj laŭ A 1.2.

- 66** Aŭtoritata Centra Institucio (ACI), nomita „Akademio“, rajtas pligrandigi la Fundamenton, konsistantan el FG, FE kaj UV laŭ la stato de 1905, kaj per tio dokumenti la intertempe atingitan plilarĝigitan ĝeneralan interkonsenton pri la lingvo – alivorte: fari el intertempe ekestinta nova silenta interkonsento, aldonan eksplacitan, skriban. Eĉ ACI tamen ne havas la rajton ŝanĝi la ĝis tiam jam ekzistantan interkonsenton, nomitan „Fundamento“. Regas la principo „unufoje en la Fundamento por ĉiam en la Fundamento“. Tio inkluzivas pli fruajn proprajn decidojn de ACI mem.

11. Alineo 11: [Propono al UK 1; la „ideoj“ de la Antaŭparolo]

[11] La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto, prezentas dume nur mian privatatan opinion [A 11.1]. Leĝan sankcion ili ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 11.2].

L. ZAMENHOF. [A 11.3].

Varsovio, Julio 1905. [A 11.4].

a) Superrigardo

67 Alineo 11 fiksas jenajn bazajn principojn:

1. Ĝi ripetas, ke la Fundamento estas „lingvo-konstitucio“ kun „leĝa sankcio“.
2. Ĝi ripetas la demokratian principon, ke la plej alta leĝdonanto pri lingvaj demandoj estas „la esperantistoj“, kp. samsence BD 4.1.
3. Ĝi ripetas la distingon inter „privata“ kaj „oficiala“ opinio, do inter opinio de individuo kaj opinio de la kolektivo de esperantistoj, kp. samsence BD 4.2.
4. Ĝi eksplicitas, ke la komuna volo de la esperantistoj ampleksas la principojn, motivojn kaj interpret-regulojn („ideojn“) donitajn en la Antaŭparolo, kiu estas same submetita al voĉdonado kiel la tri aliaj partoj de la Fundamento („kune kun sia antaŭparolo“).

b) La „ideoj“ de la Antaŭparolo

68 Longa diskuto ekzistas pri la demando, ĉu la Antaŭparolo (A) estas netuŝebla parto de la F-to, same kiel FG, FE kaj UV. La necerteco ekestis pro jenaj vortumoj en A mem.

Pri FG, FE kaj UV:

- ... la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1.) La 16-regula gramatiko; 2) la « Universala Vortaro »; 3) la « Ekzercaro » [A 2.1].
- Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li ... [A 2.2]
- ... ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3].
- ... [reeldoni] tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto, ... [A 3.3].

Kontraste pri A:

- La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto [do en A], ... [A 11.1]. [ricevos] [leĝan sankcion] ... nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj [de UK 1] [A 11.2].
- al kiu [al UK 1] tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 11.2].

69 Kiel montrite supre, la „ideojn, kiujn mi [Z] supre esprimis pri la F-to“ oni sinonime povas nomi bazajn principojn, interpretregulojn, bazajn valordecidojn. Ili en Juli 1905 ankoraŭ estis „privataj“ ideoj de Z. En Aŭgusto 1905 ili fariĝis „oficialaj“, do devigaj, ĝenerale akceptitaj, per la unuanima aprobo fare de la „esperantistoj“, kiel dokumentita en BD 4.3. La unua kongreso esprimis sian volon, ke „la sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la **verketo** «Fundamento de Esperanto», ... [BD 4.3]“. Farinte tion, la partoprenintoj havis antaŭ si la ĵus presitan „verketon“, kiu konsistis el ĝuste A, FG, FE kaj UV. Kiel rezulto, ankaŭ la principoj de A fariĝis Fundamentaj kaj per tio la solaj eterne ĝustaj principoj por decidi, kio estas ĝusta aŭ malĝusta Esperanto.

70 Kontraste al la tekstoj de FG, FE kaj UV nur la *ideoj* de A fariĝis oficialaj, sed ne la maniero, kiel ili estas vortumitaj, aŭ la *vortoj*, per kiuj ili estas vortumitaj (ekz. la vortoj „aŭtor-“ aŭ „Zamenhof“). Ili estis oficialigitaj nur poste.

71 Tiun distingon inter de 1905 devigaj „ideoj“ kaj la vortumado pretervidas **Martinelli** Ŝi obĵetis, ke „la antaŭparolo ne estas parto de la Fundamento, ĉar: a) Zamenhof ne konsideris ĝin inter la tri Fundamentaj partoj; b) la esenca novaĵo el la antaŭparolo, nome la propono pri starigo de "aŭtoritata centra institucio", estis malaprobata de la kongreso.“ Kaj samloke: „La antaŭparolo estus parto de la Fundamento, nur se la kongreso estus aprobinta la kvinan artikolon en la origina

deklaracia propono.²⁵ Per tio ŝi referencas al la proponita, sed neakceptita origina § 5 BD pri la Centra Komitato Esperantista (vd. supre en la ĉap. BD): „Pri ĉiuj duboj, kiuj aperas pri la uzado de la lingvo Esperanto, decidus ĉiam la Centra Komitato Esperantista, ... Ĉiuj decidoj de la Centra Komitato, tuŝantaj la dubajn demandojn de la lingvo, estas devigaj por ĉiuj uzantoj de la lingvo Esperanto; ...“.

- 72 Tio ne konvinkas. Kerno de A estas bazaj principoj kaj valoroj (unueco, netuŝebleco, klareco, k.t.p.). Ili ekvalidiĝis per BD 4.3 sendepende de tio, ĉu en 1905 jam estis fondita „aŭtoritata centra institucio“. La principoj ligas ne nur ĝin, sed – eĉ prioritare - ĉiujn esperantistojn (vd. ekz. „amikoj estontaj kaj estintaj“ A 1.1, „Neniu persono kaj neniu societo“ A 1.4, „la esperantistoj“ A 1.5, „ĉiuj esperantistoj“ A 2.1, la « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto ... [A 5.5] kaj ankoraŭ multloke). Iu konekto pri la ekvalido de la „ideoj“ (principoj) validaj por ĉiuj esperantistoj kaj la jama fondo de aŭtoritata centra institucio, ne havas bazon en la tekstoj de BD kaj A.²⁶
- 73 Ke nur tiu interpreto de la kunludo inter A 11.2 kaj BD 4.3 estas ĝusta, ankaŭ montras jenaj pripensoj. Por decidi ĉu io estas ĝusta, bona, taŭga oni devas interkonsenti pri kriterioj. Oni devas difini mezurilon, valor-sistemon, kiu respondas la demandon „ĝusta, bona, taŭga por kio aŭ en rilato al kio?“ Ekzemple: Se oni volas prijuĝi la taŭgecon de diversaj iloj, oni necese devas difini (= interkonsenti) kriterion pri taŭgeco. Se la kriterio estas "tauga por skribi leteron", komputilo estas bona. Se la kriterio estas "tauga por frapi najlon en la muron" komputilo estas malbona. Se la kriterio estas „laŭeble riĉa rikolto“ pluvo post longa somera sekeco estas bona. Se la kriterio estas „laŭeble agrabla naĝado en la maro“ pluvo estas malbona. Tiel same ankaŭ lingvaj demandoj kaj la reguloj kaj modeloj de FG, FE kaj UV bezonas mezurilon (kriteriojn), laŭ kiuj oni decidus („juĝas“) pri ĝusta kaj bona Esperanto. Se oni ŝanĝas la kriterion oni neeviteble kaj aŭtomate ŝanĝas la juĝon pri ĝusta, bona, taŭga.
- 74 La kutima kriterio pri „ĝusta“ kaj „bona“ en etnaj lingvoj estas la ĝenerala uzo, kiel ajn oni konstatas kaj difinas ĝin. Tiu kriterio estas fremda al la Antaŭparolo. Laŭ la sistemo de la Antaŭparolo kontraŭfundamenta ĝenerala uzo povas suplementi la ĝis tiam validan Fundamenton nur post oficiala decido laŭ A 8. Se tio ne jam okazis, devia ĝenerala uzo estas „malĝusta“ laŭ la kriterioj de Antaŭparolo. Tio estas konsekvenco el la fakto, ke Esperanto estas planlingvo kaj volas eviti la ĥaosan, spontanegan akcepton de ekz. esceptaj reguloj kaj modeloj, kiuj povas malfaciligi ĝin aŭ kaŭzi, ke ĝi disfalas en malunuecaj variantoj. Se oni tamen kontraŭ la sistemo de la Antaŭparolo juĝas laŭ ia ĝenerala uzo, oni ŝanĝas la konsenton pri tio, kio estas ĝusta lingvo-uzo.

685

²⁵ Perla Martinelli, iama sekretario de AdE, Ĉu la antaŭparolo estas parto de la Fundamento? En: HeKo 313 2-A, 2006-10-17 kaj denove en HeKo 314 8-A, de 2006-11-04 - <http://www.esperantio.net/index.php?id=198>.

²⁶ Pliaj argumentoj de Martinelli estas tro evidente malĝustaj por detala rifuto: „la frontispico de la libro, kiu klare inkluzivas en la verkon nur tri partojn – gramatikon, ekzercaron, universalan vortaron“ – ne apartenas al la Fundamenta teksto simile kiel la enhavotabelo kaj la reklamoj, vd. la ĉap. „Eksterfundamentaj partoj“; „la listigo de ĉiuj Fundamentaj vortoj (rimarku la majusklon) en la universala vortaro, dum pluraj vortoj de la antaŭparolo mankas en ĝi“ – UV same registras nek proprajn nomojn el FG kaj FE, nek vortojn fremdajn laŭ R 15 el FE, vd. Libron Kvaran; „AdE ne rajtas aldoni ion al la Fundamento, nur proponi aldonojn al la Universala Vortaro“ – rekte kontraŭa al: „...ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel « Aldonon al la Fundamento » [A 7.2].“, „...kiam aŭtoritata centra institucio decidus pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj ... [A 10.4].“

- 75** El tiuj konsideroj sekvas, ke oni povas vaste reinterpreti, neglekti, forpuŝi la regulojn kaj modelojn en FG, FE kaj UV, se oni ne aplikas la ĝustan interpret-metodon kaj la interkonsentitajn interpret-kriteriojn. Ili troviĝas en la Antaŭparolo. La Fundamento ne povas plenumi sian taskon gardi la unuecon de Esperanto sen la interkonsentoj fiksitaj en A. Ekzemplo: la formo „kalif-“ fariĝis Fundamenta, kaj do laŭdifine (laŭ interkonsento) „ĝusta“ Esperanto, per OA 2. Ĝi neglektas la araban etimon, kiun pli bone redonas la formo „ĥalif-“. La kriterio „etimologia ĝusteco“ tamen estas eksterfundamenta. Laŭ A pli gravas unueco kaj netuŝebleco. Sen la hierarkio de la principoj en A la F-to ne povus „meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj“ (A 3.3).
- 76** Post jaroj de reform-diskutoj kun la ĉiam samaj argumentoj, Z kompreneble konsciis pri tiuj interdependencoj. Li ekkonis, ke la „leĝoj“ (reguloj) de FG, FE kaj UV malmulte valoras, se oni ne donas „ŝlosilon“, kiel unuece kompreni ilin. Tute intence li pro tio kreis tiun ŝlosilon en A kaj voĉigis la esperantistojn pri la Fundamento „kun sia antaŭparolo“. Ke la principoj kaj interpret-metodoj de la Antaŭparolo estas la kerno de la F-to, Z konfirmis en LR de 1907, skribinte: „antaŭ ĉio ni devas senŝanceliĝe stari sur la bazo de la 'Fundamento', aŭ **pli ĝuste de la antaŭparolo al tiu ĉi verko**“ (nia elstarigo, vd. la plenan citaĵon malsupre).

III. Lingvaj Respondoj de Zamenhof pri la Fundamento

- 77** Estas konataj kvar Lingvaj Respondoj de Z pri la rolo kaj funkcio de la Fundamento, donitaj inter 1907 kaj 1911. Okulfrapas, kiel konstantaj kaj samformaj la respondoj estas. Ili konfirmas nian analizon donitan supre.
- 78** **LR 1907:**

„Kvankam kelkaj personoj, tute ne komprenantaj aŭ ne dezirantaj kompreni la veran esencon de la Bulonja Deklaracio, tre atakas ĝin kaj la 'Fundamenton de Esperanto', mi tamen ripetas kaj denove ripetas, ke antaŭ ĉio ni devas senŝanceliĝe stari sur la bazo de la 'Fundamento', aŭ pli ĝuste de la antaŭparolo al tiu ĉi verko. Kompreneble, se tio ĉi montriĝus absolute *necesa*, tiam en iu el niaj kongresoj ni havus la rajton *per komuna interkonsento* (ne per privataj decidoj) forigi la 'Fundamenton', kiel en Bulonjo ni per komuna interkonsento ĝin kreis. Sed feliĉe tio ĉi *ne* estas *necesa*, kaj ju pli mi esploras la aferon, des pli mi konvinkiĝas, ke tio ĉi *neniam* estos *necesa*, ĉar eĉ la plej grandajn plibonigojn ni povas tute bone enkonduki per la sendanĝera vojo de *neologismoj*, kiuj, ne forigante tion, kio jam ekzistas, ne sole gardas nin kontraŭ ĉiu danĝereco de ia nesufiĉe elprovita eksperimento, kiun poste rebonigi estus jam ne farebla sen disfalo de la tuta konstruaĵo, - sed ili donas al ni la eblon ĉiam konservi la kontinuecon kaj unuecon de nia lingvo kaj neniam senvalorigi tion, kio ĝis nun estas akirita.“ [„Tria cirkulera letero al la grupoj esperantistaj“ de Zamenhof (1907-12-20). PVZ 8 (1980), p. 165-170 – mankas kiel LR en la 7a eld. 1990].

- 79** **LR 1907:**

La netuŝebleco de la Fundamento ne en senco de *fetiĉismo*, kiel malvere diras niaj kontraŭuloj, sed en senco de malpermeso de *rompado* ... estas la plej *necesa* rimedo, por ke ... novaj esperantistoj bonege komprenu la malnovajn esperantisojn kaj la malnovajn verkojn, t.e. por ke nia lingvo ĉiam konservu severan unuecon, kiu por lingvo estas multe pli *necesa*, ol ĉiu ŝajna aŭ eĉ vera perfekteco. [LR 142 A. Al la Lingva Komitato (1907-12-20), LZ II p. 113].

- 80** **LR 1908-01:**

Ĉiu, kiu legis la antaŭparolon de la „Fundamento de Esperanto“, scias tre bone, ke ĝi ne sole ne prezentas ian baron kontraŭ la evolucio de la lingvo, sed kontraŭe, ĝi donas al la evolucio tian grandegan liberecon, kiun nenio alia lingvo iam posedis

eĉ parte. Ĝi donas la eblon, se tio estus necesa, iom post iom eĉ ŝanĝi la tutan lingvon ĝis plena nerekebleco! La sola celo, kiun la Fundamento havas, estas nur: gardi la lingvon kontraŭ anarĥio, kontraŭ reformoj arbitraj kaj personaj, kontraŭ danĝera rompad, kontraŭ forĵetado de malnovaj formoj, antaŭ ol la novaj estos sufiĉe elprovitaj kaj tute definitive kaj sendispute akceptitaj. Se la esperantistoj ĝis nun tre malmulte faris uzon de tiu granda libereco, kiun la Fundamento al ili donas, ĝi ne estas kulpo de la Fundamento, sed ĝi venas de tio, ke la esperantistoj komprenas tre bone, ke lingvo, kiu devas trarabati al si la vojon ne per ia potenca dekreto, sed per laborado de amasoj, povas disvolviĝi nur per tre singarda vojo de natura evolucio, sed ĝi tuj mortus, se oni volus ĝin disvolvi per kontraŭnatura kaj danĝeriga vojo de revolucio. [LR 144. El „Cirkulera Letero al ĉiuj esperantistoj“, 1908-01-18]

81 LR 1908-07:

Ĉiu, kiu volas nur kompreni, komprenas ja tre bone, ke la „Fundamento“, pri kiu parolas la Bulonja Deklaracio, neniam havis la celon prezenti ian „sanktan libron“, sed ĝia celo estas nur: *gardi la kontinuecon de nia lingvo*. [LR 142 B. Let. al Bourlet (1908-07-18), LZ II p. 216]

82 LR 1911:

... Kun la Fundamento ni devas esti tre singardaj; ĉar se ni ĝin rompas sen ia tre grava bezono kaj sen komuna interkonsento, tiam la tuta lingvo ruiniĝos. [LR 143. Let. al Bourlet (1911-02-17) – elstarigo en la originalo].

IV. „Prauloj“ de la Antaŭparolo

83 Same konstanta kiel la LR de Z pri la Antaŭparolo *post 1905* ankaŭ estas lia opinio pri la principoj de A *antaŭ 1905*. Citindaj estas precipe la Antaŭparoloj al la Fundamenta Krestomatio de 1903 kaj 1907 (FK) kaj la Aldono al la Dua Libro (ambaŭ de 1888 – DL-Ald). Ĉefe ĉi lasta montras, ke la principoj de A restis neŝanĝitaj de 1888 (!). Ni redonas tiujn tekstojn ĉi-sekve. En rektaj krampoj ni atentigas pri la samtemaj principoj en la Bulonja Deklaracio kaj la Fundamenta Antaŭparolo. La kursivigoj estas originalaj.

1. Antaŭparolo al la Fundamenta Krestomatio 1903

a) Antaŭparolo [FK, 1-a eld. 1903]

[1] Presentante pure kondiĉan rimedon de reciproka komuniĝado [do interkonsenton], la lingvo internacia, simile al ĉiu lingvo nacia, povos bone atingi sian celon nur en tiu okazo, se ĉiuj uzos ĝin plene *egale* [FK 1.1] [plej grava estas unueco, A 1.1 kaj multloke]; kaj por ke ĉiuj povu uzi la lingvon egale, estas necese, ke ekzistu iaj *modeloj*, leĝdonaj por ĉiuj [FK 1.2] [„leĝdona“ – 14 fojojn en A, krome en BD]. Tio ĉi estas la kaŭzo, pro kiu, cedante al la peto de multaj esperantistoj, mi eldonis la *Fundamentan Krestomation*, kiu povos servi al ĉiuj kiel modelo de esperanta stilo kaj gardi la lingvon de pereiga disfalo je diversaj dialektoj [FK 1.3] [ripeto de la principo de unueco].

[2] Lerni la lingvon ĉiu povas laŭ ĉiuj libroj, kiujn li deziras [FK 2.1] [kp. A 5.1 – F-to ne la plej bona lernolibro]; sed ĉar multaj esperantaj libroj estas verkitaj de personoj, kiuj ankoraŭ ne posedas bone la lingvon Esperanto, kaj komencanta esperantisto ne povus rilati al ili sufiĉe kritike, tial estas dezirinde, ke ĉiu, antaŭ ol komenci la legadon de la esperanta literaturo, tralegu atente la *Fundamentan Krestomation* [FK 2.2]. Ne deprenante de la lernanto la eblon kritike proprigi al si ĉiujn riĉigojn kaj regule faritajn perfektigojn [principo de laŭorda evoluipovo], kiujn li

trovas en la literaturo, la *Fundamenta Krestomatio* por ĉiam [principo de „eterneco“] gardos lin de blinda kaj senkritika alproprigo de stilo *erara* [FK 2.3].

[3] Atentan tralegon de la *Fundamenta Krestomatio* mi rekomendas al *ĉiu*, kiu volas skribi aŭ parole uzi la lingvon Esperanto [FK 3.1] [kp. A 5.4 „konstanta gvida dokumento“]. *Sed precipe atentan kaj kelkfojan tralegon de tiu ĉi libro mi rekomendas al tiuj, kiuj deziras eldoni verkojn en Esperanto* [FK 3.2]; ĉar tiu, kiu eldonas verkon en Esperanto, ne koniĝinte antaŭe fundamente kun la spirito kaj la modela stilo de tiu ĉi lingvo, alportas al nia afero ne utilon, sed rektan malutilon [FK 3.3].

[4] Ĉiuj artikoloj en la *Fundamenta Krestomatio* estas aŭ skribitaj de mi mem, aŭ - se ili estas skribitaj de aliaj personoj - ili estas korektitaj de mi en tia grado, ke la stilo en ili ne deflankiĝu de la stilo, kiun mi mem uzas [FK 4.1].²⁷

L. L. ZAMENHOF, / Aŭtoro de la lingvo *Esperanto* [FK 4.2].
Varsovio, en Aprilo 1903 [FK 4.3].

b) Antaŭparolo [FK, 5a eld. 1907]

- 84 En la 5a eldono de FK 1907, Z ripetas la principon „severa konstanteco estas multe pli grava, ol plena perfekteco“:

Mi [Z] trarigardis denove la tutan Krestomation, kaj mi forigis el ĝi ĉiujn preserarojn, kiujn mi trovis [FK-07.1] [kp. A 4.3: „permesis al mi nur korekti la preserarojn“]. Dum la trarigardado mi trovis diversajn esprimojn, kiuj siatempe ŝajnis al mi bonaj, sed kiuj nun al mi ne plaĉas kaj kiujn mi volonte ŝanĝus; mi tamen tion ĉi ne faris, ĉar mi estas konvinkita, ke por verko, kiu havas la celon subtenadi unuformecon de stilo inter ĉiuj esperantistoj [principo de unueco, A 1.1 kaj multloke], severa konstanteco estas multe pli grava, ol plena perfekteco, kaj la utilo de la faritaj ŝanĝoj estus multe pli malgranda ol la malutilo, kiun ni ricevus, se mi en ĉiu nova eldono de la Krestomatio volus fari ŝanĝojn laŭ mia plej nova opinio aŭ gusto kaj se ĉiu posedanto de la Krestomatio devus timi, ke nova eldono senvalorigis la malnovan [FK-07.2] [kp. A 4.4 – A 4.6: kontinueco pli gravas ol ŝajna aŭ eĉ vera „ĝusteco“].

Ĉar la Krestomatio enhavas tre grandan kvanton da materialo, kiu estis verkita en diversaj tempoj kaj de diversaj aŭtoroj, tial ne estas mirinde, ke en la libro troviĝas kelkaj vortoj aŭ esprimoj, kiuj ne en ĉiuj lokoj sonas absolute egale (ekzemple: Jesuo kaj Jezo, Kanadujo kaj Kanado, iri returnen kaj returne, k.t.p.) [FK-07.3]. Ĉar ne venis ankoraŭ la tempo, por diri la lastan vorton pri tiuj dubaj formoj, tial mi preferis ne tuŝi tiujn duoblajn formojn, sed rigardi ambaŭ formojn kiel egale bonajn kaj uzeblajn laŭ la libera elekto de la uzantoj [FK-07.4] [kp. BD 4.5: Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la «Fundamento de Esperanto», ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo].

L. L. Zamenhof
Varsovio, en Junio 1907.

2. Aldono al la Dua Libro [DL-Ald 1888]

- 85 Jam en 1888 (!) Z klarigis kelkajn el la principoj, kiuj en 1905 fariĝis la (devigaj) „ideoj“ de la Antaŭparolo.

[1] En mia unua libro [UL 1887] mi petis ĉiujn amikojn de l' lingvo internacia esprimi ilian juĝon pri la lingvo, kiun mi proponis, montri al mi ĉiujn erarojn, kiujn ili

685

²⁷ LR 145 A de 1906 enhavas liston de la artikoloj en FK, kiujn Z mem verkis (OV p. 557).

trovis en ĝi, kaj ĉiujn plibonigojn, kiujn ili povas proponi, kaj helpi min tiel doni al la lingvo la plej bonan formon, ĉar la finan formon mi intencis doni al la "Lingvo Internacia" ne pli frue ol en la fino de l' jaro 1888 [per DL-Ald Esperanto ricevis sian „finan formon“, konfirmitan per la F-to en 1905, kp. la vortumon en BD 2.1], pripensinte kaj provinte antaŭe ĉiujn juĝojn kaj proponojn, kiuj estus senditaj al mi ĝis tiu tempo. En la "Dua Libro" mi diris, ke por fari la lingvon libera de ĉiuj personaj eraroj, estus dezirata, ke ia instruita societo prenu en siajn manojn la sorton de l' lingvo [la „aŭtoritata centra institucio“ (Akademio) de A] kaj, aŭskultinte la konsilojn de kompetentaj personoj, ĝi donu al la lingvo la finan formon, kiu estus egale ordona [„deviga“, „leĝa“] por mi, kiel por ĉiu alia amiko de l' lingvo internacia.

[2] – [8] [Pri esploro de Amerika Filozofia Societo en Filadelfio (The American Philosophical Society), „ĉu lingvo internacia estas necesa, ĉu ĝi estas kreebla, kaj kiel ĝi devas esti“. La prepara komitato sub la influo de Henry Phillips, Jr proponis ŝanĝitan Esperanton].

[9] La kvar ŝanĝoj, kiujn proponas sinjoro H. Ph., estas *teorie* tre bonaj, sed mi jam mem antaŭ kelkaj jaroj pensis pri ili kaj mi trovis, ke *praktike* ili estus tre maloportunaj [kp. BD 2.2: „teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika“ kaj simile multloke en LR]. Pli vastan mian juĝon pri ili kaj pri ĉiuj proponitaj ŝanĝoj mi prezentos al la kongreso, se tiu ĉi efektiviĝos [tio ne okazis; surrogato fine estis UK 1 en 1905]. Al ĉiuj ŝanĝoj, kiujn la internacia kongreso de instruituloj post fonda provado trovos necesaj, —mi jam antaŭe donas mian plenan konsenton [rezigno pri aŭtoraj rajtoj, kp. BD kaj A 1.2: la internacia komunumo de la ŝtatoj „havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj“].

[10] Sciigante la amikojn de l' lingvo internacia pri la intencita [sed fine ne okazinta] internacia kongreso [de la "Amerika Filozofia Societo"], mi devas sciigi ilin, ke la tuta sorto de l' lingvo internacia de nun transiras en la manojn de l' kongreso, kaj la fina formo, kiun la kongreso donos al la lingvo, devas esti leĝdonanta [„leĝodananta“, 14 fojojn en A] por ĉiuj amikoj de l' "Lingvo internacia", se la kongreso eĉ trovos necesaj ŝanĝi la lingvon ĝis nerekonleco [kp. la CirkLet pri Neologismoj (1906) tuj poste]. Mia rolo nun estas finita, kaj mia persono tute foriras de l' sceno [kp. A 3.3: kaj [Z] petas, ke la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li, sed al tiu ĉi libro].

[11] [...] la *aŭtoro* nun ĉesigas je eterne sian laboradon. Ĉion, kion mi de nun faros aŭ skribos, mi ĝin ĉion faros jam kiel simpla privata amiko de la lingvo internacia havante nek pli da kompetenteco, nek pli da moralaj aŭ materialaj privilegioj, ol ĉiu alia [kp. BD].

[12] Sed por ke la lingvo internacia povu fariĝi de nun tute sendependa de mia persono, kaj ke ĝi povu tute bone kaj regule riĉiĝi, vastiĝi kaj iri antaŭen, ĉu mi povos ankoraŭ labori por ĝi, aŭ ne, — mi donos tie, unu fojon por ĉiam, respondojn je kelkaj demandoj tuŝantaj la lingvon kaj ĝian estontecon.

[13] 1) La lingvo internacia restas senŝanĝa en tiu formo, en kiu ĝi estas proponita de mi; fari en ĝi iajn laŭvolajn ŝanĝojn mi de nun jam ne havas la privilegion; tiu ĉi privilegio apartenas al la internacia kongreso de instruituloj, kiu estas esperata pro la iniciativo de la Amerika Filozofia Societo; se la intencita kongreso ne efektiviĝos, tiam poste (sed ne antaŭ kvin jaroj de nun) la amikoj de l' lingvo internacia faros mem internacian kongreson, kiu havos la privilegion fari en la lingvo ŝanĝojn kaj bonigojn [okazis nur en 1905].

[14] – [15] Pri tempaj tabelvortoj („kiam“ anstataŭ „kian“ k.t.p.) kaj h-skribo, vd. en la koncernaj ĉapitroj].

[16] 4) La vortaro, kiu estas aldonita al mia unua broŝuro [UL 1887], estas ne plena, kaj la leganto ne miru, se li multajn vortojn en ĝi ne trovas. Sed mi ne havis la intencon eldoni *aŭtore* plenan vortaron kaj krei laŭ mia persona plaĉo la tutan lingvon de l' kapo ĝis la piedoj. Ĉar unue — la kreado de tute plena vortaro estas laboro ne ebla por unu homo, ĉar la nombro de l' vortoj en lingvo de l' homoj estas senfina, kaj se kun ĉiu vorto oni devus atendi, ĝis mi ĝin kreos, tiam la lingvo neniam estus finita kaj ĉiam estus en dependo de mia persono; due — en tia grava afero, kiel lingvo tutmonda, la persona juĝo kaj decidoj de unu homo devas havi rolon eble plej malgrandan, ĉar unu homo sur ĉiu paŝo eraras. Unu homo tie povas esti nur iniciatoro sed ne kreanto. Lingvo tutmonda devas esti pretigata paŝo post paŝo, per la kunigita laborado de la tuta civilizita mondo. Por ke la lingvo povu regule, unuforme kaj unuvoje progresadi malgraŭ la disĵetita laboro de malsamaj personoj en malsamaj lokoj de la tuta mondo, oni devis krei komunan fundamenton [!], sur kiu ĉiuj povus labori. Tia komuna fundamento por la "Lingvo internacia" devas esti mia unua broŝuro ("Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro"), kiu havas en si la tutan gramatikon de la lingvo kaj sufiĉe grandan nombron da vortoj [poste laŭ sama principo FG, FE kaj UV]. Tio ĉi estas la unua kaj la lasta *persona* vorto en la afero de l' lingvo internacia. Ĉio cetera devas esti kreata de la homa societo kaj de la vivo, tiel kiel ni vidas en ĉiu el la vivantaj lingvoj. Ĉiu, kiu ellernis la diritan "fundamenton", povas kuraĝe diri, ke li konas la lingvon internacian tute, ke li konas ĝin ne malpli bone ol la aŭtoro aŭ ol iu alia. Ĉar en ĉio, kio en la dirita broŝuro ne estas trovata, kompetenta devas esti de nun ne la aŭtoro aŭ ia alia persono, — la solaj kompetentaj nun devas esti talento, logiko, kaj la leĝoj [!] kreitaj de la *plej granda parto* de la verkantoj kaj parolantoj [lingvo kiel deviga interkonsento de kolektivo].

[17] Se ia vorto ne estas trovata en la vortaro, kiun mi eldonis, kaj oni ĝin ne povas fari mem laŭ la reguloj de la internacia vortfarado [do laŭ la posta R 11], nek anstataŭigi per alia esprimo, — tiam ĉiu povas krei tiun vorton laŭ lia persona plaĉo; tiel ankaŭ se naskiĝus ia demando stilistika aŭ eĉ gramatika, ne decidita klare en mia unua broŝuro, — ĉiu povas ĝin decidi laŭ sia juĝo [BD 4.5]; kaj se vi volas scii, ĉu vi bone decidis tiun demandon, turnu vin ne al mi, sed rigardu, kiel tiun demandon decidas la plejmulto de l' verkantoj. Ĉiu vorto, ĉiu formo, kiu ne estas rekte kontraŭ la jam kreita gramatiko kaj vortaro, aŭ kontraŭ la logiko aŭ la leĝoj enkondukitaj de la plejmulto de l' uzantoj, — estas tute bona, tute egale ĉu ĝi plaĉos al mi persone aŭ ne. La verkoj, kiujn mi eldonos persone, ne devas havi pli da kompetenteco, ol la verkoj de ĉiu alia. Kaj poste, kiam la lingvo sufiĉe fortiĝos kaj ĝia literaturo sufiĉe vastiĝos, tiam ankaŭ tio, kio estas en mia unua broŝuro, devos perdi ĉian signifon, kaj sole kompetentaj tiam devos esti la leĝoj ellaboritaj de la plejmulto. Per unu vorto — la lingvo internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj, kaj tiu formo, kiun mi donis al ĝi, tiu gramatiko kaj vortaro, kiujn mi prezentis, devas esti sole fundamento, sur kiu estos ellaborata la efektiva lingvo internacia de l' estonteco.

[18] Se mi senigas min nun je ĉiaj personaj privilegioj, kaj fordonas ilin tute al la publiko [BD 3.1], mi ĝin faras ne pro malvera modesteco, sed ĉar mi havas la profundan kredon, ke tion postulas la intereso de la afero, kiu alie ne povus regule kaj rapide vastiĝi kaj ĉiam estus en dependo de unu persono kun liaj eraroj. Nur viva konkursa laboro, ĉe kia ĉio pli bona iom post iom elpuŝas la malpli bonan, — povas doni efektive bonan kaj vivipovantan lingvon internacian.

[19] Multaj kredeble timos, ke danke tiun vastan liberecon la lingvo internacia baldaŭ disfalos en multaj malsamaj lingvoj. Sed kiu konas iom la historion de la lingvoj, tiu komprenos, ke tiu timo estas tute senfonda, ĉar ni ĉiuj laboros sur unu fundamento, kaj tiu fundamento, enhavante la tutan gramatikon kaj la pli grandan parton de l' vortoj, kiuj en la parolado estas renkontataj la plej ofte, havos en la

lingvo internacia tian saman signifon, kiun en ĉiu lingvo havis tiu lingva materialo, kiu estis en ĝi en la komenco de regula skriba literaturo: estis preta gramatiko, estis granda kolekto da vortoj, sed multaj vortoj ankoraŭ malestis. Tiuj ĉi vortoj estis kreataj unu post unu, laŭ la kreskanta bezono, kaj malgraŭ ke ili estis kreataj dise de malsamaj personoj, sen ia kondukanto aŭ leĝdonanto, la lingvo ne sole ne disdividiĝis, sed kontraŭe, ĝi ĉiam pli unuformiĝis, la dialektoj kaj provincialismoj iom post iom perdiĝis antaŭ la fortiĝanta komuna literaturo lingvo. Ke mia unua broŝuro prezentas fundamenton sufiĉe fortan, kaj ke la fundamenta vortaro enhavas nombron da vortoj sufiĉan kaj tiel grandan, ke se oni volas, oni povas eĉ tute libere esprimi siajn pensojn sen ia kreado de novaj vortoj,—montras la fakto, ke en la tuta "Dua Libro" vi ne renkontas eĉ unu nove kreitan vorton! (vi renkontos tie, vere, multajn vortojn, kiujn vi ne trovas en la fundamenta vortaro, sed tio ĉi estas vortoj ne nove kreitaj, sed nur tiaj, kiujn mi danke la gramatikon (C. 7. [= R 15]) ne bezonis presi en la vortaro). Oni devas memori, ke ĉiu lingvo servas por esprimi niajn pensojn, sed ne por senpense traduki el aliaj lingvoj; oni devas tial peni esprimadi siajn pensojn per la jam estantaj vortoj kaj kreadi novajn vortojn nur tie, kie ĝi estas efektive necesa,—kaj tiam la vortoj nove kreataj estos nur malofte disĵetitaj inter la multo da vortoj jam konataj kaj povos facile aliĝi al la lingvo kaj riĉigi ĝin ne perdigante ĝian unuformecon.

[20] (1) Tiel, danke la unu gramatikon kaj la unu formon de la plej granda parto de l' vortoj, la lingvo internacia havos jam de l' komenco unu formon ĉe ĉiuj uzantaj ĝin. (2) Nur tiuj vortoj, kiuj en la fundamenta vortaro ne estas trovataj, en la unua tempo estos malegale kreataj de malsamaj aŭtoroj. (3) Sed ĉar unue tiaj vortoj estos renkontataj nur disĵetite inter la multo da vortoj jam konstantaj, kaj due la nombro de tiaj malegale sonantaj vortoj ankoraŭ pli malgrandiĝos danke la komunan fonton, el kiu la aŭtoroj prenados la novajn vortojn (la plej gravaj eŭropaj lingvoj), — tial tiuj "novaj" vortoj prezentos nenion alian ol provincialismojn de la unu lingvo internacia. (4) Tiaj provincialismoj estis en granda nombro en ĉia alia lingvo, kaj kun la vastiĝado de la skribata literaturo ili komencis perdiĝi. (5) Tio sama estos ankaŭ en la lingvo internacia, sed ĉar la lingvo internacia pli dependas de la volo de l' homoj, ol de aliaj kondiĉoj, — tiu proceso de unuformiĝado iros en ĝi multe pli rapide. (6) La vortoj kreitaj malfeliĉe baldaŭ perdiĝos, kaj la vortoj feliĉe kreitaj restos kaj eniros en la lingvon; la vortoj egale feliĉe kreitaj sed malegale sonantaj — kelkan tempon batalos inter si kiel sinonimoj, sed jam post mallonga tempo ni vidos, ke unu el tiuj formoj estas uzata pli ofte kaj de pli granda parto de verkantoj, ol ĉiuj aliaj formoj, — kaj baldaŭ la unua formo elpuŝos ĉiujn ceterajn formojn, kiuj post kelka tempo simple mortos de neuzado. (7) Tiel ju pli energie vastiĝos kaj riĉiĝos la literaturo de la lingvo internacia, des pli baldaŭ ni havos unuforman pli malpli plenan vortaron.

[21] Tiuj, kiuj volas labori super la lingvo internacia, skribi verkojn en tiu lingvo etc. — povas nun diri kuraĝe, ke ili havas en la manoj *plenan vortaron*, ĉar povante ĉian ankoraŭ ne kreitan vorton krei laŭ ilia plaĉo, anstataŭ atendi, ĝis *mi* ĝin kreos, ili povas nun esprimi en la lingvo internacia *ĉion*, kion ili volas. Tio ĉi estus ne ebla en la okazo, se mi volus mem eldoni plenajn vortarojn: ĉar kiom ajn mi laborus, ĉiam danke la senfineco de la homa vortaro restus ankoraŭ multego da vortoj ne kreitaj, kaj tiuj, kiuj devus ilin uzi, ne scius kion fari, ĉar krei ilin mem estus ne permesita.

[22] Sed nun restas unu ŝajne tre grava demando: se mi skribas al iu en la lingvo internacia kaj mi devis kelkajn vortojn krei mem, sed mi volas havi la certon, ke la adresito *tute bone, vere kaj klare* komprenos la vortojn, kiujn mi kreis, — kion mi tiam devas fari? La respondo estas tre simpla: fari tion saman, kio estas farata ĉe la uzado de ĉia alia lingvo, se ia por ni necesa vorto en tiu lingvo aŭ tute ankoraŭ ne ekzistas, aŭ ne estas ankoraŭ de ĉiuj egale uzata aŭ konata,—t.e. *apud la*

vorto nove kreita meti en kuneteniloj (...) la tradukon de tiu vorto en ia alia lingvo, en kiu tiu vorto jam ekzistas. Kiun lingvon vi uzos por tiu celo, estas por la afero tute egala, se vi nur pensas, ke tiu lingvo estas komprenebla por via adresito, aŭ ke li havas sub la mano aŭ facile povas havi vortaron de tiu lingvo. Sed estus dezirate, ke ĉiuj amikoj de la lingvo internacia uzu en tiaj okazoj unu lingvon, kaj por tio mi proponas la lingvon francan, ĉar tiu ĉi lingvo en nia tempo en multaj sferoj ankoraŭ havas la rolon de lingvo internacia. Sed tute ne estas postulata, ke vi aŭ via adresito sciu la lingvon francan, ĉar la vorto devas esti elskribata el la franca vortaro sen ia ŝanĝo, en tiu formo, en kiu ĝi estas trovata en la vortaro; estas nur necese, ke la skribanto kaj la ricevanto havu sub la mano francan vortaron (se ili ne pli volas uzi alian lingvon).

[23] – [34] [ne redonita tie ĉi].

V. Cirkulera Letero al la ... LK pri Neologismoj (1906)

- 86 Je 1906-11-22 Zamenhof sendis al la prezidanto de la LK, Boirac, „Cirkuleran Leteron al la Membroj de la Esperantista Lingva Komitato pri Neologismoj“ kun la peto plusendi ĝin al la membroj kaj voĉdonigi ilin pri la prezentitaj proponoj ŝanĝi la Fundamenton laŭ la vojo de alineo 8 de la Antaŭparolo („formoj novaj“, en la lingvaĵo de Z „neologismoj“). Z enkondukis sian proponon per klarigo pri A 7 kaj A 8, preparita jam por la kongreso en Bulonjo, sed tie ne prezentita. Ĉi poste ni dokumentas tiun klarigan parton el la Cirkulera Letero.²⁸

I-a Parto.

[...] Ĉu Esperanto devas esti reformata? Unuj respondas tiun ĉi demandon per absoluta « jes », forgesante, ke tio ĉi enkondukus mirindan ĥaoson en nian aferon kaj ke, por bone progresi, nia afero bezonas antaŭ ĉio severan konstantecon kaj unuecon ; aliaj respondas per absoluta « ne », forgesante, ke porĉiama rigidiĝo estus neprudenta.

Ambaŭ diritaj partioj estas pravaj kaj ambaŭ ankaŭ estas nepravaj ; ĉar ia a b s o l u t a respondo por la supre dirita demando en nia afero ne povas kaj ne devas ekzisti. Ni devas trovi vojon m e z a n , kiu de unu flanko gardus nin kontraŭ ĉiuj danĝeroj de « rompadado », kaj de la dua flanko donus al ni la eblon forigi el nia lingvo tiujn kelkajn maloportunajn punktojn, kiuj en la tempo de la kreado de la lingvo ne estis rimarkitaj, malgraŭ la plej zorga kaj plej longa elprovado, kaj kiujn elmontris nur poste la vasta multejara kaj multepersona praktika uzado.

Ĉu ekzistas tia meza vojo, kiu de unu flanko gardus nin kontraŭ ĉia rompadado de la unueco de nia lingvo kaj de la dua flanko donus al ni la eblon perfektigi ĝin ? Jes, tia vojo ekzistas. Per kelkaj vortoj mi jam parolis pri ĝi en la antaŭparolo al la « Fundamento de Esperanto »; nun mi volas klarigi mian ideon pli detale. Mi intencis tion ĉi fari en la Bulonja kongreso, sed bedaŭrinde mi devis tion ĉi prokrasti.

II-a Parto.

Antaŭ ĉio ni devas unu fojon por ĉiam fiksi konstantan kaj por ĉiam severe netuŝeblan f u n d a m e n t o n por nia lingvo (la legantoj scias, ke tiun fundamenton la esperantistoj jam fiksas per la « Deklaracio » akceptita en²⁹ la

685

²⁸ Cit. laŭ LZ I 300-309. La Cirkulera Letero ampleksas tri partoj, el kiuj ni represas nur po duonon de la I-a kaj II-a parto.

²⁹ Unua redakto: “de”.

Bulonja kongreso). Dank'al la decido, ke la esperantistoj ne³⁰ faros eĉ la plej malgrandan ŝanĝon en la Fundamento de Esperanto, ni povas nun esti tute certaj, ke nia lingvo neniam disfalos kaj ĉio ĝis nun farita kaj akirita³¹ neniam perdos sian valoron.

Sed farante nenian ŝanĝon kaj nenian e l ĵ e t o n el la ĝisnuna lingvo, ni havas tamen la rajton a l d o n i al ĝi diversajn novajn vortojn aŭ formojn³² ne sole por la ideoj, kiuj mankis en niaj vortaroj, sed ankaŭ por tiaj ideoj, kiuj jam ekzistis en la vortaroj. Jen tiuj ĉi novaj vortoj kaj formoj³³ savos la tutan situacion kaj donos al ni la eblon interkonsentigi la praktikan p e r f e k t i g o n de nia lingvo kun ĝia plej severa n e t u ŝ e b l e c o .

[302] Se ni bone kaj mature esploros nian tutan lingvon kaj ĉiujn reformajn proponojn, faritajn en la daŭro de la pasintaj 19 jaroj, ni facile rimarkos, ke ĉiujn ĝis nun faritajn reformajn proponojn oni povas dividi en la sekvantajn 5 kategoriojn:

La unua (plej granda) kategorio prezentas reformojn, kiuj estas nur personaj kapricoj de tute nespertaj personoj kaj nur al siaj aŭtoroj ili ŝajnas plibonigoj, sed al la plimulto de ĉiuj aliaj esperantistoj ili aperas nur kiel m a l p l i b o n i g o j de la lingvo. Tiun ĉi kategorion da reformoj ni sekve simple devas absolute forĵeti.

La dua kategorio prezentas reformojn, kiuj per si mem eble estus bonaj, sed kiuj tuŝas ne speciale la lingvon Esperanto, sed diversajn demandojn ĝ e n e r a l a j n , por kiuj oni eble iam p o s t e povos komenci propagandon tute a p a r t a n , sed kiujn miksi kun la afero E s p e r a n t a ni absolute ne devas. Enkonduko de lingvo internacia estas jam per si mem afero tre granda, grava kaj malfacila, kaj se ni volos ĝin ankoraŭ pli malfaciligi per almikso de diversaj aliaj demandoj, tiam ni nenion atingos. Al tiu ĉi kategorio da reformoj apartenas ekzemple skribado stenografia anstataŭ litera, ŝanĝo de la formo de la literoj, aŭ almenaŭ forigo de la streketoj kaj punktoj, kiuj mal- oportunistas la skribadon (ekzemple en « t », « i » k.t.p.), forigo de grandaj vortkomencaj literoj, filozofia precizigo de la senco de ĉiuj vortoj k.t.p. Al tiu ĉi kategorio apartenas ankaŭ la postulo doni anstataŭ la literoj supersignitaj iajn literojn novajn, aliformajn, kiuj liberigus de la maloportuna uzado de signetoj kaj de superflua skribado de « h ». Tiun ĉi kategorion da reformoj ni en la nuna tempo devas kompreneble lasi tute sen atento.³⁴

La tria kategorio prezentas reformojn, kiuj³⁵ estas destinataj nur por plaĉi al la nekompetenta publiko aŭ al la neesplorablemaj poliglota kritikistoj kaj fari bonan kaj

685

³⁰ Antaŭe: "neniam".

³¹ Unua redakto: "ĉiuj ĝisnunaj verkoj Esperantaj".

³² "aŭ formojn" aldonita per la dua redakto.

³³ "kaj formoj" aldonita per la dua redakto.

³⁴ Unua redakto: „Neniu sekve, krom la aŭtoroj dubos, ke“; "kompreneble" aldonita en la dua redakto.

³⁵ Unua redakto ekde la unua frazo sub c) „La tria kategorio prezentas reformojn, kiuj ...“: „estis destinitaj nur por fari bonan kaj allogan impreson sur la varbotajn n e - e s p e r a n t i s t o j n , sed prezentas nenian [303] oportunajon por la jam varbitaj u z a n t o j de Esperanto. Tiuj ĉi reformoj sekve povas havi ian valoron nur en la periodo de p r o p a g a n d o , sed havas absolute nenian signifon en la periodo de p r a k t i k a u z a d o . Ekzemple al varbotaj ne-esperantistoj eble povus pli plaĉi, se la vortaro estus tute homogena kaj konsistus ekzemple nur el radikoj romanaj, aŭ se el ilia nacia lingvo estus prenite pli da radikoj ol el la aliaj lingvoj, aŭ se anstataŭ „ elpensitaj » vortoj ekzistus nur vortoj „ naturaj » k.t.p. — Sed por la personoj, kiuj jam ellernis kaj uzas la lingvon, estas ja tute egale, ĉu ili devas diri « blinda » aŭ « ceka », « hundo » aŭ « kano », « tuj » aŭ « imediate » k.t.p. Al tiu ĉi kategorio da reformoj, taŭgantaj nur por la unua periodo, sed havantaj nenian valoron por la dua periodo de Esperanto, apartenas interalie la postuloj terure malriĉigi la sonaron de la lingvo, elĵetante el ĝi kelkajn tre gravajn

allogan impreson sur la ne - e s p e r a n t i s t o j n , sed kiuj prezentas nenian oportunaĵon aŭ prezentas eĉ rekte grandan maloportunaĵon por tiuj, kiuj fervore uzas Esperanton kaj kiuj bezonas, ke Esperanto esprimu iliajn pensojn ne i e l , sed p e r f e k t e . Tiu ĉi kategorio estas por ni la plej danĝera, ĉar por multaj esperantistoj ne sufiĉe spertaj aŭ tro sentemaj por la kritiko ĝi per sia ŝajna scienceco estas tro alloga kaj tro facile tiras ilin al vojoj tre danĝeraj. Al tiuj esperantistoj [304] mi ripetas kaj neniam ĉesos ripetadi la sekvantan tre gravan regulon: memoru ĉiam, ke Esperanto devas sin alkonformigi ne al la gustoj de ĝiaj flankaj **rigardantoj**, sed al la oportuneco de ĝiaj efektivaj **uzantoj** ! Se Esperanto estos bona per si mem, tiam ĝi pli aŭ malpli frue venkos per sia boneco ; sed se ĝi elĵetos el si diversajn gravajn punktojn i n t e r n a j n nur por fari allogan impreson e k s t e r a n , ĝi estos simila al sapa veziko, kiu kelkajn minutojn plaĉas al la rigardantoj, sed baldaŭ krevas kaj malaperas. Ekzemple ĉar kelkaj sonoj prezentas (nur en la komenco !) kelkan malgrandan malfacilaĵon por tiu aŭ alia nacio, oni proponas simple elĵeti ilin ; ĉar la uzado de la artikolo prezentas en la komenco malfacilaĵon por slavoj, oni proponas simple elĵeti la artikolon ; ĉar la uzado de la akuzativo prezentas en la komenco kelkan malfacilaĵon por angloj kaj francoj, oni proponas simple elĵeti ĝin ; al la poliglotoj ne plaĉas, ke Esperanto havas kelkan nombron da vortoj arte kreitaj, kiujn ili devus lerni — oni simple elĵetu ilin kaj anstataŭigu per vortoj prenitaj el iu ekzistanta lingvo. Tre facilaj solvoj ! Sur tiuj ĉi facilaj solvoj estas bazitaj kelkaj novaj projektoj, kiuj volis konkuradi kun Esperanto kaj kiuj, tute ne dezirante doni ian praktike elprovitan, vivipovan kaj ĉiubezone uzeblan l i n g v o n , volis nur doni projekton, kiu farus bonan i m p r e s o n . Sur tiuj ĉi facilaj solvoj kaj sur tiu ĉi deziro plaĉi al la senspertaj kritikistoj estis ankaŭ bazita — mi sincere tion ĉi konfesas — mia projekto de reformoj en 1894, kiun kelkaj personoj trovas « bonega », sed kiun mi mem trovas nun... terure abomeninda ! Car pli vasta praktika elprovado baldaŭ montris al mi, kia sentaŭga senvivaĵo Esperanto fariĝus, se mi farus la frenezan paŝon kaj — por plaĉi al la eksteraj rigardantoj — mi elĵetus el la lingvo tiujn punktojn, kiuj estas por ĝi interne necesaj.

Elĵeto de gravaj sonoj farus la lingvon ne sole ne harmonia, [305] sed tre malriĉa kaj ofte tute ne uzebla ; elĵeto de la artikolo (kies malfacileco ne estas granda, ĉar nia lingvo ja permesas ne uzi la artikolon) estus tute kontraŭnatura, ĉar ni scias, ke el la lingvoj, kiuj posedis artikolon, neniu iam ĝin perdis, sed el la lingvoj, kiuj ne havis artikolon, multaj ĝin perforte devis krei al si (ekzemple ĉiuj lingvoj romanaj, la lingvo bulgara k.t.p.) ; elĵeto de la akuzativo farus la lingvon tute ne uzebla, ĉar neniu kultura lingvo povas ekzisti sen akuzativo (kelkaj lingvoj ne havas akuzativon en siaj substantivoj kaj ilia fleksebleco multe suferas de tio ĉi, kaj tamen eĉ i l i ne povis elĵeti la akuzativon en la pronomoj !) ; la ellernado de kelka nombro da vortoj arte faritaj por neniu estas malfacila, kaj tamen ili prezentas grandan oportunecon ; homogeneco (unufonteco) de ĉiuj vortoj de la lingvo estas ne sole tute superflua (ĉar por la uzantoj de la lingvo estas ja tute egale, ĉu ili diras « blinda » aŭ « ceka », « hundo » aŭ « kano » k.t.p.), sed ĝi estus eĉ rekte danĝera, ĉar ĝi tro multe sklavigus ĉiujn popolojn al la popoloj romanaj, kio pli aŭ malpli frue elvokus tro grandan kaj justan proteston kontraŭ nia lingvo. — Sekve

687

sonojn nur tial, ke en kelkaj lingvoj ili ne ekzistas (kvankam la membroj de tiuj nacioj tre facile ilin lernas kaj poste uzas sen ia malfacileco), aŭ elĵetante kelkajn tre gravajn kaj belajn sonojn nur tial, ke la plimulto da presejoj ne mendis ankoraŭ por ili presliterojn supersignitajn kaj estas devigataj presi ilin per „ h ». Neniu sekve dubos, ke ankaŭ tiuj ĉi reformoj, kiuj por la estontaj uzantoj de Esperanto ne sole havos nenian valoron, sed eĉ ŝajnos al ili ridindaj, nun en la dua periodo de Esperanto absolute devas esti forĵetitaj.“

reformoj de la tria kategorio, malgraŭ ilia alloga eksteraĵo, prezentus nur rektan malbonigon de la lingvo kaj pri ili ni paroli ne bezonas.

La kvara kategorio prezentas reformojn, kiuj per si mem eble efektive prezentus³⁶ kelkan plibonigon, sed kies valoro estas tiel malgranda, ke ili certe ne meritas, ke pro ili oni faru ian ŝanĝon en la lingvo. Sekve ankaŭ pri tiu ĉi kategorio da reformoj ni povas tute ne paroli.

Tiamaniere restas nur unu tre malgranda kvina kategorio da reformoj, kiuj prezentas plibonigon ne sole efektiva n kaj sendub a n , sed ankaŭ sufiĉe g r a v a n por la praktika uzado de la lingvo kaj kiuj sekve devas esti enkondukataj en la lingvon.³⁷ Sed la nombro de tiuj ĉi efektive reformindaj vortoj kaj formoj estas tre malgranda³⁸. Kion do ni devas fari kun ili ? Ĉu ni devas fari en la lingvo certan nombron da ŝanĝoj ?³⁹

Ne, absolute ne ! Ĉar Esperanto estas tiel konstruita, ke ne sole ĉiu vorto, sed ankaŭ ĉiu gramatika formo prezentas nur ereton de la vortaro, tial ni bezonas nur krei kelkan nombron da⁴⁰ nova j v o r t o j , kiuj ne faros eĉ la plej malgrandan tuŝon en nia Fundamento, ĉar ili ne anstataŭos la maloportunajn⁴¹ malnovajn vortojn, sed ekzistos nur paralele kun ili, kiel sinonimoj, kiuj ekzistas ja en granda nombro⁴² en ĉiu lingvo — kiel neologismoj, kiuj kredeble iom post iom elpuŝos la malnovajn formojn kaj faros el ili arĥaismojn, tamen neniam nuligos, neniam senvalorigos ilin. En ĉiuj estontaj lernolibroj kaj vortaroj de nia lingvo kaj en ĉiuj novaj eldonoj de la ĝis nun jam verkita j lernolibroj kaj vortaroj la novaj vortoj kaj formoj estos presataj ne anstataŭ la malnovaj, sed nur krom la malnovaj, samtempe kun la malnovaj (aŭ tabelo de la novaj vortoj kaj formoj estos simple aldonata al la libroj en formo de aparta folieto)⁴³. La novaj⁴⁴ vortoj estos aldonitaj al la Fundamento, kaj la estontaj esperantistoj krom la novaj formoj lernos⁴⁵ ankaŭ la malnovajn, kiuj eĉ ne estos por ili superflujaj, ĉar ili povos de tempo al tempo uzadi⁴⁶ ilin (kiam ili volos uzi stilon iom « antikvan », aŭ kiam ili volos pli akcenti la vortojn ; ekzemple : « mi as (t.e. : estas) nevidata, sed mi tie ĉi⁴⁷ estas »⁴⁸).

Sekve la estontaj uzantoj de Esperanto havos nenian novan ŝanĝon, ĉar kiu ellernis la kelkajn milojn da vortoj de nia [307] lingvo⁴⁹ tiu ja certe ne plendos, se li devos lerni ankoraŭ kelkajn dekojn aŭ eĉ kelkajn centojn da vortoj⁵⁰ ; en la lingvo estos farita nenia ŝanĝo aŭ rompo ; neniu el la jam eldonitaj verkoj perdos sian valoron k.t.p. Kaj tamen kian grandegan gajnon ni havos ! Dank'al la malmultaj

685

³⁶ Unua redakto: "prezentas".

³⁷ Unua redakto ĝis frazofino: "en la nuna momento, kiam la lingvo komencas sian duan periodon de [306] ekzistado, la periodon de porĉiama praktika uzado".

³⁸ Unua redakto: "kaj ĉe matura esplorado ne superas la ciferon de ĉirkaŭ 100", forstrekita en la fina redakto.

³⁹ Unua redakto: "100 ŝanĝojn".

⁴⁰ Unua redakto: "ĉirkaŭ 100".

⁴¹ En la dua redakto forstrekita: "100".

⁴² Antaŭe: "amaso".

⁴³ Teksto en krampoj aldonitaj en la dua redakto.

⁴⁴ Forstrekita: "100".

⁴⁵ Antaŭe: "lernados".

⁴⁶ "oportune" antaŭ „uzadi“ forstrekita.

⁴⁷ "tie ĉi" aldonita.

⁴⁸ Dua ekzemplo „; kiel oni povas ne ami tan (t.e. : tian) homon, t i a n homon ! »“ forstrekita.

⁴⁹ Unua redakto: "2.600 vortojn de la nuna Fundamento".

⁵⁰ Unua redakto: „anstataŭ 2.600 devos lerni 2.700 vortojn“.

novaj vortoj⁵¹ kaj formoj⁵² ni ne sole fermos por ĉiam la buŝon al ĉiuj malkontentuloj, ni ne sole forigos ĉiujn disputojn, ni ne sole forigos la glavon de Damoklo, kiu sub la formo de timataj venontaj ŝanĝoj konstante pendas super niaj verkistoj kaj paralizas ilian energion, sed — kio estas la plej grava — nia lingvo fariĝos multe pli eleganta, oportuna kaj fluanta⁵³, ĉar la novaj⁵⁴ vortoj estos ĝuste tiuj, kiuj estas uzataj la plej ofte kaj per sia maloportuneco aŭ longeco faras la paroladon Esperantan neoportuna kaj lama.⁵⁵

La enkonduko de certa nombro da neologismoj donos al ni ankoraŭ la sekvantan gravan gajnon : ĝis nun diversaj malkontentuloj diradis, ke la praktika uzado montris en Esperanto diversajn gravajn malbonaĵojn, kiujn la esperantistoj, timante disfalon, nun jam ne povas [308] forigi, kaj tial la malkontentuloj « estas devigataj krei novajn lingvojn » ; la ŝanĝo de kelkaj formoj per vojo de neologismoj montros al la mondo, ke Esperanto, timante nian disfalon, povas tre facile forigi tiujn punktojn, kiuj montriĝis efektive malbonaj. Tial, se Esperanto eĉ estus absolute perfekta, ni devus intenceti fari en ĝi kelkajn ŝanĝojn, por fari savantan oferdonon al la dio de malpaco kaj fermi la buŝon al la kriantoj, al kiuj ni povos nun ĉiam respondi : « Se Vi certigas, ke Via kritiko estas ne Via persona kaprico, sed efektive "tre grava malbonaĵo", pri kiu "la tuta mondo konsentas", tiam Vi povas ja prezenti Vian proponon al la Lingva Komitato, kiu enkondukos Vian proponon per vojo de neologismoj. »

La frazo, ke « tio aŭ alia ne povas esti enkondukita per neologismoj, sed postulas reformon rompan », estus ne vera, ĉar per la sendanĝera vojo de neologismoj ni povas enkonduki ĉion, eĉ en tia okazo, se ĝi postulus ŝanĝon de la formoj jam ekzistantaj ; la diferenco estas nur tiu, ke plibonigojn de la lasta kategorio oni devos fari ne per unu fojo, sed per du fojoj. Ekzemploj : 1° Imagu al Vi, ke la Lingva Komitato venis al la konvinko, ke la ĝisnuna « g » ne predevas esti elparolata kiel « ĝ » (kiel opinias kelkaj esperantistoj, kvankam mia opinio estas tute alia) ; kiel tiam agi ?

Decidi per unu fojo, ke « g » povas esti elparolata « ĝ » oni ne povas, ĉar tio ĉi donus kolizion kun la formo jam ekzistanta kaj sekve enportus konfuzon en la lingvo. Sed tiam oni povas agi en la sekvanta maniero : oni unue liberigus la literon « g », decidante, ke oni ĝin povas skribi ankaŭ per la vakanta kaj senkolizia « q » — kaj post kelka serio da jaroj, kiam la « g » jam estos malaperinta el ĉiuj verkoj Esperantaj kaj forgesita, oni decidus, ke la nun vakanta kaj jam nian kolizion donanta « g » devas esti elparolata kiel « ĝ ». 2° Imagu al Vi, ke montriĝis necesa (?), ke la multenombro de substantivoj finiĝu per « i » [309] anstataŭ « oj » ; tiam oni agas en la sekvanta maniero : unue oni liberigas la « i » de la infinitivo, decidante, ke la infinitivo povas finiĝi ankaŭ

⁵¹ Antaŭe: „cent novaj vortoj“.

⁵² Teksto de la semikolo ĝis tie ĉi aldonita per la dua redakto.

⁵³ Antaŭe: “fluanta”.

⁵⁴ “cent” antaŭ “novaj” forstrekita.

⁵⁵ En la unua redakto sekvis jena alineo, forstrekita per la dua: “Nun mi prezentos al vi la tabelon de tiuj ĉirkaŭ cent novaj vortoj, kiujn mi proponas enkonduki en nian lingvon kaj aldoni al nia Fundamento. Mi tamen atentigas vin, ke tiu ĉi tabelo estas nur provizora, por ke la esperantistoj povu fari al si proksimuman ideon pri la karaktero de la neologismoj kaj povu decidi la demandon en principo. Kiam en principo la kongreso akceptos la projekton de neologismoj, tiam ĝi elektos komitaton el kelkaj plej kompetentaj personoj, kiuj en la daŭro de tuta jaro esploros la tutan tabelon teorie kaj praktike, elfetos tiujn neologismojn, kiuj montriĝos nebonaj, aldonos diversajn aliajn, kiuj montriĝos utilaj, kaj al la sekvonta kongreso la komitato prezentos por fina aprobo tabelon tute definitivon, kiu de tiu momento estos oficiale aldonita al la „Fundamento de Esperanto”.

per « ar »; kiam la « i » de la infinitivo estos jam forgesita, tiam oni enkondukos ĝin por la multenombro. {...}

D. La Akademio

I. Superrigardo

- 1 La Antaŭparolo ne mencias la **terminon** „Akademio“, sed nomas ĝin „aŭtoritata kaj nedisputebla institucio“ (A 3.4), „aŭtoritata institucio“ (A 7.2), „aŭtoritata centra institucio“ (ACI, A 8.1 kaj A 10.4) kaj „centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro“ (A 9.4).
- 2 „**Centra**“ en la lingvaĵo de Z signifas „demokrate reprezentanta“. „**Aŭtoritata**“ signifas „fidele aplikanta la regulojn de la F-to kaj pro tio esti akceptita de la esperantistoj“ (pri ambaŭ vd. ĉi-poste). „**Institucio**“ signifas iu ajn organizaĵo, kiu havas sufiĉan strukturon por veni al komuna volo kaj komuniki ĝin al la esperantistoj.
- 3 Ĉu la nuna grupo de personoj, kiuj nomas sin „Akademio“ (ankoraŭ) fakte plenumas tiujn kondiĉojn de ACI en 2014, ŝajnas tre dube. Pli da argumentoj probablighas, ke nuntempe la esperantistoj ne disponas pri funkcia ACI.

II. Ekesto de la lingvaj institucioj

Literaturo (selekto): **Bein**, K. [= Kabe] (1908). Raporto pri la fondo de la E-ista Akademio kaj pri la laboroj de la Lingva Komitato kaj de la Akademio dum la Kvara Kongreso. En: *Revuo*, La 1908:3:2 (26), p. 56-58 (Lingva Komitato tro multnombra (80), pro tio kreo de Akademio kun 18 membroj. La unuaj 12 elektitaj. 4 konstantaj komisionoj: gramatiko, komuna vortaro, teknika vortaro, internaj aferoj). – ne ind. [probable Gaston Waringhien] (1968). Mallonga historio de la lingvaj institucioj. En: **Aktoj I**, p. 7-11. Daŭrigo ĝis 1992 en **Aktoj III**, p. 6-8. – **EeP** (1974), ĉap. 20.1, p. 664-669 (ne indikita laŭvorta transpreno el Aktoj I).

1. 1889 – La planita „Tutmonda Ligo de Esperantistoj“ (TLE)

- 4 Jam en 1889 Z faris proponon por „Tutmonda Ligo de Esperantistoj“. Ĝia centra komitato, nomita „Akademio“, ankaŭ havu la rajton fari lingvajn ŝanĝojn en Esperanto. La projekto tamen ne trovis la aprobon de la tiamaj esperantistoj kaj fine Z resignis pri la „infano malvive naskita“.
- 5 Z ekdiskutis sian proponon en *La Esperantisto* 1889, n-ro 3 jene:

„Se mi volus ankoraŭ esti mem leĝdonanto en la lingvo kaj ŝanĝadi ĝin ĉiutage laŭ mia propra volo, tiam la afero baldaŭ tute detruigus. [...] Ni bezonas nun havi ian ligan aŭ akademion, kiu, estante kreita de la amikoj mem, estus aŭtoritata por ĉiuj amikoj de mia [verŝajne preseraro por nia] afero.“ [*La Esperantisto* 1889:1:3]

Estas rimarkinde, ke jam du jaroj post la Unua Libro li parolas pri „leĝdonanto“. Ankaŭ la ideon de A 4.6 („trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon“) ni trovas jam en tiu mallonga citaĵo el 1889, same kiel la koncepto „aŭtoritata por ĉiuj esperantistoj“.

- 6 En la kajero de Junio 1889 sekvis lia konkreta propono por statuto de fondota TLE kun ĝia „centra komitato organiza“ (CK), kaŝcele nomita *Akademio*. Ĝi estu elektota ĉiujare. § 10 de la propono tekstas:

La aferoj tuŝantaj la tutan Ligon, kiel ekzemple la perfektigado de la lingvo Esperanto aŭ la uzado de la kaso de l' Ligo, sin trovas en la manoj de la Akademio Esperantista* kiu konsistas el 10 personoj, kiuj estas ĉiujare nove elektataj per voĉdonado de ĉiuj kluboj de la Ligo.

La originala noto apud „Akademio Esperantista“ tekstas en la artikolo:

„* Tiu ĉi Akademio estas efektive la centra komitato de la Ligo, sed ĉar en kelkaj landoj la apartenado al la komitato aŭ Ligo estas ligita kun maloportunoj, tiel la Centra Komitato portas la nomon »Akademio« pro tiu sama kaŭzo, pro kiu la membroj de la Ligo havas la nomon »oferantoj«.“

- 7 La CK de TLE laŭ la propono havu la rajton decidi „artajn ŝanĝojn“ en Esperanto, do planitajn, intencitajn ŝanĝojn lingvajn, kontraste al ŝanĝoj pro natura evoluo. Tiuj ŝanĝoj ricevu „leĝan forton“ tamen nur, se la klubaj membroj de TLE ene de tri monatoj ne protestos:

§ 15 - Se la Akademio decidis fari ian artan ŝanĝon en la lingvo Esperanto, tiu ĉi decido ricevas leĝan forton ne pli frue ol post paso de 3 monatoj post la publikigo de la decido de la Akademio.

§ 16 - Se unu el la kluboj trovas, ke la reformo proponita de la Akademio estas malutila al la lingvo, aŭ ke la utilo de tiu reformo estas tiel sensignifa, ke ĝi ne rekompencas la maloportunon, kiu estas ligita kun ĉia arbitra rompado de la lingvo, tiu klubo povas meti la proponitan reformon al la voĉdonado de ĉiuj kluboj, kaj se antaŭ la fino de 3 monatoj de la tago de la publikigo de l' decido de la Akademio montriĝos, ke pli ol duono de la kluboj donis sian voĉon kontraŭ la decido de l' Akademio, tiam tiu ĉi decido estas nen[i]gata.

§ 18 - Sed antaŭ ol estos kreita la unua Akademio en la lingvo Esperanto povas esti farata neniu eĉ la plej malgranda ŝanĝo.

2. 1905 – „Lingva Komitato“ (LK)

- 8 La ACI kun la nomo „Lingva Komitato“ (LK) estis fondita en 1905 de UK 1. Pri la fondo de LK dum la 2^a kunsido raportas la Oficiala Protokolaro de la Unua Kongreso Universala de Esperanto (Boulogne sur-Mer, 1905) jene:

« La Prezidanto demandas la Kongreson, ĉu ĝi konsentas pri la fondo de Komitato simple lingva kun Doktoro Zamenhof kiel prezidanto, por konsiliĝi kun li pri ĉiuj demandoj rilataj al la lingvo. Tiu propono estas unuvoĉe aprobata. » [OGE 1909:01:07, p. 201 de 1909-01-25].

- 9 La elekto, pli precize la provizora nomumado fare de Z, de la unuaj Lingvo-Komitatanoj sekvis en la 4^a kunsido (Oficiala Protokolaro):

« [La Prezidanto] legas la nomojn de tiuj personoj, el kiuj konsistos la provizora Lingva Komitato, kies elekton oni komisiis al D-ro Zamenhof, en antaŭa kunsido. Li petas, ke oni montru aliajn nomojn, se estas necese, por plenigi la Komitaton. » [Sekvas la nomoj de la membroj elektitaj]. « Tiu ĉi granda Lingva Komitato decidis mem pri sia organizado kaj funkciado, ĉu elektante oficistaron, ĉu dividiĝante en grupojn. » [OGE 1909:01:07, p. 202 de 1909-01-25].

- 10 Laŭ cirkulero unua de la Organiza komitato, datumita de la 5^a de septembro 1906 kaj represita en la Fundamentaj dokumentoj de la Centra Oficejo (*), S-ro rektoro BOIRAC laŭ deziro de D-ro Zamenhof efektivigos la direktadon de la Lingva Komitato. La sidejo de tiu Komitato estas 51, rue de Clichy, Paris. Kaj oni devas ĉion sendi laŭ la jena adreso:

Al Prezidanto de la Esperantista Lingva Komitato, Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris.

- 11 En UK 2 (Ĝenevo 1906) okazis la definitiva aprobo de la Lingva Komitato:

« S^{ro} BOIRAC rimarkigas, ke la Lingva Komitato estas nur provizore elektita de D^{ro} ZAMENHOF, por unu jaro, kaj li transdonas la povojn de tiu komitato al D^{ro} ZAMENHOF.

D^{ro} ZAMENHOF petas de la Lingva Komitato, ke ĝi restu, kia ĝi estas, kiel definitiva komitato, kaj ke la prezidanto konservu sian postenon.

S^{ro} BOIRAC dankas la Majstron, je la nomo de la Lingva Komitato, pro tiu atesto de konfido, kaj akceptas resti prezidanto de la definitiva komitato. » [El la Oficiala Protokolaro de la Dua Universala Kongreso de Esperanto (Genève, 1906), 3^a kunsido; OGE 1909:01:07, p. 208 de 1909-01-25]

- 12 Per artikoloj 6 ĝis 10 de sia „Regularo“, „akceptita per voĉdonado raportita en sia letero 15-a de la 12^a de Junio 1908“ la multmembra „Lingva Komitato“ (LK) kreis pli laborkapablan „Superan Komision“, nomitan „Esperantista Akademio“, de maksimume 18 membroj. La normoj tekstas:⁵⁶

Art. 6^a.

Estas starigita en la Lingva Komitato Supera Komisiono, aŭ Esperantista Akademio, difinita por esplori la demandojn submetitajn al la L. K., kaj formuli decidojn laŭ la opinioj kolektitaj pri tiuj demandoj ĉe la Lingvokomitatoj.

Art. 7^a.

La nombro de la membroj de la Akademio ne povos superi 18.

Art. 8^a.

Ili estas elektotaj, per absoluta plimulto, de la Lingvokomitatoj laŭ proponlistoj enhavantaj nombron de kandidatoj cirkaŭe duoblan de la elektotoj. La kandidatoj estas elektotaj de la Estraro inter la membroj signitaj pro specialo lingvistika kompetenteco, prezentitaj de la diverslandaj esperantistoj, kaj havantaj la eblecon doni efektivan kunhelpon al la laborado de la Komitato.

Art. 9^a.

La membroj de la Akademio estas elektataj por 9 jaroj kaj rebalototaj ĉiun trian jaron po triono. Ili estas reelekteblaj.

Art. 10^a.

La L. K. kaj la Akademio havos la saman Estraron, kiu enhavos, krom D^{ro} ZAMENHOF, honora prezidanto, efektivan prezidanton, unu aŭ du vic-prezidantojn kaj ĝeneralan sekretarion.

La membrojn de tiu Estraro elektos la Akademio.

La kompletan tekston de la Regularo vd. en OGE 1909:01:07, p. 208-210 de 1909-01-25. Pliajn detalojn vd. en la „Konzica historio“ de la lingvaj institucioj, Aktoj I, 1963-1967.

- 13 Z konfirmis la ekeston de LK jene⁵⁷:

Klarigo.

El leteroj kaj gazetaj artikoloj mi vidas, ke kelkaj Esperantistoj ne ĝuste komprenas la esencon de la Centra Oficejo kaj ili pensas, ke mi propavole fondis ian novan leĝdonantan komitaton. Tial mi devas iom klarigi la aferon.

685

⁵⁶ Cit. laŭ OGE 1909:01:07, p. 209 de 1909-01-25.

⁵⁷ OGE 1909:01:07, p. 234-235 de 1909-01-25.

La Centra Oficejo ne estas ia leĝdonanta komitato, ĝi estas simple oficejo, ĝi estas simple loko, en kiu koncentriĝas la laboroj la du komitatoj, kreitaj de la Bulonja kongreso. La Kongreso kreis provizoran Lingvan Komitaton kaj provizoran Organizan Komitaton, sed ĝi donis neniajn monajn rimedojn, por eblegi al la ambaŭ komitatoj sukcesan laboradon; tiam troviĝis sindonaj kaj malavaraĵ Esperantistoj, kiuj el sia propra poŝo donis (almenaŭ por la unua tempo) la necesan monon, luis apartan loĝejon, en kiu povus koncentriĝi la laboroj de la ambaŭ komitatoj, ĉiuj dokumentoj ĉiuj leteroj, irantaj al la diritaj komitatoj kaj de la komitatoj; ili ankaŭ difinis kelkan salajron por aparta sekretario, kiu — kun konsento de la prezidantoj de ambaŭ komitatoj — devas plenumadi la necesan korespondadon, registradon k. t. p. Sekve la Centra Oficejo estas ne ia memstara leĝdonanta institucio, sed nur simple helpa oficejo por la ambaŭ komitatoj kreitaj de la Kongreso.

Mi devas diri ankaŭ kelkajn vortojn pri mia persona rilato al la ambaŭ komitatoj. Pro la nunaj cirkonstancoj en mia patrujo kiuj iafafoje por longa tempo detranĉas min de la tuta mondo esperantista, kaj parte ankaŭ pro la stato de mia sano, kiu nun jam ne permesas al mi tiel multe labori eksterprofesie, kiel antaŭe, mi ne povas nun aktive partoprenadi en la laboroj de la ambaŭ komitatoj elektitaj de la kongreso, kaj tial mi petas, ke kun ĉio koncernanta la agadon de la komitatoj oni sin turnu ne al mi, sed al la prezidantoj de la diritaj komitatoj, nome :

- a. Por la Lingva Komitato al S^{ro} Rektoro Boirac.
- b. Por la Organiza Komitato al S^{ro} Generalo Sebert.

Por konservado de bona ordo en la laboroj, estas utile, ke ĉiuj leteroj al ambaŭ prezidantoj, laŭ ilia propra deziro, estu direktataj al ili per la « Centra Oficejo ».

L. L. ZAMENHOF.
17 Februaro 1906.

- 14 En 1908 la LK decidis pri la Ido-krizo (Ido estis proponitaj de la „Delegacio“) jene:

„Voĉdono de la Lingva Komitato.

S-ro Boirac, prezidanto l' Lingva Komitato, sendis al la gazetaro cirkuleron pri la „Delegacia Demando“ laŭ kiu:

Sesdek unu (61) anoj de l' Lingva Komitato voĉdonis.

8 ne havas opinion;

8 estas dankaj al la Delegacio kaj volas reformojn;

11 deziras konsenton kun la Delegacio kaj kelkajn ŝanĝojn;

34 ne volas trakti kun la Delegacio kaj opinas, ke oni ne devas nun paroli pri ŝanĝoj.“ [Lingvo Internacia 1908, p. 77].

III. „Institucio“

1. Jura statuso

- 15 La jura statuso de la Akademio (AdE) ne estas unuece konstatebla. Ĝi ne estas leĝe registrita en iu ŝtato de la mondo. Ĝia statuto ne difinas, kiu juro de kiu ŝtato estu aplikebla al ĝi. La statuto ankaŭ ne enhavas iun regulon, el kiu eblus konkludi tian aplikeblan juron, ekz. indikon pri leĝa sidejo. Pluraj provoj doni al la Ak. klaran juran statuson estis rifuzitaj de ĝiaj membroj (ekz. doni al ĝi la statuson de bonfara asocio laŭ svisa juro).
- 16 Se la AdE volus procesi pro iu kialo ekz. en Germanio, germana juĝisto probable traktus ĝin kiel societo de civila juro sen profit-strebo (*BGB-Gesellschaft*). Juĝisto de aliaj jursistemoj eble traktus ĝin laŭ la korespondaj naciaj reguloj.

2. „Institucio“ en la senco de la Antaŭparolo

- 17 La neklara ŝtat-jura statuso tamen ne malhelpas, ke la nuna AdE estas „institucio“ en la senco de la Antaŭparolo. Por esti **tia** sufiĉas ĝia organiza grado, kiun donas al ĝi la **statuto**. Nome ĝi enhavas regulojn, kiel fariĝi kaj malfariĝi membro, pri siaj organoj kaj kiel estu organizita la laboro, fine kiel okazu la trovo de komuna volo de la membroj por plenumi la taskojn difinitajn en la Antaŭparolo kaj komuniki ĝin al la esperantistoj. Pri la evoluo de la lingvaj institucioj vd. malsupre.

IV. „Aŭtoritata“ Institucio

1. Superrigardo

- 18 La esprimo „aŭtoritata“ enhavas du aspektojn, internan kaj eksteran. La **interna** perspektivo koncernas la manieron kaj motivojn laŭ kiuj asertita ACI venas al decido, nome ĉu konforme al BD kaj la F-to, precipe al A, aŭ ne. Nur fundamentkonforma rezonado kaj ekzegezo povas esti „aŭtoritataj“. La **ekstera** aspekto koncernas la reagon de la esperantistoj (BD 5) al trovita respondo de ACI, nome ĉu granda plimulto – kaj ĉefe la „bonaj verkistoj“ (BD 3.3) kaj la „plej kompetentaj amikoj“ (A 5.3) - akceptas trovitan decidon aŭ ne. Tio okazos des pli facile ju pli granda estas la interna aŭtoritateco.
- 19 **Interna** aŭtoritato necesas por ĉiu unuopa decido (oficialigo, tolerdeklaro, rekomendo, aprobo aŭ malaprobo). **Ekstera** celas la sumon de ĉiuj unuopaj decidoj. Ĝi estas rezulto el daŭra kaj fidinda argumentado fundamentkonforma.
- 20 ACI **kial tute** devas esti aŭtoritata. Tio implicas, ke almenaŭ sufiĉe granda plimulto de ĝiaj **unuopaj** (aktivaj) **membroj** (nun laŭstatute 45) mem havas aŭtoritatecon. Inverse: Se neaŭtoritataj membroj dominas la decidojn de ACI, tiu mem perdas sian aŭtoritatecon.
- 21 Unuopa membro de ACI povas esti nur aŭtoritata, se li estas „**bona esperantisto**“ en la senco de A 5.4 kaj A 5.5. Li do precipe devas profunde koni (kaj por si mem akcepti!) BD kaj la Fundamenton, krome laŭeble bone la verkaron de Z (BD 4.6, A 3.6).

2. „Interna“ aŭtoritato

- 22 En diversaj kunteksto la Antaŭparolo priskribas, skizas „idealan“ decidon de ACI. Ĝi nome devas esti karakterizata per jenaj ecoj
- neniu facilanima paŝo A 1.1
 - ne laŭ personaj kapricoj A 1.2, ne kaprica A 3.1, ne laŭ arbitra kaj persona bontrovo A 3.1, ne arbitra A 6.4.
 - klara, tute difinita A 3.1-2, tute klara A 3.3, metanta finon al ĉiuj mal-kompreniĝoj kaj disputoj A 3.3, senkonfuzo A 6.4.
 - obeo al la principo de netuŝebleco A 1.3-4
- 23 Internan aŭtoritaton havas nur argumentado surbaze de la valor-sistemo de la Fundamento, t.e. pli konkrete surbaze de la sistemo kreita de la Antaŭparolo kaj BD. Tio ĉefe signifas, ke argumentado devas okazi **laŭ la norm-hierarkio** fiksita en ambaŭ dokumentoj (vd. supre la ĉapitrojn pri BD kaj A: Fundamento → Zamenhofa uzo, se subtenanta la unuecon de la lingvo → uzo de la bonaj aŭtoroj).
- 24 Por ke iu opinio estu aŭtoritata en la sfero de **privortaj diskutoj**, ĝi krome devas respekti la Fundamentan sistemon pri *vortoj fremdaj* (R 15), *novaj vortoj* (A 7) kaj *formoj novaj* (A 8), do la t.n. „Fundamentan semaforon“ (detalojn vd. ĉe tiuj normoj). Jam nur la (bedaŭrinde disvastigita) nediferenciga uzo de la termino „neologismo“ estas forta indico, ke iu argumentas ekster la Fundamento.

- 25 Por ke opinio estu aŭtoritata, ĝi ankaŭ devige devas akcepti la faritajn decidojn de la Antaŭparolo pri gravaj kaj malpli gravaj aspektoj de lingva demando. La plej grava argumento estas la unueco de la lingvo kaj de la lingvanoj (A 1.1 kaj multloke). La argumento de „etimologia ĝusteco“ ekzemple, kontraste estas eĉ ne Fundamenta, do nur suplemenata, malforta, sekundara argumento.
- 26 Se la AdE decidas pri OA, ĉiu decido pri ĉiu unuopa vorto aŭ regulo estas konsiderinda **aparte**. OA povas enhavi „aŭtoritatajn“ decidojn kaj inter ili iujn „neaŭtoritatajn“, kiuj lezas la preskribojn de la F-to. Unuopaj neaŭtoritataj decidoj **ne** nuligas la tutan OA. Tiel ekzemple la AdE malatentis, ke la vorto *beletr-*, kiun ĝi volis oficialigi per OA 9 (2007) estas formo nova en la senco de A 8 al la jam oficiala *beletristik-* (pli detale vd. en la Kvara Libro ĉe OA 9). Eĉ **se** la decido pri *beletr-* pro tio estus neaŭtoritata, tiu eventuala manko **ne** „infektus“ la tutan OA 9. La aliaj decidoj kunigitaj en OA 9 restas netuŝitaj de eventuala unuopa miso.

3. „Ekstera“ aŭtoritato

- 27 Per „ekstera aŭtoritato“ oni povas karakterizi la efikon, la eĥon de interna aŭtoritato inter la esperantistoj. Ili memvole submetas sin al formalaj, laŭorde faritaj decidoj de ACI, prenitaj laŭ la sistemo de la F-to. Se al tiuj mankas interna aŭtoritato, t.e. se ili baziĝas sur eksterfundamentaj konsideroj aŭ kriterioj, aŭ arbitre lezas la formalan proceduron, ili ne povas ekhavi eksteran aŭtoritaton. Ĉiuj esperantistoj havas la rajton kaj moralan devon atentigi aliajn lingvanojn pri neaŭtoritataj decidoj de la AdE kaj protesti kontraŭ ili. La Fundamento protektu Esperanton precipe kaj ĉefe ankaŭ kontraŭ malfidela kaj do nur ŝajn-aŭtoritata Akademio.

V. „Centra“ Institucio

- 28 La signifo de la nocio „centra“ en la Antaŭparolo (A) estas ligita al la Zamenhofaj proponoj de la Fundamento, la Bulonjan Deklaracio (BD) kaj la projekto de „Regularo de Tutmonda Ligo Esperantista“ (Regularo), kiujn li prezentis kiel tutaĵo al la unua Kongreso en 1905.⁵⁸ A, BD kaj Regularo estis verkitaj samtempe, prepare al UK 1. Ni jam vidis, kiel kohera kaj unueca estas la lingvouzo kaj la nocio-sistemo, uzata en BD kaj A (vd. supre ĉe BD). Same staras pri la lingvaĵo de la planita Regularo.
- 29 La projektita, sed de la Kongreso malakceptita § 5 de la Bulonja Deklaracio tekstis:
- „Pri ĉiuj duboj, kiuj aperas ĉe la uzado de la lingvo Esperanto, decidas ĉiam la Centra Komitato Esperantista, elektata de la esperantistoj de la tuta mondo en la internaciaj kongresoj esperantistaj.“ (niaj substrektoj)
- 30 La malakceptita BD 5-propono aludas la **Projekton de Regularo de Tutmonda Ligo Esperantista**. Laŭ la Regularo estis planita Komitato de la Lingvo (pro tio la posta nomo „Lingva Komitato“ - LK), kiel suborgano de la Centra Komitato (CK). Ĝia tasko estu memstare okupi sin je la kurantaj lingvaj aferoj enkadre de eventualaj specialaj instrukcioj de la Centra Komitato. La Projekto de Regularo de Tutmonda Ligo Esperantista preskribis en § 11 frazo 3:
- „Ĉiujn membrojn por la unua jaro elektas la aŭtoro de Esperanto; en ĉiu sekvanta jaro ĉiu Komitato mem eligas 1/3 de siaj membroj (reelekteble) kaj anstatauigas ilin per aliaj, per voĉdonado, aranĝita 2 monatojn antaŭ la Kongreso, de la Komitata prezidanto, kiu sendas al ĉiu membro la nomaron de ĉiuj personoj kiuj

685

⁵⁸ La argumentoj de ĉi tiu ĉapitro baziĝas ĉefe sur Velger, Kontribuoj 1999, ĉap. 20.

esprimis al li la deziron eniri en la Komitaton. La rezultato de la voĉdonado estas prezentata por aprobo al la Kongreso.“ (nia substreko)

Tiel, kaj la Centra Komitato kaj la Komitato de la Lingvo lastinstance dependu de la volo de la Kongreso, t.e. de la esperantista popolo. Laŭ la tuta kunteksto oni do devas supozi, ke „centra“ por Zamenhof iel implicas „demokrata“, „reprezenta“.

- 31 Tiun supozon subtenas **A 1.2:** „Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj ..., tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, ...“. Ĝis la oficiala rekono de Esperanto fare de la internacia ŝtato-komunumo, la esperantistoj organizu sin kvazaŭ-ŝtate, sur bazo egaleca (BD 4.1, 4.5), demokrata (A 1.5) kaj sub la regado de la juro (A 3.1-2, vd. la komentoj pri tiuj normoj supre).
- 32 Plue, en **letero al Sebert** de la 1-a de julio **1909** Zamenhof skribis:

„Laŭ mia opinio la granda eraro de la ĝisnuna Centra Oficejo konsistis en tio, ke portante nomon oficialan, ĝi en efektiveco estis institucio pure privata. Se vi deziras, ke la Centra Oficejo havu aŭtoritaton kaj konfidon, ĝia komitato devas nepre esti elektata de la esperantistaro mem kaj donadi kalkulajn raportojn pri sia agado al la esperantistaj grupoj aŭ iliaj delegitoj. Mi kredas profunde, ke la Centra Oficejo havos sukceson kaj fortikecon nur tiam, se ĝi efektive estos centra, t.e. elektata kaj donanta kalkulraportojn; nur tiam ĝia voĉo havos grandan valoron (ĉar ĝi estos efektiva reprezentanto de la esperantistoj)“.

Tiu teksto enhavas ian difinon de „centra“, nome i.a. „elektata de la esperantistaro kaj donanta kalkulraportojn“. Jen la kerno de la signifo de l' nocio „centra“ en la idearo de Zamenhof kaj de la Antaŭparolo: „demokrate reprezenta“ kaj „submetita al la volo kaj kontrolo de la esperantistoj“.

- 33 Ŝajnas do, ke la nuna Akademio **ne** plenumas la kriterion „centra“ de la Fundamento, ĉar la akademianoj nek estas rekte elektataj de la esperantistaro, nek la internaj elektoj estas almenaŭ poste aprobataj de „la esperantistoj“, ekzemple en kongreso; la Akademio mem alektas (kooptas) siajn membrojn (Art. 6 de la statuto), sen posta kongresa aprobo. Laŭ Velger 1999 „oni povas, iom pene, pravigi tion, argumentante, ke per silenta interkonsento la esperantistoj aprobis la ĝisnunajn elektojn, ĉar la esperantistoj estas konvinkitaj, ke la akademianoj mem estas la plej kompetentaj esperantistoj, kiuj plej bone scias, kiu meritas esti akademiano.“ Tiu pravigo en 2014 apenaŭ plu konvinkas, ĉar ekzistas gravaj duboj pri la „kompetenteco“ de la nunaj akademianoj en la senco de A 5.3-5 (bona kono kaj akcepto de la Fundamento inkl. de la Fundamenta norm-hierarkio; vd. supre ĉe „aŭtoritata“).
- 34 Estas facile imageble, kiajn nekontestebajn avantaĝojn kaj kiajn danĝerojn alportas tia elektosistemo, kiu faras el la Akademio ian nekontroleblan kardinalan kolecion. Zamenhof, kiu ne volis resti ia lingvopapo, certe preferus, ke la Akademio havu pli da demokrata legitimeco, ekz. tiel, ke la interna voĉdonado en la Akademio estas prezentata por aprobo al la kongresoj, laŭ la modelo de § 11 frazo 3 de la projektita Regularo, kaj / aŭ per iu alia formo de aprobo fare de la esperantistoj (ekz. per Interneto).

VI. Zamenhof pri la rolo de la Akademio

- 35 Dum la Ido-krizo (1907-1908) Z plurfoje donis **Lingvajn Respondojn** pri la rolo de la Akademio. Rimarkinde estas, kiel kohere kaj senkontraŭdire ili spegulas la preskribojn de la Antaŭparolo. Ĉefa temo de liaj Respondoj estas A 9 („« perfektigado » nur en okazoj de efektiva neceseco post matura prijuĝado“).

LR 1907: „... Ĉiu prudenta esperantisto komprenas tre bone, ke la Lingva Komitato estas kreita ne por entrepreni diversajn danĝerajn novaĵojn, eĉ ne por krei ion, sed nur por kontroli pasive, t.e. por malpermesi ĉiun entreprenon, kiu povus malutili al la unueco de nia lingvo. La Lingva Komitato povas entrepreni iajn laborojn, sed ĝi tute ne havas la devon tion fari – ĝia sola rolo estas: solvi per voĉdonado diversajn dubojn, pri kiuj oni *ĝin demandas*.“ [LR 151 A, let. al Boirac de 1907-10-31, LZ II, p. 60]

„[N]e por entrepreni ... danĝerajn novaĵojn“ (A 9.2); „unueco de nia lingvo“ (BD 4.6, A 1.1, A 9.1 kaj multloke); „solvi dubojn“ – juĝista funkcio de la Akademio (A 9.4); „per voĉdonado“ - demokratia kaj reprezentanta principo: „centra“ (A 9.4, A 10.4 – „aŭtoritata centra institucio“ - kaj multloke).

36 Samsence jaron poste

LR 1908: „... Ĉar neniu devas iam havi la rajton senvalorigi ion, kio troviĝas en la Fundamento, tial la Lingva Komitato havas la rajton nur permesi kaj konsili (tre singarde) la uzadon de novaj vortoj aŭ formoj, sed neniam ordoni!

... Principe la plej alta leĝo por mi estas „unueco inter la esperantistoj“, kvankam mi konfesas, ke praktike tio (almenaŭ en la nuna tempo) ŝajnas al mi ebla nur sur la bazo de la Bulonja Deklaracio.“ [LR 151 B, let. al Th. Cart de 1908-07-29, OV p. 542]

„[Ne] senvalorigii ion“ - principo de netuŝebleco (A 1.1 kaj multloke); „nur permesi kaj konsili“ (A 10.4: „neniam ŝanĝi!“); „tre singarde“ (A 9.2-3); „novaj vortoj aŭ formoj“ (A 7, A 8).

37 **LR 1908:**

LR 1908: „Principe la Lingva Komitato havas la rajton permesi en la lingvo ĉion, kion ĝi trovos necesa; mi neniam prezentos ian malhelpon, kaj ĉiun mature pripensitan kaj orde voĉdonitan decidon de la Komitato mi akceptos sendispute. Sed mi opinias, ke la vera celo de la Lingva Komitato tute ne konsistas en ia facilanima eksperimentado sen grava neceso; ju malpli ni okupos niajn kapojn per diversaj „plibonigoj“ kaj ju pli ni simple propagandos kaj riĉigos la lingvon, des pli bone estos.“ [LR 153 A, Respondo 45, La Revuo, 1908, Aŭgusto]

„permesi ĉion“ (A 8, A 10.4); „mature pripensitan“, ne „facilanima“, „sen grava neceso“ (A 9.2-4); „simple propagandos kaj riĉigos“ – „spiritaj mastroj“ (BD 3.2).

38 Fine en 1910:

LR 1910: „Fari oficialan decidon pri tiu aŭ alia duba lingva demando havas la rajton nur nia Akademio, post voĉdona interkonsiliĝo kun la tuta Lingva Komitato.

Oni tamen ne malkomprenu min. Mi tute ne apartenas al tiuj personoj, kiuj dezirus, ke la Akademio donadu al ni kiom eble pli da decidoj. En lingvaj demandoj ĉiu superflua „decido“ katenas, kaj ni devas esti kun ĝi tre singardaj; „decidojn“ oni devas fari nur en okazoj de efektiva kaj senduba neceseco!“ [LR 152, el la „Antaŭparolo al la Lingvaj Respondoj“, 1910]

„nur nia Akademio“ (A 9.4); „nur en okazoj de efektiva kaj senduba neceseco“ (laŭvorte A 9.3, aldonita nur „kaj senduba“).

VII. La Statutoj de la Akademio

1. Superrigardo

- 39 Ni komparu tiun idealan bildon pri „aŭtoritata centra institucio“ kun la realo de la Akademio, kiel ĝi videblas en la diversepokaj statutoj. La plej gravaj etapoj de la **statuta evoluo** estis:

jaro okazaĵo

- 1905 taskigo fare de UK 1 ellabori statuton por la LK
1906 konfirmo de la statuto („Regularo“) de UK 2
1908 kreo de la Esperantista Akademio kiel „Supera Komisiono“ de LK
1912 ĉefa ŝanĝo: „la anoj de la LK estas elektitaj de la LK mem, per absoluta plimulto de la voĉdonantoj, inter kandidatoj, kies liston preparas la Akademio“ (art. 4)
1935 disigo de la Regularo en „Statutaro“ kaj „Interna Regularo“; la Akademio ne plu „eltiras el la proponitaj kandidatoj la esperantistojn, kiujn ĝi juĝas indaj fariĝi anoj de la LK“, sed de nun limigas sin je la listigo de la kandidatoj, kiujn prezentas „la esperantistaj societoj, la anoj de la LK, aŭ eĉ kiu ajn esperantisto, kiu ankaŭ rajtas prezenti sin mem“; samtempe limigo de la nombroj de LK-anoj je 100 (antaŭe estis foje eĉ 116, en 1939 ankoraŭ 102)
1948 20a de Julio: Kunfandiĝo de LK kaj Akademio en unu institucio (art. 1); La nombro de akademianoj estas prefere ĉ. 40, sed ĝi ne povas esti pli ol 50 (art. 3)
1964 Nova Statuto en Aktoj I. p. 13-19 (tie sen dato [!]), kiu formas la principan bazon pri taskoj, membronombro, kooptado („alelekto“), eksigoj, estraro, decidoj k.t.p. ĝis nuntempe; postaj aldonoj kaj revizioj koncernas nur randajn aŭ teknikajn punktojn
1970 10a de Dec.: Aldono de art. 11-A pri „korespondantoj de la Akademio“ (Aktoj II, p. 6)
1988 Aprilo: „Redakta revizio“ en Aktoj III, p. 10-14; kun nur malmultaj enhavaj ŝanĝoj, tamen kompleta novaranĝo de la preskriboj
2009 aktuala stato de la Statuto (Okt. 2009)
2014 Propono pri nova statuto de 2014-12-04

2. Analizo de la Statuto de 2009

- 40 La statuto laŭ la stato de Okt. 2009 tekstas:

STATUTO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

(Redakta revizio de Oktobro 2009)

I. PRINCIPOJ

Artikolo 1. Celo

[1] La Akademio de Esperanto -- mallonge indikota per la vorto Akademio -- estas sendependa lingva institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon.

[2] La Akademio transprenis la celojn kaj la laborojn de la antaŭa "Lingva Komitato" kaj de ĝia "Akademio", kaj daŭrigas la taskojn de tiuj Lingvaj Institucioj.

- 41 Mankas referenco al la Bulonja Deklaracio kaj preciza difino de tio, kion ampleksas la Fundamento. Pro la esprimo „fundamentaj principoj“ povis ekesti la (superflua) diskuto, ĉu la Antaŭparolo estas parto de ĝi. Kp. art. 23.1.

Artikolo 2. Taskoj

[1] La Akademio esploras ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton. Ĝi verkas vortaron de Esperanto kun difinoj en Esperanto. Ĝi verkas teknikajn terminarojn, aŭ kontrolas kaj aprobas tiajn terminarojn, verkitajn de aliaj aŭtoroj. Ĝi revizias aperintajn verkojn kaj kritikas ilin el lingva vidpunkto. Ĝi povas doni premiojn al la aŭtoroj de la plej bonaj aperintaj verkoj.

[2] La Akademio defendas Esperanton kontraŭ konkurencaj sistemoj de lingvo internacia.

- 42 Mankas listo de la devigaj taskoj, preskribitaj en la Antaŭparolo, precipe en A 1.1 (gardi la unuecon) kaj A 8 (aldonoj de novaj vortoj kaj reguloj). La nomitaj taskoj ĉiuj nur estas libervolaj, sekundaraj.
- 43 Mankas klarigo, ke ankaŭ eksterfundamentaj variaĵoj de Esperanto estas „konkurencaj sistemoj“.
- 44 Mankas listo de tio, kiel la Akademio agas (oficialigoj, toler-deklaroj, rekomendoj, aproboj / malaproboj). Art. 22 estas malkompleta.

II. MEMBROJ

A) ĜENERALAĴOJ

Artikolo 3. Nombro

La nombro de la Akademianoj estu principe 45.

Artikolo 4. Daŭro

La Akademianoj konservas sian postenon dum 9 jaroj; ili estas reelekteblaj.

Artikolo 5. Trionoj

Ĉiun trian jaron unu triono de la membroj estas submetata al rebaloto. Por la tabelo de tiuj balotoj la membroj estas dividitaj en tri Grupoj laŭ siaj jaroj de eliro.

Artikolo 6. Postenoj

Se unu aŭ pluraj postenoj fariĝas vakantaj inter du regulaj elektoj, la elekto por ties plenigo okazos ĉe la sekvanta regula elekto: en tiu baloto, estos unue provizataj la 15 postenoj de la Grupo submetita al elektado; poste la vakantaj postenoj estos atribuitaj al la elektitoj ricevintaj malpli da voĉoj ol la 15 unuaj; se estas vakantaj postenoj en du Grupoj, oni krome zorgos, ke kandidato ricevinta pli altan nombron da voĉoj estu elektita al la pli longa periodo da membreco.

Artikolo 7. Korespondantoj

Povas fariĝi Korespondantoj de la Akademio eminentaj personoj, kies okupoj aŭ funkcioj ne permesas al ili regule partopreni en la laboroj de la Akademio, sed kiuj deziras doni al ĝi la apogon de sia nomo. La Korespondantoj ricevas ĉiujn akademiajn dokumentojn kaj povas eventuale esti konsultitaj pri lingva demando rilata al ilia specialeco. Ili ne havas voĉdonrajton.

B) ELEKTOJ

Artikolo 8. Kandidatiĝo

Por fariĝi kandidato por la Akademio, esperantisto devas esti proponita de almenaŭ 5 Akademianoj, kiuj reprezentu almenaŭ tri malsamajn naciajn lingvojn. Tiu regulo ne aplikiĝas al la Akademianoj, kiuj venas al la fino de sia postenperiodo. Ili estas aŭtomate prezentataj al reelekto, kondiĉe ke ili deklaras sin pretaj denove kandidati.

Artikolo 9. Informiĝo

Antaŭ ol submeti kandidaton al baloto, la Prezidanto demandas lin pri lia aĝo, ricevita scienca kaj faka instruado, profesia kariero, scio de naciaj lingvoj, Esperanto-agado -- aparto pri publikigaĵoj en kaj pri Esperanto -- fideleco al la Fundamento de Esperanto, kaj konsento konstante kunlabori en la Akademio. La Prezidanto, se la ĝisnunaj verkoj de la kandidato ne igas tion superflua, ankaŭ petas la opinion pri li de la Nacia Asocio aŭ de alia kompetenta institucio en la lando aŭ regiono, al kiu la kandidato apartenas. La Prezidanto komunikas al la elektontoj la ricevitajn respondojn de kaj pri la kandidato.

Artikolo 10. Kvalifikoj

Kiel membroj de la Akademio estas elekteblaj la esperantistoj, kies kapabloj kaj agado sur la tereno de la Lingvo Internacia garantias ilian kompetentan partoprenon en la laboroj de la Akademio, t.e. ĉefe:

- la sendiskute rekonitaj esperantologoj;
- la eminentaj pedagogoj aŭ leksikologoj, kiuj per siaj laboroj grave helpis al la instruado de Esperanto;
- la aŭtoroj, kies Esperantaj verkoj, originalaj aŭ tradukitaj, efektive kontribuis sur la beletra, teknika aŭ scienca kampoj al la kultura riĉiĝo de nia lingvo.

- 45** Mankas la kondiĉo el la Antaŭparolo: laŭeble bona kono de la normaro de Esperanto, do de BD kaj F-to.

Artikolo 11. Honoro kaj laboro

La membreco de la Akademio ne estas honora titolo, sed ĝi postulas fidelan kaj konsciencan partoprenon en la laboroj de la Akademio.

Artikolo 12. Balotado

La membroj de la Akademio estas elektataj de la Akademio mem per absoluta plimulto de la voĉdonantoj. Se devas okazi rebaloto, ĉar ne sufiĉe da kandidatoj ricevis la absolutan plimulton, en tiu rebaloto la relativa plimulto decidas. En okazo de nombroegaleco de la voĉoj la Prezidanto havas decidan voĉon.

- 46** Mankas procedura regularo.

C) EKSIGOJ

Artikolo 13. Eksigebloj

Membroj de la Akademio povas esti eksigataj:

- a) se ili kvarfoje sinsekve ne respondis leterojn aŭ cirkulerojn de la Prezidanto, de la Estraro aŭ la Direktoro de la Sekcio, al kiu ili apartenas;
- b) se ili ne partoprenas en la voĉdonoj aŭ alimaniere klare montras sian nekapablecon aŭ indiferentecon por la plenumo de sia ofico;
- c) se ili agis publike aŭ kaŝe kontraŭ Esperanto ĝenerale aŭ kontraŭ la Akademio aparte.

Artikolo 14. Eksigado

Pri eventuala eksigo la Akademio decidas, se eble post esploro de la klarigoj de la interesato, per absoluta plimulto de la voĉdonantoj, se almenaŭ du trionoj de la membroj voĉdonis, alie per absoluta plimulto de ĉiuj membroj. En okazo de nombroegaleco de la voĉoj la Prezidanto havas decidan voĉon.

III. ORGANIZO

Artikolo 15. Estraro

[1] La Estraro de la Akademio konsistas el:

- la Prezidanto de la Akademio;
- unu aŭ du Vicprezidantoj;
- la Ĝenerala Sekretario-Kasisto, se eble salajrata.

[2] Cetere la oficoj de la Estraranoj estas sensalajraj, sed la Estraranoj havas rajton je kompenso por necesaj elspezoj.

Artikolo 16. Sekcioj

[1] En la Akademio estas organizataj Sekcioj, kiuj studos la demandojn rilatajn al la specialaj lingvaj fakoj: gramatiko, ĝenerala vortaro, teknikaj vortaroj, literaturo k.a. La Sekcioj povas esti kreataj laŭbezone kaj ilia nombro ne estas limigita.

[2] Ĉiu Sekcio estas gvidata de Direktoro. Ĉiu Akademiano povas aliĝi al unu aŭ pluraj Sekcioj, por kiuj li sentas sin speciale kompetenta aŭ al kiuj li volas prefere dediĉi siajn fortojn.

Artikolo 17. Komisionoj

Komisiono estas tia organo de la Akademio, kiu plenumas aliajn taskojn ol la lingvaj. Ĝi respondecas antaŭ la Estraro. La Pleno aprobas la celon kaj funkciadon de difinita Komisiono kaj konfirmas la membrojn proponitajn de la Direktoro. Specialaj raportoj de la Komisiono informas la Plenon pri ĝia agado. Direktoro de la Komisiono povas inviti al kunlaboro specialistojn eĉ el ekster la Akademio.

Artikolo 18. Elektoj

La membroj de la Estraro kaj la Direktoroj de la Sekcioj kaj Komisionoj estas elektataj de la Akademio por tri jaroj. Tiuj elektoj okazas ĉiun trian jaron tuj post la elekto de la triono de la Akademio. La elirantaj Estraranoj estas reelekteblaj. En okazo de intertempe vakanta loko en la Estraro la Prezidanto aŭ Vicprezidanto tuj okazigas elekton. La intertempe elektita Estrarano estas submetata al rebaloto ĉe la fino de la kuranta trijara periodo. Tio sama validas por la Direktoroj.

Artikolo 19. Eksteraj rilatoj

La Akademio povas starigi oficialajn rilatojn kun organizoj eksteraj, i.a. kun fakaj komisionoj de specialistoj kaj kun naciaj Esperanto-Institutoj, se tiuj rekonas ĝian lingvan aŭtoritaton kaj devigas sin submeti al ĝia kontrolo la rezultojn de siaj laboroj.

IV. DECIDOJ

Artikolo 20. Esploraĵoj

[1] La Akademio devas esplori demandojn prezentitajn al ĝi de unu el la sekvantaj instancoj:

- a) La Prezidanto aŭ la Estraro;
- b) La Direktoro de unu el la Sekcioj aŭ Komisionoj;
- c) almenaŭ 5 Akademianoj.

[2] La Akademio povas ankaŭ esplori demandojn prezentitajn al ĝi de iu esperantista organizaĵo, de unuopa persono aŭ de grupo de personoj.

Artikolo 21. Sekcia laboro

Se iu lingva demando apartenas al la laborkampo de iu Sekcio, la Direktoro de tiu Sekcio, konsultinte ties membrojn, ellaboras raporton, pri kiu voĉdonas la Akademio. Se ne ĉiuj Sekcianoj samopinias, la raporto prezentu la diversajn vidpunktojn, kaj, post ĝia komunikado al la Akademianoj, la Estraro lasu almenaŭ

dumonatan intertempon por la diskutado, antaŭ ol voĉdonigi la Akademion pri la konkludoj de la raporto.

Artikolo 22. Akademia decido

[1] Pri ĉiu studita demando la Akademio prenas decidon. [2] La decidoj povas esti nuraj rekomendoj aŭ malrekomendoj, aŭ definitivaj aproboj aŭ malaproboj.

Artikolo 23. Proceduro

[1] La Akademio solvas la al ĝi submetitajn lingvajn demandojn laŭ la principoj de la "Fundamento de Esperanto". [2] Pri ĉiuj demandoj rilataj al lingvouzo ĝi decidas per absoluta plimulto de la voĉdonantoj, se almenaŭ du trionoj de la membroj voĉdonis, alie per absoluta plimulto de ĉiuj membroj. [3] Se temas pri enkonduko de lingva novaĵo aŭ pri ŝanĝoj de pli fruaj decidoj de la Akademio aŭ de la Lingva Komitato, la aprobo de almenaŭ du trionoj de ĉiuj membroj estas necesa. [4] En okazo de nombroegaleco de la voĉoj la Prezidanto havas decidan voĉon. [5] Se laŭ la supraj kondiĉoj decido ne povas esti atingata, la demando estas submetata al nova voĉdono. [6] La voĉdonoj povas okazi ankaŭ per elektronikaj rimedoj laŭ teĥniko aprobita de la estraro.

- 47 La centra procedura normo estas malklara. Ĝi ne respegulas la triŝtupan sistemon de la F-to: Aldono de vortoj fremdaj (R 15) kaj novaj vortoj (A 7) per simpla plimulto, decido pri formoj novaj (A 8) per du trionoj.

V. OFICIALAJ ORGANOJ

Artikolo 24. "Oficialaj Informoj"

Por diskonigi siajn laborojn kaj decidojn la Akademio publikigas "Oficialajn Informojn de la Akademio de Esperanto" en formo de cirkuleroj sendataj al la Akademianoj kaj al la esperantistaj gazetoj, kiuj deklaris, ke ili konsentas represii ilin.

- 48 Art. 24 ne plu respegulas la realecon. Decidoj *devas* esti publikigitaj por la publiko (A 3.3). Tio nuntempe kutime okazas en la propra retejo de la AdE.

Artikolo 25. "Oficiala Bulteno"

Laŭbezone kaj laŭ la financaj rimedoj la Akademio povas ankaŭ publikigi presitan kajeron kun la titolo "Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto".

VI. FINANCOJ

Artikolo 26. Fontoj

La Akademio trovas siajn financajn fontojn en subvencioj de la Universala Esperanto-Asocio kaj de aliaj esperantistaj organizaĵoj, kiuj volas subteni ĝian laboron, kaj en donacoj de esperantistoj.

Artikolo 27. Kontoj

Ĉiujare la kontoj de la Akademio estas publikigataj en la Jarlibro de la Universala Esperanto-Asocio.

VII. ŜANĜOJ EN LA STATUTO

Artikolo 28. Proponoj

Proponi ŝanĝon en la Statuto povas ĉiu Akademiano, kaj tiu propono devas esti submetita al voĉdono, se almenaŭ 4 aliaj Akademianoj ĝin apogas.

Artikolo 29. Ŝanĝo

Pri propono por ŝanĝo en la Statuto decidis la Akademio post raporto de la Estraro. Por esti akceptita, tia propono bezonas la aprobon de minimume du trionoj de la membroj de la Akademio.

3. La „Propono pri nova Statuto“ de Dec. 2014

Literaturo (selekto): [Silfer, Giorgio]. Provoj de reformo en la lingva Akademio. En: HeKo 569 2-A de 2014-12-06⁵⁹ (kritikas sole: „Inter la kvalitoj por eniri la Akademion daŭre mankas la posedo de akademijaj titoloj“).

- 49 La teksto de la propono estas publikigita en la retejo de la AdE.⁶⁰ Ĝis Aprilo 2015 apenaŭ estis iuj publikaj reagoj pri ĝi kaj neniu profunda. Kerna kritiko estas, ke la Propono 2014 eĉ pli neas la rolon kaj taskojn, kiujn la AdE plenumu kiel „aŭtoritata centra institucio“ (ACI) en la senco de la F-to, ol tion faras jam nun la Statuto 2009. [Daŭrigota].

VIII. Periodaĵoj kaj publikigaĵoj de la Akademio

- 50 Lingva Komitato kaj Akademio dum diversaj periodoj uzis diversnomajn periodaĵojn por komuniki kun la esperantistoj. Ili estis:

Jaroj	Periodaĵoj [siglo]
1908-1922	Oficiala Gazeto Esperantista [OGE].
1923-1938	Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio [JarL].
1929-1933,	Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto [OB – unua serio].
1934-1938	Oficialaj Sciigoj de la Akademio [OS].
1948-1956	Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto [OI – unu serio].
1958-1992	Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto [OB – dua serio].
1992-2013	Oficialaj Informoj [OI – dua („nova“) serio] (24 numeroj ĝis 2013)

Krome

1987-
19?? **Letero de l' Akademio** [LetAk], „organo de la „amikoj de l' Akademio“.

Por interna komunikado inter Akademianoj ekzistas nepublikaj „cirkuleroj“.

- 51 Krome la lingvaj institucioj publikigis depresaĵojn el OGE kiel apartaj broŝuroj. La sekvanta tabelo baziĝas sur artikolo nomita „Akademijaj Periodaĵoj kaj publikaĵoj“⁶¹ en Aktoj III, 1992, p. 9-10 kaj estis kronologie reordigita kaj ĝisdatigita por BK.

Jaro	Periodaĵoj aŭ publikaĵoj
s.j.	Vortoj Ĉerpitaj el Hamleto. Ellis, Millidge, Wackrill, Ŝefer. Paris: Esp-ista Centra Oficejo.
1908	Zamenhofaj Vortoj Netroveblaj en la Universala Vortaro. Raportis Alfred-E. Wackrill . Paris: Esp-ista Centra Oficejo 1908, 51 p.
1908- 1922	Oficiala Gazeto Esperantista [OGE]. (Lingva Komitato; la movado). Paris: (E-ista Centra Oficejo). 6 volumoj Junio 1908 - Majo 1914. 11 kajeroj jare po 40 p. - Vol. 7: duoblaj n-roj ekde 3 - 4 (Aŭgusto 1914), 5 - 6 (Decembro 1916), 7 - 8 (Decembro 1918), 9 (Oktobro 1919), 10 (Januaro 1920), 11 (Majo 1920) - Vol. 8: 3 kajeroj (1921 - 1922). – Skanita en http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm
1909	Fundamentaj Dokumentoj pri la Esperantista Lingva Komitato. Paris: E-ista Centra Oficejo 1909, 14 p. [ankaŭ en OGE 1909]

685

⁵⁹ url: <http://www.esperantio.net/index.php?id=2515>.

⁶⁰ url: <http://www.akademio-de-esperanto.org/dokumentoj/statutonova20141204.pdf>.

⁶¹ Ĝi enhavas jenan dankon: „Estu dankataj Kolego Reinhard Haupenthal kaj s-ro Jean Amouroux el Perpignan sen kiuj tiu bibliografio estus manka“.

- 1909 **Unua Oficiala Aldono** al la Universala Vortaro. Paris: Esp-ista Centra Oficejo 1909, 31 p. (E-ista Dokumentaro. 13)
- 1910 Pri la **participa sufikso** antaŭ verba finiĝo. (Parizo: E-ista Centra Oficejo) (1910), 28 p.
- 1910 Pri la Transskribo de la **Propraj Nomoj**. Raport. Gaston Moch. Paris: E-ista Centra Oficejo 1910, 93 p. [ankaŭ en OGE]
- 1911 Pri la preparo de nova kaj pli **plena eldono** de la Universala Vortaro. Raport. Horace Huet. Paris: E-ista Centra Oficejo 1911, 42 p.
- 1913 **Fundamentaj Dokumentoj** pri la Oficialaj Institucioj de Esperanto. Paris: E-ista Centra Oficejo 1913, 47 p. (E-ista Dokumentaro. 22)
- 1919 **Dua Oficiala Aldono** al Universala Vortaro. Paris: E-ista Centra Oficejo 1919, 16 p. (E-ista Dokumentaro).
- 1923-1938 **Jarlibro** de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio. Komp. Th. Cart. Paris: Esp-ista Centra Oficejo 1923, 16 p. (E-ista Dokumentaro. 34). [la sama, korektita per ciklostilitaj paĝoj, aperas en 1925]. Paris: Esp-ista Centra Librejo 1926 ĝis 1931, 1932-1933, 1934 po 32 p.; 1935, 1936 po 40 p.; 1937, 24 p. - Hago: 1938, 43 p.
- 1926-1935 Esperantista Akademio. **Jarlibro** de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio. Paris: E-ista Centra Librejo 1926 - 1935 po 32 p., 1935: 40 p.
- 1929-1933 **Oficiala Bulteno** de la Akademio de Esperanto [OB]. Aperis kajeroj 1 - 6 : Paris: Esp-ista Centra Librejo 1929 - 1933, 132 p. [1 kaj 2 entenas la 4-an O.A. al la UV.].
- 1934-1938 **Oficialaj Sciigoj** de la Akademio [OS]. Fontenay-sous-Bois 1934-1936 (12 numeroj). Hago 1937-1938 (2 numeroj).
- 1948-1956 **Oficialaj informoj** de la Akademio de Esperanto [OI]. Hago: Akademio de Esperanto
- 1948 **Jarlibro de UEA**, Dua Parto - Statuto
- 1949 **OI 16** – Reorganizo de la lingvaj institucioj; komentario pri la Statuto
- 1949 **OI 17** (Julio) – Elekto de akademianoj⁶²
- 1950 **OI 18** – Elekto de la estraranoj kaj direktoroj de sekcioj
- 1952 **OI 19** (Julio) - Oficialigo de la sufikso -end.
- 1958 **Oficiala Bulteno** de la Akademio de Esperanto [OB]. "1" [= 7] Sepa O.A. al la UV. 1958.
- 1959 **Oficiala Bulteno** de la Akademio de Esperanto [OB]. "2" [= 8].⁶³ J.R.G. Isbrucker: Pri la vortfarado en Esperanto. Repr. el Esperantologio vol. 2, n-ro 1, Nov. 1959, p. 13-36.
- 1968 **Oficiala Bulteno** de la Akademio de Esperanto [OB]. **9.** Aktoj de la Akademio 1963 - 1967. 1968. [Aktoj I]. 2a eld. Rotterdam 2007, 63 p. – ankaŭ en <http://www.akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj1/index.html>.
- 1975 **Oficiala Bulteno** de la Akademio de Esperanto [OB]. **10.** Aktoj de la Akademio II 1968 -1974. (1975). [Aktoj II] – ankaŭ en: <http://www.akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj2/index.html>.
- 1985 **OI 4** (Nov.) – Rekomendo pri la landnomoj
- 1987-1995 **Letero de l' Akademio**, La. Paris: La amikoj de l' Akademio de Esperanto. Oktobro 1987 po 4 p., poste po 8 p. en ĉiu trimonato, entute 31 n-roj en formato A 4 ĝis Aprilo-Junio 1995. ISSN 0986-1181.
- 1992 **Oficiala Bulteno** de la Akademio de Esperanto [OB]. **11.** Aktoj de la Akademio III 1975-1991 (1992). [Aktoj III]

⁶² Ankaŭ en Esperanto (UEA) 1949:42:10 (528), p. 126.

⁶³ Rete legebla: http://eo.wikipedia.org/wiki/Pri_la_Vortfarado_en_Esperanto.

- 2006-2013 **Oficialaj Informoj** [OI] (24 numeroj ĝis 2013), ĝis 2014-09 troveblaj nur en http://www.akademio-de-esperanto.org/oficialaj_informoj/index.html.
La 3an de Februaro 2013 prezento de la Financa situacio de la Akademio estis aldonita.
La informoj pri la Konsultejo estis ĝisdatigitaj la 25an de Decembro 2010.
La informoj pri la Direktoroj kaj pri la Konsultejo estis ĝisdatigitaj la 28an de Oktobro 2010.
- 2010 **OI 13** – 2010-04-29: “Elekto de triono de la akademianoj”.
- 2010 **OI 14** – 2010-10-16: “Rezultoj de la elekto de la estraro kaj de la direktoroj de la Akademio”.
- ? **OI 15** – ?
- 2011 **OI 16** – 2011-04-17: Sekcio pri Faka Lingvo - Raporto pri libromanuskripto kun la titolo Ekoturisma vortareto (PDF-dosiero).
- 2011 **OI 17** – 2011-12-15: “Publikigo de la respondoj de la Konsultejo de la Akademio”
- 2011 **OI 18** – 2011-12-20: “Pri la utiligo de la oficialaj materialoj de la Akademio de Esperanto”.
- 2012 **OI 19** – 2012-07-13: “2012-05-25 - Respondo al sinjoro Volker Schultheiß”.
- 2013 **OI 20** - 2013 04 27: “Elekto de triono de la akademianoj”.
- 2013 **OI 21** - 2013 10 01: “Rezultoj de la elekto de la estraro kaj de la direktoroj de la Akademio”.
- 2013 **OI 22** – 2013-10-10: “Rekomendo de la Akademio pri la uzo de propraj nomoj”.
- 2013 **OI 23** – 2013-11-06: “Informo pri la morto de la membro de la Akademio de Esperanto Lena Karpunina”.
- 2013 **OI 24** – 2013-11-23: “Informo pri novaj korespondantoj de la Akademio”.
- Informo de la Akademio de Esperanto (IA)**

IX. Oficialaj Tekstoj ne troveblaj en la retejo de la Akademio

- 52** **OI 18 [?] (1950)** [Elekto de la estraranoj kaj direktoroj de sekcioj]:

„Post la okazintaj elektoj de la Direktoroj de la Sekcioj de la Akademio de Esperanto la estraro nun konsistas el la sekvantaj personoj: prezidanto: i-ro J.R.G. **Isbrücker**, Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando; vicprezidantoj: A. **Cseh**, Riouwstr. 72, Den Haag, Nederlando; prof E. **Privat**, Evole 3, Neuchâtel, Svisujo. La taskojn de la ĝenerala sekretario-kasisto provizore plenumas la prezidanto kun helpo de la Internacia Esperanto-Instituto. Direktoroj de la diversaj sekcioj: Gramatiko d-ro W. **Lippmann**, 1021 East 14th Str., Brooklyn 30, N.Y., Usono. – Literaturo: Georges **Avril**, 60 Bld. Auguste Raynaud, Nice (A.M.), Francujo - Ĝenerala Vortaro: prof. G. **Waringhien**, 7 Av. Léon Goudault, Choisy-le-Roi, Francujo. - Teknikaj Vortaroj: J. **Okamoto**, 2435 Sinob-cho, Ueno-si, Mec-ken, Japanujo. - Bibliografio: d-ro P. **Neergaard**, Gothersgade 158. København-K., Danujo. [OI = ScRe 1952:03:12, p. 124].

- 53** **OI 19 (1952)** [Oficialigo de –end]: Vd. BK II.

X. Membroj de Lingva Komitato kaj Akademio

- 54** La Prezidantoj de la Lingvaj Institucioj estis sinsekve:

1905-1917 Emile **Boirac** (1851-1917), franca filozofo kaj rektoro de la Universitato de Dijono.

- 1917-1920** interrompo pro la morto de Boirac kaj la unua mondmilito.
- 1920-1931** Théophile **Cart** (1855-1931), franca lingvisto, profesoro en la Lernejo de Politikaj Sciencoj en Parizo kaj, en la lastaj jaroj, prezidanto de la Pariza Societo de Lingvistiko.
- 1931-1933** John Mabon **Warden** (1856-1933), skota aktuario ĉe la vivasekura kompanio “Scottish Equitable“, membro de la Edinburga Instituto de Aktuarioj.
- 1933-1937** Maurice **Rollet de l’Isle** (1859-1943), hidrografia ĝenerala inĝeniero de la franca maristaro, direktoro de la Centra Oficejo Hidrografia en Parizo.
- 1937-1939** Johannes R. C. **Isbrucker** (1889-1967), nederlanda inĝeniero pri elektrotekniko, vicdirektoro de meza teknika lernejo en Hago.
- 1939-1948** interrompo pro la dua mondmilito.
- 1948-1963** Johannes R. C. **Isbrucker** (1889-1967)
- 1963-1979** Gaston **Waringhien** (1901-1991)
- 1979-1983** William **Auld** (1924-2006)
- 1983-1995** André **Albault** (1923)
- 1995-1998** Werner **Bormann** (1931-2013)
- 1998-2007** Geraldo **Mattos** (1931-2014)
- 2007-2013** John C. **Wells** (1939)
- 2013-** Christer **Kiselman** (1939)
- 55** La **Direktoroj de la Sekcioj** estis:
- a)** por la **Komuna Vortaro**: Th. Cart (1908-1912); ĉe tiu dato Cart fariĝis “ĝenerala Direktoro por la Vortaro”, helpate de L. Elb, poste E. Grosjean-Maupin por la “komuna vortaro” kaj de Ch. Vérax por la “teknika”; ekde 1920, la situacio renormaliĝis kun la Direktoroj E. Grosjean-Maupin (1920-1934), L. Bastien (1934), W. Bailey (1935-1939).
- b)** por la **Gramatiko**: A. Grabowski (1908-1921), W. Lippmann (1924-1936), A. Cseh (1937-1940).
- c)** por la **teknika vortaro**: R. de Saussure (1912), kaj, post la komuna regado de Cart (vidu sub a), P. Corret (1920-1922), M. Rollet de Lisle (1922-1932), L. Bastien (1933-1936), L. Helleboid (1937-1939), ĉi lasta ne-L.K.-ano.
- d)** por jenaj, ne konstantaj sekcioj: pri **Internaj Aferoj**: G. Moch (1908-1911); pri **Propraj Nomoj**: G. Moch (1907-1910); pri **Vortfarado**: R. de Saussure (1911-1919); pri **Elparolo kaj Premioj**: E. Privat (1924-1927); pri **Kontrolo**: M. Rollet de l’Isle (1931-1939).
- 56** La Supera Komisiono aŭ **Akademio** konsistis en **1908** el 12 membroj: Boirac, Bein, Cart, Ellis, Evstifejeff, Grabowski, Moch, Mybs, Nylén, de Saussure, Villanueva kaj Wackrill, reprezentantaj respektive la lingvojn francan (4), anglan, polan (po 2), germanan, hispanan, rusan kaj svedan (po 1).
- 57** Post la interrompo de la unua mondmilito, ĝi konsistis el 15 membroj: Cart, Christaller, Corret, Evstifejeff, Grabowski, Grosjean-Maupin, Inglada, Kühnl, Lengyel, Mybs, Nylén, Privat, de Saussure, Wackrill, Warden, reprezentantaj respektive la lingvojn francan (5), anglan, germanan (po 2), ĉeĥan, hispanan, hungaran, polan, rusan kaj svedan (po 1).
- 58** Fine en 1939 ĝi konsistis el 16 membroj: Baghy, Bailey, Bastien, Belmont, Cseh, Grau Casas, Inglada, Isbrucker, Lippmann, Minor, Nylén, Rollet de Lisle, Schmid,

Setälä, Stamadiadis, Waringhien (kaj unu sekretario-kasisto ne-akademiano, R. de Lajarte), reprezentantaj respektive la lingvojn francan, germanan (po 3), hungaran (2), anglan, finnan, grekan, hispanan, katalunan, nederlandan, polan kaj svedan (po 1).

XI. Ĉu la Akademio en 2014 agas kiel ACI en la senco de la Antaŭparolo?

1. Indicoj kontraŭaj

59 La aktuala Statuto ne respegulas la devojn kaj kondiĉojn preskribitajn per BD kaj A.

60 [daŭrigota]

2. Berlina Manifesto por la Unueco de Esperanto

61 Por atentigi la esperantistojn pri la malkonformeco de la nuntempa AdE al la preskriboj de la F-to, fundamentfidelaj esperantistoj en Julio 2014 lanĉis la „Berlinan Manifeston por la Unueco de Esperanto“.⁶⁴ Ĝi tekstas:

Berlina Manifesto por la Unueco de Esperanto

Ni, anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto, direktas ĉi tiun manifeston al ĉiuj esperantistoj, Esperanto-organizaĵoj kaj –gazetoj, al ĉiuj bonvolaj amikoj de la Internacia Lingvo, deklaras nian intencon firmvole agadi por la unueco de la lingvo, kaj invitas ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.

1⁶³ De 1905 la Fundamento de Esperanto kun sia Antaŭparolo grave kontribuis, ke Esperanto ne disfalis. La Fundamento faradas Esperanton stabila, fidinda kaj pro tio lerninda. Sur ĝia bazo sole Esperanto evoluis al vivanta planlingvo de la 21a jarcento kaj estos alloga ankaŭ estonte.

Ni firme pensas, ke la Fundamento, ĝiaj principoj kaj kriterioj pri ĝusta kaj bona Esperanto daŭre estas modernaj kaj plene taŭgaj garantiigantaj regulan progresadon de la Internacia Lingvo, konstante adapti ĝin al novaj lingvaj defioj kaj samtempe gardi unuecon kaj stabilecon de la lingvo.

2⁶⁵ Ĉiu kaŝita provo anstataŭigi la Fundamentajn principojn kaj kriteriojn pri ĝusta kaj bona Esperanto minacas la unuecon de Esperanto kaj la kulturajn atingojn de ĝia komunumo.

Ni decide rifuzas ĉiun provon kaŝe kaj paŝon post paŝo senvalorigi, forpuŝi aŭ anstataŭigi la Fundamentajn decidojn pri ĝusta kaj bona Esperanto.

3⁶⁷ La Akademio de Esperanto estas fondita surbaze de la Fundamento kun la tasko gardi kaj protekti la kolektivan interkonsenton de la esperantistoj pri ĝusta kaj bona Esperanto kaj tiel la unuecon de la lingvo. Malgraŭ sia promeso fidele plenumi tiun taskon, granda plimulto de la nuntempaj akademianoj fakte ne aplikas la Fundamentajn principojn kaj decidojn. Eksplicite, konstante kaj jam multjare plimulto de „akademianoj“ aplikas kriteriojn privatajn. Ili mezuras

685

⁶⁴ Unue publikigita en la url: www.esperanto-konsultejo.info/manifesto.htm.

lingvan bonecon laŭ kriterioj fremdaj al la ĝenerala interkonsento de la esperantistoj. Ili pro tio misinformas kaj erarigas la esperantistojn pri lingva ĝusteco kaj boneco kaj aktivigas por iu plia reformita Esperantido.

Ni deklaras, ke la nuntempa Akademio kiel tuto ne havas aŭtoritatecon por decidi aŭ konsili pri ĝusta kaj bona Esperanto kiel difinas ĝin la Fundamento kaj ĝia Antaŭparolo.

Ni energie postulas, ke la „akademianoj“ malfidelaj al la Fundamenta valor-sistemo tuj demetu sian oficon.

Ni rigore malaprobas ĉiujn intencojn aŭ planojn de akademianoj prepari la nuligon de la Fundamento por ebenigi la vojon al reformita Esperantido.

Ni insiste petas ĉiun esperantiston energie kontraŭstari la ektuŝon de la lingva unueco de Esperanto fare de „akademianoj“ agantaj kontraŭ la Fundamento. Eblecojn por ekagi ni listigas en la **Aldonaĵo al tiu Berlina Manifesto**.

Berlino, en Junio 2014 — <http://www.esperanto-konsultejo.info/>

Aldonaĵo al la Berlina Manifesto por la Unueco de Esperanto

1⁶⁹ Kiel „akademianoj“ klopodas erarigi vin?

70 Por decidi pri „ĝusta“ kaj „bona“ ni devas difini (interkonsenti) kriterion: ĝusta en rilato al kio? bona por kiu? Ekzemplo:

Ni supozu, ke ni diskutas pri la taŭgeco de diversaj laboriloj. Se ni interkonsentas la kriterion „taŭga por skribi leteron“, komputilo estas bona. Se ni interkonsentas la kriterion „taŭga por frapi najlon en la muro“, komputilo estas malbona. Ŝanĝante la aplikendan kriterion, ni ŝanĝas la juĝon pri „bona“, „ĝusta“, „taŭga“. El bona komputilo fariĝas malbona laborilo.

Tute same estas pri lingvaj demandoj. La finaĵo –i estas ĝusta (bona, taŭga) por marki la pluralon de la substantivo en Ido. Sed ĝi estas malĝusta, malbona kaj maltaŭga en Esperanto, kiu difinis (interkonsentis), ke la pluralo de la substantivo estu -oj.

La trukon de kaŝa ŝanĝado de la boneco-kriterioj aplikas la plimulto de nunaj „akademianoj“.

2⁷² Kiel vi ekkonas, ke „akademianoj“ klopodas erarigi vin?

1. Plej bone estas, se vi studas la Fundamentajn kriteriojn, kiuj troveblas ĉefe en la sep malgrandaj paĝoj de ĝia Antaŭparolo, eble helpe de komentario (*).

2. Eĉ se vi nuntempe ne emas fari tion, estas facile ekkoni provon erarigi vin. La sistemo de la Antaŭparolo estas tre **preciza**, kohera, **konkreta** kaj **rekte aplikebla**, ĉar ĝi jam decidis la demandojn „bona por kiu?“, „ĝusta en rilato al kio?“, „ĝusta surbaze de kiuj fontoj?“. Ĉiuj **abstraktaj** kaj **malprecizaj** kriterioj, kiuj ne estas el si mem rekte aplikeblaj estas kontraŭfundamentaj kaj ŝanĝas la lingvon. Kelkaj ekzemploj el mesaĝoj de „akademianoj“:

- „facila“ — kontraŭfundamenta, ĉar necesas unue interkonsenti „facila por kiu?“, „kiel mezuri facilecon?“ Ne rekte aplikebla kriterio.
- „radikŝpara“ kiel metodo atingi „facilecon“ — kontraŭfundamenta pro la sama kialo: kiel mezuri asertitan gajnon de facileco kaj por kiu?
- „utila“ - kontraŭfundamenta, ĉar ne rekte aplikebla. Necesas unue interkonsenti „utila por kiu?“, „kiel mezuri utilecon?“; simile kontraŭfundamenta: „malnecesa“.
- „stranga“ - kontraŭfundamenta, ĉar necesas interkonsenti „stranga en rilato al kio?“
- „99 procentoj de la parolantoj“ - kontraŭfundamenta, ĉar praktike ne konstatebla

3⁷⁴ Kion vi povas fari kontraŭ malfidelaj „akademianoj“?

1. Disvastigu kaj diskutigu la **Berlinan Manifeston** inter viaj amikoj. Legu la Antaŭparolon.

2. Demandu „vian akademianon“: „Kial vi ne aplikas la kriteriojn de la Antaŭparolo?“ „Kial vi estas mallojala al la Fundamento?“ „Kial vi volas kaŝe ŝanĝi Esperanton?“ „Kial vi perfidas mian fidon, ke vi honeste servas al la esperantistoj?“

3. Ne donu forumon al ŝajn-akademianoj en kongresoj, seminarioj aŭ retaj diskutlistoj. Malhelpu, ke ili daŭre povas disvastigi siajn kontraŭfundamentajn instruojn kaj propagandi iun reformitan Esperantidon. Kontraŭargumentu!

(*) Komentario pri la Fundamento je <http://www.esperanto-konsultejo.info/bk.htm> - 2014-06.

3. Propono por Fundament-konforma Statuto de la Akademio Statuto de la Akademio De Esperanto

(Redakta revizio de [dato])

I. Principoj

Artikolo 1. Nomo kaj celo

[1] La *Akademio de Esperanto* - mallonge indikota per la vorto *Akademio* - estas sendependa lingva institucio, kiu plenumas la taskojn de „aŭtoritata centra institucio“ en la senco de la Fundamento de Esperanto. Ĝia celo estas konservi la unuecon de la lingvo internacia Esperanto, protekti ĝiajn fundamentajn principojn kaj konsili pri ĝia laŭnorma ĝusteco.

[2] La Akademio defendas Esperanton kontraŭ konkurencaj sistemoj de lingvo internacia. Al tiuj apartenas ankaŭ kontraŭnormaj variaĵoj kaj displitiĝoj de Esperanto.

[3] La Akademio transprenis la celojn kaj la laborojn de la antaŭa "Lingva Komitato" kaj ĝia „Akademio“. Ĝi daŭrigas la taskojn de tiuj lingvaj institucioj kaj estas ligita al ties decidoj.

Artikolo 2. Taskoj

La Akademio esploras lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton, kaj konsilas pri ĝusta kaj bona Esperanto laŭ la norm-sistemo de la lingvo. Al ĝiaj taskoj precipe apartenas:

1. Aldonoj al la Fundamento

- 1.1. Oficialigo de formoj novaj (vortoj aŭ reguloj) laŭ alineo 8 de la Antaŭparolo.
- 1.2. Oficialigo de novaj vortoj laŭ alineo 7 de la Antaŭparolo.
- 1.3. Oficialigo de vortoj fremdaj laŭ § 15 de la Gramatiko.
2. Publikado de ekspertizoj, komentoj kaj rekomendoj pri lingvaj demandoj (Lingvaj Respondoj).
3. Kontrolo, revizio kaj eventuala aprobo aŭ malaprobo de aperintaj lerniloj (lernolibroj, vortaroj, terminaroj) el lingva vidpunkto.
4. Kontrolo, revizio kaj eventuala aprobo aŭ malaprobo de aperintaj aliaj verkoj el lingva vidpunkto, ĉefe se ili ŝajnas taŭgaj grave atenci la unuecon de Esperanto.
5. Publikigado de facile konsultebla kolekto de la lingvaj normoj de Esperanto.
6. Informado kaj edukado de la publiko pri la fundamentaj principoj pri lingva ĝusteco en Esperanto kaj la rolo de ĝia Akademio gardi la unuecon de la lingvo.
7. Subteno de aliaj aŭtoroj, kies laboroj helpas plenumi la taskojn de la Akademio.
8. Ĉiu aliaj tasko, kies solvo ŝajnas taŭga kontribui al pli facila plenumado de la nomitaj taskoj.

Artikolo 3. Normoj lingvaj kaj organizaj

[1] La Akademio atingas sian celon kaj plenumas siajn taskojn surbaze de jena norm-hierarkio:

1. La Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo (Bulonja Deklaracio, akceptita la 9-an de Aŭgusto 1905 en la lasta laborkunsido de la Universala Kongreso en Bulonjo ĉe Maro)
2. La verketo „Fundamento de Esperanto“, konsistanta el la Fundamenta Gramatiko, la Ekzercaro kaj la Universala Vortaro, kune kun la principoj kaj kriterioj („ideoj“) de sia Antaŭparolo.
3. La Oficialaj Aldonoj al la Fundamento aŭ al iu el ĝiaj partoj kaj la aliaj oficialaj decidoj, ĉu propaj ĉu de la antaŭaj lingvaj institucioj.

[2] La Akademio suplemente konsideras

1. La stilon kaj modelojn, kiuj troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, se ili ŝajnas utilaj por la unueco de la lingvo.
2. La nedevigajn rekomendoj, ĉu proprajn, ĉu de la antaŭaj lingvaj institucioj.
3. La stilon kaj modelojn de tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estas konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

Artikolo 4. Decidoj

[1] La Akademio prenas jenajn decidojn.

1. Oficialigo de aldonaj vortoj aŭ reguloj. Oficialigo suplementas la lingvajn normojn validantajn ĝis la ekvalido de la aldonitaj vortoj kaj reguloj enkorpigataj en la ĝisnunajn normojn.
2. Tolerdeklaro. Tolerdeklaro allasas vorton aŭ regulon konkurencan al vorto aŭ regulo oficiala kiel akceptebla paralela formo nekontraŭnorma.
3. Rekomendo.
4. Aprobo aŭ malaprobo de verko.

[2] Decido estas nomita laŭ ĝia speco. Ĝi estas klara en la senco de alineo 3 de la Antaŭparolo kaj prezentas motivojn surbaze de la citendaj aplikeblaj lingvaj normoj.

[3] Decido ekvalidas je la dato de l' publikigo.

Artikolo 5. Publikigo kaj deponado

[1] La Akademio publikigas siajn decidojn kaj sciigojn en propra retejo. Ĝi povas krome publikigi ilin en presita papera formo.

[2] Decidoj laŭ art. 4 estas publikigita per „Oficiala Informo de la Akademio de Esperanto“. Administraj, proceduraj, prieduktaj kaj similaj sciigoj, esploraj studoj kaj invitoj al publika konsultado estas publikigita per „Informo de la Akademio de Esperanto“.

[3] La Akademio deponas ekzemplerojn de siaj decidoj kaj sciigoj ĉe gravaj bibliotekoj. Pri la listo de depon-bibliotekoj estos decidita laŭ la procedura regularo.

II. Membroj [Daŭrigota]

Dua Libro
Fundamenta Gramatiko
(FG)

A. La Fundamenta Gramatiko

I. Superrigardo

- 1 La Gramatiko (FG 1887) estas la plej malnova parto de la Fundamento kaj **enhava** neŝanĝite transprenita el la Unua Libro de **1887** (UL). Nur lingve la germana versio estas malmulte modernigita.
- 2 La originalo de la **germana** versio estas skribita en la tiuepoke normala **fraktur-skribo**. Detalojn vd. en la ĉapitro „La Germana en la Fundamento“. Pro manko de taŭga tiparo ni tie ĉi redonas la germanan tekston per la nuntempe kutimaj latinaj literoj.
- 3 En la kvin lingvo-versioj de UL Zamenhof klarigas la „tri kolonojn“ (la konstru-planon), sur kiuj baziĝas la relativa facileco de FG kaj pro tio de Esperanto, nome:
 - Senescepta gramatiko (vd. R 0 – R 10, R 12 – R 14, R 16)
 - plena dismembrigo de la ideoj en memstarajn vortojn – „vortara lingvo“ (vd. R 11)
 - vortoj, kiuj jam fariĝis internaciaj ("fremdaj vortoj") restas en la lingvo internacia neŝanĝataj (vd. R 15)

II. La „tri kolonoj“ de la relativa facileco de Esperanto

- 4 Por ĝuste interpreti kaj kompreni FG, indas koni la motivojn, kiujn Zamenhof donis en UL. Ni citas ilin laŭ lia traduko al Esperanto, farita por la 1a eld. de la Fundamenta Krestomatio (FK 1903). Niaj komentoj estas en angulaj parentezoj [...]; elstarigoj per *kursiva* skribo estas de Zamenhof, elstarigoj per **grasa** skribo estas niaj.

[UL 1] La plej ĉefaj problemoj, kiujn estis necese solvi [por krei lingvon internacian], estis la sekvantaj:

I) Ke la lingvo estu eksterordinare **facila**, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante.

II) Ke ĉiu, kiu ellernis tiun ĉi lingvon, povu **tuj ĝin uzi** por la kompreniĝado kun homoj de diversaj nacioj, tute egale ĉu tiu ĉi lingvo estos akceptita de la mondo kaj trovos multe da adeptoj aŭ ne, — t.e. ke la lingvo jam de la komenco mem kaj dank' al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikiĝoj.

III) Trovi rimedojn por venki la indiferentecon de la mondo [...].

I

[UL 2] La unuan problemon mi solvis en la sekvanta maniero :

a) Mi simpligis ĝis nekredobleco la **gramatikon**, kaj al tio de unu flanko en la spirito de la ekzistantaj vivaj lingvoj, por ke ĝi povu facile eniri en la memoron, kaj de la dua flanko — neniom deprenante per tio ĉi de la lingvo la klarecon, precizecon kaj flekseblecon. [...].

[UL 3] b) Mi kreis regulojn por **vortofarado** kaj per tio ĉi mi enportis grandegan ekonomion rilate la nombron de la vortoj ellernotaj, ne sole ne deprenante per tio ĉi de la lingvo ĝian riĉecon, sed kontraŭe, farante la lingvon — dank' al la eblo krei el unu vorto multajn aliajn kaj esprimi ĉiujn eblajn nuancojn de la penso — pli riĉa ol la plej riĉaj naturaj lingvoj. Tion ĉi mi atingis per la enkonduko de diversaj prefiksoj kaj sufiksoj, per kies helpo ĉiu povas el unu vorto formi diversajn aliajn vortojn, ne bezonante ilin lerni. (Pro oportuneco al tiuj ĉi prefiksoj kaj sufiksoj estas

donita la signifo de memstaraj vortoj, kaj kiel tiaj ili estas lokitaj en la vortaro.) Ekzemple: [1) mal-, 2) -in, 3) -il].

[UL 4] Krom tio mi donis komunan regulon, ke ĉiuj **vortoj, kiuj jam fariĝis internaciaj** (la tiel nomataj "fremdaj vortoj"), **restas** en la lingvo internacia neŝanĝataj, akceptante nur la internacian ortografion; tiamaniere grandega nombro da vortoj fariĝas superflujaj por la lernado; ekzemple: lokomotivo, redakcio, telegrafo, nervo, temperaturo, centro, formo, publiko, platino, botaniko, figuro, vagono, komedio, ekspluati, deklami, advokato, doktoro, teatro k. t. p., k. t. p. [nun R 15 FG].

[UL 5] Dank' al la supre montritaj reguloj kaj ankoraŭ al kelkaj flankoj de la lingvo, pri kiuj mi trovas superflue tie ĉi detale paroli, la lingvo fariĝas eksterordinare **facila**, kaj la tuta laboro de ĝia ellernado konsistas nur en la ellernado de tre malgranda nombro da vortoj, el kiuj laŭ difinitaj reguloj, sen apartaj kapabloj kaj streĉado de la kapo, oni povas formi ĉiujn vortojn, esprimojn kaj frazojn, kiuj estas necesaj. Cetere eĉ tiu ĉi malgranda nombro da vortoj, kiel oni vidos malsupre, estas tiel elektita, ke ilia ellernado por homo iomete klera estas afero eksterordinare facila. [...].

II

[UL 6 – kursivoj en la originalo, grasigo niaj elstarigoj] La duan problemon mi solvis en la sekvanta maniero :

a) Mi aranĝis plenan **dismembrigon** de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el **senŝanĝaj vortoj**. Se vi prenos verkon, skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas *ĉiam* kaj *sole* en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k. t. p. estas esprimataj per la **kunigo de senŝanĝaj vortoj**. Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute **alkonformigis** tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo **al la spirito de la lingvoj Eŭropaj**, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne tra leginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), — li eĉ ne supozos, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo. Tiel ekzemple la devenon de la vorto "fratino", kiu en efektiveco konsistas el tri vortoj : *frat* (frato), *in* (virino), *o* (kio estas, ekzistas) (— kio estas frato-virino = fratino), — la lernolibro klarigas en la sekvanta maniero : frato = *frat*; sed ĉar ĉiu substantivo en la nominativo *finiĝas* per "o" — sekve *frat'o*; por la formado de la sekso virina de tiu sama ideo, oni enmetas la vorteton "in"; sekve fratino — *frat'in'o*; kaj la signetoj estas skribataj tial, ĉar la gramatiko postulas ilian metadon inter la apartaj konsistaj partoj de la vortoj. En tia maniero la dismembriĝo de la lingvo neniom embarasas la lernanton; li eĉ ne suspektas, ke tio, kion li nomas finiĝo aŭ prefikso aŭ sufikso, estas tute memstara vorto, kiu ĉiam konservas egalan signifon, tute egale, ĉu ĝi estos uzata en la fino aŭ en la komenco de alia vorto aŭ memstare, ke ĉiu vorto kun egala rajto povas esti uzata kiel vorto radika aŭ kiel gramatika parteto. Kaj tamen la rezultato de tiu ĉi konstruo de la lingvo estas tia, ke ĉion, kion vi skribos en la lingvo internacia, tuj kaj kun plena precizeco (per ŝlosilo aŭ eĉ sen ĝi) komprenos ĉiu, kiu ne sole ne ellernis antaŭe la gramatikon de la lingvo, sed eĉ neniam aŭdis pri ĝia ekzistado.

[UL 7] Mi klarigos tion ĉi per ekzemplo: ["Mi ne sci'as, kie mi las'is mi'a'n baston'o'n; ĉu vi ĝi'n ne vid'is?" – ekzemplo ne represita tie ĉi].

[UL 8] Mi turnas la atenton de la leganto al la klarigita punkto, kiu ŝajne estas tre simpla, sed havas grandegan praktikan signifon. Estas superflue diri, ke en alia lingvo vi kun persono, ne posedanta tiun ĉi lingvon, ne havas la eblon kompreniĝadi eĉ per la helpo de la plej bona vortaro, ĉar, por povi fari uzon el la

vortaro de ia el la ekzistantaj lingvoj, oni devas antaŭe pli aŭ malpli scii tiun ĉi lingvon. Por povi trovi en la vortaro la donitan vorton, oni devas scii ĝian fundamentan formon, dum en la interligita parolado ĉiu vorto ordinare estas uzita en ia gramatika ŝanĝo, kiu ofte estas neniom simila je la fundamenta formo, en kunigo kun diversaj prefiksoj, sufiksoj k. t. p.; tial, se vi antaŭe ne konas la lingvon, vi preskaŭ neniun vorton trovos en la vortaro, kaj eĉ tiuj vortoj, kiujn vi trovos, donos al vi neniun komprenon pri la signifo de la frazo. Tiel ekzemple, se mi la supre donitan frazon skribus germane [...].

[UL 9] Mi ne parolas jam pri tio, ke la vortaro de ĉiu el la ekzistantaj lingvoj estas treege vasta kaj serĉi en ĝi 2-3 vortojn unu post alia jam lacigas, dum la vortaro internacia, dank' al la dismembra konstruo de la lingvo, estas tre malgranda kaj oportuna; mi ne parolas jam ankaŭ pri tio, ke en ĉiu lingvo ĉiu vorto havas en la vortaro multe da signifoj, el kiuj oni devas divenprove elekti la ĝustan. Kaj se vi eĉ imagos al vi lingvon kun la plej ideala simpligita gramatiko, kun konstanta difinita signifo por ĉiu vorto, — en ĉiu okazo, por ke la adresito per helpo de la vortaro komprenu vian skribon, estus necese, ke li antaŭe ne sole ellernu la gramatikon, sed ke li ankaŭ akiru en ĝi sufiĉan spertecon, por facile helpi al si, distingi vorton radikan de vorto gramatike ŝanĝita, devena aŭ kunmetita k. t. p., — t. e. la utilo de la lingvo denove dependus de la nombro da adeptoj, kaj ĉe manko de la lastaj ĝi prezentus nulon. Ĉar, sidante ekzemple en vagono kaj dezirante demandi vian najbaron, "kiel longe ni atendos en N.", vi ja ne proponos al li antaŭe ellerni la gramatikon de la lingvo! Sed en la lingvo internacia vi povas esti tuj komprenita de membro de ĉia nacio, se li ne sole ne posedas tiun ĉi lingvon, sed eĉ neniam aŭdis pri ĝi. Ĉiun libron, verkitan en la lingvo internacia, libere povas, kun vortaro en la mano, legi ĉiu, sen ia antaŭprepariĝo kaj eĉ sen bezono antaŭe tralegi ian antaŭparolon, klarigantan la uzadon de la vortaro; kaj homo klera, kiel oni vidos malsupre, eĉ la vortaron devas uzi tre malmulte.

[UL 10] Se vi deziras skribi, ekzemple, al iu hispano Madridon, sed nek vi scias lian lingvon, nek li vian, kaj vi dubas, ĉu li scias la lingvon internacian aŭ ĉu li eĉ aŭdis pri ĝi, — vi povas tamen kuraĝe skribi al li, kun la plena certeco, ke li vin komprenos! Ĉar, dank' al la **dismembra konstruo** de la lingvo internacia, la tuta vortaro, kiu estas necesa por la ordinara vivo, okupas, kiel oni vidas el la almetita ekzemplero, ne pli ol malgrandan folieton, eniras oportune en la plej malgrandan koverton kaj povas esti ricevita por kelke da centimoj en kia ajn lingvo, — tial vi bezonas nur skribi leteron en la lingvo internacia, enmeti en la leteron hispanan ekzempleron de la vortareto, — kaj la adresito vin jam komprenos, ĉar tiu ĉi vortareto ne sole prezentas oportunan plenan ŝlosilon por la letero, sed ĝi mem jam klarigas sian difinon kaj manieron de uzado. Dank' al la plej vasta reciproka kunigebleco de la vortoj, oni povas per helpo de tiu ĉi malgranda vortaro esprimi ĉion, kio estas **necesa en la ordinara vivo**; sed, kompreneble, **vortoj renkontataj malofte, vortoj teĥnikaj** (kaj ankaŭ **vortoj "fremdaj"**, supozeble konataj al ĉiuj, ekzemple "tabako", "teatro", "fabriko" k. t. p.) en ĝi ne estas troveblaj; tial se vi bezonas nepre uzi tiajn vortojn kaj anstataŭigi ilin per aliaj vortoj aŭ tutaj esprimoj estas neeble, tiam vi devos jam uzi vortaron *plenan*, kiun vi tamen ne bezonas transsendi al la adresato: vi povas nur apud la diritaj vortoj skribi en krampoj ilian tradukon en la lingvon de la adresato.

[UL 11] **b)** Sekve, dank' al la supre montrita konstruo de la lingvo, mi povas kompreniĝadi per ĝi kun kiu mi volas. La sola maloportuneco (ĝis la komuna enkonduko de la lingvo) estos nur tio, ke mi bezonos ĉiufoje atendi, ĝis mia interparolanto analizos miajn pensojn. Por forigi kiom eble ankaŭ tiun ĉi maloportunecon (almenaŭ ĉe **komunikiĝado kun homoj kleraj**), mi agis en la sekvanta maniero: la vortaron mi kreis ne arbitre, sed kiom eble el **vortoj konataj al la tuta klera mondo**. Tiel ekzemple la **vortojn, kiuj estas egale uzataj en ĉiuj**

civilizitaj lingvoj (la tiel nomatajn "fremdajn" kaj "teĥnikajn"), mi lasis tute sen ia ŝanĝo; el la vortoj, kiuj en malsamaj lingvoj sonas malegale, mi prenis aŭ tiujn, kiuj estas **komunaj al du tri plej ĉefaj Eŭropaj lingvoj**, aŭ tiujn, kiuj apartenas nur al unu lingvo, sed estas **popularaj ankaŭ ĉe la aliaj popoloj**; en tiuj okazoj, kiam la donita vorto en ĉiu lingvo sonas alie, mi penis trovi vorton, kiu havus eble nur signifon proksimuman aŭ uzon pli maloftan, sed estus konata al la plej ĉefaj nacioj (ekzemple la vorto "proksima" en ĉiu lingvo sonas alie; sed se ni prenos la latinan "plej proksima" (*proximus*), tiam ni vidos, ke ĝi, en diversaj ŝanĝoj, estas uzata en ĉiuj **plej ĉefaj lingvoj**; sekve se mi la vorton "proksima" nomos *proksim*, mi estos pli aŭ malpli komprenata de ĉiu **klera homo**); en la ceteraj okazoj mi prenadis ordinare el la **lingvo latina, kiel lingvo duone-internacia**. (Mi flankiĝadis de tiuj ĉi reguloj nur tie, kie tion ĉi postulis apartaj cirkonstancoj, kiel ekzemple la evito de homonimoj, la simpleco de la ortografio k. t. p.). Tiamaniere ĉe korespondado kun **meze-klera Eŭropano**, kiu tute ne lernis la lingvon internacian, mi povas esti certa, ke li ne sole min komprenos, sed eĉ sen bezono tro multe serĉadi en la vortaro, kiun li uzos nur ĉe vortoj dubaj.

[Sekvas ses tekst-ekzemploj en Esperanto: „Patro nia“, „El la Biblio“ (komenco de la Genezo), „Letero“, „Mia penso“ (poemo), „El Heine“ (tradukita poemo), „Ho, mia kor“ (poemo). Sekvas III. „rimedoj por venki la indiferentecon de la mondo“, nome per memdevigo lerni Esperanton, se dek milionoj (!) da aliaj homoj ankaŭ devigas sin.]

III. La Strukturo de la Gramatiko

5 La kvin versioj de la Fundamenta Gramatiko konistas el tri partoj:

- A) Alfabeto (ne numerita, tie ĉi citita kiel R 0)
- B) Parolpartoj (R 1-R 8)
- C) Ĝeneralaj Reguloj (R 9-R 16)

6 En **A) Alfabeto** troviĝas la presformoj de la 56 esperantaj literoj (28 minuskloj kaj 28 majuskloj) kaj indikoj pri proksimuma prononcado de la unuopaj literoj, fine la regulo pri skribado de la ses diakritaj literoj per h-surogata skribo.

En **B) Parolpartoj** troviĝas la specifaj reguloj por unuopaj vort-klasoj, nome:

- R 1 – Artikolo
- R 2 – Substantivo
- R 3 – Adjektivo
- R 4 – Numeraloj
- R 5 – Pronomoj
- R 6 - Verbo
- R 7 – Adverbo
- R 8 – Prepozicioj

En **C) Ĝeneralaj Reguloj** principe troviĝas reguloj aplikeblaj al ĉiuj lingvo-elementoj, nome:

- R 9 – Prononco de vortoj
- R 10 – Akcento
- R 11 – Kunmetitaj vortoj
- R 12 – Negacio
- R 13 – N-markilo („akuzativo“) por esprimi la direkton
- R 14 – Difinita signifo de prepozicioj
- R 15 – Fremdvortoj
- R 16 – Apostrofado de –o kaj „l“

- 7 Tiu aranĝo de la reguloj en 17 regulo-grupoj (R 0 – R 16) estas evidente *arbitra* kaj *formale* ne konvinka. Laŭ pure formalaj kriterioj estas malfacile kompreneble, kial la alfabeto ne ricevis la numeron R 1. Kontraste ne estas klare, kial R 8 kaj R 14 pri diversaj aspektoj (nur) de prepozicioj ne estis kunigitaj en unu sola regulo-grupo. Ankaŭ la du reguloj, kiujn enhavas R 16, povus facile esti ŝovitaj al R 1 kaj R 2 respektive.
- 8 Ŝajne Zamenhof mem en postaj jaroj ne plu estis plene konvinkita de la kreita aranĝo. Indico estas, ke en lia **traduko** de FG al Esperanto por FK **1903** li nur plu distingas inter „A. Alfabeto“ kaj „B. Reguloj“, dum li ĉion alian lasis netuŝite laŭ la ĉiama principo „kontinueco pli gravas ol „ĝusteco““ (vd. la postan A 4 de 1905).
- 9 El la faritaj observoj sekvas, ke la tradicia nocio de la „**16 reguloj de Esperanto**“ estas ne konvinka, eĉ **erariga**. Depende de tio, kiel oni difinas la terminon „regulo“, estas multe pli ol dek ses. Pli proksime al la faktoj oni povus ekzemple difini, ke ĉiu unuopa litero estas „regulo“. Tiel la sola nenumerita parto „A. Alfabeto“ jam enhavas regulojn pri 28 minuskloj, plus 28 majuskloj, plus 28 prononc-reguloj, plus la ses reguloj de la h-surogata skribo plus ankoraŭ pliaj (ŭ uzata nur post vokalo k.t.p.). Jam nur R 0 fakte do enhavas preskaŭ cent regulojn. Simile pri R 6 (verboj), kiuj ĉiukaze kaj minimume enhavas regulojn pri la 12 konjugaciaj formoj de verbo. Nur la FG enhavas probable ĉ. 150 regulojn, ne nur 16. Al tiuj aldoniĝas multaj pliaj neeksplicitaj reguloj el FE kaj UV, ekzemple pri interpunkcio („punkto indikas finon de frazo“), skribo per minusklo aŭ majusklo („La unua litero en frazo estas majusklo“) k.t.p. La ŝajnaj „16 reguloj“ dekomence estis malĝusta „propaganda“ nocio, kies sola celo estis elstarigi la relativan facilecon de Esperanto kompare kun la latina kaj ekz. la referenc- kaj aliaj lingvoj.

IV. La lingvaĵo de la Gramatikoj

- 10 La Gramatikoj (kaj la Ekzercaro) uzas la fakajn vortojn kutimajn fine de la 19-a jarcento en tradiciaj priskriboj de la latina, la kvin referenc-lingvoj kaj multaj aliaj lingvoj, ekz. „artikolo“, „genroj“, „kazoj“, „nombroj“ k.a. (R 1), „akuzativo“ (R 2.3, R 13), „adjektivo“ (R 3), „pronomo“ (R 5), „adverbo“, „participo“, (ambaŭ R 6) k.m.a.
- 11 Interpretante ilin, oni tamen ĉiam memoru, ke tia maniero klarigi la gramatikajn regulojn estas nura „artifiko“, kiel Z eksplikis en UL 6 (vd. la plenan citaĵon supre): „... En tia maniero la dismembriĝo de la lingvo neniom embarasas la lernanton; li eĉ ne suspektas, ke tio, kion li nomas finiĝo aŭ prefikso aŭ sufikso, estas tute memstara vorto, kiu ĉiam konservas egalan signifon, tute egale, ĉu ĝi estos uzata en la fino aŭ en la komenco de alia vorto aŭ memstare, ke ĉiu vorto kun egala rajto povas esti uzata kiel vorto radika aŭ kiel gramatika parteto. ...“.

V. La nekompleteco de la Gramatikoj

- 12 En UL 1887 la posta „Fundamenta Gramatiko“ ankoraŭ nomiĝis „Plena Gramatiko“. Malĝraŭ tio ĝi **neniel** estas **kompleta**. Dezirojn de esperantistojn verki pli detalan regularon Z en 1904 rifuzis jene:

LR 140 A (1904): Ellabori plenan detalan gramatikon estas afero tut ne ebla. La verkado de tia gramatiko postulus grandan serion da jaroj, sed en la rezultato ... tia gramatiko ne sole ne faciligus la lernadon de la lingvo, sed terure ĝn *mal*faciligus! Se mi eĉ laborus tutan centon da jaroj kaj publikigus libron enhavantan kelkajn milojn da paĝoj, mi ja neniam povus antaŭvidi teorie ĉiujn dubojn kaj demandojn, kiuj povus aperi ĉe la lernantoj, kaj se mia ian punkton klarigus ne sufiĉe precize, mia klarigo nur erarigus la lernanton. Ĉar mi laboris super Esperanto grandan serion da jaroj, tial en *mia propra kapo* la tuta lingvo kun ĉiuj ĝiaj nuancoj havas

formon *tute difinitan kaj precizan*; sed se mi volus ĉiujn eblajn nuancojn klarigi teorie, mi nur malklarigus la aferon kaj terure ĝin malfaciligus ...

Laŭ mia opinio estus necese, ne ke mi verku teoriantan detalan gramatikon, sed ke mi verku kie eble pli da praktikaj libroj (diversaj literaturaj tradukoj); el *tiaj* miaj libroj ĉiu povus lerni la lingvon kun ĝia tuta vera kaj unuforma spirito multe pli bone, pli facile kaj pli precize ol el la plej dika gramatiko. „Grau ist alle Theorie, die *Praxis* ist das wichtigste“⁶⁵. [LR 140 A. Let. al Bourlet de 1904-04-25, LZ I, p. 72].

13 Kun aliaj argumentoj li ripetis tiun pozicion en 1910:

LR 140 B: Kiam mi siatempe redaktis la germana-esperantan vortaron (eldonitan de Borel [do GE 1]), ĝi estis afero tute senkulpa, ĉar ĝi prezentis nur *konsilon* pri novaj vortoj; tamen kelkaj personoj⁶⁶ fort min atakis. Se mi nun eldonus pli grandan gramatikon, ĉiuj nekonsentantoj atakus min ankoraŭ multe pli. *Persone* mi tiujn atakojn ne timas; sed por nia *afero* ĉia polemiko, en kiun mi estus enmiksita, estus tre danĝera. Multe pli bone estos, se mi staros fajnke kaj lasos la decidon pri ĉiuj dubaj demandoj al la Akademio aŭ al la verkistoj.“

685

⁶⁵ Kunmeto de du verseroj el „Faŭsto“ de Goethe: „Griza estas ĉiu teorio, la praktiko estas la plej grava“.

⁶⁶ Temis ĉefe pri Th. Cart kaj lia „Malfermita Letero“, vd. LZ I, p. 92 s.

B. § 0 [Alfabeto]

I. Tekstoj de la Gramatiko kaj FE 1

A) ALPHABET - THE ALPHABET - DAS ALPHABET – АЗБУКА - ABECADŁO

Esperanto	franca	angla	germana	rusa	pola
Aa,	â	a as in "last"	a	а	a
Bb,	b	b as in "be"	b	б	b
Cc,	ts (tsar)	ts as in "wits"	c, z	ц	c
Ĉĉ,	tch (tchèque)	ch as in "church"	tsch	ч	cz
Dd,	d	d as in "do"	d	д	d
Ee,	é	a as in "make"	e	э	e
Ff,	f	f as in "fly"	f	ф	f
Gg,	g dur (gant)	g as in "gun"	g	г	g
Ĝĝ,	dj (adjutant)	j as in "join"	dsch	дж	dż
Hh,	h légèrement aspiré	h as in "half"	h	(г, х)	h
Ĥĥ,	h fortement aspiré	strongly aspirated h, "ch" in "loch" (scotch)	ch	х	ch
Ii,	i	i as in "marine"	i	и	i
Jj,	y (yeux)	y as in "yoke"	j	й	j
Ĵĵ,	j	z as in "azure"	sh, j	ж	ż
Kk,	k	k as in "key"	k	к	k
Ll,	l	l as in "line"	l	л	l
Mm,	m	m as in "make"	m	м	m
Nn,	n	n as in "now"	n	н	n
Oo,	ô	o as in "not"	o	о	o
Pp,	p	p as in "pair"	p	п	p
Rr,	r	r as in "rare"	r	р	r
Ss,	ss, ç	s as in "see"	ss	с	s
Ŝŝ,	ch (chat)	sh as in "show"	sch	ш	sz
Tt,	t	t as in "tea"	t	т	t
Uu,	ou	u as in "bull"	u	у	u
Ŭŭ,	ou bref (dans l'allemand "laut")	u as in "mount" (used in diphthongs)	kurzes u	у (краткое)	u (krótkie)
Vv,	v	v as in "very"	w	в	w
Zz,	z	z as in "zeal"	s (wie in "lesen")	з	z

Remarque. — Les typographies qui n'ont pas les caractères ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, peuvent les remplacer par ch, gh, hh, jh, sh, u.

Remark. — If it be found impracticable to print works with the diacritical signs (^, ~), the letter h may be substituted for the sign (^), and the sign (~), may be altogether omitted.

Anmerkung: ĝ lautet wie das englische g in gentleman; ĵ — wie das französische j in journal; u [tiel, legu ĝuste „ŭ“] — wie das kurze u in glauben (wird nur nach einem Vokal gebraucht). Bei mangelnden Typen im Druck ersetzt man ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ durch ch, gh, hh, jh, sh, u.

Примѣчаніе I. Буква *h* произносится какъ *h* въ языкахъ нѣмецкомъ, латинскомъ и другихъ; буква *ŭ* (которая употребляется только послѣ гласной), произносится какъ корокое *u* въ нѣмецкомъ словѣ *kaufen* или въ латинскомъ *laudo*. Лица, не знающія никакой другой азбуки кромѣ русской, могутъ на первыхъ порахъ произносить *h* какъ русское *х*, а *ŭ* какъ русское *у*.

Примѣчаніе II. Типографіи, не имѣющія буквъ *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ*, могутъ на первыхъ порахъ употреблять *ch, gh, hh, jh, sh, u*.

UWAGA. — Drukarnia, nie posiadająca czcionek ze znaczkami, może zamiast *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ*, drukować *ch, gh, hh, jh, sh, u*.

Nekompleta Zamenhova traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

A. Alfabeto.

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Uŭ, Vv, Zz.

Rimarko. Presejoj, kiuj ne posedas la literojn *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ*, povas anstataŭ ili uzi *ch, gh, hh, jh, sh, u*.

Kompleta sinteza traduko de la Gramatikoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

A) ALFABETO

A a, B b, C c, Ĉ ĉ, D d, E e, F f, G g, Ĝ ĝ, H h, Ĥ ĥ, I i, J j, Ĵ ĵ, K k, L l, M m, N n, O o, P p, R r, S s, Ŝ ŝ, T t, U u, Ŭ ŭ (uzata en diftongoj), V v, Z z.

Rimarko 1: La litero *ŭ* estas uzata nur post vokaloj.

Rimarko 2: Presejoj, kiuj ne posedas la literojn *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ*, povas anstataŭ ili uzi *ch, gh, hh, jh, sh, u*.

Teksto de § 1 Ekzercaro

ALFABETO

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz. [FE 1.1]

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz.⁶⁷ [FE 1.2]

Nomoj de la literoj: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. [FE 1.3]

Aliaj partoj de la Fundamento

Aldonajn informojn pri la esperantaj literoj vd. en BK II pri la Vortaro Oficiala ĉe la unuopaj literoj.

II. Superrigardo

- 1 La 28 minusklaj kaj 28 majusklaj literoj de la esperanta alfabeto baziĝas sur la moderna latina alfabeto 26-litera. Kontraste al la latina alfabeto la esperanta malhavas la kvar literojn Qq, Ww, Xx kaj Yy, sed aldone havas la ses diakritajn literojn Ĉĉ, Ĝĝ, Ĵĵ, Ĥĥ, Ŝŝ kaj Ŭŭ.

685

⁶⁷ Por doni ideon pri la manskriba alfabeto en FE 1 ni uzas tie ĉi *iom* similan karaktraron, kiu tamen ne inkluzivas la ses diakritajn literojn, kiujn ni indikas per la kursiva karaktraro de „Arial“. La precizan formon vd. en Albault 1963.

2 R 0 fiksas

- la formon de la presliteroj
- la ordon de la literoj (la diakritaj literoj sekvas la korespondajn sendiakritajn, do ĉ post c, ĝ post g, k.t.p.)
- la duusklecon de la alfabeto (minuskloj kaj majuskloj)
- la (proksimuman) prononcon de la unuopaj literoj.
- ke la nombro de sonoj, esprimitaj per la esperantaj literoj estas limita kaj kompleta
- la surrogatan skribon de la diakritaj literoj per ch, gh, hh, jh, sh kaj u.

FE 1 krome fiksas

- la formon de la manskribaj literoj
- nomojn de la esperantaj literoj

3 R 0 ĝenerale estas identa al la alfabeto en **UL 1887**, tamen havas gravan aldonan precizigon pri la pozicio de la litero ŭ (detalojn vd. malsupre). La Zamenhofa **traduko** de R 0 al Esperanto de 1903 estas **nekompleta**. Plenan sintezan tradukon vd. supre.

4 La klarigoj pri la **prononcado** de la unuopaj literoj varias laŭ la adresatoj, la parolantoj de la kvin referenc-lingvoj. Enhave ili tamen estas identaj. Dum **R 0** difinas la prononcon de izolita litero, **R 9** („Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita. Ne estas neelparolataj literoj“) difinas la prononcon de liter- kaj pro tio son-kombinaĵoj en vorto.

5 Dum la historio de Esperanto diversaj aspektoj de la alfabeto denove kaj denove estis kaj daŭre estas **diskutataj**, precipe la majuskloj, la diakritaj literoj, inkluzive de surogaraj skriboj, iuj liter-kombinaĵoj, la literoj *ĥ* kaj *ŭ* kaj ankoraŭ aliaj temoj. Plej multaj diskutoj tamen ne havas bazon en la Fundamento, sed estas kontraŭfundamentaj reform-diskutoj.

6 **LR 62** (1891) en sia unua parto traktas la esperantan alfabeton ĝenerale; ĝi ĉefe konfirmas, ke la nombro de sonoj esprimitaj per la 28 esperantaj literoj estas limita kaj ke ĉiuj aliaj estis „forĵetitaj“:

La alfabeto de nia lingvo konsistas el 28 literoj, kiuj servas por esprimi la sonojn la plej multe komunajn al ĉiuj plej gravaj lingvoj. Tiuj ĉi 28 sonoj ne ekzistas ie aparte en formo difinita kaj severe limita; ili estas post longa pripensado kaj provado elektitaj el la grandega nombro da diversaj sonoj trovataj en la diversaj homaj lingvoj. Enpreni en nian lingvon ĉiujn sonojn, kiuj ekzistas en ĉiuj lingvoj, estas absolute ne eble, kaj se ĝi eĉ estus eble — ĝi estus tute neoportune [legu nuntempe: neoportuna]. La nombro de la sonoj estas tute senlima kaj la nuancoj de unu sama sono en malegalaj lingvoj estas tiel multaj, tiel malfacile difineblaj aŭ diferencigeblaj, ke neniu, se li eĉ konus perfekte ĉiujn lingvojn de la tuta mondo, neniam povos diri eĉ proksimume, kiom da sonoj ekzistas en la homaj lingvoj. Se la nombro de la sonoj eĉ estus difinebla, ellerni ilin ĉiujn kaj diferencigi en la uzado estus preskaŭ tute neeble eĉ por la plej granda instruitulo [= sciencisto, klerulo], kiu volus oferi al la lernado de la alfabeto mem tre multe da tempo kaj havus la plej delikatan orelon kaj la plej flekseblajn organojn de parolado.

El la senlima nombro da sonoj ĉiu ekzistanta lingvo elektis por ĝi nur certan difinitan kolekton kaj ĉiujn aliajn forĵetis. Tiel ni devis fari ankaŭ kun nia lingvo: ni elektis certan nombron da sonoj, kiuj formis la alfabeton de nia lingvo, kaj ĉiuj ceteraj sonoj ne trovis uzadon en nia lingvo. Neniu dubos, ke alie ĝi tute ne povis esti farita, se ni ne volis, ke nia lingvo estu scienca ludilo interesa eble por 2-3 personoj en la tuta mondo, sed tute ne uzebla por la granda publiko kaj havanta nenian praktikan taŭgon.

Tiel la lingvo Esperanto, kiel ĉiu alia lingvo, havas klare difinitan nombron da sonoj aŭ literoj kaj neniam nova vorto en tiu ĉi lingvo devas esti kreata el sonoj, kiuj sin ne trovas en la kadro de ĝia alfabeto. Obei tiun ĉi principan regulon en la kreado de vortoj estas afero tiel simpla kaj facila, ke ni ne bezonas tute pri ĝi paroli. Sed iafoje ni estas en tia situacio, ke ni devas uzi fremdajn sonojn, kiuj ne havas por si literon en nia alfabeto (tiu ĉi situacio dependas kompreneble ne de la speciala konstruo de nia lingvo, sed ĝi havas lokon ankaŭ kun ĉiu alia lingvo); ĝi estas tiam, kiam ni devas uzi ian nacian nomon (personan, geografian k. c.) aŭ kiam ni volas esprimi per literoj la precizan sonadon de fremda vorto. Kion ni tiam devas fari? ... [sekvas proponoj por transskribo kaj por proksimuma indiko de kelkaj neesperantaj sonoj per esperantaj literoj, proponoj pri kiuj vd. ĉe R 15] [La Esperantisto 1891, p. 1].

III. Diskutataj aspektoj de la alfabeto

1. La majuskloj

Literaturo (selekto): **Auld**, William (1950) Pri majuskloj. En: Malgranda Revuo [Svedujo] 1950:8:2, p. 36-38:

- 7 Tipa ekzemplo de reform-diskuto pri la majuskloj estas la artikolo de Auld 1950. La posta prezidanto de la Akademio pledas por forigo de ĉiuj majuskloj en Esperanto per teksto komplete skribite minuskle. Li argumentas, ke duobla formo de litero nek ekzistas en la araba, nek la latina [nek en la jida kaj ankoraŭ multaj aliaj lingvoj], kaj ke la danĝero de konfuzo estas nur ŝajna. – Ne gravas, ke oni povus konstrui planlingvon kun unuuskleca sistemo. Laŭ la Fundamento, Esperanto estas duuskleca. Eĉ la Akademio ne rajtas forigi la majusklojn laŭ A 8 kun A 10.4 (regulo nova). Se entute, ĝi nur povas „proponi formon [tie ĉi regulon] novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova“ [A 8.1], nur „pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj ... reguloj“ [A 10.4].

2. La diakritaj literoj

Literaturo (selekto): *Etimologio:* **Laŭ**, Tage [ps.] (1942) Ĉu Esperanto havas "specialajn" literojn? En: tamen 1942:1:1 (Maj-Jun), p. 11-12 (Zamenhof prenis la ĉeĥan liter sistemon inventitan en la 16a jc. de la religia reformanto *Jan Hus*). - **Golden**, Bernard (1981). La Zamenhofaj supersignoj. En: Esperanto (UEA) 1981:74:12 (Dec.), p. 207-209 (Eble inspirita de la tri haĉekoj de la litova, sed certe ne de la ĉeĥa, kiel asertas Navala en E-isto Slovaka 1951:1, p. 3-5). - **Stanura**, Adolf (1985) De kie venis la supersignitaj literoj? En: Pola Esperantisto 1985:1, p. 2-5.

Kritiko: **Boirac**, L. (1910). Lingva Komitato. Listo de proponoj submetitaj al la Akademio por esplorado kaj voĉdonado. En: Antaŭen Esperantistoj! Lima, Peruo 1910:7:7 (85), p. 108-110. **Lienhardt**, Albert. Optimala Ortografio de la internacia lingvo Esperanto. Mulhouse: O.E.O. [t.e. la aŭtoro] 1978, 122 p. (detala kritiko de ĝistiamaj reformproponoj pri – ĉefe -la diakritaj literoj kaj propra propono: paĉulo → pachulo, paĝo → pagjo k.t.p.). **Albault**, Andre. Eseo pri la Esperantaj help-alfabetoj. En: La Gazeto 1998:13:2 (74), p. 20-25. **Haszpra**, Ottò (2000). Supersignoj, pro kiu diabla kaŭzo? En: Monato 2000:21:03, p. 27.

Defendo: **Cherpillod**, André (1999). Ĉu la esperanta alfabeto estas unika monstraĵo? En: Monato 1999:20:05, p. 23.

- 8 La kritiko kontraŭ la ses diakritaj literoj troveblas jam en la reform-diskuto de 1894. Ĝin realigis la reform-projekto „Ido“ en 1907. En 1910 la Akademio denove estis petita ekzameni, ĉu kaj kiel oni forigu la diakritajn literojn (Boirac 1910). Ankoraŭ

en 1998 (!) la iama prezidanto de la Akademio (!!)

André Albault pledis por helpalfabeto sen supersignoj. La multegaj diskuteroj kontraŭ la „ĉapelitaj“ literoj apenaŭ plu estas superrigardeblaj. La argumentoj ĉiam estas similaj (faciligus la presadon kaj uzadon de Esperanto per komputiloj k.t.p. – Lienhardt 1978, Haszpra 2000), same kiel la defendoj (reformo de la esperanta alfabeto por adapti ĝin al la bezonoj de komputiloj ne necesas – Cherpillod 1999).

- 9 El vidpunkto de la F-to tiaj diskutoj estas vanaj. Nur la AdE povus - laŭ A 8 - aldoni al ĝi novajn literojn paralele uzeblajn kun la ĝisnunaj diakritaj. Sed ĝi ja devus motivigi la „efektivan necesecon“ en la senco de A 9.2 por tia aldono. Tio ne ŝajnas eble, ĉar jam ekzistas la skribo per h/u-surogato kaj la teknikaj surrogataj skriboj. Praktike tio signifas – ĉiam el la perspektivo de la Fundamenta regularo -, ke la diakritaj literoj rajte eĉ ne estas forigebla sur la vojo de arkaiĝo laŭ A 8.

3. Kombinebleco de la 28 literoj

- 10 Principe la 28 literoj, kaj do la 28 sonoj, estas libere kombineblaj por formi esperantan radikon, se la kombinaĵo plenumas la preskribojn de **R 9**. FG ne havas eksplicitan regulon, ke radiko aŭ silabo devas enhavi **vokalon**. Tiel tamen estas en preskaŭ ĉiuj oficialaj vort-elementoj krom en la kares-sufiksoj „nj“ kaj „ĉj“. Aldoniĝas kelkaj tre malmultaj senvokalaj eksterfundamentaj son-imitaĵoj kiel „pst!“ kaj „p!“ , fine kelkaj adaptoj de toponimoj laŭ R 15 (*Bm-o* – ĉeĥa urbo, sinonime *Brun-o*).
- 11 Disputata estas la libera kombinebleco de la 26a litero „Ŭ“, „ŭ“, vd. malsupre.
- 12 Disputataj krome estas la maloftaj liter-sinsekvoj dĝ, dh, kh, ll, nn, pf, ŝĉ, tĉ, tt en unu silabo. Disputate krome estas nazaloj – ng, ngk – kaj la kombinaĵo ts, vd. la diskuton ĉe R 9.
- 13 [Daŭrigo ne redonita tie ĉi].

IV. La 11a litero „ĥ“

Literaturo (selekto): **Setälä**, Vilho (1921). La formortonta litero. En: Esperanta Finnlando 1921, n. 6 (Junio), p. 95-96. - **Korinek**, Jiri (1981). Ĉu la fonemo 'ĥ' estas eksterminda arkaikaĵo? En: Starto 1981:3, p. 14 - **Golden**, Bernard (1982). Kiam formalaperos la litero ĥ? En: Oomoto 1982 Jul.-Dec., p. 114-120. - **Wennergren**, Bertil (1984). Ĥ - Ĉu tro malofta? En: Oomoto 1984 Jan.-Jun., p. 26-27. - **Portmann**, Doug (1990). Propono por kompromiso pri la uzado de la litero Ĥ. En: AkSt 1988-90, p. 77-81. - **Golden**, Bernard (1992). Iom pri la litero Ĥ. En: Eventoj 1992/18, p. 1. - **Golden**, Bernard (1994). La erariga litero ĥo. En: Debrecena Bulteno Dec. 1994, p. 85. - **Vitali**, Daniele (1996). La utiliga litero ĥ. Pledo por esperanta fonemo. En: LitFo 1996:161, p. 131-133. -

- 14 Eĉ inter tiuj, kiuj principe akceptas la diakritajn literojn, la litero Ĥ, ĥ estas **ofte disputita**, kiel montras jam nur la kelkaj diskuteroj listigitaj sube je „Literaturo“. Kritiko kontraŭ la 11a litero troveblas jam tre frue. Zamenhof en la manuskripton de la FE de 1893 eĉ enigis specifan ekzemplo-frazon (i.a.) pri ĝi „Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto [FE 32.2].“
- 15 Kiam Theofilo Cart en 1902 verkis sian vortaron Francan-Esperantan⁶⁸, li ripete konsultis Zamenhofon pri diversaj punktoj, i.a. ankaŭ pri la litero ĥ. Z respondis al Cart:

685

⁶⁸ Vocabulaire français-Esperanto. Paris: Hachette 1903. Konsultebla je <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm>.

LR 56 B (1902): „Pri la litero *ĥ* Vi estas tute prava. Se mi kreus la lingvon *nun*, havante jam tiom da sperto praktika, mi certe forĵetus tiun ĉi literon; sed nun mi persone jam havas nenian rajton fari ian ŝanĝon en la lingvo, - ŝanĝojn povas fari nur ia estonta Akademio. Tial doni al Vi oficiale la permeson skribi „kemio“ k.t.p. mi ne povas, ĉar per tio ĉi mi montrus, ke mi rigardas min kiel mastron de la lingvo; sed private mi povas diri al vi [tiel minuskle], ke mi vian ideon aprobas kaj mi neniam protestos, se vi uzos en la vortaro ambaŭ formojn (kun *k* kaj kun *ĥ*). [LR 56 B, 1902, PVZ VI, 54 – elstarigoj en la originalo].“

- 16 Baldaŭ post la unua mondmilito la Lingva Komitato (LK) dissendis demandaron al siaj membroj pri anstataŭigo de *ĥ* per *k* kaj kelkaj ĉi-rilataj detal-demandoj. Tipa ekzemplo de la – ĝis nuntempe pli-malpli stereotipa - kritiko estas la respondo de la finna LK-ano Setälä el 1921, kiu argumentis: -*ĥ*- estas malfacila por francoj kaj finnoj, kiuj ne havas la sonon en siaj lingvoj, sed precipe tro malofta (nur 13 vortoj en UV, unu plia en la Antaŭparolo plus unu en OA 1, do entute nur 15); tial ĝi laŭ Setälä ne estas lernebla kaj lernata kaj li proponas jesi la Akademian demandon pri ĝia anstataŭigo kaj plie anstataŭigon de eĥo per eho kaj de ĥolero per holero.
- 17 [Daŭrigo ne redonita tie ĉi].

V. La 12a litero „i“

- 18 **LR 70 (1893):**

Kelkaj amikoj ne bone komprenas kaj ne regule uzas la literojn *u*, *ŭ*, *i* kaj *j*. Laŭ ilia opinio (esprimita eĉ en kelkaj lernolibroj) la literoj *u* kaj *i* kune kun antaŭirantaj vokaloj faras “duoblan vokalon” ili sekve elparolas *au* kiel *aŭ*, *ei* kiel *ej* k. t. p. Tio ĉi estas *eraro*. En nia lingvo ne ekzistas duoblaj vokaloj, sed ĉiu litero estas elparolata ĉiam egale kaj ĉiam aparte. Sekve oni devas legi “*ba-la-u*, *pra-u-lo*, *tro-u-zi*, *de-i-ri*, *kre-i*, *hero-i-no*” kaj ne “*ba-laŭ*, *praŭ-lo*, *troŭ-zi*, *dej-ri*, *krej*, *heroj-no*” (kiel faras multaj germanoj, havantaj tiun ĉi kutimon en sia lingvo). La literoj *u* kaj *i* devas ĉiam esti elparolataj klare kaj aparte, kiel ĉiu alia litero. [La dua alineo koncernas la prononcon de „*ŭ*“ kaj „*j*“, vd. ĉe „*ŭ*“]. [LR 70, *Esperantisto*, 1893, p. 15].

VI. La 25a litero „u“

- 19 Pri la ĝusta prononco de „*u*“ vd. LR 70 de 1893, trovebla supre ĉe „La 12a litero „*i*““.

VII. La 26a litero „ŭ“

- 20 Pri la 26a litero de la esperanta alfabeto („*ŭ*“) ekzistas precipe tri demandoj: La ĝusta prononcado, nuntempe ne plu diskutata, ĉu la litero „*ŭ*“ simbolas la sonon [w] kaj la ebla pozicio *antaŭ* vokalo aŭ eĉ konsonanto. Neniu demando ĝis nun estas oficiale decidita de la Akademio.

1. Prononco de „*ŭ*“

- 21 Pri la temo estas konataj jenaj du LR:

LR 69 (1889): En la sono *aŭ* la *a* kaj la *ŭ* devas esti aŭdataj klare ĉiu aparte, sed ili faras unu silabon, ĉar efektive la litero *ŭ* ne estas vokalo. Tiel ekzemple la vorto *laŭdi* devas esti elparolata *laŭ-di*. [LR 69, *La Esperantisto*, 1889, p. 23].

kaj

LR 70 (1893): [La unua alineo koncernas la prononcon de „*u*“ kaj „*i*“, vd. ĉe „*i*“]. Sed ekster *u* kaj *i* en nia lingvo ekzistas ankoraŭ la literoj *ŭ* kaj *j*, kies elparolado estas simila al la elparolado de *u* kaj *i*, sed pli mallonga kaj ne prezentanta silabon (kiel konsonanto); se ili staras post vokalo, ili estas elparolataj kun ĝi en unu silabo

kaj tial faras *impreson* de duobla vokalo. La literoj *ŭ* kaj *j* ĉiam ankaŭ estas elparolataj aparte, sed ili ĉiam estas *konsonantoj*, tute egale, ĉu ili staras antaŭ vokalo aŭ post vokalo. Sekve oni devas legi “ja-ro, jus-ta, kra-jo-no, fraŭ-lo, Eŭ-ro-po, foj-no, paj-lo” kaj ne “i-a-ro, i-us-ta, kra-i-o-no, fra-u-lo, E-u-ro-po, fo-i-no, pa-i-lo”. Se ni la germanajn vortojn *Saite*, *Traube* volus skribi per ortografio Esperanta, ni devus skribi *Zajte*, *Traŭbe*. La vorto *laŭta* ekzemple estas dusilaba kaj ne trisilaba, sed ne pro la kaŭzo ke *aŭ* estas kvazaŭ duobla vokalo, sed nur ĉar *ŭ* estas konsonanto (dum *u* estas vokalo). [LR 70, *Esperantisto*, 1893, p. 15].

2. Ĉu la 26a litero „ŭ“ simbolas la sonon [w]?

3. Ĉu „ŭ“ nur post vokaloj?

Literaturo (selekto): **Grabowski**, A. Raporto pri la decido de la Akademio. En: OG Dec. 1911, p. 229-232. - **Albault**, André (1973) Du literoj - multaj problemoj (pri la esperantaj j kaj ŭ). En: ScRe vol. 24 n. 2-3 (100-101), p. 51-64: Ĉu enkonduki "y". "w"? - **Pokrovskij**, Sergio. Duonvokaloj kaj diftongoj. [Studaĵo pri la fonetika kaj fonologia valoroj de la parolsonoj signataj per la literoj j kaj ŭ en Esperanto]. *Rete* publikigita je 2012-11-17. Lasta stato de prilaboro 2013-12-11.

a) Superrigardo

- 22 Okaze de la propono „ŭesto“ (kompasa direkto okcidento)⁶⁹ la Akademio jam en 1911 diskutis pri la eblaj pozicioj de la litero „ŭ“. Jen la spektro de la penseblaj opinioj, grandparte esprimitaj jam en 1911, ordigitaj de plej malvasta ĝis plej vasta apliksfero:

regulo	rezultas en	ekzemploj	komentoj
ŭ nur post a aŭ e	aŭ, eŭ	aŭdi, Eŭropo	nur tiaj formoj
ŭ nur post vokaloj	aŭ, eŭ, oŭ	aŭdi, Eŭropo, poŭpo	troveblaj en la F-to proponoj por iŭ aŭ uŭ ne ekzistas
ŭ ankaŭ antaŭ vokaloj	ŭa, ŭe, ŭi, ŭo, ŭu	ŭaĉo, ŭesto, ŭinĉo, ŭon	
ŭ ankaŭ antaŭ vokaloj aŭ konsonantoj			

Malgraŭ multaj argumentoj la diskuto de 1911 tamen estas malmodela. *Neniu* (!) el la tiamaj akademianoj referencis al la Fundamentaj tekstoj. Nylen eĉ asertis: „En la Fundamento mi ne trovas kaŭzon por doni al « ŭ » esceptan situacion, kompare kun aliaj literoj. Ke ĝis nun la kutimo ne donis al « ŭ » alian uzon, ol tiun post la vokaloj « a » kaj « e », el tio ni ne povas rajte konkludi leĝon pri ĝia parta neuzo“ (OG 1911, p. 230).

b) La preskriboj de la Fundamento

- 23 Elir-bazo estas jenaj Fundamentaj reguloj:

Ŭŭ, ou bref (dans u as in "mount" (used in kurzes u y u l'allemand "laut") diphtongs) (краткое) (krótkie)

Anmerkung: u [tiel, legu ĝuste „ŭ“] [lautet] wie das kurze u in glauben (wird nur nach einem Vokal gebraucht). — **Nia traduko:** ŭ estas elparolata kiel la mallonga u en *glauben* (uzata nur post vokalo).

⁶⁹ Uzita en la Provo de Marista Terminaro de 1908, vd. ĉe R 9.

Примѣчаніе I. ... буква ѣ (которая употребляется только послѣ гласной), произносится какъ корокое u въ нѣмецкомъ словѣ kaufen или въ латинскомъ laudo. Лица, не знающія никакой другой азбуки кромѣ русской, могутъ на первыхъ порахъ произносить h какъ русское x, а ѣ какъ русское y. — **Nia traduko:** La litero ѣ (uzata nur post vokaloj) estas elparolata kiel la mallonga u en la germana vorto *kaufen* aŭ en la latina *laudo*. ...

- 24 La franca, germana, rusa kaj pola difinas „mallonga u“ (mankas en la angla). La klarigaj ekzemploj en la Gramatikoj franca, angla, germana kaj rusa estas
- la germanaj vortoj **laut** (laŭta – FG-fr), **glauben** (kredi – FG-de), **kaufen** (aĉeti – FG-ru)
 - la latina vorto **laudo** (mi laŭdas – FG-ru)
 - la angla vorto **mount** (monto – FG-en)
- 25 Sole la **pola** versio ne notas prononc-ekzemplon por klarigi „mallonga u“ al pollingvanoj. Se mankas prononc-ekzemplo en la franca, germana, rusa kaj pola versioj, tio signifas, ke la esperanta prononco de litero estas la sama kiel la prononco en tiuj referenc-lingvoj (kaj pro tio plia klarigo per ekzemplo ne necesa). Nur en la angla FG estas donita prononc-ekzemplo ĉe ĉiu litero. El tio sekvas, ke la esperanta „mallonga u“ estas identa al la mallonga u en la **pola**. Ekzemploj estas *auto* (aŭto), *autor* (aŭtoro) kaj *Europa* (Eŭropo), *euro* (eŭro).
- 26 El tiu ekkono, ke la celita prononcado estas la **pola**, evidentiĝas, ke la klarigoj donitaj en R 0 estas malprecizaj, en moderna strikta senco eĉ malĝustaj. La nuntempa kaj tiuepoka prononco de la germanaj vortoj *laut*, *glauben* kaj *kaufen* en la germana mem **ne** estas [a^u] kiel en la pola (aŭ itala), sed [au]. Same en la germana oni prononcas la latinan literkombinon [au] en *laudo* ne [a^u], sed ankaŭ [au].
- 27 Plej klare la malĝusta klarigo fariĝas ĉe la germana literkombino [eu], elparolita en la germana [oj] (Europa - [ojropa], Euro -- [ojro], Efeu (hedero) - [efoj]), malsame kiel en la pola (aŭ itala) [e^u]. Fakte la Fundamento instruas: „prononcu la germanajn vortojn *laut*, *glauben* kaj *kaufen* laŭ ilia (misa) pol-stila prononco“. Pli klare estus, se R 0 ne donus germanajn ekzemplojn, sed polajn. Tio evidente ne okazis, ĉar germanaj ekzemploj estis tiuepoke (kaj nuntempe estas) internacie pli konataj ol polaj. Gravus tamen kompreni, ke la „vera senco“ (A 4.5) de la alstrebita prononc-klarigo en R 0 estas nur komprenebla, se oni – kontraŭ la vortumo – referencas al **pola**, **ne** al **germana** elparolado.
- 28 La Fundamenta Gramatiko en la rusa kaj germana partoj klare preskribas: „uzata nur post vokaloj“ „ŭ [mit Bogen] wie das kurze „u“ in „glauben“ (wird nur nach einem Vokal gebraucht)“.
- 29 Ke **Zamenhof** unufoje uzis la formon „ŭa!“ kiel son-imitaĵo por plor-krio de bebo, ŝanĝas nenion. Zamenhofs uzo estas model-dona kaj analogiebla nur, se ĝi mem ne kontraŭas la Fundamenton kaj efikas lingvo-unuecige (A 3.5 ĝis A 3.6, BD 4.6). La onomatopeo „ŭa!“ tiujn kondiĉojn ne plenumas kaj pro tio estas neglektinda.

c) Rezulto: Laŭ la Fundamento 2007 ŭ estas uzebla nur post vokalo

- 30 Pro tio la duonvokalo „ŭ“ **ne** povas esti uzata alimaniere ol kiel dua elemento de diftongo; Permesi vortkomencan „ŭ“ povus nur la Akademio, per oficiala „Aldono al la Fundamento“ de „regulo nova“ en la senco de A 8, A 10.4, nome do per aldono al R 0 FG, **se** por tio ekzistas „efektiva neceseco“ [A 9.3].⁷⁰

685

⁷⁰ En la rezulto same Welger. Normesperantologiaj ekspertizetoj. 1999.

d) Ĉu „efektiva neceseco“ por ŭ antaŭ vokalo?

31 Kelkaj lingvoj, i.a. la angla kaj hispana, distingas elparolon de [v] kaj [w]:

- angle *university* [v], sed *water, Botswana* [w];
- hispane *universidad* [v], sed *Guatemala* [w].

Parolantoj de tiuj (kaj aliaj) lingvoj ofte sentas „efektivan necesecon“ havi tiun distingon ankaŭ en Esperanto. La [w]-sonon ili kutime simbolas per la 26a litero „ŭ“:

- universitato [v], sed Bocŭano, Gŭatemalo [w].
- watt (mezur-unuo *W* laŭ la skota inĝeniero *James Watt*) → ŭato anstataŭ vato.
- west (kompasa direkto) → ŭesto anstataŭ uesto.

Iom ofta tiu tendenco ankaŭ estas ĉe vortoj adaptitaj ekzemple el la araba, korea aŭ taja:

- الوهابية [al-ŭah:a:bija] (branĉo de sunaisma islamo) → ŭahabismo anstataŭ vahabismo.
- [won, wŏn] (korea mono) → ŭono anstataŭ vono.
- [ŭonbulgjo] (kore-devena religio) → ŭonbulismo anstataŭ vonbulismo.
- [wī sākabučo] (festtago de la naskiĝo de Budho) → Ŭisakabuĉo anstataŭ Visakabuĉo.

32 Kiel montrite supre, la 26a litero „ŭ“ simbolas la polan mallongan u [u] en [a^u] aŭ [e^u] (kaj analogie en [o^u]). Tiu ĉi **ne** egalas al la sono [w], kiun celas simboli uzo de la litero ŭ en okazoj kiel menciitaj en la antaŭa paragrafo. Tia uzo male donas al la litero ŭ novan (plian) funkcion. Temas pri aldona regulo en la senco de A 8, A 10.4.

33 La esperanta sonsistemo malhavas multajn fonemojn troveblajn en aliaj lingvoj. Ekzemple ĝi nek havas la germanan aŭ francan [ü] (*München, utile*) nek la germanan aŭ danan [ø] (*Mönch, øl*) nek multajn aliajn. Esperanto ankaŭ ne distingas diversajn elparolojn de la litero e, kiel ekzemple faras la franca (*je, été, traversais*), nek langopintan [r] de gorĝa (tiel ekz. en la hispana), nek distingas tonojn kiel faras ekzemple la ĉina aŭ vjetnama. - Alie ne povas esti. Se internacia lingvo volas esti laŭeble facile prononcebla por laŭeble multaj homoj kun malsamaj elparolaj tradicioj, ĝi necese devas fari kompromison kaj redukti la multegon de fonemoj observeblaj en la lingvoj de la mondo al amplekso ankoraŭ lernenda. Ne estas videble, kial precize la en Esperanto mankanta sono [w] estu aldonita al la esperanta sistemo kaj ne – ekzemple – la ĵus menciitaj [ü] aŭ [ø], la angla / hispana [th] (*the*) aŭ iuj aliaj.

34 Kiel la ekzemploj cititaj supre (kaj multaj aliaj) montras, esence temas pri transskribo de fremdvortoj en la senco de R 15 al la „internacia, esperanta ortografio“. Tiu ne havas literon simbolantan la sonon [w]. Tradicie ĝi tial uzas la literajn rimedojn, pri kiu ĝi disponas: Plej ofte estas

- [w] → v (vato, vono, Gvatemalo, Bocvano),

okaze

- [w] → u (uesto).

Ĉe toponimoj alia kutima kaj firme enradikiĝita elturniĝo estas esperantigo surbaze de alia ol la loka lingvo:

- Köln (germana urbo) → esperantigita surbaze de la latina formo *Colonia* → Kolonjo.

- Münster (germana urbo) → esperantigita surbaze de la latina formo → Monastero.
- Pekino (ĉina urbo) → esperantigita surbaze de angla, franca, germana k.a. formoj.

35 **Resume** oni devas do konstati, ke „efektiva neceseco“ por ŭ antaŭ vokalo **ne** ekzistas. Alie dirite: **Ne** ekzistas neceseco aldoni al la 26a litero ŭ la plian funkcion simboli la sonon [w] por kontrasti ĝin al [v]. Ĉiuj uzoj de la litero ŭ kiel simbolo por la sono [w], ĉu antaŭ vokalo aŭ antaŭ konsonanto, estas kontraŭfundamenta kaj malĝusta Esperanto, facile evitebla.

VIII. La 27a litero „v“

36 **LR 71 B (1912)** tekstas:

„V“ devas esti elparolata kiel la franca „V“ en „vous“, „votre“ k.t.p. [LR 71 B. PVZ IX, 277, 1912].

IX. Statistikoj pri literofteco

Literaturo (selekto): **Fencliff**, Stenton. Literofteco en Esperanto. En: Scienca Gazeto Marto 1932, p. 20⁷¹ (nombris la vokalojn en 13 ĉefartikoloj de E. Privat en la revuo Esperanto (UEA): a – 4260, i – 3230, o – 3221, e – 3205, u – 1204, aŭ – 200, eŭ – 8). **Fencliff**, Stenton. Vortstatistiko. En: EdE 1933-1934, p. 566-570. **Pabst**, Bernhard. En: Inversa Vortaro de Esperanto. Paderborn 1989 (perkomputila nombrado de la literoj en la kapvortoj de PIV 1970 kaj PIVS 1987: en tia vortara korpuso „ĥ“ pli ofta ol „ĵ“ [!]). Pliajn kontribuojn pri „statistik“ vd. en EBEA.

X. Surogataj skriboj (ch, cx, c^ k.s. anstataŭ ĉ)

1. h/u-surogata skribo

Literaturo (selekto): **Tabellarische Übersicht** (1890) der Grammatik und Wortbildung der Esperantosprache. Beilage zu No. 4 de „La Esperantisto“ 1a vol. de 1890-01-20. Identita teksto ankaŭ kiel „Beilage zu No. 5“ de 1890-02-25.

37 La norma bazo estas jenaj „rimarkoj“ sub la tabeloj kun la esperanta alfabeto:

Les typographies qui n'ont pas les caractères ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, peuvent les remplacer par ch, gh, hh, jh, sh, u.

If it be found impracticable to print works with the diacritical signs (^, ~), the letter h may be substituted for the sign (^), and the sign (~), may be altogether omitted.

Bei mangelnden Typen im Druck ersetzt man ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ durch ch, gh, hh, jh, sh, u.

Типографіи, не имѣющія буквъ ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, могутъ на первыхъ порахъ употреблять ch, gh, hh, jh, sh, u.

Drukarnia, nie posiadająca czcionek ze znaczkami, może zamiast ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, drukować ch, gh, hh, jh, sh, u.

38 La rusa kaj pola parolas pri „presejoj“. Tion probable ankaŭ celas la franca, kvankam – almenaŭ en moderna franca – la ĝusta vorto ne estas „typographies“ (t.e. tipografioj), sed „imprimeries“ (probable paŭsaĵo de falsa amiko el la rusa). La angla kaj germana alludas la saman ideon per „print works“ kaj „im Druck“. Nur la

685

⁷¹ Rete legebla en <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm>.

angla estas klare vortumita kiel regulo (if ... [kondiĉo]... [then]). Sed ankaŭ la aliaj lingvo-versioj estas facile revortumigebla laŭ la modelo „se ... [kondiĉo] ..., tiam“. Ankaŭ la kondiĉo mem estas malsame esprimita: „ne havas“ (fr), „mankas“ (de), „ne disponas pri“ (ru), „ne posedas“ (pl). Plej strikta estas la angla: „If it be found *impracticable* to print works ...“, *impracticable*, do: se estas „nefarebla, neebla, nerealigebla“, tiam ..“.

- 39 La skribado per h-surogato anstataŭ per diakritaj („ĉapelitaj“) literoj tiel ofte estis disputita, ke Zamenhof devis doni ses (!) lingvajn respondojn pri la temo. La unuaj kvin respondoj donitaj de 1888 ĝis 1891 estas samsencaj: La h-skribo estas nur surrogato escepte allasebla okaze de teknikaj problemoj kun la diakritoj en presejoj aŭ „telegrafo“. La (lasta) LR 60 de 1908 tamen rekte kontraŭas la pli fruajn. Estas „ne demando de permeso aŭ malpermeso, sed simple demando de *gusto*“, Z respondas en 1907, kaj plie „ankaŭ permesata por skribado“, do en situacio, en kiu ne povas ekzisti teknika problemo. Ni diskutos tion en la sekvanta ĉap. „Ĉu h-skribo kiel ordinara skribo?“. Jen unue la respondoj de Z:

40 **DL-Ald (1888):**

[15] 3) Se ia el la tipografioj ne povas presi verkojn kun signetoj superliteraj (^) kaj (~), ĝi povas anstataŭigi la signeton (^) per la litero "h" kaj la signeton (~) tute ne uzadi. Sed en la komenco de tia verko devas esti presita: "ch=ĉ; gh=ĝ; hh=ĥ; jh=ĵ; sh=ŝ". Se oni bezonas presi ion kun signetoj internaj (,), oni devas ĝin fari garde, ke la leganto ne prenu ilin por komoj (,). Anstataŭ la signeto (,) oni povas ankaŭ presadi (!) aŭ (-). Ekzemple: sign,et,o = sign'et'o = sig-net-o.

41 **LR 58 A (1889):**

La uzado de *ch* k.t.p. anstataŭ *ĉ* k.t.p. estas enkondukita nur por la presejoj, kiuj ne havas ankoraŭ literojn kun signetoj, sed en *skribado* mi konsilas al vi ĉiam uzi pli bone *ĉ* anstataŭ *ch*, ĉar la uzado de unu litero por unu sono estas multe pli logika ol la uzado de du literoj. Vi diras, ke la signetoj superliteraj estas maloportunaj en la skribado; sed la alfabeto pure latina havas ja ankaŭ kelkajn literojn kun signetoj superliniaj (i, j, t), kaj la plej granda parto de la lingvoj kiuj uzas la alfabeton latinan havas ankoraŭ amason da aliaj literoj kun signetoj superliniaj kaj subliniaj. Certe ia akademio aŭ kongreso penos iam elpensi pli oportunajn skribajn formojn por kelkaj literoj (ĉar ne sole la literoj kun signetoj sed ankaŭ multaj aliaj literoj havas formon tre maloportunan); sed tio ĉi estas jam tute alia demando, kiu *la lingvon mem* tute ne tuŝas: ĝi estas ne demando de lingvo, sed nur demando de oportuneco de la skribado. La Esperantisto, 1889, p. 15.

42 **LR 57 (1890):**

Multaj plendas, ke la skribado per *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ* kaj *ŭ* estas por ili neoportuna kaj malhelpas ilin ankaŭ en la presado de verkoj en iliaj lokoj, kie la presejoj ne havas la literojn kun signetoj. Ni ripetas tial tion, kio estis jam dirita en la “Aldono al la Dua Libro”: anstataŭ la signeto superlitera oni povas kuraĝe uzadi la literon *h* kaj anstataŭ *ŭ* — simplan *u*. [LR 57. La Esperantisto, 1890, p. 32; la citaĵon el DL-Ald 1888, alineo 15 vd. supre].

- 43 En la kvarpaĝa „**Tabellarische Übersicht**“ (tabela superrigardo pri la gramatiko kaj vortfarado de Esperanto, t.e. konciza germanlingva gramatiko), aldono al la kajeroj de Januaro kaj Februaro de *La Esperantisto* 1890 „sub la kunlaborado“ de Z troveblas jena klarigo:

Anmerkung: Im telegraphischen Verkehre wird das Zeichen ^ durch den Buchstaben h ersetzt. Man schreibt somit für *ĉ* – *ch*, für *ĥ* – *hh*, für *ŝ* – *sh*, für *ĝ* – *gh*, für *ĵ* – *jh*.

Nia traduko: „Noto: En telegrafa korespondado la signo \hat{h} estas anstataŭigita per la litero h . Oni do skribas anstataŭ \hat{c} – ch , anstataŭ \hat{h} – hh , anstataŭ \hat{s} – sh , anstataŭ \hat{g} – gh , anstataŭ \hat{j} – jh .“

44 LR 59 (1890):

Sinjoro F.-V. Lorenc⁷² konsilas, ke la presejoj, kiuj ne havas la signetojn superliterajn, uzu anstataŭ ili kaj anstataŭ h — apostrofon returnitan post la litero; ekzemple “ac’eti” anstataŭ “aĉeti” aŭ “acheti”. De nia flanko ni devas nur peti, ke se oni volos uzi tiun ĉi konsilon, oni ne forgesu klarigi en la komenco de la presata verko la signifon de tiu ĉi returnita apostrofo. [LR 59. La Esperantisto, 1a jaro, 1890, n. 11, p. 54-55].

45 LR 58 B (1891):

Vane vi timas, ke ni volas enkonduki novan ortografion (h anstataŭ signeto superlitera). La fina leĝo por nia ortografio estos: “por unu sono unu litero” kaj kiam ni nur povos, ni ĉiam uzados \hat{c} anstataŭ ch (povas nur esti, ke iom poste, por pli oportunigi la skribadon, ni donos al tiu ĉi litero pli simplan formon). La skribado de unu sono per du literoj estas tute ne logika kaj neniam povus esti aprobata; sed ni ĝin uzas nur kiel necesan unuatempan rimedon por doni al ĉiuj presejoj kaj al la telegrafo la eblon labori jam nun en nia lingvo. Sed kiam iom post iom la plej granda parto de la presejoj kaj telegrafejoj proviziĝos je nia alfabeto, tiam la uzado de superflua h estos absolute ĉesigita. Ne la \hat{c} estas transira ŝtupo al ch , sed en la ch ni proponis transiran ŝtupon al \hat{c} , kiam ni vidis, ke la absoluta enkonduko de \hat{c} estas ankoraŭ teĥnike ne oportuna. Tute vere vi diras, ke la presejoj kaj telegrafoj devas sin konformigi al la lingvo, kiun ili uzas, kaj ne la lingvo al ili; sed nia lingvo estas ankoraŭ juna kaj nepotenca kaj devas sin fleksi, se ĝi ne volas pereii. Ne estas ankoraŭ tempo diri fiere al ĉiuj presistoj: “Se vi ne volas vin konformigi al ni, ni vin ne bezonas!” La unuatempa permeso presi per h estas necesa rimedo por ne fari ofte la presadon de ia verko tute ne ebla aŭ tro multekosta; sed kiu nur havas la eblon presi per signetoj superliteraj, tiu ĉiam devas ĝin fari. [LR 58 B. La Esperantisto, 1891, p. 15].

46 LR 60 (1907): Pri sensupersigna skribado

La fundamentaj reguloj de nia lingvo permesas presi „ h “ anstataŭ supersigno; sed kio estas permesata por presado, tio ankaŭ estas permesata por skribado. Tiel same, kiel neniu povas protesti, se vi skribos ekzemple per artifikaj gotaj literoj anstataŭ per literoj ordinaraj, aŭ per literoj presaj anstataŭ skribaj, tiel same ankaŭ neniu povas protesti, se vi skribos per „ h “ anstataŭ supersignoj. Sed la demando estas, ĉu viaj *korespondantoj* estos kontentaj, se, skribante al ili, vi uzos la pli artifikan manieron kun „ h “ anstataŭ la pli simpla kun supersignoj. Tio ĉi sekve estas ne demando de permeso aŭ malpermeso, sed simple demando de *gusto*. Sed, se vi deziras anstataŭigi la supersignon en „ \hat{c} “ kaj „ \hat{s} “, vi nepre devas anstataŭigi ĝin ankaŭ en „ \hat{j} “, „ \hat{h} “ kaj „ \hat{g} “, ĉar ĉiu el la ambaŭ skribmanieroj aparte estas permesita en nia lingvo, sed uzado de ia skribmaniero miksitita estus jam arbitraĵo kaj kondukus al ĥaoso. - Se vi volas skribi per „ h “ anstataŭ supersignoj, vi povas tion fari, ne bezonante demandi ies permeson; sed se vi volas uzi skribmanieron miksititan, aŭ - tiom pli - se vi volas uzi sisteme la tute novajn literojn „ y “ kaj „ w “, anstataŭ „ j “ kaj „ $ŭ$ “ (mi ne parolas pri specialaj teknikaj okazoj, kiam tio eble estas necesa) vi devas - se vi deziras esti lojala Esperantisto kaj ne enkonduki anarĥion en nian aferon - akiri por tio la permeson de la Lingva

685

⁷² František Vladimír Lorenc (1872-1957) estis ŝtatano de Aŭstrio-Hungario el Bohemio kaj ĉeĥa Esperanto-pioniro. Pro politikaj kialoj li elmigris kun falsa pasporto en 1893 al Brazilo, kie li mortis kiel Francisko Valdomiro Lorenz. Detalojn vd. en [Vikipedio](#).

Komitato. Formulu klare vian deziron kaj prezentu ĝin al la voĉdonado de la Lingva Komitato, kaj se via propono estos akceptita per plimulto da voĉoj, ĝi fariĝos permeso oficiala. Sed memoru, ke pro la bono de nia afero la Lingva Komitato devas esti tre singarda kaj akcepti nur tion, kion ĝi trovas tute *sendanĝera*, efektive *grava* kaj sendube *utila*; tial se la Komitato malakceptos vian proponon, submetu vin discipline al ĝia decido kaj ne agu simile al tiuj personoj, kiuj, ne ricevinte aprobon de la Komitato, krias, ke la Komitato nenion taŭgas, ke ĝi ne estas aŭtoritata, ke ĝi nenion faras, k.t.p. - Principe la Lingva Komitato havas la rajton permesi en la lingvo ĉion, kion ĝi trovas necesa; mi neniam prezentos ian malhelpon, kaj ĉiun mature pripensitan kaj orde voĉdonitan decidon de la Komitato mi akceptos sendispute. Sed mi opinias, ke la vera celo de la Lingva Komitato tute ne konsistas en ia facilanima eksperimentado *sen grava neceseco*; ju malpli ni okupos niajn kapojn per diversaj “plibonigoj” kaj ju pli ni simple propagandos kaj riĉigos la lingvon, des pli bone estos. [LR 60. Respondo 45, *La Revuo*, 1907, p. 588].⁷³

2. Ĉu h/u-skribo kiel ordinara skribo anstataŭ diakritoj?

Literaturo (selekto): **Aymonier**, Camille. Grammaire complète. Paris 1907 (4a senŝanĝa eld. Paris 1918). - **Lippmann** 1921, § 8/10 („nur als Notbehelf vorgesehen“; Notbehelf – helpilo, anstataŭilo, surogato, provizoraĵo, elturnaĵo). - **Göhl** 1932, § 3 („nur Notbehelfe“). - **PAG** 1985, § 3 („restis praktike ne aplikata“). **PMEG** 2013, 1.1 („Por tiaj okazoj, en kiuj ne eblas uzi la ĝustajn supersignojn ...“). – Malpli ampleksaj gramatikoj kiel **Aymonier** 1907, **Seppik** 1937, **Malovec** 1988, **Willkommen** 2001 eĉ ne mencias la h-skribon, sed prezentas nur la diakritajn literojn.

a) Superrigardo

- 47 Kontraŭ la preskaŭ unueca multjardeka kompreno en la faka literaturo, OLEO 2008 kaj la *Praktisches Wörterbuch Esperanto* 2012 (vortaro germana-esperanta-germana) de Andreas **Kück** intence uzas la h/u-surogatan sistemon, kvankam ne ekzistas teknikaj problemoj uzi la esperantajn diakritojn. En la germanlingvaj uzoklarigoj li atentigas⁷⁴:

„u rekte post a, e, o devas ĉiam esti legata kiel mallonga u (ekz. *auto*); en diakrita skribformo ĝi havas brevon ̣. Se u post la nomitaj vokaloj devas esti legata kiel longa u (ĝi tiuokaze staras ĉe la komenco de silabo), ligostreketo estas uzata antaŭ ĝi, ekz. en *Na-uro* (en diakrita skribo ĝi ne havas brevon).“

- 48 La aŭtoro pravigas tion, ĉar la h-skribo laŭ li estas „ideala por Interneto, e-poŝtaj kaj mallongaj tekst-mesaĝoj (SMS)“. Krome li referencas al LR 60 de 1907, citita supre, kaj OI 6 de 2007 (Pri apartaj teknikaj bezonoj rilate al niaj alfabeto kaj ortografio), citita malsupre. Ekster la vortaro en publika diskuto li donas jenan plian pravigon (skribmaniero lia)⁷⁵:

„La ne malpermesata kaj ankau ne malpermesebla intenco de la aŭtoro Kück estas, ke lia verko montru Esperanto-tekstojn tiel, ke oni povu ilin senpere kopi-entajpi lau-originale signon post signo en aparaton, kiu ne subtenas la ghustan montron kaj/au transsendon je la supersignaj literoj de Esperanto. Tial la aŭtoro

685

⁷³ En la 7a eld. de la LR 1990 troviĝas jena miscitaĵo: „*La Revuo* 1908, Aŭgusto“. La originalo estas legebla je <http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e0c&datum=1907&page=597&size=45>.

⁷⁴ Esperanto-Deutsch, Deutsch-Esperanto. 2a eld. edition winterwerk 2012. Motivoj (germanlingvaj) por la h-skribo tie p. 5-6, nia traduko.

⁷⁵ Mesaĝo de 2014-10-03 al la reta diskutlisto „reago-al-AdE“ en originala skribmaniero kiel uzata de Kück.

Küçk pritaksas en kompetenta funkcio, nome kiel aŭtoro, la uzon je la Fundamenta anstataŭa skribosistemo (ch, gh, hh, jh, sh, u) oportuna kaj konforma al la normaro valida por Esperanto.“ [Küçk 2014-10-03].

- 49 Laŭ Küçk la koncerna „rimarko“ en R 0 ne estas kondiĉa regulo (se ..., tiam ...), sed nur ekzempla. El tiu opinio sekvas, ke ambaŭ skribmanieroj estas samrange ĝustaj, ke temas do nur pri demando de oportuneco aŭ de „gusto“, kiel asertis Z en 1907, kun la konsekvenco, ke ĉiu povas libere elekti, ĉu li volas uzi la diakritajn literojn aŭ anstataŭe la formojn *ch, gh, hh, jh, sh, u*. Tiu opinio estas erara.

b) Ekzegezo de la Fundamenta normo

- 50 Elirpunkto estas la preskribo „Presejoj, kiuj ne posedas la literojn *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ*, povas anstataŭi ili uzi *ch, gh, hh, jh, sh, u*“, kiu enestas – en iom variaj vortumoj (vd. supre je 1.) – en la rimarkoj de ĉiuj kvin referenc-lingvoj en R 0, dum ĝi tute mankas en FE 1. Plej klara estas la angla: „If it be found *impracticable* to print works ...“, *impracticable*, do „nefarebla, neebla, nerealigebla“. Laŭ la vortosenco temas pri escepto-regulo: se la dezirata skribo per diakritaj literoj ne eblas, tiam oni escepte povas anstataŭigi ĝin per h-skribo.

- 51 La rezulto estas konfirmita per la kunteksto, t.e. la aranĝo de R 0. La tabeloj kun la diakritoj preskribas la ordinaran skrib-manieron, al kiu la rimarkoj faras escepton. Tiun interpreton unuece konfirmas la LR donitaj inter 1888 kaj 1891. LR 58 B (1891) klarigas, ke la esceptoregulo estas analogiebla. Ĝi validas ne nur por presejoj, sed ankaŭ por „telegrafo“. Tio tamen ne ŝanĝas la kondiĉon, ke skribo de diakritaj literoj devas esti „teknike neebla“, sed konfirmas ĝin. La apliksfero de „presejoj“ estas nur ekzempla (kaj pro tio tro malvaste vortumita). La esceptoregulo estas aplikebla al ĉiuj sferoj, kie teknike ne eblas redoni diakritojn.

c) Pliaj argumentoj, precipe LR 60 (1907)

- 52 Kiel alludita de Z en la sama LR 58 B, en kiu li uzas la formulon “por unu sono unu litero”, ĉiu uzo de la h/u-skribo samtempe kaj neeviteble ankaŭ signifas nedezirindan escepton al R 9 („Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita“): *aĉeti / ac-heti, leĝo / leg-ho, aŭto / a-uto* k.t.p. Küçk konscias pri tio, ĉar li enmetas streketon antaŭ longa u en vortoj kiel Nauro (laŭ Küçk „Na-uro“) por indiki, ke la prononco ne estas **Naŭro*. Per tio li „riparas“ la malklarecon, kiun kreas la ĝenerala nedistingo inter la literoj *u* (sen brevo) kaj *ŭ* (kun brevo).

- 53 LR 60 (1907), la sola *postfundamenta* respondo de Z pri la temo, surprizas, i.a. ĉar Z mem post 1905 neniam uzis la h/u-skribon krom en telegramoj⁷⁶. Jam nur la konstato de la regulo estas malpreciza kaj ignoras ĝian karakteron de escepto-regulo: „La fundamentaj reguloj de nia lingvo permesas presi „h“ anstataŭ supersigno“ (Z); laŭ la vortumo de la rimarkoj ĝuste estas: „La fundamentaj reguloj de nia lingvo permesas *nur esceptokaze pro teknikaj necesoj* presi „h“ anstataŭ supersigno“ (kp. *impracticable*). Ĝi nek elstarigas, ke ĝi konsilas la rektan malon de la konsiloj donitaj en 1888-1891, nek klarigas pro kiuj motivoj ŝanĝo de la opinio estas „efektive necesa“ (kp. A 9.3) aŭ eĉ nur dezirinda. Ĝi ne asertas aŭ probablighas silentan eksterfundamentan interkonsenton. Tia ankaŭ objektive ne ekzistis en 1907. Preskaŭ ĉiuj libroj kaj periodaĵoj uzis la diakritojn. Fine ĝi ne efikas unuecige (A 1.1 kaj multloke), sed - kiel la uzo en la cititaj verkoj de Küçk montras - malunuecige, disige.

- 54 Lingvaj Respondoj de Z estas eksterfundamentaj interprethelpoj „privataj“ (do ne *oficialaj*, t.e. devigaj). Pri ili validas: „... ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro [la F-to], devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de

685

⁷⁶ PAG 3.

Esperanto mem [A 3.4]“ kaj „ĉio alia, kion mi verkis aŭ *verkos*, *konsilas*, korektas, aprobas k. t. p., estas nur verkoj *privataj*, kiujn la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero - povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6]“. LR povas nur klarigi, konfirmi kaj detaligi regulon de la F-to, sed neniam forigi ĝin (tie ĉi: forigi la karakteron de esceptoregulo): „ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝodonanto por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko [A 3.2]“ kaj „la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li [Z], sed al tiu ĉi libro [A 3.3].

- 55 Konsekvence de ĉio tio, la respondo de Z ne kapablas nuligi la *esceptan* karakteron de la h/u-skribo. Inverse, la respondo mem, tiom kiom ĝi koncernas la esceptokarakteron de la h/u-skribo estas neglektinda kiel neaŭtoritata.
- 56 Verkoj uzantaj h/u-skrifton estas maloftaj en la historio de Esperanto. PAG 3 atentigas pri la elfranca traduko de Emile **Gasse** (Havro: tradukinto 1907) de la verko „Vivo de Jesuo“ verkita de Ernest Renan (1863). Laŭ informo de Kück⁷⁷ „la chapeloj estas anstataŭigitaj per h kaj la hoketo estas prezentita kiel maldekstrakorna supersigno (ˆ). La verko komence entenas "Averto de l' tradukinto" (en ties teksto la hoketo ne estas anstataŭigita, sed tute forlasata); eltirajho (malghuste skribitaj tekstpartoj estas konservataj, ekzemple "chitiu", "esta").“

"Tiam ni [Gasse] konstatis, ke la kelkaj aliaj presistoj, kiuj havas la supersignojn, ilin konsideras kiel privilegio kaj postulas prezojn troajn (2), kiuj neniel estas kunireblaj kun la prezo de verko 'popola'. Fine, trovante presiston, ni ekaudis pri bruoj de shanghoj sufiche gravaj en la lingvo, por forigi ghiajn supersignojn. Tiam ni havis du elektojn :

1e utili la neinformitecon de presisto por igi lin akiri presliterojn supersignajn, kiuj eble post kelke da semajnoj estus neuzeblaj;

2e simple alpreni la solvon (1), kiun nia Majstro donis li mem. Ni plishatis la plej honoran. [nova paĝo]

Se tiuj tialoj ne sufichus por kontentigi la leganton, ni diros al li ke Dro Zamenhof sciigis al ni persone sian aprobon pri tiela preso sensupersigna de chitiu verko."

(1) 'Presejoj, kiuj ne posedas la literojn c, g, h, j, s, u supersignajn, povas anstataŭi ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u.' Fundamenta Krestomatio. pgh. 254a.

(2) La presistoj ja esta nur duone kulpaj pri tio, ĉar grandliteroj supersignaj devigas ilin al 'paragonado' tre kosta; tial oni jam de longe forlasis la supersignojn sur la grandliterojn, ekz en franca kaj germana lingvoj.

La „averto“ montras, ke Gasse konsciis pri la escepta karaktero de la regulo pri h/u-skribado kaj akceptas ĝin por si, unue klopodinte trovi eblecon por presigi ĝin en diakrita skribo. Pro la kostoj ne sukcesinte, li tamen – post interkonsiliĝo kun Z - decidis favore al la surogata skribo. En tia situacio la aprobo de Z estas tute konsekvenca en la senco de la F-to kaj de liaj Lingvaj Respondoj donitaj inter 1888 kaj 1891. La uzo de la diakrita skribo koste estis *impracticable*.

- 57 Alia staras la afero pri la tajpita „Awtobiografio de nederlanda SS-soldato en Anglio“ de Philip **Buttinger** (Londono: aŭtoro s.j. [ĉ. 1992]). Buttinger uzas la h-surogaton kaj anstataŭigas la literon „ŭ“ per „w“. En la enkonduko li klarigas: „Mi ne shatas supersignojn kaj uzas la literon ‚h‘ (Zamenhofa sugesto) anstataŭ supersignoj super la literoj ‚c, g, j, kaj s‘ kaj ‚w‘ anstataŭ la supersignon super la

685

⁷⁷ Mesaĝo de 2014-10-02 al la diskutlisto „AdE-Diskuto“.

litero „u“ (ekz. „filmoj pri bovgardistoj kaj rughawtuloj“, p. 42). Tio ne plu falas en la apliksfero de la esceptoregulo. La kvin diakritoj ĉ, ĝ, ĥ, ĵ kaj ŝ estis facile produkteblaj per la tajpilo, la „ŭ“ pli proksime al la ideala skribo anstataŭigebla per ekz. „ũ“ (u kun akcento). La kriterio de la esceptoregulo estas praktika realigeblo, ne individua „malŝato de supersignoj“. Temas pri persona kaprico kontraŭfundamenta.

- 58 **Kück** asertas aliajn motivojn. Laŭ lia eksterlibra mesaĝo de 2014-10-03 lia intenco estas plifaciligi la uzon de Esperanto en (elektronikaj) aparatoj, kiuj ne (jam) disponas pri la diakritaj literoj („senpere kopi-entajpi lau-originale signon post signo en aparaton“). Sed lia rimedo estas objekte ekscesa kaj disproporcia. Por solvi praktikan uzeblecon en *limigita* aplikosfero de Esperanto (nome en poŝtelefonoj k.s.) li tute rezignas pri diakritaj literoj en *ĉiuj* aplikosferoj, eĉ enkondukas novan regulon por distingi mallongan kaj longan u („ŭ“ → „u“; „u“ → „-u“ en certaj cirkonstancoj ekz. ĉe „Na-uro“). Lia favorpreza poŝvortaro (10 x 7,5 cm) direktas sin precipe ankaŭ al komencantoj. Ĉe la averaĝa malsperta leganto li vekas la malĝustan impreson, ke la h/u-skribo estas samranga kun la diakrita, aŭ eĉ preferinda al tiu, nome „ideala“. El okaza elturniĝilo li efektive faras laŭaserte ĝenerale preferindan sensupersignan skribon de Esperanto. Tio vaste transiras la licencon donitan de la h/u-regulo kaj atencas la plej prioritatan principon de la Fundamento, nome la unuecon de la lingvo kaj inter la esperantistoj (A 1.1 kaj multloke).
- 59 Komuna silenta interkonsento, ke la h/u-skribo post 1907 perdis sian karakteron de kondiĉa *escepto*, ne estas konstatebla. Male la Akademio en 1982 kaj denove en 2007 konfirmis la Fundamentan, do diakritan alfabeton (vd. tuj poste). Neniu historia aŭ moderna gramatiko instruas la samrangecon de diakrita kaj h/u-surogata alfabeto (vd. supre je „Literaturo“). La uzo de h/u-skribo en teknike ne necesaj cirkonstancoj fare de la aŭtoro Kück estas izolita, eĉ regule ricevas viglan kontraŭstaron („kontraŭfundamenta“). Tio pro la donitaj kialoj estas ĝusta. Uzo de **h/u-skribo sen teknika neceseco** kaj kiel fakta samranga anstataŭigo de la diakritaj literoj ne plu falas en la apliksferon de la **esceptoregulo** kaj pro tio estas **kontraŭfundamenta**, do malĝusta Esperanto.
- 60 Eĉ se oni ne samopinias pri tiu konkludo, estas konstatinde, ke LR 60 enhavas rekomendon favore al uzo de la diakritoj („*pli artifika* maniero kun „h“ anstataŭ la *pli simpla* kun supersignoj“).

d) La h/u-regulo kiel ĝenerala klaŭzo referencanta al la „stato de la tekniko“

- 61 La kondiĉo de *impracticable* (praktike nerealigebla) dependas de la teknika evoluo kaj pro tio ne povas esti difinita unu fojon por ĉiam. Jurmetode temas pri ĝenerala klaŭzo, t.n. „**dinamika regulo**“, nome pri referenco al la „**stato de la tekniko**“ (*state of the art; Stand der Technik*). Ŝuldataj estas provoj realigi la diakritan skribon laŭ la ĝeneralaj teknikaj eblecoj en la respektiva epoko kun konsidero de ekonomiaj (kostaj) aspektoj. En la nuna epoko la stato de tekniko estas komputiloj kun Unikodo, kiu enhavas la ses esperantajn diakritojn. Se Gasse publikigus sian tradukon nuntempe li – malsame kiel en 1907 - ne plu povus pravigi sian devion de la diakrita skribo per la esceptoregulo.⁷⁸

685

⁷⁸ Historia ekzemplo estas kompost-maŝinoj „Vari-typer“, pri kiu raportas A. J. Howard Hulme en Esperanto (UEA) 1949:42:7-8 (525-526), p. 97, plendante, ke ankoraŭ mankas la esperantaj diakritoj. En la kajero de *Esperanto* de Decembro 1950, p. 165 oni informas, ke intertempe estas havebla por tiu „moderna kompost-maŝino“ du Esperanto-literplatoj krom tiuj de 53 aliaj lingvoj.

62 Ĝenerale atentigendas, ke esceptoreguloj ĉiam estu interpretitaj laŭeble malvastaj kaj striktaj, ĉar tro malstriktaj interpretoj inversigas la rilaton inter regulo kaj escepto, kiel montras la misa LR 60. Ĝeneralan klaŭzon kiel la h/u-regulon oni konkretigu jene:

1. ju pli grava la "atenco" al la kerno de la lingvo, des pli granda la devo eviti la esceptojn: la esceptoregulo en R 0 tuŝas unu el la tri kolonoj de la relativa facileco de Eo, kiel priskribita en la Unua Libro, nome ke kutime ekzistas nur unu sola gramatika rimedo por iu funkcio (as, is, os, a, i k.t.p., R 9). Esceptoj estas maloftaj, ekz. R 16. La esceptoregulo de R 0 celas rekte en la "koron" de Esperanto, do oni laŭeble strikte, t.e. malofte apliku ĝin.
2. ju pli grava la uzosfero, des pli granda la devo fari la uzon de diakritoj "practicable". Tiel ekzemple apliko de la esceptoregulo nuntempe estas praktike nepermesata en konsultverkoj kiel vortaroj aŭ lernolibroj kaj nur pro tre specifaj cirkonstancoj allasebla koncerne aliajn librojn (ekz. beletra literaturo), dum surogata skribo pro teknikaj malfacilaĵoj estas akceptebla en okazaj tekstoj kiel e-mesaĝoj, privataj SMS k.s.⁷⁹

63 Laŭ la stato de la tekniko en 2014 oni povas **resumi** jene:

- manskribo: kondiĉo neniam plenumita, h-skribo malĝusta;
- libroj verkitaj per modernaj komputiloj kun Unikodo: kondiĉo neniam plenumita, h-skribo malĝusta;
- tekstoj en ekz. tajpitaj libroj: kondiĉo nur escepte plenumita
- tekstoj en interneto, poŝtelefonoj, e-poŝtaj kaj mallongaj tekst-mesaĝoj: kondiĉo en 2014 ankoraŭ okaze plenumita.

3. Teknikaj surogataj skriboj (-x-, ^, morsa, brajla k.t.p.)

64 Dum pluraj jardekoj la demando de h-surogata skribado apenaŭ plu estis diskutata ĝis la komenco de la komputila erao en la jaroj 1970aj kaj 1980aj. Dum en la 1890a kaj 1900a jardekoj estis mankantaj prestipoj, nun estis komenc-tempaj komputil-teknikaj malfacilaĵoj, kiuj puŝis la diskuton.

65 La Akademio en **1982** reagis per jena oficiala decido:

Pri niaj alfabeto kaj ortografio *

La Akademio de Esperanto notas kun forta malaprobo diversajn proponojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniu ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: "Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u".

Por la Akademio, ties Prezidanto,

William AULD

685

⁷⁹ Ekzistas diversaj programoj, kiuj ebligas tajpadon de la diakritaj literoj ankaŭ en e-poŝtaj mesaĝoj, plej konataj estas „Ek!“ kaj „tajpu“.

*) Teksto en la voĉdonilo aldonita al C 131 (31 AUG 1980). La Cirkulero 132 (29-a de Januaro 1982) informis pri la rezulto de la pozitiva voĉdono.⁸⁰

66 En 2007 ĝi kompletigis la decidon el 1982 (OI 0) per jena plia (OI 6)⁸¹:

Pri apartaj teknikaj bezonoj rilate al niaj alfabeto kaj ortografio

La Akademio de Esperanto konfirmas sian pozicion, jam esprimitan en 1982, ke la ortografio de Esperanto, kiel ĝi estas prezentita en la Fundamento de Esperanto, konformas perfekte al la karaktero de la lingvo, kaj ke neniu ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda.

Nur kiam la cirkonstancoj ne permesas uzi la ĝustajn supersignojn, kaj kiam pro apartaj bezonoj la Fundamenta anstataŭa skribsistemo (ch, gh, hh, jh, sh, u) ne estas oportuna, oni povas anstataŭigi la supersignajn literojn per aliaj signoj aŭ signokombinoj. Tiam anstataŭigon, kiam ĝi estas nura teknika rimedo, ne celanta reformon de la ortografio de Esperanto, kaj kiam ĝi neniel kaŭzas konfuzon, oni ne rigardu kiel kontraŭ-Fundamentan.

Ekzistas ankaŭ aliaj cirkonstancoj, kiam nia lingvo estas prezentata alimaniere ol per la normala skribo, ekz. en stenografio, morse, brajle, per fonetika transskribo k.s., kaj kiam teksto Esperanta estas konservata aŭ transsendata elektronike en cifereca formo laŭ diversaj kodsistemoj, kaj ankoraŭ aliaj similaj okazoj. Ankaŭ tiajn manierojn skribi, transskribi aŭ prezenti nian lingvon oni ne rigardu kiel kontraŭ-Fundamentajn.

Geraldo Mattos

Prezidanto de la Akademio de Esperanto

La ĉi-antaŭa Akademia deklaro estas kompletigo de la jena rezolucio publikigita jam en 1982 ("Aktoj de la Akademio III 1975-1991"): [sekvas teksto de la supre cit. decido].

67 La decido el 2007 en la praktiko koncernas precipe la x-surogaton (cx, gx, hx, jx, sx, ux), uzata ofte por faciligi enigon de serĉ-vortoj kun diakritaj literoj en datum-bazoj aŭ por aŭtomata konverto inter diversaj komputilaj sistemoj, kie ĝi evitas misanalizon (en h-surogata skribo ekz. „senĉava“ estas maŝine konvertita al erara „senĉava“, „u“ kiel anstataŭaĵo de „ŭ“ apenaŭ estas aŭtomate (re-) konvert-ebla k.t.p.).

68 La decidoj estas ĝustaj kaj konfirmas la respondojn, kiujn jam Zamenhof donis pri la temo. Kun malmultaj esceptoj⁸² ili ankaŭ - prave - estas ĝenerale akceptitaj.

XI. La neesperantaj literoj q, x, y

69 La literoj **q**, **x** kaj **y** ne apartenas al la esperanta alfabeto, do ne estas esperantaj literoj. La difino-ŝablono en OA 9 („nomo de la litero ...“) estas malpreciza kaj eble erariga. Ili tamen estas uzeblaj kiel simboloj (ekzemple en matematiko, fiziko k.t.p.) laŭ analogio al R 15 (vd. tie). Same estas pri la uzo de **X** kaj **Y** en ĝenerala lingvaĵo kun la signifo „nekonata aŭ anonimigita nomo“. Diskuton vd. ankaŭ ĉe R 15.

685

⁸⁰ Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 0 [tiel: nul], en: Aktoj de la Akademio, III, 1976 - 1991 (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, n-ro 11).

⁸¹ Oficialaj Informoj 6 - 2007 01 21.

⁸² Vd. ekz. Kück, supre.

XII. La neesperanta litero w

- 70 La Marista Terminaro de 1908⁸³ enkondukis vortojn kun –w–. La Akademio en 1911 reagis per jena decido:

„La Akademio malaprobis la enkondukon de la litero « w » en Esperanton kaj akceptas la ortografion « vaĉo », « varfo », « vinĉo », anstataŭ waĉo, warfo, winĉo de la Marista Terminaro.“ [OG Dec. 1911, p. 231; detalojn de la diskuto vd. p. 228 k.s.]

Tiu decido daŭre estas oficiala.

- 71 La malaprobo ankaŭ validas por la vorto „westo“ (geografia direkto, okcidento):

„Malaprobante la formon « westo » la akademianoj ne decidis inter la diversaj proponitaj formoj « vesto, ovesto, uvesto, uesto, ŭesto » pro diferenco inter la opinioj pri la karaktero de la litero « ŭo ».“ [OG Dec. 1911, p. 231]

La Akademio transsendis la demandon al la LK kaj ties tiama „Scienca kaj Teknika Komisiono“. PIV 2005 rekomendas la formon uvesto (mallongigo U) por la kompasna direkto, kontraste al eosto (E), nordo (N) kaj sudo (S). La malsamaj opinioj „pri la karaktero de la litero ŭo“ koncernis la demandon, ĉu ŭ povas stari antaŭ vokalo aŭ nur post la literoj „a“ kaj „e“. Detalojn vd. supre.

- 72 Okaze la neesperanta litero „w“ estas uzata kiel simbolo en teknika surogata skribo por redoni la literon „ŭ“ (ekz. en antaw), vd. supre.

- 73 La simbolo **W** havas diversajn signifojn en pluraj fakoj kaj sciencoj, i.a.

- simbolo por **vato** en la Sistemo Internacia de Unuoj, t.e. la mezurunuo de povumo, do la rapideco de konsumado, produktado aŭ transformado de energio.
- simbolo por **triptofano** en biokemio.
- simbolo por la elemento **volframo** en kemio
- simbolo por unu el la elementaj bosonoj en partikla fiziko (W-bosono).

Tiuj (kaj similaj fakaj) uzoj ankaŭ estas laŭfundamentaj en analogio al R 15, vd. la diskuton tie.

- 74 Kontraste al la neesperantaj literoj q, x kaj y, la Akademio ankoraŭ ne decidis pri la esperanta **nomo de W**. La plej oftaj solvoj estas **duobla vo**, **ĝermana vo** (ambaŭ PIV 2005 ĉe „v“) kaj **vu** (Pokrovskij, Komputika Leksikono 1995)⁸⁴. Pro ĝia mallongeco kaj la paraleleco al „kuo“ ni pledas por „vuo“.

⁸³ **Rollet de l'Isle**, Maurice (ed.). Provo de marista terminaro - verkita de kelkaj kompetentuloj sub la direkto de M. Rollet de l'Isle. Paris: Hachette 1908, IV, 74 p. (kun multaj ilustraĵoj).

⁸⁴ Jekaterinburg: Sezonoj 1995, p. 362; lasta prilaboro en la interneta eldono de 1996-02-29. Modelo estas la pola nomo „wu“.

Parties du discours – Parts of Speech – Redetheile – Части Рѣчи – Częsci Mowy

C. § 1 [Artikolo]

I. Tekstoj de la Gramatikoj

1. [1] L'Esperanto n'a qu'un **article défini** (*la*), invariable pour tous les genres, nombres et cas. [2] Il n'a pas d'article indéfini.

Remarque. — [3] L'emploi de l'article est le même qu'en français ou en allemand. [4] Mais les personnes auxquelles il présenterait quelque difficulté peuvent fort bien ne pas s'en servir.

1. There is [2] no indefinite, and [1] only one definite, article, *la*, for all genders, numbers, and cases.

1. [1] Der bestimmte Artikel ist *la*, für alle Geschlechter und Fälle, für die Einzahl und Mehrzahl. [2] Einen unbestimmten Artikel gibt es nicht.

1. [1] **Члена** неопределенного нѣтъ; есть только определеннѣй (*la*), [2] одинаковый для всѣхъ родовъ, падежей и чисель.

Примѣчаніе. [3] Употребленіе члена такое же, какъ въ языкахъ нѣмецкомъ, французскомъ и другихъ. Лица, для которыхъ употребленіе члена представляеть трудности, могутъ совершенно его не употреблять.

1. [1] **Przedimka** nieokreślonego niema; jest tylko określony *la*, [2] wspólny dla wszystkich rodzajów, przypadków i liczb.

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

1. [1] Der bestimmte **Artikel** ist *la*, für alle Geschlechter und Fälle, für die Einzahl und Mehrzahl. [2] Einen unbestimmten Artikel gibt es nicht.

Zamenhofa traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

1. [2] **Artikolo** nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur [1] artikolo difinita, *la*, egala por ĉiuj genroj, kazoj kaj nombroj.

Rimarko. [3] La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la Germana, Franca kaj aliaj lingvoj. [4] La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas tute ĝin ne uzi.

II. Komentoj

1. Superrigardo

- 1 R 1.1 traktas la difinitan artikolon „la“ aŭ – laŭ R 16 – „l“, R 1.2 la nedifinitan („ne ekzistas“).
- 2 La tekstoj en la referenc-lingvoj estas malunuecaj. Nur la franca kaj rusa havas kroman rimarkon (R 1.3 kaj R 1.4). Ankaŭ la rimarkoj estas malsamaj en la franca kaj rusa. Dum la franca versio de R 1.3 referencas nur al la uzado en la „germana kaj franca“, la rusa krome preskribas „en la lingvoj germana kaj franca *kaj aliaj*“. Z baziĝis sian neoficialan tradukon al Esperanto sur la rusa versio.

2. Difinita artikolo (R 1.1 – la, l')

a) Samtemaj tekstoj en aliaj partoj de la Fundamento

artikol' - article | article | Artikel | статья, членъ | artykuł. — **artikolo** - article | article | Artikel | членъ, статья | artykuł, przedimek [FE 27]. — La artikolo „la” estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj [FE 27.1].

l', la - article défini (le, la, les | the | der, die, das (bestimmter Artikel) | членъ определеннй (по русски не переводится) | przedimek określny (nie tłumaczy się). — **la** - article défini (le, la, les) | the | bestimmter Artikel (der, die, das) | членъ определеннй (по русски не переводится) | przedimek określny (nie tłumaczy się) [FE 5].

b) La „rimarkoj“ en la franca kaj rusa (R 1.3 „kiel en la franca kaj germana“)

- 3 La statuso de la „rimarkoj“ R 1.3 kaj R 1.4, kiuj konkretigas R 1.1, ne estas evidenta. Nome el si mem ne estas klare, ĉu temas pri devigaj reguloj („leĝoj“ en la lingvaĵo de la Antaŭparolo) aŭ – ĝuste, kiel montrite poste - nur pri komentoj, klarigoj aŭ (nedevigaj) rekomendoj.
- 4 FE 27.2 ripetas la enhavon de R 1.3 laŭ la rusa versio: „La artikolo „la” estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj [FE 27.1]. Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj [FE 27.2].“ Tio klarigas, kial Z elektis ĝin por traduki R 1.
- 5 En rilato al R 1.3 / FE 27.2 la demando pri la statuso tamen estas teoria, ĉar ili ĉiukaze ne estas aplikeblaj. La kialo estas, ke la uzado de la difinita artikolo estas malsama en la franca kaj germana, ekzemple „la France“ (kun artikolo) kompare al „Frankreich“ (sen artikolo). R 1.3 pro tio ne klarigas, ĉu en Esperanto devas esti „la Francujo“ aŭ „Francujo“. Tio validas eĉ pli por la rusa versio kaj FE 27.2, kiu krome aŭ eĉ nur referencas al „aliaj lingvoj“ (kiuj havas difinitan artikolon), sen specifi, al kiuj. Pro tio la solvo devas esti prenita el aliaj fontoj.

c) La „rimarkoj“ en la franca kaj rusa (R 1.4 „povas tute ĝin ne uzi“)

- 6 R 1.4 estas temo de DL 1.8, FE 27.3 kaj du (eksterfundamentaj) Lingvaj Respondoj (LR). La citaĵoj montras la tekst-historion:

DL 1.8 de 1888: „Se iu ne komprenas bone la uzon de la artikolo [nun: artikolo], li povas tute ĝin ne uzi, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa.“

LR 83 A de 1890: „Ofte vi ripetas pri la maloportuneco de la artikolo *la*. Sed la artikolo estas ja vorto tute aparta kaj sur la konstruon de la frazoj ĝi havas nenian influon; tial, se vi volas, vi povas tute ĝin ne uzadi, almenaŭ ĝis la tempo kiam vi tute bone scios ĝian signifon.“ [La Esperantisto, 1890, p. 32]

FE 27.3 de 1894: „La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa.“

FK 1903: „La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas tute ĝin ne uzi.“

LR 83 B de 1906: „Tute vane vi faras al vi multe da klopodoj kun la uzado de la artikolo. Vi devas memori, ke en nia lingvo la uzado de la artikolo ne estas deviga; sekve la plej bona maniero de agado estas jena: uzu la artikolon tiam, kiam vi

scias certe, ke ĝia uzado estas necesa kaj postulata de la logiko, sed en ĉiuj *dubaj* okazoj tute ĝin ne uzu. Pli bone estas ne uzi la artikolon en tia okazo, kiam ĝi estas necesa, ol uzi ĝin tiam, kiam la logiko kaj la kutimoj de ĉiuj popoloj ĝin malpermesas. Se vi ekzemple diros “venis tago, kiun mi tiel longe atendis”, via frazo estos ne tute bonstila, sed ne rekte erara, kvankam oni devus tie ĉi diri “*la* tago” sed se vi diros “hodiaŭ estas *la* dimanĉo” anstataŭ “hodiaŭ estas dimanĉo”, tiam vi faros rekte *eraron*, kiu estos malagraba por la oreloj de ĉiu bona Esperantisto.” [Respondo 2, *La Revuo*, 1906, Decembro]

7 La komparo montras, ke FE 27.3 (1894) estas nura revortumo de LR 83 A (1890) kaj pro tio same interpretenda. El tio sekvas, ke la vortoj „en la unua tempo“ ne signifas „en la unua epoko de Esperanto“, sed „en la unua tempo, dum kiu lernanto estas ankoraŭ komencanto“. Li laŭeble penu lerni la uzadon de la artikolo, sed ankaŭ povas „tute ĝin ne uzi“.

8 Tiun interpreton subtenas LR 83 B (1906), kie Z distingas inter „deviga regulo“ (eraro = lezo de regulo) kaj „bona stilo“. La licenco de R 4 ne estas regulo („leĝo“), sed nur permeso esceptokaze ne obei la regulon de R 1.1 por faciligi la komenc-tempan lernadon al (ekz.) slav-lingvanoj. Tia escepto eblas, ĉar la artikolo estas „oportuna sed ne necesa“. Inversigite tio signifas, ke temas pri rekomendo: „Por skribi bonstilan Esperanton, baldaŭ lernu la ĝustan uzon de la difinita artikolo“.

d) Anstataŭigo de *la* per *l'* (apostrofado de la difina artikolo)

9 Pri tiu demando vd. la komentojn al § 16.2 FG.

3. Nedifinita artikolo (R 1.2 „ne ekzistas“)

10 Klarigenda estas la rilato inter R 1.2 kaj la uzo de „unu“ kiel „kvazaŭ-nedifinita“ artikolo en la Fundamento („unu vidvino havis du filinojn“):

unu - un | one | ein, eins | одинъ | jeden. — **unu** - un | one | ein, eins | одинъ | jeden [FE 11]. ... trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, ... [A 4.6]. — Unu vidvino havis du filinojn [FE 11.1]. La pli juna filino, ..., estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11.3]. En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki [FE 15.1]. Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki ... [FE 19.5]. “Jes, patrino”, respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon [FE 21.2]. La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj, la loĝantoj de unu urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj [FE 37.11]. ... unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11]. El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. [FE 42.8]. — Кр. „iu“.

11 [Daŭrigota].

D. § 2 [Substantivo]

I. Tekstoj de la Gramatikoj

2. [1] Le substantif finit toujours par o. [2] Pour former le pluriel on ajoute j au singulier. [3] La langue n'a que deux cas: le nominatif et l'accusatif. [4] Ce dernier se forme du nominatif par l'addition d'un n. [5] Les autres cas sont marqués par des prépositions: le génitif par de (de), le datif par al (à), l'ablatif par per (par, au moyen de) ou par d'autres prépositions, selon le sens. [6] Ex.: la patr'o — le père; al la patr'o — au père, de la patr'o — du père, la patr'o'n — le père (à l'accusatif, c.-à-d. complément direct), per la patr'o'j — par les pères ou au moyen des pères, la patr'o'j'n — les pères (accus. plur.), por la patr'o — pour le père, kun la patr'o — avec le père, etc.

2. [1] Substantives are formed by adding o to the root. [2] For the plural, the letter j must be added to the singular. [3] There are two cases: the nominative and the objective (accusative). [4] The root with the added o is the nominative, the objective adds an n after the o. [5] Other cases are formed by prepositions; thus, the possessive (genitive) by de, „of”; the dative by al, „to”, the instrumental (ablative) by kun, „with”, or other preposition as the sense demands. [6] E. g. root patr, „father”; la patr'o, „the father”; la patr'o'n, „the father” (objective), de la patr'o, „of the father”; al la patr'o, „to the father”; kun la patr'o, „with the father”; la patr'o'j, „the fathers”; la patr'o'j'n, „the fathers” (obj.), por la patr'o'j, „for the fathers”.

2. [1] Das Hauptwort bekommt immer die Endung o. [2] Der Plural bekommt die Endung j. [3] Es gibt nur zwei Fälle: Nominativ und Akkusativ; [4] der letztere entsteht aus dem Nominativ, indem die Endung n hinzugefügt wird. [5] Die übrigen Fälle werden vermittelt durch Präpositionen ausgedrückt: der Genitiv durch de (von), der Dativ durch al (zu), der Ablativ durch kun (mit), oder andere, dem Sinne entsprechende, Präpositionen. [6] Z. B. la patr'o, der Vater; al la patr'o, dem Vater; la patr'o'n, den Vater; la patr'o'j'n, die Väter (Akkusativ).

2. [1] Существительное всегда оканчивается на o. [2] Для образования множественного числа прибавляется окончание j. [3] Падежей есть только два: именительный и винительный; [4] последний получается из именительного прибавлением окончания n. [5] Остальные падежи выражаются помощью предлогов: для родительного — de (отъ), для дательного — al (къ), для творительного — per (посредствомъ) или другие предлоги соответственно смыслу. [6] (Примѣры: patr|o отецъ, al patr|o отцу, patr|o|n отца (винит. пад.), por patr|o|j для отцовъ, patr|o|j|n отцовъ, (винит. пад.).

2. [1] Rzeczownik kończy się zawsze na o. [2] Dla utworzenia liczby mnogiej dodaje się końcówka j. [3] Przypadków jest dwa: mianownik (nominativus) i biernik (accusativus); [4] ten ostatni powstaje z mianownika przez dodanie zakończenia n. [5] Resztę przypadków oddaje się za pomocą przyimków: dla dopełniacza (genitivus) — de (od), dla celownika (dativus) — al (do), dla narzędnika (instrumentalis) — per (przez), lub inne przyimki odpowiednio do znaczenia. [6] Przykłady: patr/o ojciec, al patr/o ojcu, patr/o/n ojca (przypadek czwarty), por patr/o/j dla ojców, patro/j/n ojców (przyp. czwarty).

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

2. [1] Das Hauptwort bekommt immer die Endung o. [2] Der Plural bekommt die Endung j. [3] Es gibt nur zwei Fälle: Nominativ und Akkusativ; [4] der letztere entsteht aus dem Nominativ, indem die Endung n hinzugefügt wird. [5] Die übrigen

Fälle werden vermittelt durch Präpositionen ausgedrückt: der Genitiv durch *de* (von), der Dativ durch *al* (zu), der Ablativ durch *kun* (mit), oder andere, dem Sinne entsprechende, Präpositionen. [6] Z.B. la patr'o, der Vater; al la patr'o, dem Vater; la patr'o'n, den Vater; la patr'o'j'n, die Väter (Akkusativ).

Zamenhofa traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

2. [1] **Substantivoj** estas formataj per aldono de *o* al la radiko. [2] Por la formado de la pluralo oni aldonas la finiĝon *j* al la singularo. [3] Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo. [4] La radiko kun aldonita *o* estas la nominativo, la akuzativo aldonas *n* post la *o*. [5] La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj: la genitivo per *de*, la dativo per *al*, la instrumentalo (ablativo) per *per*, aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco. [6] Ekz. radiko *patr*, *la patr'o*, *al la patr'o*, *de la patr'o*, *la patr'o'n*, *por la patr'o*, *kun la patr'o*, *la patr'o'j*, *la patr'o'j'n*, *per la patr'o'j*, *por la patr'o'j*.

II. Tekstoj de Ekzercaro kaj UV

o - marque le substantif | ending of nouns (substantive) | bezeichnet das Substantiv | означает существительное | oznacza rzeczownik. [UV] — **o** - marque le substantif | ending of nouns (substantive) | bezeichnet das Substantiv | означает существительное | oznacza rzeczownik [FE 5]. — [ekzemplojn vd. en BK II].

j - marque le pluriel; ex. hom'o homme — hom'o'j hommes | sign of the plural; e. g. patr'o father - patr'o'j fathers | bezeichnet den Plural | означает множественное число | oznacza liczbę mnogą. — **j** - marque le pluriel | sign of the plural | bezeichnet die Mehrzahl | означает множественное число | oznacza liczbę mnogą [FE 7].

n - marque l'accusatif ou complément direct et le lieu où l'on va | ending of the objective, also marks direction | bezeichnet den Accusativ {de 1901: Akkusativ}, auch die Richtung | означает винительный падеж, также направление | oznacza biernik, również kierunek. — **n** - marque l'accusatif ou complément direct | ending of the objective | bezeichnet den Accusativ {de 1901: Akkusativ} | означает винительный падеж | oznacza przypadek czwarty [FE 6]. — **n** - marque l'accusatif et le lieu où l'on va | ending of the objective, also marks direction towards | bezeichnet den Accusativ {de 1901: Akkusativ}, auch die Richtung | означает винит. падеж, а также направление | oznacza przypadek czwarty, również kierunek [FE 13].

III. Komentoj

1. Superrigardo

- 1 R 2 temas pri **substantivoj** kaj difinas la **o**- (R 2.1 - nominativo), **j**- (R 2.2 - pluralo) kaj **n**-markilojn (R 2.3-4 - akuzativo). R 2.5 klarigas la deklinacion (kazon) de la substantivoj per pliaj terminoj, prenita el la latina gramatiko (kp. la ĉapitron „La lingvaĵo de la Fundamento“): genitivo (2a kazo) – *de*, dativo (3a kazo) – *al*, ablativo (5a kazo) – „prepozicioj laŭ la senco“. Angla kaj germana gramatikoj por ablativo prezentas la ekzemplan rolvorteton *kun*, la aliaj lingvoj kaj la neoficiala Zamenhofa traduko la rolvorteton *per*. R 2.5 tiel referencas al R 8 kaj R 14 pri „prepozicioj“. R 2.6 resumas la deklinacion de la substantivoj per malsamaj ekzemploj, uzante la vorton *patr*'.
- 2 R 3.2 pri la adjektivo resendas por ties kazoj kaj nombroj al R 2 („Kazoj kaj nombroj [de la adjektivoj] kiel ĉe substantivoj“). R 13 pri la direkto per la termino „akuzativo“ referencas al R 2.3-4.

- 3 FE 7-9 enhavas aplikon de la bazaj instruoj pri la substantivo. UV kaj FE 13 suplementas la difinon de la n-markilo, troveblan en R 2.3-4 per la kroma senco „indikas ankaŭ direkton“ (R 13). FE 26 profundigas la klarigojn pri tiu uzo.

2. R 2.1 (o-markilo, nominativo)

- 4 La finaĵo –o simple estas indikilo por „substantiva funkcio en frazo“. Se radiko ĉiukaze jam havas substantivan signifon, la indikilo –o (aŭ ĝiaj surogatoj, vd. tuj malsupre) estas redundanca (patr-o, detalojn vd. ĉe R 11). Z klarigis tion tiel en 1905:

LR 5 A (1905): La finiĝo „o“ signifas nur simple *substantivon*, nenion pli; sekve en vortoj devenantaj de adjektivo ĝi povas nur signifi *ideon*, *esencon*, sed ĝi ne povas prezenti la komplikitan senco de „homo kiu estas ...a“, tiel same, kiel ĝi ne povas prezenti la komplikitan senco de ia alia sufikso. Ni povas diri, „li batalas por la *bono* kaj *belo*“, ĉar tie ĉi ni parolas nur simple pri la *ideo* de la adjektivoj „bona“, „bela“; sed „*bonulo*“, „*belulo*“ (tiel same kiel ekzemple „bonaĵo“, „boneco“ k.t.p.) prezentas ion *pli* ol simple substantivigitan adjektivon, kaj tiun senco ni devas esprimi per ia difinita sufikso. [LR 5 A, let. al Couturat de 1905-09-17, LZ I 187].

- 5 Laŭ la kombino de R 2.1 kun R 16.1 substantivoj estas markeblaj per tri markiloj: per **-o** (R 2.1), per **apostrofo** (R 16.1) aŭ – nur se temas pri propraj nomoj kun komenca majusklo aŭ literonomoj – per **nenio** (OA 8): Zamenhofo aŭ Zamenhof (kun apostrofo) aŭ Zamenhof (sen apostrofo). Diskuton vd. ĉe R 16.

3. Substantivoj sen la markilo –o

a) Superrigardo

- 6 Sen la markilo –o aperas jenaj substantivoj
- familiaj nomoj skribitaj nur per esperantaj literoj: *Zamenhof*, *Varengjen*, *Kaloĉaj* — pri ili vd. la komentojn al R 16.
 - Personaj nomoj de virinoj je –a: *Debora*, *Lea*, *Rebeka*.

b) Personaj nomoj de virinoj je –a

Literaturo (selekto): Cherpillod, André. Leksikaj Vagadoj. La Blanchetière 2012.

- 7 En la **Fundamento** aperas personaj nomoj de virinoj *nur* kun o-markilo: Mario, Sonjo k.t.p., vd. la liston en la Kvara Libro.
- 8 En tradukoj de **Zamenhof** tamen aperas multaj virinaj personoj nomojn je -a⁸⁵:
- **1908:** La nomformo *Marta* en lia traduko de la samtitola romano de *Eliza Orzeszko*.
 - **1909:** *Ada* (Ge 4.19 kaj plurloke)⁸⁶, *Bilha*, *Cila* (Ge 4.19 kaj plurloke), *Debora* (Ge 35.8 kaj plurloke), *Dina*, *Ketura*, *Lea*, *Milka*, *Rebeka* (Ge 23.22 kaj multloke), *Reuma*, *Sara*, *Zilpa* en la Malnova Testamento de la Biblio (Genezo, Juĝistoj k.a.). — Tamen ankaŭ troveblas *Evo* (**ne** *Eva*) en Ge 4.1 (*Kaj Adamo ekkonis Evon, sian edzinon ...*).

Postmorte eldonitaj:

685

⁸⁵ Ĉiuj virinaj nomoj en tiu paragrafo cit. laŭ Cherpillod 2012, p. 3. La jarindikoj referencas al la unuaj publikigoj en *La Revuo*: *Marta* 1909, p. 1. Genezo 1909, p. 339. Unua libroforma eld. *Marta* en 1910, de la Genezo en 1911.

⁸⁶ Kaj Lemeŝ prenis al si du edzinojn: unu havis la nomon *Ada*, kaj la dua havis la nomon *Cila* (Ge 4.19; *La Revuo* 1909, p. 345).

- **1924:** La formo *Sara* en lia traduko de la *Rabeno de Baĥaraĥ*: „la bela Sara“.
- **1923-1932:** En lia traduko de la *Fabeloj de Andersen* estas troveblaj jenaj kromaj nomoj: *Eva, Felicita, Gerda, Gianina, Helga, Ida, Kala, Marta, Sara* k.a.

9 Zamenhof aldonis n-markilon al la virinaj nomoj je –a sen intermeti streketon, ekz.:

- Kaj ili alvokis Rebekan, kaj diris al ŝi: ... (Ge 24.58)
- Kaj ili benis Rebekan, kaj diris al ŝi: Nia fratino! ... (Ge 24.60 kaj simile plurloke)

Simile: *Dinan, Lean, Martan, Saran* (Ge 20.2; *La Revuo* 1909, p. 440) k.t.p. Tio estas forta indico, ke laŭ Zamenhof tiuj nom-formoj estas plene esperantigitaj.

4. R 2.2 (j-markilo, pluralo)

10 La markilo –j indikas, ke temas pri pli ol unu elemento (persono, aĵo). Ĝi estas aldonebla al o-vortoj (R 2.2), a-vortoj (R 3.2 kun R 2.2) kaj al unu, tiu, kiu, iu, ĉiu kaj tia, kia, ia, ĉiaj kaj nenia (FE 30).

11 En multaj okazoj la j-markilo estas redundanca:

- post numeraloj aliaj ol unu (nul, du, tri k.t.p. pomoj);
- ĉe vortoj kiel pluraj, multaj, kelkaj k.t.p., kiuj jam indikas, ke temas ne nur pri unu elemento;
- ĉe kunmetaĵoj kun ge- (gepatroj)

12 Pri la diferenco inter j-vorto kaj **aro** vd. BK II ĉe aro kun LR 10 (1908).

13 Pri „Vortoj kun plurala bazformo“ (*okulvitroj*) vd. en Libro Kvara (UV).

5. R 2.3 („Kazoj ekzistas nur du“)

14 Laŭ la klasika gramatika terminaro oni tamen povas rigardi la vortojn **ies, kies, ties, ĉies, nenies** (FE 30) kiel genitivo (2a kazo) de *iu, kiu, tiu, ĉiu, neniu*. Ili do signifas *de iu, de kiu, de tiu, de ĉiu, de neniu* (detalojn vd. BK II).

6. R 2.3-4 (n-markilo, akuzativo)

Literaturo (selekto): Moirand, Daniel. Materialoj pri la nuna uzado de la akuzativo. Antverpeno 1990.

15 [Daŭrigota].

LR 74 (1890) [Pri la akuzativo]: Tuŝante la akuzativon mi povas al vi doni la jenan konsilon: uzu ĝin ĉiam nur en tiuj okazoj, kie vi vidas ke ĝi estas efektive necesa; en ĉiuj aliaj okazoj, kie vi ne scias, ĉu oni devas uzi la akuzativon aŭ la nominativon — uzu ĉiam la *nominativon*. La akuzativo estas enkondukita nur el neceso, ĉar sen ĝi la senco ofte estus ne klara; sed ĝia uzado en okazo de nebezono pli multe malbeligas la lingvon ol la neuzado en okazo de bezono. [*La Esperantisto*, 1890, p. 27].

E. § 3 [Adjektivo]

I. Fundamentaj Tekstoj

3. [1] L'adjectif finit toujours par *a*. [2] Ses cas et ses nombres se marquent de la même manière que ceux du substantif. [3] Le *comparatif* se forme à l'aide du mot *pli* — plus, et le *superlatif* à l'aide du mot *plej* — le plus. [4] Le „que” du comparatif se traduit par *ol* et le „de” du superlatif par *el* (d'entre). [5] Ex.: *pli blank'a ol neĝ'o* — plus blanc que neige; *mi hav'as la plej bel'a'n patr'in'o'n el ĉiu'j* — j'ai la plus belle mère de toutes.

3. [1] Adjectives are formed by adding *a* to the root. [2] The numbers and cases are the same as in substantives. [3] The comparative degree is formed by prefixing *pli* (more); the superlative by *plej* (most). [4] The word „than” is rendered by *ol*, [5] e. g. *pli blanka ol neĝo*, „whiter than snow”.

3. [1] Das Eigenschaftswort endet immer auf *a*. [2] Declinationen wie beim Substantiv. [3] Der Komparativ wird mit Hilfe des Wortes *pli* (mehr), der Superlativ durch *plej* (am meisten) gebildet. [4] Das Wort „als” heißt *ol*. [5] Z.B.: *pli blank'a ol neĝ'o*, weißer als Schnee.

3. [1] Прилагательное всегда оканчивается на *a*. [2] Падежи и числа какъ у существительнаго. [3] Сравнительная степень образуется помощью слова *pli* (болѣе), а превосходная — *plej* (наиболѣе); [4] слово „чѣмъ” переводится *ol*. [5] (Прим.: *pli blank|a ol neĝ|o* бѣлѣе снѣга; *mi hav|as la plej bon|a|n patr|in|o|n* я имѣю самую лучшую мать).

3. [1] **Przymiotnik** zawsze kończy się na *a*. [2] Przypadki i liczby też same co dla rzeczownika. [3] Stopień wyższy tworzy się przez dodanie wyrazu *pli* (więcej), a najwyższy przez dodanie *plej* (najwięcej); [4] wyraz „niż” tłumaczy się przez *ol*. [5] **Przykład:** *Pli blank/a ol neĝ/o* bielszy od śniegu.

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

3. [1] Das **Eigenschaftswort** endet immer auf *a*. [2] Deklinationen wie beim Substantiv. [3] Der Komparativ wird mit Hilfe des Wortes *pli* (mehr), der Superlativ durch *plej* (am meisten) gebildet. [4] Das Wort „als” heißt *ol*. [5] Z.B.: *pli blank'a ol neĝ'o*, weißer als Schnee.

Zamenhova traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

3. [1] **Adjektivoj** estas formataj per aldono de *a* al la radiko. [2] Kazoj kaj nombroj kiel ĉe substantivoj. [3] La komparativo estas farata per la vorto *pli*, la superlativo per *plej*. [4] Post la komparativo la vorto „que” (France), „than” (Angle), „als” (Germane), „чѣмъ” (Ruse), „niż” (Pole) tradukiĝas per *ol*, kaj post la superlativo la vorto „de” (France) tradukiĝas per *el*. [5] Ekz. *pli blank|a ol neĝ|o*; *mi hav|as la plej bel|a|n patr|in|o|n el ĉiu|j*; *mi hav|as la plej bon|a|n patr|in|o|n*.

II. Komentoj

1. R 3.1 („-a“)

a) Superrigardo

- 1 R 3.1 unuafoje estas temo en FE 5 kaj klarigita ankaŭ en UV:

a - marque l'adjectif; ex. hom' homme - hom'a humain | termination of adjectives; e. g. hom' man - hom'a human | bezeichnet das Adjektiv; z. B. hom' Mensch - hom'a menschlich | означает прилагательное; напр. hom' человек - hom'a человекский | oznacza przymiotnik; np. hom' człowiek - hom'a ludzki. — **a** - marque l'adjectif | termination of adjectives | bezeichnet das Adjektiv | означает прилагательное | oznacza przymiotnik [FE 5]. — [UL].

b) Ĉu adjektivo aŭ adverbo?

- 2 Pri la demando, ĉu oni devas uzi la a-formon (adjektivon) aŭ la e-formon (adverbon) ekzistas pluraj modeloj en la Ekzercaro, ekz.:

FE 7.5: „Resti kun leono estas danĝere.“

FE 20.23: „Morti pro la patrujo estas agrable.“

- 3 La evoluon de la a- al la e-formo klarigas du Lingvaj Respondoj:

LR 82 A de 1891: „En la tempo, kiam estis verkata la „Dua Libro“ [1888], la demando, ĉu oni devas diri „estas varme“ aŭ „ĝi [= ne plu kutima senpersona uzo, vd. malsupre] estas varma“, ne estis ankoraŭ absolute decidita kaj la uzado de unu formo estis tiel egale bona, kiel la uzado de la dua. Nun tiu ĉi demando iom post iom per la uzado akceptis jam decidon pli definitivan.

La adjektivo difinas la substantivon aŭ la pronomon, havantan senco de substantivo (responde la demandon *kia*) kaj la adverbo difinas la verbon (responde la demandon *kiel*). Tial mi diras: „la vetero estas bona, „li kantas bone“. Tamen en la okazoj, kie la difino apartenas precize nek al substantivo aŭ pronomo, nek al verbo, ni ofte ne povas decide diri, kian demandon (*kia* aŭ *kiel*) nia difino devas respondi kaj kian formon ni devas uzi. En ĉiu alia lingvo tiu ĉi duba demando estas decidata per la sankcio de l' uzado, - en nia lingvo ni konsilas uzadi en tiuj okazoj ĉiam la adverbon; ekzemple: „estas varme“, „estas vere“, „ĝi estas vera“ (*). La vorton „ĝi“ ni konsilas ĉiam uzi nur por anstataŭi objekton aŭ aferon (kiel „li“ anstataŭas personon); sed en esprimoj senpersonaj kaj senobjektaj ni konsilas neniam uzi la vorton „ĝi“ (ekzemple: „hodiaŭ estas varme“ kaj ne „hodiaŭ ĝi estas varme“). [LR 82 A. La Esperantisto, 1891, p. 7]. — (*) **Rim.:** La originala fino tekstas: „ĝi estas vere“ (sed se la difinata „ĝi“ havas la senco de substantivo, ĝi kompreneble devas esti uzata kun adjektivo; ekzemple: „lia parolo estas mallonga, sed ĝi estas tre konvinka“). Cetere la vorton „ĝi“ ni konsilas ĉiam uzi nur en tiu ĉi lasta senco, t.e. nur por anstataŭi objekton aŭ aferon (kiel „li“ anstataŭas personon); sed en esprimoj senpersonaj kaj senobjektaj ni konsilas neniam uzi la vorton „ĝi“ (ekzemple: „hodiaŭ estas varme“ kaj ne „hodiaŭ ĝi estas varme“); tiam la duboj en la uzado de la adjektivo aŭ adverbo per si mem defalos.

LR 82 B de ĉ. 1902: „Mi uzas la formon kun „a“ ordinare nur tiam, kiam ĝi rilatas al ia substantivo aŭ pronomo; kiam subjekto (substantivo aŭ pronomo) forestas, mi uzas la formon kun „e“. Ekzemple: hodiaŭ estas malvarme; morti pro la patrujo estas glorie; estas necese ke ... En aliaj okazoj mi ne povas ĝin aprobi. [LR 82 B. Pk al C. Aymonier⁸⁷ 1902 ?].

- 4 La Akademio traktis la temon en OI 19 de 2012-07-13:

OFICIALAJ INFORMOJ Numero 19 – 2012 07 13

Ni informas pri respondo de la Sekcio pri Gramatiko al demando veninta de la publiko

685

⁸⁷ Camille Aymonier (1866-1951), franca instruisto, membro de la Lingva Komitato (1909) kaj de la Akademio de Esperanto (1932) i.a. verkis multe uzatan „Plenan Gramatikon de Esperanto“ (*Grammaire complete* 1907).

2012-05-25

Respondo al sinjoro Volker Schultheiß

La sekretario de Akademio de Esperanto [t.e. Renato Corsetti] ricevis la ĉi-suban mesaĝon, kiun li submetis al traktado en la Akademia Konsultejo. Tiu siavice transsendis la demandon al la Sekcio pri Gramatiko, kiu diskutis ĝin. Post la demanda mesaĝo sekvas eldiro de la Sekcio pri Gramatiko, rezultanta el la diskuto.

[**Demando**] Originala mesaĝo [de 27 Feb 2012]

Mi skribas al vi pro gramatika dubo. Por prezenti ĉi tiun dubon, mi volus citi du frazojn skribitajn de Doktoro Zamenhof.

(I) La gazetoj ne trovas necesa eniĝi en tion, pri kio ili skribas. (II) Nek Snitchey nek Craggs trovis utile batali malkaŝe kontraŭ la fluo de tiu ĉi kolero.

La frazo (I) troviĝas en la verko Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia, kaj la frazo (II) troviĝas en la verko La Batalo de l'Vivo.

En la frazo (I) la perverba priskribo [necesa] havas a-finaĵon kaj rilatas al la i-vorteca esprimo [eniĝi...]. En la frazo (II) la perverba priskribo [utile] havas e-finaĵon kaj rilatas al la i-vorteca esprimo [batali...].

La Plena Analiza Gramatiko eldiras ke perverbaj priskriboj kiuj rilatas al la objekto de la frazo, devas havi la a-finaĵon eĉ kiam la objekto estas i-vorto aŭ subfrazo. La aŭtoroj de ĉi tiu libro klarigas ke oni uzas a-finaĵon por eviti konfuzon. La Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko eldiras ke ĉiuj perverbaj priskriboj, kiuj rilatas al i-vorto aŭ subfrazo (sendepende ĉu la frazparto rilatita estas subjekto aŭ objekto), devus uzi la e-finaĵon kaj ke la uzo eldirita de la PAG ne estas rekomendinda.

Ĉu priskribi i-vortojn aŭ subfrazojn pere de a-vortoj, ne estas kontraŭdire al la baza regulo ke i-vortoj kaj subfrazoj estas priskribataj pere de e-vortoj?

Kia estas la opinio de la Akademio: ĉu oni uzu preferinde a-vortecan aŭ e-vortecan objektan perverban priskribon kiam la frazparto priskribita estas i-vorto aŭ subfrazo?

[ĝentileca formulo] Volker Schultheiß

[**Respondo**] Unue la Sekcio pri Gramatiko atentigas, ke nek Plena Analiza Gramatiko (PAG) nek Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG) estas oficialaj Akademiaj gramatikoj, kvankam ambaŭ estas verkitaj de Akademianoj.

Fonaj konsideroj

Predikativo (perverba priskribo) rilatas al alia substantiveca (o-vorteca) parto de la frazo, ĉu la subjekto, ĉu la objekto (rekta komplemento). Predikativo povas difini aŭ karakterizi la subjekton aŭ objekton per alia substantivo. Ĝi ankaŭ povas priskribi iun econ de la subjekto aŭ objekto. Normale tian funkcion havas adjektivoj (a-vortoj). Ĉar predikativo esence havas karakteron de "nomo", t.e. substantivo aŭ adjektivo, iuj nomas ĝin "noma predikato" por distingi ĝin de la "verba predikato".

La substantivaj predikativoj ne prezentas problemon, kaj pri ili la alsendita demando ne temas. La problemo aperas ĉe frazparto, kiu havas la funkcion de predikativo kaj en la plej multaj okazoj havas la formon de adjektivo. Tiam predikativon ni celos, kiam ni en la ĉi-suba trakto uzos la vorton "predikativo" sen specifo. Por aliri al la temo necesas ioma ekzamenado de la adjektivo ĝenerale kaj de la adjektiveca predikativo speciale.

En Esperanto (kaj en multaj aliaj lingvoj) adjektivo dependas de substantivo. Forme tiu dependeco manifestiĝas per tio, ke la adjektivo akordiĝas kun la

substantivo, de kiu ĝi dependas. Se adjektivo apartenas al la sama frazparto, kiel la substantivo, ĝi akordiĝas kun ĝi koncerne nombbron kaj kazon:

AltA domO staris tie.
AltAJ domOJ staris tie.
Mi vidis altAN domON.
Mi vidis altAJN domOJN.

Kiam la adjektivo estas predikativo, ĝi akordiĝas kun la substantivo principe nur koncerne nombbron, ĉar objekta predikativo staras en nominativo, dum la objekto staras en akuzativo:

La domO estas altA.
La domOJ estas altAJ.
Mi konsideras la domON altA.
Mi konsideras la domOJN altAJ.

Ĉio ĉi estas senproblema, kiam la subjekto aŭ objekto, al kiu la predikativo rilatas, estas substantivo: “RestadO kun leono estas danĝerA”; “Oni konsideras danĝerA restadON kun leono”. Sed substantivecan funkcion povas havi ankaŭ elementoj, kies kerno estas verbo: infinitivo (i-vorto), kaj subpropozicio (normale komenciĝanta per “ke”). Ĉe predikativo rilatanta al verbkerna subjekto aŭ objekto prezentiĝas la jena lingva dilemo:

Unuflanke, la sintaksa rolo de predikativo: priskribe rilati al subjekto aŭ objekto, postulas, ke la predikativo havu adjektivan formon. Sed aliflanke, se (la kerno de) la subjekto aŭ objekto ne estas substantivo, adjektivforma predikativo ne havas substantivon, kun kiu akordiĝi. Tiam substantivecan vorton oni tamen povas aldoni al la frazo, resumante la enhavon de la subjekto aŭ objekto per la pronomo “tio(n)”.

En la lingvo ĝenerale, la meĥanismo de subordigado de unu vorto sub alian estas esence jena:

Kiam la ĉefa vorto estas substantivo, la subordigita vorto estas adjektivo akordiĝanta kun ĝi:

BelAJ kantOJ, sufokAN varmON.

Kiam la ĉefa vorto estas io alia ol substantivo, ekz. verbo, adjektivo aŭ adverbo (e-vorto), la subordigita vorto estas adverbo:

BelE kantl, sufokE varmA, sufokE varmE.

Du strategioj por trakti predikativojn rilatantajn al verbkerna subjekto aŭ objekto

Unu strategio estas trakti la predikativon laŭ la sama principo, kiel la supre klarigita meĥanismo (sendepende de tio, ĉu oni konsideras predikativon “subordigita” aŭ ne), t.e. doni al predikativo rilatanta al verbkerna subjekto aŭ objekto la adverbajn finaĵojn -e. Alia strategio estas marki la predikativecon de la koncerna frazparto, donante al ĝi la adjektivan finaĵon -a ankaŭ kiam ĝi rilatas al verbkerna subjekto aŭ objekto. Ĉi-sube ni indikos la 4 konstruojn jene:

SPe = subjekta predikativo e-finaĵa
OPe = objekta predikativo e-finaĵa
SPa = subjekta predikativo a-finaĵa
OPa = objekta predikativo a-finaĵa

Kiam predikativo rilatas al verbkerna subjekto, la Ekzercaro de la Fundamento instruas al ni uzi la konstruon SPe: “Restl kun leono estas danĝerE”. Sed kiam la predikativo rilatas al verbkerna objekto, nek la Gramatiko nek la Ekzercaro de la Fundamento donas al ni instruon pri tio, ĉu uzi OPe, “Oni konsideras danĝerE restl

kun leono”, aŭ OPa, “Oni konsideras danĝere resti kun leono”. Eĉ la lingvo-uzo de Zamenhof mem varias, kiel la alsendita demando montras. La tendenco ŝajnas esti, ke OPe aperas ĉefe en la plej fruaj tekstoj, dum OPa estas pli ofta en pli malfruaj tekstoj.

Zamenhofaj ekzemploj

(1, SPe) Resti kun leono estas danĝere. (Fundamento de Esperanto, Ekzercaro ...)

(2, OPa) La gazetoj ne trovas necesa eniĝi en tion, pri kio ili skribas. (Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia;)

(3, OPe) Nek Snitchey nek Craggs trovis utile batali malkaŝe kontraŭ la fluo de tiu ĉi kolero. (La Batalo de l'Vivo;)

(4, SPa) por mi persone estus kompreneble multe pli oportuna teni la sorton de la lingvo en miaj manojZ. (PAG 1985:232, § 169, Rim. I)

(5, SPa) estus tre utila tute precizigi kaj klarigi la rolon de la OficejoZ. (PAG 1985:232, §169, Rim. I)

(6, OPa) ni trovis necesa doni la sekvantajn klarigojnZ. (PAG 1985:236, §173, Rim. I b)

(7, OPa) mi trovas bona konigi la pruvosignojn kaj miraklojn ...Z. (PAG 1985:236 §173, Rim. I b)

(8, OPa) oni trovas ebla, kion oni dezirasZ. (PAG 1985:236, §173, Rim. I b) [Tiu ekzemplo estas alispeca ol la aliaj, ĉar la objekto estas nek infinitivo nek “ke”-propozicio, sed speco de rilata propozicio, en kiu “kion” resendas al subkomprenita “tion”.

Konstatoj pri la lingvouzo

La ĉi-supraj ekzemploj montras, ke la lingvouzo ne estas stabila. Zamenhof mem uzis ĉiujn 4 tipojn, eĉ SPa, malgraŭ la Fundamenta ekzerco de SPe. La diferenco inter la rekomendo de PAG kaj tiu de PMEG, menciita en la demando, spegulas diferencon en la atribuo de relativa graveco al du konsideroj:

Oni ofte konsideras, ke formoj kutimaj en la malfruaj verkoj de Zamenhof ĝenerale estas pli rekomendindaj ol formoj kutimaj nur en liaj fruaj verkoj. Laŭ tia konsidero la relative malfrua “necesA” devus havi antaŭrangon antaŭ la relative frua “utilE”. Apogas tiun opinion la adjektiveca naturo de la priskribaj predikativoj.

Ĉiun lingvon konsistigas sistemo aŭ sistemaro pli aŭ malpli kohera. Esenca trajto de la kohereco de Esperanto estas ĝia analogieco. La netuŝebla parto de Esperanto estas la Fundamento. Ĉar la Fundamento instruas, ke predikativo rilatanta al verbkerna subjekto havu adverban formon, la analogieco igas nin doni adverban formon ankaŭ al predikativoj rilatantaj al verbkernaj objektoj. Laŭ tia konsidero la analogieco kun la Fundamento principe estas pli grava ol la lingvouzo de Zamenhof, kaj en ĉi tiu okazo la analogieco kun la Fundamento krome havas apogon ankaŭ en la lingvouzo de Zamenhof.

Ambaŭ tiuj konsideroj havas siajn porparolantojn en la Sekcio pri Gramatiko. Ni ankaŭ konscias, ke povas aldoniĝi konsideroj pri cirkonstancoj, kiuj povus instigi al malsama traktado de predikativoj subjektaj kaj objektaj. Unu tia cirkonstanco povus esti, ke frazoj kun objekta predikativo normale estas pli ampleksaj - por ne diri kompleksaj - ol frazoj kun subjekta predikativo. En frazo kun objekta predikativo rilatanta al verbkerna objekto facile povas aperi ankaŭ -e-finaĵaj vortoj kun aliaj funkcioj ol tiu de objekta predikativo. Tial - kiel mencias PAG - kelkfoje oni povas misinterpreti la funkcion de e-vorto intencita kiel objekta predikativo.

Konklude, la Sekcio pri Gramatiko konstatas, ke la lingvouzo ankoraŭ ne definitive solvis la aferon, kaj ke ambaŭ alternativoj estas pravigeblaj. La kunekzistado de tiuj konkurencantaj lingvouzoj konsistigas nur marĝenan riskon de miskomprenado, kaj la lingvo disponas pri rimedoj por eviti tiajn miskomprenojn. Unu tia rimedo estas la aludita aldono de “tion”. Eblas ankaŭ alivortigoj, kiuj tute forigas la objektan predikativon. Ekzemple, anstataŭ “La gazetoj ne trovas necesa/-e eniĝi en tion, pri kio ili skribas”, eblas diri “La gazetoj ne trovas, ke necesas eniĝi en tion, pri kio ili skribas”.

Rekomendoj

Pro la ankoraŭ ne stabila lingvouzo kaj pro la marĝeneco de la problemo, la Sekcio pri Gramatiko ne trovas la tempon matura por decide rekomendi unu uzon kaj malrekomendi la alian. Tamen, al verkistoj de lernolibroj la Sekcio rekomendas, ke oni uzu adjektivon por predikativoj rilatantaj al substantivoj kaj substantivecaj vortoj kiaj pronomoj, kaj ke oni uzu adverbon por predikativoj - subjektaj kaj objektaj - rilatantaj al infinitivoj kaj “ke”-propozicioj.

Otto Prytz

Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko

La estraro de la Akademio de Esperanto:

John Wells, prezidanto, Brian Moon, vicprezidanto, Probal Dasgupta, vicprezidanto, Renato Corsetti, sekretario.

2. R 3.4 („el“)

- 5 Ekzemplo el FE 10.20: „El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa.“. Pliajn detalojn vd. en BK II. Pri prepozicioj vd. R 14 kun R 8.

3. R 3.4-5 („ol“)

- 6 La vorteto „ol“ havas plurajn signifojn laŭ la F-to, ne nur tiun preskribitan en R 3.4 (pli ... ol, malpli ... ol). Ekzemplojn vd. en BK II. Pri la frazero „pli blanka ol neĝo“ vd. la ĉapitron „Religia lingvaĵo en la Fundamento“.

F. § 4 [Numeraloj]

I. Fundamentaj Tekstoj el 1905

4. [1] Les **adjectifs numériques cardinaux** sont invariables: *unu* (1), *du* (2), *tri* (3), *kvar* (4), *kvin* (5), *ses* (6), *sep* (7), *ok* (8), *naŭ* (9), *dek* (10), *cent* (100), *mil* (1000). [2] Les dizaines et les centaines se forment par la simple réunion des dix premiers nombres. [3] Aux adjectifs numériques cardinaux on ajoute: la terminaison (*a*) de l'adjectif, pour les **numéraux ordinaux**; *obl*, pour les numéraux **multiplicatifs**; *on*, pour les numéraux **fractionnaires**; *op*, pour les numéraux **collectifs**. [4] On met *po* avant ces nombres pour marquer les numéraux **distributifs**. Enfin, dans la langue, les adjectifs numériques peuvent s'employer substantivement ou adverbialement. Ex.: *Kvin'cent tri'dek tri* — 533; *kvar'a* — 4me; *tri'obl'a* — triple; *kvar'on'o* — un quart; *du'op'e* — à deux; *po kvin* — au taux de cinq (chacun); *unu'o* — (l') unité; *sep'e* — septièmement.

4. [1] The cardinal numerals do not change their forms for the different cases. They are: *unu* (1), *du* (2), *tri* (3), *kvar* (4), *kvin* (5), *ses* (6), *sep* (7), *ok* (8), *naŭ* (9), *dek* (10), *cent* (100), *mil* (1000). [2] The tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals, e. g. 533 = *kvin'cent tri'dek tri*. [3] Ordinals are formed by adding the adjectival *a* to the cardinals, e. g. *unu'a*, „first”; *du'a*, „second”, etc. [4] Multiplicatives (as „threefold”, „fourfold”, etc.) add *obl*, e. g. *tri'obl'a*, „threefold”. Fractionals add *on*, as *du'on'o*, „a half”; *kvar'on'o*, „a quarter”. Collective numerals add *op*, as *kvar'op'e*, „four together”. Distributive prefix *po*, e. g., *po kvin*, „five apiece”. Adverbials take *e*, e. g., *unu'e*, „firstly”, etc.

4. [1] Die **Grundzahlenwörter** (undefinierbar) sind folgende: *unu* (1), *du* (2), *tri* (3), *kvar* (4), *kvin* (5), *ses* (6), *sep* (7), *ok* (8), *naŭ* (9), *dek* (10), *cent* (100), *mil* (1000). [2] Zehner und Hunderte werden durch einfache Anreihung der Zahlwörter gebildet; z. B.: *kvin'cent tri'dek tri* = 533. [3] Ordnungszahlwörter entstehen, indem sie die Endung des Adjektivs annehmen; z. B. *kvar'a*, vierter. [4] Vielfältigungszahlwörter — durch Einschlebung des Suffixes *obl*; z. B.: *tri'obl'a*, dreifach. [5] Bruchzahlwörter — durch *on*; z. B. *kvar'on'o*, ein Viertel. [6] Sammelzahlwörter — durch *op*; z. B. *du'op'e*, selbender. [7] Distributive Zahlwörter — durch das Wort *po*; z. B. *po kvin*, zu fünf. [8] Außerdem gibt es Substantiv- und Adverbialzahlwörter; z. B. *cent'o*, das Hundert, *du'e*, zweitens.

4. [1] **Числительная** количественная (не склоняются): *unu* (1), *du* (2), *tri* (3), *kvar* (4), *kvin* (5), *ses* (6), *sep* (7), *ok* (8), *naŭ* (9), *dek* (10), *cent* (100), *mil* (1000). [2] Десятки и сотни образуются простым сліяніем числительныхъ. [3] Для образования порядковых прибавляется окончание прилагательного; [4] для множительныхъ — вставка *obl*, [5] для дробныхъ — *on*, [6] для собирательныхъ — *op*, [7] для раздѣлительныхъ — слово *po*. [8] Кроме того могутъ быть числительная существительная и нарѣчныя. (**Примѣры:** *Kvin|cent tri|dek tri* = 533; *kvar|a* четвертый; *unu|o* единица; *du|e* во вторыхъ; *tri|obl|a* тройной, *kvar|on|o* четверть; *du|op|e* вдвоемъ; *po kvin* по пяти).

4. [1] **Liczebniki** główne nie odmieniają się: *unu* (1), *du* (2), *tri* (3), *kvar* (4), *kvin* (5), *ses* (6), *sep* (7), *ok* (8), *naŭ* (9), *dek* (10), *cent* (100), *mil* (1000). [2] Dziesiątki i setki tworzą się przez proste połączenie liczebników. [3] Dla utworzenia liczebników porządkowych dodaje się końcówka przymiotnika, [4] dla wielorakich — przyrostek *obl*, [5] dla ułamkowych — *on*, [6] dla zbiorowych — *op*, [7] dla podziałowych — wyraz *po*. [8] Prócz tego mogą być liczebniki rzeczowne i przysłówkowe. **Przykłady:** *kvin/cent tri/dek tri* = 533; *kvar/a* czwarty; *unu/o* jednostka; *du/e* powtóre; *tri/obl/a* potrójny, trojaki; *kvar/on/o* czwarta część; *du/op/e* we dwoje; *po kvin* po pięć.

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

4. [1] Die **Grundzahlwörter** (undeklinierbar {de 1901: undeklinierbar}) sind folgende: *unu* (1), *du* (2), *tri* (3), *kvar* (4), *kvin* (5), *ses* (6), *sep* (7), *ok* (8), *naŭ* (9), *dek* (10), *cent* (100), *mil* (1000). [2] Zehner und Hunderte werden durch einfache Anreihung der Zahlwörter gebildet; z.B.: *kvin'cent tri'dek tri* = 533. [3] Ordnungszahlwörter entstehen, indem sie die Endung des Adjektivs annehmen; z.B. *kvar'a*, vierter. [4] Vervielfältigungszahlwörter — durch Einschlebung des Suffixes *obl*; z.B.: *tri'obl'a*, dreifach. [5] Bruchzahlwörter — durch *on*; z.B. *kvar'on'o*, ein Viertel. [6] Sammelzahlwörter — durch *op*; z.B. *du'op'e*, selbender. [7] Distributive Zahlwörter — durch das Wort *po*; z.B. *po kvin*, zu fünf. [8] Außerdem gibt es Substantiv- und Adverbialzahlwörter; z.B. *cent'o*, das Hundert, *du'e*, zweitens.

Zamenhofa traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

4. [1] La bazaj numeraloj (ne deklinaciataj) estas: [*nul* (0) - OA 8], *unu* (1), *du* (2), *tri* (3), *kvar* (4), *kvin* (5), *ses* (6), *sep* (7), *ok* (8), *naŭ* (9), *dek* (10), *cent* (100), *mil* (1000). [2] La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj. [3] Por la ordaj numeraloj oni aldonas la adjektivan finiĝon *a*; [4] por la multiplikaj — la sufikson *obl*; [5] por la frakciaj — *on*; [6] por la kolektivaj — *op*; [7] por la distribuaj — la vorton *po*. [8] Krom tio povas esti uzataj numeraloj substantivaj kaj adverbaj. Ekz. *kvin|cent tri|dek tri* (533); *kvar|a, unu|a, du|a; unu|o, cent|o; sep|e, unu|e, du|e; tri|obl|a; kvar|on|o, du|on|o; du|op|e, kvar|op|e; po kvin*.

II. OA 8 pri „nul“ (aldono al R 4.1)

1 UV havas jenan artikolon pri **nul'**:

nul' - zéro | null | Null | нуль | nul, zero. — [AK] {en} zero, nought. — [RE]. — Detalojn vd. en BK II.

OA 8 aldonis al la Oficiala Vortaro:

nul. [OA 8] La nombrosigno 0 (radiko de la Fundamenta: nul/o). — A. zero, nought, nil; F. zéro; G. Null; H. {es} cero; I. {it} zero; P. {pt} zero. — [OA 8] II.B.3. Apud la Fundamenta substantivo nulo estas oficialigita la numeralo nul.

III. Deklinaciataj numeraloj

2 **miliono** — Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj [FE 14.3, mankas en UV]. — **milion-o** [OA 2.1] — **milion'** (2) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [EG 1].

miliard' [OA 1] * milliard | thousand millions | Milliarde | миллиардъ | miljard. — [EG 1].

bilion-o – [EG 1] [EG 2] [GE 1] [GE 2] [ER] Billion (1 000 000 000 000). [10¹² (milionaj milionoj)].

trilion-o. - [EG 2] [GE 1] [GE 2] [ER]

kvadrilion-o – [EG 1] [EG 2] [ER] Quadrillion (Million in der 4. Potenz)

kvintilion-o – PIV 2005.

IV. Komentoj

1. Superrigardo

- 3 FG 4 temas nur pri la listitaj bazaj **numeraloj** ne deklinaciataj. Al ili la Akademio aldonis la ne deklinaciatan vorton **nul**. Krome ekzistas la deklinaciataj oficialaj numeraloj **nulo**, **miliono** kaj **miliardo** kaj aldone la neoficiala, sed Zamenhofa serio **biliono**, **triliono**, **kvadriliono**. Pliajn formojn (**kvintiliono**) notas PIV 2005.
- 4 La numeraloj estas temo ĉefe en FE 12 kaj FE 14, vd. tie.

2. R 4.1: Arabaj ciferoj

- 5 R 4.1 difinas, ke la t.n. **arabaj** ciferoj (0, 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9) estas la kutimaj ciferoj en Esperanto. Aliaj ciferoj, precipe la latinaj (I, V, X, L, C, M) estas „fremdaj“, sed allasitaj simboloj en analogio al R 15, vd. pli detale tie.

3. Fermita listo de numeraloj

- 6 La listo de numeraloj en R 4.1 estas kompleta kaj finita. La difinita artikolo „die“, „the“ kaj „les“ en la artikol-havaj lingvoj franca, angla kaj germana klarigas, ke sekvas ĉiuj elementoj de la klaso de l' nedeklinacieblaj bazaj numeraloj. Same kiel alikoke, oni devas interpreti „Grundzahlwörter“ (= „bazaj numeralaj vortoj“) kiel „bazaj numeralaj radikoj“, ĉar la regulo evidente ne celas komplete listigi la kunmetitajn numeralajn vortojn. Nur „aŭtoritata centra institucio“ (la Akademio) rajtas enkonduki pliajn nedeklinacieblajn numeralajn radikojn; ĝi faris tion ĉe „nul“ (OA 8).⁸⁸

4. „nul“

- 7 Simile kiel ĉe Aŭgust' (monato) kaj Aŭgust' (vira antaŭnomo) ankaŭ pri nul' [UV] (radiko bezonas finaĵon) kaj nul [OA 8] (senfinaĵa numeralo) oni povas dubi, ĉu temas pri unu aŭ du elementoj. Ĉefa argumento por du elementoj estas, ke la Akademio ne rajtas ŝanĝi la statuson de Fundamenta elemento, nur interpreti dubajn okazojn kaj aldoni novajn elementojn (A 10.4). Se oni interpretas la numeralon kiel aldonitan novan elementon temas pri du apartaj elementoj (la Fundamenta elemento, kiu bezonas finaĵon, kaj la aldonita elemento kiu ne bezonas finaĵon). La kontraŭa opinio asertas, ke OA 8 nur difinis novan manieron uzi la Fundamentan elementon nul' kiel klarigite en la „Baza Radikaro Oficiala“ (BRO: „sen finaĵo en kalkuloj, nombrado...“), sed ne ŝanĝis ĝian principan statuson kiel finaĵbezona radiko. Tiun aliron elektis AV, kiu registras nur nul' (NUL/). La konvinka povo de tiu argumento dependas pri la formala statuso de BRO, pri kiu vd. Libron Kvaran, ĉapitron D.

5. R 4.4 („obl“)

- 8 Vd. la vortaran parton, BK II.

6. R 4.5 („on“)

- 9 Vd. la vortaran parton, BK II.

7. R 4.6 („op“)

- 10 Vd. la vortaran parton, BK II.

685

⁸⁸ Same Welger. Normesperantologiaj ekspertizetoj. 1999.

8. R 4.7 („po“)

Literaturo (selekto): Antilla, Werner (1921). Ankoraŭ pri "po", "krom" kaj "anstataŭ". En: Esperanta Finnlando 1921:8/9 (Aŭg-Sep), p. 141. - Atanasov, A.D. (= Ada) (1966). La vorteto "po". En: Nuntempa Bulgario 1966/3, p. VI-VII (Superrigardo pri la uzo kaj teorio de «po»). - V.S. [= Setälä, V.] (1971). po. En: Esperanta Finnlando 1971/1, p. 7 (pri „100 km/h“). – Diversaj kontribuoj en Akademiasaj Studoj 1983-1985. – Cherpillod, André (1996). Po – la diablo vorto. Courgenard: Memeld. 1996.

- 11 „Po“, inspirita de la rusa kaj pola „no“ kaj „po“, ĉiam denove kaŭzis problemojn al parolantoj i.a. de latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj (ĉu adverbo, ĉu prepozicio? – ĝuste: prepozicio). Zamenhof donis du Lingvajn Respondojn pri ĝi (LR 79 [1891] – po regas la nominativon – kaj LR 137 [1908] – pri la ĝusta uzo). La Akademio diskutis ĝin jam en 1932⁸⁹, fine donis plian rekomendon en 1974 („30 km/h“, **ne** estas km *po* horo, sed “en”, “je”, “por” aŭ “sur” laŭ la cirkonstancoj). Ĉiujn tri tekstojn vd. en la vortara parto, BK II. Sekvo de la malfacilaĵoj estas relative riĉa faka literaturo pri la „diabla vorto „po““, vd. la selekton supre kaj EBEA. Nuntempe la demandoj pri „po“ probable estas solvitaj, kiel resumas Cherpillod 1996.

9. Kompleksaj numeraloj

- 12 Nek R 4, nek iu alia parto de la Fundamento laŭ la stato de 2007 (do inkluzive de la naŭ OA) enhavas regulojn pri kompleksaj numeraloj, ekzemple frakcioj ($\frac{1}{2}$; 0,5). En analogio al R 15 (diskuton vd. tie) ili sekvas la internacie akceptitajn, ĝeneralajn konvenciojn de matematiko.
- 13 Foje tia konvencio *ne* ekzistas, ekz. ĉe la demando, ĉu oni skribu „0,5“ kun komo aŭ „0.5“ kun punkto. OA 9 enhavas jenajn – tamen neoficialajn – modelojn kun **komo**:

40,08 en la difino de **kalci/o** (atommaso)

1,33 en la difino de **kurz/o**

28,09 en la difino de **silici/o** (atommaso)

10. Pri la dato

- 14 Unu (sed ne la solan) formaton de la dato traktas FE 12.17 ĝis FE 12.19:

Kiun daton ni havas hodiaŭ? [FE 12.17] — Hodiaŭ estas la *dudek sepa (tago) de Marto* [FE 12.18]. — Georgo Vaŝington estis naskita la *dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua* [FE 12.19].

- 15 A 11.4 uzas la formon „Julio 1905“, la Bulonja Deklaracio la formon „9-a de Aŭgusto 1905“ (BD sub la titolo). Laŭ A 3.6 kaj BD 4.6 tiuj Zamenhofaj formoj tamen estas ne devigaj, sed nur rekomendataj modeloj.
- 16 Eksplicita regulo aŭ eĉ nur modelo pri **skribado de dato nur per ciferoj** ne ekzistas en la Fundamento. Ankaŭ la Akademio ĝis nun neniam eksplicite traktis la temon kaj ne aldonis iun regulon pri skribado de nurcifera dato al la Fundamento laŭ A 10.4 („per oficialigo de novaj reguloj“).
- 17 La Akademio tamen donas (nedevidan) modelon en siaj Oficialaj Informoj (OI), nome skribado de nurcifera dato laŭ la formo
„jaro (kvarcifera nombro) (spaceto) monato (ducifera nombro) (spaceto) tago (ducifera)“,

685

⁸⁹ La tiam diskutitaj aspektoj estas menciitaj en la jarraporto de la AdE en: Lingva Kritiko vol. 1, 1932, n. 8 (Sep), p. [3] (= 1932, [31]).

vd. ekzemple

OI 22 de „2013 10 10“

OI 12 de „2009 05 04“

OI 8 de „2007 03 10“

Tio baziĝas sur la ISO-normo, kiun ankaŭ uzas la periodaĵo *Monato*.⁹⁰ Ĉar ni ne vidas iun gravan kaŭzon devii de tiu uzo kaj ĉar unueca lingvo-uzo pli gravas ol ĉiuj personaj aŭ naciaj gustoj, ni rekomendas sekvi tiun modelon.

- 18** La formo de dato ankaŭ estas temo de LR 64 B (1907). Tamen temas pri noto de P. Corret en *Lingvo Internacia*, nur laŭaserte „interkonsente kun D-ro Zamenhof“. Ni tial rezignas redoni ĝin tie ĉi.

11. Pri la indiko de la horo

- 19** En la F-to ne troveblas iu indiko de la horo. DL 1888 havas nur ekzemplojn per plenaj vortoj, sed ne per ciferoj:

Ni matenmanĝas ĉian {de 1888: ĉiam} je l' deka horo antaŭ tagmezo [DL 7.5]. - Je l' deka horo vespere la kortisto fermas la pordegon de l' domo [DL 11.6]. - Diru al mi, mi petas, kioma horo nun estas [DL 16.7]. - Nun estas la tria horo, aŭ, pli certe, nun estas kvin minutoj post la tria horo [DL 16.8]. - Ne, sinjoro, vi eraras: nun estas kvarono de la kvara (horo) [DL 16.9]. - Je l' kioma horo vi tagmanĝas (tagmezmanĝas)? [DL 16.10]. - Ne ĉian {de 1888: ĉiam} egale: hodiaŭ ni tagmanĝis je tri kvaronoj de l' kvara, kaj hieraŭ ni manĝis akurate je l' tria horo [DL 16.11].

- 20** La *Monato*-konvencio uzas „je la 7h30“ – horoj kaj minutoj estas disigitaj per la litero –h– (legu: „je la sepa horo tridek“. Sinonima ebleco estas uzi dupunkton anstataŭ la h-simbolon: „je 07:30“.

⁹⁰ *Monato*-konvencioj en http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_konv.php (stato 2014-07-17).

G. § 5 [Pronomoj]

I. Fundamentaj Tekstoj

1. Gramatikoj

5. [1] Les **pronoms** personnels sont: *mi* (je, moi), *vi* (vous, tu, toi), *li* (il, lui), *ŝi* (elle), *ĝi* (il, elle, pour les animaux ou les choses), *si* (soi), *ni* (nous), *ili* (ils, elles), *oni* (on). [2] Pour en faire des adjectifs ou des pronoms possessifs, on ajoute la terminaison (*a*) de l'adjectif. [3] Les pronoms se déclinent comme le substantif. [4] Ex.: *mi'n* — moi, me (accus.), *mi'a* — mon, *la vi'a'j* — les vôtres.

5. [1] The personal pronouns are: *mi*, „I”; *vi*, „thou”, „you”; *li*, „he”; *ŝi*, „she”; *ĝi*, „it”; *si*, „self”; *ni*, „we”; *ili*, „they”; *oni*, „one”, „people”, (French „on”). [2] Possessive pronouns are formed by suffixing to the required personal, the adjectival termination. [3] The declension of the pronouns is identical with that of substantives. [4] E. g. *mi*, „I”; *mi'n*, „me” (obj.); *mi'a*, „my”, „mine”.

5. [1] Die persönlichen **Fürwörter** sind: *mi* (ich), *vi* (du, Ihr), *li* (er), *ŝi* (sie), *ĝi* (es; von Thieren oder Sachen), *si* (sich), *ni* (wir), *ili* (sie [Mehrzahl]), *oni* (man). [2] Possessive Pronomina werden durch die Hinzufügung der Endung des Adjektivs gebildet. [3] Die Pronomina werden gleich den Substantiven dekliniert. [4] Z. B.: *mi'a*, mein, *mi'n*, mich.

5. [1] **Мѣстоименія** личныя: *mi* (я), *vi* (вы, ты), *li* (онъ), *ŝi* (она), *ĝi* (оно; о вещи или о животномъ), *si* (себя), *ni* (мы), *ili* (они, онъ), *oni* (безличное множественнаго числа); [2] притяжательныя образуются прибавлениемъ окончанія прилагательнаго. [3] Склоненіе какъ у существительныхъ [4] (**Примѣры**: *mi|n* меня (винит.); *mi|a* мой).

5. [1] **Zaimki** osobiste: *mi* (ja), *vi* (wy, ty) *li* (on), *ŝi* (ona), *ĝi* (ono; o rzeczy lub zwierzęciu), *si* (siebie) *ni* (my), *ili* (oni, one), *oni* (zaimek nieosobisty liczby mnogiej); [2] dzierżawcze tworzą się przez dodanie końcówki przymiotnika. [3] Zaimki odmieniają się jak rzeczowniki. [4] **Przykłady**: *mi/n* mnie (przyp. czwarty); *mi/a* mój.

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

5. [1] Die persönlichen **Fürwörter** sind: *mi* (ich), *vi* (du, Ihr), *li* (er), *ŝi* (sie), *ĝi* (es; von Thieren oder Sachen), *si* (sich), *ni* (wir), *ili* (sie [Mehrzahl]), *oni* (man). [2] Possessive Pronomina werden durch die Hinzufügung der Endung des Adjektivs gebildet. [3] Die Pronomina werden gleich den Substantiven dekliniert. [4] Z.B.: *mi'a*, mein, *mi'n*, mich.

Zamenhofs traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

5. [1] La **pronomoj** personaj estas: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi* (por bestoj aŭ aĵoj), *si*, *ni*, *ili*, *oni* (senpersona plurala pronomo). [2] Pronomoj posedaj estas formataj per aldono de la adjektiva finiĝo *a*. [3] La deklinacio de la pronomoj estas kiel ĉe substantivoj. [4] Ekz. *mi|n*, *mi|a*, *la vi|aj*.

2. Ekzercaro kaj UV pri „ci“

ci - tu, toi, | thou | du | ты | ты. — **ci** - tu, toi, | thou | du | ты | ты [FE 16]. — Ci skribas (anstataŭ „ci” oni uzas ordinare „vi”) [FE 16.2]. — Detalojn (DL, LR 87) vd. en la vortara parto.

II. Komentoj

1. R 5.1: Fermita listo de pronomoj

- 1 La listo de pronomoj en R 5.1 kaj FE 16 estas kompleta kaj finita. Novajn pronomojn nur rajtas aldoni „aŭtoritata centra institucio“ laŭ A 8, A 10.4.
- 2 La kompleteco de la listo de pronomoj sekvas el jenaj konsideroj.
R 5 en la franca, angla kaj germana versioj, do en tiuj lingvoj, kiuj havas difinitan artikolon, komenciĝas per jenaj vortoj:

Les pronoms personnels sont: ...

The personal pronouns are: ...

Die persönlichen Fürwörter sind: ...

La difinitaj artikoloj „les“, „the“, kaj „die“ eksplicite konfirmas, ke sekvas **ĉiuj** elementoj de la klaso de personaj pronomoj (kp. la saman argumenton supre ĉe R 4). Tamen aldoniĝas al ĝi la pronomo „ci“, ĉar tiu ĉi troviĝas en FE 16.2 kaj la Universala Vortaro.⁹¹

- 3 El tio sekvas, ke ĉiuj proponoj, ekzemple enkonduki virinan pluralan pronomon **ŝi - iŝi** ŝajne paralele al **li - ili** (kp. france *elle - elles, il - ils*) estas kontraŭ-fundamentaj kaj malĝusta Esperanto. La enkondukon de „iŝi“ la Lingva Komitato diskutis jam en 1910, reage al la 1a eld. de la vortaro Esperanto-Franca de E. Grosjean-Maupin kaj prave rifuzis ĝin.⁹² Same staras pri nuntempaj proponoj kiel „ri“, „ŝli“, „imi“, „zi“, „gi“ (sen supersigno) k.t.p. Ankaŭ ili estas kontraŭfundamentaj.

2. Apudmetitaj personaj pronomoj („li-ŝi“, „ŝi-li“ k.t.p.)

- 4 Personaj pronomoj kiel „li-ŝi“, „ŝi-li“ k.t.p. principe ja eblas, se oni rigardas ilin *apudmetitajn* formojn kiel „pli-malpli“ (pli aŭ malpli), „nigra-blanka“ (nigra kaj blanka), „blua-blanka-ruĝa“ (kaj) k.t.p., al kiuj **ne** estas aplikebla R 11 pri *kunmetitaj* vortoj (vd. tie).⁹³

3. R 5.1: Senpersona „ĝi“

- 5 Senpersona „ĝi“ laŭ la germana modelo (*es regnet - *ĝi pluvas*) ekzistis nur en la plej frua epoko de Esperanto, sed intertempe estas malĝusta. Detalojn vd. en la vortara parto BK II.

4. Pri „si“ kaj „sia“ (refleksivaj pronomoj)

Literaturo (selekto): Takahaŝi, Meguru (1933). Pri la refleksiva pronomo. [Kun respondo de W[alter] Lippmann]. En: [1] Lingva Kritiko 1933:1:15 (Apr.), p. [3-4]. [2] 1933:1:16 (Maj.), p. [3-4]. [3] 1933:1:18/19 (Jul.-Aŭg.), p. [6-7]. - **Golden**, Bernard. Ĉu la uzo de la refleksivo estas lernebla? En: *esperanto* (Italujo)

685

⁹¹ Same Welger. Normesperantologiaj ekspertizetoj. 1999.

⁹² Vd. ekz. la kritikon de B.K. [= Kotzin, B.] (1910). E. Grosjean-Maupin. Dictionnaire Complet Esperanto Français. En: Ondo de Esperanto 2a jaro 1910, n-ro 12, p. 9: „S-ro G-M verkis ne tre perfektan vortaron, kies utilo estas dubebla.. multe da neologismoj absolute superflujaj .. adoleska, amendamenti, aĵoj, aŭdaca, temerara, tenera, evento .. par, nam, olim, forsan, iŝi ...“.

⁹³ Tion pretrevidas Welger. Normesperantologiaj ekspertizetoj. 1999, kiu argumentas, ke kiel *kunmetitaj* formoj laŭ R 11 ili ne havas la sencon celatan de la proponantoj („li aŭ ŝi“): „Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino) ...“. Tiukaze la sufiĉe malklara kaj duba senco de „liŝi“ iel similas al „vira ŝi“, aŭ „vireca ŝi“, sed ne al „li aŭ ŝi“.

1983:61:3, p. 15-16. - PAG 1985, § 160-163. - PMEG 2013, 11.6. – **Jansen**, Wim. The learnability of the reflexive in Esperanto. En: EES 6 (2013), p. 71-96.

a) Superrigardo

- 6 La preciza uzo de la refleksivaj (aŭ resendaj) pronomoj („si“, „sia“) tra la historio de Esperanto ĝis niatempe estas disputata, ĉar – kiel prave konstatas PMEG 11.6 – „en simplaj frazoj la reguloj estas tute klaraj, sed en iaj kompleksaj frazoj la uzado ne estas fiksita“. Kontribuo de Bernard Golden el 1983 eĉ havas la titolon „Ĉu la uzo de la refleksivo estas lernebla?“, demandon kiun Jansen ripetas en 2013. Rezulte de la malfacilaĵoj ekzistas multaj aplik-ekzemploj en la F-to (vd. en BK II), multaj LR kaj pluraj respondoj de la Akademio pri la temo (dokumentitaj tuj poste), kaj fine riĉa faka literaturo, aperinta dum almenaŭ ok jardekoj.

b) Lingvaj Respondoj

- 7 Estas konataj jenaj **Lingvaj Respondoj** de Z, krome respondo de Grabowski nome de la Akademio el 1909, kiu raportas respondon de Z (mallongigita teksto estas citita kiel LR 96 en la 7a eld. 1990). Kiel kutime en BK ni ordigis ilin kronologie.

8 LR 94 B (1903):

S-ro Witteryck skribis: „Urbano kaj sia edzino“; Zamenhof korektis „kaj lia edzino“. [1903. PVZ X, 116].

9 LR 97 (1904) [Pri „siaĵo“]:

Cuique suum = al ĉiu lian siaĵon (donu) [Pk. al Michaux de 1904-03-30, LZ I, p. 67].

10 LR 95 (1906):

Vi devas diri „la patrino diras, ke ŝia filo venos kun sia infano.“ [LR 95. Let. al Th. Thorsteinsson (1906), OV p. 523].

11 LR 98 (1908) [Pri „siatempe“]:

Diri „iam“ anstataŭ „siatempe“ ni en la plimulto da okazoj ne povas, ĉar la senco de ambaŭ vortoj estas malsama. „Iam“ esprimas tempon nedifinitan, dum „siatempe“ esprimas tempon kvankam ne klare nomitan, tamen pli-malpli difinitan. „Mi volis siatempe proponi regulon“ = „mi volis proponi en tiu tempo, kiam, laŭ mia opinio, la cirkonstancoj tion postulis“. Se anstataŭ „siatempe“ vi diros „ĝiatempe“, vi ne faros eraron; sed ŝajnas al mi, ke en la plimulto da okazoj „siatempe“ estas pli bona ol „ĝiatempe“. Tiamaniere uzas la vorton ne sole tiuj lingvoj, kiuj por „sia“ kaj „ĝia“ uzas la saman vorton, sed ankaŭ tiuj lingvoj (ekzemple la slavaj), kiuj severe faras diferencon inter „sia“ kaj „ĝia“. Laŭ mia opinio oni povas klarigi ĝin al si per tio, ke „sia“ montras pli grandan intimecon inter la faro kaj la tempo, ol kiom montrus la vorto „ĝia“. Gvidi nin per teoriaj postuloj gramatikaj en tiu ĉi okazo ni ne povas, ĉar al kio ni povus rilatigi la vorton „ĝia“? Ŝajnas al mi, ke en la esprimo „faro ĝiatempa“ la tempo apartenas (t.e. estas konvena, konforma k.t.p.) al io alia, dum en „faro siatempa“ la tempo apartenas al la faro mem. Kompreneble, mia klarigo ne prezentas ion absolute konvinkan; sed mi volis nur montri al vi, ke ne ekzistas ia grava kaŭzo, por ke ni la ĝis nun komune uzatan „siatempe“ anstataŭigu per „ĝiatempe“. [LR 98, Respondo 43 La Revuo, 1908, Aŭgusto].

12 LR 94 A (sen jaro):

*Deligny*⁹⁴ proponis jenan frazon: „Tiu sinjoro venis kun la panisto, kaj diris al mi, ke sia filo (= de l' sinjoro) estas malsana“ – klarigante, ke, por eviti dubon, oni devus uzi „sia“, por resendi al la subjekto de la antaŭa verbo.

Zamenhof respondis jenon:

„La sinjoro diris al mi, ke lia filo ...“. Se li parolus pri la filo de la *panisto*, li dirus: „ke la filo de tiu ĉi (lasta) ...“. „Sia filo“ estas nebona, ĉar ĝi signifus „la filo de si mem“, kaj neniu povas esti filo de si mem. [LZ I, p. 122].

c) Akademiaj respondoj kaj decidoj

- 13 En 1909 la tiama Akademio Esperantista okupiĝis pri „si, sia“ okaze de demando de iu sinjoro *Clement Hill*. Ni citas ĝian respondon laŭ OGE 1909, indikante la paĝo-numerojn en rektaj krampoj.

Demando de Clement Hill pri „si, sia“ kaj respondo de Grabowski (1909)

[**Demando:**] La regulo pri la uzado de *sia* donita en la *Esperanta Sintakso* de S^{ro} Fruictier⁹⁵ estas jena:

[85] *Sia* montras rilaton al la subjekto de tiu verbo, kies ĝi estas rekta dependaĵo (§ 85, paĝon 31).

Similan regulon donas S^{ro} Cox en sia gramatiko⁹⁶ [§ 128 en la 4a eld. 1924], kaj ankaŭ la verkintoj de aliaj lernolibroj.

Mi notas, ke verkistoj ordinare sekvas tiun ĉi regulon, sed ne ĉiam.

Jen estas ekzemploj el la verkoj de D^{ro} Zamenhof, kie ŝajne tiu ĉi regulo ne estas observata.

1. « Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por *li* ». (Fundamento de Esperanto. Antaŭparolo, p. vi. [A 2.2])

2. « Kaj ke tiu, kiu estas la kaŭzo de tio, ricevu justan punon por *lia* krueleco ». (Georgo Dandin, Revuo, sept. 1908, p. 10. [libroeldono Paris: Hachette 1908, p. 45])

3. « La Ĥino tial ankaŭ legas siajn skribajn signojn ĉiam en sia dialekto, kaj la aliaj popoloj de Azio legas tiujn samajn signojn en *ilia* lingvo ». (Fundamenta krestomatio, p. 258, l[inio] 4)

4. « La imperiestro tuj elsaltis el la lito, kaj sendis voki *lian* konstantan kuraciston ». (Najtingalo, Revuo, n° 20, apr. 1908, p. 359.)

5. « La abato sendas en urbon Palos inviti *sian* amikon ». (Fundamenta Krestomatio, p. 98, l. 25.)

(Mi [Hill] ne komprenas kial oni uzus *lian* en n° 4, kaj *sian* en n° 5.)

685

⁹⁴ Ernest **Deligny** (1864-1950), franca licea instruisto, en 1900 transiris de Volapuko al Esperanto kaj aktivis en Saint-Omer, norda Francio.

⁹⁵ **Fruictier**, Paŭlo [t.e. Paul (1879-1947)]. *Esperanta sintakso*. Laŭ verkoj de Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj. Paris: "Lingvo Internacia" 1903. 2a eld. Paris: Presa Esperantista Societo 1907. Skanaĵo de la 1a eld. 1903 en la retejo de IEMW.

⁹⁶ **Cox**, George (1838-1909). *A grammar and commentary on the international language Esperanto*. 1a eld. 1906. 2a eld. 1907. 3a eld. London: British Esperanto Association 1908. 4a rev. eld. 1924, represita 1939, skanita ĉe www.gutenberg.org (2014-09).

6. « En unu nokto ŝi rimarkis en granda malproksimeco la maljunan avinon... kaj la reĝon de maro kun *sia* krono sur la kapo ». (Fundamenta Krestomatio, p. 53, l. 22-20).

7. « Kaj li tutajn tagojn sidas super ili, kaj kun ĝojo trovas en ili jesigon de *liaj* teoriaj supozoj ». (Fund. Krest., p. 95, l. 31.)

8. Ofte en vespero ŝi vidadis lin forveturantan sub la sonoj de muziko en *lia* belega ŝipeto ». (Fund. Krest., p. 45, l. 21.)

9. « Ili ekvidadis la nubojn preterflugantaj profunde sub *ili* ». (Fund. Krest., p. 53.)

10. « Kiam restas fari nur kelkajn paŝojn por pravigi *siajn* esperojn ». (Fund. Krest., p. 105, l. 28.)

[Respondo:] Raporto pri la demando de S^{ro} Clement Hill.

Varsovio, Hoza, 40, 5 majo 1909.

Laŭ la fundamentoj de nia lingvo la pronomoj reflektivaj, « *si, sia* » estas uzataj rilate al tria persono de ambaŭ nombroj, kiam tiu persono estas subjekto de la frazo. Sekve: Li, ŝi, ĝi, ili lavas sin; ŝi portas siajn riĉajn vestojn; tiuj patroj perdis siajn infanojn; hundo amas sian mastron; la hundino kun siaj idoj... sed: mi vidis virinon kaj ŝiajn infanojn; apenaŭ ŝia patrino rimarkis ŝin, li amas siajn infanojn sed mallaŭdas ilian mallaboremmon; patro iras kun sia filo kaj liaj amikoj (amikoj de l'filo); Petro skribis al Paŭlo, ke li alkonduku al li lian hundon (de Petro).

Tian uzadon konstatas ankaŭ tute ĝuste la reguloj de Fruictier, Cox kaj aliaj gramatikistoj. Se tamen plej bonaj verkistoj iafoje ne sekvas la regulon, ili aŭ faras eraron (*errare humanum est*; eĉ klasikaj aŭtoroj eraras iafoje en sia propra lingvo gepatra), aŭ ili penas ating[i] ankoraŭ pli altan gradon de klareco, kiu estas la plej supera regulo de nia lingvo, ĉar ankaŭ la uzado de *sia* estis enkondukita en Esperanton nur pro tiu motivo de klareco.

Pri la frazoj cititaj de S-ro Hill, mi demandis la aŭtoron, D-ron Zamenhof. Li konsentas ke *si, sia* estus en ili pli korekta, ekzemple: en la frazo: « kaj ke tiu, kiu estos [legu: estas] la kaŭzo de tio, ricevu justan punon por lia krueleco » (krueleco propra, ne de iu alia) sed Dr. Zamenhof uzas *li, lia*, kiam la pronomo ne sekvas tuj la subjekton sed estas apartigita per aliaj substantivoj, kaj tial povus okazi dubo pri la ĝusta rilateco kaj senco.

Ekzemple, en la frazo: « ofte en vespero, ŝi vidadis lin forveturantan sub la sonoj de muziko en lia belega ŝipeto » *sia* ne estus tute klara, ĉar ni havas tie du kuntiritajn frazojn: ŝi vidis, li veturis, kie *ŝi* kaj *li* estas subjektoj; do la aŭtoro uzis la pli klaran « *lia* ». Similaj konsideroj gvidis lin ĉe la konstruado de la frazo : « Ili vidis [legu: ekvidadis] la nubojn preterflugantaj profunde sub ili ».

Sekve la ĉefa regulo de Esperanto estas la klareco kaj facila komprenebleco; ankaŭ la reguloj starigataj de la gramatikistoj devas cedi al tiu bezono kaj, pri tio, ni vidas iafoje hezitudon de l'verkanto.

A. GRABOWSKI.

14 Rimarkoj de la Prezidanto

La tiama prezidanto de la Akademio, Émil Boirac aldonis jenajn rimarkojn al tiu respondo:

Komunikante al la Esperanta publiko tiujn interesajn dokumentojn, mi permesas al mi aldoni la jenajn rimarkojn.

El la reguloj kaj klarigoj donitaj ĉi supre, oni povas tiri la konkludon, ke la principa kaj esenca formo de la posedaj adjektivoj estas la formo, kiun mi volonte proponus

nomi « rekta formo », t. e. « lia, ŝia, ĝia, ilia », kaj ke la formo resenda aŭ refleksiva « sia » estas nur flankaj kaj akcesoraj formoj, difinitaj por anstataŭi la rektan en certaj okazoj, t. e. ĉiujfoje, kiam la posedanto estas subjekto de la frazo (aŭ pli-ĝustadire, de la propozicio mem en kiu troviĝas la posedato).

Sekve, estus bone, laŭ mia opinio, se la verkistoj de lernolibroj instruus antaŭ ĉio la komencantojn pri la uzado de la rekta formo, « lia, ŝia, ĝia, ilia » kaj eĉ silentus en la unuaj lecionoj pri la ekzisto de la resenda formo, tiamaniere, ke la lernantoj ne kutimiĝu konsideri la ambaŭ formojn kiel egalajn, sed ili komprenu, ke la resenda estas kvazaŭ escepta, rilate al la rekta.

Estus bone ankaŭ, se en lernolibroj, oni starigu kiel praktikan regulon, la jenan konsilon : En okazo de dubo, ĉiam uzu la rektan formon, t. e. « lia, ŝia, ĝia, ilia », prefere ol la resendan « sia ». Kiu uzas la rektan, kiam la resenda estus pli taŭga, tiu faras negravan eraron; sed estas grava kulpo uzi la resendan, kiam ĝi ne estas nepre bezonata.

E. BOIRAC.

15 Rekomendo de la Akademio pri la refleksivo (1971)

En 1971 la Akademio denove okupiĝis pri la refleksivo kaj publikigis jenan tekston:

En Majo 1971, sekve de raporto de la Direktoro pri la Gramatika Sekcio, D.B. Gregor, la Akademio, post zorga esplorado de la demando, oficialigis unuanime jenan regulon pri la refleksivaj pronomoj kaj adjektivoj; ĝi esperas per tio pozitive kontribui al pli granda unueco de la uzado.

Regulo

I. La refleksivaj pronomoj (serio “si/sia”) rilatas nur la 3-an personon kaj resendatas al la plej proksima subjekto, aŭ singulara aŭ plurala. Tiu subjekto ne ĉiam koincidas kun la gramatika subjekto de la tuta frazo, ĉar novan subjekton povas enkonduki (1) infinitivo, (2) a-finaĵa participo kaj (3) substantivo de verba deveno, kiam ĝi klare esprimas agon.

II. Ifoje la vera subjekto lasas sin vidi per enmeto de la vortoj “kiu(j) est-” ekz-e ĉe apozicioj adjektivaj aŭ substantivaj provizitaj per komplemento (ekz-e: “kastelo fama pro sia historio” — sed “li ekvidis sian fraton Benjaminon, la filon de lia patrino” t.e. Benjaminon, kiu estis la filo de lia patrino).

III. Ekzistas tradicie sankciitaj vortkunmetoj kaj frazeroj, en kiuj la refleksivo funkcias absolute, sen rilato al la agsubjekto, ekz-e “siatempo” ktp.

IV. Nekonformiĝo en iaj okazoj, se el tio rezultas pli granda klareco, estas tolerata.

Gvidaj Ekzemploj

I. Vi lavas vin kaj li lavas sin.

Ĉiuj homoj akiras por si.

Ŝi estas amata por si, ne por la doto.

Ŝia propra patrino forpelis ŝin de si.

Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem.

Mia patrino plendas, ke ŝiaj filinoj faras ĉion por si, nenion por ŝi.

Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro.

La infanoj serĉis sian patrinon.

Ŝi estas amata de siaj instruistinoj.

Li promenis kun sia edzino; li kaj lia edzino promenis.

Ili kondukis la kolegojn en sian loĝejon anstataŭ iri kun ili en ilian.

La patrino diras, ke ŝia filino venos kun sia infano.

(1) La sinjoro ordonis al la servisto vesti lin por la ceremonio.

La sinjoro ordonis al la servisto vesti sin pli dece.

La mizero kutimigis lin levi sin el la lito tre frue.

Jozefo ordonis al siaj servistoj balzami lian patron.

Li invitis la pentriston alporti unu el siaj pentraĵoj.

La reĝo, konsultinte kun la ĉefministro, sendis voki sian kuraciston.

(2) Ŝi ekvidis viron staranta antaŭ ŝi.

Ŝi ekvidis starantan viron antaŭ si.

Li sidiĝis sur la seĝo prezentita al li.

Li portis seĝeton refalditan sur si mem.

Li estos kiel arbo donanta sian frukton en sia tempo.

Li rekompencis la soldatojn batalintajn por lia savo.

La pastro sentis la pekulon tuŝita de liaj admonoj.

La juĝisto opiniis la atestanton influata de siaj antaŭjuĝoj.

(3) Marta admiris lian fidon al ŝi (al M.).

Marta admiris lian fidon al si.

Ŝi kompleze aŭdis la flatadon de ŝiaj amindumantoj.

Ŝi ribelis kontraŭ la interveno de edzo en ŝiajn aferojn.

Ŝi zorge observis la enportadon de siaj kofroj.

II. Li evitu la trinkaĵojn por li tro acidajn.

Ĉiu konas homojn nur por si indulgajn.

Picasso vizitis muzeon, faman pro liaj pentraĵoj.

Ili vizitis la muzeon faman pro siaj pentraĵoj.

III. Moki ies fidon al si mem.

Oni komprenis liajn gestojn per si mem.

Ni ne povas koni la realon en si mem.

Metu ĉion en sian lokon.

En ĉiu kranio estas sia opinio.*

16 Reagojn al tiu Rekomendo 1971 la tiama prezidanto *Gaston Waringhien* resumis en la sekvanta *neoficiala* letero, publikigita en Aktoj II, p. 67 (Parto Neoficiala).

Pri la uzo de la refleksivoj

Post kiam la Akademio oficialigis kaj publikigis la regulon pri la refleksivoj, venis al mi kelkaj leteroj, demandantaj pri tiu aŭ alia detala punkto.

La uzo de la refleksivo estas kompleksa afero, kaj eble tial ĝi neniam estis ĝis nun formulita en regulo; ĝi postulas de la uzanto apartan decidon en ĉiu okazo, nome

ĉu la efikanta radiko havas la karakteron de ago kaj kiu estas la (gramatika) subjekto de tiu ago. La decidoj povas varii laŭ la speco de la radiko, laŭ la kunteksto kaj fine laŭ intenco aŭ lingvokutimoj de la uzanto. Tio klarigas, kial la Akademio provis ja difini la gvidliniojn de la uzado, sed respekti samtempe la liberecon de interpretado pri dubaj okazoj.

Praktike, la plimulto el la Akademianoj opinias:

1) ke oni devas konsideri la subjekton de infinitivo, participo aŭ substantivo nur, se ĝi estas esprimita. Tion klarigas la ekzemplo sub 1(1): "La reĝo sendis voki sian kuraciston" (same estus pri la samvaloraj "La reĝo venigis sian kuraciston" aŭ "la abatino lernigis al ŝi ŝian novican preĝon").

2) ke la deverbaj substantivoj montrantaj personojn ne estas konsiderendaj por la uzo aŭ neuzo de la refleksivo; "servanto" estas traktenda kiel "sklavo", "instruisto" kiel "profesoro", aŭ "flatulo" kiel "kortegano".

3) ke la ceteraj deverbaj substantivoj ofte povas montri egale aŭ la agon aŭ rezulton de la ago, tiel ke la decidon devas fari la intenco de la uzanto. La du lastaj ekzemploj sub 1(3) ilustras la unuan eblon, ĉar ĝi estas ĝis nun la pli ofte renkontata: "ŝi kompleze aŭdis la flatadon de ŝiaj amindumantoj" kaj "ŝi ribelis kontraŭ la interveno de (la) edzo en ŝiajn aferojn". Sed en ambaŭ frazoj, se oni komprenus "flatado" kvazaŭ "komplimento" kaj "intervenon" kvazaŭ "enketo" aŭ "operacio", oni tute bone povus uzi "sia".

Pri la substantiva predikativo estas ankoraŭ tro frue por difini la uzadon, kiu hezitas inter la Zamenhofa "La Eternulo bonvolis fari vin Lia popolo" kaj la pli moderna "La reĝo faris lin sia ministro". Estas cetere facile eviti la heziton, skribante: "La reĝo faris el li sian ministron".

La Prezidanto,
G. Waringhien.
Aprilo 1971.

5. „ci“, „cia“ (FE 16.2)

Literaturo (selekto): **Arco**, M. (1923). Pledo por "ci". En: Literatura Mondo vol. II. 1923, p. 160 ('En lingvo e-a preskaŭ ne ekzistas intima formo de pronomo. Ĉi tiu manko kaŭzas vere ian ĝenon. Ĉu, ekz., patrino parolu al sia infaneto - "Vi"? ...' Kun reago de **Kopar**: '.. ci al mit tute ne faras impreson de intimeco, dorloto aŭ karesemo, sed mi aŭdas en ĝi fremdan, malagrablan siblon, kvazazaŭ insulton...'). - Reago de **Hammer**, H.; **Anner**, S. (1923). En: Literatura Mondo vol. II. 1923, p. 248. - **Mazzolini**, A. (1925). Du vortoj je defendo por du etaj, senkulpaj akuzitoj. En: Itala Esperanto-Revuo 1925:12:11, p. 176 (defendas "ci"). - **Bauman**, John E. (1933). Vortaraj aferoj. En: Lingva Kritiko 1933:1:14 (Mar.), p. [3-4] (Ne uzu ci / vi en la senco de germana Du / Sie, franca tu / vous, k.t.p., ankaŭ Z ne faris). - **Faulhaber**, F. (1961). Ĉu "ci" aŭ "vi"? En: Nuntempa Bulgario 1961:5:6, p. 42-43. **Balkanyi**, P. (1966). Ĉu mankas "ci"? En: HdE 1966:3, p. 2 («ci» povas esti uzata kiel nuancigilo). - **Papp**, K. (1966). "Vi" kaj "ci". En HdE 1966:14, p.4 ("Ci" jam perdita; proponas "tu"). - **Dratwer**, I. (1967). Superflua bru'! En: HdE 1967:2, p. 3 (Resp. al Papp: «tu» nedezirinda, rompas la pronoman simetron). - **Gabalda-Lanteigne** (1983). "ci" fundamenta vorto. En: Laŭte! 1983:1-2. - **Golden**, Bernard (1983). La historio de la pronomo *ci* en Esperanto. En: Brita E-isto 1983:79:852-853 (Maj-Aŭg.), p. 233-234. **Golden**, Bernard (1984). La sociologia bazo de la uzo de 'ci'. En: Brita E-isto 1984:80, p. 365-367. - **PAG** (1985) 45 R (mallonga noto „oni trovas ĝin kelkfoje en poezio“). - **Golden**, Bernard (1987). Faktoj pri la neuzado de 'ci'. En: Boletino de HEF 1987:39:280 (Maj-Jun.), p. 4-6. Kp. samtitole en Gazeto 1987:2:5, p. 20-22. - **Golden**, Bernard (1987). 'Ci' - la vorto kiu ne volas formalaperi. En: Dia Regno 1987:6, p. 2819-2820. 1987:7, p. 2825. - **Golden**,

Bernard (1988). Ĉu ciumi aŭ ne ciumi: Tiel staras nun la demando. En: Esperantisto Slovaka 1988:42:4, p. 12-13. - **Golden**, Bernard (1988). Hundoj, insultoj kaj la pronomo 'ci'. En: EspAkt 1988:7:8 (Dec.), p. 7-8. Vd. samtitole en Debrecena Bulteno 1995:86 (Feb.), p. 21 (n. 3643). - **Golden**, Bernard (1990). Refuto de pledado por la uzo de 'ci'. En: Boletín de HEF 1990:42:296 (Maj-Jul.), p. 9-10. - **Golden**, Bernard (1990). Ĉu Zamenhof pravis pri 'ci'? En: Nov-Zelanda Esperantisto 1990:501 (Nov.), p. 7-8. Kp. samtitole en Esperantisto Slovaka 1992:46:1, p. 7, 10 (n-ro 2743). - **Stanura**, Adolf (1992). Pri la pronomo "ci". En: Starto 1992:1 (148), p. 20. - **PMEG** (2013) 11.4.

a) Superrigardo

- 17** Malfavorata de Z, la pronomo **ci** – kvankam Fundamenta - neniam vere hejmiĝis en Esperanto. Ĉiuj provoj ĝeneraligi ĝian uzon restis sensukcesaj. Ĝia ĉefa malavantaĝo estas, ke pro la malofta uzado ne ekzistas ĝenerala interkonsento pri ĝia preciza signifo. Origine ĝi servis nur por distingi formalan, respektan *vi* singularan (*vi*, *sinjoro*) dis de singulara *vi* familiara, amika, intima, karesa (*vi*, kamarado) laŭ la modelo de pluraj lingvoj, ekz. germana (*Du*, *Sie*), franca (*tu*, *vous*), hispana (*tu*, *usted*), afrikansa (*iy*, *U*) k.t.p.
- 18** Provoj plilarĝigi la signifon kaj uzadon de *ci* kiel sinonimo por la singulara *vi*, ĉu formala aŭ intima, por distingi singularan de pluralan *vi* subfalas la regulojn pri **formo nova** en la senco de A 8.1, A 10.4, A 9.3 kaj art. 23 Statuto kaj do teorie povas esti enkondukita nur de la Akademio kun dutriona plimulto de la seĝoj. Tamen post 125 jaroj de senĝena uzo de *vi* en la singulara senco de „*vi*, *sinjoro*“ kaj la plurala de „*vi* ĉiuj“ praktike ne eblas motivigi la kondiĉon de „efektiva neceseco“ (A 9.3), ĉar de 1888 tiuaspekte nenio ŝanĝiĝis.
- 19** La demando pri *vi* / *ci* povas esti rigardata kiel ero de la temo „esprimo de ĝentileco“ en Esperanto. Aliaj aspektoj de tiu temo estas *vi* / *Vi* (uzo de majuskla skribo por indiki respekton, vd. R 0) kaj „-us pro mildeco“ (uzo de la us-formo anstataŭ la formoj je -as, -is, -os por indiki ĝentilecon, vd. R 6.2ĉ).

b) Historia evoluo

- 20** „*Ci*“ mankas en UL **1887** kaj – kun malrekomendo – estis enkondukita nur en DL **1888**. PMEG 2013 bone priskribas la nuntempan situacion. Aldone ni nur dokumentas la historian evoluon.
- 21** La Fundamento (UV kaj FE 16 – **1893**, **1894**) havas (vd. BK II):

ci - tu, toi, | thou | du | ты | ty [UV]. — **ci** - tu, toi, | thou | du | ты | ty [FE 16]. — Ci skribas (anstataŭ „ci“ oni uzas ordinare „vi“) [FE 16.2].

• **ci**'a - ton, ta | thy, thine | dein | твой | twój [UV]. — Cí-a [FE 2].

- 22** Pli detale estis DL **1888**:

Mi vin ne komprenas, sinjoro. — Vi estas tre obstina, mia amiko. — Vi ĉiuj estas tro fieraj. — „*Vi*“ ni diras egale al unu persono aŭ objekto kaj al multaj; tio ĉi estas farita pro oportuneco, ĉar, parolante kun iu, ni ofte ne scias, kiel diri al li: „*vi*“ aŭ „*ci*“ („*ci*“ signifas la duan personon de l' ununombro; sed tiu ĉi vorto estas trovata sole en la plena vortaro; en la lingvo mem ĝi preskaŭ neniam [de 1888: neniam] estas uzata) [DL 4.1-4].

DL 4.1-3 estas kaŝita kritiko de la kritikantoj de Z:

- Mi vin ne komprenas, sinjoro ... (ke vi tiel insistas pri **ci**).
- Vi estas tre obstina, mia amiko ... (pri tiu superflua **ci**).
- Vi ĉiuj estas tro fieraj ... (kritikante min pri ŝajna forgeso de **ci**).

- 23 En DL 17.49-50, do en la traduko de la fabelo „La Ombro“ de Andersen, Z montris, kiel oni povas traduki germanan (intiman) *Du* (ci) kaj (formalan) *Sie* (vi) sen uzo de „ci“. La „instruitulo“ proponas al sia iama ombro, ke "ni trinku nun fratecon, kaj ni estu pli familiara unu kun la dua", ĉar ili ja estas vojaĝ-kunuloj. Jen la germana versio, el kiu Z tradukis al Esperanto, kaj lia solvo de la tradukproblemo:

Germana „originalo“

[49] »Sie haben da etwas gesagt!« sagte der Schatten, der ja nun der eigentliche Herr war, »was sehr geradezu und wohl auch gutgemeint war; ich will ebenso geradezu und wohlmeinend sein. Sie, als gelehrter Mann, wissen zur Genüge, wie seltsam die Natur mitunter ist. Manche Menschen können es nicht vertragen, graues Papier zu berühren, sonst wird ihnen schlecht, anderen geht es durch und durch, wenn man einen Nagel gegen eine Glasscheibe knirschen läßt. Ich habe ebenso ein Gefühl, wenn Sie Du zu mir sagen. Ich fühle mich geradezu zu Boden und in meine frühere Stellung bei Ihnen zurückgedrückt. Sie sehen, das ist eine reine Gefühlssache, kein Stolz; ich kann es nicht zulassen, daß Sie Du zu mir sagen, aber ich will gerne zu Ihnen Du sagen, dann habe ich Ihnen wenigstens den halben Gefallen getan.«

[50] Seitdem sagte der Schatten Du zu seinem früheren Herrn.

Zamenhofa traduko al Esperanto

[49] "Vi esprimis vian personon", diris la ombro, kiu nun ja estis efektive la sinjoro; "vi parolis rekte el la koro kaj bonintence, tial mi ankaŭ parolos el la koro kaj egale bonintence. Vi, estante homo instruita, scias tre bone, kiel kaprisa estas la naturo. Multaj homoj ne povas tuŝeti malglatan paperon; aliaj per la tuta korpo ektemas, se oni gratas per karbo sur vitro; mi ricevas tian saman senton, se vi parolas al mi familiare [= cias min]; mi sentas min kiel alpremita al la tero, kiel mi estus ree en mia antaŭa dependeco de vi. Vi vidas, ke tio ĉi ne estas fiereco, sed sento. Mi ne povas permesi, ke vi parolu al mi familiare [= ciu min], mi mem tamen kun plezuro parolos kun vi senceremonie [= cios vin], kaj tiel mi almenaŭ duone plenumos vian deziron".

[50] Kaj de tiu tempo la ombro sinjore paroladis kun sia estinta sinjoro [= ciis lin].

La solvo de Z do estas adverba priskribo: *paroli familiare, senceremonie, sinjore*.

- 26 La vortaroj de Beaufront kaj Jürgensen (ambaŭ 1904) en kunlaboro kaj aprobitaj de Z havas jenajn samspecajn artikolojn:

ci, toi, tu. **diri ci**, tutoyer.
ci, du; **-a**, dein; **diri —**, duzen.

- 27 **LR 87 (1908)** denove klarigas la motivojn:

La neuzado de "ci" tute ne estas senkonscia imitado de la ekzistantaj lingvoj, - kontraŭe, ĝi estas specialaĵo de la lingvo Esperanto, specialaĵo bazita sur pure praktikaj konsideroj kaj esploroj. La plej bona maniero kompreneble estus, se ni al pli-ol-unu personoj dirus "vi" kaj al unu persono ĉiam "ci" sed ĉiuj nuntempaj kulturaj popoloj tiel al kutimiĝis al la ideo, ke "ci" enhavas en si ion senrespektan, ke ni neniam povus postuli de la Esperantistoj, ke ili al ĉiu unu persono diru "ci" ni devus sekve havi apartan pronomon de ĝentileco (kaj tia pronomo efektive ekzistis en Esperanto antaŭ la jaro 1878). Sed la praktiko de ĉiuj ekzistantaj lingvoj montris, ke tia "formo de ĝentileco" estas ofte tre embarasa, ĉar tre ofte ni ne scias, kiamaniere ni devas nin turni al tiu aŭ alia persono (ekzemple al infano k.t.p.): "ci" ŝajnas al ni eble ofenda, pronomo de ĝentileco ŝajnas al ni ridinde ceremonia. En tiaj okazoj oni en la ekzistantaj lingvoj uzas diversajn artifikojn, kiuj tamen tre ofte estas tre embarasaj, kiel por la parolanto, tiel por la aŭskultanto

(ekzemple anstataŭ “ci” kaj “vi” oni diras “li”, “oni”, “sinjoro”, “fraŭlo” k.t.p.). Por forigi ĉiujn ĉi tiujn embarasojn, ekzistas nur unu rimedo: diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur “vi”. Malkompreniĝon tio ĉi neniam povas kaŭzi, ĉar en la tre maloftaj okazoj de neklareco ni povas ja precizigi nian parolon, dirante “vi, *sinjoro*”, aŭ “vi *ĉiuj*”, “vi *ambaŭ*” k.t.p. Por la personoj, kiuj tre sentas la bezonon de “ci” (ekzemple kiam ili sin turnas al Dio aŭ al amata persono), la uzado de “vi” ŝajnas neagraba nur en la *unua tempo* (tiam ili ja havas la rajton uzi “ci”), sed post kelka praktiko oni tiel facile alkutimiĝas al la uzado de “vi”, ke ĝi perfekte kontentigas kaj oni trovas en ĝi absolute nenion “malvarman”. Ĉio dependas ja nur de la *kutimo*. [LR 87, Respondo 28, *La Revuo*, 1908, Februaro].

28 La difinvortaro de Kabe **1910** konfirmas:

Ci. Pronomo de la dua persono de la unumombro (famiara formo anstataŭ *vi*).

29 Simile PV **1934**:

1. Pronomo de la dua persono en ununombro, uzata por alparoli iun sencere-
monie. 2. Kelkfoje alparolante al Dio.

30 Samsence PIV **1970**:

***ci.** Pron[omo] de la dua persono singulara: *ci-diri al iu*. **Rim.:** Tiu pron. estas ordinare uzata nur en la [! forstreku mense la francecan artikolon] tradukoj, por aparta efekto. Z. klarigis la ĝenojn, kaŭzitajn de la uzado de ĝentila pronomo k konkludis: „por forigi ĉiujn ĉi tiujn embarasojn, ekzistas nur unu rimedo: diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur ‚vi‘ ... Ĉio dependas nur de la kutimo“ [do citaĵo el LR 87 de 1908, vd. supre].

31 PIV **2002** kaj senŝanĝe PIV **2005** bedaŭrinde fariĝis malpli klaraj pri tio, ke *ci* estas pronomo de la (nur) „dua persono singulara“, „uzata por alparoli iun sencere-
monie“. La nova vortumado tamen enhance nenion ŝanĝis:

***ci.** Pron. uzebla por nomi la alparolaton. **Rim.** Laŭ la konsilo de Z. («diri al ĉiu, ĉiuj k ĉio nur “vi”»), **ci** estas tre malofte uzata; ĝin kutime anstataŭas **vi**: *post paso de monato ŝanĝiĝis «Vi» per «ci»^{FZ}; mi tra feliĉa ploro diradas al vi: Ci!^U*. – [FZ = Feliks Zamenhof; U = E. Urbanová]

32 **Resume** oni povas konstati, ke de 1888 ekzistas antaŭ- kaj postfundamenta konsento, ke *ci* indikas nur senceremonian, intiman formon de la dua persono singulara, kiu ordinare estas esprimita per *vi*. Ĝenerala anstataŭigo de singulara *vi* per *ci*, estas kontraŭfundamenta, **malĝusta** Esperanto.

6. Pri la „vortoj kun senco pronoma“ (iu, kiu, tiu, ĉiu, neniu)

33 Pri la u-finaĵaj pronomoj vd. BK I ĉe FE 30.

H. § 6 [Verbo]

I. Gramatikoj

6. [1] Le **verbe** ne change ni pour les personnes, ni pour les nombres. Ex.: *mi far'as* — je fais, *la patr'o far'as* — le père fait, *ili far'as* — ils font.

6. [1] The verb does not change its form for numbers or persons, e. g. *mi far'as*, „I do”; *la patr'o far'as*, „the father does”; *ili far'as*, „they do”.

6. [1] Das *Zeitwort* hat weder Personen noch Mehrzahl; z. B. *mi far'as*, ich mache; *la patr'o far'as*, der Vater macht; *ili far'as*, sie machen.

6. [1] **Глаголь** по лицамъ и числамъ не измѣняется (наприм.: *mi far'as* я дѣлаю, *la patr'o far'as* отецъ дѣлаеть, *ili far'as* они дѣлають).

6. [1] **Słowo** nie odmienia się przez osoby i liczby. Np. *mi far'as* ja czynię, *la patr'o far'as* ojciec czyni, *ili far'as* oni czynią.

[2] Formes du verbe:

a) Le *présent* est caractérisé par *as*; ex.: *mi far'as* — je fais.

b) Le *passé*, par *is*: *vi far'is* — vous faisiez, vous avez fait.

c) Le *futur*, {est caractérisé} par *os*: *ili far'os* — ils feront.

ĉ) Le *conditionnel*, par *us*: *ŝi far'us* — elle ferait.

d) L'*impératif*, par *u*: *far'u* — fais, faites; *ni far'u* — faisons.

e) L'*infinitif*, par *i*: *far'i* — faire.

f) Le *participe présent actif*, par *ant*: *far'ant'a* — faisant, *far'ant'e* — en faisant.

g) Le *participe passé actif*, par *int*: *far'int'a* — ayant fait.

ĝ) Le *participe futur actif*, {est caractérisé} par *ont*: *far'ont'a* — devant faire, qui fera.

h) Le *participe présent passif*, {est caractérisé} par *at*: *far'at'a* — étant fait, qu'on fait.

ĥ) Le *participe passé passif*, {est caractérisé} par *it*: *far'it'a* - ayant été fait, qu'on a fait.

i) Le *participe futur passif*, {est caractérisé} par *ot*: *far'ot'a* — devant être fait, qu'on fera.

[2] Forms of the Verb:

a) The present tense ends in *as*, e. g. *mi far'as*, „I do”.

b) The past tense ends in *is*, e. g. *li far'is*, „he did”.

c) The future tense ends in *os*, e. g. *ili far'os*, „they will do”.

ĉ) The subjunctive mood ends in *us*, e. g. *ŝi far'us*, „she may do”.

d) The imperative mood ends in *u*, e. g. *ni far'u*, „let us do”.

e) The infinitive mood ends in *i*, e. g. *far'i*, „to do”.

There are two forms of the participle in the international language, the changeable or adjectival, and the unchangeable or adverbial.

f) The present participle active ends in *ant*, e. g. *far'ant'a*, „he who is doing”; *far'ant'e*, „doing”.

g) The past participle active ends in *int*, e. g. *far'int'a*, „he who has done”; *far'int'e*, „having done”.

ĝ) The future participle active ends in *ont*, e. g. *far'ont'a*, „he who will do”; *far'ont'e*, „about to do”.

h) The present participle passive ends in *at*, e. g. *far'at'e*, „being done”.

ĥ) The past participle passive ends in *it*, e. g. *far'it'a*, „that which has been done”; *far'it'e*, „having been done”.

- i) The future participle passive ends in *ot*, e. g. *far'ot'a*, „that which will be done”; *far'ot'e*, „about to be done”.

[2] **Formen des Zeitwortes:**

- a) Das Präsens endet auf *as*; z.B. *mi far'as*, ich mache.
b) Die vergangene Zeit — auf *is*; z.B. *li far'is*, er hat gemacht.
c) Das Futurum — auf *os*; z.B. *ili far'os*, sie werden machen.
ĉ) Der Konditionalis — auf *us*; z.B. *ŝi far'us*, sie würde machen.
d) Der Imperativ — auf *u*; z.B. *far'u*, mache, macht; *ni far'u*, lasset uns machen.
e) Der Infinitiv — auf *i*; z.B. *far'i*, machen.
f) Partizipium präsens aktivi — auf *ant*; z.B. *far'ant'a*, machender; *far'ant'e*, machend.
g) Partizipium perfekt aktivi — *int*; z.B. *far'int'a*, der gemacht hat.
ĝ) Partizipium futuri aktivi — *ont*; *far'ont'a*, der machen wird.
h) Partizipium präsens passivi — *at*; z.B. *far'at'a*, der gemacht wird.
ĥ) Partizipium perfekt passivi — *it*; z.B. *far'it'a*, gemacht.
i) Partizipium futuri passivi — *ot*; *far'ot'a*, der gemacht werden wird.

[2] **Формы глагола:**

- a) Настоящее время принимает окончание *as* (например: *mi far|as* я дѣлаю).
b) Прошедшее — *is* (*li far|is* онъ дѣлать).
c) Будущее — *os* (*ili far|os* они будутъ дѣлать).
ĉ) Условное наклонение — *us* (*ŝi far|us* она бы дѣлала).
d) Повелительное наклонение — *u* (*far|u* дѣлайте).
e) Неопределенное наклонение — *i* (*far|i* дѣлать).

Причастія (и дѣепричастія)

- f) Дѣйствит. залога настоящаго времени — *ant* (*far|ant|a* дѣлающій, *far|ant|e* дѣлая).
g) Дѣйствит. залога прошедш. времени — *int* (*far|int|a* сдѣлавшій).
ĝ) Дѣйствит. залога будущ. времени — *ont* (*far|ont|a* который сдѣлаетъ).
h) Страдат. залога настоящ. времени — *at* (*far|at|a* дѣлаемый).
ĥ) Страдат. залога прошедш. времени — *it* (*far|it|a* сдѣланный).
i) Страдат. залога будущ. времени — *ot* (*far|ot|a* имѣющій быть сдѣланнымъ).

[2] **Formy słowa:**

- a) Czas teraźniejszy ma zakończenie *as*. (Przykład: *mi far/as* ja czynię).
b) Czas przeszły — *is* (*li far/is* on czynił).
c) Czas przyszły — *os* (*ili far/os* oni będą czynili).
ĉ) Tryb warunkowy — *us* (*ŝi far/us* ona by czyniła).
d) Tryb rozkazujący — *u* (*far/u* czyń, czyńcie).
e) Tryb bezokoliczny — *i* (*far/i* czynić).

Imiesłowy (odmienne i nieodmienne):

- f) Imiesłów czynny czasu teraźniejszego — *ant* (*far/ant/a* czyniący, *far/ant/e* czyniąc).
g) Imiesłów czynny czasu przeszłego — *int* (*far/int/a* który uczynił).
ĝ) Imiesłów czynny czasu przyszłego — *ont* (*far/ont/a* który uczyni).
h) Imiesłów bierny czasu teraźn. — *at* (*far/at/a* czyniony).
ĥ) Imiesłów bierny czasu przeszłego — *it* (*far/it/a* uczyniony).
i) Imiesłów bierny czasu przyszłego — *ot* (*far/ot/a* mający być uczynionym).

[3] La voix passive n'est que la combinaison du verbe *est* (être) et du participe présent ou passé du verbe passif donné. [4] Le „de” ou le „par” du complément

indirect se rendent par *de*. [5] Ex.: *ŝi est'as am'at'a de ĉiu'j* — elle est aimée de tous (part. prés.: la chose se fait). *La pord'o est'as ferm'it'a* — la porte est fermée (part. pas.: la chose a été faite).

[3] All forms of the passive are rendered by the respective forms of the verb *est* (to be) and the participle passive of the required verb; [4] the preposition used is *de*, „by”. [5] E. g. *ŝi est'as am'at'a de ĉiu'j*, „she is loved by every one”.

[3] Alle Formen des Passivs werden mit Hilfe der entsprechenden Form des Wortes *est* (sein) und des Partizipium passivi des gegebenen Zeitwortes gebildet, [4] wobei die Präposition *de* gebraucht wird; [5] z. B. *ŝi est'as am'at'a de ĉiu'j*, sie wird von Allen geliebt.

[3] Всѣ формы страдательнаго залога образуются помощью соотвѣтственной формы глагола *est* (быть) и причастія страдательнаго залога даннаго глагола; [4] предлогъ при этомъ употребляется *de* [5] (**Примѣръ**: *ŝi est'as am'at'a de ĉiu'j* она любима всѣми).

[3] Wszystkie formy strony biernej tworzą się zapomocą odpowiedniej formy słowa *est* być i imiesłow biernego danego słowa; [4] używa się przytem przyimka *de* [5] (np. *ŝi est'as am'at'a de ĉiu'j* — ona kochana jest przez wszystkich).

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

6. [1] Das **Zeitwort** hat weder Personen noch Mehrzahl; z.B. *mi far'as*, ich mache; *la patr'o far'as*, der Vater macht; *ili far'as*, sie machen.

[2] Formen des Zeitwortes:

- a) Das Präsens endet auf *as*; z.B. *mi far'as*, ich mache.
- b) Die vergangene Zeit — auf *is*; z.B. *li far'is*, er hat gemacht.
- c) Das Futurum — auf *os*; z.B. *ili far'os*, sie werden machen.
- ĉ) Der Konditionalis — auf *us*; z.B. *ŝi far'us*, sie würde machen.
- d) Der Imperativ — auf *u*; z.B. *far'u*, mache, macht; *ni far'u*, lasset uns machen.
- e) Der Infinitiv — auf *i*; z.B. *far'i*, machen.
- f) Partizipium präsens aktivi — auf *ant*; z.B. *far'ant'a*, machender; *far'ant'e*, machend.
- g) Partizipium perfekt aktivi — *int*; z.B. *far'int'a*, der gemacht hat.
- ĝ) Partizipium futuri aktivi — *ont*; *far'ont'a*, der machen wird.
- h) Partizipium präsens passivi — *at*; z.B. *far'at'a*, der gemacht wird.
- ĥ) Partizipium perfekt passivi — *it*; z.B. *far'it'a*, gemacht.
- i) Partizipium futuri passivi — *ot*; *far'ot'a*, der gemacht werden wird.

[3] Alle Formen des Passivs werden mit Hilfe der entsprechenden Form des Wortes *est* (sein) und des Partizipium passivi des gegebenen Zeitwortes gebildet, [4] wobei die Präposition *de* gebraucht wird; [5] z.B. *ŝi est'as am'at'a de ĉiu'j*, sie wird von Allen geliebt.

Zamenhofa traduko de la Gramatiko 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

6) [1] La verbo ne estas ŝanĝata laŭ personoj nek nombroj. [2] **Formoj de la verbo**: la tempo estanta akceptas la finiĝon "-as"; la tempo estinta "-is"; la tempo estonta "-os"; la modo kondiĉa "-us"; la modo ordona "-u"; la modo sendifina "-i". **Participoj (kun senco adjektiva aŭ adverbaj)**: aktiva estanta "-ant"; aktiva estinta "-int"; aktiva estonta "-ont"; pasiva estanta "-at"; pasiva estinta "-it"; pasiva estonta "-ot". [3] Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo "esti" kaj participo pasiva de la bezonata verbo; [4] la prepozicio ĉe la pasivo estas "de".

II. Ekzercaro kaj Universala Vortaro

Vd. en la vortara parto, BK II ĉe la unuopaj elementoj –as, -is, -os, -us, -i, -ant, -int, -ont, -at, -it, -ot.

III. Komentoj

1. Superrigardo

- 1 Post artikolo, substantivo, adjektivo, numeraloj kaj pronomoj (R 1 – R 5), R 6 fiksas la ses bazajn formojn de la **verbo** (tempoj: -as, -is, -os; modoj: -us, -u, -i – R 6.2 a-e) kaj la ses participojn (aktivaj: -ant, -int –ont; pasivaj: -at, -it, -ot – R 6.2 f-i).
- 2 R 6 **ne** klarigas, kiu radiko („vorto“) estas verba aŭ ne, ekz. substantiva. Tio sekvas el aliaj normoj (vd. la komentojn al R 11).
- 3 R 6.4 preskribas, ke la **prepozicio** ĉe la pasivo estas „**de**“. Temas pri difino en la senco de R 14.1 kun R 8. Pri „fare de“ aŭ „far“ vd. malsupre.

a) Malsamaj tekstoj en la referenc-lingvoj

- 4 La **tekstoj** de R 6 estas **malsamaj** en la kvin referenc-lingvoj. En la **rusa** kaj **pola** versioj estas intermetita la titolo „participoj“ antaŭ R 6.2 f. La tradukoj al la **germana** estas diskutindaj: far'int'a, der gemacht hat (R 6.2 g - gemacht habend(er)!) kaj simile ĉe faronta, farata kaj farota (R 6.2 ĝ, h, i – „der ...“). La gramatikaj terminoj en la germana estas stranga miksaĵo inter latina kaj germana.
- 5 Sole la **franca** havas plian kontrastigan ekzemplon en R 6.4, kiu mankas en la aliaj lingvo-versioj. Ĝi estas **grava** argumento en la disputo pri –ata / -ita (vd. malsupre):
*„ŝi est'as am'at'a de ĉiu'j — elle est aimée de tous (part. prés.: la chose se fait).
La pord'o est'as ferm'it'a — la porte est fermée (part. pas.: la chose a été faite).“*

- 6 La neoficiala **Zamenhofa traduko** de 1903 ne redonas la originalan strukturon de R 6 kaj ellasas ĉiujn ekzemplojn. Ĝi redonas la intermetitajn titolon „Participoj (kun senco adjektiva aŭ adverba)“, troveblan nur en la rusa kaj pola, sed mankanta en la tri aliaj referenc-lingvoj.

b) R 6: Fermita listo de konjugaciaj formoj

- 7 La listo de konjugaciaj formoj en R 6 estas kompleta kaj finita. Novajn formojn rajtas aldoni nur „aŭtoritata centra institucio“. Zamenhof ekde 1887 neniam uzis aliajn konjugaciajn formojn, ol tiujn de la 6-a regulo. La praesperantan imperfektan formon finiĝantan per „-es“ li forigis el la lingvo, klare intencante, ke ĝi tute forestu el la lingvo kaj poste ne estu denove enkondukita per privata propono.⁹⁷
- 8 Kontraŭ tiu rezulto ne pledas la fakto, ke la artikolhavaj lingvoj franca, angla kaj germana en la titolo de R 6.2 parolas pri „Formoj de la verbo“, do malhavas la difinitan artikolon („La formoj de la verbo“), kiel oni trovas ĝin ĉe la numeraloj (R 4) kaj pronomoj (R 5). Tie la malmultaj elementoj estas ĉiuj unuope listigitaj, dum sama prezento-metodo ĉe R 6 nek eblas, nek havus sencon. Por listigi „la“ (do ĉiujn) formojn de la verbo, oni devus montri ĉiujn eblajn kombinojn, ekz. do mi mi faras, vi faras, li faras k.t.p., far'ant'a, far'ant'a'j, far'ant'a'j'n k.t.p., kiuj estas tamen montritaj nur post enkonduka „ekzemple“. La fakto, ke en R 6.2 mankas difinita artikolo, estas ŝuldata sole (kaj kohere) al la nur ekzempla listigo kontraste al la kompleta listigo en R 4 kaj R 5.

685

⁹⁷ Welger. Normesperantologiaj ekspertizetoj. 1999.

c) Kontraŭfundamentaj proponoj („-unt“, „-ut“)

Literaturo (selekto): **Wiener**, F.I. (1956). 'Se mi sciintus, ke vi venos ...'. En: Esperanto (UEA) 1956:49:06 (607), p. 98-99. - **Hajdu**, K. (1971). "Se vi tiam sciintus Eon ...". En: Esperanto (UEA) 1971:02, p. 33. - **Osmotherly**, E.K. (1974). "Devintus". En: Brita E-isto 1974:803, p. 280. – **PAG** 1985, § 99 Rim. III. – **Welger**, Helmut. Normesperantologiaj ekspertizetoj. 1999. **Cherpillod** 2012, p. 74.

- 9 Ĉar la listo de la participoj en R 6 estas kompleta, la proponitaj kondicionalaj participoj „-unt“ kaj „-ut“ estas kontraŭregula, malĝusta Esperanto.⁹⁸
- 10 Pri verboj vd. LR 108 k.s.

2. R 6.2 lit. ĉ (us)

a) Superrigardo

- 11 FE 19 (1893) priskribas la funkcion de la us-finaĵo en la franca, angla kaj germana per la latindevena *conditionnel*, *conditional*, *Konditionalis* (aŭ *Konjunktiv*) (vd. en BK II je „us“). Zamenhof uzas en sia neoficiala traduko de FG en FK 1903 la terminon „modo kondiĉa“, Göhl 1932 *Bedingungsform*, PAG 1985 „kondicionalo“ aŭ „fiktiva modo“, Cherpillod 2012 „fiktivo“, PMEG en 2013 la esprimon „imaga modo“.
- 12 La us-formo per si mem **ne** havas **tempan valoron**. Ĝi forte spegulas la rusan, sed tute ne la latinan kondicionalon (Cherpillod 2012, p. 44). Se necese oni indiku tempan valoron per adverbo: „mi ne farus la eraron, se li *antaŭe* dirus al mi la veron (aŭ se li estus dirinta al mi la veron)“ [FE 24.8].

b) Ĉu –us kiel ĝentila formo?

Literaturo (selekto): **Fructier** 1903, § 165 Rim. 3. **Aymonier**, Camille. Grammaire complète. Paris ¹1907, ²1908, ³1910, ⁴1918, § 236. **Velten** 1910, § 125⁹⁹. **Göhl** 1932, § 261. **PAG** 1985, § 116 b) 3. (p. 158). **PIV** 2005 je „-us“¹⁰⁰. **PMEG** 2013, § 26.4.

- 13 Laŭ ĉiuj supre nomitaj konsultverkoj, aperinta inter 1903 kaj 2013 la us-formo ankaŭ esprimas *ĝentilan* rimarkon aŭ demandon, peton aŭ deziron („-us pro mildeco“). Kvankam ĉiuj verkoj donas ekzemplo-frazojn, nur Aymonier 1907 donas fontindikon el Fundamento, Zamenhof aŭ la „bonaj aŭtoroj“. PAG nur *alludas* kialon por la „ĝentileca“ uzo: „oni prezentas peton kvazaŭ neefektiva“ kaj ilustras i.a. per la frazo „mi dezirus aĉeti tiujn gantojn“, la sama pri kiu Göhl komentas „prefere *deziras*“. Plej eksplicite estas Fructier 1903:

685

⁹⁸ Same Welger. Normesperantologiaj ekspertizetoj. 1999. Ankaŭ, eĉ se ne tiel klare PAG 99.3: „oni sporade renkontas“, sed „Ĉefaj tempoj ekzistas nur ĉe du manieroj: indikativo kaj participo; ĉe la tri aliaj manieroj oni havas nur po unu simplan tempon (kapti, kaptu, kaptus). Tiujn manierojn do oni povus rigardi kvazaŭ resumaj por ĉiuj tri manieroj kaj uzi ilin indiferente por prezenco, preterito kaj futuro.“ Detalojn vd. PAG 111. Cherpillod 2012, p. 74 nur konstatas je **unt**: „Malofte uzata sufikso de aktiva kondicionala participo (= kiu -us) [sekvas ekzemploj]“, sen iu ajn diskuto pri laŭfundamenteco.

⁹⁹ La paragrafo tekstas: „§ 125. Will man seinen Gedanken oder Äußerungen eine verbindliche, höfliche Form geben, so kann man auch im Hauptsatz die Bedingungsform gebrauchen. Z.B.: Ich würde das nicht ohne weiteres behaupten. Mi tion ne pretendus senplue.“ – Nia traduko: „Se oni volas esprimi siajn pensojn aŭ diraĵojn en afabla, ĝentila formo, oni povas uzi la kondiĉan formon [us-formon] ankaŭ en la ĉefa frazo. Ekz.: Mi tion ne pretendus senplue.“

¹⁰⁰ „Ĉu mi povus ricevi iom da pano (ĝentila peto)“.

3. Oni iafaje uzas kondicionalon eĉ kiam afero estas reala, por montri (pro ĝentileco aŭ alia kaŭzo) malpli da forton en la senco. En tia okazo (...) oni alpensas alian frazon kondiĉan. E[kz].: »Mi ne volus tion fari« (se tio okazus). — »Mi estus feliĉa ricevi vian verkon« (se vi havus afablecon ĝin sendi al mi...).

Post 1903 neniu diskuto plu estis trovita. Okulfrapas, ke la donitaj ekzemploj dum la jardekoj estas tre similaj – indico, ke posta aŭtoro simple senkritike kopiis la informon el pli frua verko. Malpli detalaj gramatikoj kiel Seppik 1937 aŭ Willkommen 2001 eĉ ne mencias la apartan us-uzon.

14 Laŭ Aymonier 1907 estas du ekzemploj de „-us pro mildeco“ („*une opinion, sous une forme atténuée et discrète*“) en la **Fundamento**, ambaŭ en la traduko (elfrancigo) de la „La Feino“:

- FE 17.10: „... *ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon?* — La frazo ne estas sendube unusenca. Ĝi estas interpretebla kiel „ĝentila peto“, sed pro la sube nomitaj kialoj pli konvinke kiel „kondiĉa“ esprimo en strikta senco (la patrino klopodas konvinki la duan filinon ankaŭ iri al la puto kaj pro tio klopodas veki ŝian imagon, deziron).
- FE 19.1: „*Estus tre bele, ke mi iru al la fonto!*“ — La originala franca teksto estas „*Il me ferait beau voir, répondit la brutale, aller à la fontaine.*“, dum Aymonier libere retradukas al „*Il serait vraiment joli que j'aille à la fontaine*“. La interpreto, ke -us esprimas en milda formo ŝian opinion, estas duba. La filino ne volas iri. Ŝi imagas la situacion, ke ŝi kontraŭvole tamen iros al la fonto kaj esprimas sian malŝaton dirante (ironie) la malon de sia vera opinio „estus tre bele“ (= estos malbele; mi ne volas).

„Ĝentila -us“ estas **eksterfundamenta**, t.e. ĝi ne trovis eksplicitan konfirmon en la tekstaro esence finverkita jam en 1893 (sendo de FE al la cenzurejo).

15 Ĝi ŝajne ankaŭ ne estas **Zamenhofa**. Per la (filologie ne kritika kaj pro tio science ne fidinda) Tekstaro troveblas jena trafo en la „Revizoro“ (trad. 1907), akto kvara, sceno dekdua:

Ĥlestakov. — Sed viaj lipetoj, sinjorino, estas pli bonaj ol ĉiu vetero.

Marja Antonovna. — Vi ĉiam parolas ion tian ... Mi petus vin, ke vi pli bone skribu al mi pro memoro iajn versojn en la albumon. Vi kredeble scias multe da ili.

Ĉu ĝi estas vere Zamenhofa aŭ ĉu okazis iu posta ŝanĝo „as“ → „us“ ne estas konstatebla (pri gradoj de zamenhofeco vd. la Kvinan Libron). Ĉiukaze tiaj uzoj ĉe Z estas tre maloftaj.

16 Fakte temas pri (tre malnova) kalkeo (paŭsaĵo) de okcident-eŭropaj kutimoj pri „ĝentila“ esprim-maniero, trovebla i.a. en la angla, germana, franca, itala, hispana kaj probable pliaj samregionaj lingvoj.

17 **Kontraŭ** ili staras jenaj konsideroj: **1.** La uzo de la verbformoj en Esperanto estas relative *rigida*. Fakta estonta agado - ekzemple - estu markita per -os, eĉ se la kunteksto jam klarigas („morgaŭ mi iros [ne: iras] al kinejo“¹⁰¹). **2.** La distingo inter realo (-as, -is, -os) kaj nerealo, deziro, hipotezo (-us) estas tre baza kaj grava por kompreno. Ĝentilec-cela uzo de -us nebuligas tiujn fundamentajn kategoriojn („modojn“), kaŭzas malpli da *klareco* kaj pro tio disput-eblecoj (kp. supre FE 17.10: ĉu „kondiĉa“ esprimo en strikta senco aŭ „ĝentila peto“?). **3.** Pri aliaj aspektoj de ĝentila vortumado la F-to kaj Z estas retiremaj. Z klare pledis kontraŭ distingo inter familia, kamera *ci* kontraste al formala *vi* malgraŭ germana *Du / Sie*, franca

685

¹⁰¹ Kontraste en ekz. la germana oni tiufraze kutime uzadas la as-formon: „Morgen gehe ich ins Kino“ (nur tre formale kaj escepte: „Morgen werde ich ins Kino gehen“).

tu / vous, hispana *tu / Usted* k.t.p. En la traduko de „La Ombro“ en la Dua Libro 1888 § 17 li esprimis la ideon de ciado per atributoj („alparoli sinjore“ – „senceremonie“) kaj tute evitis uzon de *ci*. Majusklan *Vi* kiel esprimo de ĝentileco li uzis nur komenc-tempe, sed poste rezignis pri tiu uzo favore al la ĝenerala minuskla *vi* (pri ambaŭ punktoj vd. la komentojn ĉe R 5). 4. Por „-us pro mildeco“ ne ekzistas „efektiva neceseco“ en la senco de A 9. Simile kiel la solvo de Z en la demando pri *ci* aŭ *vi*, ankaŭ facile eblas eviti „promildecan –us“ per priskribaj atributoj:

- mi petus, ke vi sendu al mi ekzempleron → mi ĝentile / afable petas, ke vi sendu / ĉu vi havos la afablecon sendi al mi ... / ĉu mi rajtas peti vian afablan subtenon havigi ekzempleron al mi? – k.m.a.

Aliaj tiaj „mildigaj“ formoj povas esti ekzemple: „ĝentile“, „afable“, „humile“, „purkore“, „kun ĉiu respekto“, „(plen-)admire“, „mi petas“ („ĉu vi bonvolas doni al mi la sukeron, mi petas“) k.m.a.

- 18 La fona ideo de Z pri aliaj formoj de ĝentileco (*ci / vi*, *Vi /vi*) daŭre ŝajnas ĝusta. En internacia lingvo kunpuŝiĝas plej diversaj sentoj, kutimoj kaj tradicioj pri tio, kio estas „ĝentila“, „sobra“, „formala“, „malĝentila“. Por lingvo internacia, uzo de –us anstataŭ –as ŝajnas tro subtila, tro neklara, tro konfuziga esprimilo. Aldoniĝas, ke de la komenco de la 20a jc. ĝis la nuntempo la kutimoj pri formala ĝentileco en la okcident-eŭropaj referenc-lingvoj mem multe ŝanĝiĝis (malpli formaliĝis) kaj ke Esperanto intertempe forte internaciĝis al kulturoj kun aliaj ideoj pri „ĝentileco“ ol la okcident-eŭropaj.
- 19 La sendebata unueca uzo de „-us pro mildeco“ de Fructier 1903 ĝis la nuntempo tamen estas forta indico, ke ekzistas kaj antaŭfundamenta kaj (ankoraŭ) postfundamenta „silenta“ interkonsento, ke tia uzo estas „ĝusta Esperanto“. La formala klarigo de Fructier 1903 (ellasita kondiĉa frazo) konvinkas, malgraŭ la nomitaj skrupuloj koncerne la principon de klareco kaj la efektivan necesecon.
- 20 **Rezulte**, uzo de –us pro „ĝentileco“ (daŭre) estas **ĝusta**, eĉ se eksterfundamenta Esperanto, tamen **stile malbona** kaj laŭeble **evitinda**.

3. R 6.2 lit. f (ant)

- 21 Vd. en BK II je „ant“.

4. R 6.2 lit. g (int)

- 22 Vd. en BK II je „int“.

5. R 6.2 lit. ĝ (ont)

- 23 Vd. en BK II je „ont“.

6. R 6.2 lit. h-ĥ: La ata/ita-disputo („aspektismo“ – „tempismo“)

Literaturo (selekto): Studoj: Schwartz, Raymond. Kompletanta inventaro de la pasivaj participoj en „La Rabistoj“. En: Aktoj II 58-67 (1968-1974). – Similaj esploroj ekzistas pri la Zamenhofaj tradukoj de „Fabeloj de Andersen“ (Wilhelm Wingen), „La Rabeno de Baĥaraĥ“ kaj „Ifigenio“.

Itismo: Hoog, H[endrik] A[rie] de (red.). La Zamenhofa Esperanto. **Simpozio** pri -ata/-ita. La Laguna: Régulo 1961. - **Schwartz**, Raymond. Ne kiel Meier! Invito al revizio de niaj konceptoj pri la konjugacio en Esperanto. Paris: Unuiĝo Franca por

Esperanto s.j. [1962 aŭ poste¹⁰²; repr. Iltis 1995]. - **Kalocsay**, K. Vojaĝo inter la tempoj. La Laguna: Régulo 1966.

Atismo: **Setälä**, Vilho; **Vilborg**, Ebbe; **Stöp-Bowitz**, C. Esperanto - moderna lingvo. Studo baze de la "Fundamento". Helsinki : Fondumo Esperanto 1965. **Jung**, Teo. La Esperanta konjugacio - kun pli ol 1000 ekzemploj plejparte Zamenhofaj kaj kun abundaj klarigoj kaj konsiloj precipe pri la kunmetitaj verboformoj. Scheveningen 1965-1966. - **Mimó** Espinalt, L. Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto. Sabadell 1973. - **Reiersöl**, O. Participoj kaj konjugaciaj formoj en Esperanto. Nötteröy, propra eldono, 1980. - [**Ŝulco**, Rikardo; **Bermano**, Hermano] Komplementa Volumo al: Ludoviko Mimoo Espinalto. Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto. Paderborno: Esperanto-Centro 1989. - **Reiersöl**, O. Aspektismaj reguloj pri la uzo de verbaj formoj en Esperanto. Nötteröy, propra eldono, 1990.

La „modernan“ diskuton ekis artikoloj en la esperantologia publikaĵo „Lingva Kritiko“ en 1932, vd. T.J. [= **Jung**, Teo] (1932). La 'problemo' ata-ita. En: Lingva Kritiko 1a jaro 1932, n. 5 (Jun.), p. [1-2] (atista) kaj rebato (itista) **Waringhien**, G[aston] (1932). Letero al Teo Jung pri la pasivaj participoj. En: Lingva Kritiko 1a jaro 1932, n. 9/10 (Okt.), p. [6-7]. Pliajn kontribuojn vd. en Elektronika Bibliografio de Esperantaj Artikoloj (EBEA, serĉu je „ata-ita“ kaj „pasivaj participoj“), konsultebla je <http://www.esperantoland.org/ebea>.

Nuntempa: **Brosch**, Cyril. Kelkaj pensoj pri la esperanta verbosistemo (la ĉiama *ata/ita*). En: Lingva Kritiko [retejo¹⁰³]. 2014-01-03.

a) Superrigardo

- 24 La eble plej konata, longedaŭra kaj akra disputo gramatika de Esperanto estas tiu pri la preciza signifo de R 6.2 h kontraste al R 6.2 ĥ, nome farata – farita, amata – amita, fermata – fermita k.t.p. La disputo estas konata sub pluraj frapvortoj. Kvankam malprecizaj, la plej konataj estas **atismo – itismo** aŭ sinonime **tempismo – aspektismo**.¹⁰⁴ La kontribuoj kaj argumentoj de la kontraŭaj tendencoj (kaj de „kompromisaj“ opinioj) plenigas plurajn cent paĝojn, verkitajn dum preskaŭ 80 jaroj. Malgraŭ tiu abundo, ambaŭ pozicioj nur malofte (se entute) sisteme referencis al la Fundamentaj tekstoj, eĉ se ili estas favoraj por la propra opinio.¹⁰⁵ Nek estas tasko, nek intenco de tiu ĉi komentario detale reskizi la disputon. Ni limigos nin redoni la oficialajn tekstojn pri la temo.
- 25 En 1967 kaj denove en 1989, la Akademio decidis favore al aspektismo (itismo). Por kompreni la esencon de la malsamaj interpretoj de la formoj je –at kaj –it vd. la ekzemplojn donitajn de la Akademio je 1967-11-25, cit. malsupre.

b) § 6 FG

aa) FG 6.2

h) Le *participe présent passif*, {est caractérisé} par *at: far'at'a* — étant fait, qu'on fait.

685

¹⁰² Vd. p. 47, kiu referencas al la Franca Esperanto-Kongreso de Aprilo 1962.

¹⁰³ <http://lingvakritiko.com/2014/01/03/kelkaj-pensoj-pri-la-esperanta-verbosistemo-la-chiama-ata-ita/>.

¹⁰⁴ Detalojn pri la diversaj nomoj de la disputo vd. Kalocsay 1966, p. 10-11.

¹⁰⁵ Tipa ekzemplo estas Schwartz ĉ. 1962, kiu abunde referencas al la eksterfundamentaj kriterioj „Logiko kaj Simpleco“, sed eĉ ne al la franca teksto de FG, kiu subtenas lian aspektisman starpunkton (!). Same Ŝulco 1989, § 144 („Ĉiuj argumentoj kontraŭ la ‚itismo““) neniel referencas al la oficialaj tekstoj. Mimó 1973, § 127 ja citas R 6, tamen nur en la neoficiala traduko de Z el 1903, do sen la ekzemploj.

h) Le *participe passé passif*, {est caractérisé} par *it*: *far'it'a* - ayant été fait, qu'on a fait.

h) The present participle passive ends in *at*, e. g. *far'at'e*, „being done”.

h) The past participle passive ends in *it*, e. g. *far'it'a*, „that which has been done”; *far'it'e*, „having been done”.

h) Partizipium präsens passivi — *at*; z.B. *far'at'a*, der gemacht wird.

h) Partizipium perfekt passivi — *it*; z.B. *far'it'a*, gemacht.

h) Страдат. залога настоящ. времени — *at* (*far|at|a дѣлаемый*).

h) Страдат. залога прошедш. времени — *it* (*far|it|a сдѣланный*).

h) Imiesłów bierny czasu teraźn. — *at* (*far/at/a czyniony*).

h) Imiesłów bierny czasu przeszłego — *it* (*far/it/a uczyniony*).

- 26 France:** -at: „kion oni faras“, -it: „kion oni faris“. Ankaŭ en la **angla** kaj **germana** tekstoj troveblas la sama kontrasto inter la tradukoj de -at (being done/der gemacht wird) kaj de -it (having been done/gemacht – kaj ne: der gemacht wurde!). En la **ruslingva** Gramatiko Zamenhof tradukis ‘farata’ per la rusa дѣлаемый (delaemyj), kio signifas, ke la ago estas en stato de disvolviĝo. Por ‘farita’ Zamenhof havis je dispono du pasintajn participojn en la rusa: ‘delannyj’ kaj ‘sdelannyj’. La unua – ‘delannyj’ – indikas nefinitan, nekompletigitan pasivan agon en la pasinteco, do disvolviĝon de la ago mem en la pasinteco. La dua – ‘sdelannyj’ – signifas, ke la ago komplete plenumiĝis. Kompreneble, pro la plenumiteco, la ago mem estas necese ‘pasinta’, kaj tial en la Fundamento, same kiel en la rusa, tiu participo estas nomata ‘pasinta’. Zamenhof perfekte sciis la rusan. Pro tio ne povas esti dubo, ke lia elekto por ‘sdelannyj’ estas konscia. Per tio li klare difinis la signifon de la pasiva pasinta participo kiel agon, kiu kompletiĝis¹⁰⁶. La **pola** formo *czyniony* estas derivaĵo de la imperfekta verbradiko. Ĝi estas interpretata kiel participo aŭ formo indikanta ripeton (ĉiam denove farata). La formo *uczyniony* estas derivaĵo de la perfekto kaj indikas unufojan, finitan agadon (farita).

bb) FG 6.3 kaj FG 6.5

- 27** [3] La voix passive n’est que la combinaison du verbe *est* (être) et du participe présent ou passé du verbe passif donné. [4] ... [5] Ex.: *ŝi est’as am’at’a de ĉiu’j* — elle est aimée de tous (part. prés.: la chose se fait). *La pord’o est’as ferm’it’a* — la porte est fermée (part. pas.: la chose a été faite).

[3] All forms of the passive are rendered by the respective forms of the verb *est* (to be) and the participle passive of the required verb; [4] ... [5] E. g. *ŝi est’as am’at’a de ĉiu’j*, „she is loved by every one”.

[3] Alle Formen des Passivs werden mit Hilfe der entsprechenden Form des Wortes *est* (sein) und des Partizipium passivi des gegebenen Zeitwortes gebildet, [4] ...; [5] z.B. *ŝi est’as am’at’a de ĉiu’j*, sie wird von Allen geliebt.

[3] Всѣ формы страдательнаго залога образуются помощью соотвѣтственной формы глагола *est* (быть) и причастія страдательнаго залога даннаго глагола; [4] ... [5] (**Примѣръ**: *ŝi est|as am|at|a de ĉiu|j* она любима всѣми).

[3] Wszystkie formy strony biernej tworzą się zapomocą odpowiedniej formy słowa *est* być i imiesłow biernego danego słowa; [4] ... [5] (np. *ŝi est/as am/at/a de ĉiu/j* — ona kochana jest przez wszystkich).

¹⁰⁶ Klarigo de Lapenna, cit. en Waringhien, Enketo ... 1965, Aktoj I, pn. [3].

c) Aliaj partoj de la Fundamento

aa) FG 6.2 h) - Formoj kun –at'

28 at' - marque le participe présent passif | ending of pres. part. pass. in verbs | bezeichnet das Participium praes. passivi | означает причастие настоящего времени страдат. залога | oznacza imiesłów bierny czasu teraźniejszego. — **at'** - marque le participe présent passif | ending of pres. part. pass. in verbs | bezeichnet das Participium praes. passivi | означает причастие настоящего времени страд. залога | oznacza imiesłów bierny czasu teraźniejszego [FE 22]. — [UL].

- **aĉetata** — Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi [FE 25.4].
- **adresato** — ... ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro [A 7.1].
- **altrudata** — ... tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj [A 7.1].
- **amata** — *ŝi est[as am]at[a de ĉiuj]* [FG 6.5] {vd. supre}. — Aŭgusto estas mia plej amata filo [FE 22.11]. Mi estas amata. Mi estis amata. Mi estos amata. Mi estus amata. Estu amata. Esti amata [FE 25.1].
- **aprobata** — ... por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, ..., de la vortoj kaj reguloj rekomendataj private, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobataj [A 5.4].
- **batato** — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22.3].
- **dividata** — Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, tiel ekzemple la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enkonduko 2].
- **far'at'a** - étant fait, qu'on fait | der gemacht wird | дѣлаемый | czyniony [FG 6h].
- **far'at'e** - „being done” [FG 6.2 h].
- **havata** — Mono havata estas pli grava ol havita [FE 22.12].
- **konata** — ... por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, ..., de la vortoj kaj reguloj rekomendataj private, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobataj [A 5.4].
- **konstruata** — Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita [FE 25.6]. Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn [FE 25.10].
- **kreata** — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; ... [FE 27.5].
- **nekonata** — ... en korespondado kun personoj nekonataj estas bone ĉiam peni uzadi nur vortojn el la «Fundamento» ... [A 7.1].
- **nomata** — Patro kaj patrino kune estas nomataj gepatroj [FE 36.1].
- **pagata** — Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi [FE 25.7].
- **presata** — ... tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj ... [A 8.3].
- **regato** — ... [fundamentaj leĝoj], kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj ... [A 3.1].

● **rekomendata** —... por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, ..., de la vortoj kaj reguloj rekomendataj private, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobatataj [A 5.4]. ... tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj [A 7.1]. ... ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [12].

● **rigardata** — ... jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: ... [A 2.1]. ... ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, ... [A 3.4]. Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5]. La « Fundamento de Esperanto » tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto [A 5.1]. ... tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo ... [A 7.1]. ... ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [12].

● **rompata** — ... eĉ ĉe la plej granda perfektigado la unueco de Esperanto neniam estos rompata [A 8.3].

● **serĉata** — Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9].

● **skribata** — Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, tiel ekzemple la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enkonduko 2].

● **tolerata** — ... jam estus ŝanĝo, kiu ... en verko fundamenta ne povas esti tolerata [A 4.3].

● **turnata** — ... li petas, ke la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li, sed al tiu ĉi libro [A 3.3].

● **uzata** — La artikolo „la” estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj [FE 27.1]. Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo) [FE 32.6].

● **uzateco** — Kiam ... registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon ..., tiam ... [A 1.2].

bb) Dua Libro 1888 – Formoj kun –at

- 29 Se ili estus dirintaj la veron, ili ne estus nun punataj; nun ili konfesis ĉion, sed ĝi estis jam tro malfrue [DL 5.13]. — Punata antaŭ la rompita poto, la kato eble komprenos la kaŭzon de l' punado [DL 5.27]. Batate de la mastro, li ploris kaj ĵuris, ke li terure venĝos [DL 5.29]. — En tiu ĉi lernejo la infanoj estas edukataj tre bone, ĉar la lernejestro sin okupas je sia afero kun amo [DL 5.30]. — Dum en unu ĉambro la gastoj dancadis, en la dua ĉambro estis preparata la vespermanĝo; kian {de 1888: kiam} la tablo estis preparita, oni invitis la gastojn al la tablo [DL 5.32]. — Kio estos hodiaŭ prezentata en la teatro? [DL 5.33]. — Li estas tre riĉa, kaj li donis al la malfeliĉulo tro malmulte, ĉar li estas konata avarulo. Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de simplaj vortoj; prenataj estas ordinaraj la puraj radikoj, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t.e. la radikon kune kun la finiĝo [DL 7.1]. — Mi estas la zorganto de tiu ĉi infano, kaj ĝi estas mia zorgato [DL 10.2]. — Via kuracato estas mia konato [DL 10.3]. — Virino, kiu sin okupas je kudrado, estas nomata kudristino, kaj ŝia edzo estas nomata kudristinedzo [DL 11.4].

cc) **FG 6.2 ĥ) - Formoj kun -it'**

30 it' - marque le participe passé passif; ex. far' faire - far'it' fait (qu'on a fait), ayant été fait | ending of past part. pass. in verbs; e. g. am'it' having been loved | bezeichnet das Particip. perfecti passivi | означает причастие прошедшего времени страдательного залога | oznacza imiesłów bierny czasu przeszłego. — **it** - marque le participe passé passif | ending of past part. pass. in verbs | bezeichnet das Participium perfecti passivi | означает причастие прошедшего времени страдат. залога | oznacza imiesłów bierny czasu przeszłego [FE 12]. — [UL].

• **aĉetita** — La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi [FE 25.5]. Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero [FE 31.21].

• **atendite** — Li venis al mi tute ne atendite [FE 22.15].

• **adresita** — El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; ... [FE 42.8].

• **akceptita** — Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj ... [A 1.2]. Leĝan sankcion ili [= la ideoj] ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 13.2].

• **am'it'** having been loved [UV it'].

• **arestito** — La soldatoj kondukis la arestitojn tra la stratoj [FE 22.14].

• **dezirita** — ... fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, ... [A 1.2].

• **difinita** — ... la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo [A 1.1]. ... obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando ... [A 3.1]. ... ia klare difinita verko [A 3.2]. La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, ... [FE 42.9].

• **dirita** — Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon ... [A 8.1]. — El la dirita regulo sekvas, ke ... [FE 29.8]. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, ... [FE 30.10].

• **eldonita** — ... mi rekomendas la diversajn lernolibrojn ..., kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj ... kaj el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj tre bone kaj zorgeme, ... [A 5.3].

• **elektita** — ... aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj ... [A 1.2].

• **elĵetita** — ... tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj [A 8.3].

• **far'it'** - fait (qu'on a fait), ayant été fait [UV it']. — **farita** - Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13]. — **far'it'a** - ayant été fait, qu'on a fait | „that which has been done” | gemacht | сдѣланный | uczyniony [FG 6.2 ĥ].

• **far'it'e** - „having been done” [FG 6.2 ĥ].

• **glaciigita** — Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita frandaĵo [FE 35.14].

• **havita** — Mono havata estas pli grava ol havita [FE 22.12].

• **kaptita** — Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota [FE 22.13].

- **kaŝita** — Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9].
- **kovrita** — La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj [FE 35.18].
- **kunmetita** — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; ... [FE 27.5]. ... la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enkonduko 2].
- **lavita** — Vi estas lavita. Vi estis lavita. Vi estos lavita. Vi estus lavita. Estu lavita. Esti lavita [FE 25.2].
- **montrita** — La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ... [FE 30.2].
- **mortigita** — Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu ... [FE 39.11].
- **naskita** — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19]. Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita [FE 33.7].
- **nefermita** — La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove malfermis [FE 33.9].
- **nekorektite** — ... ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj ... tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2].
- **nomita** — Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5].
- **pagita** — Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ [FE 25.8]. Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enkonduko 1].
- **perdita** — Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon) [FE 29.7].
- **prezentita** — Leĝan sankcion ili {= la ideoj} ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 13.2].
- **priparolita** — ... pro kaŭzoj jam multajn fojojn priparolitaj [A 9.2].
- **publikigita** — Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5].
- **represita** — ... la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1].
- **skribita** — ... viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble [FE 41.4]. Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enkonduko 1].
- **tradukita** — ... se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe [A 4.3].
- **vestita** — ... ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro [FE 19.5].

dd) Dua Libro 1888 – Formoj kun -it

- 31** Vi ne malhelpis min, ĉar kian {de DL-Ald 1888: kiam} vi venis, mi estis jam finita mian laboron [DL 5.10]. — Punata antaŭ la rompita poto, la kato eble komprenos la kaŭzon de l' punado [DL 5.27]. — Tio ĉi montras, ke via nepo estas ne bone

edukita [DL 5.31]. — Dum en unu ĉambro la gastoj dancadis, en la dua ĉambro estis preparata la vespermanĝo; kian {de 1888: kiam} la tablo estis preparita, oni invitis la gastojn al la tablo [DL 5.32]. — Aŭdu, infanoj! se vi estos prezentitaj al la generalo, salutu lin ĝentile [DL 5.34]. — La formojn kunmetitajn (ekzemple: mi faradas, mi estis farinta ... kaj ceterajn) oni devas uzi sole tian, kian {de 1888: tiam, kiam} la senco ĝin necese postulas [DL 5.36]. La adverboj (evortoj), kiuj estas kreitaj el aliaj vortoj, finiĝas je la litero "e"; ĉiuj aliaj adverboj ne havas konstantan finiĝon kaj apartenas al la vortoj *simplaj* [DL 6.1]. — Kun tiu papero mi ekiris per grandaj paŝoj al la komercisto; sed antaŭ la magazeno mi renkontis kaleŝon, en kiu sidis riĉe vestita sinjoro. [DL 6.5.1]. Elirinte el la kaleŝo kaj forĵetinte la pecon da cigaro, kiun li estis teninta inter la fingroj, li ekrigardis min tra siaj bluaj okulvitroj kaj diris sen ia antaŭparolo: "ne, por vi mia magazeno estas fermita pro la malbonaj sciigaĵoj, kiujn mi ricevis pri vi de homoj kredindaj." [DL 6.5.2]. Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de simplaj vortoj; prenataj estas ordinare la puraj radikoj, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t.e. la radikon kune kun la finiĝo [DL 7.1]. — Plendito, kion vi povas diri por via praviĝo? [DL 10.5]. — Disiru, sinjoroj, ĉar amase stari sur la strato estas malpermesita {legu nun: malpermesite}¹⁰⁷ [DL 10.14].

d) Oficialaj decidoj de la Akademio

aa) El „Aktoj de la Akademio, 1963 - 1967 (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, n-ro 9)“

32 KOMUNIKAĴOJ de la AKADEMIO al la gazetaro

[...]

25. Novembro 1967

Petite de la Germana Esperanto-Asocio (DEB) "solvi la problemon de la pasivaj participoj laŭ Zamenhof", kaj de la unuanima komitato de UEA "kiel eble plej baldaŭ" difini tiun solvon;

samtempe konsultite de la Unuiĝo Franca por Esperanto (UEF) kaj de la Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (EUGI) pri la ĝusta senco de kvar tipaj frazoj, kiaj povas troviĝi en diplomatia, komerca, jura aŭ politika dokumento, nome:

[1] "Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj en 1970" = do la garantiantoj estos kvitaj,

- A) se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekonstruadon;
- B) nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon.

[2] "Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo" =

- A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo;
- B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.

[3] "Ni asertas, ke la aŭtomobilo de s-ro X estis efektive riparata la lastan semajnon" =

- A) la lastan semajnon oni efektive okupiĝis pri la riparado de la aŭto;
- B) la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon.

[4] "Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio" =

- A) oni akceptis la proponon la 3-an de Junio;

685

¹⁰⁷ En 1888 ankoraŭ ekzistis „senpersona ĝi“ kiel en la germana. „Ĝi (la starado) estas malpermesita“. Post kiam tiu senpersona uzo forfalis, devis sekvi ŝanĝo de a-vorto al e-vorto: „estas malpermesite“.

B) oni akceptis la proponon antaŭ la 3-a de Junio.

la Akademio, per 26 voĉoj el 31 voĉdonintoj (kaj 6 kromaj blankaj voĉdoniloj) decidis kaj deklaras, ke en ĉiu el tiuj frazoj nur la senco A estas konforma al la tradicia lingvouzo de Zamenhof, kaj ke ĉia alispeca interpreto estas neoficiala. Tiu decido cetere nur konfirmas kaj kompletigas la rezulton de voĉdono farita de la Akademio en Julio 1965 pri la senco de la pasivaj participoj en la Fundamento.

Ĉia eblo de dusenceco en la uzo de tiuj participoj estas do forigita per ĉi tiu decido kaj ni esperas, ke la aŭtoroj de la lernolibroj de nun konsideros la ĉi-suprajn modelajn frazojn en la senco aprobita de la Akademio.

G. Waringhien Prezidanto

P. Neergaard,

A. D. Atanasov } Vicprezidantoj

R. Bernard Sekretario

D. B. Gregor Direktoro de la Gramatika Sekcio

[...]

bb) El "Aktoj de la Akademio, III, 1975 - 1991 (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, n-ro 11)"

33 Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 8

Rezolucio pri la participoj ¹

Dum la Unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marŝo D-ro L. L. Zamenhof kun la tiama Esperantistaro estigis "Akademion" ĝuste por kontroli la evoluon de la lingvo per arbitracia Instituto: "Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco; oferi la unuan al la dua mi konsilus nur en tia okazo, se nia Lingva Komitato² tion postulus".³

La uzado de la participoj montris la eblecon de du interpretaj teorioj same logikaj; sed tiu kun aspektaj valoroj estas la pli malnova, la pli beletra, kaj la fundamenta. Surbaze de detalaj studoj ankaŭ la Akademio agnoskis la aspektisman signifon de la participoj, kaj neatento al tia decido devas esti konsiderata kiel lingva eraro.

Instigo al eraro aŭ propagando por teorioj kontraŭaj al la agnosko de la Akademio povas konduki nur al skismo kaj disdialektiĝo. Redaktoroj kaj recenzistoj, eldonistoj kaj libroservoj havas grandan respondecon pri la unueco de la lingvo.

Por la Akademio, ties Prezidanto

D-ro André ALBAULT

1) La Letero de l' Akademio, n-ro 7, APR - MAJ - JUN 1989, p. 2.

2) Nun la Akademio de Esperanto, kiu "transprenis la celojn kaj laborojn de la antaŭa Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio" (Art. 1 de la Statuto).

3) Respondo 47, "Oficiala Gazeto Esperantista", 1911, p. 291.

e) Lingvaj Respondoj

34 Lingva Respondo 111 (1890) [„Pri la esprimo “estu timata”“]:

La esprimo “estu timata” estas uzita tute bone kaj regule. En la rusa lingvo la vorto “timi” ne havas pasivon, sed tio ĉi ja tute ne montras ankoraŭ, ke ankaŭ en Esperanto ĝi ne devas havi pasivon. En ĉiu vivanta lingvo estas permesita uzi nur tiujn formojn, kiujn aliaj personoj jam uzis antaŭ vi; sed en la lingvo internacia oni devas obei sole nur la *logikon*. La logiko diras, ke *ĉia* verbo povas havi pasivon, se nur la *senco* ĝin permesas. Sed en la verbo “timi” la senco tute bone permesas pasivon, kiel en aliaj verboj. Ĉe la timado ni havas ĉiam du personojn aŭ objektojn:

unu, *kiu* timas, kaj unu, *kiun* oni timas, aŭ *kiu estas timata*. “De l' malamikoj vi estu timata” signifas: ke la malamikoj timu vin (= je vi aŭ antaŭ vi). Vere, ke en la rusa lingvo oni diras ne “timi *lin*”, sed “timi *de li*” sed tio ĉi estas aparteco de la rusa lingvo, kiu tute ne estas deviga ankaŭ por ĉia alia lingvo. Jam la senco mem permesas tute bone uzi la verbon “timi” kun la akuzativo (en tia maniero ĝi ankaŭ estas uzata en multaj lingvoj, kie ĝi tiel ankaŭ havas pasivon); sed se la senco ĝin ankaŭ ne dirus, ĝin diras ja tute klare nia gramatiko, laŭ kiu en ĉia duba okazo oni povas uzi la prepozicion “je” aŭ la akuzativon sen prepozicio. Eĉ de vortoj, kiuj per si mem ne postulas la akuzativon, vi povas en nia lingvo libere ĉiam fari pasivon, se nur la senco de tiu ĉi pasivo estos komprenebla. Tiel ekzemple en la versaĵo “Al la Esperantisto” estas ne malregule uzita la esprimo “la celo estos *alvenita*” (= oni alvenos al la celo). [LR 111. *La Esperantisto*, 1890, p. 32].

35 Lingva Respondo 109 A (1901):

Kiel principon ĝeneralan por –ata, prenu: ke tempo estanta ekzistas vere nur, kiam la ago aŭ stato daŭras sufiĉe. En alia kondiĉo la ago aŭ stato jam finiĝis, kiam ni parolas pri ili; sekve ni ne povas uzi –ata, sed devas uzi –ita. Tiel same se ni parolas ne pri la malvolvado de l'ago, sed nur pri ĝia rezulto (Ekz.: la proksiman lundon mi estos konvokita kiel membro de la kriminala juĝantaro) mi uzos –ita, ne –ata [LR 109 A. Let. de Beaufront, en kiu li donas tiun instruon kiel la opinion de Zamenhof, de 1901-02-23, LZ I, p. 17].

36 Lingva Respondo 109 B (1903):

[...] [LR 109 B. Beaufront en „Commentaire sur la Grammaire Esperanto“, 1903, p. 45-47. En pk. al Paul Corret de 1903-03-15, Beaufront deklaris, ke tiuj reguloj estis donitaj al li de Zamenhof mem.]

37 Lingva Respondo 109 C (1903):

S-ro Witteryk¹⁰⁸ skribis: „Mi estas tre feliĉa, ke vi kaptis tiom da ĉasaĵo; vi estas ŝarĝegata“. Korektis Zamenhof al „ŝarĝegita“. [LR 109 C].

38 Lingva Respondo 110 (1911) [„Okupita“ aŭ „okupata“?]:

Kiam pro ia laboro mi ne estas libera, mi diras ordinaro “mi estas okupita”. Kelkaj personoj trovas, ke tio estas neĝusta; ke ĉar mi parolas pri laboro, kiu daŭras nun, mi devas diri “okupata”. Kelkfoje ŝajnis al mi, ke tiuj personoj estas pravaj, kaj tiam mi provis uzi “mi estas okupata” mi tamen tuj forĵetis tiun formon, kontraŭ kiu protestis mia lingva sento. Ĉu ni devas uzi en tiu esprimo la pasivon nuntempan aŭ pasintan, pri tio la lingvoj franca kaj angla ne povas doni al ni respondon, ĉar ili ne havas apartajn formojn por tiuj ambaŭ pasivoj; sed la lingvoj slavaj kaj germana uzas en la dirita okazo la pasivon *pasintan*, sekve ĉi tio estas jam sufiĉe grava motivo, por ke ankaŭ en Esperanto ni tiel agu. Sed eble la formo estas kontraŭlogika? Ne. Se iu ion okupas (en la senco “prenas en posedon”), tiam en tiu momento la io estas okupata de la iu; ekzemple kiam la malamikoj okupas nian urbon, ĝi estas en tiu momento okupata de ili; se mi estis tute libera, sed en la nuna momento oni donas al mi ian laboron, kiu min ekokupas, mi povas diri, ke mi estas nun okupata de tiu laboro, t.e. ĝi forprenas en sian posedon mian tempon; sed se mi parolas pri laboroj, kiuj estis donitaj al mi jam *antaŭe*, t.e. se mi parolas ne pri la *ago* de ekokupo mem, sed pri la *stato*, en kiu mi troviĝas, tiam mi devas diri “mi estas okupita”. Estas vero, ke, transformante la pasivan formon de la citita frazo en aktivan, ni ofte uzas la formon *nuntempan* (“laboroj min tre okupas”), sed tion ni faras por tio, ke la formo “okupis” ne pensigu, ke mia okupiteco jam pasis.

685

¹⁰⁸ Probable temas pri la verketo „Kelkaj floroj esperantaj“ de Antoon Jozef Witteryk, Bruges (Bruĝo, Flandrio) 1903, 1907, 1911.

En la *pasiva* formo ni ne bezonas timi tiun malkompreniĝon, ĉar “mi estas okupita” montras, ke io min okupis kaj la okupiteco ankoraŭ *daŭras*. La senco de “okupi” havas du nuancojn: *preni* en posedon kaj *teni* en posedo; per la formo “mi estas okupita” ni esprimas samtempe *ambaŭ* nuancojn, dum la formo “mi estas okupata” esprimus nur la *unu*an nuancon. Cetere pri la vorto “okupi” mi devas ripeti tion, kion mi diris pri multaj aliaj lingvaj demandoj; ĉiufoje, kiam la logiko ne donas al ni respondon tute klaran kaj senduban, kiu ne ofendus nian lingvan senton, ni devas peni konformigi nin al la ekzistantaj *kutimoj*; kaj la kutimo de la popoloj, kiel mi supre montris, postulas, ke ni diru “mi estas okupita”. [LR 110. Respondo 48, *Oficiala Gazeto*, III, 1911, p. 293].

f) Preparaj materialoj de la Akademio

- 39 En la „Lingva Parto“ de Aktoj I (1963-1967), Oficiala Bulteno N-ro 9, troviĝas detala „ENKETO kaj DECIDOJ de la Akademio pri la demando de La Pasivaj Partecipoj“, verkita de la tiama prezidanto Gaston Waringhien (Varengjeno). Li submetis al la voĉdonado de la akademianoj la enketajn demandojn kaj la de li trovitan rezulton aspektisman je **1965-04-21**. Ĝi ricevis la necesan plimulton.
- 40 Surbaze de tiu (interna) decido, estis verkita de la Direktoro de la Gramatika Sekcio, D.B. Gregor, jena **propono de rezolucio**.

„La Akademio, aprobe konsiderinte la konkludojn de la Enketo de la Prezidanto pri la signifo de la ekzemploj de pasivaj verboformoj en la Fundamento;

atentante la Raporton de la Direktoro de la Gramatika Sekcio, decidis oficialigi jenajn principajn regulojn:

1°- La Esperanta konjugacio konsistas nur el tri verbotempoj: la estanta (aŭ as-tempo, aŭ prezenco), la estinta (aŭ is-tempo, aŭ preterito) kaj la estonta (aŭ os-tempo, aŭ futuro).

2°- Ĉiuj aliaj temporilatoj, kiel ekzemple la antaŭpreterito, la antaŭfuturo, ktp., estas esprimataj per adverboj, konjunkcioj, aŭ simple per la kunteksto.

3°- La ses participoj, uzataj aŭ apud substantivo (resp. pronomo) aŭ apud la verbo “esti”, montras, en kia fazo de la ago troviĝas la subjekto, respektive la objekto: aŭ komencita kaj ne finita (-ant, -at), aŭ finita kaj plenumita (-int, -it), aŭ ankoraŭ ne komencita sed intencata aŭ atendebla (-ont, -ot).

4°- Sekve la formoj “estas, estis, estos, estus, estu, esti -ata” insistas pri la daŭro aŭ ripetiĝo de la ago; kaj la formoj “estas, estis, estos, estus, estu, esti -ita” insistas pri la rezulto de la ago. La formoj kun “-ita” povas ankaŭ montri la antaŭtempecon en la okazo, se en la frazo estas tiurilata aparta indiko.“

- 41 Tiu *propono* tamen **ne** ricevis la necesan plimultan kvorumon. La Rezolucio **ne** estis **akceptita** kaj la demando laŭstatute resendita al la Sekcio pri Gramatiko por plua pristudo. Nova demandaro pri la interpreto de kvar test-frazoj estis sendita al la membroj. La respondoj en la senco de aspektismo fine atingis la necesan plimultan kvorumon. La rezulto estis komunikita al la publiko je **1967-11-25** (vd. la citaĵon supre).

g) Kritiko de la esplormetodo en la „Enketo“ 1965 de Varengjeno

- 42 La „Enketo“ de Varengjeno [W], verkita en 1965 por prepari la akademian decidon pri ata-ita, estas taŭga instru-materialo pri **metodaj** demandoj de la laŭnorma ekzegezo de la Fundamento. Ni [BK] (parte) citas kaj komentas ĝin sube, aŭ inter angulaj krampoj ([...]) aŭ sub la citaĵo.

- 43 [W]

„II – Metodo de la nuna esploro.

Ne povas temi pri analizo, komparado kaj diskutado de la diversaj teorioj elmetitaj diversflanke pri tiu demando. [...], ni estas ligitaj per la Artikolo 16-a de nia statuto, laŭ kiu la “Akademio solvas la lingvajn demandojn laŭ la principoj de la Fundamento de Esperanto” [nun art. 1.1 kaj 23.1 Statuto 2009]. Ni devas do simple esplori tiun bazan dokumenton “por ĉiam devigan por ĉiuj esperantistoj”, kolekti la informojn, kiujn oni povas tie trovi pri la uzado de la pasivaj verboformoj, kaj konstati, ĉu el la du skoloj [atismo aŭ itismo] ili pravigas unu aŭ ambaŭ aŭ nenium.

[BK] La elir-punkto („kion precize diras la F-to?“) estas tute ĝusta, eĉ se malprecize motivita: „Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidis alie, ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; ... [A 3.4] kaj „3. Ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidis pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [A 10.4]“.

44 **[W]**

„Por tiu esplorado mi uzos la sciencaj eldonon de la Fundamento, publikigitan de nia kolego Albault ĉe la Esperantaj Francaj Eldonoj (1963).“

[BK] Ĝuste. Postaj eldonoj estas nuraj enhance senŝanĝaj represoj. Alternative oni nun ankaŭ povus uzi la skanaĵon de la 1a eld. 1905, troveblan en la reto.

45 **[W]**

„IV – La esplrendaj dokumentoj.

[1] La “Fundamento de Esperanto” konsistas el kvar partoj: Antaŭparolo, Gramatiko en kvin lingvoj, Ekzercaro, Universala Vortaro. Ĉar la Antaŭparolo ne estis oficiale rigardita kiel parto de la Fundamento ĝis 1958 [piednoto: Vidu la “Sepan Oficialan Aldonon”]. [2] kaj la Universala Vortaro evidente ne apartenas al nia studokampo, nur la duan kaj trian parton [do FG kaj FE] koncernos mia esploro.

[BK] [1] Tio estas malĝusta. La *principoj* de A (kaj BD) estas *devigaj* („Leĝan sankcion ili [= la ideoj, t.e. la principoj de A] ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 11.2]“). Kontraste la *lingvaĵo* de A ne estas „oficiala“ (t.e. deviga), sed „privata“ (ĝin „la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero - povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6]“; same BD 4.6).

BK [2] Tio estas metode malĝusta: FG, FE kaj UV estas principe samrangaj (A 2.1 - A 2.3, A 3.5, BD 4.3). El tio sekvas, ke **ĉiam ĉiuj** partoj de la F-to devige devas esti konsiderataj. Ankaŭ en UV troveblas artikoloj pri –at kaj –it, vd. BK II. En la enkonduko al UV eĉ troviĝas kontrasta paro: „Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, tiel ekzemple la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enk. 2].

46 **[W]**

[1] „La kvinlingva Gramatiko tuŝas nian temon en sia paragrafo 6a. [2] Sed ĝi donas pri ĝi nur morfologiajn indikojn, kiel klare montras la subtitolo aŭ anonco, troviĝanta tiuloke en la kvin lingvoj, kiu tradukiĝas per “Formoj de la Verbo”. Kie oni parolas pri “formoj”, oni evidente ne intencas paroli pri la uzmaniero de tiuj formoj.“

[BK] [1] La unua frazo estas tro malpreciza. Oni preferu indiku la precizajn trovlokojn, nome FG 6.2 h) kaj ĥ), krome FG 6.3 kaj 6.5 (vd. la tekstojn supre).

BK [2] La konstato pri la intermetitaj titoloj estas malpreciza. Ja la rusa kaj pola (kaj laŭ ili la neoficiala traduko de Z el 1903) distingas inter „Formoj de la verbo“ (-as, -is, -os, -us, -u, -i) kaj „Participoj (kun senco adjektiva aŭ adverba)“ (-ant, -int, -ont, -at, -it, -ot). Oni jam povas dubi, ĉu la titolo „Formoj de la verbo“ entute koncernas –at kaj –it. Temas pri malobeo de la centra interpreta regulo de A 4.5 (eltrovi la veran senco per kunteksta komparo). Male al la aserto de Varengjeno FG 6.2 h) kaj ĥ) ankaŭ parolas pri la „uzmaniero de tiuj formoj“, nome per la tradukoj al la referenc-lingvoj.

47 **[W]**

„Vere estas, ke la diversaj participaj sufiksoj estas nomataj per nacilingvaj vortoj, kiuj en ĉiu lingvo egalas al “participo aktiva prezenca, preterita, futura”, “participo pasiva prezenca, preterita, futura”: [...] El tiu tradicia terminaro oni do ne povas prudente tiri konkludon pri la valoro kaj uzado de la participoj en Esperanto (pri la sola escepto en la franca teksto mi parolos en la ĉapitro VI, 1°).“

[BK] Prave, apliko de A 4.5 – ne restu ĉe la supra signifo de vorto, sed esploru la vere celitan. Aldoniĝas, ke la tradicia gramatika lingvaĵo bazita sur la latina ne nepre taŭgas por priskribi lingvajn fenomenojn de Esperanto, kp. UL 6 supre („Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k. t. p. estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj. Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne traŝinginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), — li eĉ ne supozos, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo. ...)“.

48 **[W]**

„Se montriĝos [...], ke la § 6a [? vd. la ĝustajn referencojn supre] de la Gramatiko ne sufiĉas, por informi pri la ĝusta uzo de la participoj, ni devas do turni nin al la Ekzercaro. Sed antaŭ ol studi ĝin, ni devas klare precizigi, ke tiu Ekzercaro havas ĝuste la saman valoron de fundamenteco, kiel la Gramatiko. Tion evidentigas la Antaŭparolo (Alineo A 2)“.

[BK] Prave, vd. supre. Pli precize A 2.1 - A 2.3, A 3.5 kaj BD 4.3.

49 **[W]**

„V – Esploro de la Ekzercaro pri la formo “estis -ita”.

La unua ekzemplo de pasiva preterito troviĝas en § 12, 19: “Georgo Vaŝington estis naskita ...“

[BK] Ĝuste. Tamen Varengjeno serĉis nur je „estis –ita“, kaj trovis kaj diskutis nur ses (!) ekzemplojn. Fakte enestas 24 (!! it-vortoj en FE plus pliaj 5 en UV kaj 17 en A, vd. la liston supre. Motivo de la limigo estas, ke Varangjeno serĉis ekzemplojn pri „pluskvamperfekto aŭ antaŭpreterito“. Sed tiuj konceptoj estas fremdaj al la F-to. La vorto „pluskvamperfekto“ troveblas nenie en ĝi, eĉ ne en VO. „Preterito“ nur en la formo „**preterit-o** (gr.) [OA 2.1]“. Kontraŭe frazojn kiel „Mono [daŭre, nun ankoraŭ] havata estas pli grava ol havita [= ne plu havata] [FE 22.12]“ kaj similajn aliajn li ignoris, kvankam ili subtenas lian konkludon (-at indikas “ne momentan, unufojan agon, sed ja daŭran aŭ ripetiĝantan agadon”).

- 50 Resume oni devas konstati, ke kvankam Varengjeno metode elektis la ĝustan elirpunkton (kion precize diras la F-to?), li nur malprecize kaj pro tio ne konvinke respondis tiun demandon, ne ĝisfunde analizinte FG 6, ignorante UV kaj grandan parton de la trafaj pri –at kaj –it en FE. Feliĉe, ke li tamen – sur tro mallarĝa faktobazo – venis al la ĝusta konkludo.

7. R 6.4-5 [„de“ post pasivaj participoj]

- 51 **OI 5 de Julio 1986 [Pri „de“, „fare de“, „far“]:**

Esprimo de la aganto en komplementa funkcio *

1. Post ita/ata/ota-vorto, la aganto estas indikita per DE. Ekz-e, ŝi estas amata de ĉiuj (6-a Regulo de la Fundamenta Gramatiko).

2. Post o-vortoj DE povas indiki la aganton, se neniuj aliaj koncernatoj estas ebla. Ekz-e, la kanto de la birdoj, la projekto de la inĝenieroj (Fundamento), la parolado de la oratoro, k.s.

3. Por indiki la aganton post o-vortoj en aliaj kazoj, la plej ĝenerale akceptita formo estas FARE DE. Ekz-e, la akcepto de la kongresanoj fare de la urbestro; la traduko de Hamleto fare de Zamenhof.

La Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko

Michel DUC GONINAZ

La Prezidanto de la Akademio

D-ro André ALBAULT

*) Julio 1986, C. 152, Aldono A; vd. La Letero de l' Akademio, n-ro 1, Oktobro 1987.

Oni cetere notu jenon:

La voĉdonota teksto (C. 151, Aldono B) entenis jenan kvaran artikolon:

4. La uzo de FAR en la sama funkcio estas ankaŭ akceptebla. Ekz-e, la akcepto de la kongresanoj far la urbestro.

Sed dum la tri unuaj artikoloj estis akceptitaj de granda plimulto, la kvara ricevis nur unu voĉon super la tiama absoluta plimulto: neniuj povas do pretendi, ke la Akademio rifuzis la prepozicion FAR, des pli ke la artikolo 3 aludis aliajn formojn ol FARE DE.

Tamen la pozitive voĉdoninta Prezidanto decidis apliki la regulon de la 2/3 al tiu demando, kiel al lingva novaĵo (art. 23 de la Statuto); efektive li volis per tio eviti senfinajn diskutojn, ĉar pluraj forte deklaris sian oponon al oficialigo de FAR, pro tio ke estas tute nekutime retroderivi kaj krei prepozicion el "verba radiko" aŭ el kiu ajn alia radiko; aliaj dume kaj ne malpli forte subtenis la ideon, ke por tiu evidenta kaj escepta bezono la lingvo sukcesis krei al si oportunan kaj taŭgan rimedon el si mem, t.e. sen elekstera deprunto.

Aliparte la Direktoro de la Gramatika Sekcio kontestis, ke temas pri lingva novaĵo.“

- 52 La Akademio diskutis „la dispartigon de „de“ jam en 1909 kaj konsideris jenon:

„12. — Pri la dispartigo de DE.

Oni proponis tri formojn: de, di kaj par, sed « la enkonduko de tri formoj. diras Grabowski, ŝanĝus nur la teritorion de la malfacileco. Ĝi estus faciligo por unu nacio sed samtempe, ĝi malfaciligus la lingvon por aliaj popoloj, kiuj ne konas tian diferencigadon. » Same por slavoj kiel por germanoj estas malfacile, lerni bone la ĝustan uzadon de *of*, *from*, *by*.

Laŭ S-ro Wackrill, en praktika uzado. tre malofte okazas embaraso, kaj kiam ĝi okazas, ĝi estas facile forigebla. « Oni povas ĝin forigi per diversaj rimedoj, ekzemple anstataŭigante la prepozicion *de*, per jam ekzistantaj prepozicioj *el*, *al*, *pri*, *ĉe*, *per*.

« Oni ne devas forgesi, diras S-ro Evstiféieff, unu psikologian kaj unu meĥanikan leĝon: la elekto estas facile, nur inter du, sed ne ankaŭ inter tri kaj pli multaj objektoj. »

Tamen, se oni opinias, ke la sola prepozicio *de* ne sufiĉas, por esprimi tro multajn diversajn rilatojn, oni povus provi la paralelan uzon de la prepozicio *par*, post pasiva verbo. Ekzemple, oni povus diri: « La akcepto de la tutmondaj Esperantistoj *par* la urbestro de Cambridge. »“ [OG 1910:04, p. 323-324]

Ĝis 1909-08-15 nur unu Akademiano subtenis la proponon pri *par*.

I. § 7 [Adverbo]

I. Tekstoj

1. Gramatikoj

7. [1] L'**adverbe** est caractérisé par *e*. [2] Ses degrés de comparaison se marquent de la même manière que ceux de l'adjectif. [3] Ex.: *mi'a frat'o pli bon'e kant'as ol mi* — mon frère chante mieux que moi.

7. [1] Adverbs are formed by adding *e* to the root. [2] The degrees of comparison are the same as in adjectives, [3] e. g., *mi'a frat'o kant'as pli bon'e ol mi*, „my brother sings better than I”.

7. [1] Das **A d v e r b i u m** endet auf *e*; [2] Komparation wie beim Adjektiv. [3] Z. B.: *mi'a frat'o pli bon'e kanta'as ol mi* = mein Bruder singt besser als ich.

7. [1] **Нарѣчія** оканчиваются на *e*. [2] Степени сравнения какъ у прилагательныхъ [3] (**Примѣръ**: *mi|a frat|o pli bon|e kant|as ol mi* мой братъ лучше меня поеть).

7. [1] **Przysłówki** mają zakończenie *e*. [2] Stopniowanie podobnem jest do stopniowania przymiotników [3] (np. *mi/a frat/o pli bon/e kant/as ol mi* — brat mój lepiej śpiewa odemnie).

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

7. [1] Das **Adverbium** endet auf *e*; [2] Komparation wie beim Adjektiv. [3] Z.B.: *mi'a frat'o pli bon'e kanta'as ol mi* = mein Bruder singt besser als ich.

Zamenhofa traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

7. [1] **Adverboj** estas formataj per aldono de *e* al la radiko. [2] Gradoj de komparado estas la samaj kiel ĉe adjektivoj. [3] Ekz. *mi|a frat|o pli bon|e kant|as ol mi*.

2. Aliaj partoj de la Fundamento

e - marque l'adverbe; ex. *bon'e bien* | ending of adverbs; e. g. *bon' good* — *bon'e well* | Endung des Adverbs; z. B. *bon'e gut* | окончание нарѣчія; напр. *bon'e хорошо* | zakończenie przysłówka; np. *bon'e dobrze*. — **e** - marque l'adverbe | ending of adverbs | Endung des Adverbs | окончание нарѣчія | zakończenie przysłówka [FE 7]. — Resti kun leono estas danĝere [FE 7.5]. — Pliajn trafojn vd. en BK II ĉe „e”.

3. Lingvaj Respondoj

1 Pri adverboj vd. LR 121 ss.

a) LR 121 C (1903) – „alie“ anstataŭ „se ne“

2 Vd. en la vortara parto, BK II.

b) LR 121 B (1906?) – pri la serio alial, aliam k.t.p.

3 „Prezentas ektuŝon de la Fundamento“. Vd. ĉe FE 30 (tabelvortoj).

- c) **LR 121 A (1911) - ambaŭ**
- 4 1. Pri la uzado de „ambaŭ“; 2. anstataŭ „la ambaŭ“ oni uzu „ambaŭ“ (sen artikolo). Vd. en la vortara parto, BK II.

4. Dua Libro 1888 (eksterfundamenta interpret-helpo)

La adverboj (evortoj), kiuj estas kreitaj el aliaj vortoj, finiĝas je la litero "e"; ĉiuj aliaj adverboj ne havas konstantan finiĝon kaj apartenas al la vortoj *simplaj* [DL 6.1]. — Li estas severa juĝanto, li juĝas severe, sed juste [DL 6.2]. — Nun estas varme, sed la nokto kredeble estos tre malvarma [DL 6.3]. — Li estas tre riĉa, kaj li donis al la malfeliĉulo tro malmulte, ĉar li estas konata avarulo [DL 6.4]. — Kun tiu papero mi ekiris per grandaj paŝoj al la komercisto; sed antaŭ la magazeno mi renkontis kaleŝon, en kiu sidis riĉe vestita sinjoro. Elirinte el la kaleŝo kaj forĵetinte la pecon da cigaro, kiun li estis teninta inter la fingroj, li ekrigardis min tra siaj bluaj okulvitroj kaj diris sen ia antaŭparolo: "ne, por vi mia magazeno estas fermita pro la malbonaj sciigaĵoj, kiujn mi ricevis pri vi de homoj kredindaj." [DL 6.5].

II. Komentoj

1. Superrigardo

- 5 La Zamenhofa traduko baziĝas sur la angla teksto, kiu plej klare esprimas, ke R 8 parolas nur pri „adverboj, kiuj estas kreitaj el aliaj vortoj“ (DL 6.1, vd. supre). Apud tiuj „evortoj“ ekzistas „aliaj adverboj, [kiuj] ne havas konstantan finiĝon kaj apartenas al la vortoj *simplaj*“ (DL 6.1), ekz. multaj vortoj je –aŭ (ankoraŭ, apenaŭ k.t.p.) aŭ tabelvortoj je –el (iel, tiel k.t.p.). „Konstanta finiĝo“ signifas, ke ekz. –aŭ aŭ –el apartenas al la radiko.
- 6 Pri la demando „ĉu uzi adjektivon aŭ adverbon?“ vd. R 3 pri adjektivoj.

2. Derivitaj adverboj (e-vortoj)

- 7 R 7.2 referencas al R 3.3-5 (pli, plej, ol, el), vd. tie.
- 8 [Daŭrigota]

3. Simplaj adverboj

a) Adverboj je –aŭ

- 9 Proponoj anstataŭigi adverbojn je –aŭ per adverboj je –e (*ankore aŭ *ankor'e; *apene aŭ *apen'e)¹⁰⁹ estas kontraŭfundamentaj. Temas pri „formoj novaj“ (A 8), kiujn oficialigi paralele al la formoj je –aŭ teorie rajtas nur la Akademio, en okazo de „efektiva neceseco“ (A 9.3). Praktike iu neceseco por tia ŝanĝo ne estas ekkonebla.
- 10 La Akademio diskutis la temon jam en 1909 (OG 1910:4, p. 322-323) kaj konsideris jenon:

„11. — Pri la finiĝo E anstataŭ AŬ en adverboj.

Preskaŭ ĉiuj Akademianoj konsentas, ke oni povas toleri en la adverboj (ne en la prepozicioj), la paralelan uzadon de e anstataŭ aŭ.

685

¹⁰⁹ Grosjean-Maupin, E. (1910). Notes Pédagogiques 40. En: Franca E-isto 1910:2:11, p. 187-188: "Ne vous semble-t-il pas que l'on pourrait admettre, à côté des formes ankaŭ, antaŭ, ankoraŭ, hodiaŭ, morgaŭ, etc., qui sont si peu agréables à l'oreille, les formes anke, ankore, ante, etc., que l'on a souvent proposées".

Tiuj adverboj estas :

adiaŭ	baldaŭ
almenaŭ	hieraŭ
ambaŭ	hodiaŭ
ankaŭ	kvazaŭ
ankoraŭ	morgaŭ
apenaŭ	preskaŭ

Oni havus do la paralelan formon:

adie	balde
almene	hiere
ambe	hodie
anke	kvaze
ankore	morge
apene	preske

Sed oni devos ankaŭ toleri paralelan formon por la derivitaj adjektivoj kaj eĉ verboj kaj nomoj.

Ekz. : adia (adiaŭa), adio (adiaŭo), adii (adiaŭi), balda (baldaŭa). hiera (hieraŭa), k. t. p.

Aliparte la prepozicioj finiĝantaj per *aŭ* ne ricevas paralelajn formojn per *e*, kaj oni daŭrigus diri: anstataŭ, antaŭ, ĉirkaŭ, kontraŭ, laŭ, malgraŭ, kun la derivitaj adverboj: anstataŭe, antaŭe, ĉirkaŭe, kontraŭe, k. t. p.” [OG 1910:04, p. 322-323]

Ĝis 1909-08-15 nur tri Akademianoj subtenis la la paralelan uzadon de *e* anstataŭ *aŭ*.

J. § 8 [Prepozicio]

I. Gramatikoj

8. Toutes les **prépositions** veulent, par elles-mêmes, le nominatif.

8. All prepositions govern the nominative case.

8. Alle *Präpositionen* regieren den Nominativ.

8. **Предлоги** всё требуют именительного падежа.

8. **Przyimki** rządzą wszystkie przypadkiem pierwszym.

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

8. Alle Präpositionen regieren den Nominativ.

Zamenhofa traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

8. Ĉiuj **prepozicioj** per si mem postulas la nominativon.

II. Komentoj

- 1 FG 8 estas komentita kune kun FG 14, vd. tie.

K. § 9 [Prononco]

I. Gramatikoj

9. Chaque mot se prononce absolument comme il est écrit.

9. Every word is to be read exactly as written, there are no silent letters.

9. Jedes Wort wird gelesen so wie es geschrieben steht.

9. Каждое слово читается такъ, какъ оно написано.

9. Każdy wyraz tak się czyta, jak się pisze.

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpe)

9. Jedes Wort wird gelesen so wie es geschrieben steht.

Zamenhofa traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpe)

9. Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita. Ne estas neelparolataj literoj.

II. Komentoj

Literaturo (selekto): Nylén, Paul. Sonoj kaj vortoj de Esperanto. Komentario pri elparolo kaj vortfarado. Stockholm 1930. **PAG** (1985) §§ 17-22.

1. Superrigardo

- 2 La traduko de R 9 fare de Z baziĝas sur la angla versio, kiu sole eksplicitas „there are no silent letters“ – „Ne estas neelparolataj literoj“, dum la aliaj lingvo-versioj enhavas tiun konkretigon nur implicate.
- 3 **FE 2-4** enhavas „Ekcerzojn de legado“, do pri la ĝusta prononco. FE 2 kaj 3 eksplicitas la elparolindajn unuojn per disigo-streketoj en la vortoj kaj krome indikas la akcentojn (vd. R 10).
- 4 **FE 27.5** fine mencias la kriterion de „bonsoneco“. La frazo estas preskaŭ laŭvorte transprenita el DL 1888, 7.1:

Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo.

- 5 Tiuj malmultaj kaj evidente neprecizaj reguloj kaj rekomendo pri la prononco de Esperanto estas ĉio, kion havas la Fundamento. Aldone ekzistas kelkaj Lingvaj Respondoj de Zamenhof pri prononcado (nedevegaj, sed rekomendataj pro plena unueco de la lingvo – BD 4.6):

LR 67 (1901): „La elparolado de Esperanto estas tute konforma (kompreneble krom la supersignitaj literoj) al la latina elparolado, kiu estas uzata en mia lando.“ [OV p. 575].

Supozeble temas pri la siatempa lerneja prononco de la latina, kiu probable egalas al la prononco de la tiuepoko eklezia latino en Pollando kaj verŝajne ne multe ŝanĝiĝis ĝis hodiaŭ.¹¹⁰ Studo pri la prononcado de la eklezia latino en Pollando tamen ne estas konata al ni. En la reto troveblas latinaj preĝoj de la iama pola

¹¹⁰ Tiel la supozoj de Velger, Kontribuoj 1999, ĉap. II.6.

papo Johano Paŭlo 2a. Li tamen prononcas ekz. la latinan „c“ antaŭ „e“ aŭ „i“ kiel „ĉ“ laŭ la itala maniero.

- 6 Pri la prononcado de vokaloj ĝenerale, de „i“ kaj „o“, de „c“, „ĉ“, „ĝ“, „j“, „v“, pri la nazaloj („nj“, „ng“, „nk“) kaj la aparta kazo de „ŭ“ ekzistas pliaj LR. Ni dokumentas ilin ĉe la unuopaj liter-(kombin)oj: Jen nur superrigardo kaj Lingvaj Respondoj kun ĝenerala signifo.

LR 71 A (1911) [Prononco en **teorio kaj praktiko**, la ekzemplo de **nazaloj**]: „Kiel en ĉiuj lingvoj, tiel ankaŭ en Esperanto la sono *j* ordinare moligas la konsonanton, kiu staras antaŭ ĝi; oni sekve ne devas miri, ke ekzemple en la vorto „panjo“ la plimulto de la Esperantistoj elparolas la *nj* kiel unu molan sonon (simile al la franca *gn*). Tiel same oni ne miru, ke en praktiko oni ordinare antaŭ *g* aŭ *k* elparolas la sonon *n* naze, aŭ ke antaŭ vokalo oni elparolas la *i* ordinare kiel *ij*. *Batali* kontraŭ tia natura emo en la elparolado ŝajnas al mi afero tute sencela kaj senbezona, ĉar tia elparolado (kiu estas iom pli eleganta, ol la elparolado pure teoria) donas nenian malkompreniĝon aŭ praktikan maloportunaĵon; sed *rekomendi* tian elparoladon (aŭ nomi ĝin „la sole ĝusta“) ni ankaŭ ne devas, ĉar laŭ la teoria vidpunkto (kiu en Esperanto ofte povas esti ne severe observata, sed neniam povas esti rigardata kiel „erara“) ni devas elparoli ĉiun sonon severe aparte; sekve se ni deziras paroli severe regule, ni devas elparoli „pan-jo“, „san-go“, „mi-a“. [Respondo 56, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 222].

LR 68 B (1905) [Meza longeco de vokaloj – „o“]: „La „o“ devas esti parolata meze-longe, t.e. nek tro longe nek tro mallonge. [1905, PVZ X, 131, t.e. respondo donita dum laborkunsido de UK 1 en Bulonjo ĉe Maro].

LR 68 A (1906) [Meza longeco de vokaloj – „i“]: „La elparolado de la vokaloj devas esti nek tro longa, nek tro mallonga; ekzemple „i“ devas esti elparolata iom pli longe ol en la germana „Sinn“ kaj iom pli mallonge ol en „Riese“. [Let. al Thorsteinsson (1906), OV, p. 523].

LR pri pliaj literoj (en alfabeto ordo):

LR 71 C (1910) [Prononco de „c“, „ĉ“, „ĝ“]

LR 70 (1893) [Prononco de „i“ kontraste al „j“].

LR 70 (1893) [Prononco de „u“ kontraste al „ŭ“].

LR 69 B (1888), LR 69 A (1889), LR 70 (1893) [Prononco de „ŭ“].

LR 71 B (1912) [Prononco de „v“].

- 7 Ankaŭ tiu materialo ne solvas ĉiujn detal-demandojn. Pro tio ekzistas abundo da artikoloj pri la esperanta fonetiko, ĉu ĝeneralaj, ĉu celantaj certajn misprononcojn de parolantoj de iuj lingvoj. Kelkajn bibliografiajn indikojn ekde 1931 oni trovas en EBEA serĉante je „fonetik“ en ĉiuj kampoj.
- 8 Frua **son-dokument** kun mallonga peco el parolado de Z estas aŭskultebla ĉe www.youtube.com. Multajn horojn de parolata Esperanto oni trovas en la registraĵoj de la esperantaj (ret-) radioj, ĉe la magnetofona servo de UEA, ĉe youtube (Fettes, Kovacs, Lapenna, Pietrzark, Tonkin, Wennergren k.m.a.) kaj aliloke.
- 9 R 9 estas intime ligita kun **R 10** pri la **akcento**, vd. tie.

2. Prononco de „c“, „ĉ“, „ĝ“

LR 71 C (1910): „Via opinio pri c, ĉ, ĝ estas erara; estas vero, kelkaj nacioj elparolas ilin kiel ts, tŝ, dĝ – sed ne ĉiuj nacioj tion faras.“ [1910, PVZ IX, p. 135].

3. LR 70 (1893) [Prononco de „i“ kontraste al „j“].

4. LR 70 (1893) [Prononco de „u“ kontraste al „ŭ“].

5. LR 69 B (1888), LR 69 A (1889), LR 70 (1893) [Prononco de „ŭ“].

6. LR 71 B (1912) [Prononco de „v“].

7. Duoblaj konsonantoj („nonoismo“)

Literaturo (selekto): Y.N. (1910) Pri la nomo de nia lando. En: Finna Esperantisto 1910:4:3/6 (Mar-Jun), p. 9-10: „Tiel ni ... malaprobas la propronon de S:ro Bein, k aliĝante al S:roj Moch k Schröder, uzos la pli praktikan kaj esence eĉ pli internacian radikon kun du n, t.e. la vortojn Finnlando, finno, kaj finna.“ – Grabowski, A. Raporto pri la decido de la Akademio. En: OG Dec. 1911, p. 229-232. - Kalocsay, [Kalmàn] (1933) Duoblaj literoj. En: Enciklopedio de Esperanto 1933, p. 113-114: Ĉu d.l. estas kontraŭfundamentaj? Resumo de la diskuto en LK (Ofic. Gaz. Dec. 1911, p. 231-232). - Golden, Bernard (1983) Galo, Gallo aŭ Gaŭlo? En: KEG 1983:15:7, p. 78. - Wennergren, Bertil (1984) Brutte kaj vatto: Ĉu Esperanto? En: Espero (Svedujo) 1984, 71:4, p. 55. - Wennergren, Bertil (1990) Nonoismo - kelkaj alternativoj. En: Akademiaj Studoj 1988-90, p. 82-84.

a) Superrigardo

- 10 Per la (malpreciza) termino „**nonoismo**“ (de no-no-ismo, n-n-ismo) oni kutime nomas la fenomenon, ke ene de *radiko* aperas duobla konsonanto. Tio povas esti „nn“ kiel en *finno*, sed ankaŭ „ll“ kiel en *villo* aŭ „tt“ kiel en *regatto* (tiuj lastaj devus pli precize esti nomataj loloismoj kaj totoismoj, sed kutime ankaŭ ilin oni nomas nonoismoj). Kontraste, se pro kunpuŝiĝo de du radikoj ene de *kunmetita vorto* ekestas duobla litero, oni ne parolas pri nonoismo, ekz. en *tut'tag'a*, *lern'nivel'o* k.t.p.
- 11 Aparta subgrupo estas **prononcaj nonoismoj** ĉe la liter-kombinoj „dĝ“ kaj „tĉ“, prononcitaj proksimume „d-dŝ“ kaj „t-tŝ“ kiel en *budĝeto* kaj *matĉo*.
- 12 La diskuto, ĉu duoblaj konsonantoj ene de radiko estas laŭ- aŭ kontraŭfundamentaj ekzistas jam de minimume cent jaroj. Jam en 1911 la Lingva Komitato disputis la temon okaze de la esperantigo de la etno- kaj landonomo finno kaj Finnlando.

b) Nonoismoj en la Vortaro Oficiala kaj ĉe Zamenhof

- 13 Vortoj kun duoblaj konsonantoj *en la sama silabo* de radiko ne ekzistas en la Vortaro Oficiala, Nur du vortoj havas duoblajn konsonantojn, tamen *en du silaboj*, nome la propraj nomoj **Ŝil-ler'o** [FG 16] kaj **An-no** [FE 36.2]. Z mem uzis kelkajn malmultajn pliajn neoficialajn vortojn kun duoblaj konsonantoj: **brut-t'e**, **bul-l'o**, **get-t'o**, **net-t'o**, **re-gat-t'o**, **vil-l'o**¹¹¹, por distingi ilin de brut'o, bul'o, net'a, reg'at'o, vil'o [ĉiuj UV]. „get-t'o“ estas arkaa, PIV 2005 notas (nur) „get'o“. Kvankam maloftaj kaj nekutimaj, tiaj vortoj ne lezas R 9, ĉar ili estas prononceblaj laŭ tiu regulo, do sen ke iu litero estus neelparolata.

685

¹¹¹ brutt-e, regatt-o, vill-o en EG 1.

- 14 Same staras pri la nordeŭropa gento **fin-n'o** (kontraste al la F-ta fin'i, fin'o), laŭ kiu la lando povas esti nomata **Fin-nu-jo** (ĉefurbo Helsinko): Tiuj formoj estas prononceblaj sen „neelparolataj literoj“ laŭ R 9, ĉar n-n aperas en du silaboj. Dubi oni tamen povas pri la Z-a formo **Finn-land'o**, kiun rekomendas la „Listo de Rekomendataj Landnomoj“ (OI 12 de 2009-05-04, vd. ĉe la fino de BK II), kaj la kunmetaĵo **finn-ugr'a** (rilata al unu el la du grupoj de uralaj lingvoj, PIV 2005). Finnlando oni devas laŭ R 9 prononci **Fin-nlan-d'o**, finn-ugra **fin-nu-gr'a**. Silabkomenca *n* plus konsonanto (*nlan*) estas malofta en Esperanto, tamen probable de multaj prononcebla. Simile estas en kelkaj vortoj, kiujn Esperanto transprenis el i.a. afrikaj lingvoj, ekz. *ndebelo* (gento en Sudafriko), *Ndao* (indonezia insulo), *Njamen* (ĉefurbo de Ĉado) k.t.p. Same ankaŭ Finnlando ne lezas R 9.

8. –dĝ– kaj –tĉ– (budĝeto, matĉo)

- 15 Senproblemaj laŭ R 9 ankaŭ estas **budĝet'** [OA 3.1] (paralela formo **buĝeto** [OA 8]) kaj la neoficiala **matĉo**. **budĝet'** jam laŭdifine estas „ĝusta“ Esperanto, ĉar ĝi per la oficialigo fariĝis parto de la Fundamento. Kolizio kun R 9 ne ekzistas, ĉar la aŭde duoblaj konsonantoj –dĝ– (proksimuma prononco d-dŝ) estas en du silaboj **bud-ĝet'o**. Same staras la afero pri la neoficiala –tĉ– (proksimuma prononco t-tŝ): **mat-ĉ'o**.

9. –dz– (frandzi)

Literaturo: **Golden**, Bernard (1989). Ĉu franci aŭ frandzi: Tiel staras nun la demando. En: *Kancerkliniko* 1989:51 (Jul-Sep.), p. 16-17.

10. pf- (pfenigo)

- 16 „pf-“ en unu silabo aperas nur en unu sola oficiala vorto, nome en la (iama) mon-unuo **pfenigo** [FE 41.15, OA 1, OA 7]. Ĉar ĝi estas parto de la Vortaro Oficiala, ĝi estas laŭdifine ĝusta, kvankam oni povas dubi, ĉu ĝi harmonias kun R 9 (ĝusta prononco estus p-fe-ni-g'o). Ĝis nun la Akademio ne oficialigis - laŭ la preskriboj de A 8 pri formoj novaj - paralelan formon „fenigo“, kiu eble estas pli proksima al la idealo de R 9.

11. –h– (Budho, budhismo)

- 17 En UV troveblas **mirh-o**, evidente por distingo de mir-o. La neoficiala vorto **budhismo** estas uzata en la difino de lotuso (OA 8), vd. la ĉapitron „Kaŝitaj Vortoj en la Vortaro Oficiala“. Ĉar ankaŭ en tiu okazo –d kaj h- troviĝas en du silaboj (**bud-his-m'o**) lezo de R 9 ne ekzistas. Samo validas por la iom ofta liter-kombino „kh“ kiel en **sik-h'o** (ano de monoteisma religio en Hindio) aŭ en **men-hi-ro**.

12. R 9 en kunludo kun R 16.1

- 18 Se iu el la nomitaj liter- kaj pro tio son-kombinoj aperas *radikfine*, ekestas la demando, ĉu ili estas ankoraŭ prononceblaj laŭ R 9, se la vort-kategoria markilo –o estas apostrofita laŭ R 16.1: ho, sankta Budh', sikh', vill', finn', matĉ', brutt', bull', gett', nett', regatt'. Pro la forfalo de –o la duoblaj konsonantoj retroviĝas en *unu silabo*.

13. –ngk– (nazaloj, Hongkongo - Honkongo)

Literaturo (selekto): LR 71 A (tekston vd. supre ĉe „R 9 - Superrigardo“).

- 19 En sia „Rekomendo pri la uzo de propraj nomoj“ (OI 22 de 2013-10-10) la Akademio *rekomendas* jenon:

„3.4 Krome, oni konsideru la fonetikajn apartaĵojn de Esperanto: la esperantigo ... prefere ... evitu nekutimajn sonkombinojn, precipe se por multaj Esperanto-

parolantoj estas malfacile prononce distingi ilin de iuj pli kutimaj sonkombinoj (kiel ... la "ngk" en Hongkongo⁶, kiujn multaj prononcus same kiel ... "nk").“

Piednoto 6 tekstas: „Preferinda estas la formo Honkongo (temas pri speciala administra parto de Ĉinujo).“

Tiu *nedevisa rekomendo* estas imitinda.

14. –ts– (Botsvano – Bocvano)

- 20 Pri „ts“, „tŝ“ kaj „dĵ“ Zamenhof donis jenan lingvan respondon en 1910:

LR 71 C (1910): „Via opinio pri c, ĉ, ĝ estas erara; estas vero, kelkaj nacioj elparolas ilin kiel ts, tŝ, dĵ – sed ne ĉiuj nacioj tion faras.“ [1910, PVZ IX, p. 135].

- 21 Prave la Akademio (nedevisge) *rekomendas* la formon **Bocvano** (Listo de Rekomendataj Landnomoj, Ol 12 de 2009-05-04, vd. ĉe la fino de BK II). Simile **Pocdamo** (nomo de pluraj urboj, i.a. apud Berlino en Germanio) kaj ne **Potsdamo* k.t.p.

15. Evitstrategioj

- 22 Kvankam ĉiuj tiuj formoj harmonias kun la Fundamentaj reguloj kaj preskriboj, multaj esperantistoj malŝatas ilin, nomas ilin „strangaj“, probable pro ilia relativa malofteco. Jam frue oni pro tio proponis paralelajn formojn, kiuj evitas la maloftajn liter-kombinojn.

	ekzemplo	paralela formo	komento
dĝ	budĝet-o	buĝet-o	intermiksebla vorto buĝ'et'o ne ekzistas anstataŭigo de –h– per –a–, kp. villo – vilao; buleo
dh	Budh-o	Buda-o	
dĵ			neniu ekzemplo en la Vortaro Oficiala la transskribo sikho baziĝas sur la angla transskribo de la sono –h– per –kh–
kh	sikh-o	siĥ-o	
ll	bull-o	bule-o	anstataŭigo de –l– per –e–, kp. Budao, vilao neniu paralela formo
	Ŝiller-o	—	
	vill-o	vila-o	anstataŭigo de –l– per –a–, kp. Budho - Budao evito de la internacia formo (eksonimo) kaj uzo de formo bazita sur la finna (endonimo)
nn	Finnland-o	Suomi-o	
pf	pfenig-o	—	neniu paralela formo
tĉ	matĉ-o	maĉ-o	konfuzebleco kun maĉ'o de maĉ'i estas pli teoria ol praktika, ĉar la apliksferoj de ambaŭ vortoj estas sufiĉe malsamaj
ts	Botsvano	Bocvan-o	Bocvano laŭ Listo de Rekomendataj Landnomoj 2009
tŝ			neniu ekzemplo en la Vortaro Oficiala
tt	brutt-e	malnet-e	PIV 2005, teoria konfuzebleco estas akceptita tiel PIV 2005, ĉar konfuzebleco kun alia radikoj get- ne ekzistas
	gett-o	get-o	
	nett-e	net-e	PIV 2005, teoria konfuzebleco estas akceptita konfuzebleco kun reg'at'o estas pli teoria ol praktika, ĉar la apliksferoj de ambaŭ vortoj estas tre malsamaj;
	regatt-o	regat-o, boat- konkurso	

L. § 10 [Akcento]

I. Gramatikoj

10. L'accent tonique se place toujours sur l'avant-dernière syllabe.

10. The accent falls on the last syllable but one, (penultimate).

10. Der Accent fällt immer auf die vorletzte Silbe.

10. Ударение всегда находится на предпоследнемъ слогѣ.

10. Akcent pada zawsze na przedostatnią zgłoskę.

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

10. Der Accent fällt immer auf die vorletzte Silbe.

Zamenhofa traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

10. La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

II. Komentoj

- 1 R 10 izolite ne estas klara, ĉar ĝi ne eksplicitas la demandon „antaŭlasta silabo de kio?“, nome ĉu de radiko aŭ de vorto kun la vortkategorio markilo (-o, -a, -e k.t.p.). Kuntekste kun FE 2 kaj FE 3 tamen fariĝas nemiskompreneble, ke la „vera senco“ (A 4.5) estas la laste menciita, nome radko kun markilo: Bá-lo. Pát-ro. Nú-bo. Mál-plej. k.t.p. [FE 2]. Oni do povas konkretigi R 10 per jena revertumo:

„La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo *de vorto (radiko kun finaĵo aŭ senfinaĵa vorto: bá-lo, mál-plej)*.“

- 2 R 10 ankaŭ ne eksplicitas la kunludon kun R 16.1 (apostrofigo de –o, detalojn vd. tie). Oni povas revertume precizigi:

„[1] La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo *de vorto (radiko kun finaĵo aŭ senfinaĵa vorto: bá-lo, mál-plej)*. [2] *Se substantiv-indika –o estas anstataŭigita per apostrofo laŭ R 16.1 la akcento estas sur la lasta silabo (bela fraŭ-lín', freŝa mar-tén')*“

- 3 LR de 1891 traktas R 10 pri la regulo de la akcento:

LR 72 A (1891): „... Egale kiel la sekvado de gustoj personaj aŭ naciaj, estas senfrukta kaj danĝera ankaŭ la sekvado de *teoriaj principoj*, se ni ne demandas nin, kian *praktikan* signifon ili havas. La defendantoj de tiaj teoriaj principoj ofte memorigas la instruitulon, kiu, vidante ke el la tuta bestaro nenia speco da bestoj manĝas bakitan panon, venis al la logika konvinko, ke ĝi ne estas sana kaj bongusta, kaj komencis sin nutradi je kampaj herboj kaj kruda viando. Teoriaj proponoj, ofte eksterordinare strangaj kaj havantaj nenian eĉ plej malgrandan praktikan fundamenton, estis faritaj al ni en granda amaso. Sed ne parolante pri ĉiu el ili, ni prenos por ekzemplo nur unu, kiu apartenas ŝajne al la plej bonaj kaj pravaj kaj trovis multajn aprobantojn. Ni parolas pri la regulo de la akcento. Sinjoro de Wahl en tre bona artikolo montris, ke la ŝanĝoj, kiujn diversaj vortoj ricevis, transirante el unu lingvo en alian, neniam tuŝas la akcenton, ke volonte estas forglutataj tutaj silaboj, por nur ne ŝanĝi la akcenton, ke sekve la akcento en diversaj niaj vortoj, kiel ekzemple “nacio”, “titolo” k.c. estas kontraŭnatura; kaj sinjoro Runstedt eĉ rakontas pri unu persono, kiun la akcentoj en “animo”, “proksime” k.c. fortimigis de nia lingvo, kvankam per si mem la lingvo al li tre

plaĉis. Kiel ajn bela tiu ĉi opinio ŝajnas en la teorio, ĝi tamen post pli atenta pripensado baldaŭ montriĝas al ĉiu kiel bela... sofismo. Ni rigardu atente, en kio propre kuŝas la kulpo de la konstanta akcento, kaj kia grava kaŭzo devigas nin aŭ doni malfacilan kaj konfuzan malregulecon al la akcento, aŭ forigi silabojn en diversaj vortoj, por ke la akcento fariĝu "plinatura". Ĉu vortoj kiel ekzemple "proksima", "titolo" estas pli malfacile ellerneblaj kaj memoreblaj, ol "título", "proksima"? Ne, neniu dubos, ke ellerni *unu* akcenton por ĉiuj vortoj estas mil fojojn pli facile, ol memori por ĉiu vorto apartan akcenton. (Demandu la alinaciulojn, kiuj lernas la lingvon rusan, kaj ili diros al vi, kiom da grandegaj malfacilaĵoj prezentas al ili la ellernado kaj regula uzado de la rusa akcento!) Ĉu la diritaj vortoj estas malfacile elparoleblaj? Ĉu ili estas malbonsonaj? Ĉu ili prezentas eble ian alian maloportunaĵon? Ne! sendube ne! ĉiu scias, ke la akcento sur la antaŭlasta silabo estas ĉiam la plej bone elparolebla kaj la plej bonsona. Dum la malreguligo de la akcento estus ligita kun tro grandaj kaj tro videblaj maloportunaĵoj, vi en nia *nuna* konstanta akcento ne trovos eĉ la plej malgrandan maloportunaĵon, se vi eĉ serĉos tutan vivon! Kial do, oni povas demandi, propono, tiel senfundamenta povis plaĉi al kelkaj el niaj amikoj? La respondo estas tre simpla: la propono tuŝis kordon konatan de ni ĉiuj sed de ni mem ĝis hodiaŭ ne rimarkitan; kaj se homo ekaŭdas ion konatan, li ofte kontraŭvole, sen konscio kaj sen analizo, ekkrias: "Jes, jes, bone!"

Ni analizu pli proksime la motivojn, kiuj ŝajne parolas por la propono. La konato de sinjoro R. ne volis lerni nian lingvon, ĉar kutiminte je la elparolado de la latina "proximus", "animus", li ne povis akcepti la vortojn "proksima", "animo". Sed ne malfacile estas vidi la tutan signifecon de tiu ĉi motivo. Ĉu la latina vorto "maximus" estas motivo kontraŭ la franca vorto "maxime"? Ĉu la simpla fakto, ke ia vorto havas ian difinitan formon en unu lingvo, prezentas ian eĉ plej malgrandan kaŭzon, por ke tiu ĉi vorto en alia lingvo ne havu alian formon? Se hodiaŭ iu postulas, ke anstataŭ "facila", ni diru "facila", li morgaŭ kun tia sama rajto postulos, ke anstataŭ "facila" ni diru "facilís", ĉar la formo "facila" al lia orelo estas fremda! Kaj kun tia sama rajto oni postmorgaŭ postulos, ke ni al ĉiuj vortoj en nia lingvo donu tiujn formojn, kiujn oni trovas en la lingvo ekzemple latina, t.e. ke ni tute detruu la lingvon internacian kaj anstataŭigu ĝin per ia alia jam ekzistanta lingvo, ĉar... (nenia alia kaŭzo)... la formoj de tiu aŭ alia lingvo al sinjoro X. aŭ Y. estas konataj kaj la formoj de nia lingvo al li ne estas ankoraŭ konataj! Ĉiu lingvo havas siajn leĝojn, kaj se la leĝoj per si mem estas bonaj, estus ridinde deziri ilin ŝanĝi *nur* tial, ke alia lingvo havas aliajn leĝojn. Ĉu ni povas diri, ke la germana vorto "Geographie" estas malbona kaj tranĉas la orelon, ĉar la Rusoj elparolas tiun ĉi saman vorton "geografia"? Al la konato de sinjoro R. la vorto "proksima" en la unua momento malplaĉis, ĉar li alvenis al tiu ĉi sama vorto de nia lingvo kun kutimoj latinaj; ĉio dependas de la kutimo, kaj nun, kiam ni kutimis je la leĝoj de nia lingvo, ni povas certigi, ke se iu antaŭ ni elparolas la nomon de nia lingvo "internacia" anstataŭ "internacia", ĝi tranĉas nian orelon tiel terure, kiel se iu tirus karbon sur vitro.

La kutimo ofte ludas gravan rolon en la vivo; eble ni devas kalkuliĝi kun ĝi? Se ni povus tion fari sen ia malutilo, jes, kial do ne kalkuliĝi? Sed se por *parton* da homoj liberigi de alkutimiĝo je *unu* tre facila regulo ("akcento ĉiam sur la antaŭlasta silabo") ni bezonus *multe pli grandan parton* da aliaj homoj devigi lerni kaj memori *multajn* regulojn (sen ia regulo memori apartan akcenton por ĉiu aparta vorto), — kion ni tiam devas preferi? Ni forte dubas, ĉu troviĝos iu, kiu konsilus solvi la demandon alie ol ni ĝin solvis! Por ne devigi la lernantojn memori apartajn akcentojn por ĉiu vorto, oni eble konsilos al ni transformi grandan parton da vortoj en nia lingvo tiel, ke ili konsentigu en si la regulon pri la akcento konstanta kun la akcento kutima (ekzemple "titlo" anstataŭ "título", "amo" aŭ "ano" anstataŭ "animo", "proksa" aŭ "proma" aŭ "propa" anstataŭ "proksima" k.c.); sed ne parolante jam pri

la malbonsoneco, malklaraĵoj, k.t.p., kiuj tiam naskiĝus, kaj supozante, ke eĉ la lingvo mem nenion de tio suferus, ni forte dubas, ĉu iu serioze konsilus enkonduki tian grandan rompadon en nian aferon... sen ia eĉ la plej malgranda kaŭzo! Sen ia eĉ la plej malgranda kaŭzo: ĉar ni serĉis kaj serĉis kaj ne povis trovi en la konstanta antaŭlasta akcento ian eĉ la plej malgrandan maloportunecon por la memoro, nek por la buŝo, nek por la orelo. Kontraŭ nia regulo ekzistas absolute nenio, ekster la tute signifa motivo, ke la lingvo X aŭ la lingvo Y tion ĉi ne havas.

Sed eble kontraŭ nia regulo ekzistas io tio, kion oni per vortoj esprimi ne povas, sed kion oni neklare *sentas*, kiel ian vokon de naturo? Ni aŭskultu, kion diras sinjoro de W.: li ne vidas kaj ne montras ian faktan cirkonstancon kontraŭ la akcento en nia lingvo; sed rimarkinte, ke la naturaj lingvoj ofertas la sonon kaj formon de la vortoj, por nur konservi la unuatempan akcenton, li vidas en tio ĉi naturan leĝon kaj konsilas al ni sekvi tiun ĉi leĝon, por ke nia lingvo ne estu kontraŭnatura. Je l'unua rigardo povas efektive ŝajni, ke ni pekas kontraŭ la natura leĝo; sed ni rigardu pli atente, en kio konsistas tiu ĉi "leĝo", kaj kia puno atendas la rompanton de ĝi. Malsupre ni montros, ke tio, kion oni prenis por natura leĝo de ĉiuj lingvoj, estas nur *okaza* apartenaĵo de *kelkaj* lingvoj; sed ni supozu por momento, ke tio ĉi efektive estas leĝo, kiu ekzistas en ĉiuj lingvoj; kio do sekvas de ĝi? Se ia regulo efektive ekzistas en ĉiuj lingvoj kaj ni ne komprenas la kaŭzon kaj la celon de tiu ĉi regulo, kio do devigas nin ankaŭ blinde akcepti tiun ĉi regulon, se ĝi estas por ni maloportuna? Ĉiuj riveroj en la mondo havas fluon tre kurban kaj tre neregulan; sed se iu, kun instrumentoj en la mano, arte fosante kanalon, volus sekvi tiun ĉi "leĝon naturan", — ĉu vi laŭdus lin, aŭ ĉu vi eĉ iom povus lin pravigi? Ĉiuj lingvoj naturaj havas grandan amason da malregulaĵoj kaj malfacilaĵoj, — ĉu ni ankaŭ devas sekvi tiun ĉi "leĝon naturan" kaj intence fari nian lingvon malregula kaj malfacila?

Eĉ se ni tute ne scius la esencon de la akcento, eĉ tiam estus la plej nature, se anstataŭ tro filozofie fosi en teorioj ni dirus al ni praktike: la ceteraj lingvoj havas akcenton malregulan kaj malfacilan, kiun ili jam ŝanĝi ne povas; ni havas ankoraŭ liberan elekton kaj povas sen la plej malgranda malutilo havi akcenton facilan kaj regulan; sekve ni devas elekti la lastan, tute ne rompante al ni la kapon, pro kia kaŭzo la lingvoj kreitaj blinde tiun ĉi oportunajon ne havas; ĉar estus ridinde imiti kun malutilo al ni mem iajn misteraĵojn, se ni ne komprenas ilian sencon kaj celon. Sed se ni rigardos pli profunde, ni baldaŭ vidos, ke la "leĝo de la akcento" eĉ ne estas ia misteraĵo, kaj tio, en kio ni serĉis ian leĝon naturan, estas simpla okazaĵo, kiu kun la esenco kaj spirito de la lingvoj havas nenion komunan. La lingvo de ĉiu nacio kreiĝis tiam, kiam la nacio ne sciis ankoraŭ skribi kaj la lingvo transiradis de unu homo al alia nur per la orelo; la orelo de Johano aŭ Petro ofte ne bone aŭdadis, la memoro senkontrola ne bone tenadis, kaj tiel la vortoj renversiĝadis kaj akceptadis diversajn sovaĝajn formojn; kontroli la vortojn per skribado oni ne povis, kaj tial la plej puraj kaj senŝanĝaj restis nur tiuj silaboj, kiujn oni bone *aŭdis*, t.e. la silaboj *akcentitaj*. Jen estas la tuta mistera kaŭzo, kial la silaboj akcentitaj ofte restadis senŝanĝaj, dum la tuta cetera parto de l'vorto ŝanĝiĝadis — el simpla senhelpa *neceseco* kaj ne el ia lingva leĝeco. De la momento, kiam ia popolo ricevas skriban literaturon, ni jam tian blindan lingvan akrobataĵon ne renkontas. Sed se ni, havantaj literaturon skriban pli frue ol literaturon buŝan kaj orelan, sciantaj skribi kaj legi kaj povantaj gardi la lingvon de blinda malbonorela renversiĝado, volus intence fari la erarojn, kiujn niaj neinstruitaj antaŭuloj faris el blinda neceseco, — ni estus similaj je tiu naivulo, kiu, havante du bonajn okulojn, intence falis super ŝtono kaj vundis al si la kapon... ĉar li vidis, ke antaŭ li multaj blinduloj falis super tiu ĉi ŝtono, kaj li pensis, ke oni tiel necese devas fari!

Sekve se ni eĉ en nenia blinde kreita lingvo trovus la transportadon de l'akcento de unu silabo sur silabon alian pro konstanteco de l' akcento, tio ĉi neniel devus nin deteni de enkonduki tiun ĉi oportunaĵon en nian artan kaj konscie kreitan lingvon, tiel same kiel la malregula konjugado en ĉiuj lingvoj ne sole ne devigas, sed ankaŭ tute ne pravigas nin enkonduki intence malregulan konjugadon en nian lingvon. Sed por forigi ĉiujn dubojn de la personoj, kiuj, ne konfidante al tio, kion la praktiko al ili montras, teorie timas, ke eble... eble... oni ne scias... oni ne vidis ekzemplojn k.t.p. — ni fine montros ankoraŭ, ke la transportado de l'akcento de unu silabo sur alian ne estas eĉ ia ennovaĵo de nia flanko, sed ĝi ekzistas jam en la lingvoj naturaj, kvankam tiuj ĉi tute ne bezonis zorgi pri facileco. Apartajn ekzemplojn vi trovos sur ĉiu paŝo en ĉiu lingvo; sed, por ne malproksime foriri de nia lando, ni bezonas nur kompari la lingvojn rusan kaj polan, kaj ni vidos, ke *tute tio sama*, kion ni faris en nia lingvo, estis jam antaŭe farita de la naturo mem en la natura lingvo pola. De neniuj kaj de nenio devigata, la lingvo pola akceptis konstantan akcenton sur la antaŭlasta silabo, kvankam en aliaj slavaj lingvoj en tiuj ĉi vortoj la akcento estas alia; kaj tion ĉi la lingvo pola faris tute sen ia mallongigado de vortoj, sen ia forĵetado de silaboj k.t.p., sed ĝi simple sencere monie transportis la akcenton de unu silabo sur alian; sen ia filozofado ĝi metis la akcenton de ĉiu vorto sur la silabon antaŭlastan, tute ne demandante, ĉu tiu silabo estas tia aŭ alia kaj ĉu ĝi havas la forton por porti sur si la akcenton, kaj tute ne timante, ke oni diros, ke ĝi estas kontraŭnatura. Kaj tion ĉi la lingvo faris ne sole kun la fremdaj, arte enportitaj vortoj (kiel ekzemple “adwokat”, “inzynier”, “telegraf”, “spirytus”, “manuskript”, “papier”, “tytulu”, “artikulu” k.t.p.) sed ankaŭ en ĉiuj senescepte vortoj pure slavaj (ekzemple la rusaj “malenki”, “vojna”, “okno”, “ĉelovjek”, “ulica” k.c. k.c. k.c. en la tuta lingvo — estas en la lingvo pola “malenki”, “wojna”, “okno”, “czlowiek”, “ulica”, k.c. k.c. k.c.) — jam ne apartaj disĵetitaj ekzemploj, sed miloj kaj dekoj da miloj — tuta lingvo! (Se en la tuta lingvo vi en kelkaj tre malmultaj vortoj trovas deflankiĝon de tiu ĉi regulo, vi facile rimarkos, ke tiun ĉi deflankiĝon faris ne la popolo, sed la instruituloj, tute sen ia kaŭzo kaj bezono kaj kontraŭ la spirito de la lingvo).

Nun al la konkludo. Ke konstanta regulo por la akcento en lingvo lernota estas mil fojojn pli bona ol akcento neregula — neniuj dubos; se ni povas ĝin fari, ni devas ĝin fari, se eĉ neniuj el la blinde kreitaj lingvoj ĝin farus. Se ni al tio ĉi vidas, ke lingvo natura, *kiu ja tute ne bezonis zorgi pri facileco*, faris tion saman el simpla kaprico kaj tute ne suferas de tio, — tiom pli ni jam ne povas dubi, ke en lingvo arta, por kiu facileco estas tre grava, oni devis sen ia eĉ minuta ŝanceliĝo akcepti la akcenton konstantan, eĉ se la demando estus levita antaŭ la kreiĝo de la lingvo. Sed se nun, kiam la lingvo estas jam kreita kaj uzata, ni volus fari en ĝi grandan rompadon por... sen ia kaŭzo kaj celo... doni al ĝi maloportunaĵon anstataŭ oportunaĵo — tio ĉi estus jam facilanimeco nepardonebla!

El diversaj faritaj teoriaj proponoj ni analizis nur unu — la ŝajne plej bonan, kaj ni montris, ke tio, kio en la teorio ŝajnas tre bona kaj trovas aprobantojn, en la praktiko ofte havas nenan signifon. El la diritaĵo ni faras la konkludon: proponante aŭ enkondukante (private) ian ŝanĝon en nia lingvo, neniam gvidu vin per konsideradoj *teoriaj*, kiel ajn belaj ili ŝajnas, sed ĉiam demandu vin, kian *praktikan* signifon la ŝanĝo havas. Pri la ekzemplo de teoria propono ni tiel multe parolis, ĉar tiu ĉi kategorio da proponoj apartenas al la plej danĝeraj: en tia afero, kiel la nia, la homoj plej volonte akceptas proponojn, kiuj havas fizionomion instruitan, kaj se oni parolas al la homoj en instruita formo kaj en la nomo de leĝoj sciencaj, tiam el 100 personoj 99 ĝin blinde aprobas kaj nur unu demandas sin: “tre bele, sed kian signifon ĝi havas por *nia* lingvo?” “ [LR 72 A. *La Esperantisto*, 1891, p. 50]

M.§ 11 [Kunmetitaj vortoj]

I. Fundamentaj Tekstoj

1. Gramatikoj

11. [1] Les mots composés s'obtiennent par la simple réunion des éléments qui les forment, écrits ensemble, mais séparés par de petits traits¹). [2] Le mot fondamental doit toujours être à la fin. [3] Les terminaisons grammaticales sont considérées comme des mots. Ex.: *vapor'sip'o* (bateau à vapeur) est formé de: *vapor* — vapeur, *ŝip* — bateau, *o* — terminaison caractéristique du substantif.

1. [4] Dans les lettres ou dans les ouvrages, qui s'adressent à des personnes connaissant déjà la langue, on peut omettre ces petits traits. [5] Ils ont pour but de permettre à tous de trouver aisément, dans le dictionnaire, le sens précis de chacun des éléments du mot, et d'en obtenir ainsi la signification complète, sans aucune étude préalable de la grammaire.

11. [1] Compound words are formed by the simple junction of roots, ([2] the principal word standing last), which are written as a single word, but, in elementary works, separated by a small line ('). [3] Grammatical terminations are considered as independent words. E. g. *vapor'sip'o*, „steamboat” is composed of the roots *vapor*, „steam”, and *ŝip*, „a boat”, with the substantival termination *o*.

11. [1] Zusammengesetzte Wörter entstehen durch einfache Anreihung der Wörter, indem man sie durch hochstehende Striche trennt¹. [2] Das Grundwort kommt zuletzt. [3] Grammatikalische Endungen werden als selbstständige Wörter betrachtet. Z. B. *vapor'sip'o* (Dampfschiff) besteht aus *vapor*, Dampf, *ŝip*, Schiff, und *o*=Endung des Substantivs.

1. [4] Im Briefwechsel mit solchen Personen, die der internationalen Sprache schon mächtig sind, oder in Werken, die für eben solche Personen bestimmt sind; ¹¹² fallen die hochstehenden Striche zwischen den verschiedenen Theilen der Wörter weg.

11. [1] Сложные слова образуются простымъ сліяніемъ словъ ([2] главное на концѣ), которыя пишутся вмѣстѣ, но отдѣляются другъ отъ друга черточкой¹). [3] Грамматическія окончанія разсматриваются также какъ самостоятельныя слова (**Примѣръ:** *vapor|ŝip|o*, пароходъ — изъ *vapor* парь, *ŝip* корабль, *o* окончаніе существительныхъ).

1. Въ письмахъ и сочиненіяхъ, назначенныхъ для лицъ, владѣющихъ уже международнымъ языкомъ, черточки между частями словъ не употребляются.

11. [1] Wyrazy złożone tworzą się przez proste połączenie wyrazów ([2] główny na końcu). **Przykład:** *vapor/ŝip/o*, parostatek — z *vapor* para, *ŝip* okręt, *o* — końcówka rzeczownika.

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

11. [1] Zusammengesetzte Wörter entstehen durch einfache Anreihung der Wörter, indem man sie durch hochstehende Striche trennt¹. [2] Das Grundwort kommt zuletzt. [3] Grammatikalische Endungen werden als selbstständige Wörter betrachtet. Z. B. *vapor'sip'o* (Dampfschiff) besteht aus *vapor*, Dampf, *ŝip*, Schiff, und *o*=Endung des Substantivs.

¹¹² Tiel: Semikolo, ne komo!

1. [4] Im Briefwechsel mit solchen Personen, die der internationalen Sprache schon mächtig sind, oder in Werken, die für eben solche Personen bestimmt sind; fallen die hochstehenden Striche zwischen den verschiedenen Theilen der Wörter weg.

Zamenhofa traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

11. [1] Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (radikoj) ([2] la ĉefa vorto staras en la fino); ili estas kune skribitaj kiel unu vorto, sed, en elementaj verkoj, disigitaj per streketoj (|)(1). [3] La gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj. Ekz. *vapor|ŝip|o* estas formita de: *vapor*, *ŝip* kaj *o* (finiĝo de la substantivo).

2. UV (enkonduko 2)

Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enkonduko 1]. Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, tiel ekzemple la vorto « **frat'in'o** », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enkonduko 2].

Tout ce qui est écrit en langue internationale Esperanto peut se comprendre à l'aide de ce dictionnaire. Les mots qui forment ensemble une seule idée s'écrivent ensemble mais se séparent les uns des autres par de petits traits. Ainsi, par exemple, le mot « **frat'in'o** », qui n'exprime qu'une idée est formé de trois mots, et chacun d'eux se cherche à part.

Everything written in the international language Esperanto can be translated by means of this vocabulary. If several words are required to express one idea, they must be written in one but, separated by commas; e. g. « **frat'in'o** » though one idea, is yet composed of three words, which must be looked for separately in the vocabulary.

Alles, was in der internationalen Sprache Esperanto geschrieben ist, kann man mit Hilfe dieses Wörterbuches verstehen. Wörter, welche zusammen einen Begriff bilden, werden zusammen geschrieben, aber von einander, durch einen senkrechten Strich getrennt; so ist z. B. das Wort « **frat'in'o** », welches einen Begriff bildet, aus drei Wörtern zusammengesetzt, deren jedes besonders zu suchen ist.

Все, что написано на международномъ языкѣ Эсперанто, можно понимать съ помощью этого словаря. Слова составляющія вмѣстѣ одно понятіе, пишутся вмѣстѣ, но отдѣляются другъ отъ друга черточкой; такъ наприимѣръ слово « **frat'in'o** », составляя одно понятіе, сложено изъ трехъ словъ, изъ которыхъ каждое надо искать отдѣльно.

Wszystko co napisano w języku międzynarodowyn Esperanto, można zrozumieć przy pomocy tego słownika. Wyrazy, stanowiące razem jedno pojęcie, pisze się razem, lecz oddziela się króską pionową; tak na przykład wyraz « **frat'in'o** » stanowiący jedno pojęcie, złożony jest z trzech wyrazów, z których każdego należy szukać oddzielnie.

3. FE 27

FE 27.5 fine klarigas: Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinarie la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo.

4. Dua Libro 1888 (eksterfundamenta interpret-helpo)

DL 7.1: Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de simplaj vortoj; prenataj estas ordinare la puraj radikoj, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t.e. la radikon kune kun la finiĝo.

DL 5.36: La formojn kunmetitajn (ekzemple: mi faradas, mi estis farinta ... kaj ceterajn) oni devas uzi sole tian, kian {de 1888: tiam, kiam} la senco ĝin necese postulas.

II. Komentoj

Literaturo (selekto): **Nylén**, Paul. Sonoj kaj vortoj de Esperanto. Komentario pri elparolo kaj vortfarado. Stockholm 1930 (citas la pli fruan literaturon sur p. 31). - **Cherpillod**, André. Vortkonsisto, Vortfarado, Vortanalizo, Vortordo. Courgenard 1996. - **Cherpillod**, André. La vortfarado en dek lecionoj. Courgenard 2003 (listo de la pli frua literaturo sur p. 5). - **Brosch**, Cyril. Vortfarado el la vidpunktoj de la hindeŭropista lingvoscienco kaj de esperantologio. [diplom-laboraĵo] Poznań 2008.¹¹³ - **Wennergren**, Bertilo. Bazformoj de radikoj en vortaroj. En: EES 4 (2009), p. 7-22¹¹⁴; ankaŭ en: Lingva Kritiko (Interneta retejo) 2008.¹¹⁵ - **Jansen**, Wim. Radikoj kaj vortoj en esperanto. En: EES 6 (2013), p. 9-43.

1. Superrigardo

- 1** R 11 pri vortoj kunmetitaj, alivorte pri la **vortfarado**, estas la kerno de unu el la tri kolonoj de la relativa facileco de Esperanto, kiel ilin priskribas Z en la Unua Libro. Ĝi distingas Esperanton de ĉiuj referenc-lingvoj kaj eble de ĉiuj aliaj lingvoj entute: „... la reciprokaj rilatoj inter la vortoj ... estas esprimataj per la kunigo de **senŝanĝaj vortoj**, kiu[j] ĉiam konservas egalan signifon, tute egale, ĉu [ili] estos uzata[j] en la fino aŭ en la komenco de alia vorto aŭ memstare, [...] ĉiu vorto kun egala rajto povas esti uzata kiel **vorto radika** aŭ kiel **gramatika parteto**. [UL 6]. – plenan citaĵon vd. supre.
- 2** Ĉar ĝi estas tiel kerna kaj nekutima, jam tre frue ekestis multaj demandoj pri la ĝusta kompreno de R 11 kaj sekve abunda literaturo. La teorio pri vortfarado de Couturat de 1907 estis unu el la kialoj, kiuj kondukis al la Ido-skismo kaj instigis esperantistojn al esplorado. Plej influhava fariĝis la studoj de de Saussure de 1910. Pri parton el ĝi decidis Akademio kaj LK ankoraŭ antaŭ 1914.
- 3** Post la refondo de la Akademio en 1948 la temo denove estis traktita. Ĝi decidis pri „**Konstatoj**“ pri la vortfarado (Aktoj I, 1963-1967) kaj aplikis ilin en BRO (Aktoj II, 1968-1974), celante fiksi la signifo-kategoriojn de la radikoj (o-vorto, a-vorto, i-vorto k.t.p.). Tiu teorio de la Akademio ĝis nuntempe estas disputata, ĉefe pro la metode nesufiĉa analizo de la Fundamentaj tekstoj kaj parte pro la trovitaj rezultoj. Fakte la teorio pri la vortfarado de la Akademio ne havas norman bazon en la Fundamento. Ĝi adaptas la Fundamentajn tekstoj al la teorio, dum ĝi devus adapti la teorion al la preskriboj de la F-to. Praktike duboj tamen ekzistas nur por kelkaj dekoj da radikoj. Plej ofte temas pri la demando, ĉu radiko estas verba aŭ substantiva (i-vorto aŭ o-vorto).

¹¹³ <http://www.cyrilbrosch.net/wb/media/diplomCB.pdf>.

¹¹⁴ Elŝutebla de: www2.math.uu.se/esperanto/ees4.pdf.

¹¹⁵ <http://lingvakritiko.com/2008/04/18/bazformoj-de-radikoj-en-vortaroj/>.

- 4 R 11 koncernas nur „**kunmetitajn**“ vortojn, **kontraste** al **apudmetitaj**, al kiuj la regulo **ne** estas aplikebla (ekz. pli-malpli, surda-muta, nigra-blanka, nigra-blanka-ruĝa [Z 1903]¹¹⁶, kapo-pieden [Beaufront 1894] k.t.p.).

2. Historio de la disputoj pri vortfarado

- 5 En 1959 la tiama prezidanto de la Akademio J.R.G. Isbrucker¹¹⁷ resumis la historion de la disputo en la periodaĵo *Esperantologio*¹¹⁸. Lia artikolo poste estis represita en la samjara Oficiala Bulteno (OB "2" = 8¹¹⁹). Ni tie ĉi dokumentas ĝian unuan parton pri tiu historio. Komentoj de BK estas en angulaj krampoj aŭ piednotoj.

6 Isbrucker. Pri la vortfarado en Esperanto. 1959:

[1] „La sistemo de vortfarado estas unu el la fundamentoj de la lingvo kaj ĝi certe meritas detalan esploron. La studo de la Esperanta vortfarado estas des pli interesa, ĉar pruviĝis, ke pri ĝi ekzistas, aŭ almenaŭ ekzistis, tre diversaj opinioj, kiuj ofte estis tute kontraŭaj unu al la alia kaj kiuj eĉ kaŭzis viglajn disputojn inter la defendantoj de la diversaj komprenoj. Je la unua rigardo ŝajnas iomete strange, ke D-ro ZAMENHOF neniam enmiksitis sin en tiuj ĉi disputoj,¹²⁰ ĉar oni povus atendi, ke li estis la plej kompetenta homo por decidi, kiu kompreno estas ĝusta kaj kiu ne. Tamen se oni pli detale rigardas la aferon, oni facile venas al la konkludo, ke ZAMENHOF tute prave sin detenis. La aŭtoroj, kiuj sin okupis pri la Esperanta vortfarado, ofte eniris en teoriajn detalojn, kiuj neniam estis konsiderataj de la aŭtoro de Esperanto kiam li kreis la lingvon. Kiel tio ofte okazas, majstroverko ne estas la rezultato de teoriaj esploroj, sed ĝi dankas sian ekziston al klara rigardo kaj intuitiva sento, kiuj estis kapablaj krei sistemon, kies altan valoron postaj teoriaj studoj povis nur konfirmi. Efektive la aluditaj studoj montris, ke la Esperanta vortfarado estas tiel logika kaj bona, ke eĉ aroj da sciencaj homoj ne povus esti plibonigintaj ĝin. Mi esperas, ke mi povos konvinki vin pri tio.

[2] La pli detala studo de la vortfarado de Esperanto trovis sian originon en kelkaj broŝuroj de COUTURAT, aperintaj en la jaro 1907. En tiuj broŝuroj COUTURAT pritraktis la vortderivadon en Esperanto, sed li havis pri tiu ĉi afero tute eraran komprenon. Li eĉ starigis principon pri derivado tute arbitran kaj postulis, ke Esperanto devas akordiĝi kun tiu principo, kvankam ĝi neniam estis uzita de Zamenhof dum la konstruo de la lingvo. COUTURAT insistis pri sia miskompreno kaj opiniis, ke tial Esperanto bezonis reformojn kaj tiu malĝusta ideo estis unu el la kaŭzoj, kiuj kondukis al la ldista skismo.

[3] La kritikoj de COUTURAT estis la unua instigo por la defendantoj de Esperanto okupi sin pri la demando pri la derivado kaj vortfarado kaj la idista ĉefo baldaŭ trovis kompetentan kontraŭulon en la persono de D-ro RENE DE SAUSSURE, kiu per la de li adoptita pseŭdonimo ANTIDO klare montris ĉe kiu flanko liaj simpatioj estis. Kiel ajn ĉagrena povas esti la posta malfideleco al la ZAMENHOFA lingvo de tiu talenta esploristo, oni ne povas nei, ke li havas pri la Esperanta vortteorio la plej

685

¹¹⁶ „La vaporŝipo portas sur la posta flanko la germanan standardon, nigra-blanka-ruĝan, ...“ [FK 203]. – Koloroj de la Germana Imperio ĝis 1919, nun nigra-ruĝa-ora.

¹¹⁷ En *Esperantologio* li prezentas sin en piednoto jene: „Prezidanto de la Akademio de Esperanto; inĝeniero, antaŭa vicdirektoro de teknika mezlernejo, Hago, Nederlando“.

¹¹⁸ Vol. 2, n-ro 1, Nov. 1959, p. 13-36.

¹¹⁹ Rete legebla en http://eo.wikipedia.org/wiki/Pri_la_Vortfarado_en_Esperanto.

¹²⁰ Zamenhof neniam akiris la akademian gradon de *doctor medicinae*, „doktoro“ estas uzata kiel sinonimo de „kuracisto“. Kial Z „staris flanke“ li motivigas en LR 140 A (1904) kaj samsence en LR 140 B (1910): „... por nia *afero*, ĉia polemiko, en kiun mi estus enmiksita, estus tre danĝera. Multe pli bone estos, se mi staros flanke kaj lasos la decidon pri ĉiuj dubaj demandoj al la Akademio ...“

grandan meriton. Laŭ mia opinio li estis la nura, kiu tute klare donis fundamenton al la principoj de la Esperanta vortfarado kaj kiu pruvis, ke nur en Esperanto la kunmeto de la vortoj el la elementoj estas tute logika. En Aŭgusto 1910 DE SAUSSURE aperigis en Scienca Revuo artikolon titolitan „La logika bazo de Vortfarado en Esperanto” kaj la saman artikolon li prezentis al la Esperantista Akademio¹²¹ en formo de aparta broŝuro okaze de la 6-a Universala Kongreso de Esperanto en Washington en 1910.

[4] La Akademio zorge esploris la faritan proponon kaj la rezultato de la rimarkoj de la Akademianoj estas kunmetita en „Raporto de la Prezidanto de la Akademio”, kiun oni povas trovi en la „Oficiala Gazeto Esperantista” de la 25-a de Aprilo 1911. La konkludo de la Prezidanto en tiu ĉi okazo estis, „ke la teorio de Antido estas juĝita de la plimulto (per 10 voĉoj kontraŭ 3) kiel ĝenerale aŭ principe aprobinda, sed ke se ĝi ankoraŭ ne estas sufiĉe perfekta en sia nuna formo, por ke oni povu de nun plene akcepti ĝin tia, kiel ĝi estas, oni povas tamen preni ĝin kiel bazon de diskutado por esti klarigota, korektota kaj plenigota laŭbezone per kolektiva laboro de ĉiuj kompetentuloj”. Kaj S-ro Boirac daŭrigas: „Se vi aprobas tiun konkludon la ekzameno de la tuta demando povas esti komisiata al speciala komitato elektota de la Akademio, al kiu mi ankaŭ resendos la laborojn ricevatajn aŭ ricevotajn el kelkaj Lingvokomitatoj pri tiu sama temo”. Tia komisiono estis nomata en Decembro 1911 kaj ĝi konsistis el de Saussure kiel prezidanto kaj Grabowski kaj Höveler [1859-1918] kiel membroj. Tamen pro multaj okupoj, kiujn li havis kiel Direktoro de la Gramatika Sekcio de la Akademio, GRABOWSKI devis ekŝiĝi el la komisiono. Lia loko nur poste estis okupata de S-ro CART.

[5] En sia raporto al la Oka Kongreso S-ro BOIRAC, Prezidanto de la Akademio, diris pri la laboroj de tiu ĉi komisiono: „Car la temo pritraktota estas tre vasta kaj malfacila pro la diverseco de la vid- punktoj (vidpunkto praktika kaj vidpunkto teoria) oni decidis diskuti unu post la alia ĉiun el la 5 proponoj de ANTIDO kaj tiu me- todo montriĝis bona, ĉar S-roj HOVELER kaj DE SAUSSURE tuj in- terkonsentis pri la Propono 1-a kaj pri la Propono 2-a S-ro HOVELER nur deziras ŝanĝeton en la formo de la „Principo de sufiĉo”. Tiu akordiĝo pri certaj punktoj facile kredigus, ke DE SAUSSURE kaj HOVELER en la ĉefaj aferoj samopiniis, sed fakte tio estis tute kontraŭa, kiel evidentiĝos kiam ni estos rigardintaj de pli proksime la diversajn teoriojn. Tamen la parta interkonsento jam ebligis, ke la du jam aluditaj proponoj de ANTIDO estu submetataj al la juĝo de la tuta Akademio kaj poste al tiu de la Lingva Komitato. En Oktobro 1912 la tuta Akademio do studis la du proponojn kaj ili estis aprobataj kun granda plimulto, la dua kun iomete modifita teksto de HÖVELER. En Majo 1913 la Prezidanto de la Lingva Komitato povis komuniki, ke la de la Akademio aprobita teksto estas ankaŭ akceptita de la Lingva Komitato kaj ke ĝi do fariĝis oficiala.

[6] Tiel la unua parto de la laboro de la Komisiono pri Vortfarado estis finita kaj ni jam havas en la akceptita rezolucio certan bazon por la Esperanta Vortteorio. Tamen la laboro ankoraŭ farota estis evidente pli granda ol tiu, kiu jam estis farita. La du jam akceptitaj proponoj de ANTIDO restis sur ĝenerala tereno kaj tial povis esti akceptataj de homoj, kiuj havis tre malsamajn opiniojn. Tiuj opinioj koncernis alian parton de la teorio, en kiu la ideoj estis tute kontraŭaj unu al la alia. Tio jam evidentiĝis dum la jaroj, dum kiuj la demando pri la Vortfarado estis konsiderata kaj la diversaj opinioj trovis formon en kelkaj broŝuroj kaj artikoloj, en kiuj la partioj defendis siajn vidpunktojn kun sama fervoro kaj diligento. Mi povas citi la jenajn verkaĵojn:

¹²¹ Post sia fondo en 1908, tiu estis la oficiala nomo de la Akademio kun tiuepoke maksimume 18 membrojn, vd. la ĉap. „Ekesto de la lingvaj institucioj”. La nuna nomo „Akademio de Esperanto” ekzistas nur de la refondo en 1948.

- „La Elementoj kaj la Vortfarado”, de ĈEFEĈ (pseŭdonimo de HÖVELER) , Februaro 1911.
- „Pluaj Argumentoj por pruvi, ke la teorio: „La radikoj en Esperanto havas gramatikan karakteron” kontraŭstaras la intencojn de la Fundamento”, de la sama aŭtoro, Januaro 1912.
- „Studo pri la Vortfarado de Esperanto”, de D-ro PANEL, Februaro 1912.
- „La Esperanta Vortfarado laŭ la Fundamento”, de PAUL FRUICIER, 1914.
- „Pri la gramatika specifikado de la fundamentaj radikoj”, de FAUVART-BASTOUL, 1914.

[7] Okaze de la deka Kongreso en Parizo, 1914, ANTIDO ankaŭ aperigis verketon, titolitan: „La Vortteorio en Esperanto”, en kiu li resumis la tiutempan staton de la koncerna demando kaj detale klarigis sian tutan teorion. Bedaŭrinde la eksplodo de la unua mondmilito dum longa tempo malhelpis la regulan laboron de la tuta Akademio kaj de ĝiaj komisionoj kaj do ne estas mirige, ke la tuta afero restis en sia nesolvita stato. Tamen DE SAUSSURE daŭrigis sian laboron kaj reesploris la tutan temon post kiam GRABOWSKI en la komisiono estis anstataŭita de CART. Studinte ankaŭ aliajn teoriojn kaj diversajn kritikojn, DE SAUSSURE verkis novan raporton, aperintan en 1915 kaj titolitan: „Fundamentaj Reguloj de la Vortteorio en Esperanto”, en kiu la tuta teorio estas esprimita per 16 reguloj. Tiu raporto estis denove proponata al la Akademio kaj samtempe la aŭtoro sendis ĝin al ĉiuj anoj de la Lingva Komitato, petante ilian opinion. Laŭ mia scio la raporto neniam estis definitive studata de la Akademio kaj ĝis nun la demando do restis en sia nefinita stato. Ke post la milito kaj post la refunkciado de la lingvaj institucioj la laboro ne estas rekomencita, certe grandparte trovis sian kaŭzon en la malfideleco al Esperanto de DE SAUSSURE kaj en la morto de HÖVELER. Tamen estus tre dezirinde se la nuna Akademio, bazante sin sur la jam faritaj laboroj fine venu al definitiva solvo de la demando.

[8] Jen estas do mallonge la historio de la esploro pri Esperanta Vortfarado. Ni nun transiros al la pli detala studo de la demando mem. ...“

3. La Akademiaj „Konstatoj“ pri la vortfarado

- 7 En la „oficiala parto“ de Aktoj II, p. 37, tuj post la ĉapitro pri OA 8 sekvas ĉapitro pri BRO (pri ĝi vd. apartan sekcion en la Kvara Libro de tiu ĉi komentario). Tie tekstas:

„IV. ALIAJ LABOROJ faritaj de la Akademio okaze de la starigo de B.R.O.

A. KATEGORIECO DE LA RADIKOJ

Oni scias, ke la Akademio paralele studis la vortfaradon kaj establis tekston de “Konstatoj” (“Aktoj de la Akademio” 1963-67). Tiuj konstatoj agnoskas, ke la Universala Vortaro kaj ties Oficialaj Aldonoj ne estis redaktitaj kun la celo fiksi la signifokategoriojn de la radikoj. Tiun kategorion nerekte fiksas la uzado ĉe Zamenhof kaj la bonaj aŭtoroj.

Tamen por la grandega plimulto de la radikoj tiu kategorio estas evidenta: *arbo*, *elefanto*, *patro*, *tablo* estas substantivaj; *bela*, *granda*, *nobla*, *tenera* estas adjektivaj; *bati*, *fari*, *marŝi*, *ridi* estas verbaj. En ili la finaĵo, vidpunkte de la signifo, estas senutila, pleonasma. Nur por kelkaj dekoj da radikoj eblas heziti; kaj por tiuj dubaj okazoj la alternativo plej ofte konsistas en tio, ĉu temas aŭ ne temas pri verbaj radikoj.

Por tion decidi, ni apogis nin sur la § 3, 2 de la Rekomendoj pri vortfarado (“Aktoj” p. 69¹²²), kiu tekstas:

“2) kun radiko de verba kategorio la finaĵo -o havas la signifon de ago kaj konkreta manifestiĝo aŭ rezulto de tiu ago; ekz-e: la kuro, la danco, la konstruo. Kontraste, aĵ montras ion konkretan estigitan de la ago, dum ad havas la signifon de ago konsiderata en sia daŭro; ekz-e: la dancado, la konstruado, la konstruaĵo.”

Rezultas el tiu teksto, ke, se o-derivaĵo de radiko supozita verba neniam povas signifi *agon*, ĝi tutsimple ne estas verba radiko.

Ekzemple, *floro*, *pako*, *urino* neniam signifas *agon*, sed male ion tute konkretan; sekve la radikoj *flor/*, *pak/*, *urin/* ja ne estas verbaj sed substantivaj. Plie de tiuj substantivaj radikoj tute logike kaj facile deriviĝas la verboj *flori*, *paki*, *urini*. Kaj tio plene respondas al la preskriboj de Zamenhof en siaj vortaroj rusa, germana kaj franca kaj ankaŭ al la uzado ĉe la bonaj aŭtoroj.

Ni notu tie ĉi, ke, por fiksi tiujn kategoriojn, la Akademio sin apogis, krom sur la oficialaj dokumentoj, ankaŭ sur la laboroj de Eugen WÜSTER, kiel ni jam diris en I.“

- 8 La lasta alineo referencas al jena teksto en Aktoj II, p. 27-28:

„Alia karakterizo de tiu Baza Radikaro Oficiala estas, ke ĉiu radiko, kaj se eble ĉiu elemento, estas klasita laŭ sia signifokategorio substantiva, verba aŭ adjektiva; tiel la Baza [28] Radikaro Oficiala aperas kiel praktika komplemento al la “Konstatoj pri la Vortfarado”, kiun ni publikigis en la antaŭaj “Aktoj”. Tiu radikaro estas la unua oficiala verko, kiu speciale kaj aparte prizorgas la signifokategoriojn. Por la fiksado de tiuj kategorioj estis tre atentata la libreto de Eugen WÜSTER “La Oficiala Radikaro kun enkonduko kaj notoj” (1923. XVI + 70 paĝoj), kvankam la Akademio ne povis sekvi ĉiujn proponojn de tiu aŭtoro. Oni cetere atentis, ke malgraŭ sia titolo tiu valora verko estis tute privata.“

- 9 La unua alineo referencas al jena teksto el Aktoj I:

„II. KONSTATOJ DE LA SEKCIO

I. NI KONSTATAS, ke en la kvinlingva Universala Vortaro de la “Fundamento de Esperanto” la Esperantaj vortoj estas prezentitaj sen finaĵo kiel nudaj radikoj kaj estas tradukitaj en la naciajn lingvojn parte per substantivo, parte per adjektivo, parte per infinitivo de verbo. Laŭ tio do oni povas distingi tri grandajn kategoriojn de radikoj: substantive tradukitajn, adjektive tradukitajn kaj infinitive (verbe) tradukitajn. Ĉar laŭ la sama Vortaro la substantivecon markas la finaĵo -o , la adjektivecon la finaĵo -a kaj la verbo-reprezantan infinitivon la finaĵo -i , tiujn tri kategoriojn oni povas nomi O-radikoj, A-radikoj kaj I-radikoj kaj signi per O-, A- kaj I-.

RIM. Krome ekzistas ankaŭ adverbe tradukitaj radikoj (E-radikoj) kaj aliaj elementoj, kiuj ne estas finaĵbezonaĵoj (numeraloj, pronomoj, tabelvortoj, primitivaj adverboj, prepozicioj, konjunkcioj, partikuloj, interjekcioj). Ĉiuj ĉi tamen aŭ ne havas signifon en la vortfarado, aŭ estas klaseblaj en iun el la tri grandaj kategorioj, aŭ postulas specialan konsideron.

- 10 **Komentoj:** Jam la unua frazo estas erariga („en la kvinlingva Universala Vortaro“). Ĝi neglektas la samrangecon de FG, FE kaj UV (A 2.1) kaj la preskribon, ke postaj aldonoj al la F-to (OA) ekhavas la saman statuson de netuŝebleco kiel la vortoj enestintaj jam en 1905 (A 10.4). Tiu misa redukto nur al UV ankaŭ poste ne estas korrigita de la Akademio.

685

¹²² Tiel en la originala eld. de Aktoj I. En la reeldono de 2007 estas p. 58.

II. NI KONSTATAS, ke laŭ la Fundamenta Gramatiko la finaĵoj “estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj” (R. 11). Tio tamen ne signifas, ke ili estas uzataj kiel memstaraj vortoj, ĉar tiaj provoj sporadaj (ekz-e “la mastro as fore” aŭ “l’o necesa” aŭ “a birdo”) ĝis nun ne estis imitataj; tio signifas nur, ke ili povas funkcii kiel substantiviga, adjektiviga aŭ verbiga elementoj (sufiksoj). Efektive, el la tri kategorioj de radikoj (O-, A-, I-) kaj el la tri finaĵoj (-o, -a, -i) oni povas fari naŭ kombinaĵojn: O + o, O + a, O + i; A + a, A + o, A + i; I + i, I + o, I + a). Ekzemple oleo, olea, olei; avida, avido, avidi; skribi, skribo, skriba.

III. NI KONSTATAS, ke en la “Fundamento de Esperanto” ne troviĝas regulo, kiu malpermesus, ke iun ajn finaĵon oni uzu kun iu ajn radiko; la sola kondiĉo de la uzebleco estas, ke la formita vorto havu ian sencon.

IV. NI KONSTATAS, ke, kiam la kategorio de la radiko estas identa kun la karaktero de la finaĵo (O + o, A + a, I + i), la finaĵoj havas ja gramatikan signifon, ĉar ili signas la singularon kaj la nominativan kazon, aŭ la infinitivon, sed ili ne havas vortfaran, ĉar la vortoj formitaj per ili havas la saman tradukon, kiel la nuda radiko en la Universala Vortaro. Oni povas do diri, ke la finaĵoj tiaokaze estas pleonasmaj el la vidpunkto de la vortfarado. Tiu pleonasmeco signifas, ke ne nur la finaĵoj markas la signifo-kategorion substantivan, adjektivan aŭ verban, sed ke ankaŭ la substantiva, adjektiva aŭ verba traduko de la radikoj en la Universala Vortaro markas ties signifo-kategorion substantivan, adjektivan aŭ verban. La O-radikojn oni do povas nomi substantivaj, la A-radikojn adjektivaj, la I-radikojn verbaj.

V. NI KONSTATAS,

A) ke la substantive tradukitaj radikoj (= O-radikoj, substantivaj radikoj) havas tre diversajn sencojn: ili signifas ekz-e individuojn (persono, infano, viro), profesiulojn (tajloro, profesoro, barbiro), familianojn (filo, edzo, onklo), bestojn (leono, kankro, vermo), plantojn (kverko, lilio, fungo), lokojn (hejmo, urbo, lando), instrumentojn (violono, martelo, broso), materialojn (oro, metalo, ŝtono), sciencojn (fiziko, matematiko, logiko), nociojn (ideo, eklezio, poezio), ktp. ktp., sed ili havas la komunan karakterizaĵon, ke

1. kun la o-finaĵo ili havas la sencon donitan en la Universala Vortaro;
2. kun la a-finaĵo ili povas havi tri signifojn: a) identa al la radiko (reĝa persono); b) karakterizata de la kvalito de la radiko (reĝa sinteno); c) rilata aŭ apartena al la radiko (reĝa palaco). Alivorte: O + a povas esti: a) O-identita, b) O-kvalita, c) O-rilata aŭ O-apartena;
3. kun la i-finaĵo ili havas la sencon: agi aŭ stati kiel la radiko (tajlori, gastigi), aŭ agi per la radiko (marteli), aŭ agi karakterizate de la radiko (ondi, nesti). Alivorte: O + i = manifestiĝi (agi aŭ stati) O + e.

B) ke la adjektive tradukitaj radikoj (= A-radikoj, adjektivaj radikoj)

1. kun la pleonasma a-finaĵo havas la sencon donitan en la Universala Vortaro;
2. kun la o-finaĵo ili signas la nomon de la kvalito donita en la Universala Vortaro (la bono, la belo) aŭ la konkretan manifestiĝon de la respektiva kvalito (la forto, la varmo);
3. kun la i-finaĵo ili signifas: manifestiĝi (stati aŭ efiki) karakterizate de la radiko (rapidi, verdi, sani).

C) ke la infinitive tradukitaj radikoj (= I-radikoj, verbaj radikoj)

1. kun la i-finaĵo havas la sencon donitan en la Universala Vortaro;

2. kun la o-finaĵo ili signas la nomon de la ago donita en la Universala Vortaro, ago konsiderata kiel fakto kaj kune kun sia konkreta manifestiĝo aŭ rezulto (promeno, flego, parolo; altaj konstruoj, sigelita skribo, rompita baro);

3. la a-finaĵo laŭsence gluiĝas ne senpere al la verba radiko, sed al ties substantivigita formo, do $I+a = I+o+a$. La senco de la a-finaĵa verbradiko, tiel same kiel ĉe la a-finaĵaj substantivradikoj, povas esti: a) identa kun la ago (ama sento, detrua ago); b) havanta la agon kiel kvaliton (ama koro, detrua vento); c) rilata aŭ apartena al la ago (ama letero, detrua intenco). Alivorte: $I + a$ povas esti: a) $I + o$ -identaj, b) $I + o$ -kvalitaj, c) $I + o$ -rilataj aŭ $I + o$ -apartenaj.

VI. NI KONSTATAS, ke pri la granda plimulto de la radikoj estas per si mem evidente, al kiu kategorio ili apartenas. Tiu kategorio, cetere, estas aludita en la Universala Vortaro (uv), Oficialaj Aldonoj (oa) kaj en la bonaj vortaroj.

Tamen ni konstatas, ke tiuj verkoj principe ne estis verkitaj kun la intenco montri la signifo-kategoriojn, kaj tial en pluraj okazoj oni devas esplori la Zamenhofan lingvuzon kaj la lingvuzon de bonaj aŭtoroj por konstati la kategoriecon, ĉar okazis, ke elementoj transiris el unu kategorio en alian.

Ekz-e: flori (uv), floro (uv) estas O-kategoria, ĉar flori = manifestiĝi flore (t.e. produkti florojn).

firma (uv) (= solida) kaj firmo (uv) (= komerca societo) efektive estas du radikoj homonimaj: firma estas A-kategoria, firmo estas O-kategoria.

piki (uv) (per pinto) estas I-kategoria, sed piko (uv) (ludkarta figuro) estas O-kategoria.

planti (uv), (plantisto, plantado, ...) origine estis I-kategoria; planto en la fruaj tempoj simple ne estis uzata. Ĝia ekuzo kun la signifo de kreskaĵo transportis la radikon al la O-kategorio; la ceteraj kunmetaĵoj ne modifiĝis.

- 11 Komentoj:** La „konstato“ en la dua alineo („ne estis verkitaj kun la intenco montri la signifo-kategoriojn“) ne estas deduktebla el la Fundamentaj tekstoj kaj rekte malĝusta, vd. la diskuton malsupre. Ĝuste estas, ke malmultaj „elementoj transiris el unu kategorio en alian“, vd. la ekzemplon de „moral-a“ → „moral-o“ malsupre.

VII. NI KONSTATAS, ke la elementojn, krom la radikoj, ĉu pro ilia reala signifo-kategorio (afiksoidoj), ĉu pro la funkcioj, kiujn ili ekhavas en efektivaj kunmetoj, oni povas praktike klasi jene:

En la O-kategorio: la finaĵon -o, sufiksoidojn: ad, aĵ, ec, ul; an, ar, ej, er, estr, id, il, in, ing, ism, ist, uj; obl, on, op;

En la A-kategorio: la finaĵon -a kaj la parencon -e (kiu estas propre adjektivo kun alia gramatika rolo), la adverbe tradukitajn radikojn aŭ E-radikojn (el la sama kaŭzo), la prefiksoidojn: dis, ek, for, mis, re; la sufiksoidojn: ebl, em, end, ind; la primitivajn (nesimetriajn kaj aŭ-finaĵajn) adverbojn; la prepoziciojn, la interjekcion fi;

En la I-kategorio: la finaĵon -i (kaj la parencajn -as, -is, -os, -us, -u); la afiksoidojn: ig, iĝ; la prepozicion per; la interjekcion ve.

Eksterkategorie staras:

1. ĉiuj elementoj, kiuj ĝenerale ne formas kunmetaĵojn: la artikolo la, la partikulo ĉi, interjekcioj, konjunkcioj;

2. la elementoj obeantaj specialajn regulojn:

a) la numeraloj estas du-kategoriaj: jen O-kategoriaj; du plus du estas kvar, jen A-kategoriaj: du birdoj. La a-finaĵo ĉe ili servas formi vicmontran numeralon kaj tial ĝi

konserviĝas ĉe ties pluformado (unuaco); la substantivan karakteron oni povas plifortigi per la o-finaĵo (unuco, centco); tamen ĉe la a-finaĵa pluformado tiu o-finaĵo ne konserviĝas, sed estas anstataŭata de la sufikso -op- (unuopa, centopa);

b) ĉe la participoj la o-finaĵo neniam formas la nomon de abstrakta koncepto aŭ kvalito, sed la nomon de estulo aŭ de aĵo, kiu faras – respektive suferas – la agon difinitan de la radiko: ĝenerale temas pri persono (amanto, konato). Ĉi tie do la a-finaĵa kaj la o-finaĵa formoj estas sendependaj unu de la alia.

c) la pronomoj personaj estas kvazaŭ apartaj substantivoj, en kiuj la o-finaĵo ne estas esprimita: mi(o), mi(o)n, mi-a.

d) la du kares-sufiksoj (ĉj, nj) apenaŭ estas uzataj memstare; se tamen jes, ili havas substantivan karakteron (mia njo, njo-knabo).

e) la elemento um estas plurkarakterata: jen substantiva (buŝumo), jen adjektiva (proksimuma), jen verba (krucumi).

VIII. NI KONSTATIS,

1. ke post adjektivaj radikoj la o-finaĵo signas la nomon de la kvalito esprimata de la radiko aŭ ties konkretan manifestiĝon. Tiu konkreta manifestiĝo povas esti konkretaĵo (malfaciloj, malagrabloj), kvalito de iu aŭ de io (belo de virino, malfacilo de tasko), aŭ eĉ individuo (mia kara, mia belo Z). Tiun komunan aŭ resuman formon, tamen, oni uzas nur escepte, precipe en la poezio. Ordinare oni distingas la diversajn specojn de manifestiĝoj per la t.n. kategorio-sufiksoj (aĵo, eco, ulo). La simpla o-finaĵa formo signifas la respektivan kvaliton kutime nur kiel abstraktan nocion (la belo, la bono) aŭ fizikan nocion (la varmo, la forto). La konkretan manifestiĝon indikas -aĵo (malfacilaĵoj, malagrablaĵoj, belaĵoj, bonaĵoj), la kvaliton de iu aŭ de io indikas -eco (ies beleco, boneco, forteco; malfacileco de tasko). La individuan manifestiĝon signas -ulo (belulo, bonulo, fortulo).

2. ke post verbaj radikoj la o-finaĵo signas la nomon de la respektiva ago konsiderata kiel fakto kaj kune kun sia konkreta manifestiĝo aŭ rezulto (konstruo, skribo, danco, kanto; altaj konstruoj, sigelita skribo, folkloro danco, populara kanto). Sed se oni konsideras la agon en ties fariĝo, la agon evoluantan en sia daŭro, oni uzas kunmetaĵon per -ado (konstruado, skribado, dancado, kantado); aliflanke, se oni volas konsideri la konkretan manifestiĝon aŭ la rezulton sed ne plu la agon mem, oni uzas kunmetaĵon per aĵo (konstruaĵo, skribaĵo).

IX. NI KONSTATIS, ke el la substantivradikaj substantivoj (O + o), oni povas finaĵe formi kvalit-sencan adjektivon (O + a); ekz-e: homa sento, edza vivo, hejma atmosfero. Por signi la nomon de tiuj kvalitoj, oni devus kroĉi al la a-finaĵo la o-finaĵon: *homa^o, *edza^o, *hejma^o. Anstataŭ tio oni uzas la kategorio-sufikson -eco: homeco, edzeco, hejmeco. Laŭ ĉi tio do: eco = aO-o.

Ni konstatis ankaŭ, ke el la ne-verbradikaj substantivoj (O + o, A + o) oni povas formi finaĵe verbojn (agenti, genui, verdi, rapidi, utili). Por esprimi la nomon de ĉi tiuj agoj, oni devus kroĉi la o-finaĵon al la i-finaĵo (*agentio, *genuio, *verdio, *rapidio, *utilio). Anstataŭ tio oni uzas la kategorio-sufikson -ado: agentado, verdado, genuado, utilado, rapidado. Laŭ ĉi tio do: ado = iO-o.

X. RILATE al la vortkunmeto, la Fundamenta Gramatiko diras: “Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino)” (R. 11). Ni konstatas, ke tiu ĉi regulo koncernas ankaŭ la t.n. sufiksojn, escepte de eta, ega kaj aĉa, kiuj, kvankam starantaj en la fino de la kunmeto, ne estas “ĉefaj vortoj”, sed sole modifas (grandigas, malgrandigas, aĉigas) la sencon de la antaŭa radiko. Oni povas ilin nomi veraj sufiksoj, aŭ deriviloj, aŭ modifiloj.

Krom en la vortoj kun ĉi tiuj modifiloj, ne validas la Fundamenta regulo de la vortkunmeto en la t.n. vortapudmetoj, en kiuj du vortoj de sama signifo-kategorio

estas simple apudmetitaj, ne estante suborditaj unu al la alia; ordinare ambaŭ vortoj konservas sian finaĵon kaj ili estas ligitaj per streketo. Tiaj povas esti du substantivoj: majstro-oratoro, soldato-kamarado, membro-abonanto; du, eĉ tri adjektivoj: surda-muta, ruĝa-blanka-blua standardo; du adverboj: vole-nevole, trafe-maltrafe, pli-malpli, iele-tiele. Tia apudmeto estas signifa precipe per tio, ke tiel ligiĝas la kategorio-sufiksoj (Vd. § VIII: -aĵo, -eco, -ulo), kaj plie: vir-, ĉef- kaj -ino.

En la ceteraj kunmetoj, la ĉefa vorto, kiu staras en la fino, subordigas al si la elementon starantan antaŭ ĝi. La ĉefan vorton oni povas nomi ĉefelemento kaj la vorton starantan antaŭe flankelemento. Ekzemple, en la vortkunmeto vaporŝipo la ĉefelemento estas ŝipo kaj la flankelemento estas vapor(o).

Ni konstatas, ke la ĉefelemento vortigas la antaŭan elementon (la flankelementon), laŭ jenaj reguloj de la "rekta vortefiko".

A) Substantiva ĉefelemento (t.e. ia-ajn-kategorio o-finaĵa radiko staranta en la fino) substantivigas la ia-ajn-kategorian flankelementon, t.e. kroĉas al ĝi manifeste aŭ latente la o-finaĵon. La rilato inter la du elementoj estas esprimebla per la prepozicio de, kiu estas anstataŭigebla ankaŭ per alia, pli preciza prepozicio. Ekz-e: homkoro = homo-koro = koro de homo; varmenergio = varmo-energio = energio de varmo; skribmaŝino = skribo-maŝino = maŝino por skribo; kuraĝprovo = kuraĝo-provo = provo de aŭ pri kuraĝo; libertempo = libero-tempo = tempo de libero.

B) Adjektiva ĉefelemento substantivigas la antaŭan flankelementon, t.e. kroĉas al ĝi manifeste aŭ latente la o-finaĵon. La interelementa rilato estas esprimebla per la prepozicio je, kiu estas anstataŭigebla ankaŭ per alia, pli preciza prepozicio. Ekz-e: herbriĉa = herbo-riĉa = riĉa je herbo; varmplena = varmo-plena = plena de varmo; servpreta = servo-preta = preta por servo; florsimila = floro-simila = simila al floro; komunutila = komuno-utila = utila al komuno.

C) Verba ĉefelemento povas efiki al sia flankelemento trimaniere:

1. substantivige; la interelementan rilaton esprimas la prepozicio per. Ekz-e.: martelbati = martelo-bati = bati per martelo; pafmurdi = pafo-murdi = murdi per pafo;

2. adjektivige, farante ĝin, laŭ la formo, sia predikata adjektivo, laŭ la senco, rezulta adjekto: ruĝpentri = pentri ruĝa; purlavi = lavi pura; sanigi = igi sana;

3. adverbige, farante ĝin manier-adjekto; tiu ĉi efiko, tamen, estas escepta ĉe adjektivradika flankelemento (ekz-e: bonfarti) kaj validiĝas precipe, kiam la flankelemento estas verba prefikso (disstarti, ekiri, foresti, misuzi, revidi) aŭ prefikse uzata prepozicio (ĉirkaŭrigardi, ĝisatendi, interŝanĝi, kontraŭkuri, trakuri).

Tiuj reguloj A, B, C estas la bazaj reguloj de la vortkunmeto en Esperanto.

RESUME: la interelementa rilato inter la elementoj de kunmetita vorto ĝenerale estas tia, ke la flankelemento rilatas al la ĉefelemento kiel substantivo antaŭata de prepozicio: varmenergio = energio de varmo, servpreta = preta je servo, pafmurdi = murdi per pafo. Krome, la flankelemento de verba ĉefelemento povas esti predikata adjektivo kun senco de rezultadjekto: purigi = igi pura, kaj ankaŭ manier-adjekto adverba, sed prefere nur, se la flankelemento estas adverba aŭ prepozicia prefikso: revidi, ĉirkaŭflugi.

Ĝenerale nekorektaj estas tiuj kunmetoj, en kiuj la flankelemento estas adjektiva epiteto de la ĉefelemento (dikonklo, belbirdo, bonprofesoro, diligentstudento, ks.). Evitindaj estas ankaŭ tiuj kunmetoj, en kiuj la adjektivradika flankelemento rilatas al la verba ĉefelemento kiel adverba manier-adjekto (bonlerni, beldanci, precizkalkuli, ks.)"

Kelkaj uzataj tiaj kunmetoj, nerespondaj al la bazaj reguloj, estas esceptoj kaj ne pravigas aliajn similajn kunmetojn; ekz-e: dikfingro ne pravigas la vortojn dikkonklo aŭ dikporko; nek junedzino pravigas la vortojn: junamiko aŭ junfraŭlino.

Aliajn ŝajnajn esceptojn klarigas la pluformado de la regulaj kunmetoj (Vd. § XI), la vortliga funkcio de la finaĵoj (Vd. § XII, XIII) kaj la inversa vortefiko (Vd. § XIV, XV).

- 12 Komentoj:** La antaŭlasta alineo estas ekzemplo por la malpreciza argumentado de la „Konstatoj“. La formo „dikfingro“ ne ekzistas en la F-to. Ĝi ankaŭ ne ekzistas ĉe Z. Male kaj la vortaro de Beaufront kaj EG 1 havas: [Beau] **fingr**, doigt. *dika fingro*, pouce. *montra fingro*, index. *longa fingro*, médius. *ringa fingro*, annulaire. *malgranda fingro*, petit doigt; [EG 1] **fingr-o**, Finger; *dika -o*, Daumen; *montra -o*, Zeigefinger; *longa -o*, Mittelfinger; *ringa -o*, Ringfinger; *malgranda fingro*, kleiner Finger. La formo „dikfingro“ estas uzata dufoje en la Malnova Testamento, sed ne eblas konstati, ĉu ĝi estas Z-a aŭ – pli verŝajne (postmorte) - enkondukita de la brita Biblia komitato. Simile staras pri la formo „junedzino“, nek F-ta, nek Z-a, sed uzata en la traduko de „Quo vadis“ fare de Lydia Zamenhof (1933). Male UV havas **sek'vin'ber'** (ĉe vin'), kiun la Akademio ne mencias. Eblan klarigon pri tiaj formoj vd. en Brosch 2008.

XI. NI KONSTATAS, ke la vortkunmetoj faritaj laŭ la bazaj reguloj estas pluformeblaj per finaĵoj; tiam la finaĵo sendependiĝas de la ĉefelemento kaj rilatas al la tuta kunmeto. Ekz-e: urbdoma = urbo-domo-a; domkonstrua = domo-konstruo-a; leterskribi = letero-skribo-i = i per leterskribo. Tiaj pluformitaj vortoj ne estas analizeblaj laŭ la bazaj reguloj (domo je urbo, aŭ skribi per letero, skribi letere, skribi letera), ĉar tiamaniere ili ne havas sencon. Oni devas serĉi ilian bazan formon: urbodomo, domkonstruo, kaj al tiu rilatigi la memstaran finaĵon.

XII. NI KONSTATIS en la § IX., ke ĝenerale oni ne povas fari vortkunmeton el substantivo kaj el ties adjektiva epiteto. Tamen memstara a-finaĵo povas efiki per interkroĉado de tiaj du elementoj, farante el ili unu adjektivan vortkunmeton: facilanima = (facila animo)-a, bluokula = (blua okulo)-a, nigrahara = (nigra haro)-a, larĝaŝultra = (larĝa ŝultro)-a, samidea = (sama ideo)-a. Kompreneble, ankaŭ ĉi tiuj vortkunmetoj ne estas analizeblaj laŭ la bazaj vortkunmetaj reguloj; krom ĉi tio ilin rekonigas, ke kun la o-finaĵo ili donas kontraŭregulan adjektivo-substantivan kunmeton (facilanimo, bluokulo, nigraharo ktp).

En ĉi tiuj kunmetoj, el la strukturo de la vortoj sekvas, ke la finaĵo de la adjektiva elemento devas esti -a kaj neniel -e: do nigranaza, larĝaŝultra, ĉar ne temas pri la adverba epiteto de adjektivo (naza, ŝultra) sed pri adjektiva epiteto de substantivo (nazo, ŝultro).

Kiel la memstara finaĵo, tiel same ankaŭ sufix(oid)oj povas efiki per interkroĉado de la substantivo kun ties adjektiva epiteto: facilanimeco = (facila animo)-eco, bluokuleco = (blua okulo)-eco, nigraharulo = (nigra haro)-ulo; larĝaŝultrulo = (larĝa ŝultro)-ulo, samideano = (sama ideo)-ano.

- 13 Komentoj:** Ankaŭ tiu analizo malobeas la (devigajn) regulojn de la Antaŭparolo pri la metodo. Elir-punkto ĉiam necese estas la reguloj kaj modeloj de la F-to (A 3.3). Pri la temo de la lasta alineo de FE 37.11: „La loĝantoj de unu regno estas **samregnanoj**, la loĝantoj de unu urbo estas **samurbanoj**, la konfesantoj de unu religio estas **samreligianoj**“. Se la materialo de la F-to ne sufiĉas, oni rajtas (kaj devas) serĉi ĉe Z (A 3.4 - A 3.6), kaj tie i.a. trovas la oftan formon „samideano“ (kutima alparolo en plej multaj kongresaj paroladoj), facilanima (A) k.t.p.. Nur poste oni rajtas serĉi ĉe la „bonaj aŭtoroj“. Konstato 12 male intermiksas sendistinge ĉiujn nivelojn, ignorante la norm-hierarkion kreitan de BD kaj A. La konsekvenco estas, ke oni ne scias, ĉu la Konstato entute analizas „ĝustan“

Esperanton, aŭ iujn misformojn. Simila kritiko validas ankaŭ por la postaj Konstattoj.

XIII. NI KONSTATAS, ke la memstara finaĵo povas efiki per interkroĉado ankaŭ de substantivo kun prepozicio: ĉirkaŭurba = (ĉirkaŭ urbo)-a, eksterlanda = (ekster lando)-a, transmara = (trans maro)-a, senkora = (sen koro)-a.

Kiel la memstara finaĵo, tiel same ankaŭ sufiks(oid)oj povas efiki per interkroĉado de la substantivo kun ties prepozicio: eksterlandano = (ekster lando)-ano, senkorulo = (sen koro)-ulo.

En la kazoj sub § XI., XII. kaj XIII. la vortkunmetoj estas trielementaj: ili konsistas el ĉefelemento, kiu estas finaĵo aŭ sufiks(oid)o kaj el duobla flankelemento, el kiuj la dekstra estas substantiva kaj la maldekstra estas adjektivo aŭ prepozicio.

Ni konstatas, ke ĉe duobla flankelemento ties du elementoj povas interrilati laŭ la vortkunmetaj reguloj: urbodoma = (domo de urbo)-a, domkonstrua = (konstruo de domo)-a, kaj ankaŭ laŭ la sintaksaj reguloj, do adjektiva epiteto aŭ prepozicio kun substantivo: nigrahara = (nigra haro)-a, senkora = (sen koro)-a.

XIV. NI KONSTATAS, ke ĉe duobla flankelemento ne nur la dekstra elemento povas difini la vortkarakteron de la maldekstra elemento (ekz-e: skribmaŝina = skribo-maŝino-a), sed ankaŭ la maldekstra elemento povas efiki al la dekstra, difinante ties vortkarakteron. Adjektiva aŭ prepozicia maldekstra elemento efikas substantivige: grandkuraĝa = (granda kuraĝo)-a = karakterizita de granda kuraĝo; palblua = (pala bluo)-a; helverda = (hela verdo)-a; senforta = (sen forto)-a; senutila = (sen utilo)-a; senpova = (sen povo)-a; senduba = (sen dubo)-a. Verba prefikso kiel maldekstra elemento efikas verbige: reformo = re-formi-o; ekmartelo = ek-marteli-o. Tio estas la "inversa vortefiko".

XV. NI KONSTATAS, ke per la inversa vortefiko povas estiĝi plurala aŭ substantiva senco de elemento, kaj per tio la finaĵo povas roli kiel memstara. Ekz-e, en triangulo "tri" sence pluraligas la elementon "angulo" kaj memstarigas la o-finaĵon laŭ la strukturo: (tri anguloj)-o = triangulaĵo. Tiel same: senforto = (sen forto)-o = senforteco; senpovo = (sen povo)-o = senpoveco. Tiujn formojn oni nomas "streĉitaj formoj".

XVI. NI KONSTATAS, ke ekzistas vortkunmetoj ankaŭ kun triobla flankelemento, kiu povas esti:

1. prepozicio + substantivo interkroĉitaj per la a-finaĵo: enlitiĝi = enlita-iĝi = (en lito)-a-iĝi; altabliĝi = altabla-iĝi = (al tablo)-a-iĝi; elseliĝi = elsela-iĝi = (el selo)-a-iĝi. En tiuj kunmetoj anstataŭ la prepozicioj ĉe aŭ apud oni uzas al kaj anstataŭ ekster oni uzas el.

2. du substantivoj interkroĉitaj per prepozicio: vizaĝaltere = (vizaĝo al tero)-e, vidalvide = (vido al vido)-e; korpsurkorpa = (korpo sur korpo)-a.

XVII. NI KONSTATAS, ke la vortfarado obeas al jenaj reguloj de neceso kaj sufiĉo:

En la konstruon de la vorto oni devas enkonduki ĉiujn elementojn, kiuj necesas, sed ne pli ol kiom sufiĉas, por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan.

La faktoroj, kiujn oni konsideras ĉe la neceso kaj sufiĉo, povas kuŝi ankaŭ ekster la vorto, en la kunteksto. Helpe de ĝi oni povas uzi t.n. resumajn formojn anstataŭ la ekzaktaj."

4. Kritiko de la metodo, laŭ kiu la Akademio venis al la „Konstatoj“

- 14 En 1907 Cart konsultis Z pri la korekto de eraraj tradukoj en UV. Z respondis:

LR 2 (1907): „...„Stamp“ [UV] povas esti egale bone tradukita per verbo (stampi) kaj per substantivo (stampo); se vi trovas, ke estas necese doni por tiu ĉi radiko en ĉiuj lingvoj tradukon *egalan*, tiam mi preferus doni por ĉiuj lingvoj la tradukon per verbo (kiel la tradukoj germana, rusa kaj pola). La ago estas: *stampi*; la rezultato: *stampo*; la instrumento: *stampilo*.

„Stuckaturen“ [stuk' - UV] ne estas multenombro, sed verbo.¹²³ Ankaŭ por tiu ĉi vorto (kiel por „stamp“) mi intencis doni al la radiko signifon *verban*.“ [LR 2, Let. al Th. Cart (1907-02-24), OV p. 538-539 – nia substreko].

El tiu respondo evidentiĝas, ke Z ja intencis difini vortkategoriojn por *stamp'* kaj *stuk'*, ambaŭ troveblaj en UV. Ne ekzistas probabla kialo pensi, ke li ne intencis fari same pri la aliaj radikoj en UV. Male: Li intencis fiksi vortkategorion por ĉiu unuopa radiko en UV. Tiu konstato rekte kontraŭas la bazan tezon de la Akademio, sur kiu baziĝas ĝia teorio de vortfarado (UV „ne redaktita kun la celo fiksi la signifokategoriojn de la radikoj“).

- 15 La intencon esprimitan en LR 2 eblas konkludi ankaŭ el LR 20 A:

LR 20 A (1907) [Pri „akuŝi]: „Por ‚akuŝi‘ mi konsilas konservi ĝian signifon netransiran (kiun ĝi havas en la Un.V.). La ŝanceliĝo pri tiu ĉi vorto estis kaŭzita de la sekvanta cirkonstanco: antaŭ 5-6 jaroj S^o de Beaufront skribis al mi, ke pro la voto ‚akuŝistino‘ estas necese doni al ‚akuŝi‘ signifon transiran. Ĉar la tiama rezonado de S^o B. ŝajnis al mi ĝusta kaj ĉar la Univ. Vortaro tiam ne havis ankoraŭ ian karakteron de netuŝebleco, tial, konfuzita per la argumentoj de S^o B., mi konsentis, ke li donu en sia vortaro al ‚akuŝi‘ sencon transiran.¹²⁴ En tia senco la vorto poste transiris ankaŭ en ĉiujn aliajn vortarojn kaj kaŭzis konfuzon kaj mi ĝin enmetis ankaŭ en la vortaron Germana-Esperantan. Nun, ĉar la Univ. Vortaro devas resti netuŝebla, mi konsilas konservi por la vorto ĝian *antaŭan* sencon, tiom pli, ke tiu senco estas ankaŭ pli ĝusta, logika kaj oportuna. La ekzistado de la vorto ‚akuŝistino‘ tute ne devas nin konfuzi, ĉar ĉiu facile komprenos, ke ‚akuŝistino‘ signifas ne ‚virino, kiu profesie (!) naskas‘, sed ‚virino, kiu profesie sin okupas per aferoj de naskado‘ (ne okupas sin per akuŝado, sed nur per akuŝoj).“ [LR 20 A, let. al Cart (1907-02-24), O.V. p. 539].

Je la ekzemplo de *akuŝ'* Z konfirmas, ke la verbaj subkategorioj de transitiveco kaj netransitiveco estas devige kaj „netuŝebla“ fiksitaĵoj per UV (kaj FG kaj FE). Se tio validas jam por la subkategorioj, tio eĉ pli devas validi por la ĉefaj kategorioj verbo, substantivo, adjektivo k.t.p. (*argumentum de minore ad maiorem*, argumento de la malpli grava al la pli grava, eĉ-pli-argumento). Ankaŭ tiun argumenton la baza tezo de la Akademio ignoras.

- 16 La du respondojn de Z konfirmas la ekzemplon de not-i → not-o en UV mem, konsekvence laŭ la ekzemplo stamp-i → stamp-o:

not' - noter | note | notiren {de 1901: notieren} | записывать, отмѣчать | notować. — [AK] {en} make a note of, note. — En ĉiuj kvin referenc-lingvoj verbo, laŭ BRO 6 tamen: noto.

685

¹²³ Pri tiu eraro de Z vd. detale ĉe „stuk“ en BK II.

¹²⁴ Кр. Beau 1904: **akuŝ**, accoucher (trans.). **akuŝistino**, sage-femme. EG 1, 1904: **akuŝ-i**, (jem[anden]) entbinden [trans.]; **-iĝi**, niederkommen; **-isto**, Geburtshelfer; **-istino**, Hebamme. Kontraste [AK] accoucher (*intr.*) | be confined (*in childbed*) (*intr.*) | powić, odbyć pológ.

• **not'o** (muzik'a) - note (de musique) | note (mus.) | Note (Mus.) | нота | nuta. {MUZ} — [AK] нота (музык.). —

Same:

vest' - vêtir, habiller | clothe | ankleiden | одѣвать | odziewać, ubierać [UV]. —
vesti - vêtir, habiller | clothe | ankleiden | одѣвать | odziewać, ubierać [FE 18].

• **vest'o** - habit | clothes | Kleid | платье | ubiór, odzież. — Montru al ili vian novan veston [FE 18.11]. ... mi ... purigis la veston [FE 39.1]. ... ofte bruligas la vestojn de la malsanulo [FE 39.5]. ... eĉ unu polveron vi ne trovos sur lia vesto [FE 41.17].

Tamen BRO3 havas kiel bazan formon la substantivan vesto (detalojn pri vest' vd. en BK II)

Ĝin ankaŭ konfirmas la senambiguigaj indikoj pri la vort-kategorio en tradukoj kiel en plant' al la angla [„(vb.)“, t.e. verbo]:

plant' - planter | plant (vb.) | pflanzen | сажать, насаждать | sadzić. — AV: plant-o, plant-.

Simile:

teg' - mettre par-dessus, couvrir | overlay, cover | beziehen, überziehen | наволакивать | powłóczyć. → • **teg'o** — BRO8: tegi.

- 17 La du respondojn de Z plie konfirmas la aranĝo de vortoj tradukitaj kaj en UV kaj en la lecion-finaj vort-listoj de FE. Ekz. la duoble registrita *lig-i* laŭ ambaŭ fontoj estas verbo:

lig' - lier | bind, tie | binden | связывать | wiązać [UV]
ligi - lier | bind, tie | binden | связывать | wiązać [FE 27].

En FE 27.5 ĝi tamen ne estas uzata kiel verbo, sed (nur) en la kunmetaĵo **kunligado** („Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj“). Se FE volus traduki nur la vorton, uzitan unuan fojon en la leciono, ĝi devus traduki „kunligado“. Sed tion ĝi ne faras, ĝi indikas la bazan formon de tiu kunmetaĵo, nome „ligi“, kiu per sia *-i* eksplicite konfirmas, ke temas pri verbo – informo deduktebla jam el la tradukoj en UV. El tio evidentiĝas, ke – kontraŭe al la Akademia „Konkludo“ - UV ja volas fiksi ankaŭ la bazformon. Malgraŭ tio BRO 4 atribuas al „ligi“ substantivan karakteron: *ligo*.

- 18 Simile:

cel' - viser | aim | zielen | цѣлиться | celować [UV]. —
celi - viser | aim | zielen | цѣлиться | celować [FE 28].
• **celo** — **Cé-lo** [FE 2]. — ... ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado [FE 28.3]. — BRO4: celo.

direkt' - diriger | direct | richten | направлять | kierować [UV]. —
direkti - diriger | direct | richten | направлять | kierować [FE 28]. — [AK 1914] diriger, adresser | direct, steer | richten, leiten. — BRO 4 -o (subst.).
• **direkt'o** - direction | direction | Richtung | направление | kierunek [UV]. — ... por esprimi direkton, ... [FE 28.3]. ... sed nur ĉar ni volis esprimi direkton ... [FE 28.3].

kurb' - courbe, tortueux | curve | krumm | кривой | krzywý. [UV]
kurba - courbe, tortueux | curved | krumm | кривой | krzywý [FE 33]. — [AK 1914] curved, bent | krumm, gebogen. — [RE]. — Rekta vojo estas pli mallonga, ol kurba [FE 33.10]. — BRO 7: kurbo.

pak' - empaqueter, emballer | pack, put ut {pres-eraro, legu: put up} | packen, einpacken | укладывать, упаковывать | pakować. —

paki - empaqueter, emballer | pack, put up | packen, einpacken | укладывать, упаковывать | pakować [FE 35]. — [AK] pack, put up. — [RE]. — BRO 5: pako.

• **pakaĵo** — Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo [FE 35.12].

vest' – vd. supre.

- 19 Ke oficialigo ja volas fiksi la vortkategorion, ankaŭ konfirmas postaj aldonoj al la Vortaro Oficiala, kiel montras la ekzemplo de **moral'**:

moral' [OA 1] * moral | moral | moralisch | нравственный | moralny. —

Ĉiuj kvin tradukoj estas a-vortoj. Tio akordiĝas kun la frua uzo ĉe Z:

[DL-Ald 1888]: Ĉion, kion mi de nun faros aŭ skribos, mi ĝin ĉion faros jam kiel simpla privata amiko de la lingvo internacia havante nek pli da kompetenteco, nek pli da moralaj aŭ materialaj privilegioj, ol ĉiu alia [DL-Ald 11]. ... estante nun egala moralaj kaj materialaj mastro de la lingvo kiel mi mem, ĉiu povas nun mem eldoni ĉiajn necesajn verkojn [DL-Ald 24]. Mi faris por la afero ĉion, kion mi povis, kaj se ĉiu efektiva amiko de l' lingvo internacia alportos al ĝi eĉ la centan parton de l' moralaj kaj materialaj oferoj, kiujn mi al ĝi alportis ..., tiam la afero iros bonege ... [DL-Ald 34]. [RE 1889, 112]: Нравоучеше *mor'instru'*. - Нравственность *mor'ec'*, *moral'*. - Нравственный *moral'* {adj}. Нравъ *mor'*.

Kun adjektiva karaktero notas ĝin la vortaroj de Beaufront (⁴1904) kaj ĉefe la „Jürgensen-“ (sed fakte Z-aj) vortaroj Esperanto-germana (¹1904, ²1906), kiuj poste fariĝis la ĉefa bazo de OA 1 (1909 – vd. la ĉap. „Fundamento, Enkonduko“):

[Beau] **moral**, moral {adj.}. **nemorala**, immoral.

[EG 1] **moral-a**, moralisch, sittlich; **-eco**, Moralität, Sittlichkeit; **-aĵo**, Moralisches, Moral; **sen—a**, unmoralisch.

La decido de la Akademio por la a-formo estis konscia kaj harmoniis kun la tiuepoka ĉefa uzo.

- 20 Indico por tiu konstato estas la difin-vortaro de Kabe 1910:

Morala. Konforma, akordiĝanta kun la bonaj moroj, devoj kaj virtoj. **Morale**. En moralaj maniero. **Moraleco**. Eco de tio, kio estas moralaj. Komparu: **Etiko**.¹²⁵

Z mem uzas *moral'* ĉefe kiel a- aŭ e-vorto (vd. tekstaro.com). Kie li uzas *moralo*, estas antaŭ 1909, kiam li ankoraŭ ne sentis sin (kaj laŭ la Antaŭparolo ankoraŭ ne estis) ligita al la netuŝebleco de *moral-a*, akirita nur en tiu jaro.¹²⁶ La plej oftaj uzoj kiel o-vorto ĉe Z estas en la du kunmetaĵoj „moralinstruo“ kaj „moraldevo“ (do ne „morala instruo“ kaj „morala devo“ en Malnova Testamento kaj Fabeloj I). Ambaŭ verkoj tamen aperis post lia morto kaj la grado de fidinda zamhofeco estas malalta (detalojn vd. en Libro Kvin, ĉap. „Gradoj de Zamenhofeco“). Precipe pri la multaj trafoj en MT oni ne scias, ĉu temas pri Z-a uzo aŭ posta redaktado de la brita Biblia komitato.

- 21 **Resume** oni devas konstati, ke per la oficialigo, la formo *moral-a*, do kun adjektiva baza formo, fariĝis netuŝebla. Se la Akademio opinias, ke tio ne plu harmonias

685

¹²⁵ En aliaj vortaraj artikoloj Kabe tamen ne estas konsekvenca pri la uzo de moraleco, moralaĵo aŭ morallo: deci - moraleco kaj bonmoreco. devi - pro leĝoj, morallo, konveneco. etik0o principoj de la morallo. etiologio - deveno de la moroj kaj de l' morallo; en ĉiuj aliaj artikoloj aŭ morala au morale.

¹²⁶ Ekzemple en Pri la Homaranismo 1906 aŭ Esenco kaj Estonteco 1907.

kun la ĉefa nuntempa uzo¹²⁷ (do ke ekestis nova „silenta interkonsento“ – A 2.1)“, ĝi **rajtas** procedi **nur** laŭ A 8: „Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova [A 8.1].“ Por tia propono necesas „aprobo de almenaŭ du trionoj de ĉiuj membroj“ (art. 23.3 de la Statuto). Pro la principo de klareco („por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, kaj por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi“ – A 3.3, vd. la tieajn komentojn), ĝi devas fari tion eksplicite kaj doni motivojn por la „efektiva neceseco“ de sia propono (malpermeso de arbitraj decioj, A 9.2 – A 9.3). Ĝi faris tion ekzemple en la kazo de „pis-i“ (OA 9), simetrie al „urin-i“ (UV).¹²⁸ Male, proponi „ŝanĝon“ (strikte malpermesita laŭ A 10.4) rante de verko kiel BRO, kiu havas tute alian celon, lezas kaj la principojn de netuŝebleco kaj klareco kaj la devon al motivigo de decidoj kaj – depende de la unuopa kazo - eble la Statuton. La interpreto de la bazaj formoj fare de la Akademio en BRO (kaj eĉ malpli en AV, pri kiu okazis eĉ ne voĉdonado¹²⁹) estas nure „privataj“ en la senco de A 3 kaj „**kaj por neniu deviga**“ (BD 4.2).

- 22 Rezulto:** La teorio pri la vortfarado de la Akademio ne havas norman bazon en la Fundamento. Ĝi adaptas la faktojn al la teorio, dum ĝi devus adapti la teorion al la faktoj.

5. Devioj inter la bazaj formoj en VO kaj la interpreto en BRO /AV

- 23** Jen *malkompleta* listo de ŝanĝita interpreto de la baza formo de kelkaj vortoj el la Vortaro Oficiala (VO), ordigita laŭ la tipoj de la ŝanĝita kompreno (A – adjektivo, S – substantivo, V – verbo; A → S ekz. signifas: vorto en VO havas adjektivan bazan formon, dum BRO aŭ AV interpretas ĝin kiel substantivon):

VO	trov-loko	BRO / AV	trov-loko	komentoj
fonetik-a	OA 1	-o	AV	A → S
kurb-a	UV, FE	-o	7	A → S
moral-a	OA 1	-o	9	A → S
narkotik-a ¹³⁰	OA 1	-o	AV	A → S
oval-a	UV	-o	9	A → S
teĥnik-a, teknik-a	OA 3.2	-o	9	A → S
kapric-o	UV	-a	8	S → A
komfort-o	UV	-a	6	S → A
pacienc-o	UV	-a	6	S → A

685

¹²⁷ Tio en la okazo de „moral“ estas tre probabla, paralele al la lingvo-ŝanĝo en la Fundamentaj referenc-lingvoj kaj aliaj etnaj lingvoj kun relative alta nombro de nuntempaj esperantistoj. Kiel EG 1 montras, Z – ekz. – estis inspirita de la germana elinternaĵo „sitt'lich“ (laŭ la moroj = Sitten), el kiu la lingvaĵo de la unua duono de la 19a jc derivis „Sitt'lich'keit“ („laŭ'mor'ec'o“); sama principo en la rusa elinternaĵo нравы (moroj) → нравственность ([laŭ]mor'ec'o). Simile tiama franca „moral“ → „moral'ité“, angla „moral“ → „moral'ity“. En tiu epoko – malsame kiel nuntempe - do neniel estis stranga, ke la adjektivo estis la baza formo.

¹²⁸ Pri tiu paro tamen estas alia problemo, nome la preskaŭsinonimeco, vd. la komentojn ĉe A 8.

¹²⁹ En la enkonduko al AV tekstas: „Bazformoj de radikoj, por kiuj ankoraŭ mankas oficiala difino, estu rigardataj kiel provizoraj indikoj.“

¹³⁰ Apud narkotik-a (OA 1) ekzistas narkot-i (OA 4), vd. BK II.

VO	trov-loko	BRO / AV	trov-loko	komentoj
konversaci-o	OA 3.2	-i	9	S → V
kultur-o	OA 1	-i	6	S → V
operaci-o	OA 1	-i	8	S → V
konven-i	UV	-a	6	V → A
cel'	UV, FE	-o	4	V → S
deklinaci-i	UV	-o	AV	V → S
direkt-i	UV, FE	-o	4	V → S
flor-i	UV ¹³¹	-o	4	V → S
glu-i	UV	-o	7	V → S
gut-i	UV	-o	6	V → S
konjugaci-i	UV	-o	AV	V → S
kopi-i	UV	-o	8	V → S
lig-i	UV	-o	4	V → S
lot-i	UV	-o	9	V → S
not-i	UV	-o	6	V → S
pak-i	UV, FE	-o	5	V → S
plant-i	UV	-o, plant/	AV	V → S
teg-i	UV	-o	8	V → S
vest-i	UV, FE	-o	3	V → S

- 24 Aparta kazo estas ŝanĝo de singulara al plurala baza formo fare de AV ĉe molusk':

molusk' [OA 1] mollusque | mollusc | Molluske | моллюскъ | mięczak. — [EG 1].
— AV: molusk/oj {plurale kontraŭ ĉiuj referenc-lingvoj}.

6. Aliaj modeloj por klarigi la esperantan vortfaradon

- 25 La Akademia teorio pri la vortfarado ankaŭ enhave estas kritikata de diversaj aŭtoroj pro diversaj aspektoj. Superrigardon donas Brosch 2008 en ĉap. 4, kiu surbaze de kritika sintezo de pluraj aliroj disvolvas propran modelon.

7. Malkoheraĵoj pri la vort-kategorioj en VO

Okaze troveblas radikoj, kiuj estas tradukitaj al diversaj vort-kategorioj en la referenc-lingvoj. Ekzemploj estas **lunatik'** kaj **stamp'**, vd. BK II.

8. Principo de sufiĉo kaj neceso

- 26 LR 4 A (1891):

La vorto "bezonesti" estas kunmetita tute regule, kaj vi povas ĝin uzadi. Sed entute ni konsilas pli uzadi ĉiam formojn simplajn anstataŭ kunmetitaj. Kunmetado de vortoj estas karaktera eco de la lingvo germana, kaj al tiu ĉi lingvo ĝi efektive donas grandan riĉecon de formoj; sed en nia lingvo la vortoj pleje estas pli naturaj kaj pli bonsonaj se ili estas ne kunligataj, sed uzataj aparte. [LR 4 A. *La Esperantisto*, 1891, p. 23].

¹³¹ Detale vd. BK II kun resumo de la vorthistorio.

9. Elinterna aŭ elektera vortuzo (skemismo – naturalismo)

- 27 „Eterna“ temo de Esperanto estas, ĉu oni kreu vortojn por novaj ideoj (terminojn por nocioj) surbaze de la kunmetigaj reguloj laŭ R 11 aŭ de la inkluziviga regulo de R 15 (ekz. *pacifism'o* – R 15 aŭ *pac'ism'o* – R 11). Diskuton vd. ĉe R 15.

N. § 12 [Negacio]

I. Fundamentaj Tekstoj

12. S'il y a dans la phrase un autre mot de sens négatif, l'adverbe „ne“ se supprime. Ex.: mi neniam vid'is — je n'ai jamais vu.

12. If there be one negative in a clause, a second is not admissible.

12. Wenn im Satz ein Wort vorkommt, das von selbst eine verneinende Bedeutung hat, so wird die Negation **ne** weggelassen; z. B. mi nenio'n vid'is, ich habe Nichts gesehen.

12. При другомъ отрицательномъ словѣ отрицаніе **ne** опускается (Примѣръ: mi neniam vid'is я никогда не видалъ).

12. Przy innym przeczącym wyrazie opuszcza się przysłówek przeczący **ne** (np. mi neniam vid/is nigdy nie widziałem).

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

12. Wenn im Satze ein Wort vorkommt, das von selbst eine verneinende Bedeutung hat, so wird die Negation **ne** weggelassen; z.B. *mi nenio'n vid'is*, ich habe Nichts gesehen.

Zamenhofa traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

12. Ĉe alia nea vorto la vorto **ne** estas forlasata.

II. Ekzercaro (FE 28.9 – 11)

Mi konas nenium en tiu ĉi urbo [FE 28.9]. — Mi neniel povas kompreni, kion vi parolas [FE 28.10]. — Mi renkontis nek lin, nek lian fraton (aŭ mi ne renkontis lin, nek lian fraton) [FE 28.11].

III. Komentoj

- 1 R 12 fiksas (nur) la principon, ke **duobla neado** en Esperanto – malsame kiel en kelkaj aliaj lingvoj¹³² - **ne** ekzistas. Pliajn demandojn R 12 ne regulas, ĉefe ne la pozicion de *ne* en la frazo.
- 2 La ekzemploj en la referenc-lingvoj estas malunuecaj: franca, rusa, pola – *neniam*, germana - *nenio*. En la angla kaj la neoficiala traduko de Z mankas ekzemplo. Aliaj neaj vortoj, krom la cititaj du, ĉefe estas la ne menciitaj el la tabelvorta serio *nenia*, *nenial*, *neniam*, *nenie*, *neniel*, *nenies*, *nenio*, *neniom*, *neniu*, pri kiu vidu detale FE 30.6, krome la nea vorto *nek*, kiel montras FE 28.11.
- 3 R 12 ne malpermesas esprimojn kiel „ne malbone“ (do iom bone), „ne malofte“ (iom ofte), ĉar mal- ne estas „nea vorto“, t.e. el si mem ne havas nean signifon, vd. BK II.
- 4 Pri la pozicio de „ne“ rekte antaŭ la neinda fraz-elemento vd. la ekzemplojn en BK II.

¹³² Kp. ekz. en la afrikansa: *ek stel ni belang ni – ne* gravas por mi, estas egale al mi.

O.ĝ 13 [Direkto]

I. Fundamentaj Tekstoj

13. Si le mot marque le lieu où l'on va, il prend la terminaison de l'accusatif. Ex.: kie vi est'as? — où êtes-vous? kie'n vi ir'as? — où allez-vous? mi ir'as Pariz'o'n — je vais à Paris.

13. In phrases answering the question „where?” (meaning direction), the words take the termination of the objective case; e. g. kie'n vi ir'as? „where are you going?”; dom'o'n, „home”; London'o'n, „to London”, etc.

13. Auf die Frage „wohin” nehmen die Wörter die Endung des Akkusativs an; z. B. tie, da; tie'n, dahin; Varsovi'o'n, nach Warschau.

13. На вопросъ „куда” слова принимаютъ окончание винительнаго падежа (Примѣры: tie тамъ — tie|n туда; Varsovi|o|n въ Варшаву).

13. Na pytanie „dokąd” wyrazy przybierają końcówkę przypadku czwartego (np. tie tam (w tamtem miejscu) — tie/n tam (do tamtego miejsca); Varsovi/o/n (do Warszawy).

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

13. Auf die Frage "wohin" nehmen die Wörter die Endung des Akkusativs an; z.B. tie, da; tie'n, dahin; Varsovi'o'n, nach Warschau.

Zamenhofa traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

13. Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo.

Aplik-ekzemploj por R 13 troviĝas en FE 26, aldonaj klarigoj (kaj pliaj ekzemploj) en FE 28:

FE 28: Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon [FE 28.1]. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj [FE 28.2]. Ekzemple: por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon „n”; sekve: tie (= en tiu loko), tien (= al tiu loko); tiel same ni ankaŭ diras: „la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon”, kaj la vortoj „ĝardenon”, „tablon” staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en” kaj „sur” tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado); en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n” tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne [FE 28.3].

II. Komentoj

1. Superrigardo

- 1** La vortumoj de R 13 estas malsamaj en la referenc-lingvoj. La franca havas la ekzemplon *Parizo/n*, la angla *Londono/n*, germana, rusa kaj pola *Varsovio/n*, la neoficiala Zamenhofa traduko neniun. Pliaj ekzemploj estas *kie/n* (franca, angla), *tie/n* (germana, rusa, pola) kaj *domo/n* (angla). Plej klara estas la franca teksto, laŭvorte: „Se vorto indikas la lokon, kien oni iras, ĝi alprenas la finaĵon de la akuzativo“, do la n-markilon laŭ R 2.4 kaj R 3.2. Per la vortumo „se vorto indikas“

fariĝas klare, ke R 13 mem ne difinas, kiuj vortoj povas alpreni direkto-markilon. Tiun demandon decidas la signifo (semantiko) de la koncernaj vortoj aŭ frazoj.

2. Rolvortetoj sekvata de direkto-indikilo –n

Literaturo (selekto): Göhl 1932, §§ 160-162. PAG 1985, §§ 190-191.

- 2 Pro la interrilato inter R 13 kaj R 8 („ĉiuj prepozicioj per si mem postulas la nominativon“) ekestas la demando, post kiuj **prepozicioj** (rolvortetoj) **kun loka signifo** povas aŭ devas sekvi direkto-indikilo. Kiel ĵus montrite tio dependas de la „difinita kaj konstanta signifo“ de la rolvorteto (R 14), pri kiu vd. la vortaran parton BK II. Nur ĉe relative malmultaj inter ili la *signifo* neniam permesas postsekvan n-indikilon, ĉar ili el si mem jam indikas (nur) direkton (ekz. *al, ĝis*). Ĉe multaj ofte ekestas tiel subtilaj signifo-nuancoj (ekz. *kontraŭ*), ke oni povas heziti. Ĉe relative malgranda tria grupo la signifa diferenco estas tiel evidenta, ke la distingon oni devas nepre fari (ekz. *flugi en la ĝardeno/n*).
- 3 Bona kontrol-demando en la praktiko estas tiu, kiun sugestas R 13, nome mense demandi sin „kie aŭ kien?“ Ekz.: *ekkuŝi – kie? – en la lito (sen n-indikilo); grimpi – kien? – sur la muron (kun n-indikilo; nome de la strata grundo); grimpi – kie? – sur la muro (sen n-indikilo; nome la persono jam estas sur la muro kaj daŭrigas la grimpadon tie)*. En dubaj okazoj, t.e. se laŭ la cirkonstancoj de la intrigo ne estas klare, ke direkto nepre estu indikita, oni **ne** uzu la n-indikilon (klara aplikkazo de R 13 ne ekzistas, do R 14 – „nominativo“ aplikiĝas). Z klarigis tiun rekomendon en 1890. Fono estis, ke slavoj kaj germanoj sub influo de sia nacia lingvo emis tro vaste uzi n-formon post rolvorteto (malmodele: „skribi ion sur paperon“ anstataŭ pli bona „sur papero“).

LR 74 (1890) [Pri la uzo de la akuzativo post prepozicio en dubaj okazoj]: Tuŝante la akuzativon mi povas al vi doni la jenan konsilon: uzu ĝin ĉiam nur en tiuj okazoj, kie vi vidas, ke ĝi estas efektive necesa; en ĉiuj aliaj okazoj, kie vi ne scias, ĉu oni devas uzi la akuzativon aŭ la nominativon – uzu ĉiam la *nominativon*. La akuzativo estas enkondukita nur el neceso, ĉar sen ĝi la senco ofte estus ne klara; sed ĝia uzado en okazo de nebezono¹³³ pli multe malbeligas la lingvon ol la neuzado en okazo de bezono. [*La Esperantisto* 1890, p. 27].

- 4 Jen listo de rolvortetoj kun (ankaŭ) loka signifo; „neniu F-ta ekz.“ signifas, ke en la Fundamento ne troviĝas ekzempla frazo por la kombino de rolvorteto sekvata de direkto-markilo.

rolvorteto kun loka signifo	ĉu eblas direkto-indikilo?	ekzemplo	rimarkoj
al	<i>ne</i>	al la domo	PAG § 190 e) 3.
antaŭ	jes	meti seĝon antaŭ la fenestron	Göhl § 160; neniu F-ta ekz.
apud	jes	grenado falis apud la domon	Göhl § 160; neniu F-ta ekz.
ĉe			
ĉirkaŭ	jes		Göhl § 160; neniu F-ta ekz.
ekster	jes	iri ekster la urbo/n (Z)	iam disputita, vd. malsupre
en	jes	en la ĝardeno/n	[FE 28.3]
ĝis	<i>ne</i>	li kuris ĝis la stratangulo	PAG § 190 e) 3.

685

¹³³ Originala vortumo: „sed la uzado ĝin en okazo de senbezono“.

inter
kontraŭ
malantaŭ
post
preter
sub
super

sur	jes	sur la tablon	[FE 28.3]
tra			
trans	jes	kuri trans la straton	PAG § 190 Rim. IV.

3. Ĉu direkto-indikilo post „ekster“?

Literaturo (selekto): **Setälä**, Vilho. Ekster. En: Esperanto Finnlando 1965, repr. en: Fortoj de l'Vivo 1967, p. 166.

- 5 Kontraŭ la uzo ĉe Z kaj kontraŭ PV 1930, PV 1934 rimarkis:

„Nelogika kaj ev[itinda] estas la uzo de akuz[ativo] post ekster, malgraŭ multaj Z-aj ekzemploj, ĉar la komplemento de tiu prep[ozicio] neniam montras la celon aŭ direkton de la movo“: [sekvas kvar Z-aj ekzemploj kun ekster –n].

Tiun „eraran“ (Setälä) konsilon, PIV 1970 – prave – forigis ĝustige.

P. § 14 [Prepozicio]

I. Fundamentaj Tekstoj

14. [1] Chaque préposition possède, en Esperanto, un sens immuable et bien déterminé, qui en fixe l'emploi. [2] Cependant, si le choix de celle-ci plutôt que de celle-là ne s'impose pas clairement à l'esprit, on fait usage de la préposition **je** qui n'a pas de signification propre. Ex.: **ĝoj'i je tio** — s'en réjouir, **rid'i je tio** — en rire, **enu'o je la patr'uj'o** — regret de la patrie. [3] La clarté de la langue n'en souffre aucunement, car, dans toutes, on emploie, en pareil cas, une préposition quelconque, pourvu qu'elle soit sanctionnée par l'usage. [4] L'Esperanto adopte pour cet office la seule préposition **je**. [5] A sa place on peut cependant employer aussi l'accusatif sans préposition, quand aucune amphibologie n'est à craindre.

14. [1] Every preposition in the international language has a definite fixed meaning. [2] If it be necessary to employ some preposition, and it is not quite evident from the sense which it should be, the word **je** is used, which has no definite meaning; for example, **ĝoj'i je tio**, „to rejoice over it”; **rid'i je tio**, „to laugh at it”; **enu'o je la patr'uj'o**, „a longing for one's fatherland”. [3] In every language different prepositions, sanctioned by usage, are employed in these dubious cases, [4] in the international language, one word, **je**, suffices for all. [5] Instead of **je**, the objective without a preposition may be used, when no confusion is to be feared.

14. [1] Jede Präposition hat eine bestimmte, feste Bedeutung; [2] ist es aber aus dem Sinne des Satzes nicht ersichtlich, welche Präposition anzuwenden ist, so wird die Präposition **je** gebraucht, welche keine selbstständige Bedeutung hat; z.B. **ĝoj'i je tio**, sich darüber freuen; **rid'i je tio**, darüber lachen; **enu'o je la patr'uj'o**, Sehnsucht nach dem Vaterlande, etc. [3] Die Klarheit leidet keineswegs darunter, da doch dasselbe in allen Sprachen geschieht, nämlich, daß man in solchen Fällen eine beliebige Präposition gebraucht, wenn sie nur einmal angenommen ist. [4] In der internationalen Sprache wird in solchen Fällen immer nur die eine Präposition **je** angewendet. [5] Statt der Präposition **je** kann man auch den Akkusativ ohne Präposition gebrauchen, wo kein Doppelsinn zu befürchten ist.

14. [1] Каждый предлог имѣтъ опредѣленное постоянное значеніе; [2] если же нужно употребить предлогъ, а прямой смыслъ не указываетъ, какой именно, то употребляется предлогъ **je**, который самостоятельнаго значенія не имѣеть (Примѣры: **ĝoj'i je tio** радоваться этому; **rid'i je tio** смѣяться надъ этимъ; **enu'o je la patr'uj'o** тоска по родинѣ и т. д.). Ясность отъ этого не страдаетъ, потому что во всѣхъ языкахъ въ этихъ случаяхъ употребляется какой угодно предлогъ, лишь бы обычай далъ ему санкцію; въ междунатодномъ же языкѣ санкція на всѣ подобные случаи дана одному предлогу **je**. Въмѣсто предлога **je** можно также употребить винительный падежъ.

14. [1] Każdy przyimek ma określone, stałe znaczenie; jeżeli należy użyć przyimka w wypadkach, gdzie wybór jego nie wpływa z natury rzeczy, używany bywa przyimek **je**, który nie ma samoistnego znaczenia (np. **ĝoj'i je tio** cieszyć się z tego; **mal/san/a je la okul/o/j** chory na oczy; **enu'o je la patr'uj'o** tęsknota za ojczyzną i t. p. Jasność języka wcale wskutek tego nie szwankuje, albowiem w tym razie wszystkie języki używają jakiegokolwiek przyimka, byle go tylko zwyczaj uświęcił; w języku zaś międzynarodowym sankcja we wszystkich podobnych wypadkach nadaną została jednemu tylko przyimkowi **je**). Zamiast przyimka **je** używać też można, przypadku czwartego bez przyimka tam, gdzie nie zachodzi obawa dwuznaczności.

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

14. [1] Jede Präposition hat eine bestimmte, feste Bedeutung; [2] ist es aber aus dem Sinne des Satzes nicht ersichtlich, welche Präposition anzuwenden ist, so wird die Präposition **je** gebraucht, welche keine selbstständige Bedeutung hat; z.B. **ĝoj'i je tio**, sich darüber freuen; **rid'i je tio**, darüber lachen; **enu'o je la patr'uj'o**, Sehnsucht nach dem Vaterlande, etc. [3] Die Klarheit leidet keineswegs darunter, da doch dasselbe in allen Sprachen geschieht, nämlich, daß man in solchen Fällen eine beliebige Präposition gebraucht, wenn sie nur einmal angenommen ist. [4] In der internationalen Sprache wird in solchen Fällen immer nur die eine Präposition **je** angewendet. [5] Statt der Präposition **je** kann man auch den Akkusativ ohne Präposition gebrauchen, wo kein Doppelsinn zu befürchten ist.

Zamenhofs traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

14. [1] Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon; [2] sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion "je", kiu memstaran signifon ne havas. [3]-[4] [mankas]. [5] Anstataŭ la prepozicio "je" oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.

II. Superrigardo

Literaturo (selekto): **Wüster**, Eugen. Die Verhältniswörter des Esperanto. Zugleich eine allgemeine Funktionslehre der Verhältniswörter seiner Quellsprachen. (neŝanĝ. repr. de la eld. Berlin, Dresden 1924). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1968, 36 p.

1 R 14 traktas prepoziciojn¹³⁴, R 8 suplementas, ke „ĉiuj prepozicioj per si mem postulas la nominativon“ (vd. tie). Ne estas evidente, kial R 8 ne estas integrita en R 14, sed aperas separate sub „B) Parties du discours – Parts of Speech – Redetheile - Части рѣчи - Części mowy, dum R 14 kuŝas en C) „Ĝeneralaj Reguloj“. En sia traduko de FG al Esperanto de 1903 Zamenhof rezignis pri la separo inter B) kaj C). La strukturo en la esperanta traduko nur plu havas la partojn „A) Alfabeto“ kaj „B) Reguloj“. Probable do temas pri postlasaĵo el la unua epoko, kiu al Z poste ne plu ŝajnis utila.

2 R 14 kun R 8 enhavas du bazajn regulojn:

- R 14.1: „prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon“.
- R 8: „prepozicio per si mem postulas la o-formon“.

Aldoniĝas du escepto-reguloj al R 14.1:

- R 14.2: La sola prepozicio sen difinita signifo estas „je“.
- R 14.5: „je“ estas anstataŭigebla per n-markilo“

R 14.3 – R 14.4 nek enhavas regulon, nek klarigajn ekzemplojn. Temas pri la fona motivo por krei „je“.

¹³⁴ En la lingvaĵo de PMEG „rolvorteto“.

III. Analizo laŭ frazoj

1. R 14.1 („difinita kaj konstanta signifo“)

- 3 La **listo** de prepozicioj **ne** estas **fermita**. R 14.1 kaj idente R 8 parolas pri „ĉiuj“, do ne pri „la“ prepozicioj, kp. kontraste la fermitajn listojn de numeraloj en R 4 kaj de pronomoj en R 5. Novaj prepozicioj do principe povas esti enkondukitaj, se ili plenumas la kondiĉojn de R 14.1, nome „havas difinitan kaj konstantan signifon“ kaj krome la kondiĉojn fiksitajn en la Antaŭparolo, ekz. en A 8 (formoj novaj) k.t.p.
- 4 R 14.1 nek nomas la esperantajn prepoziciojn, nek mem difinas ilin. Temas do pri normo, kiu plusendas al la aliaj partoj de la Fundamento, ĉefe al UV kaj FE. Ili enkondukas jenajn 33 bazajn prepoziciojn, pri kiuj vd. la vortaran parton (BK II). Eksterfundamente aldoniĝas pliaj kunmetitaj, ekz. malantaŭ.

al, anstataŭ, antaŭ, apud, ĉe, ĉirkaŭ, da, de, dum, ekster, el, en, ĝis, inter, je, kontraŭ, krom, kun, laŭ, malgraŭ, per, po, por, post, preter, pri, pro, sen, sub, super, sur, tra, trans.

2. R 14.2 („je“)

- 5 La ekzemploj donitaj en R 14.2 estas malsamaj en la kvin lingvo-versioj. Komunaj al ĉiuj lingvoj estas „ĝoji je tio“ kaj „enuo je la patrujo“. Nur en la pola mankas „ridi je tio“. Anstataŭe sole la pola havas „malsana je la okuloj“.
- 6 UV (1893) kaj FE 23 (1898) ripetas la difinojn en R 14.2 (1887) jene:

- **je** - se traduit par différentes prépositions; sa signification est toujours aisément suggérée par le sens de la phrase | can be rendered by various English prepositions | kann durch verschiedene Präpositionen übersetzt werden | может быть переведено различными предлогами | może być przetłumaczone za pomocą różnych przyimków. [UV - 1893]
- **je** - se traduit par différentes prépositions | can be rendered by various prepositions | kann durch verschiedene Präpositionen übersetzt werden | может быть переведено различным предлогами | może być przetłumaczone za pomocą różnych przyimków [FE 23 - 1898].

Ankaŭ tiuj versioj estas malsamaj. En FE-franca estis strekita „sa signification est toujours aisément suggérée par le sens de la phrase“ (ĝia signifo ĉiam estas facile deduktebla el la senco de la frazo) trovebla en UV-franca; en FE-angla „English“. Ambaŭ redaktoj enhave nenion ŝanĝas.

- 7 La ekzemplo „**enuo je la patrujo**“ estas arkaismo. La semantika malakordo inter gramatiko (la nuna FG 14.2) kaj vortaro jam troviĝas en la Unua Libro de 1887 (UL). Kialo estas, ke la rusa *сучать* *skuĉat'* estas plursenca kaj povas signifi kaj *enuo* kaj *sopiro*. Kun la rusa prepozicio *po* plus lokativo aŭ dativo ĝi signifas „sopiri je“. De la rusa UL la signifo „sopiro“ transiris al la franca, pola kaj germana UL, dum en (la posta) FG 14.2 restis neadaptita la senco „enuo“. ¹³⁵ Fine tiu „eraro“ estis – tute intence – nekorektite transprenita en la Fundamenton de 1905 (kp. A 4.2 – A 4.4).

3. R 14.3 – R 14.4 (motivoj por „je“)

- 8 Principe la Gramatikoj nur enhavas regulojn aŭ - en la lingvaĵo de la Antaŭparolo - „leĝojn“. R 14.3 kaj R 14.4 nek enhavas regulon, nek aplik-ekzemplon, sed simple informas pri la motivoj de Zamenhof krei la nedefinitan prepozicion „je“. Pro tio la du frazoj sidas „malĝuste“, nome kontraŭsisteme en FG. Zamenhof mem ekkonis

685

¹³⁵ Pli detale vd. EVE.

tiun nekonsekvencon, kiam li tradukis FG al Esperanto por publikigo en la Fundamenta Krestomatio de 1903, kaj simple preterlasis ilin.

- 9 Malgraŭ tio, la du frazoj tamen laŭdifine apartenas al la Fundamento (principo de netuŝebleco, vd. la Antaŭparolon). Oni povas traduki ilin jene:

„[3] La klareco neniel suferas pro tio; same okazas en ĉiuj lingvoj, nome ke oni en tiaj okazoj uzas iun ajn prepozicion, se ĝi nur estas akceptita de la uzado. [4] La Internacia Lingvo Esperanto en tiaj okazoj uzas sole la prepozicion „je“.

Ili enhavas tri fonajn principojn, de kiuj Zamenhof lasis sin gvidi, verkinte la lingvon:

- klareco – komparu la francan tradukon de „je“ en UV 1893 kaj ĝenerale A 3.3: „, por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj“
- akcepto fare de la ĝenerala uzado.
- unu lingva celo – unu rimedo („sole“) – kp. ekz. R 1 (nur unu difinita artikolo „la“), R 6 pri la konjugacio de verboj kaj multloke simile.

4. R 14.5 (n-markilo anstataŭ „je“)

- 10 La Ekzercaro havas jenajn ekzemplo-frazojn:

- Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon) [FE 29.7].
- Ekzemple, ni povas diri “obei al la patro” kaj “obei la patron” (anstataŭ “obei je la patro”) [FE 29.9].

Q. § 15 [Fremdaj vortoj]

I. Fundamentaj Tekstoj

15. [1] Les mots "étrangers" c.-à-d. ceux que la plupart des langues ont empruntés à la même source, ne changent pas en Esperanto. Ils prennent seulement l'orthographe et les terminaisons grammaticales de la langue. [2] Mais quand, dans une catégorie, plusieurs mots différents dérivent de la même racine, il vaut mieux n'employer que le mot fondamental, sans altération, et former les autres d'après les règles de la langue internationale. Ex.: tragédie — tragedi'o, tragique — tragedi'a.

15. [1] The so-called „foreign” words, i. e. words which the greater number of languages have derived from the same source, undergo no change in the international language, beyond conforming to its system of orthography. — [2] Such is the rule with regard to primary words, derivatives are better formed (from the primary word) according to the rules of the international grammar, e. g. teatr'o, „theatre”, but teatr'a, „theatrical”, (not teatrical'a), etc.

15. [1] Sogenannte Fremdwörter, d. h. solche Wörter, welche die Mehrheit der Sprachen aus einer und derselben fremden Quelle entlehnt hat, werden in der internationalen Sprache unverändert gebraucht, indem sie nur die internationale Orthographie annehmen; [2] aber bei verschiedenen Wörtern, die eine gemeinsame Wurzel haben, ist es besser, nur das Grundwort unverändert zu gebrauchen, die abgeleiteten Wörter aber — nach den Regeln der internationalen Sprache zu bilden; z. B. Theater, teatr'o; theatralisch, teatr'a.

15. [1] Так называемыя „иностранныя” слова, т.е. такія, которыя большинствомъ языковъ взяты изъ одного чужого источника, употребляются въ международномъ языкѣ безъ измѣненія, принимая только орфографію этого языка; [2] но при различныхъ словахъ одного корня лучше употреблять безъ измѣненія только основное слово, а другія образовать по правиламъ международнаго языка (Примѣръ: театръ — teatr'o, но театральный — teatr'a).

15. [1] Tak zwane wyrazy „cudzoziemskie” t. j. takie, które większość języków przyjęła z jednego obcego źródła, nie ulegają w języku międzynarodowym żadnej zmianie, lecz otrzymują tylko pisownię międzynarodową; [2] przy rozmaitych wszakże wyrazach jednego źródłosłowu, lepiej używać bez zmiany tylko wyrazu pierwotnego, a inne tworzyć według prawideł języka międzynarodowego (np. teatr'o — teatr, lecz teatralny — teatr'a).

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

15. [1] Sogenannte Fremdwörter, d.h. solche Wörter, welche die Mehrheit der Sprachen aus einer und derselben fremden Quelle entlehnt hat, werden in der internationalen Sprache unverändert gebraucht, indem sie nur die internationale Orthographie annehmen; [2] aber bei verschiedenen Wörtern, die eine gemeinsame Wurzel haben, ist es besser, nur das Grundwort unverändert zu gebrauchen, die abgeleiteten Wörter aber — nach den Regeln der internationalen Sprache zu bilden; z.B. Theater, teatr'o; theatralisch, teatr'a.

Zamenhofa traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

15. [1] La tiel nomataj vortoj "fremdaj", t. e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la

ortografion de tiu ĉi lingvo; [2] sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

II. Komentoj

Literaturo (selekto): Neergaard, Paul. Fremdvortoj en Esperanto. 15a regulo de la "Fundamenta gramatiko" en teorio kaj praktiko. Kopenhago 1933, [ĉ. 65 p.]

1. Superrigardo

- 1 R 15 estas la centra „enkorpiga“, „inkluziviga“ regulo de Esperanto. Apud la regula gramatiko (R 1 – R 10, R 12 – R 14, R 16) kaj la „plena dismembrigo de ideoj“ (A 11) ĝi estas la tria kolono, sur kiu baziĝas la relativa facileco de la lingvo (vd. supre la superrigardon pri FG).
- 2 R 15 konsistas el **du partoj**. R 15.1 enhavas du regulojn („estas uzata“ kaj „ricevante la ortografion“, en la franca versio krome „ricevante la gramatikajn finiĝojn“). R 15.2 estas nura rekomendo („pli bone“).
- 3 La **vortumo** en la referenc-lingvoj estas **malunueca**. Plej eksplicite estas la franca, kiu preskribas en R 15.1 ne nur „ricevante la ortografion de Esperanto“ sed krome „kaj ties gramatikajn finiĝojn“. Ankaŭ la aplik-ekzemploj estas malsamaj. Nur la franca havas „tragedio“ – „tragedia“, dum la aliaj kvar lingvoj „teatro“ – „teatra“.
- 4 Kiel ĉiuj reguloj de la FG ankaŭ R 15 jam troveblas en la **Unua Libro** (UL) de 1887 (tie kun la numero C 8): „ĉiuj vortoj, kiuj jam fariĝis internaciaj (la tiel nomataj „fremdaj vortoj“), restas en la lingvo internacia neŝanĝataj, akceptante nur la internacian ortografion“. Z tie donas detalajn motivojn pri ĝi kaj multajn ekzemplojn. La tekstojn de la UL en la kvin referenc-lingvoj li tradukis al Esperanto por FK 1903 kun selekto de la UL-ekzemploj (vd. malsupre en la ĉap. „Vortoj fremdaj en la Unua Libro“). Ĉar R 15 eniris la Fundamenton neŝanĝite laŭ la stato de 1887, tiuj klarigoj el UL povas kaj devas esti konsiderataj por ĝuste interpreti la normon.
- 5 Pro la multaj „ĝeneralaj klaŭzoj“ („plimulto de la lingvoj“, „prenis“, „unu fonto“, „diversaj vortoj de unu radiko“), R 15 apartenas al la plej malfacile interpreteblaj reguloj de Esperanto. Disputoj ekzistas ekz. kaj i.a. pri jenaj demandoj: Kiujn lingvojn oni devas konsideri? Kiel oni difinas, ĉu iu lingvo „prenis“ vorton el alia fonto, t.e. ke la vorto fariĝis parto de tiu lingvo; ĉu ekzemple sufiĉas, ke en iu lingvo vorto ekzistas nur en klerula faklingvo, dum la ĝenerale uzata vorto estas alia? Kiel oni difinu „plimulto“? Aktuale ekzistas minimume tri konceptoj (Zamenhof, Kück, Derks), kiuj laŭ parte malsamaj kriterioj klopodas konkretigi la aplikon de R 15 kaj respondi la nomitajn kaj aliajn demandojn.
- 6 Tiuj malfacilaĵoj pri la ĝusta apliko de R 15 jam ekzistis en la epoko de Z. Pri R 15.1 temas Lingva Respondo de 1904, pri R 15.2 de 1911. Ni dokumentas ilin – kaj pliajn LR pri R 15 – en la koncernaj subĉapitroj.
- 7 **LR 54 de 1904:**

„... La malĝojaj ideoj, kiujn vi esprimis pro la novaj vortoj en la laste aperintaj vortaroj [EG 1 kaj GE 1], ŝajnas al mi tute senkaŭzaj; laŭ mia opinio via timo venis nur de tio, ke vi ne tute ĝuste prezentas al vi la esencan signifon de tiuj pligrandigitaj vortaroj.

La novaj vortaroj ne havas eĉ la plej malgrandan intencon detrui la unuecon de nia lingvo. La sola kaj netuŝebla fundamento de nia lingvo ĉiam restas la „Universala Vortaro“ kaj la novaj vortaroj ne ŝanĝas eĉ unu vorton el tiu fundamenta vortaro;

ilia celo estas nur doni klarigon kaj helpon en tiuj okazoj, kiam la Universala Vortaro ne sufiĉas. Estas dezirinde, ke tiun ĉi ideon la novaj vortaroj akcentu tute klare en siaj antaŭparoloj, por eviti ĉian malkompreniĝon.

La ĉefaj principoj de de la vortouzado en Esperanto estas la sekvantaj:

a) Ĉiu vorto, kiu troviĝas en la Universala Vortaro estas leĝdona por ĉiuj esperantistoj, kaj neniu en la mondo, nek la aŭtoro de Esperanto nek ia alia esperantisto havas la rajton fari en tiuj vortoj ian ŝanĝon (se ekzemple anstataŭ „ŝipo“ iu uzas la vorton „navo“, ĉar la vorto „ŝipo“ al li „ne plaĉas“ – tio estus rekta peko kontraŭ la unueco de nia lingvo kaj ĉiuj esperantistoj tiam protestus).

b) Se vorto per si mem estas internacia, tiam laŭ la regulo 15 de nia gramatiko ĉiu havas la rajton uzi tiun ĉi vorton, kvankam ĝi ne troviĝas en la Universala Vortaro. (Ekzemple neniu povus protesti kontraŭ la uzado de la vortoj „aŭtoro“, „telegrafo“ k. t. p., kvankam ili ne troviĝas en la Universala Vortaro).

c) Sed se ia vorto nek estas sendube internacia nek havas por si apartan radikon en la Universala Vortaro kaj esprimi ĝin per kunmeto de radikoj jam ekzistantaj estas aŭ tute ne eble, aŭ tro neoportune, aŭ teknike [tiel! Z probable origine skribis teĥnike] ne precize, tiam tiun ĉi vorton ĉiu aŭtoro povas mem krei laŭ sia bontrovo, tiel same kiel oni ĝin faras en ĉiu alia lingvo. Tiu ĉi permeso estas necesa, ĉar alie la lingvo estus tro rigida kaj multajn ideojn oni tute ne povus esprimi en ĝi. Sed ĉar ne ĉiuj personoj povas mem krei al si vortojn kaj ĉar estas dezirinde, ke ĉiuj uzu la novajn vortojn kiom eble egale, tial ĉiu nove aperanta vortaro ordinare enhavas en si kelkan nombron da novaj vortoj sub la kontrolo de l' aŭtoro de Esperanto, por ke ili povu alporti helpon al ĉiuj, kiuj bezonas novajn vortojn kaj ne volas ilin krei ĉiu arbitre kaj diversmaniere laŭ sia bontrovo. Sed tiuj ĉi novaj vortoj, kiuj ne troviĝas en la Universala Vortaro, estas nur private rekomendataj, sed tute ne oficiala ordonataj! Nur rekomendataj, ne altrudataj! Kiu trovas ilin bonaj, povas ilin uzi, - kiu trovas ilin ne bonaj, povas ilin ne uzi kaj anstataŭigi per iaj aliaj vortoj. Sed por la unueco de nia afero estas kompreneble dezirate, ke oni anstataŭigu [tiel] ilin per aliaj vortoj nur en okazo de ilia efektiva malboneco, sed ne pro simpla persona kaprico. ...

- 8 **LR 52 B de 1911** temas pri la speciala demando de transskribo de natursciencaj nomoj ([1]) kaj pri la t.n. „falsaj parencoj“ ([2]):

„[1] Vian opinion mi trovas tute prava, kaj por ĉiuj natursciencaj nomoj mi konsentas ĉiam preni la nomojn latinajn en Esperanta transskribo. Se en la Universala Vortaro troviĝas nomoj de bestoj kun formo ne latina, la fakto venas de tio, ke en la unuaj jaroj mi ne havis ankoraŭ la principon doni al tiuj nomoj formon latinan, sed nun mi ordinare gvidas min per tiu principo.

[2] Tio sama estas ankaŭ kun la diversaj finiĝoj, kiujn mi en la unua tempo ŝanĝadis pro ilia simileco kun Esperantaj sufiksoj, sed kiujn mi nun ordinare ne ŝanĝas; sekve mi konsilas, uzi -ilo, -ino, -ulo k.t.p. [1911, PVZ IX, p. 236].“

2. R 15.1 („vortoj fremdaj“)

a) Diskutitaj demandoj

- 9 Pri la termino „vorto“ ekzistas jenaj demandoj.

1. Ĉu propraj nomoj estas „vortoj“ en la senco de R 15?

2. Ĉu – transpasante la normalan vort-sencon - „vorto“ ankaŭ inkluzivas etimologie identigeblajn literaroj, ekz. afiksojn de la antikva greka kiel bio-, homo-, meta-, pan-, pseŭdo-, tele- k.t.p.?

3. Ĉu – transpasante la normalan vort-sencon - „vorto“ ankaŭ inkluzivas la finaĵon –a por signi personajn nomojn de virinoj (*Marta, Sara*)?
4. Ĉu – transpasante la normalan vort-sencon - „vorto“ ankaŭ inkluzivas izolitajn grafemojn, signojn aŭ simbolojn?
- 10 La dua frazo de la enkonduko al UV, verkita same kiel R 15 en 1887 (plenan tekston vd. en la ĉapitroj „UV“ kaj ĉe R 11) donas jenajn indikojn:

Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, tiel ekzemple la vorto « **frat'in'o** », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [**UV, enk. 2**].

Tio harmonias kun **R 11.3** (cit. laŭ la Zamenhofa traduko en FK 1903):

[3] La gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj. Ekz. vapor|ŝip|o estas formita de: *vapor, ŝip kaj o* (finiĝo de la substantivo).

FE 27.5 fine klarigas:

Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo.

- 11 El tio sekvas, ke la Fundamento uzas la terminon „vorto“ egale por radikoj, afiksoj kaj markiloj („finiĝoj“), kiuj havas propran *memstaran signifon* kaj principe estas *libere kombineblaj* laŭ R 11 kaj kiujn oni pro tiuj ecoj povas registri aparte en esperanta vortaro. Ke tiu klarigo trafas, ankaŭ montras la fakto, ke en UL-V kaj UV estas registritaj nur la „puraj radikoj“ sen la „gramatikaj finiĝoj“.

b) Vortoj de Zamenhof eksplicite nomitaj „fremdaj“

aa) Vortoj de Zamenhof eksplicite nomitaj „fremdaj“ en la Unua Libro

- 12 En la traduko de UL por FK 1903 fare de Zamenhof tekstas:

„Krom tio mi donis komunan regulon, ke ĉiuj vortoj, kiuj jam fariĝis internaciaj (la tiel nomataj "fremdaj vortoj"), restas en la lingvo internacia neŝanĝataj, akceptante nur la internacian ortografion; tiamaniere grandega nombro da vortoj fariĝas superflujaj por la lernado; ekzemple: lokomotivo, redakcio, telegrafo, nervo, temperaturo, centro, formo, publiko, platino, botaniko, figuro, vagono, komedio, ekspluati, deklami, advokato, doktoro, teatro k. t. p., k. t. p.“

- 13 La listo de ekzemploj estas malsamaj en la diversaj lingvo-versioj. La traduko al Esperanto baziĝas sur kaj estas identa kun la rusa UL, p. 10 (en la originalo en la rusa) kaj la pola UL p. 10 (en la originalo en la pola). La germana UL, p. 12 (en la originalo en la germana) aldonas astronomio kaj motivo, dum teatro mankas. En la franca UL, p. 11 ni trovas krome (en la franca) atomo, desinfekti, emancipi kaj monopolo. La angla UL, p. 11 havas neniujn pliaj ekzemplojn, sed nur ellasas kelkajn.
- 14 Aliloke en UL (ekzemple germana UL, p. 19) Zamenhof donas ankoraŭ pliajn ekzemplojn:

... kaj ankaŭ vortoj „fremdaj“, supozeble konataj al ĉiuj, ekzemple „tabako“, „teatro“, „fabriko“ k. t. p. ...

Tiun klarigon Zamenhof densigis en regulo C7 (= § 15 FE) forstrekinde ĉiujn ekzemplojn krom teatro kaj en la franca ŝanĝante de komedio al tragedio.

bb) Vortoj de Zamenhof eksplicite nomitaj „fremdaj“ aliloke en liaj verkoj

- 15 Plian ekzempon Zamenhof donas en Lingva Respondo n-ro 54 de 1904:

„... neniuj povus protesti kontraŭ la uzado de la vortoj „aŭtoro“, „telegrafo“ k.t.p., kvankam ili ne troviĝas en la Universala Vortaro“ (sed nome en la Antaŭparolo respektive la Ekzercaro de la Fundamento).

En LR 47 F (1903) Z eksplicite nomas „internaciajn vortojn“ (do R 15-vortojn) la formojn „ariergardo“, „avangardo“ kaj „rezono, rezonado“. En LR 24 (1907) li eksplicite nomas la vorton „ero“ (en la senco de „erao“, „historia periodo“) fremdan vorton en la senco de R 15, en LR 31 A (1908) la vorton „kateĥismo“ „tute internacian kaj bonan“.

16 Resume de jenaj vortoj ni klare scias, ke laŭ Z ili estas vortoj fremdaj:

advokato (UL)
ariergardo (LR 47 F, 1903)
astronomio (UL)
atomo (UL)
aŭtoro (RE) (LR 54, 1904)
avangardo (LR 47 F, 1903)
botaniko (UL)
centro (UL)
deklami (UL)
desinfekti (UL)
doktoro (UL)
ekspluati (UL)
emancipi (UL)
ero [„erao“] (LR 24, 1907)
fabriko (UL)
figuro (UL)
formo (UL)
kateĥismo (LR 31 A, 1908)
komedio (UL)
lokomotivo (UL)
monopolo (UL)
motivo (UL)
nervo (UL)
platino (UL)
publiko (UL)
redakcio (UL)
rezono, rezonado (LR 47 F, 1903)
tabako (UL)
teatro (UL) (R 15)
telegrafo (UL) (LR 54, 1904)
temperaturo (UL)
tragedio (R 15f)
vagono (UL)

c) Vortoj de Zamenhof, deduktende „fremdaj“

- 17 LR 54 de 1904 uzas la ekzemplojn „aŭtoro“ kaj „telegrafo“. Ambaŭ apartenas al la grupo de vortoj mankantaj en la UV laŭ stato de 1893 / 1905, sed ja estas uzitaj en aliaj partoj (A 2.2, A 3.3, A 3.4 kaj FE 36.4). Krom propraj nomoj en tiu grupo de **Fundamentaj vortoj ekster-UV** troveblas i.a. jenaj:

- absolut-, adres-, aktiv-, alfabet-, arĥaism-, aŭtor-, aŭtoritat-, bal-, centim-, centr-, depend-, diplomat-, diplomati-, dogm-, doktor-, dokument-, energi- k.t.p. ĝis valor- kaj zoologi-. La kompletan liston vi trovas tie ĉi.

- 18 Zamenhof skribis en UL 1887:

„... Dank' al la plej vasta reciproka kunigebleco de la vortoj, oni povas per helpo de tiu ĉi malgranda vortaro [la folio aldonita al UL] esprimi ĉion, kio estas necesa en la ordinara vivo; sed, kompreneble, vortoj renkontataj malofte, vortoj tehnikaj (kaj ankaŭ vortoj "fremdaj", supozeble konataj al ĉiuj, ekzemple "tabako", "teatro", "fabriko" k. t. p.) en ĉi ne estas troveblaj; tial se vi bezonas nepre uzi tiajn vortojn kaj anstataŭigi ilin per aliaj vortoj aŭ tutaj esprimoj estas neeble, tiam vi devos jam uzi vortaron plenan ... [Z-a traduko en FK 1903].

En 1911 Z klarigis tion jene:

LR 55 (1911) [Pri plena vortarego]: „...publikigonte mian unuan libron pri Esperanto, [mi] decidis forĵeti la tro grandan vortaron kaj tro abundan afiksaron, kiujn mi estis pretiginta teorie, kaj mi decidis publikigi vortareton nur tre malgrandan kaj nur plej necesan por la ordinara vivo, lasante ĉion alian al libera, iom-post-ioma ellaboriĝado. ...“ [LR 55 Respondo 58, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 223].

LR 55 estas fakte nur resumo de la pli detale elmetitaj pensoj el **DL-Ald (1888 – vd. la kompletan citaĵon en la ĉap. „Prauloj de la Antaŭparolo“)**:

„Ke mia unua broŝuro [UL 1887] prezentas fundamenton sufiĉe fortan, kaj ke la fundamenta vortaro [folio aldonita al UL] enhavas nombron da vortoj sufiĉan kaj tiel grandan, ke se oni volas, oni povas eĉ tute libere esprimi siajn pensojn sen ia kreado de novaj vortoj, — montras la fakto, ke en la tuta "Dua Libro" [1888] vi ne renkontas eĉ unu nove kreitan vorton! (vi renkontos tie, vere, multajn vortojn, kiujn vi ne trovas en la fundamenta vortaro, sed tio ĉi estas vortoj ne nove kreitaj, sed nur tiaj, kiujn mi danke la gramatikon (C. 7. [= R 15]) ne bezonis presi en la vortaro).“ [DL-Ald 19]

En 1888 Z do distingas inter „nove kreitaj vortoj“ kaj „vortoj fremdaj“ laŭ la posta R 15. Ĉar la laste menciitaj internaciaj vortoj aŭtomate apartenas al Esperanto, ne necesas, ke ili aperas en la vortaro.

- 19 El tiuj citaĵoj oni devas konkludi, ke ĉe la grupo de Fundamentaj vortoj ekster UV ne temas pri pretervido, sed pri konscia, laŭplana decido. Vortoj „maloftaj“, „teknikaj“ aŭ „fremdaj“ principe nek estas registritaj en la vortara folio de UL, nek poste en UV. Per R 15 ili ne estas unuope, sed grupe integritaj en Esperanton. Multaj Fundamentaj vortoj, kiuj tamen mankas en UV, laŭ la kompreno de Z kaj sekve de la Fundamento do estas „vortoj fremdaj“.
- 20 Tion konfirmas analizo de la „**Plena vortaro Rusa Internacia**“ de 1889 [RE]. Kontraste al la vortareto de UL 1887 kaj al la minimuma UV 1893, ĝi celas registri ankaŭ teknikajn kaj fremdajn vortojn. Jen kelkaj ekzemploj (detale kun multaj pliaj ekzemploj vd. en la Kvara Libro - UV):
- admiral-, advokat-, aerostat-, agent-, agit-, agoni-, akaci-, akademi-, akcent-, akci-, akciz- k.m.a.

- 21 Se oni rigardas ankoraŭ la (antaŭfundamentan) **Fundamentan Krestomation de 1903** kun tekstoj de diversaj aŭtoroj, sed zorge redaktita de Zamenhof, oni trovas pliajn ekzemplojn de vortoj, kiuj por Zamenhof estis vortoj fremdaj kaj pro tio registrindaj nur en „plena vortarego“. Jen kelkaj (nur litero A):
- agronomio, aligatoro, amforo, antropologio, anatomio, arabo, anonima, antipoda, aristokrato, aŭtomato, aŭtoritato, aŭdienco, astigmatismo, astrologo, azimuto k.t.p.¹³⁶
- 22 En LR 47 F 1903 (vd. analizon tuj poste malsupre) Z. ankoraŭ rekomendas jenajn „internaciajn vortojn“:
- aorto, aŭreolo, bigamio, boksi, intesto, burleska k.t.p.
- 23 **Resume** la analizo montras centojn da ekzemploj de vortoj konsiderataj “fremdaj” de Zamenhof en la senco de R 15, kiuj do estas “ĝusta” Esperanto.
- 24 [Daŭrigo ne publikigita tie ĉi].

3. R 15.2 („pli bone“)

- 25 Kontraste al R 15.1, kiu estas deviga regulo, R 15.2 estas nur rekomendo („pli bone“). Z klarigis tion en 1911 jene:

LR 52 A (1911) [Pri pseŭdosufiksoj – redakti, redakcio, redaktoro]: Kelkaj samideanoj forte malaprobis la uzadon de vortoj kun pseŭdosufiksoj *cio*, *toro* k.t.p. (ekzemple: “civilizacio”, “redaktoro” k.t.p.); ili diras, ke de tiaj vortoj ni devas preni nur la radikan formon (ekzemple: “civiliz”, “redakt”) kaj ĉiujn devenajn formojn uzi nur kun sufikso aŭ finiĝo pure *Esperanta* (ekzemple: “civilizo”, “redaktejo”, “redaktisto” anstataŭ “civilazacio”, “redakcio”, “redaktoro”). Kompreneble, se tia vorto, kiel ekzemple “redaktejo”, estus tute identa kun la vorto “redakcio” kaj povus ĝin perfekte anstataŭi, certe neniu el ni plendus, se la vorto “redakcio” baldaŭ malaperus el nia lingvo; sed se iu diras, ke la formoj pseŭdosufiksaj estas *kontraŭ-Esperantaj*, aŭ ke ili prezentas malaprobindan enkondukon de *novaj vortoj*, mi opinias, ke li eraras. Tiaj formoj, kiel ekzemple “redakcio”, “civilizacio” estas nek kontraŭ-Esperantaj, nek novaj, ĉar laŭ la № 15 de nia gramatiko ili plene apartenas al nia lingvo jam de la unua momento de ĝia naskiĝo. Ni povas *esperi*, ke pli aŭ malpli frue la pseŭdosufiksaj vortoj “fremdaj” fariĝos arĥaismoj kaj cedos sian lokon al vortoj “pure esperantaj” ni povas eĉ *konsili* tion; sed *postuli* tion ni ne povas, ĉar la diritaj vortoj ne sole havas en nia lingvo (laŭ la № 15) plenan rajton de ekzistado, sed ankoraŭ dum longa tempo multaj el tiuj pseŭdosufiksaj vortoj estos pli oportunaj, pli naturaj kaj pli kompreneblaj, ol la ilin anstataŭontaj vortoj “pure Esperantaj”. Ne venis ankoraŭ la tempo, ke ni estu tro pedantaj. Estas vero, ke sekve de nia toleremeco ni por kelkaj vortoj havos dum kelka tempo formojn *duoblajn* (ekzemple: “evolucio” kaj “evoluo”); sed ŝajnas al mi, ke estas multe pli bone havi en la unua tempo ian “embarason de riĉeco”, ol malutili al si per ia ne sufiĉe matura dekreto, elĵetante el la lingvo vortojn, kies elĵetindeco ne estas ankoraŭ por ni tute certa. [LR 52 A. Respondo 55, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 222].

- 26 [Daŭrigo ne publikigita tie ĉi].

685

¹³⁶ **Mencel**, Riĉardo. Vortoj ĉerpitaj el ‘Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto’. En: *Lingvo Internacia* 1907, p. 554-556.

4. R 15 – permeso, sed ne devigo

- 27 R 15 donas **permeson** uzi „vortojn fremdajn“, sed **ne devigas** uzi ilin. Esperantistoj mem rajtas decidi, ĉu ili ekz. preferas kunmetaĵon laŭ R 11. Zamenhof klarigis tion tiel:

LR 24 (1907) [Pri ero – erao]: „Efektive estus pli bone, se por la ideo de tempokalkulo ni uzus ian alian vorton anstataŭ “ero”, kiu havas jam difinitan signifon en la Universala Vortaro. Sed ĉar la vorto “ero” en la senco de tempokalkulo [„erao“] estas vorto pure internacia, tial laŭ la №15 de nia fundamenta gramatiko ni havas plenan rajton ĝin uzi. Ĉar la “ero” de la Universala Vortaro kaj la “ero” science internacia havas tro malsamajn signifojn, tial ni ne bezonas timi, ke oni ilin iam reciproke konfuzos. Cetere, se la vorto “ero” laŭ la №15 de nia gramatiko estas plene *permesata*, ĝi kompreneble ne estas *deviga*, kaj ni havas plenan rajton uzi anstataŭ ĝi “tempokalkulo” aŭ ion similan, kion proponos niaj specialistoj. [LR 24. Respondo 24, *La Revuo*, 1907, Aŭgusto].

5. R 15 en la kompreno de Zamenhof

- 28 [Daŭrigota]

6. Elekstera kaj elinterna lingvaĵo ĉe Zamenhof (R 15 kontraŭ R 11)

- 29 Impreson pri la sinteno de Z en la demando de uzado de **elinternaj** (R 11) aŭ **eleksteraj** (R 15) vortoj ĉefe donas du tekstoj, **LR 47 F (1903)** kaj lia traduko de „Kronika katara konjunktivito“ el la Fundamenta Krestomatio (**FK 1903**, p. 217 ss).
- 30 **LR 47 F (1903)** estas respondo al Th. Cart. Pretigante sian vortaron francan-esperantan¹³⁷, li sendis al Z liston de vortoj, pri kies traduko li hezitis aŭ nesciis. Plej multaj respondoj koncernas la antagonismon „skemismo aŭ naturalismo“.¹³⁸ Kutime Z konsilis la formojn jam troveblajn en la vortaro Esperanto-Franca de Beaufront (1901):

franca	propono de Cart	respondo de Zamenhof	komentoj
aorte	ĉefarterio	aorto	R 15, jam ĉe [Beau]
arrière-garde	postgvardio	ariergardo	R 15, jam ĉe [Beau]
avant-garde	antaŭgvardio	avangardo	R 15; Z: „(vortoj internaciaj)“. jam ĉe [Beau]
archiduc	imperiestrido	arĥiduko	R 15
auréole	glorkrono	aŭ aŭreolo	R 11 – R 15
bigamie	duobledezeco	jes, sed pli bone: bigamio	R 15
boxer	pugnobati	jes, aŭ simple boksi	R 11 – R 15, jam ĉe [Beau]
boyau (intestin)	internaĵo ??	intesto	R 15, jam ĉe [Beau]
brocanteur	revendisto	aŭ brokantisto	R 11 – R 15, ĉe [Beau] jam brokont-i
burlesque	maldelikata, ridinda	aŭ burleska	R 15, jam ĉe [Beau]

685

¹³⁷ Vocabulaire français-Esperanto. Paris: Hachette 1903. Konsultebla je <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm>.

¹³⁸ Aliaj demandoj koncernas temojn kiel anarĥio aŭ anarkio, naĝbarelo aŭ naĝosigno k.t.p.

calorifère	varmiga aparato	aŭ kalorifero (poste forstrekitaj)	?
absolution	—	malkulpigo, senpekigo	R 11, do ne absolucio
accessoire (adj.)	—	flanka	R 11, do ne akcezora
acclimater	—	alklimatiĝi	R 11, do ne alklimatizi
agenda	—	memorlibro	R 11, do ne agendo
albumine	—	ovblankaĵo, albumeno	R 11 – R 15
raisonnement	(Schlussfolgerung)	rezono, rezonado (vortoj internaciaj)	R 15, jam ĉe [Beau]
cédille	(subkomo, substreketo)	cedilo	R 15
commentaire	komentaro aŭ –o	komentario	R 15, jam ĉe [Beau]
compromettre	meti en danĝeron, malagraban situacion	komprometi [tiel!]	R 15, jam ĉe [Beau] kaj nun: kompromiti (kun –i-).
compromis	—	kompromiso	R 15, jam ĉe [Beau]
cornet (en papier)	papera kunvolvaĵo ??	korneto	R 15
désinfecter	malinfekti ?	dezinfekti [tiel!]	R 15 – nun: desinfekti (kun –s-)
scarlatine	(skarлата febro)	skarlatino	R 15, jam ĉe [Beau]
volontaire	(soldat) volontajro	mi preferus „voluntulo“	R 11
tubercule	tubereto	(aŭ speciale: tuberkulo)	R 11 – R 15

32 La peco „**Kronika katara konjunktivito**“ (FK 1903, p. 217 ss) estas la sola konata *traduko faka* de Z. Temas pri elgermanigo de mallonga parto el la „Lernolibro de Oftalmologio“ de Ernst Fuchs (1a eld. 1889, p. 50 ss; 10a neŝanĝita 1905 p. 63 ss), kies kursojn Zamenhof frekventis en Vieno. La germana originalo enhavas multajn medicinajn fakajn vortojn, kiuj estas konsiderataj „fremdvortoj“ en la germana. Ambaŭ eldonoj estas en malnova germana ortografio de antaŭ la reformo de 1901 (objectiv, mässige, Röthung, Uebergangstheile k.t.p.) kaj presitaj en fraktur-skribo. La numeroj en rektaj krampoj referencas al la komentoj sub la kompara teksto.

Conjunctivitis catarrhalis chronica

Symptome. Beim chronischen Bindehautkatarrh [1] sind die objectiv wahrnehmbaren [2] Veränderungen im Ganzen wenig bedeutend. Es besteht mässige Röthung [3] der Bindehaut, entweder nur über dem Tarsus [4] oder auch im Uebergangstheile. Die Bindehaut ist glatt und nicht geschwellt; nur in alten Fällen [5] stellt sich Hypertrophie [6] der Bindehaut mit Verdickung und sammtartiger Beschaffenheit derselben ein. Die Secretion [7] ist gering und äussert sich hauptsächlich durch Verklebtsein der Lider am Morgen. Der weissliche [8] Schaum, den man oft an

Kronika katara konjunktivito

Simptomoj. Ĉe la kronika kataro de la konjunktivo [1] la objekte trovataj [2] ŝanĝoj estas entute malmulte signifaj. Estas modera ruĝeco [3] de la konjunktivo, aŭ nur super la tarso [4], aŭ ankaŭ en la parto transira. La konjunktivo estas glata kaj ne ŝvelinta; nur en malnovaj okazoj [5] aperas hipertrofio [6] de la konjunktivo kun ĝia dikiĝo kaj velursimila karaktero. La sekrecio [7] estas malgranda kaj montras sin precipe per kungluiteco de la palpebroj matene. La blanketa [8] ŝaumo, kiun oni ofte trovas en la anuloj de la

den Lidwinkeln findet, entsteht dadurch [9], dass in Folge [10] häufigen Blinzeln mit den Lidern die Thränenflüssigkeit mit dem Secrete [11] der Meibom'schen [12] Drüsen [13] zu einer Art schaumiger Emulsion geschlagen wird. Die beständige Befeuchtung der Haut an dieser Stelle führt [14] dann zur Bildung von Excoriationen [15]. In manchen Fällen scheint die Secretion anstatt vermehrt sogar verringert zu sein. Mit Rücksicht auf die geringe oder ganz fehlende Vermehrung der Secretion bezeichnen manche Autoren viele Fälle von chronischem Katarrh nicht als solchen, sondern als Hyperaemia conjunctivae [16].

palpebroj, venas de tio [9], ke en sekvo de [10] ofta palpebrumado la larma fluidaĵo kun la eligaĵo [11] de la Meibomaj [12] glandetoj [13] per batiĝado fariĝas speco de ŝaŭma emulsio. La konstanta malsekiĝado de la haŭto en la anguloj de la palpebroj kondukas [14] al la formiĝado de ekskoriacioj [15]. En kelkaj okazoj la sekrecio, anstataŭ esti pliigita, ŝajnas eĉ malpliigita. Pro la tre malgranda aŭ eĉ tute mankanta pliigo de la sekrecio kelkaj aŭtoroj difinas multajn okazojn de kronika kataro ne kiel tian, sed kiel hiperemion de la konjunktivo [16].

- 33** [1] *Beim chronischen Bindehautkatarrh*: kronika kataro de la konjunktivo - Z. transprenas ĉiujn tri grek-latinaĵojn, **ne** anstataŭigas ilin per ĝeneral-lingvaj vortoj, ekzemple "kronika" per "longedaŭra" aŭ simile. Li ignoras la (pro la kunteksto pure teoriantan) misanalizon "katar-o" / "kat-aro". Notu, ke la germana paŭsis la scienc-latinan *conjunctiva*, laŭvorte tradukinte ĝin al *Bindehaut* ("lig-haŭto"). Tiu metodo ankaŭ estus ebla en Esperanto, sed Z. **ne** aplikis ĝin, sed agis laŭ la (posta) 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko pri adapto de fremdvortoj.
- [2] *wahrnehmbar*: Noto de la eldonistoj de la Fundamenta Krestomatio: "legu: troveblaj" anstataŭ *trovataj*.
- [3] *Röthung*, nuntempe *Rötung*: La stato, eco de la konjunktivo pro la malsano estas ruĝa.
- 34** [4] Zamenhof uzas tie ĉi la formon "tarso", anstataŭ la modernan "tarzo" (fibrecalmeno, kvazaŭskeleto de la palpebra rando). Sed li **ne** inventas iun terminon surbaze de "simplaj" vortoj kiel "palpebro-lameno", "palpebro-skeleto" aŭ simile.
- [5] *Fall* (pluralo *Fälle*) povas signifi kaj (gramatika, medicina aŭ jura) "kazo" kaj "okazo": "kazo" nuntempe havas trian difinon, nome "3. (medicino) Manifestiĝo de malsano, konsiderata ĉe difinita individuo: ... *tio estas kuranta kazo de gripo; benigna, maligna kazo*" (PIV 2005). Ĉe la artikolo "okazo" ĝi difinas: "4. (medicino) Kazo: *tio estis bela okazo de hemiplegio* [ekzemplo el la Biblio]". Laŭ PIV oni do niaepoke prefere traduku per "kazo". "Okazo" en tiu kunteksto estas arkaa.
- 35** [6] *Hypertrophie*: Z. simple transprenis la grek-latinan internaciismon "hipertrofio" laŭ regulo, du jarojn poste akceptita en FG 15. Li **ne** „tradukis“ ĝin al ĝeneral-lingva(j) vorto(j), kiel ekzemple „ŝvelaĵo“ aŭ simile.
- 36** [7] *Secretion*, post 1901 *Sekretion*: sekrecio, do apliko de R 15.
- [8] *weisslich*, nuntempe *weißlich*: simila al blanka, iom blanka?
- [9] venas de tio: kalkeo, laŭvorta traduko de germana *kommt daher*, sinonimo de *entsteht dadurch*. Nuntempe oni probable dirus „ekestas, ĉar“.
- [10] en sekvo de: laŭvorta traduko de *in Folge von*; nuntempe probable „sekve de“ aŭ simple „pro“.
- 37** [11] *mit dem Secrete*, nuntempe *mit dem Sekret*: Z. **ne** tradukas la sciencan terminon per scienca termino, kiel ekzemple "sekreciaĵo" (PIV), sed per la ĉiutaga

tre ĝenerala „eligaĵo“. Komparu kontraste hipertrofio, konjunktivo, sekrecio, ekskoriacio, hiperemio! Kial la ŝanĝo de la stilo tie ĉi?

38 [12] *Meibom'schen*: glandoj nomitaj laŭ la germana kuracisto Heinrich Meibom (1638-1700; prononcu majbom). Tiaj t.n. eponimoj svarmas en medicino (alchejmara malsano), fiziko (kelvinaj aŭ farenhejtaj gradoj) kaj aliaj fakoj. Z. nur duone adaptas ĝin per „Meibomaj“, do ne „Meibom-aj“ aŭ Mejbomaj (kp. Ŝiller', R 16).

[13] *Drüsen*: Z. aldonas diminutivan –et, glandetoj. Kial? Ĉu tiel eble en la rusa?

[14] *führt dann*: Z. plian fojon laŭvorte tradukas per „kondukas al“ anstataŭ ekzemple „kaŭzas“, „rezultigas“.

39 [15] *Excoriationen*, nuntempe *Exkorationen*: Plia adaptiĝo de grek-latina internnaciismo, tie ĉi de la latina *Excoriatio* per "ekskoriacio".

40 [16] *Hyperaemia conjunktivae*: Z. evitas la latinan terminon kaj anstataŭigas ĝin per esperanta „hiperemio de la konjunktivo“, kiu tamen estas nur transskribo al la esperanta alfabeto laŭ la (posta) 15-a regulo. Sed li ne tradukas ĝin al laikula lingvaĵo per io kiel „troplenigo de la konjunktivo per sango“.

41 **Resumo**: Surbaze de tiu – tamen nur tre mallonga - peco oni povas provizore resumi:

1. La traduko de Z. estas tre proksima al la germana originalo, surprize ofte li uzas kalkeojn, paŭsaĵojn, germanismoj el la originalo.

2. Z. tradukas fakan tekston pri oftalmologio skribitan por kuracistoj kaj studentoj de medicino. Li plejparte uzas – konforme al tiu celgrupo - grek-latinajn fakvortojn, kiujn li nur adaptas al la esperanta alfabeto kaj gramatiko laŭ la nuna 15-a regulo. Escepte (ĉe *Sekret*) li foje uzas ĉiutagan vorton ĝeneralsignifan kaj malprecizan (eligaĵo).

7. Testo de Kück pri internacieco en la senco de R 15

42 **Literaturo**: Kück, Andreas. Internacieco de vorto kaj ties uzebleco lau [legu: laŭ] Regulo 15: rekomendata testo. En: Ipernity (2009-10-03)¹³⁹. Kück 2012 (vd. la sekvan ĉapitron pri „Testo de Derks“: Komparo de la rezultoj laŭ la testo de Kück kaj tiu de Derks).

43 [Daŭrigota].

8. Testo de Derks pri internacieco en la senco de R 15

Literaturo: Kück, Andreas (2012). Interretprogramo por kalkuli gradojn de vort-internacieco kaj unua komparo kun testo rekomendata de Andreas Kück ekde 2009. En: Ipernity 2012-05-03. Derks, Johan (2012). Ekspliko pri virtuala akademia valoro kun ekzempliga studaĵo. 2012-04-30. Derks, Johan (2013). Kiom internacia estas mia vorto? En: Lingva Kritiko (retejo) 2013-06-28.¹⁴⁰

44 *Derks* kreis programon, kiu surbaze de la traduk-servo *Google Translate* kalkulas gradojn de internacieco de vorto en iuj difineblaj lingvo-grupoj laŭ pluraj difineblaj pesadoj (www.esp-evoluo.org). Eblas selekti, kiujn lingvojn aŭ lingvo-grupojn oni volas konsideri:

685

¹³⁹ Retadreso: <http://www.ipernity.com/blog/55667/177243> (2014-08).

¹⁴⁰ Retadresoj: Kück 2012 - <http://www.ipernity.com/blog/55667/388634>; Derks 2012 - <http://www.esp-evoluo.org/v.a.valor.html>; Derks 2013: <http://lingvakritiko.com/2013/06/28/kiom-internacia-estas-mia-vorto/>.

1. Klasika, Zamenhofa lingvo-grupo (la kvin referenc-lingvoj de la F-to 1905 plus du pliaj eŭropaj, do sume 7 lingvoj);
2. Pliaj eŭropaj lingvoj kun pli ol tri milionoj da parolantoj (28 lingvoj).
3. Pliaj ekstereŭropaj lingvoj kun pli ol tri milionoj da parolantoj (65 lingvoj).

Krome eblas selekti kiel la interretprogramo pesu la rezultojn:

1. Pesado egala por ĉiu selektita lingvo.
 2. Pesado laŭ la nombro de la gepatraj parolantoj de la selektita lingvo.
 3. Pesado laŭ la „virtuala akademia valoro“ de la selektita lingvo (vd. Derks 2012).
- Detalojn vd. en Derks 2013 kaj la nomita retejo mem. Kück 2012 komparas la rezultojn pri „grado de internacieco“ trovitajn laŭ ambaŭ testoj.

9. Propraj nomoj

Literaturo (selekto): **Degenkamp**, G.J. Eigennamen in Esperanto. Amsterdam s.j. [post 1935] (en la nederlanda). **Rollet de l'Isle**, Maurice. Skribado kaj Prononcado de la Personaj kaj Lokaj Nomoj. Paris 1935.

a) Superrigardo

- 45** Propraj nomoj estas rigardeblaj kiel aparta klaso de fremdaj vortoj laŭ R 15. Liston de ĉiuj propraj nomoj en la Fundamento vd. en la Kvara Libro pri la Universala Vortaro. El ĝi evidentiĝas, ke proprajn nomojn oni skribas per komenca **majusklo** (Esperanto, Sofio, Zamenhof, k.t.p.).
- 46** Esperantigitaj propraj nomoj jam troviĝas en la **Dua Libro** de 1888. La liston same vd. en la Kvara Libro pri la Universala Vortaro.
- 47** La proprajn nomojn troveblajn en la Fundamento oni povas klasifi jene:
- **Personaj nomoj** de viroj kaj virinoj (de OA 7 nomitaj „antaŭnomoj“): Jozefo, Ludoviko, Klaro, Mario, k.t.p.
 - **Familiaj nomoj**: Kalvino, Lutero, Ŝekspiro, Zamenhof.
 - **Geografiaj nomoj (toponimoj)** de landoj, urboj, riveroj, maroj, montoj k.m.a.: Berlino, Nov-Jorko, Danubo, Rejno, Vistulo, Atlantiko, Balta Maro, Alpoj, Himalajo, Blanka Monto.
- 48** Pri la diskuto pri landnomoj je –i („Franc-i-o“) vd. FE 40 ĉe –uj.
- 49** Zamenhof traktis la temon jam tre frue, nome en **1891**, en sufiĉe detala Lingva Respondo. Baze li distingas tri grupojn de personaj aŭ geografiaj nomoj: Nomoj lasitaj en ne-esperanta latina alfabeto (*Fürth*), nomoj adaptitaj de nelatinaj alfabetoj al la esperanta (*Puŝkin*) kaj nomoj plene esperantigitaj laŭ R 15. Li prognozas, ke iam tiu lasta metodo fariĝos la normala en Esperanto kaj rekomendas jam nun laŭeble apliki ĝin por internacie konataj nomoj. Jen sekvas la koncerna teksto de LR 62. La komenca parto koncernas demandojn de la esperantaj alfabeto kaj fonemoj, vd. ĉe R 0. La temon de la parto II. ni traktos aparte en tiu ĉi ĉapitro pri R 15. Niajn rimarkojn ni aldonis en rektaj krampoj, krome enigis linio-saltojn, por ke oni pli facile povu sekvi la strukturon de la Zamenhofa teksto:

LR 62 de 1891: [...] Tiel la lingvo Esperanto, kiel ĉiu alia lingvo, havas klare difinitan nombron da sonoj aŭ literoj kaj nenia nova vorto en tiu ĉi lingvo devas esti kreata el sonoj, kiuj sin ne trovas en la kadro de ĝia alfabeto. Obei tiun ĉi principan regulon en la kreado de vortoj estas afero tiel simpla kaj facila, ke ni ne bezonas tute pri ĝi paroli. Sed iafaje ni estas en tia situacio, ke ni devas uzi fremdajn sonojn, kiuj ne havas por si literon en nia alfabeto (tiu ĉi situacio dependas

kompreneble ne de la speciala konstruo de nia lingvo, sed ĝi havas lokon ankaŭ kun ĉiu alia lingvo); ĝi estas tiam, kiam ni devas uzi ian nacian nomon (personan, geografian k. c.) aŭ kiam ni volas esprimi per literoj la precizan sonadon de fremda vorto. Kion ni tiam devas fari? Por la unua tempo, ĝis tiu ĉi demando estos tute difinita kaj firme decidita per la uzado, ni konsilas agi en ĵa sekvanta maniero:

I. Se ni volas esprimi ian nacian nomon, kiu havas en si fremdajn literojn kaj kiu estas grava por ni nur per sia signifo kaj ne per la maniero de sia sonado, ni uzas ĝin jene:

a) aŭ ni uzas la nomon en tiu sama formo, en kiu ĝi estas uzata en sia propra lingvo, kaj ni lasas al la legantoj elparoli la nomon kiel ili volas (ekzemple “Fürth” [urbo en Bavarujo], “Göthe”);

b) aŭ ni uzas ĝin laŭ la ortografio kaj fonetiko esperanta, t.e. ni esprimas la nomon per la sonoj kaj literoj uzataj en nia lingvo (ekzemple “Vjazma” [urbo en Rusujo], “Puŝkin”);

c) aŭ ni donas al la nomo karakteron pure esperantan, t.e. ekster [legu: krom] la ortografio kaj fonetiko esperanta ni donas al ĝi ankaŭ la gramatikajn formojn de nia lingvo (ekzemple “Numbergo”, “Rejno”).

Ĉiuj 3 diritaj manieroj estas uzataj ankaŭ en ĉiuj ekzistantaj lingvoj.

[1] La unuan manieron ni uzas ordinaro tiam, kiam la fremda nomo en ĝia nacia lingvo estas skribata per alfabeto egala al nia propra (tiel ekzemple ĉiuj popoloj uzantaj alfabeton latinan skribas: “Manchester”, “Byron”, kvankam tiuj ĉi nomoj estas elparolataj tute alie, ol postulas la reguloj de legado de la diritaj nacioj);

[2] la dua maniero estas uzata, kiam la nacio doninta la nomon kaj la nacio uzanta ĝin havas alfabetojn malegalajn kaj la figura litera imitado de la nomo estas jam ne ebla aŭ ne bezona (ekzemple la rusoj skribas [per siaj literoj] “Sekspir” kaj ne “Shakespeare”, la germanoj skribas “Newa”, kvankam la rusoj mem skribas kaj elparolas sian riveron preskaŭ “Njeva”);

[3] la tria maniero estas uzata por tiuj nomoj, kiuj estas gravaj aŭ ofte ripetataj kaj okupis jam difinitan lokon en la vortaro de nia propra lingvo sub formo ellaborita per longa uzado (ekzemple “Varsovie” aŭ “Warschau” anstataŭ “Warszawa”, “Lissabon” aŭ “Lisbonne” anstataŭ “Lisboa”).

Kian [legu: kiun] el la diritaj 3 manieroj oni devas uzi en la lingvo “Esperanto” kaj en kiaj okazoj ilin uzi — ni ne povas ankoraŭ diri decide, ĉar tiu ĉi demando estas tre malfacile solvebla kaj tre multe disputebla, kaj tial ni lasas nun ankoraŭ ĝian solvon al la forto de la tempo kaj uza sankciado, kiel en ĉiuj aliaj ekzistantaj lingvoj, kaj al la volo de la uzantoj mem. Post kelka tempo, kiam la literaturo de nia lingvo riĉiĝos, la dirita demando estos solvita per si mem en la sekvanta maniero: aŭ iom post iom per la uzo ellaboriĝos esperanta vortaro geografia, historia k. c. kiel ni ĝin vidas en ĉiu alia lingvo, aŭ estos proponita kaj akceptita ia bona difinita komuna regulo por la uzado de ĉiuj nomoj. La plej atendebla kaj ankaŭ la plej bona kaj celinda estas la lasta maniero, kaj kredeble poste ĉiuj nomoj estos uzataj fonetike laŭ la sonaro kaj ortografio kaj kun karaktero pure esperanta, t.e. el la 3 manieroj, pri kiuj ni parolis supre kun la tempo sendube enfortikiĝos nur unu sola por ĉiuj nomoj — la maniero tria. Tamen pro diversaj kaŭzoj ni devas por la unua tempo lasi ankoraŭ al ĉiu esperantisto liberan elekton inter ĉiuj 3 diritaj manieroj. Ni permesas al ni nur doni kelkajn konsilojn por la elektado de tiu aŭ alia maniero :

a) laŭ la maniero unua ni konsilas uzadi la nomojn familiajn de ĉiuj personoj (esceptinte tiujn, kiuj mem esperantigas sian nomon) kaj tiujn nomojn geografiajn, kiuj, estante ne gravaj kaj ne ofte renkontataj, ne povas esperi baldaŭ kutimigi la publikon al sia formo pure esperanta, aŭ kies ortografio nacia estas tiel malegala

je la ortografio esperanta, ke akceptinte formon esperantan ili riskas fariĝi tute nerekonablaj por la legantoj;

b) laŭ la maniero dua ni konsilas uzadi ĉiujn nomojn, kiuj en sia lingvo estas skribataj per alfabeto ne latina kaj tial ne riskas, ke en ortografio ili fariĝos nerekonablaj aŭ strangaj (*);

c) laŭ la maniero tria ni konsilas uzadi ĉiujn nomojn geografiajn, kiuj, estante gravaj kaj ofte renkontataj, povas esti rigardataj preskaŭ kiel vortoj en nia vortaro kaj, estante ofte ripetataj, prezentus disonancon en nia lingvo, se ili ne havus karakteron pure esperantan.

Niajn konsilojn ni donas ne kiel reguloj (†) sed nur kiel rimedo (†) por pacigi la logikon kun la tradicio, kun kiu rompi subite per unu fojo estus iom danĝere. Sed por kiu la skribado laŭ 3 diversaj manieroj estas malfacila, aŭ kiu dubas, kiun manieron uzi por tiu aŭ alia nomo, — tiu ĉiam faros la plej bone, se li uzos la manieron trian, ĉar tiu ĉi maniero de uzado estas ĉiam bona kaj regula kaj, kiel mi jam diris, poste kun la tempo ĝi kredeble fariĝos la sola maniero de uzado por ĉiuj nomoj.

II. Sed iafoje ni estas en la situacio, ke ni devas esprimi ne la signifon de ia nomo aŭ fremda vorto, sed ĝian precizan sonadon, kaj tiam ni devas figure prezenti sonojn, kiuj en nia alfabeto ne havas por si literojn. Kion tiam fari? [...]

(*) [Piednoto de Z]: Se ni la rusajn adresojn de niaj amikoj skribas ordinare laŭ ortografio germana, franca k. c. ni faras ĝin pro celoj poŝtaj.

(†) [Nia atentigo; legu:] regulojn ... rimedon ... (vd LR 78).

[LR 62, *La Esperantisto* 1891, p. 2-3]

b) Personaj nomoj

Literaturo (selekto): Vd. supre sub „9. Propraj nomoj“.

- 50** Pri la demando, ĉu kaj se jes kiujn personajn nomojn esperantigi ekzistas longega diskuto kaj ampleksa literaturo. Zamenhof donis respondon pri ĝi jam en 1891 (vd. tuj supre LR 62) kaj denove en 1904:

LR 63 (1904): „Propran nomon oni povas *nun* skribi tiel, kiel ĝi estas skribata en la gepatra lingvo de ĝia posedanto, ĉar en la nuna tempo la fonetika skribado de multaj nomoj kaŭzus tro grandan kriplaĵon de tiuj nomoj kaj diversajn malkompreniĝojn. Sed tio ĉi estas nur rimedo *provizora*; ni devas celadi al tio, ke pli aŭ malpli frue en la lingvo internacia ĉiuj nomoj estu skribataj laŭ la fonetiko internacia de tiu ĉi lingvo, por ke ĉiuj nacioj povu legi ĝuste tiujn nomojn. ... [LR 63. *Esperantistische Mitteilungen*, 1904, Junio (citita en *Lingvo Internacia*, 1904, p. 216)].

c) Pri Egipto kaj Koreo

Literaturo (selekto):

Egipto: **Golden**, Bernard. Ni ne omaĝo al apostato! En: *Monato*, 10-a jaro 1989, n-ro 10 (Okt.), p. 20 (pledas por „Egiptujo / Egiptio“ kaj „egipto“ por la landanoj). - **Golden**, Bernard. La Faraona malbeno el la antikva Egiptujo/Egiptio. En: *La Kancerkliniko* 1990, n-ro 53 (Jan-Mar.), p. 18-19 (samtendence).

Koreo: **Wennergren**, Bertilo. Landanoj, gentoj kaj kategorioj. En: *Lingva Kritiko (retejo)* 2009-06-13. **Cherpillod**, André. Leksikaj Vagadoj. 2012, p. 44-45.

- 51** La diskuto pri tiuj du nomoj temas pri la demando, ĉu *Koreo* kaj *Egipto* signifu la landojn (tiel OI 7 de 1988) aŭ la landanojn (tiel la dua rekomendo pri landnomoj de 2009 sekve al OI 15 de 2003). Ĝi ankaŭ tuŝas la ĝeneralan demandon, ĉu jam

R 15 mem donas respondon al tiu demando (laŭ OI 7 jes, laŭ OI 15 ne). Ni unue dokumentas la tekstojn de la Akademiaj decidoj.

- 52 En la pli nova kaj *nun aktuala* OI 15 de **2003-03** la Akademio „konstatas, [1] ke la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko pritraktas, kiel “fremdaj” (internaciaj) vortoj kompletigu la vortoprovizon de Esperanto [nedisputite]. La Akademio ankaŭ konstatas, ke [2] *per si mem tiu regulo [R 15] ne determinas, kiu ano de internacia vortofamilio fariĝu baza en Esperanto, kaj kiun el la internaciaj signifoj ĝi havu.*“ Tiu dua – bedaŭrinde apenaŭ motivigita – konstato estas la kerno de la decido el la vidpunkto de la ekzegezo de R 15. La decido tekstas:

Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 15

Pri la vortoj KOREO kaj EGIPTO

En 1988 la Akademio de Esperanto faris decidojn pri la vortoj KOREO kaj EGIPTO. Tiuj decidoj estis unue publikigitaj en La Letero de l’Akademio, n-ro 7, Aprilo-Majo-Junio 1989, paĝoj 2 k. skv., kaj poste en la Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, No 11, Aktoj de la Akademio III, 1975–1991, paĝoj 61–63.

La Akademio tiam deklaris i.a. jene:

La formo *Koreujo* estas kontraŭfundamenta. La sola formo, kiu obeas la Fundamenton estas *Koreo* kaj ties anoj estas *Koreanoj*.

La sola formo, kiu obeas la Fundamenton estas la landnomo *Egipto*; ties anoj estas *Egiptanoj*.

La Akademio tiam referencis al la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko kaj al la 2-a Rekomendo pri landnomoj (Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 4, Aktoj de la Akademio III, paĝo 49), kiu tekstas jene:

En okazo de konflikto inter du aŭ pluraj formoj por unu sama landnomo aŭ ankaŭ inter la uzo de kategorio aŭ la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15-a Regulo de la Fundamento.

Reveninte al tiuj demandoj la Akademio nun konstatas, ke la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko pritraktas, kiel “fremdaj” (internaciaj) vortoj kompletigu la vortoprovizon de Esperanto. La Akademio ankaŭ konstatas, ke per si mem tiu regulo ne determinas, kiu ano de internacia vortofamilio fariĝu baza en Esperanto, kaj kiun el la internaciaj signifoj ĝi havu. Tial uzado de la vortoj KOREO kaj EGIPTO kun genta aŭ landana signifo ne malobeas la 15-an regulon, same kiel tia uzado de ekzemple la vortoj ĈINO, JAPANO kaj PORTUGALO tiun regulon ne malobeas, malgraŭ la fakto ke por ĉiu el ili la internacie plej ofta signifo estas landa.

Sekve la Akademio de Esperanto nun deklaras, ke neniu el la landnomoj Koreo, Koreujo, Koreio; Egipto, Egiptujo, Egiptio malobeas al la reguloj de la Fundamento de Esperanto. Per tio la Akademio nuligas siajn antaŭajn decidojn el 1988 pri la vortoj KOREO kaj EGIPTO.

La Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro
Bertilo WENNERGREN

La Prezidanto de la Akademio
Prof. Geraldo MATTOS

La ĉi-antaŭa nova decido pri KOREO kaj EGIPTO konsistigas ŝanĝon de pli fruaj decidoj de la Akademio. En tiaj okazoj la Statuto de la Akademio postulas aprobon de almenaŭ du trionoj de ĉiuj membroj. La nova decido estis aprobata en Marto

2003 per 30 jesaj voĉoj (kun 2 neoj kaj 1 sindeteno). La nombro de la Akademianoj estis tiam 44. [OI 15 – 2003-03]

- 53 Kritiko:** Kiel menciite, la kerna aserto de OI 15 (2003) estas: „La Akademio ankaŭ konstatas, ke per si mem tiu regulo [= R 15] ne determinas, kiu ano de internacia vortofamilio fariĝu baza en Esperanto, kaj kiun el la internaciaj signifoj ĝi havu.“ Por tiu aserto la AdE donas neniun argumenton aŭ eĉ nur konkretigon. Argumento por tiu pozicio ankaŭ ne estas evidenta, eĉ male. Ĝi estas **neaŭtoritata** ĉar ne bazita sur la Fundamento kaj **enhav malĝusta**.
- 54** Elirpunkto la Fundamento ekzegezo estas la regulo „[vortoj], kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo“. La nocio „vorto“ ampleksas du ecojn: la eksteran fasadon (terminon) kaj la signifon (semantikon). UV kaj la lecion-finaj vortlistoj de FE fiksas ĉiam la kombinaĵon de ambaŭ. Tiel ekz. la UV-artikolo **aprob'** - approuver | approve | billigen, gut heissen {legu: heißen} | одобрять | aprobować fiksas la fasadan vortformon *aprob-* (kaj ne **apruv-*, **adabr-* aŭ io alia). Sed ĝi ankaŭ fiksas minimume unu signifon, nome la komunan semantikon, dedukteblan el la kvin referenc-lingvoj laŭ A 4.5. Tiel same estas pri „vortoj fremdaj“ en la senco de R 15. La „plimulto de la lingvoj“ ja ne prenis izolite nur la eksteran formon de iu vorto, sed difinitan kombinon de vortformo (fasado) kaj vortsignifo.
- 55** En la kazo de *Kore-* la „plimulto de la lingvoj“, pli precize eĉ **ĉiuj** ĝis nun esploritaj (!), adaptis la vorton *nur* kun la signifo de lando (Corea, Corée, Coreia, Korea, Koreja, Koreya, Kurya, Корея k.t.p.). Iu formo-enhavo-kombinaĵo, t.e. iu „vorto“, *kore-landano* simple ne ekzistas. Ĝi pro tio ankaŭ ne estas „vorto fremda“ en la senco de R 15. Vorto fremda, kiu aŭtomate estas „ĝusta“ Esperanto estas nur la formo-enhavo-kombinaĵo „*Kore-* = lando“. Cetere estas tute nedecide, ĉu R 15 „per si mem“ ion determinas. Kiel ĉiuj aliaj reguloj kaj modeloj enestantaj en la F-to, ankaŭ R 15 estas interpretinda en la kadro de la F-to *kiel tuto* (principo de samrangeco de ĉiuj partoj de la F-to, vd. supre ĉe „Antaŭparolo“).
- 56** La AdE lezas sian devon motivi sian decidon (vd. la ĉapitron „Antaŭparolo“), tiel ke la esperantistoj ne povas kontroli, ĉu temas pri arbitra decido aŭ ne. Motivojn donis la tiam „Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro“ Bertilo Wennergren, kiu preparis la decidon, en sia privata retejo „Lingva Kritiko“ je 2009-06-13. Per ciferoj en rektaj krampoj ni referencas al niaj komentoj malsupre:¹⁴¹

[1] La ĉefa motivo de la Akademia konsilo pri landnomoj kaj landano-nomoj estas deziro eviti, ke oni interpretu la kategorielekton de landnomo kiel pritakson de la „genta pureco“, „rasa unueco“ aŭ simile, de la koncernaj popoloj. Efektive oni iafoje renkontas tiajn misideojn. Ekzemple multaj koreaj Esperantistoj pensis, ke tio, ke iuj nomas ilin *koreanoj* (anoj de la lando *Koreo*) estas bazita sur iaspeca penso, ke tiu popolo ne konsistigas „veran genton“. **[2]** La koreaj Esperantistoj preferegis, ke oni nomu ilin *koreoj* en *Koreujo*, ĉar la korea popolo estas laŭ ili tre unueca jam de la plej praa tempo. Iliaj argumentoj estas maltrafaj, sed ilia prefero (*koreoj* en *Koreujo*), estas tute en ordo. Tute bone eblas nomi ilin tiel, kaj **[3]** efektive plej multaj tion faras, kaj tial la Akademio nun rekomendas la landnomon *Koreujo/Koreio*. Sed tio esence estas arbitra elekto. **[4]** Se plej multaj dirus *koreanoj* en la lando *Koreo*, tiam la Akademio rekomendus tion. En ajna okazo rolus nenia ajn pritakso de la genta unueco de la korea popolo.

- 57 Komentoj:** **[1]** Eksterfundamenta konsidero. **[2]** Decida estas la F-to, ne la (hazarda) de iuj (kiuj?) „koreaj Esperantistoj“. **[3]** Nepruvita aserto, kiel la kriterio „plej multaj“ estas difinita? Necesa estus elmonro, ke ekzistas iu post-Funda-

685

¹⁴¹ lingvakritiko.com/2009/06/13/landanoj-gentoj-kaj-kategorioj.

menta silenta interkonsento, ke (nur) la formo *Kore/uj/o* por la lando estas ĝusta. Tio apenaŭ eblas, ĉar en 1988 ĝi ankoraŭ decidis favore al la formo-enhavo-kombino „*Kore-* = lando“. [4] Eksterfundamenta kriterio.

- 58 **Resume** oni devas konstati, ke la AdE misinterpretas la nocion „vorto“ en R 15, fakte reduktante ĝin nur al la vortformo (vortfasado), anstataŭ ekkoni, ke ĝi signifas „formo-enhavo-kombinaĵo“. Ĝi venas al tiu malĝusta kompreno per lezo de la principo de samrangeco de ĉiuj partoj de la F-to kaj neobeo de la deviga regulo pri interpretado en A 4.5. Ĝia decido estas bazita sur ekster-Fundamentaj kriterioj kaj argumentoj. Ĝi **ne havas bazon en la F-to** kaj pro tio **ne** estas „aŭtoritata“. La rezulto trovita sur la senbaza „konstato“ ankaŭ enhave estas **malĝusta**. Laŭ R 15 nur la formo *Kore-* kun la signifo „lando“ estas „ĝusta“ esperanta vorto.
- 59 La malnovaj *ne plu validaj* decidoj pri KOREO kaj EGIPTO de **1988** troviĝas en OI 7 ("Aktoj de la Akademio, III, 1975-1991 - Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, n-ro 11)". En la parto pri Koreo ankaŭ estas traktita la argumento de „ĉino“, „japano“ kaj „portugalo“. La decidoj tekstas (ciferoj en rektaj krampoj referencas al komentoj sub la teksto):

Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 7

KOREO

I. Faktoj

Ni konstatas, ke

a) en gravaj dokumentoj (*Mondmapo*, *Poŝatlaso*, *PIV* [1]) estas uzataj la landnomo *Koreo* kaj ĝia derivaĵo *Koreano*.

b) en la protokolo de la 3-a kunsido de la "Lingva Komitato de KEA" (Korea Esperanto-Asocio), kiu okazis la 9-an de Aprilo 1984, estis alprenitaj decidoj. Ni citas:

1. "La esperanta landnomo de nia lando 'Dehanminguk' estas *Koreujo*".
2. "La esperanta gentnomo de nia gento estas *koreo*".

II. Rimarkoj

a) La "decidoj" de KEA nek estis prezentitaj al la Akademio, nek sankciitaj de ĝi. Ili ne povas esti precedentoj por similaj decidoj nek esti oponitaj al decidoj de la Akademio.

b) La kontrasto inter punktoj a kaj b de § I montras, ke ni troviĝas en tipa kazo antaŭvidita de la 2-a Rekomendo pri landnomoj; estas konflikto inter la kategorioj por unu sama nomo. Sekve por decidi ĉu *Koreo* nomas landon aŭ homon ni devas obei la 15-an regulon de la Fundamento.

III. Internacieco

Ni konstatas, ke

a) ekzistas monda internacieco por la landnomo **Kore-*: ĝi koncernas ne nur la Latinidajn, Germanidajn kaj Slavajn lingvojn kune kun la ceteraj Eŭropaj, sed ankaŭ la Sanskritidajn kaj la Iranajn, ankaŭ la Afrikajn kaj Aziajn, kiel ekz-e la Indonezia. Ĉiuj devenas de la nomo de Korea dinastio *Gaoli*, pri kiu raportis Marco Polo.

b) la sama nomo *Gaoli* estas plu uzata en kelkaj lingvoj Aziaj: nome, en la Ĉina *Gaoli* kaj en la Taja *Kaoli*.

c) la Koreanoj apartenas al unu sola etno, kiu nomiĝas sialingve: *Han*. Sur la bazo de tiu nomo la Sud-Koreanoj nomas sian landon ordinare: *Hanguk*, t.e.

"Hanlando", vorto kiu povus utili kiel sinonimo. Japanoj imitas tiun nomon per: *Kankoku*.

IV. Konkludoj

a) La formo Koreujo estas kontraŭfundamenta. La sola formo, kiu obeas la Fundamenton estas *Koreo* kaj ties anoj estas *Koreanoj*.

b) Ne povas esti oponita al tiu konkludo la fakto, ke unuece ĉiuj diras *Japan-ujo / -io* kaj *Ĉin-ujo / -io*. Al ili estas aplikebla la Rekomendo 1-a; cetere tie la internacieco ne estas unueca, nek monda. Ankaŭ ne eblas oponi la fakton, ke oni diras *Franc-ujo / -io* por la Franca *France*: temas pri vortoj de la Fundamento kaj estas egaleco inter la internaciecoj de **Frans-* kaj de **Franci-* por la landnomo.

c) Nur tiel ni povas retrovi la unuecon de nia lingvo.

EGIPTO

I. Faktoj

Ni konstatas ke

a) en la grava traduko de "*La Faraono*" de Prus (Kabe 1907-1908, reeldono en 1957) nia plej eminenta tradukisto konscie kaj konstante tradukis la Polan *Egipt* per *Egipto*. Ne eblas nei, ke tiu traduko apartenas al nia literatura tradicio kaj kune kun ĝi la landnomo *Egipto*.

b) en la ĉiutaga tradicio oni uzas la formojn *Egiptujo* aŭ *Egiptio*.^[2]

c) iuj volus distingi inter la malnova antikva Egiptujo kaj la hodiaŭa *Egiptio*, eble loĝata de *Egiptianoj*.

II. Rimarkoj

a) La distingo inter *Egiptujo* kaj *Egiptio* malfaciligus la lingvon kaj eĉ la komprenon. Cetere la antikvaj Egiptanoj nomis sian landon *Kemet*, kiu povas liveri la nomon *Kemeto* ("Nigra Tero"); ili havis ankaŭ diversajn bildajn nomojn, kiel, ekzemple, *Novhi-Kah* ("Sikomor-Tero") k.a., ĉiuj nomantaj la landon.

b) La kontrasto inter punktoj a) kaj b) de § I montras, ke ni troviĝas en tipa kazo antaŭvidita de la 2-a Rekomendo pri landnomoj; estas konflikto inter la kategorioj por unu sama nomo. Sekve por decidi ĉu Egipto nomu landon aŭ homon, ni devas obei la 15-an regulon de la Fundamento.

III. Internacieco

a) Ni konstatas, ke ekzistas monda internacieco por la landnomo **Egipt-*: ĝi koncernas ne nur ĉiujn Eŭropajn lingvojn, sed ankaŭ ĉiafamiliajn lingvojn tra la mondo. La etimo estas, tra la Latina *Ægyptus* kaj la antikva Greka, la Egipta urbonomo *Haj-Ĥu-Phtah*, almenaŭ laŭ la plej probabla hipotezo de la specialistoj.

b) La malmultaj lingvoj (Hinda, Bengala, Persa; Turka; Araba, Hebrea; Indonezia, Svahila...), kiuj uzas alian nomon, uzas unuanime la landnomon **misir* aŭ variantojn de tiu.

c) en ĉiuj lingvoj la nomo de la ano estas derivita (**Egipt-an-*; **misir-an-*).

IV. Konkludoj

a) La sola formo, kiu obeas la Fundamenton estas la landnomo *Egipto*; ties anoj estas *Egiptanoj*.

b) Obei la Fundamenton estas ankaŭ omaĝi al nia granda verkisto kaj tradukisto Kabe, de sia plena nomo Kazimierz Bein. Lia traduko estas ankoraŭ aktuala.

c) Nur tiel ni povas retrovi la unuecon de nia lingvo ankaŭ en la tempo.

Por la Akademio, ties Prezidanto,
D-ro André ALBAULT

Komentoj de BK:

[1] „*Mondmapo, Poŝatlaso, PIV*“: Poŝatlaso de la Mondo. Prago 1971. PIV 1970.

[2] Tiu estas – kion Albault prisilentas - la formo trovebla ĉe Z (EG 1) kaj en la Biblio, PIV 1970 kaj multloke, vd. la tuj sekvantan superrigardon en la teksto.

- 60 La **Rekomendoj pri landnomoj**, al kiu OI 7 referencas, troveblas en OI 4 de Nov. 1985, kiu ne estis oficiale nuligita, do formale daŭre valida. Rekomendo 2 tamen nun konfliktas kun OI 15 de 2003:

El "Aktoj de la Akademio, III, 1975 - 1991 (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, n-ro 11)"

Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 4

Rekomendoj pri Landnomoj *

1. Pro respekto al la tradicio, kaj en pacema spirito, ni deklaras, ke landnomo estas taŭga, se ĉiuj aŭ la granda plimulto senkonteste uzas la saman formon.

2. En okazo de konflikto inter du aŭ pluraj formoj por unu sama landnomo aŭ ankaŭ inter la uzo de kategorio aŭ la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15-a Regulo de la Fundamento.

3. La Akademio rekomendas konsideri, ke la signifo-rilatoj inter la landnomoj kaj la koncernaj landano-nomoj ĉiam estas principe la samaj, kiu ajn estas la kategorio de la landnomoj. Ekz-e, *Angl-ujo / -io -- Angl-oj* kaj en la alia kategorio *Nederland-o -- Nederland-anoj*.

4. Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia "sufikso" aŭ sufikse uzata fremda vorto (*-io, -(i)stano, ...*), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.

Por la Akademio, ties Prezidanto
D-ro André ALBAULT

*) C[irkulero] 149, Ald[onaĵo] F. Oficialaj Informoj de la AdE, n-ro 4, Novembro 1985.

- 61 Al tiuj Rekomendoj estas aldonitaj jenaj (neoficialaj, sed interpret-helpaj) **Rimarkoj de la Prezidanto**.

Rimarkoj de la Prezidanto:

1. Per tiuj rekomendoj la Akademio esperas marki la finon de la diseriga tendenco en la landnomoj. Devus instaliĝi tendenco al unuecigo farita sur sana bazo tradicia kaj Fundamenta.

2. Ni memorigas, ke la Akademio jam publikigis liston de 32 landnomoj kaj de 15 landano-nomoj en la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (Aktoj de la Akademio, II, p. 13-14). Tiuj nomoj aldoniĝas al la kelkaj nomoj troveblaj en la Fundamento. Ĉiu disciplinema Esperantisto severe atentos tiujn listojn.

3. La Akademio ne intencas oficialigi pliajn nomojn. Sed ĉar oni diversflanke petis tian paŝon, ĝi decidiĝis anstataŭe starigi liston de "normaj" landaj kaj landanaj nomoj, kiu povos subiĝi al revizio, kiam necesos.

A.A. [André Albault]

- 62 La pledo de Albault por la landnomo *Egipt-* surprizas. Krom ĉe Kabe tre unuece troveblas la Z-a uzo de *egipt-* por la landano (tiel jam en la antaŭfundamentaj vortaroj de Beaufront kaj Jürgensen EG 1, ambaŭ kun rekta kunlaboro de Z). Jen eta superrigardo pri la uzo de **Egipt-** kiel lando aŭ landano:

lando	landano
RE 1889, MV 1889: neniuj nomoj de landoj aŭ landanoj	
	<p>1904 – Beaufront: egipt, égyptien (adj.). Egipto, (un) Egyptien. Egiptujo, Egypte.</p> <p>1904 - EG 1: egipt-a, ägyptisch; -o, Aegypter; Egiptujo, Aegypten.</p>
1908 - Kabe: Traduko de La Faraono	
1908 – Rhodes, p. 518: Egypt. Egipt'o -ujo	
	<p>1910 – Christaller, 1a eld.: Ägypten, Egiptujo; Ägypter, egipto, egiptujano.</p>
<p>1910 - Kabe difinvortaro (mankas kiel memstara artikolo, sed plurfoje kaŝite en la difinoj kaj ekzemploj de aliaj artikoloj): Egipto. <i>La historiaj monumentoj atestas, ke la antikva Egipto posedis altan civilizacion.</i> – atesti. <i>La magio estis tre ŝatata en la antikva Egipto.</i> – magio. egipta. ... <i>egiptaj piramidoj.</i> – destini. Antikva egipta reĝo. – faraono. <i>egipta mumio.</i> – mumio. Egipta monumento ... - obelisko. <i>la egipta simboliko.</i> – simboliko. Egiptanoj. ... antikvaj Egiptanoj. - hieroglifo 1. <i>La antikvaj Egiptanoj kredis je la metempsikozo.</i> – metempsikozo. ... antikvaj Egiptanoj. – papiruso. ... antikvaj Egiptanoj, – sfinkso.</p>	
	<p>1923 – Christaller, 2a eld.: Ägypt-en n Egiptujo^Z [Egipto^B]; ~er , egipto^Z ... (rektaj krampoj [...] ĉe Christaller signifas „evitinda“).</p> <p>1923 – Wüster, EV: egipto, Egiptujo</p>
PV 1930 / 1934 mankas	
	<p>1970 – PIV: Egipt/o. Ano de la ĉefgento loĝanta en ~ujo ...</p> <p>2002, 2005, 2012 – [e-]PIV: egipt/o Ano de la ĉefa gento de (E)~io ...</p>

- 63 Malpli klara estas la bildo pri **Kore-**, kiu nur pli malfrue venis en la lingvon (la lando de 1905 estis japana protektorato, de 1910 ĝis 1945 japana kolonio). Ĝis PIV 1970 *Kore-* signifis ĉefe la landon, de PIV 2002 la landanon. Fakte temas pri lingvoŝanĝiĝo, kiu meritis pli bonan motivigon.

lando	landano
RE 1889 , MV 1889 : neniuj nomoj de landoj aŭ landanoj	
Beaufront 1904 , EG 1 1904 , Rhodes 1908 , Kabe 1910 , Christaller, 1a eld. 1910 , 2a eld. 1923 : mankas	
1923 – Wüster, EV: Koreo, koreano (Koreujo = evitinda)	
PV 1930 / 1934 mankas	
1949 – Fulcher, Long, p 330: Korea , Kore-o. Korian <i>noun</i> kore-ano.	
1961 - Léger, Albault, p. XX: Corée – Kore-o, Koreano.	
1970 – PIV: Koreo . koreano . Ano de la ĉefgento loĝanta en ~o.	
1991 – Hajpin Li: kore-o , K~i(uj)o.	
2002, 2005, 2010 – [e-] PIV: kore/o . Ano de la gento de Koreio.	

- 64 Vidu ankaŭ la Liston de Rekomendataj Landnomoj el 2009 en la aldono al BK II. En ĝi la Akademio rekomendas uzi la nomojn Koreujo / Koreio (Nord-Koreujo / Nord-Koreio, Sud-Koreujo / Sud-Koreio) kaj Egiptujo / Egiptio.

10. Etimologie identigeblaj afiksoj

- 65 Temas ĉefe pri **malnov-grekaj** kaj **latinaj** prefiksoj kaj sufiksoj, uzataj en multegaj sciencaj kaj fakaj vortoj. Z nomis ilin **pseŭdoafiksoj**.
- 66 Jen listo de grek-devenaj prefiksoj

greka prefikso	greka	P signifo	ekzemploj	lat.
a-, an- (antaŭ vokaloj)	ἀ(v)-	neado: mal-, sen (Alpha privativum) plifortigo (Alpha intensivum)	aneroba, analfabetismo, anarkio, anomalio, asinkrona; ataksio, ateismo	in-
al-, alo-	αλλ(o)- (?)	malsama, diversa, fremda, devia, aliula	alergio, alopatio, alotropio	
amfi-	ἀμφί	ĉirkaŭ (loke), ambaŭ, duobla	amfibio, amfibrako, amfiteatro	inter-
ana-, an-	ἀνά	<i>loke</i> : supren, trans ... al × <i>tempe</i> : tra <i>fig.</i> : po (distribua)	anaboliko, anagramo, analogio, analizo, anamnezo, ananimo, anapesto, anafero, anatomio; anodo	
angio-, angi-	ἀγγεῖ	angio (arterio, vejno k.t.p.)	angiografio, angiologio, angiomo, angioplastio	
anti-, ant-	ἀντί	<i>loke</i> : kontraŭ, vid-al- vide × <i>tempe</i> : kontraŭ <i>fig.</i> : por, anstataŭe de,	antibiotiko, antidoto, antigeno, antimaterio, antinomio, antipatio, antipodo,	contra-, erga-, (adversus)

greka prefikso	greka	P	signifo	ekzemploj	lat.
			kontraŭe	antisemitismo, antitezo; antonimo	
apo-, ap-	ἀπό	x	<i>loke:</i> de (... her, ... weg) <i>tempe:</i> de, de post <i>fig.:</i> ab	apokalipso, apostolo, apostrofo, apoteko	ab- (a-, abs-)
arĥ-, ark- arĥeo-, arkeo-	ἀρχαῖο-		origine, pra-, malnova, ĉef-	arĥipelo, arĥivo, arĥeologio, arĥitekto	
auto-	αὐτό		mem	aŭtogramo, aŭtomobilo, aŭtodidakto	
dia-	διά	x	<i>loke:</i> tra <i>tempe:</i> dum, tra <i>fig.:</i> per, pro	diagnozo, diagonalo, diagramo, dialekto, dialogo, dializo, diamagnetismo, diametrala, diafragmo, diapositivo, dieto, diatoniko	trans-, per-
dys-	δύς		mis-, malbona	distrofio, disfunkcio, distimio, distopio	
ek-, ex- (vor Vokalen)	ἐκ, ἐξ	x	<i>loke:</i> el <i>tempe:</i> de <i>fig.:</i> pro, sekve de	eklektikismo; ekstazo, ekzemo	ex-
en- (em-)	ἐν	x	<i>loke:</i> en, ĉe, sur, apud, ene, interne <i>tempe:</i> dum, ene de <i>fig.:</i> en, ĉe, kun	endemio, energio, engramo, enzimo; emfazo, ~a, empirio	in-, intra-
epi-, ep-	ἐπί	x	<i>loke:</i> sur, ĉe, ĝis, al, kontraŭe al, super, <i>tempe:</i> je la tempo de, tuj post, ĝis, super <i>fig.:</i> pro, cele al, pri	epidemio, epidermo, epigono, epilepsio, epilogo, epifanio, epicentro	ad-
eu-, ev-	εὖ		bona, agrabla	eŭgeniko, eŭtanazio, eŭtrofiĝo, eŭfemismo; evangelio	
exo-	ἐξω	x	<i>loke:</i> ekstere <i>tempe:</i> ekster <i>fig.:</i> escepte de	ekzotiko, ekzosfero	extra- (lat.)
Gyro-, Giro-			turniĝanta, turbo	giroskopo, giromagneta, ĝirokonto, guroso (viandaĵo rostita ĉe turniĝanta bastono)	
halo-	ἅλς		salo	halogeno, halofilo	
hemi-	ἥμι		duona (sub kvalita aspekto)	hemisfero, hemi-motoro	semi-
hetero-	ἕτερο		malsama	heterodoksio,	

greka prefikso	greka	P signifo	ekzemploj	lat.
hiper-	ὑπέρ	<i>loke</i> : super × <i>tempe</i> : super <i>fig.</i> : por, pri	heterogena hiperaktiveco, hiperbolo, hipertonio, hipertrofió,	super-
hipo-	ὑπό	<i>loke</i> : sub, sube de × <i>tempe</i> : ĉirkaŭ, dum <i>fig.</i> : pro, kaŭze de	hipoŝondio, hipofizo, hipotenuzo, hipotalamo, hipoteko, hipotermio, hipotezo, hipotonio, hipotrofió	sub-
holo-	ὅλο	plene, tute (en kvalita aspekto)	holokaŭsto, holografio, holometabolio, holismo, holomorfa	
homo-	ὅμο	same (en kvalita aspekto)	homologio, homogena, homonimo	equi-
homeo-	ὁμοῖο	samspeca	homeopatio, homeomorfismo	
iso-	ἴσο	same (en kvanta aspekto)	izobaro, izodinama, izokroma	aequi-
kata-, kat-	κατά	<i>loke</i> : de ... malsupren, super ... al, laŭlonge, × renkonte al <i>tempe</i> : dum <i>fig.</i> : kontraŭ, laŭ, pro	katabolismo, katakombó, katalogo, katalizi, katapulto, katarakto, kataro, katastrofo, katastro; kateŝismo, katodo	
kryo-	κρύος	malvarma	kriolito, kriotekniko, krioterapio, kriofiziko	
krypto-	κρύπτο	kaŝita, sekreta	kripto, kriptogramo, kriptono, kriptologio	
lipos-	λίπος	graso	lipido, lipofila, liposukcio	
makro-	μακρός	× granda, larĝa	makroekonomio, makrofoto	
mega-	μέγα	granda	megafono, megalito	
meso-	μέσος	meza, meze de	mezozono, mezosfero	
meta-, met-	μετά	× 1. a) (<i>loke</i>) ene de, inter; b) kun, kune kun, sub, en, ĉe; 2. ek al (io), direkte al (io); 3. (<i>tempe</i> aŭ laŭvice) al, post, sekvanta	(1) metadatomoj, metalingvo, metaserĉo, metaebeno, metastazo; (2) metaetiko, metafilozofio, metateorio, metabolismo, metamorfozo, metaforo; (3) metafiziko, metatezo, metapolo (malantaŭa urbo)	inter-, post-
mikro-	μικρό-	malgranda	mikroskopo	

greka prefikso	greka	P signifo	ekzemploj	lat.
orto-	ὀρθο	ĝusta	ortografio, ortogonala, ortodoksa	
paleo-, pale-, pal-		malnova, antikva, pra-	paleozeno, paleoantropologio, paleolitiko	
pan-	παν (?)	tuta, ĉio	pandemio, panseksa, panslavismo	omni-
para-	παρά	<i>loke</i> : de (io), ĉe, apud, al × <i>tempe</i> : dum, dume <i>metafore</i> : kontraŭ, kompare kun, apud	parabolo, parodontozo, paradigmo, paralelo, paralizo, parametro, paranormala, parafrazo, parasito	contra-, (secundum)
peri-	περί	<i>loke</i> : ĉirkaŭ de × <i>tempe</i> : je, preskaŭ <i>metafore</i> : ĉirkaŭ, pro, pri, en rilato al	perimetro, periodo, peripetio, perifrazo, periskopo, periferio, peristalto, peristomo	circum-
poli-	πολύ-	viele	poligamio, polifonio	multi-
pro-	πρό	<i>loke</i> : antaŭ × <i>tempe</i> : antaŭ <i>fig.</i> : por, pli volonte ol	prognozo, programo, prostato, prologo, probiotika	prae-, pro-
pros-	πρός	<i>loke</i> : ĉe, de (io), al (io) × <i>tempe</i> : antaŭ <i>fig.</i> : krom, aldone, koncern(ant)e	prozodio	
pseŭdo-	ψεύδο	malĝusta, ŝajn-, trompa	pseŭdonimo, pseŭdodemokrata, pseŭdoesperanto, pseŭdoanglismo, pseŭdosciencia, pseŭdomoralo	
sin- (si-, sil-, sim-)	σύν, (σύ-, σύλλ-, σύμ-)	<i>loke</i> : kune (kun) × <i>tempe</i> : – <i>fig.</i> : kun	sinodo, sinapso, sindikato, sindromo, sinergio, sinkretismo, sintezo, sinkrona; sistemo; silogismo; simbolo, simetrio, simpatio, simfonio, simpozio, simptomo	con- (co-, col-, com-, cor-), (cum)
tele-	τηλε	malproksime, je distanco	telemetrio, telefono, telepatio, telekinezo	
zyklo-	κύκλω	cirklo	ciklopo, ciklono	

67 [Daŭrigota].

11. Analoga apliko de R 15 (internaciaj simboloj)

68 Por apliki normon **analogie** (laŭsence) du kondiĉoj devas esti plenumitaj. Unue eksplicita normo pri la demando ne ekzistas (normo-manko). Due la analogie

aplikebla normo laŭ sia strukturo kaj regula enhavo donas rezulton, kiu senc-have estas transigebla por solvi la demandon, pri kiu ne ekzistas normo.

- 69 Ambaŭ kondiĉoj estas plenumitaj por la demando, ĉu internacie kutimaj **simboloj** (el matematiko, muziko, internaciaj normoj k.t.p.; ekzemplojn vd. malsupre) estas uzeblaj en „ĝusta“ Esperanto. Eksplicita normo ne ekzistas en la Fundamento. R 15 parolas pri „vortoj“, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto. Simboloj ne estas „vortoj“ en la senco de R 15 (vd. supre). Ilin tamen, same kiel vortojn, la „plimulto de lingvoj prenis el unu fonto“. Estas senc-have apliki la ideon de R 15. Tio nenio ŝanĝas, la analogio nur estas klarigo de longega kaj neniam disputita uzo en Esperanto. Ĝin en 2007 neeksplicite, sed per ekzemploj konfirmis OA 9 (detalojn vd. tie). Temas ekzemple kaj inter aliaj pri jenaj simboloj.

a) Literoj de fremdaj alfabetoj

- 70 Ekzemploj estas literoj de la **latina** alfabeto, kiuj ne apartenas al la esperanta alfabeto laŭ FG 0: Q, q, X, x, Y, y (pri tiuj tri komparu OA 9 ĉe kuo, ikso kaj ipsilono). Per analogia apliko de R 15 ili ne fariĝas esperantaj *literoj*, sed *simboloj* uzeblaj en Esperanto, ekz. en matematiko, fiziko k.t.p. (vd. jam R 0 – Alfabeto): x-radioj (OA 9: „iks-radioj“ ĉe radiografi), pafiletto en la formo de Y (OA 9 ĉe katapulto), Y-fero (ipsilonforma fero) k.t.p.
- 71 Zamenhof uzis **X** kaj **Y** kiel simboloj por „nekonata aŭ anonimigita nomo“ en **1891**¹⁴²: „la formoj de tiu aŭ alia lingvo al sinjoro X. aŭ Y. estas konataj“ kaj simile en LR 9 de **1907**¹⁴³: „Mia korespondanto skribas (...), ke la esprimo “Parolo de X en la kunveno Y” estas tute mallogika kaj malpreciza“. FE 36.3 havas: „Gesinjoroj N. hodiaŭ vespere venos al ni.“ Ne estas klare, ĉu „N.“ (eble inspirita de la latina N.N. – *nomen nescio* aŭ *nomen nominandum* - nekonata nomo) tie ĉi havas la saman funkcion kiel X kaj Y en „sinjoro X, sinjorino Y“, ĉar en la sama FE 36 ni trovas ankaŭ „La doktoredzino A. vizitis hodiaŭ la gedoktorojn P. [FE 36.10]“.
- 72 Same staras la afero pri literoj de la **greka** alfabeto, ekz. Δ, δ (pri kiu vd. OA 9 ĉe delto), internacie uzitaj ekz. en fiziko kaj aliaj sciencoj. Pliaj ekzemploj el PIV 2005: α-radioj, β-radioj, γ-radioj (alfaradioj, betaradioj, gamaradioj ĉe radio).

b) Latinaj ciferoj

- 73 La oficialaj ciferoj de Esperanto estas la arabaj (0, 1, 2, 3 k.t.p.), vd. R 4. La latinaj ciferoj (I, II, III, IV, X, L, C, M k.t.p.) estas allasitaj simboloj laŭ R 15 analogie. Laŭ la principo „ju pli proksima al la Fundamenta solvo, des pli bona“ estas tamen rekomendinde preferi uzi la arabajn ciferojn, ekz. skribi „Ludoviko 14a“ (franca reĝo) ol „Ludoviko XIV“.

c) ISO-kodaĵo (ekz. pri ŝtatoj aŭ lingvoj)

- 74 Ekzemploj el OA 9 pri ŝtatoj: GB ĉe brit/o CN ĉe ĉin/o IL ĉe Israel/o JP ĉe japan/o US ĉe Uson/o k.t.p. Ekzemploj pri lingvoj: eo – Esperanto, de – Deutsch (germana), en – English (angla) k.t.p.

d) Fizikaj simboloj

- 75 Ekzemploj el OA 8: „rivolu/o. Rotacio de 360^o - ° signifas gradoj. „tonelo. ... la internacia ~o valoras 2,83 m³“ – m³ = kubikmetro.

685

¹⁴² En: La Esperantisto 1891, p. 50. Vd. la kompletan tekston ĉe la komentoj pri § 10 FG.

¹⁴³ La kompletan de LR 9 vd. en la vortara parto ĉe „-aj“.

e) Kemiaj simboloj kaj formuloj

- 76 Ekzemploj el OA 9: Ca ĉe kalcio, Si ĉe silicio. $C_6H_3(OH)_2-CH(OH)-CH_2-NH-CH_3$ ĉe adrenalino, $CH_3-CO-O-C_6H_4-COOH$ ĉe aspirino. Ekzemplo el OA 8: $C_6H_{12}O_6$ ĉe glukozo.

f) Muzikaj simboloj

- 77 Ekzemploj el OA 9: ♭ ĉe bemolo, ♯ ĉe dieso.

g) Scienc-latina nomenklature de botaniko kaj zoologio

- 78 Ekzemploj el OA 9: Amoeba, Entamoeba ĉe amebo, Bison bison, Bison bonasus ĉe bizono, Persea americana ĉe avokado, Rangifer tarandus ĉe boaco k.m.a.

h) Simboloj de mon-unuoj

- 79 Ekzemploj: € por eŭro, \$ por dolaro, £ (aŭ £) por pundo k.t.p.

12. Studoj pri esperantigo de vortoj fremdaj laŭ devenlingvoj

- 80 Vd. en la Kvar Libro ĉe UV.

13. Aneksa: Indiko de fremdlingvaj sonoj per esperantaj literoj

- 81 La demando **ne** koncernas R 15. Tamen jam Z traktis ĝin en la kunteksto de adaptado de nomoj fremdaj laŭ R 15 (vd. supre). En 1891 li proponis jenan sistemon en la lasta parto de LR 62:

[...]

II. Sed iafoje ni estas en la situacio, ke ni devas esprimi ne la signifon de ia nomo aŭ fremda vorto, sed ĝian precizan sonadon, kaj tiam ni devas figure prezenti sonojn, kiuj en nia alfabeto ne havas por si literojn. Kion tiam fari? Tio ĉi ne estas speciala demando de nia lingvo, ĝi estas egala demando por ĉiuj ekzistantaj lingvoj kaj en neniuj el ili ĝi estas ankoraŭ solvita ĝis nun. Nenia lingvo ĝis nun havas la eblon prezenti precize ian vorton, en kiu sin trovas sonoj fremdaj por tiu ĉi lingvo. Ne parolante jam pri la sonoj de naciotoj malgrandaj kaj malproksimaj, eĉ la sonojn de la nacioj plej gravaj kaj plej najbaraj neniuj el niaj lingvoj povas prezenti; tiel ekzemple la slavoj povas precize prezenti preskaŭ neniun vorton el la lingvoj romana-germanaj, kaj tiuj ĉi lastaj — preskaŭ neniun vorton slavan; eĉ la slavaj popoloj inter si kaj la romana-germanaj inter si ne havas la eblon precize esprimi skribe la vortojn unuj de la aliaj.

Sed en la lingvo Esperanto tiu ĉi granda, kvankam natura, manko ekzisti ne devas. La celo de nia lingvo estas, servi kiel ligilo inter la popoloj, kaj tial ĝi devas havi la eblon esprimi la sonojn de ĉiuj lingvoj. Ni jam diris, ke enpreni ĉiujn sonojn en nian alfabeton estus tre maloportune, — kontraŭe, en la alfabeto ellernota de ĉiuj esperantistoj devas sin trovi sonoj nur tute klaraj, difinitaj, por ĉiuj bone ellegneblaj: sed ekster la alfabeto pure esperanta ni devas havi ankoraŭ provizan [legu: provizoran] alfabeton por fremdaj sonoj; tiu ĉi proviz[or]a alfabeto por la amaso de esperantistoj estas tute ne bezona kaj neniuj devas ĝin lerni; ĝi ekzistas nur por la filologoj kaj servas al ili kiel kondiĉa [legu: konvencia] rimedo por esprimi klare kaj unuforme la sonojn ne trovatajn en nia lingvo. Sendube tia proviz[or]a alfabeto, perfekta kaj plena, iom post iom estos kreita de personoj pli kompetentaj ol ni, kaj por ebligi tiun ĉi kreadon ni petas niajn amikojn sendi al ni siajn konsilojn kaj opiniojn tuŝante tiun ĉi demandon. Sed ĉar sendube ĝis la fina kaj firma kreiĝo de tia perfekta proviz[or]a alfabeto pasos ankoraŭ longa tempo kaj ni dume jam nun devas havi ian unuforman manieron de esprimado por la diversaj fremdaj sonoj, tial ĝis tiu tempo ni proponas nian propran sistemon por la plej gravaj fremdaj sonoj. En la ricevotaj proponoj, kiujn ni kredeble presados en nia gazeto, tiuj

samaj sonoj estos sendube esprimataj en alia maniero, ol la nia; sed por eviti konfuzon kaj malegalan komprenadon de la samaj sonoj, ni petas niajn legantojn memori, ke malgraŭ ĉiuj presotaj teoriaj proponoj nia sistemo restos neŝanĝita kaj netuŝebla, ĝis ia alia sistemo oficiale okupos ĝian lokon. Por la okulo nia sistemo estas iom neoportuna; multe pli bone estus krei por la fremdaj sonoj novajn literojn aŭ doni certajn signetojn al la literoj jam ekzistantaj; sed ĉar tiuj ĉi literoj estas uzataj tre malofte, tial neniuj presistoj volos prepari por ili apartajn tipojn kaj tiel ĝia uzado en okazo de bezono estus praktike neebla. Tial ni signas la fremdajn sonojn per literoj en krampoj. Ni parolos tie ĉi nur pri la fremdaj sonoj plej gravaj.

- 1) La germanaj sonoj *ä, ö, ü* (la francaj *ai, è, eu, œu, u*) estas esprimataj per *a(e), o(e), u(e)*;
- 2) la molaj konsonantoj (ekzemple en la lingvoj slavaj) estas esprimataj per *(j)* post la konsonanto;
- 3) la malmolaj konsonantoj — per *(u)* post la konsonanto;
- 4) la naza *n* (franca, pola) — per *n(g)*;
- 5) la angla *th* en “think” — per *t(h)*;
- 6) la angla *th* en “father” — per *d(h)*;
- 7) la meza sono inter *a* kaj *o* — per *a(o)*.

Per la montritaj malmultaj signoj, kiujn ellerni kaj memori estas afero tre facila, ni povas esprimi tute klare kaj precize preskaŭ ĉiujn sonojn de ĉiuj eŭropaj lingvoj, malgraŭ ke tiuj lingvoj mem por ilia esprimado uzas tre grandan nombron da diversaj signoj kaj multon da tre malfacilaj “reguloj de legado”. Se ni ekzemple volas precize esprimi la germanan tradukon de “urso”, “leono”, “dolĉa”, la rusan de “glacio”, “morto”, “estis”, la anglan de “pensi”, “patro”, “bone”, la francan de “mia”, la polan de “cigno”, “klafto”, k. c., — ni skribos: “ba(e)r”, “lo(e)ve”, “zu(e)s”, “l(j)od”, “sm(j)ert(j)”, “b(u)il(u)”, “t(h)ink”, “fad(h)er”, “ŭel”, “mon(g)”, “l(u)aben(g)dz(j)” (oni elparolas ankaŭ alie — “l(u)aben(g)dĵ(j)”, “son(g)ĵen(j)” k. c.

Ankaŭ per la akcento kaj per malegala longeco de la vokaloj multaj lingvoj diferencas de nia lingvo. Tion ĉi ni esprimos per la signoj, kiuj ordinare estas uzataj por tio ĉi, ekzemple: *à, ŭ, a*. [LR 62, *La Esperantisto* 1891, p. 3].

82 La ekzemplojn donitajn de Z en la antaŭlasta alineo de LR 62 oni povas resumi jene:

Esperanto	fremdlingvo	Zamenhofa propono
urso	Bär	ba(e)r
leono	Löwe	lo(e)ve
dolĉa	süß	zu(e)s
glacio	лёд	l(j)od
morto	смерть	sm(j)ert(j)
estis	был	b(u)il(u)
pensi	think	t(h)ink
patro	father	fad(h)er
bone	well	ŭel
mia	mon	mon(g)
cigno	łabędź	l(u)aben(g)dz(j), l(u)aben(g)dĵ(j)
klafto	sążeń	son(g)ĵen(j)

- 83** **Waringhien** proponis alian sistemon por proksimume priskribi fremdajn fonemojn per esperantaj literoj en *Lingvo kaj Vivo* (1959, p. 433; 2a rev. eld. 1989). La magazeno „**Monato**“ starigis regulojn pri transskribo de nomoj rusaj kaj ukrainaj, la revuo „El Popola Ĉinio“ pri transskribo de nomoj ĉinaj (sistemon, kiun ankaŭ aplikas *Monato*).¹⁴⁴

685 _____

¹⁴⁴ Detalojn vd. en „Monato-konvencioj“ en www.esperanto.be/fel/mon/mon_konv.php.

R. § 16 [Apostrofado]

I. Fundamentaj Tekstoj

1. § 16 Gramatikoj

16. Les terminaisons des substantifs et de l'article peuvent se supprimer et se remplacer par une apostrophe. Ex.: *Ŝiller'* (Schiller) au lieu de *Ŝiller'o*; de *l' mond'o* au lieu de *de la mond'o*.

16. The *a* of the article, and final *o* of substantives, may be sometimes dropped euphoniae gratia, e. g. de *l' mond'o* for *de la mond'o*; *Ŝiller'* for *Ŝiller'o*; in such cases an apostrophe should be substituted for the discarded vowel.

16. Die Endung des Substantivs und des Artikels kann ausgelassen werden, indem man dieselbe durch einen Apostroph ersetzt; z. B. *Ŝiller'*, statt *Ŝiller'o*; de *l' mond'o*, statt *de la mond'o*.

16. Окончания существительного и члена могут быть опущены и замѣнены апострофомъ (Примѣры: *dom'* вм. *dom|o*; de *l' mond|o* вм. *de la mond|o*).

16. Końcówkę rzeczownika i przedimka można opuścić i zastąpić apostrofem (np. *Ŝiller'* zam. *Ŝiller'o*; de *l' mond/o* zamiast *de la mond/o*).

Transskribo de la germana teksto per latinaj literoj (eksterfundamenta interpret-helpo)

16. Die Endung des Substantivs und des Artikels kann ausgelassen werden, indem man dieselbe durch einen Apostroph ersetzt; z.B. *Ŝiller'*, statt *Ŝiller'o*; de *l' mond'o*, statt *de la mond'o*.

Zamenhofa traduko de la Gramatikoj 1903 (eksterfundamenta interpret-helpo)

16. La finiĝo *o* de substantivoj kaj la *a* de la artikolo povas esti iafoje forlasataj kaj anstataŭataj de apostrofo pro belsoneco. Ekz. *Ŝiller'* (Schiller) anstataŭ *Ŝiller|o*; *de l' mond|o* anstataŭ *de la mond|o*; *dom'* anstataŭ *dom|o*.

2. Ekzercaro kaj UV

Anstataŭ „*la*” oni povas ankaŭ diri „*l'*” (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo) [FE 27.4].

II. Eksterfundamentaj interpret-helpoj

1. Kromdeklaro pri la nomoj Zamenhof kaj Vaŝington (OI 22 de 2013)

„La Akademio de Esperanto, lige kun sia esploro pri la skribado de diversgrade esperantigitaj propraj nomoj, rekonsideris rimarkon IV en la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro. La rimarko aperis en sekcio I(B) de la Aldono:

,B) 2 propraj nomoj

Paŭl/o

Zamenhof

RIM.IV. La nomo Zamenhof komence estis uzata kun apostrofo (ekzemple en la “Unua Libro”); en la Fundamento (fine de la Antaŭparolo) ĝi aperas sen apostrofo,

tiel same kiel la virnomo Vaŝington (12, 19). Dume oni trovas en la U.V., ĉe an/, la urbonomon Nov-Jork sen apostrofo, sed en la ekzercaro (37, L. 1) troviĝas Nov-Jorko, kie ne povas temi pri preseraro. Fakte temas pri neesprimita licenco al la 16a Regulo pri apostrofado de substantivoj, licenco, laŭ kiu ĉe propraj nomoj povas esti forlasata ne nur la finaĵo de l' substantivo, sed ankaŭ la apostrofo mem." (Fonto: Aktoj de la Akademio II, 1968-1974, p. 12.)

La Akademio ĉi-pere nuligas tiun licencan interpreton de la apero de senapostrofaj Zamenhof kaj Vaŝington en la Fundamento kaj konstatas, ke tiuj nomformoj estas rigardendaj kiel nur parte esperantigitaj."

2. Lingvaj Respondoj 84 A - C

1 LR 84 A de 1889:

„[1] Se vi ne scias, kiam vi devas uzi la formon *la* kaj *l'*, uzu ĉiam pli bone la formon *la*. [2] La formon *l'* mi uzas ordinaro nur post prepozicioj, kiuj finiĝas per vokalo (ekzemple *de*, *je*, *tra* k.c.); en ĉiaj aliaj okazoj mi uzas ordinaro la plenan formon *la*, ĉar alie la senco povus fariĝi ne klara, eĉ la sono ne agrabla.“ [La Esperantisto 1889, p. 24].

2 LR 84 B de 1893:

„[1] La uzadon de „l“ (apostrofita „la“) ni ne forigis; sed ĉar tiu ĉi formo estas ne tre necesa escepto el la regulo kaj estas kreita precipe por mallongeco en *verso*j, tial ni en *prozo* uzas nun ordinaro la formon konstantan („la“) kaj konservas la formon apostrofitan speciale por *verso*j. [2] Tiel ni agas ordinaro en nia gazeto; tamen ni tute ne faras el tio ĉi regulon; ĉiu povas kuraĝe uzadi ankaŭ en *prozo* la formon apostrofitan.“ [La Esperantisto 1893, p. 127].

3 LR 84 C de 1906:

„[1] La esprimo „reunuiĝi l' homaron“ estas efektive ne bona, ĉar apostrofi la artikolon oni povas nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo. [2] Sed la neobservado de tiu ĉi regulo, kiu estis donita ne en la gramatiko, sed nur en la „Ekzercaro“ (§ 27), estas ne *eraro*, sed nur peko kontraŭ *boneco de la stilo*. [3] Sekve en *prozo* tiu ĉi regulo devas esti observate, sed en *verso*j, kie pro „licentia poetica“ oni ofte permesas al si deflankiĝon de la ordinara stilo, la neobservado de la supre donita regulo (aŭ pli ĝuste *konsilo*) ne estas *eraro*. [4] En *verso*j ni devas nomi „eraro“ nur deflankiĝo de la *gramatiko* (ekzemple la apostrofado de adjektivo, uzadon de diversaj kontraŭgramatikaj formoj k.t.p., kio estas tre ofte renkontata ĉe la komencantaj esperantaj versistoj.“ [Respondo 4, La Revuo, Decembro 1906].

III. Komentoj

1. Tekst-historio

a) Unua Libro 1887

- 4 La kvin lingvo-versioj de FG 16 estas identaj kun tiuj en UL, kiuj havas la numeron C8.

b) Dua Libro 1888

Anstataŭ „la“ oni povas ankaŭ diri „l'“, se ĝi ne estos malbonsone {tiel! legu: *malbonsona*} [DL 1.7].

- 5 La „Kromdeklaro pri la nomoj Zamenhof kaj Vaŝington (OI 22 de 2013)“ estas enhance malĝusta kaj krome lezas la preskribon de A 10.4. Fakte la Akademio per

la kromdeklaro volis nuligi jenan regulon aldonita de OA 8 al R 16: „ĉe propraj nomoj povas esti forlasata ne nur la finaĵo de l' substantivo, sed ankaŭ la apostrofo mem”. La kromdeklaro pro tio lezas la principon de netuŝebleco de la Fundamento („pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj“, A 10.4).

6 Detale: [Daŭrigota].

Tria Libro
Fundamenta Ekzercaro
(FE)

A. La Fundamenta Ekzercaro (FE 1898)

I. Superrigardo

1. Eldon-historio

- 1 La 1-a eldono de la Ekzercaro estis sendita kune kun la Universala Vortaro al la cenzuristo en Sankt-Peterburgo en Aprilo aŭ Majo 1893. Dum la UV aperis jam meze de 1893, tamen kun la erara eldon-jaro „1894“, la FE pro la reform-diskuto en „La Esperantisto“ de 1894 estis publikigita nur en Septembro de tiu jaro, post la decido lasi la lingvon neŝanĝita. Ĝis enmeto de FE en la Fundamenton en 1905 aperis kvar eldonoj de la Ekzercaro. La dua eldono (1898), poste reproduktita senŝanĝe, enkondukis multajn korektojn en la tradukoj, precipe en la anglaj. Sed la Universala Vortaro ne estis paralele modifita, tiel ke en la Fundamento tiuj du partoj ne plu konkordas inter si.¹⁴⁵
- 2 Neniu eldono de FE enhavas antaŭparolon aŭ enkondukon. Ĝian celon kaj sistemon oni tamen ekscias el la Zamenhofa anonco de la verko en Esperantisto 5a jaro n. 9 (57) 1894, p. 130 de 1894-09-15, kiun ni enmetis antaŭ § 1 FE malsupre. Ĝi montras, ke la motivoj por FE estas similaj, kiel tiuj de ĝia antaŭulo, la Dua Libro, aperinta komence de 1888 (DL – vd. ties antaŭparolon).

2. La Dua Libro (DL 1888), la „Pra-Ekzercaro“

a) Celo kaj aranĝo de DL

- 3 DL estas la unua libro de Esperanto, tute verkita en la lingvo mem (la Unua Libro – UL 1887 – estis verkita en la kvin referenc-lingvoj kaj aperis en esperanta traduko nur en 1903). DL enhavas, post antaŭparolo, 20-pecan ekzercaron. Zamenhof skribas (p. 16):

„La venontajn apartajn pecojn mi donas, [por] ke la lernantoj povu ripeti praktike la regulojn de l' gramatiko internacia kaj kompreni bone la signifon kaj la uzon de l' sufiksoj kaj prefiksoj. [DL-A III]“

Laŭ tiu programo la unuaj ekzercoj en DL klarigas la regulojn de FG laŭ ties ordo, poste la vort-kreaj afiksoj, fine donas proverbojn kaj literaturan tradukon, nome de „La Ombro“ de Andersen. Similan programon kaj aranĝon havas ankaŭ FE, verkita kvin jarojn poste.

- 4 DL estas speco de „lingvaj respondoj“ al la publiko. Zamenhof respondis la demandojn, kiujn li ricevis de individuaj korespondantoj reage al la Unua Libro ne individue, sed kolektis kaj sistemigis ilin en DL:

„Respondi je ĉiu letero aparte estas por mi ne eble, kaj tial mi decidis respondi publike je ĉiuj demandoj kaj proponoj [reage al UL], ĉar tiel unu respondo povas servi por multaj demandantoj. [DL-A 2.3]“.

Tiel la ekzercoj en DL fariĝis la praulo de FE. FE baziĝas sur DL malgrand-parte laŭvorte, plejparte nur laŭsence, grand-parte enhance senŝanĝita, et-parte modernigita.

685

¹⁴⁵ *André Albault* en sia "Enkonduka Notico" al la libroforma eldono de la Fundamento (1963, 1991, 2007, p. 15). Sola ŝanĝo en UV: vipuro – vipero.

b) Lingvaĵo de DL

- 5 Jam nur la supre citita enkonduka frazo montras tipajn lingvajn ecojn de DL: Uzo de la gramatikaj fak-vortoj „sufikso“ kaj „prefikso“ (apliko de R 15, en FE uzitaj nur en § 30), dufoja uzo de „de l“ anstataŭ „de la“ (apliko de R 16), inversigo de la kutima vort-ordo (SPO – subjekto, predikato, objekto). Malgraŭ kelkaj malglataĵoj, la lingvaĵo de DL kiel tuto estas jam surprize sperta kaj matura.
- 6 La ĉefa uzo devianta de la moderna estas, ke la serio de tempaj tabel-vortoj finiĝas je –an (*kian, tian, ĉian, ian, nenian*). Ilin Zamenhof ŝanĝis al la respektivaj formoj je –am en la samjara Aldono al la Dua Libro (DL-Ald 1888): *kiam, tiam, ĉiam, iam, neniam*.

c) Specimena komparo inter § 1 DL 1888 kaj FE 1894

- 7 La unuaj ses frazoj de la unua ekzerco de DL tekstas:

„Amik,o ven,is (= unu el la amik,o,j ven,is). [DL 1.1] — La amik,o ven,is (= la kon,at,a amik,o, aŭ la amik,o, kiu,n oni atend,is). [DL 1.2] — Don,u al mi libr,o,n. [DL 1.3] — Don,u al mi la libr,o,n, kiu,n vi promes,is al mi. [DL 1.4] — Tiu ĉi ĝarden,o est,as am,at,a lok,o de bird,o,j. [DL 1.5] — La fenestr,o est,as am,at,a lok,o de la bird,o,j (= ni,a,j bird,o,j). [DL 1.7] — [DL 1.7] — [DL 1.8].“

Ĉar temas pri instru-cela ekzerco, Zamenhof disigas la lingvo-elementojn tie ĉi (kaj malsame kiel en la antaŭparolo al DL – DL-A) per komoj (vd. la nunan R 11.4). La unua frazo evidente temas pri la regulo, ke nedifinita artikolo ne ekzistas (FG 1.2). La aranĝo de la temoj sekvas do la aranĝon en la Gramatikoj. Tio devigas Zamenhof, enkonduki multajn gramatikajn erojn, ankoraŭ nekonatajn al lernanto en tiu komenca fazo.

DL 1.2 ĝis DL 1.6 instruas la uzon de la difinita artikolo (FG 1.1). Frazo 2 kontrastas kun frazo 1: Amiko venis – La amiko venis. Simila kontraŭmeto ĉe frazoj 3-4 kaj 5-6: libron – la libron kaj birdoj – la birdoj. Sed la Dua Libro bezonas multajn gramatikerojn por klarigi FG 1 (participoj, imperativo, akuzativo, relativ-frazo, tabel-vortoj, posesiv-pronomoj, numeraloj ktp.). Kontraste la samtema § 5 FE, do la koresponda unua ekzerco post la alfabeto kaj la „ekzercoj de legado“ tekstas:

„Patro kaj frato. — Leono estas besto. — Rozo estas floro kaj kolombo estas birdo. — La rozo apartenas al Teodoro. — La suno brilas. — La patro estas sana. — La patro estas tajloro.“

Multe pli simpla oni probable apenaŭ povas ekzempligi R 1. Tia simpleco do estas pedagogia progreso kompare al DL 1.

- 8 En DL 1.7 kaj DL 1.8 sekvas ne per-ekzempla, sed „klar-teksta“, eksplicita klarigo pri la „artikolo“ (nuntempe „artikolo“):

[7] La vort,o „la“ est,as nom,at,a „artikul,o“ [!]; ĝi est,as uz,at,a tian [!!], kian [!!] ni parol,as pri objekt,o,j kon,at,a,j. [8] Anstataŭ „la“oni pov,as ankaŭ dir,i „l“, se ĝi ne est,os mal,bon,son,e. — [9] Se iu ne kompren,as bon,e la uz,o,n de la artikul,o [!], li pov,as tut,e ĝi,n ne uz,i, ĉar ĝi est,as oportun,a sed ne neces,a.

Tiu parto de § 1 DL 1888 fariĝis la unua parto de § 27 FE 1894, 1898 Diferencoj ni substrekas:

[1] La artikolo „la“ estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj. [2] Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj. [3] La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi

estas oportuna sed ne necesa. [4]. Anstataŭ „la” oni povas ankaŭ diri „l'” (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo).

En frazo 1 estas prave aldonita „parolas pri personoj”. Precizigo nur, ja ankaŭ § 1.1-2 DL parolas pri „amiko”, do persono.

Frazo 2 estas „nova” kaj ... tro ĝenerala. En § 1 de la franca Gramatiko ni trovas rimarkon, ke la uzo de la artikolo estas la sama kiel en la franca aŭ germana (do ne en „aliaj” lingvoj), en la rusa Gramatiko „sama kiel en la franca, germana kaj aliaj lingvoj”.

Frazo 3 pri la homoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo, fariĝis pli malvasta per „en la unua tempo”. Krome aldoniĝis la parenteza ekzemplo pri la unu-lingvaj rusoj aŭ poloj. El tio sekvas: lam ĉiuj ja lernu la uzadon de la artikolo, eĉ parolantoj de tiuj lingvoj, kiuj ĝin ne havas.

Frazo 4 fine traktas la temon de § 1.8 DL (la → l'). En 1888: „permesita, se ne malbonsona”, en 1894 duoble pli malvaste kaj eksplicite: „sed nur [1-e] *post prepozicio*, kiu [krome 2-e] *finiĝas per vokalo*”. En 1888 do defendebla estis la frazo „Kun bruo oni malfermis la pordegon, kaj l' kaleŝo enveturis en la korton”, en 1894 ne plu (vd. § 38 FE: „kaj la kaleŝo ...”).

- 9 **Resumo:** La komparo de la unua ekzercero de la Dua Libro 1888 kun FE 1894 montras progreson ne nur pedagogian, sed ankaŭ konkretigan, klarigan pri la gramatika enhavo kaj rilata al pli sistema prezento. Tiun konstantan fajladon de la materialo Zamenhof daŭrigis en la 2-a eldono de FE 1898 (kiu fariĝis la Fundamenta de 1905), krome en sia traduko de la Gramatikoj al Esperanto por la Fundamenta Krestomatio (1903).

d) Specimena komparo inter §§ 8-10, 12 FE 1894 kaj DL 1888

- 10 § 8 de la Fundamenta Ekzercaro (FE) klarigas la kazojn, en la tradicia latina terminaro de nominativo ĝis ablativo:

La patro estas bona [FE 8.1 - nominativo]. — Jen kuŝas la ĉapelo de la patro [FE 8.2 - genitivo]. — Diru al la patro, ke mi estas diligenta [FE 8.3 - dativo]. — Mi amas la patron [FE 8.4, akuzativo]. — Venu kune kun la patro [FE 8.5 - ablativo 1]. — La filo staras apud la patro [FE 8.6 - ablativo 2]. —

Kaj jen la sama temo en § 2 de la Dua Libro (DL):

Jen estas la patro [DL 2.1 - nominativo]. — *Mi aŭdas la voĉon de la patro* [DL 2.2 - genitivo 1]. — *Mi ricevis donacon de la patro* [DL 2.3 - genitivo 2]. — *Diru al la patro, ke mi estas sana* [DL 2.4 - dativo 1]. — *Ni iros al la patro* [DL 2.5 - dativo 2].

Tie la serio finiĝas, ekzemplo por akuzativo kun „patro” mankas. Anstataŭe ni trovas kompleksan frazon: „Karolo aĉetis por sia kuzino horloĝeton kun tri montrantoj [DL 2.6]”. „Montrantoj”, estas germanismo („Zeiger”) por „montriloj (de horloĝo)”. Sed la kerna instruo (akuzativo havas n-finaĵon) ie perdiĝas inter multaj aliaj informoj. Pli klare kaj simple fariĝis en la Ekzercaro: Mi amas la patron. Ankaŭ la frazo por lerni la genitivan en 1894 estas pli bona. Per la strukturo de „jen kuŝas” Zamenhof evitas jam tiuloke enkonduki la akuzativon kiel en „mi aŭdas la voĉon de la patro”.

- 11 § 9 FE profundigas la bazajn instruojn pri la kazoj el § 8. Jen unu, duone rekte transprenita:
- Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj [FE 9.5]. — *Ni vidas per la okuloj* [DL 2.7].
- 12 En § 10 temas pri komparacio:

- El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna [FE 10]. — Mi estas tiel forta, kiel vi [FE 10]. — El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa [FE 10].
- *Aŭgusto estas bona, Mario estas pli bona ol Aŭgusto, sed Ernestino estas la plej bona el ĉiuj miaj gefratoj* [DL 2.11].

13 Lern-temo de § 12 estas nombroj:

- Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj [FE 12.12].

Sesdek minutoj faras unu horon, kaj dudek kvar horoj faras unu plentagon [DL 3.1].

e) Pliaj komparoj inter DL 1888 kaj FE 1894

DL 1888

La vorto "la" estas nomata "artikolo" {nun: artikolo}; ĝi estas uzata tiam, kian {de 1888: tiam, kiam} ni parolas pri objektoj konataj. Anstataŭ "la" oni povas ankaŭ diri "l", se ĝi ne estos malbonsone [DL 1.7].

Se iu ne komprenas bone la uzon de la artikolo {nun: artikolo}, li povas *tute ĝin ne uzi*, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa [DL 1.8].

Ni vidas per la okuloj [DL 2.7].

Hodiaŭ estas la dek kvina (tago) de Aprilo [DL 3.3].

Tiu ĉi rivero havas ducent naŭdek kvar kilometrojn da longo [DL 3.5].

Georgo Vaŝingtono estis naskita la dudek duan Februaron (aŭ: je l' dudek dua Februaro) de l' jaro mil sepcent tridek dua [DL 3.6].

Kvaroble kvin estas dudek [DL 3.14].

En tiu ĉi lando loĝas tri milionoj kristanoj (aŭ: da kristanoj) [DL 3.11].

FE 1894 / 1898

La artikolo „la” estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj [FE 27.1]. Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj [FE 27.2]. Anstataŭ „la” oni povas ankaŭ diri „l” (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo) [FE 27.4].

La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo *tute ne uzi* la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa [FE 27.3].

Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj [FE 9.5].

Kiun daton ni havas hodiaŭ? [FE 12.17] — Hodiaŭ estas la dudek sepa (tago) de Marto [FE 12.18].

Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo [FE 32.8].

Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19].

Kvinoble sep estas tridek kvin [FE 14.8].

Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj [FE 14.3].

"Vi" ni diras egale al unu persono aŭ objekto kaj al multaj; tio ĉi estas farita pro oportuneco, ĉar, parolante kun iu, ni ofte ne scias, kiel diri al li: "vi" aŭ "ci" ("ci" signifas la duan personon de l' ununombro; sed tiu ĉi vorto estas trovata sole en la plena vortaro; en la lingvo mem ĝi preskaŭ nenian {de 1888: neniam} estas uzata) [DL 4.4].	Ci skribas (anstataŭ „ci” oni uzas ordinare „vi”) [FE 16.2].
Mi amas min, ĉar ĉiu amas sin mem [DL 4.7].	Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem [FE 18.12].
La patro skribas leteron, kaj la infanoj preparas siajn lecionojn [DL 5.2].	La patro ne legas libron, sed li skribas leteron [FE 9.11].
Kion li babilas? [DL 5.3]. — Li babiladas la tutan tagon [DL 5.4].	Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko [FE 40.5].
Se mi nur estus sana, mi estus tute kontenta [DL 5.12].	Se mi estus sana, mi estus feliĉa [FE 20.10].
Li estas severa juĝanto, li juĝas severe, sed juste [DL 6.2].	Nia provincestro estas severa, sed justa [FE 37.6].
Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de simplaj vortoj; prenataj estas ordinare la puraj radikoj, sed, se la bonsonco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t.e. la radikon kune kun la finiĝo [DL 7.1].	Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsonco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5].
La lingvo internacia esperas fariĝi ian {de 1888: iam} lingvo tutmonda [DL 7.2].	En la lingvo "Esperanto" ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo [FE 22.10].
Kia granda brulo! kio brulas? [DL 8.1]	Kia granda brulo! kio brulas? [FE 31.15]
Ligno estas bona brula materialo [DL 8.2].	Ligno estas bona brula materialo [FE 31.16].
La fera bastono estas brule varmega [DL 8.3].	La fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas nun brule varmega [FE 31.17].
Ĉu oni povas diri: helpi la fraton (anstataŭ: al la frato), obei la patron (anstataŭ: al la patro), ridi lian malsekonecon (anstataŭ: ie lia	Ekzemple, ni povas diri "obei al la patro" kaj "obei la patron" (anstataŭ "obei ie la patro") [FE 29.01]. Sed ni

malsaĝeco), plori la perdon (anstataŭ: pro la perdo)? Jes; ĉar se la senco ne montras klare, kian prepozicion ni devas uzi, ni ĉiam {de 1888: ĉiam} povas uzi la vorton "je", aŭ la akuzativon sen prepozicio [DL 8.7].

La lavistino alportis mian tolaĵon: ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj viŝilojn (oni nomas ĝin tolaĵo, kvankam ne ĉio estas farita el tolo) [DL 9.5].

Anstataŭ vino li enverŝis en mian glason ian malagrablan acidaĵon, kaj tiun ĉi malklaran fluidaĵon li devigis min eltrinki [DL 9.6].

Ne ĉiu rusujano estas ruso [DL 9.12].

Ili venkos, ĉar ilia militistaro estas glora pro sia disciplino [DL 9.14].

La patro de mia edzino estas mia bopatro [DL 10.9].

La parenco de mia edzo aŭ la edzo de mia parenco, estas mia boparenco [DL 10.8]. Mi estas la bofrato de Heleno, ĉar ŝi estas la edzino de mia frato; ŝi estas mia bofratino [DL 10.10].

Li rakontas aferon tute ne kredeblan [DL 10.17].

Virino, kiu sin okupas je kudrado, estas nomata kudristino, kaj ŝia edzo estas nomata kudristinedzo [DL 11.4].

Ŝi ne estas doktorino, sed nur doktoredzino [DL 11.5].

La vetero estis malbona, kaj mi malvarmumis: la kuracisto konsilis al mi iri

ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas [FE 29.10]; ekzemple: ni povas diri "pardonu al la malamiko" kaj "pardonu la malamikon", sed ni devas diri ĉiam "pardonu al la malamiko lian kulpon" [FE 29.11].

Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13].

Via vino estas nur ia abomena acidaĵo [FE 35.7]. Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon [FE 35.4].

Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj [FE 37.9].

Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava [FE 34.12].

La patro de mia edzino estas mia bopatro, mi estas lia bofilo, kaj mia patro estas la bopatro de mia edzino [FE 36.6].

Ĉiuj parencoj de mia edzino estas miaj boparencoj, sekve ŝia frato estas mia bofrato, ŝia fratino estas mia bofratino; mia frato kaj fratino (gefratoj) estas la bogefratoj de mia edzino [FE 36.7].

Li rakontis al mi historion tute nekredeblan [FE 41.6].

Virino, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino [FE 36.9].

Virino, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino [FE 36.9].

En malbona vetero oni povas facile malvarmumi [FE 12.12] — La

en ŝvitbanejon [DL 11.9].	kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon [FE 40.14].
La religio diras, ke la animo estas nemortema, kvankam la korpo estas mortema [DL 11.20].	La korpo estas morta, la animo estas senmorta [FE 31.6].
Mia kolego estas tre kredema: li kredas ĉion, kion oni diras al li [DL 11.17].	Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas [FE 41.14].
La plej malgranda fajrero estas sufiĉa por eksplodigi la pulvon [DL 12.3].	Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon [FE 41.18].
Se la ŝipestro ordonas, la ŝipanoj devas obei [DL 12.5].	La ŝipanoj devas obei la ŝipestron [FE 37.1].
Sidante sur seĝo, kaj tenante la piedojn sur benketo, li dormetis [DL 12.7].	Mi sidas sur seĝo kaj tenas la piedojn sur benketo [FE 26.7].
La Napoleonidoj esperas ricevi la tronon de Francujo [DL 12.12].	La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo [FE 36.13].
La printempa suno fluidigis la neĝon kaj la glacieron [DL 13.2].	En la printempo la glacio kaj la neĝo fluidiĝas [FE 39.8].
Mirinda estas la historio de lia familio: la avo mortis je ia nekomprenebla malsano, havante la aĝon de dudek naŭ jaroj; la avino mortigis sin mem en atako de malprudento; la patro elfalis el fenestro de tria etaĝo kaj mortiĝis; la patrino estis mortigita de ŝia propra servantino [DL 13.9].	Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniuj; unu tagon, promenante apud la reloĵoj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11].
Prenu la fosilon kaj fosu tombon [DL 14.4].	Per hakilo ni hakas, per segilo ni segas, per fosilo ni fosas, per kudrilo ni kudras, per tondilo ni tondas, per sonorilo ni sonoras, per fajfilo ni fajfas [FE 34.8].
La patrino de mia patro estas mia avino [DL 14.7].	La edzino de mia patro estas mia patrino kaj la avino de miaj infanoj [FE 33.15].
Multope ni pli frue finos la laboron, ol unuope [DL 15.3].	Du homoj povas pli multe fari ol unu [FE 12.1].
Se ni devas uzi ian sufikson, sed la senco	La sufikso «um» ne havas difinitan

ne montras al ni, kian sufikson ni devas preni, ni uzas la sufikson "um" [DL 15.14].

La dek du monatoj de l' kristana jaro estas: Januaro, Februaro, Marto, Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro, Decembro [DL 16.6].

La venontan dimanĉon mi veturos Hamburgon [DL 16.16].

Antaŭ tiu malgranda ligna dometo staris bela granda arbo [DL 16.21].

Metu la manon sur la koron [DL 16.26].

La leteron mi adresis: al lia moŝto sinjoro N.en N.N [DL 16.29].

signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9].

Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua [FE 12.13].

Morgaŭ mi veturos Parizon (aŭ en Parizon) [FE 28.4].

Antaŭ la domo staras arbo [FE 8.11].

Mi metis la manon sur la tablon [FE 26.8].

El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. [FE 42.8]

II. La tekst-specoj de la Ekzercaro

1. Alfabeto (§ 1 FE)

- 14 FE 1 enhavas du listojn de la duoble 28-litera alfabeto, trovebla jam en FG A (R 0), nome listo de presitaj kaj (enkondukitaj nur tie ĉi) manskribitaj literoj. Detalojn vd. ĉe R 0 FG.

2. Ekzercoj de legado (§§ 2 – 4 FE)

- 15 §§ 2 kaj 3 de la „Ekzercoj de legado“ kune enhavas 213 prononc-ekzercojn. Estas indikita la akcento per la simbolo (´) kaj la disigoj de la silaboj per (-), tiel ke aspektas jene:

Al. Bá-lo. Pát-ro. Nú-bo. Cé-lo. Ci-tró-no. Cén-to. Sén-to. Scé-no. Scí-o. Có-lo. Kó-lo. O-fi-cí-ro. Fa-cí-la. Lá-ca. Pa-cú-lo ... [FE 2].

Per tio oni lernu la ĝustan prononcon de la literoj A, B kaj C kaj kiel distingi ilin de similaj sonoj:

A: Al.

B: Bá-lo. Pát-ro. Nú-bo.

C: Cé-lo. Ci-tró-no. Cén-to. Sén-to. Scé-no. Scí-o. Có-lo. Kó-lo. O-fi-cí-ro. Fa-cí-la. Lá-ca. Pa-cú-lo

Ĉ: Ĉar. ... ktp. ĝis

KV: Ak-vo. Ko-ké-to. Li-kvó-ro.

- 16 **CK:** Pac-ká-po.

3. Ekzerco-frazoj

- 17 Escepte de la poste priskribitaj partoj, la ĉefa enhavo de FE 5 – 42 estas ekzemplo-frazoj, kiuj klarigas la regulojn de FG kaj la uzon de la afiksoj. Multaj estas pluevoluitaj formoj de frazoj el DL 1888 kaj kiel tiuj speco de „lingvaj respondoj“. Superrigardon pri la gramatikaj temoj de la unuopaj ĉapitroj de FE donas Albault p. 306-308.

4. Gramatikaj reguloj

- 18 Kelkaj frazoj en la Ekzercaro estas eksplicitaj gramatikaj reguloj, ne nur ekzemploj, kiuj montras aplikon de reguloj. Ili suplementas la Gramatikojn, kiu – malgraŭ kelkaj novaj vortumadoj en la Fundamento – enhance restis neŝanĝitaj de la Unua Libro de 1887, kaj gramatikajn regulojn troveblajn en UV. Jen kelkaj ekzemploj. Detalojn vd. en la komentoj pri FG:
- Uzo de la difina artikolo: FE 27.1-3 (kp. R 16 FG)
 - Elizio de la difina artikolo: FE 27.4. (kp. R 16 FG).
 - Kunmetitaj vortoj: FE 27.5 (kp. R 11).
 - Nominativo post prepozicio: FE 28.1 (kp. R 8)
 - Akuzativo por indiki direkton: FE 28.3 (kp. R 13).
 - La ĝenerala prepozicio „je“: FE 29.1 (kp. R 14).
 - Akuzativo anstataŭ „je“: FE 29.3 (kp. R 14).

5. Interpret-reguloj

- 19 Kelkaj frazoj en FE estas kaŝitaj interpret-reguloj, kiuj klarigas ĝeneralajn principojn, kiujn Zamenhof poste eksplicite vortumis en la Antaŭparolo aŭ en Lingvaj Respondoj.
- 20 Aparte grava estas FE 32.3 pri la rilato inter elinternaĵoj („skemismo“) laŭ R 11 (diplomati-o – diplomati-isto) kaj eleksteraĵoj („naturalismo“) laŭ R 15 (diplomatatio – diplomato):

Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem [FE 32.3].

La frazo konfirmas, ke ambaŭ formoj principe estas egale „bona Esperanto“. Ĝi konfirmas, ke R 15.2 estas nura rekomendo. Kvankam ambaŭ vortoj venas el la sama fonto, ne estas devige uzi nur unu vorton kaj derivi la alian surbaze de ĝi. La Akademio en OA 8 sistemigis la scienco-aganto-parojn, vd. la ĉapitron pri OA 8.

6. Lecion-finaj vort-listoj

- 21 Fine de FE 4 – 42 troviĝas listoj de la esperantaj vortoj nove enkondukita en la ĉapitro kun tradukoj al la kvin referenc-lingvoj. Ili estas ordigitaj laŭ apero en la ekzemplo-frazoj, ne alfabet. Malsame kiel en UV ili estas registritaj kun la finiĝo, indikanta la vortklason (ekz. UV ĝentil', sed FE ĝentila).
- 22 La lecion-finaj vort-listoj en la Ekzercaro (FE 1898) estas kvin jarojn pli junaj ol la Universala Vortaro (UV 1893). Kiel montrite, UV estas eĉ pli maljuna, nome ĝi - kun nur malmultaj devioj - baziĝas sur la Meza Vortaro Esperanto-Germana de 1889 kaj tiu sur la samjara Rusa-Internacia. Ĝenerale FE estas pli fidinda ol UV, tamen ne ĉiam. Aŭtomatismo ne ekzistas kaj necesas kontroli ĉiun unuopan okazon.
- 23 Multas ekzemploj, kie FE plibonigas la paralelajn informojn en UV. Jen kazo, kie la angla traduko estas kompletigita:
- UV: **ĝentil'** - gentil, poli | gentle | höflich | вѣжливый | grzeczny.

- FE: **ĝentila** - gentil, poli | polite, gentle | höflich | вѣжливый | grzeczny [§ 15].

24 Krom la kutima difino de la vortklaso (*ĝentila*) tipa ekzemplo de plibonigita traduko al la angla, *polite* aldonita, eĉ (*ĝuste*) unualoke.

Jen simila artikolo, kun plibonigo de la franca traduko:

- UV: **grav'** - grave | important | wichtig | важный | ważny.
- FE: **grava** - grave, important | important | wichtig | важный | ważny [§ 22].

25 Malmultas ekzemploj, kie FE malplibonigas vortarajn artikolojn en UV. Tia estas:

- UV: **prepozici'** – préposition | preposition | Vorwort, Präposition | предлогъ | przyimek.
- FE: **prepozicio** – préposition | preposition | Vorwort | предлогъ | przyimek [FE 27].

La vorto „prepozicio“ estas uzataj en jenaj frazoj en la Ekzercaro: Anstataŭ „la“ oni povas ankaŭ diri „l“ (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo) [FE 27.xx]. Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj. ... tiel same ni ankaŭ diras: “la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon”, kaj la vortoj „ĝardenon“, „tablon“ staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en“ kaj „sur“ tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton ... en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n“ tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne. [FE 28.xx]. Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion „je“. Anstataŭ la vorto „je“ ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio. [FE 29.xx].

26 UV do tradukas **prepozici'** al la germana per *Vorwort* kaj *Präposition* (nuntempe „Präposition“, en la senco de „antaŭparolo“, t.e. *Vorwort*, ne plu estas kutima, sed arkaa). Ĉiujn naŭ trafojn el FE oni tamen devas traduki germanen per „Präposition“ (gramatika fak-vorto). „*Vorwort*“ en tiu kunteksto estas - kaj estis en 1898 kaj 1905 - nete malĝusta, UV pravis, FE malpravas.

7. Vortoj ekster la lecion-finaj vortlistoj, precipe propraj nomoj

27 La ekzemplo-frazoj de FE enhavas aron de propraj, speciale de personaj nomoj, registritaj nek en UV, nek en la lecion-finaj vortlistoj de FE, ekz. „La rozo apartenas al Teodoro [FE 5.4]“. Por la kompleta listo vd. BK I, „Libro 4 – Universala Vortaro“.

8. Literaturaĵo: La Feino

28 La sola literatura teksto en la Fundamento estas la fabelo „La Feino“ en §§ 11, 13, 15, 17, 19, 21 kaj 23 de la Ekzercaro. La originalo estas la franca *Les Fées* de Charles Perrault (1628-1703), unue publikigita en ties *Contes de mère l'Oye* de 1697 [1]. Ĝi baziĝas sur simil-tema itala fabelo de Giambattista Basile (1575-1632), publikigita postmorte en napola dialekto en *Lo cunto de li cunti* (La fabelo de la fabeloj, 1634-1636, de 1674 nomita *Il Pentamerone*). Perrault prenis la temon kaj adaptis ĝin al la gusto de la kulturitaj francaj legantoj de sia epoko. Konforme al la tekst-tipo „fabelo“ li uzis tre facilan, iom intence malmodernan lingvaĵon. Tio, la mallongeco de la teksto, la ripeto de la priskribitaj okazaĵoj kaj la fakto, ke oni povas ĝin facile dividi en eĉ sep partetoj, faris ĝin taŭga kiel instrua ero por la Ekzercaro.

29 Ne estas konate, kiun originalan eldonon Zamenhof tradukis. La 1-a eldono de 1697 estas verkita en arkaa franca ortografio. En la 19-a jarcento la tre populara fabelo estis mult-foje eldonita en diversaj kolektoj, i.a. en la vaste disvastigita serio „Bluaj Kajeroj“.

- 30 Probable Zamenhof ankaŭ uzis rusan kaj / aŭ germanan tradukon. Interkruca traduko surbaze de diversaj lingvo-versioj ne jam estas pruvita okaze de la Feino, sed ja okaze de la *Batalo de l'Vivo* de Charles Dickens (18xx-18xx, la zamenhofa traduko de 19xx). En ties enkonduko Zamenhof asertas, ke li tradukis al Esperanto el germana traduko. Detala analizo de lia traduko tamen montris, ke li nepre ankaŭ konsultis rusan eldonon. Simila metodo oni ankaŭ povas observi en la traduko de la Ombro de Hans-Christian Anderson (18xx-18xx) en la Dua Libro de 1888. Kelkaj traduk-pecoj evidente estas inspirita de rusa traduko. Ne ekzistas kialo kredi, ke Zamenhof ŝanĝis sian labor-metodon nur okaze de la traduko de la Feino.
- 31 Jen sekvas la Esperanto-traduko de Zamenhof el la Fundamento, en kiu intermetite estas la originalo de Charles Perrault en modernigita franca laŭ Wikisource¹⁴⁶. Kiel vi vidas, la traduko estas tre proksima de la originalo. Kelkaj malsamaĵoj estas substrekitaj (*à une grande demi lieue* □ laŭvorte: bona duona mejlo ktp.) kaj per komentoj klarigitaj. Fine de la fabelo Perrault aldonis du „moralojn“ (konkludojn, instruojn). Ilin Zamenhof ellasis kaj ne tradukis. Vi trovos ilin ĉe la fino de la kompara teksto.

La feino / Les Fées

Unu vidvino havis du filinojn [FE 11.1]. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinojn; ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili [FE 11.2]. La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11.3].

Il était une fois une veuve qui avait deux filles ; l'aînée lui ressemblait si fort et d'humeur et de visage, que qui la voyait voyait la mère. Elles étaient toutes deux si désagréables et si orgueilleuses qu'on ne pouvait vivre avec elles. La cadette, qui était le vrai portrait de son Père pour la douceur et pour l'honnêteté, était avec cela une des plus belles filles qu'on eût su voir.

- 32 **Rim.:** 1. La titolo en la franca originalo estis origine en pluralo, tamen ekzistas ankaŭ francaj eldonoj el la epoko de Zamenhof kun titolo en singularo. La rusa eldono havas singularon.
2. La tipa formulo, enkondukanta fabelon *Il était une fois* (*es war einmal* [*vor langer Zeit*]), ne estas tradukita („lam antaŭ longa tempo estis unu vidvino, kiu havis du filinojn ..“).
3. Pri la uzo de „unu“ kiel kvazaŭa nedifinita artikolo vd. ĉe R 1 FG.

Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1]. Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese [FE 13.2]. Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon [FE 13.3].

Comme on aime naturellement son semblable, cette mère était folle de sa fille aînée, et en même temps avait une aversion effroyable pour la cadette. Elle la faisait manger à la cuisine et travailler sans cesse. Il fallait entre autres choses que cette pauvre enfant allât deux fois le jour puiser de l'eau à une grande demi lieue du logis, et qu'elle en rapportât plein une grande cruche.

685

¹⁴⁶ http://fr.wikisource.org/wiki/Les_F%C3%A9es.

En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki [FE 15.1]. „Tre volonte, mia bona,“; diris la bela knabino [FE 15.2]. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune [FE 15.3]. Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino [FE 15.4]: „Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon“ [FE 15.5] (ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino) [FE 15.6]. „Mi faras al vi donacon,“ daŭrigis la feino, „ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono.“ [FE 15.7].

Un jour qu'elle était à cette fontaine, il vint à elle une pauvre femme qui la pria de lui donner à boire. - Oui-dà, ma bonne mère, dit cette belle fille ; et rinçant aussitôt sa cruche, elle puisa de l'eau au plus bel endroit de la fontaine, et la lui présenta, soutenant toujours la cruche afin qu'elle bût plus aisément. La bonne femme, ayant bu, lui dit : - Vous êtes si belle, si bonne, et si honnête, que je ne puis m'empêcher de vous faire un don (car c'était une Fée qui avait pris la forme d'une pauvre femme de village, pour voir jusqu'où irait l'honnêteté de cette jeune fille). Je vous donne pour don, poursuivit la Fée, qu'à chaque parole que vous direz, il vous sortira de la bouche ou une Fleur, ou une Pierre précieuse.

Kiam tiu ĉi bela knabino venis domon, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto [FE 17.1]. „Pardonu al mi, patrino,“ diris la malfeliĉa knabino, „ke mi restis tiel longe“ [FE 17.2]. Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj [FE 17.3]. „Kion mi vidas!“ diris ŝia patrino kun grandega miro [FE 17.4]. „Ŝajnas al mi, ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj! [FE 17.5] De kio tio ĉi venas, mia filino?“ [FE 17.6] (Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino) [FE 17.7]. La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj [FE 17.8]. „Se estas tiel,“ diris la patrino, „mi devas tien sendi mian filinon [FE 17.9]. Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? [FE 17.10] Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile.“ [FE 17.11].

Lorsque cette belle fille arriva au logis, sa mère la gronda de revenir si tard de la fontaine. Je vous demande pardon, ma mère, dit cette pauvre fille, d'avoir tardé si longtemps ; et en disant ces mots, il lui sortit de la bouche deux Roses, deux Perles, et deux gros Diamants. - Que vois-je ? dit sa mère tout étonnée ; je crois qu'il lui sort de la bouche des Perles et des Diamants ; d'où vient cela, ma fille ? (Ce fut là la première fois qu'elle l'appela sa fille.) La pauvre enfant lui raconta naïvement tout ce qui lui était arrivé, non sans jeter une infinité de Diamants. - Vraiment, dit la mère, il faut que j'y envoie ma fille ; tenez, Fanchon, voyez ce qui sort de la bouche de votre sœur quand elle parle ; ne seriez-vous pas bien aise d'avoir le même don ? Vous n'avez qu'à aller puiser de l'eau à la fontaine, et quand une pauvre femme vous demandera à boire, lui en donner bien honnêtement.

“Estus tre bele,” respondis la filino malĝentile, “ke mi iru al la fonto!” [FE 19.1] — “Mi volas ke vi tien iru,” diris la patrino, “kaj iru tuj!” [FE 19.2] La filino iris, sed ĉiam murmurante [FE 19.3]. Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo [FE 19.4]. Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki (tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino) [FE 19.5]. “Ĉu mi venis tien ĉi,” diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, “por doni al vi trinki? [FE 19.6] Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale

por tio, por doni trinki al tiu ĉi sinjorino! [FE 19.7] Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki.” [FE 19.8] — “Vi tute ne estas ĝentila,” diris la feino sen kolero [FE 19.9]. „Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano.” [FE 19.10]

Il me ferait beau voir, répondit la brutale, aller à la fontaine. Je veux que vous y alliez, reprit la mère, et tout à l’heure. Elle y alla, mais toujours en grondant. Elle prit le plus beau Flacon d’argent qui fût dans le logis. Elle ne fut pas plus tôt arrivée à la fontaine qu’elle vit sortir du bois une Dame magnifiquement vêtue qui vint lui demander à boire : c’était la même Fée qui avait apparu à sa sœur mais qui avait pris l’air et les habits d’une Princesse, pour voir jusqu’où irait la malhonnêteté de cette fille. - Est-ce que je suis ici venue, lui dit cette brutale orgueilleuse, pour vous donner à boire, justement j’ai apporté un Flacon d’argent tout exprès pour donner à boire à Madame ! J’en suis d’avis, buvez à même si vous voulez. - Vous n’êtes guère honnête, reprit la Fée, sans se mettre en colère ; hé bien ! puisque vous êtes si peu obligeante, je vous donne pour don qu’à chaque parole que vous direz, il vous sortira de la bouche ou un serpent ou un crapaud.

Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: “Nu, mia filino?” [FE 21.1] — “Jes, patrino”, respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon [FE 21.2]. — “Ho, ĉielo!” ekkriis la patrino, “kion mi vidas? [FE 21.3] Ŝia fratino en ĉio estas kulpa; mi pagos al ŝi por tio ĉi!” [FE 21.4] Kaj ŝi tuj kuris bati ŝin [FE 21.5]. La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro [FE 21.6]. La filo de la reĝo, kiu revenis de ĉaso, ŝin renkontis; kaj, vidante, ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras [FE 21.7]. — „Ho ve, sinjoro, mia patrino forpelis min el la domo“ [FE 21.8].

D’abord que sa mère l’aperçut, elle lui cria : - Hé bien, ma fille ! - Hé bien, ma mère ! lui répondit la brutale, en jetant deux vipères, et deux crapauds. - ô Ciel ! s’écria la mère, que vois-je là ? C’est sa sœur qui en est cause, elle me le payera ; et aussitôt elle courut pour la battre. La pauvre enfant s’enfuit, et alla se sauver dans la Forêt prochaine. Le fils du Roi qui revenait de la chasse la rencontra et la voyant si belle, lui demanda ce qu’elle faisait là toute seule et ce qu’elle avait à pleurer. Hélas ! Monsieur c’est ma mère qui m’a chassée du logis.

La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas [FE 23.1]. Ŝi rakontis al li sian tutan aventuron [FE 23.2]. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, forkondukis ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi [FE 23.3]. Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si; kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23.4].

Le fils du Roi, qui vit sortir de sa bouche cinq ou six Perles, et autant de Diamants, la pria de lui dire d’où cela lui venait. Elle lui conta toute son aventure. Le fils du Roi en devint amoureux, et considérant qu’un tel don valait mieux que tout ce qu’on pouvait donner en mariage à un autre, l’emmena au Palais du Roi son père où il l’épousa. Pour sa sœur elle se fit tant haïr que sa propre mère la chassa de chez elle ; et la malheureuse, après avoir bien couru sans trouver personne qui voulût la recevoir alla mourir au coin d’un bois.

33 [Esperanto traduko mankas]

Moralité

Les Diamants et les pistoles

*Peuvent beaucoup sur les Esprits ;
Cependant les douces paroles
Ont encore plus de force, et sont d'un plus grand prix.*

Autre Moralité

*L'honnêteté coûte des soins,
Elle veut un peu de complaisance,
Mais tôt ou tard elle a sa récompense,
Et souvent dans le temps qu'on y pense le moins.*

9. Proverboj kaj sentencoj

34 Dum en § 18 de la Dua Libro de 1888 enestas listeto de proverboj ("popoldiroj"), io simila mankas en la Ekzercaro. Tamen ĝi jen kaj jen havas fikso-formajn frazojn, kiujn oni povas rigardi proverbojn, sentencojn aŭ aforismojn. Pri kelkaj apenaŭ ekzistas duboj, ekzemple pri la pasero kaj la aglo (malsupre n-ro 11), pri aliaj oni eble povas diskuti, ĉu ili vere estas proverboj (ekzemple n-roj 4, 13). Jen la listo:

1. Al leono ne donu la manon [7.3].
2. Resti kun leono estas danĝere [7.5].
3. Kiu kuraĝas rajdi sur leono? [7.6]
4. Du homoj povas pli multe fari ol unu [12.1].
5. Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj [12.4].
6. Oni ne forgesas facile sian unuan amon [18.19].
7. Morti pro la patrujo estas agrable [20.23].
8. Al homo, pekinta senintence, Dio facile pardonas [22.4].
9. La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas [22.8].
10. Mono havata estas pli grava ol havita [22.12].
11. Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota [22.13].
12. Honesta homo agas honeste [25.11].
13. Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon) [29.7].
14. La korpo estas morta, la animo estas senmorta [31.6].
15. Ŝteliston neniu lasas en sian domon [37.15].
16. Malsaĝulon ĉiu batas [37.20].
17. Timulo timas eĉ sian propran ombron [37.21].
18. Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon [41.18].

B. Analizo laŭ lecionoj

Literaturo (selekto): **Beaufront**, Louis de. Ekzercaro (recueil d'exercices) de la langue internationale "Esperanto". Varsovie: Gins 1896. - **Rhodes**, Joseph. Key to the Ekzercaro. Keighley 1903. - **Albault** 1963. - **Bavant**, Marc. Les bases de l'espéranto d'après le Fundamento. 2002.

Sekvas la originala teksto de la Ekzercaro, tamen **sen** la lecion-finaj **vort-listoj**. Ili estas notitaj en la Dua Parto de la Komentario pri la Vortaro Oficiala. La simbolo „—||—“ **ne** troviĝas en la originala teksto, sed helpas en ĉi tiu komentario por indiki komencon de nova temo.

La samtemajn (interpret-helpajn) ekzercojn el la Dua Libro ni informcele aldonis sub la teksto de la unuopaj lecionoj. La DL-ekzercoj tamen ne nepre estas kompletaj. Pliaj ekzemploj povas esti troveblaj en aliaj frazoj de la pra-Ekzercaro.

EKZERCARO

de la lingvo internacia « Esperanto »

- 1 La supra titolo de FE estas oficiala. FE 1 havas la oficialan titolon „ALFABETO“, FE 2-4 la titolon „Ekzerco de legado“, la ekzercoj pri la feino la oficialan titolon „La feino“ (FE 11) kaj „La feino (Daŭrigo)“ (FE 13, 15, 17, 19, 21), fine „La feino (Fino)“ (FE 23). Ĉiuj aliaj ekzercoj ne havas oficialajn titolojn.

1. La kvazaŭa antaŭparolo de la Ekzercaro

- 2 Kiel jam konstatite, neniuj eldono de la FE havas antaŭparolon. La anonco en la numero de la *Esperantisto* de l' 15a de Sept. 1894 tamen klarigas sian celon kaj bazan strukturon. Al kelkaj teksteroj ni referencas per ciferoj en angulaj krampoj ([1] k.t.p.) kaj komentas ilin malsupre.

„Ĝis nun pri nia lingvo ekzistis nur sekaj gramatikoj kaj vortaroj (krom la lingvo germana, en kiu ekzistas ankaŭ ekzercolibroj n-roj 28 kaj 45 [1]). Kiu volis lerni nian lingvon, devis aŭ simple ellerni la gramatikon kaj sekan amason da vortoj, aŭ preni ian libron, skribitan en nia lingvo, kaj tradukadi ĝin kun helpo de la komuna vortaro: libro por sistema lernado, por sinekzercado — ne ekzistis [2]. Sed nur malmultaj havas tiom da pacienco, por lerni per serĉado de ĉiu vorto en la vortaro; tio ĉi faradis la lernadon de nia lingvo malfacila kaj malagraba (precipe por tiuj personoj, kiuj, ne konante la ĉefajn eŭropajn lingvojn, devis ĉe la lernado serĉi ĉiun vorton en la vortaro). Longe jam niaj amikoj plendis pri tio ĉi, kaj longe jam ni volis eldoni tian libron [3], enhavantan sistemajn ekzercojn [4] kun la traduko de la vortoj sub ĉiu paragrafo; sed du objektoj nin detenadis: a) la minacado de reformoj, kiuj promesadis fari la eldonotan ekzercaron tute sentaŭga tuj post ĝia eliro, kaj b) manko de rimedoj. Nun la Aŭgusta rezultato de la komuna voĉdonado montris, ke reformoj aŭ tute ne estos faritaj, aŭ — se en Novembro venkus la punkto 4 — iaj reformoj estos faritaj ankoraŭ ne tiel baldaŭ. Tial ni jam povis permesi al ni eldoni nian longe jam intencitan libron « Ekzercaro de la lingvo internacia Esperanto ». La mankon de rimedoj ni ankaŭ povis iom venki, ĉar, kiel la legantoj scias, por eldonado de verkoj ekzistas nun « Biblioteko », kiu apogas sin sur abonoj kaj donas la eblon kreadi literaturon per fortoj komunaj; la « Ekzercaron » ni eldonis sub la formo de folioj 5, 6, 7 de la « Biblioteko » [5]. La « Ekzercaro » konsistas el 42 paragrafoj da sistemaj ekzercoj en nia lingvo; sub ĉiu paragrafo estas donitaj tiuj vortoj kaj formoj gramatikaj, kiuj sin trovas en la

paragrafo, kun traduko en la lingvoj franca, angla, germana, rusa kaj pola. La « Ekzercaro » donas al ĉiu komencanto, de kia ajn el la 5 montritaj nacioj li estas, la eblon facile kaj sisteme ellerni nian lingvon. Por ke tiu ĉi « Ekzercaro » estu tute plena, ni intencas post kelkaj monatoj aldoni al ĝi ankoraŭ unu aŭ du foliojn, enhavantajn la plenan tradukon de la frazoj de ĝiaj paragrafoj [6]; tiam ĉiu povos ne sole lerni, sed ankaŭ precize kontroladi sian lernadon, komparante siajn proprajn tradukojn kun la tradukoj presitaj, tradukante el Esperanto en sian lingvon nacian kaj el sia lingvo nacia en Esperanton. Tiam fariĝi perfekta esperantisto estos jam afero tre facila por ĉiu, dum ĝis nun ĉiu, kiu volis fundamente lerni Esperanton, devis necese havi certan dozon da pacienco. La « Ekzercaro », enprenita en la nomaron de la verkoj sub n-ro 72, estas jam dissendita al la mendintoj de la « Biblioteko ». Ni devas tie ĉi rimarki, ke per bedaŭrinda eraro de la Varsovia presejo la « Ekzercaro » ricevis kovrilon grizan anstataŭ verda kaj la surskribo « Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto » [7] mankas sur ĝi. [Esperantisto 1894, p. 130 de 1894-09-15]

3 [1] La fruaj verkoj en Esperanto ricevis kuran numeron en „Nomaro de la verkoj“ („Literaturo de la lingvo internacia Esperanto“). N-ro 28 estas **Klubo Nurnberga**. La Lingvo Internacia. Vollständiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörterbuch zum Gebrauche für Deutsche; n-ro 45 estas **Meier**, Ludwig. Vollständige methodische Grammatik, Formenlehre und Syntax der internationalen Sprache Esperanto.

[2] Tamen jam ekzistis la Dua Libro, pri kiu Z silentas tie ĉi, eble ĉar ĝi en 1894 jam ne plu respegulis aktualan Esperanton („kiam“ anstataŭ „kian“, forfalo de senpersona „ĝi“, „artikolo“ anstataŭ „artikulo“ k.t.p.).

[3] Nome almenaŭ de la komenco de 1893.

[4] Z trifoje en la mallonga teksto substrekas, ke estis planitaj kaj fakte ja temas pri „sistemaj“ ekzercoj. Tio estas ĝusta, kiel montras la analizo de ĝia strukturo.

[5] La t.n. „Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto“ (1894-1898) estis la unua kolekto de esperantaj literaturaj verkoj, presata en *Nürnberg* ĉe W. Tümmel, detalojn vd. EdE; pri tiu uzo de „folio“ vd. LR 26, let. al Th. Thorsteinsson (1906), en BK II.

[6] Tiun intencon Z ne povis realigi. Tamen aperis tradukoj al la franca, verkita de Louis de Beaufront (1896), kaj al la angla, verkita de Joseph Rhodes (1903).¹⁴⁷

[7] Vd. jam ĉe rim. [5].

4 Iuspecan tre mallongan **antaŭparolon** ankaŭ jam enhavas **DL** sub III:

„III. La venontajn apartajn pecojn mi donas, [por] ke la lernantoj povu ripeti praktike la regulojn de l' gramatiko internacia kaj kompreni bone la signifon kaj la uzon de l' sufiksoj kaj prefiksoj.“ [DL 1888]

La Ekzercaro baze havas la saman funkcion kaj rolon.

2. § 1 - ALFABETO

5 § 1 ripetas la presitan alfabeton, troveblan jam en R 0 de la Gramatiko, aldonas manskriban alfabeton kaj la „nomojn de la literoj“. Tekston kaj klarigojn vd. ĉe R 0 FG.

685

¹⁴⁷ Vd. ĉapitrokomence ĉe „literaturo“. Beaufront estas traduko de la 1a eld. 1894, kun komentoj, sed sen FE 1-4. Bazo de Rhodes estas la 2a eld. 1898. Ankaŭ ĝi ne havas FE 1-4.

3. § 2 - Ekzerco de legado

- [1] Al. Bá-lo. Pát-ro. Nú-bo. Cé-lo. Ci-tró-no. Cén-to [FE 2].
[2] Sén-to. Scé-no. Scí-o. Có-lo. Kó-lo. O-fi-cí-ro. Fa-cí-la [FE 2].
[3] Lá-ca. Pa-cú-lo. Ĉar. Ĉe-mí-zo. Ĉi-ká-no. Ĉi-é-lo. Ĉu [FE 2].
[4] Fe-lí-ĉa. Cí-a. Ĉí-a. Pro-cé-so. Sen-ĉé-sa Ec. Eĉ. Ek [FE 2].
[5] Da. Lú-do. Dén-to. Plén-di. El. En. De. Té-ni. Sen [FE 2].
[6] Vé-ro. Fá-li. Fi-dé-la. Trá-fi. Gá-lo. Grán-da. Gén-to [FE 2].
[7] Gíp-so. Gús-to. Lé-gi. Pá-go. Pá-ĝo. Ĝis. Ĝús-ta. Ré-ĝi [FE 2].
[8] Ĝar-dé-no. Lón-ga. Rég-no. Síg-ni. Gvar-dí-o. Lín-gvo [FE 2].
[9] Ĝu-á-do. Há-ro. Hi-rún-do. Há-ki. Ne-hé-la. Pac-hó-ro.
[10] Ses-hó-ra Bat-hú-fo. Hó-ro. Ĥó-ro. Kó-ro. Ĥo-lé-ro [FE 2].
[11] Ĥe-mí-o. I-mí-ti. Fí-lo. Bír-do. Tró-vi. Prin-tém-po [FE 2].
[12] Min. Fo-í-ro. Fe-í-no. I-el. I-am. In. Jam. Ju. Jes [FE 2].
[13] Ju-ris-to. Kra-jó-no. Ma-jés-ta. Tuj. Dó-moj. Ru-í-no [FE 2].
[14] Prúj-no. Ba-lá-i. Pá-laj. De-í-no. Vėj-no. Pe-ré-i [FE 2].
[15] Mál-plej. Jú-s-ta. Ĵus. Ĵé-ti. Ĵa-lú-za. Ĵur-nálo [FE 2].
[16] Má-jo. Bo-ná-ĵo. Ká-po. Ma-kú-lo. Kés-to. Su-ké-ro [FE 2].
[17] Ak-vo. Ko-ké-to. Li-kvó-ro. Pac-ká-po [FE 2].

Literaturo (selekto):

- 6 §§ 2-3 krom la instruoj pri legado ankaŭ donas modelon pri la **divido de vortoj** en la skribo, indikata per streketo (-). La vortinternan dividon klarigis Z en 1893 jene:

LR 66 A (1893):

„Transportante la vortojn el unu linio en la sekvantan, ni ordinare dividas ilin per iliaj partoj gramatikaj, ĉar ĉiu parto gramatika en nia lingvo prezentas apartan vorton. Tiel ni ekzemple dividas: “Esper-anto”, “ricev-ita” k.t.p. Sed tio ĉi tute ne estas deviga regulo; ni faras ĝin nur por ne rompi subite kun la kutimoj de aliaj lingvoj: efektive tiu ĉi maniero havas nenian celon kaj signifon, ĉar la transportado de la vortoj estas afero pure papera, havanta nenion komunan kun la leĝoj de la lingvo; ni konsilas al vi per nenio vin ĝeni en la dividado de la vortoj kaj fari ĝin tute tiel, kiel en la donita okazo estos al vi pli oportune. Eĉ se vi dividos ekzemple “aparteni-s”, ni vidus en tio ĉi nenion malregulan, kvankam la aliaj lingvoj (tute sen ia logika kaŭzo) ne permesas tian dividadon.” [LR 66 A. *Esperantisto*, 1893, p. 32].

- 7 „**Pat-ro**“ (unua linio, tria vorto) ne harmonias kun aliaj similaj ekzemploj kiel ci-tro-no, ci-pre-so k.a. La fakte reganta prononco estas pa-tro.
- 8 Vorto „**De-í-no**“ (FE 2.14) ne ekzistas. Kunmetaĵo de la prepozicio „de“ kun „-ino“ estas sensenca. „De-í-no“ jam troviĝas en la 1a eld. 1894. Same ne helpas la kunteksto:

- [13] Ju-ris-to. Kra-jó-no. Ma-jés-ta. Tuj. Dó-moj. Ru-í-no [FE 2].
[14] Prúj-no. Ba-lá-i. Pá-laj. De-í-no. Vėj-no. Pe-ré-i [FE 2].

Evidente oni tie ĉi lernu la prononcan diferencon inter -i- kaj -j-, pli precize ke oni ne elparolu -j- se du vokaloj staras unu apud la alia (ru-ino, de-ino, pere-i ktp.). Tio ne helpas por decidi, kion Zamenhof celis per „Deino“. Kaj **fe'in'** kaj **Di'** (tiel majuskle) troviĝas en la UV kaj plurloke en FE kaj estas la kutima alternativa klarigo por la „erara“ Deino.

4. § 3 - Ekzerco de legado

- [1] Lá-vi. Le-ví-lo. Pa-ró-li. Mem. Im-plí-ki. Em-ba-rá-so [FE 3].
[2] Nó-mo. In-di-fe-rén-ta. In-ter-na-cí-a. Ol. He-ró-i [FE 3].
[3] He-ro-í-no. Fój-no. Pí-a. Pál-pi. Ri-pé-ti. Ar-bá-ro [FE 3].
[4] Sá-ma. Stá-ri. Si-gé-lo. Sis-té-mo. Pe-sí-lo. Pe-zí-lo [FE 3].

- [5] Sĕn-ti. So-fĭs-mo. Ci-prĕ-so. Ŝi. Pá-ŝo. Stá-lo [FE 3].
 [6] Ŝtá-lo. Vĕs-to. Vĕŝ-to. Dis-ŝĭ-ri. Ŝan-cĕ-li. Ta-pĭ-ŝo [FE 3].
 [7] Te-o-rĭ-o. Pa-tĕn-to. U-tĭ-la. Un-go. Plú-mo [FE 3].
 [8] Tu-múl-to. Plu. Lú-i. Kĭ-u. Ba-lá-u. Tra-ú-lo [FE 3].
 [9] Pe-ré-u. Ne-ú-lo. Fráŭ-lo. Paŭ-lĭ-no [FE 3]. Láŭ-di [FE 3].
 [10] Eŭ-ró-po [FE 3]. Tro-ú-zi. Ho-dĭ-aŭ. Vá-na. Vĕr-so [FE 3].
 [11] Sól-vi. Zór-gi. Ze-nĭ-to. Zo-o-lo-gĭ-o. A-zé-no [FE 3].
 [12] Me-zú-ro. Ná-zo. Tre-zó-ro. Mez-nók-to. Zú-mo [FE 3].
 [13] Sú-mo. Zó-no. Só-no. Pé-zo. Pé-co. Pé-so [FE 3].
 [14] Ne-nĭ-o. A-dĭ-aŭ. Fi-zĭ-ko [FE 3]. Ge-o-gra-fĭ-o [FE 3].
 [15] Spi-rĭ-to. Lip-há-ro. In-dĭg-ni. Ne-nĭ-el [FE 3].
 [16] Spe-gú-lo. Ŝpĭ-no. Né-i. Ré-e. He-ró-o [FE 3].
 [17] Kon-scĭ-i. Tra-e-tĕ-ra. He-ro-é-to. Lú-e [FE 3].
 [18] Mó-le. Pá-le. Tra-í-re. Pa-sĭ-e. Me-tĭ-o [FE 3].
 [19] In-ĝe-ni-é-ro. In-sĕk-to. Re-sér-vi. Re-zér-vi [FE 3].

5. § 4 - Ekzerco de legado

- [1] Citrono. Cento. Sceno. Scio. Balau. Ŝanceli. Neniĕl [FE 4].
 [2] Embaraso. Zoologio. Reservi. Traire. Hodiaŭ. Disŝiri [FE 4].
 [3] Neulo. Majesta. Packapo. Heroino. Pezo. Internacia [FE 4].
 [4] Seshora. Cipreso. Stalo. Feino. Plu. Sukero. Gento [FE 4].
 [5] Indigni. Sigelo. Kraĵono. Ruino. Pesilo. Lipharo. Metio [FE 4].
 [6] Ĝardeno. Sono. Laŭdi. Pale. Facila. Insekto. Kiu [FE 4].
 [7] Zorgi. Cikano. Traetera. Sofismo. Domoj. Spino [FE 4].
 [8] Majo. Signi. Ec. Bonaĵo. Legi. Iel. Juristo [FE 4].
 [9] Ĉielo. Ĥemio [FE 4].

- 9 § 4 ripetas ĉiujn ekzercojn donitajn en §§ 2 kaj 4 en laŭregula kutima skribo, tamen kun majuskla vort-komenco (Citrono. Cento. Sceno. Balau. Ŝanceli ktp.) Krome ĝi aldonas kelkajn pliajn ekzercojn. Jenaj vortoj el FE 4 mankas en UV:

„sofismo“ [FE 4, mankas en UV]

- 10 **ĉikan'** laŭ la UV 1893 estas verbo. En FE 2.3 kaj FE 4.7 ĝi estas uzata kiel substantivo. En § 4 de la 2a eld. de la Ekzercaro de 1898 tamen mankas la cirkumfleksio super la majuskla -C-. En la 1-a eld. de 1894, p. 4 ankoraŭ estis ĝusta Ĉikano (kun permanente aldonita diakrito!). Same en la 3-a eld. 1900 samløke legeblas la ĝusta „Ĉikano“. Vorto „cikano“ ne ekzistas, temas pri „preseraro“. Pri la semantika ŝanĝo de „ĉikani“ vd. BK II.
- 11 Nuntempe ne plu rekte kompreneblaj estas la kunmetaĵoj „**Pac-hór-o**“ kaj „**Pac-ká-po**“. Pri ili vd. la sekción „Religia lingvaĵo en la Fundamento“.

6. § 5 [R 1 – artikolo]

Teksto de FE 1

Patro kaj frato [FE 5.1]. — Leono estas besto [FE 5.2]. — Rozo estas floro kaj kolombo estas birdo [FE 5.3]. — La rozo apartenas al Teodoro [FE 5.4]. — La suno brilas [FE 5.5]. — La patro estas sana [FE 5.6]. — La patro estas tajloro [FE 5.7].

Dua Libro 1888 (selekto)

Amiko venis (= unu el la amikoj venis) [DL 1.1]. — La amiko venis (= la konata amiko, aŭ la amiko, kiun oni atendis) [DL 1.2]. — Donu al mi libron [DL 1.3]. — Donu al mi la libron, kiun vi promesis al mi [DL 1.4]. — Tiu ĉi ĝardeno estas amata loko de birdoj [DL 1.5]. — La fenestro estas amata loko de la birdoj (= niaj birdoj)

[DL 1.6]. — La vorto "la" estas nomata "artikolo" {nun: artikolo}; ĝi estas uzata tian, kian {de 1888: kiam} ni parolas pri objektoj konataj. Anstataŭ "la" oni povas ankaŭ diri "l", se ĝi ne estos malbonsone [DL 1.7]. — Se iu ne komprenas bone la uzon de la artikolo, li povas *tute ĝin ne uzi*, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa [DL 1.8].

7. § 6 [R 1 – artikolo]

Teksto de FE 6

Infano ne estas matura homo [FE 6.1]. — La infano jam ne ploras [FE 6.2]. — La ĉielo estas blua [FE 6.3]. — Kie estas la libro kaj la kraĵono? [FE 6.4] — La libro estas sur la tablo, kaj la kraĵono kuŝas sur la fenestro [FE 6.5]. — Sur la fenestro kuŝas kraĵono kaj plumo [FE 6.6]. — Jen estas pomo [FE 6.7]. — Jen estas la pomo, kiun mi trovis [FE 6.8]. — Sur la tero kuŝas ŝtono [FE 6.9].

8. § 7 [R 2: deklinacio, R 8: prepozico kun nominativo]

Teksto de FE 7

Leono estas forta [FE 7.1]. — La dentoj de leono estas akraj [FE 7.2]. — Al leono ne donu la manon [FE 7.3]. — Mi vidas leonon [FE 7.4]. — Resti kun leono estas danĝere [FE 7.5]. — Kiu kuraĝas rajdi sur leono? [FE 7.6] — Mi parolas pri leono [FE 7.7].

Dua Libro 1888 (selekto)

Jen estas la patro [DL 2.1]. — Mi aŭdas la voĉon de la patro [DL 2.2]. — Mi ricevis donacon de la patro [DL 2.3]. — Diru al la patro, ke mi estas sana [DL 2.4]. — Ni iros al la patro [DL 2.5]. — Karolo aĉetis por sia kuzino horloĝeton kun tri montrantoj [DL 2.6]. — Ni vidas per la okuloj [DL 2.7]. — Rakontu al ni la novaĵojn, kiujn vi aŭdis pri niaj malfeliĉaj fratoj [DL 2.8]. — De kiu vi ĝin aŭdis? [DL 2.9]. — Mi pensas pri la sorto de mia fratino, kaj mi kalkulas jam la minutojn ĝis nia revido [DL 2.10].

9. § 8 [R 2: deklinacio, R 8: prepozico kun nominativo]

Teksto de FE 8

La patro estas bona [FE 8.1]. — Jen kuŝas la ĉapelo de la patro [FE 8.2]. — Diru al la patro, ke mi estas diligenta [FE 8.3]. — Mi amas la patron [FE 8.4]. — Venu kune kun la patro [FE 8.5]. — La filo staras apud la patro [FE 8.6]. — La mano de Johano estas pura [FE 8.7]. — Mi konas Johanon [FE 8.8]. — Ludoviko, donu al mi panon [FE 8.9]. — Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo [FE 8.10]. — Antaŭ la domo staras arbo [FE 8.11]. — La patro estas en la ĉambro [FE 8.12].

Dua Libro 1888 (selekto)

Vd. ĉe FE 7.

10. § 9 [R 2 – substantivo: pluralo, akuzativo]

Teksto de FE 9

La birdoj flugas [FE 9.1]. — La kanto de la birdoj estas agrabla [FE 9.2]. — Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki [FE 9.3]. — La knabo forpelis la birdojn [FE 9.4]. — Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj [FE 9.5]. — Bonaj infanoj lernas diligente [FE 9.6]. — Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron [FE 9.7]. — De la patro mi ricevis libron, kaj de la frato mi ricevis

plumon [FE 9.8]. — Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo [FE 9.9]. — Mi legas libron [FE 9.10]. — La patro ne legas libron, sed li skribas leteron [FE 9.11].

12 FE 9.1 – FE 9.6: R 2.2 – pluralo per –j.

13 FE 9.7 – FE 9.11: R 2.3 – akuzativo per –n.

11. § 10 [R 3 – adjektivo]

Teksto de FE 10

Papero estas blanka [FE 10.1]. — Blanka papero kuŝas sur la tablo [FE 10.2]. — La blanka papero jam ne kuŝas sur la tablo [FE 10.3]. — Jen estas la kajero de la juna fraŭlino [FE 10.4]. — La patro donis al mi dolĉan pomon [FE 10.5]. — Rakontu al mia juna amiko belan historion [FE 10.6]. — Mi ne amas obstinajn homojn [FE 10.7]. — Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro! [FE 10.8] — Bonan matenon! [FE 10.9] — Ĝojan feston! (mi deziras al vi) [FE 10.10]. — Kia ĝoja festo! (estas hodiaŭ) [FE 10.11]. — Sur la ĉielo staras la bela suno [FE 10.12]. — En la tago ni vidas la helan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn [FE 10.13]. — La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka [FE 10.14]. — Lakto estas pli nutra, ol vino [FE 10.15]. — Mi havas pli freŝan panon, ol vi [FE 10.16]. — Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa, ol mia [FE 10.17]. — El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna [FE 10.18]. — Mi estas tiel forta, kiel vi [FE 10.19]. — El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa [FE 10.20].

Dua Libro 1888 (selekto)

Aŭgusto estas bona, Mario estas pli bona ol Aŭgusto, sed Ernestino estas la plej bona el ĉiuj miaj gefratoj [DL 2.11]. — La malgrandan filinon de mia najbaro mi amas ne malpli ol mian propran infanon; hodiaŭ mi aĉetis por ŝi tre belan ludilon [DL 2.12].

12. § 11 La feino

Vd. apartan ĉapitron supre.

13. § 12 [R 4 – numeraloj]

Teksto de FE 12

Du homoj povas pli multe fari ol unu [FE 12.1]. — Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn [FE 12.2]. — Li promenas kun tri hundoj [FE 12.3]. — Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj [FE 12.4]. — El ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj [FE 12.5]. — Kvin kaj sep faras dek du [FE 12.6]. — Dek kaj dek faras dudek [FE 12.7]. — Kvar kaj dek ok faras dudek du [FE 12.8]. — Tridek kaj kvardek kvin faras sepdek kvin [FE 12.9]. — Mil okcent naŭdek tri [FE 12.10]. — Li havas dek unu infanojn [FE 12.11]. — Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj [FE 12.12]. — Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua [FE 12.13]. — La dudeka (tago) de Februaro estas la kvindek-unua tago de la jaro [FE 12.14]. — La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj [FE 12.15]. — Kion Dio kreis en la sesa tago? [FE 12.16] — Kiun daton ni havas hodiaŭ? [FE 12.17] — Hodiaŭ estas la dudek sepa (tago) de Marto [FE 12.18]. — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19].

Dua Libro 1888 (selekto)

Sesdek minutoj faras unu horon, kaj dudek kvar horoj faras unu plentagon [DL 3.1]. — Mi loĝas en la tria etaĝo [DL 3.2]. — Hodiaŭ estas la dek kvina (tago) de Aprilo [DL 3.3]. — La dudeka de Februaro estas la kvindek unua tago de l' jaro [DL 3.4]. — Tiu ĉi rivero havas ducent naŭdek kvar kilometrojn da longo [DL 3.5]. — Georgo Vaŝingtono estis naskita la dudek duan Februaron (aŭ: je l' dudek dua Februaro) de l' jaro mil sepcent tridek dua [DL 3.6]. — Sendu al mi prunte dekduon da forketoj [DL 3.7]. — Tio ĉi okazis antaŭ cent jaroj [DL 3.8]. — Mi aĉetis du ŝrankojn kaj pagis por ili cent frankojn [DL 3.9].

14. § 13 La feino (Daŭrigo)

Vd. apartan ĉapitron supre.

15. § 14 [R 4 – numeraloj: da, -obl, -on, -op, po]

Teksto de FE 14

Mi havas cent pomojn [FE 14.1]. — Mi havas centon da pomoj [FE 14.2]. — Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj [FE 14.3]. — Mi aĉetis dekduon (aŭ dek-duon) da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj [FE 14.4]. —|— Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron [FE 14.5]. — Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon [FE 14.6]. —|— Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. (= tio estas) dek frankojn [FE 14.7]. — Kvinoble sep estas tridek kvin [FE 14.8]. —|— Tri estas duono de ses [FE 14.9]. — Ok estas kvar kvinonoj de dek [FE 14.10]. — Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ da frankoj) [FE 14.11]. — Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro [FE 14.12]. —|— Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope [FE 14.13]. — Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn [FE 14.14]. —|— Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj [FE 14.15]. — Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj [FE 14.16].

Dua Libro 1888 (selekto)

da: Jen estas cento da pomoj [DL 3.10]. — En tiu ĉi lando loĝas tri milionoj kristanoj (aŭ: da kristanoj) [DL 3.11].

-obl: Duobla fadeno estas pli forta ol unuobla [DL 3.12]. — De tiu tago mia amikeco al li duobliĝis [DL 3.13]. — Kvaroble kvin estas dudek [DL 3.14]. — Por via malkonfeso oni duobligos vian punon [DL 15.1].

-on: Duonon de tiu ĉi piro mi manĝis, kvaronon mi donis al mia nevo, kaj la lastan kvaronon mi forĵetis [DL 3.17]. — Dudek unu estas tri seponoj de kvardek naŭ [DL 3.18]. — Mi foriras, kaj mi revenos post kvarono da horo [DL 15.2]. — Ne, sinjoro, vi eraras: nun estas kvarono de la kvara (horo) [DL 16.9].

-op: Kvinope ili tiris la keston kaj tamen ne povis ĝin altiri al la domo [DL 3.19]. — Se vi venos al li triope, li redonos, kion li prenis; ĉar unue li timos vian forton, kaj due li ne povos sin pravigi [DL 3.20]. — Multope ni pli frue finos la laboron, ol unuope [DL 15.3].

po: Al ĉiu el la laborantoj li donis po kvin dolarojn {legu nun: dolaroj, sen -n, vd. FE 14.15 – FE 14.16} [DL 3.21].

14 FE 14.1 – FE 14.4: **da**; detalojn vd. ĉe R 4 kaj en la vortara parto BK II.

- 15 FE 14.7 – FE 14.8: **-obl.**
- 16 FE 14.9 – FE 14.12: **-on.**
- 17 FE 14.13 – FE 14.14: **-op.**
- 18 FE 14.15 – FE 14.16: **po**; detalojn vd. ĉe R 4 kaj en la vortara parto BK II.

16. § 15 La feino (Daŭrigo)

Vd. apartan ĉapitron supre.

17. § 16 [R 5 – personaj pronomoj]

Teksto de FE 16

Mi legas [FE 16.1]. —||— Ci skribas (anstataŭ „ci” oni uzas ordinare „vi”) [FE 16.2]. —||— Li estas knabo, kaj ŝi estas knabino [FE 16.3]. — La tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra [FE 16.4]. —||— Ni estas homoj [FE 16.5]. —||— Vi estas infanoj [FE 16.6]. —||— Ili estas rusoj [FE 16.7]. — Kie estas la knaboj? — Ili estas en la ĝardeno [FE 16.8]. — Kie estas la knabinoj? — Ili ankaŭ estas en la ĝardeno [FE 16.9]. — Kie estas la tranĉiloj? — Ili kuŝas sur la tablo [FE 16.10]. —||— Mi vokas la knabon, kaj li venas [FE 16.11]. — Mi vokas la knabinon, kaj ŝi venas [FE 16.12]. — La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi [FE 16.13]. — La infanoj ploras, ĉar ili volas manĝi [FE 16.14]. — Knabo, vi estas neĝentila [FE 16.15]. — Sinjoro, vi estas neĝentila [FE 16.16]. — Sinjoroj, vi estas neĝentilaj [FE 16.17]. — Mia hundo, vi estas tre fidela [FE 16.18]. —||— Oni diras, ke la vero ĉiam venkas [FE 16.19]. — En la vintro oni hejtas la fornojn [FE 16.20]. — Kiam oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas multajn amikojn [FE 16.21].

Dua Libro 1888 (selekto)

vi (singulare kaj plurale): Mi vin ne komprenas, sinjoro [DL 4.1]. — Vi estas tre obstina, mia amiko [DL 4.2]. — Vi ĉiuj estas tro fieraj [DL 4.3]. — "Vi" ni diras egale al unu persono aŭ objekto kaj al multaj; tio ĉi estas farita pro oportuneco, ĉar, parolante kun iu, ni ofte ne scias, kiel diri al li: "vi" aŭ "ci" ("ci" signifas la duan personon de l' ununombro {singularo}); sed tiu ĉi vorto estas trovata sole en la plena vortaro; en la lingvo mem ĝi preskaŭ nenian {de 1888: neniam} estas uzata [DL 4.4].

li, ŝi, ĝi: La ĉapisto ne venos, ĉar li estas malsana; se venos lia edzino, donu al ŝi mian ĉapelon; se venos lia plej maljuna filo, vi povas ankaŭ ĝin doni al li; sed se venos lia malgranda infano, donu al ĝi nenion [DL 4.5]. — Jen estas la hundo, donu al ĝi oston, kaj voku la katinon, ĝi ricevos pecon da viando [DL 4.6].

oni: Oni diras, ke vi estas riĉa [DL 4.11].

- 19 Pri FE 16.2 (**ci**) vd. R 5 kaj la vortaran parton BK II.
- 20 Pri FE 16.7 – FE 16.10 (**ili** por viroj, virinoj kaj objektoj) vd. R 5 kun la diskuto pri „iŝi” k.t.p.
- 21 FE 16.13: **ĝi** por infanoj. Komparu pli detale DL 4.5.
- 22 La ekzemplo el DL 4.6 (ĝi por hundo kaj katino, do por viraj kaj inaj **bestoj**) forfalis en FE. Ekzemplojn pri „ĝi por bestoj” nur plu aperas en aliaj kunteksto en FE 27, 28 kaj 31, nome „ĝi, la birdo” kaj „ĝi, la muso”. Detalojn vd. BK II.
- 23 FE 16.19 – FE 16.21: **oni** (uzata en singularo kaj pluralo). Vd. BK II, tie ankaŭ LR 106 (1907) pri „onin” kaj „onia”.

18. § 17 La feino (Daŭrigo)

Vd. apartan ĉapitron supre.

19. § 18 [Pronomoj: deklinacio; si, sia]

Teksto de FE 18

Li amas min, sed mi lin ne amas [FE 18.1]. — Mi volis lin bati, sed li forkuris de mi [FE 18.2]. — Diru al mi vian nomon [FE 18.3]. — Ne skribu al mi tiajn longajn leterojn [FE 18.4]. — Venu al mi hodiaŭ vespere [FE 18.5]. — Mi rakontos al vi historion [FE 18.6]. — Ĉu vi diros al mi la veron? [FE 18.7] — La domo apartenas al li [FE 18.8]. —||— Li estas mia onklo, ĉar mia patro estas lia frato [FE 18.9]. — Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn (infanojn) [FE 18.10]. — Montru al ili vian novan veston [FE 18.11]. —||— Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem [FE 18.12]. — Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem [FE 18.13]. — Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas [FE 18.14]. —||— Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [FE 18.15]. — Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian [FE 18.16]. — Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro [FE 18.17]. — La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo [FE 18.18]. — Oni ne forgesas facile sian unuan amon [FE 18.19].

Dua Libro 1888 (selekto)

Mi amas min, ĉar ĉiu amas sin mem [DL 4.7]. — Vi estimas vin mem, sed aliaj vin ne estimas; mia frato estimas sin ne multe, sed aliaj lin tre estimas [DL 4.8]. — Montru al mi vian kalkulon [DL 4.9]. — Ili kondukis la kolegojn en sian loĝejon, anstataŭ iri kun ili en ilian [DL 4.10]. — Kial vi ne respondas al mi, kian {de 1888: kiam} mi vin demandas? [DL 5.1]. — La patro skribas leteron, kaj la infanoj preparas siajn lecionojn [DL 5.2].

a) Superrigardo

24 FE 18.1 – FE.18.8: Deklinaciitaj personaj pronomoj – min, lin, de mi, al mi, al vi, al li.

FE 18.9 – FE.18.11: Posed-indikaj pronomoj – mia, lia, miajn, iliajn, vian.

FE 18.12 – FE 18.14: Refleksivaj personaj pronomoj – min, vin, sin, lin, pri mi, pri si.

FE 18.15 – FE 18.19: Refleksivaj posed-indikaj pronomoj – sia, ilia, mian, vian, sian.

b) Refleksivaj pronomoj („si“, „sia“ k.t.p.)

25 Vd. la komentojn ĉe R 5.

c) „Sinjoro Petro kaj lia edzino“ (FE 18.10)

26 Lau la difino de OA 7 **Petr'** estas „vira antaŭnomo“ (detalojn vd. en BK II). Tio estas ĝusta, kvankam la kombinaĵo de „sinjoro“ kun antaŭnomo (persona nomo) estas nekutima en pluraj lingvoj, inkluzive en la referenc-lingvoj franca, angla kaj germana. Tamen ne temas pri familia nomo, kiun oni atendas en tiuj lingvoj, en kiuj la formo Petro povas esti kaj persona kaj familia nomo. La kombinaĵo tamen estas kutima en la pola de la epoko de Z ĝis niatepe. En la ĝentila alparolo oni uzas la vortojn sinjoro / sinjorino (Pan / Pani) sekvatajn de la persona

(antaŭ)nomo, kp. la titolon "Sinjoro Tadeo"¹⁴⁸ de la verko de Adam Mickiewicz (1834) tradukita al Esperanto de A. Grabowski (1918); "Tadeo" estas la persona, ne la familia nomo, ĉar la nobela protagonisto nomiĝas "Tadeo Soplica" (pole Pan Tadeusz kaj Tadeusz Soplica).

20. § 19 La feino (Daŭrigo)

Vd. apartan ĉapitron supre.

21. § 20 [R 6: -as, -is, -os, -us, -u, -i]

Teksto de FE 20

Nun mi legas, vi legas kaj li legas; ni ĉiuj legas [FE 20.1]. — Vi skribas, kaj la infanoj skribas; ili ĉiuj sidas silente kaj skribas [FE 20.2]. — Hieraŭ mi renkontis vian filon, kaj li ĝentile salutis min [FE 20.3]. — Hodiaŭ estas sabato, kaj morgaŭ estos dimanĉo [FE 20.4]. — Hieraŭ estis vendredo, kaj postmorgaŭ estos lundo [FE 20.5]. — Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron [FE 20.6]. — Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? [FE 20.7] — Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos [FE 20.8]. — Kiam mi venis al li, li dormis; sed mi lin vekis [FE 20.9]. — Se mi estus sana, mi estus feliĉa [FE 20.10]. — Se li scius, ke mi estas tie ĉi, li tuj venus al mi [FE 20.11]. — Se la lernanto scius bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus [FE 20.12]. — Kial vi ne respondas al mi? [FE 20.13] — Ĉu vi estas surda aŭ muta? [FE 20.14] — Iru for! [FE 20.15] — Infano, ne tuŝu la spegulon! [FE 20.16] — Karaj infanoj, estu ĉiam honestaj! [FE 20.17] — Li venu, kaj mi pardonos al li [FE 20.18]. Ordonu al li, ke li ne babilu [FE 20.19]. — Petu ŝin, ke ŝi sendu al mi kandelon [FE 20.20]. — Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa [FE 20.21]. — Ŝi volas danci [FE 20.22]. — Morti pro la patrujo estas agrable [FE 20.23]. — La infano ne ĉesas petoli [FE 20.24].

Dua Libro 1888 (selekto)

-us: Se mi nur estus sana, mi estus tute kontenta [DL 5.12]. — Se ili estus dirintaj la veron, ili ne estus nun punataj; nun ili konfesis ĉion, sed ĝi estis jam tro malfrue [DL 5.13]. Oni diras, ke vi gajnis la grandan gajnon; se tio ĉi estas vera, mi vin gratulas [DL 6.7]. — Li diras, ke mi estus pli feliĉa, se mi estus pli diligenta [DL 6.8]. — La mastro diris, ke mi foriru, ĉar se ne li min elpelos per la hundoj [DL 6.9].

27 FE 20.1 – FE 20.9: -as, -is, -os.

28 FE 20.13 – FE 20.14: ĉu-demando.

29 FE 20.10 – FE 20.12: -us en simplaj formoj. Vd. FG 6ĉ. Daŭrigota en 24.7 – 24.8 kaj 25.1 – 25.3 (-us en kunmetitaj formoj).

30 FE 20.15 – FE 20.21: -u.

31 FE 20.22 – FE 20.24: -i.

22. § 21 La feino (Daŭrigo)

Vd. apartan ĉapitron supre.

23. § 22 [R 6: -anto, -into, -onto, -ato, -ito, -oto]

Teksto de FE 22

685

¹⁴⁸ http://eo.wikisource.org/wiki/Sinjoro_Tadeo/Libro_Unua.

Fluanta akvo estas pli pura, ol akvo staranta senmove [FE 22.1]. — Promenante sur la strato, mi falis [FE 22.2]. — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22.3]. —||— Al homo, pekinta senintence, Dio facile pardonas [FE 22.4]. — Trovinte pomon, mi ĝin manĝis [FE 22.5]. — La falinta homo ne povis sin levi [FE 22.6]. Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem plimulte meritas riproĉon; li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22.7]. —||— La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas [FE 22.8]. —||— Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo [FE 22.9]. — En la lingvo "Esperanto" ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo [FE 22.10]. —||— Aŭgusto estas mia plej amata filo [FE 22.11]. — Mono havata estas pli grava ol havita [FE 22.12]. — Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota [FE 22.13]. — La soldatoj kondukis la arestitojn tra la stratoj [FE 22.14]. — Li venis al mi tute ne atendite [FE 22.15]. — Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto [FE 22.16].

a) Superrigardo

32 FE 22.1 – FE 22.3, FE 22.7: -anta.

FE 22.4 – FE 22.8: -inta.

FE 22.9 – FE 22.10: -onta

FE 22.11 – FE 22.16: -at, -it, -ota.

33 Vd. ĉe R 6 kaj FE 25.

24. § 23 La feino (Fino)

Vd. apartan ĉapitron supre.

25. § 24 [R 6: verboj –as, -is, -os]

Teksto de FE 24

Nun li diras al mi la veron [FE 24.1]. — Hieraŭ li diris al mi la veron [FE 24.2]. — Li ĉiam diradis al mi la veron [FE 24.3]. — Kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (aŭ li estis dirinta al mi la veron) [FE 24.4]. — Li diros al mi la veron [FE 24.5]. — Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron) [FE 24.6]. — Se mi petus lin, li dirus al mi la veron [FE 24.7]. — Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron (aŭ se li estus dirinta al mi la veron) [FE 24.8]. — Kiam mi venos, diru al mi la veron [FE 24.9]. — Kiam mia patro venos, diru al mi antaŭe la veron (aŭ estu dirinta al mi la veron) [FE 24.10]. — Mi volas diri al vi la veron [FE 24.11]. — Mi volas, ke tio, kion mi diris, estu vera (aŭ mi volas esti dirinta la veron) [FE 24.12].

26. § 25 [R 6: -at, -it, -ot; R 7: adverboj]

Teksto de FE 25

Mi estas amata. Mi estis amata. Mi estos amata. Mi estus amata. Estu amata. Esti amata [FE 25.1]. — Vi estas lavita. Vi estis lavita. Vi estos lavita. Vi estus lavita. Estu lavita. Esti lavita [FE 25.2]. — Li estas invitota. Li estis invitota. Li estos invitota. Li estus invitota. Estu invitota. Esti invitota [FE 25.3]. — Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi [FE 25.4]. — La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi [FE 25.5]. — Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita [FE 25.6]. — Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi [FE 25.7]. — Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ [FE 25.8]. — Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus

tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9]. — Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn [FE 25.10]. —||— Honesta homo agas honeste [FE 25.11]. — La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo [FE 25.12]. — Ĉu hodiaŭ estas varme aŭ malvarme? [FE 25.13] —||— Sur la kameno inter du potoj staras fera kaldrono; el la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo; tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton [FE 25.14].

Dua Libro 1888 (selekto)

-at: Tiu ĉi ĝardeno estas amata loko de birdoj [DL 1.5]. — La fenestro estas amata loko de la birdoj (= niaj birdoj) [DL 1.6]. — La vorto "la" estas nomata "artikulo" {nun: artikolo}; ĝi estas uzata tian, kian {de 1888: tiam, kiam} ni parolas pri objektoj konataj [DL 1.7].

a) Superrigardo

34 FE 25.1 - FE 25.10: pasivaj participoj en kontrasta prezento: 1 –at, 2 –it, 3 –ot; 4 ĉiam aĉetata, 5 [unufoje] aĉetita. 6 konstruata – jam longe konstruita, 7 de nun pagata 8 baldaŭ pagita, 9 longe serĉata – lerte kaŝita, 10 konstruota - konstruata .

FE 25.11 - FE 25.13: ĉu adverbo aŭ adjektivo (-e aŭ –a) en kontrasta prezento; senpersona „ĝi“ ne ekzistas.

FE 25.14: prepozicioj havas difinitan sencon kaj regas la nominativon, -n por indiki direkton, kp. la temojn en la sekva FE 26.

b) Ĉu –e aŭ –a-formo? (FE 25.11-13)

35 [Daŭrigota]

27. § 26 [R 13: -n por indiki direkton; R 8, R 14; R 6, interjekcioj]

Teksto de FE 26

Kie vi estas? - Mi estas en la ĝardeno [FE 26.1]. — Kien vi iras? - Mi iras en la ĝardenon [FE 26.2]. — La birdo flugas en la ĉambro (= ĝi estas en la ĉambro kaj flugas en ĝi) [FE 26.3]. — La birdo flugas en la ĉambro (= ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin) [FE 26.4]. — Mi vojaĝas en Hispanujo [FE 26.5]. — Mi vojaĝas en Hispanujon [FE 26.6]. — Mi sidas sur seĝo kaj tenas la piedojn sur benketo [FE 26.7]. — Mi metis la manon sur la tablon [FE 26.8]. — El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun ĝi kuras sub la lito [FE 26.9]. —||— Super la tero sin trovas aero [FE 26.10]. — Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero, sed sen kremo [FE 26.11]. — Mi staras ekster la domo, kaj li estas interne [FE 26.12]. — En la salono estis neniu krom li kaj lia fianĉino [FE 26.13]. — La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj [FE 26.14]. — Mi restas tie ĉi laŭ la ordono de mia estro [FE 26.15]. — Kiam li estis ĉe mi, li staris tutan horon apud la fenestro [FE 26.16]. —||— Li diras, ke mi estas atenta [FE 26.17]. — Li petas, ke mi estu atenta [FE 26.18]. — Kvankam vi estas riĉa, mi dubas, ĉu vi estas feliĉa [FE 26.19]. — Se vi sciis, kiu li estas, vi lin pli estimus [FE 26.20]. — Se li jam venis, petu lin al mi [FE 26.21]. —||— Ho, Dio! kion vi faras! [FE 26.22] — Ha, kiel bele! [FE 26.23] — For de tie ĉi! [FE 26.24] — Fi, kiel abomene! [FE 26.25] — Nu, iru pli rapide! [FE 26.26].

36 FE 25.14, FE 26.1 – FE 26.9 kaj 26.14 klarigas R 13 (aldono de la markilo –n por indiki la direkton).

- 37 FE 25.10 – FE 26.16 klarigas R 8 (prepozicio regas la nominativon) kaj R 14.1 (prepozicio havas difinitan signifon) per la ekzemploj de super, anstataŭ, kun, sen, ekster, en, krom, trans, laŭ, ĉe kontraste al apud. Vd. krome FE 25.14.
- 38 FE 26.17 – FE 26.21 klarigas R 6 (verboj), nome la formojn –u kontraste al –as, –as en **nerekta parolo** kontraste al –us, simpla –is por pasinteco.
- 39 FE 26.22 – FE 26.26 klarigas la tri **interjekciojn** ho!, ha!, nu! kaj montras, ke aliaj „vortoj“ povas esti uzataj en la funkcio de interjekcio (for!, fi!).

28. § 27 [R 1: artikolo, R 16: apostrofado, R 11: kunmetado]

Teksto de FE 27

La artikolo „la” estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj [FE 27.1]. Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj [FE 27.2]. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa [FE 27.3]. —||— Anstataŭ „la” oni povas ankaŭ diri „l” (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo) [FE 27.4]. —||— Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinaro la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5]. Ekzemploj: skribtablo aŭ skribotablo (= tablo, sur kiu oni skribas) [FE 27.6]; internacia (= kiu estas inter diversaj nacioj) [FE 27.7]; tutmonda (= de la tuta mondo) [FE 27.8]; unutaga (= kiu daŭras unu tagon) [FE 27.8]; unuataga (= kiu estas en la unua tago) [FE 27.9]; vaporŝipo (= ŝipo, kiu sin movas per vaporo) [FE 27.10]; matenmanĝi [FE 27.11], tagmanĝi [FE 27.12], vespermanĝi [FE 27.13]; abonpago (= pago por la abono) [FE 27.14].

Superrigardo

- 40 FE 27.1 – FE 27.3: R 1.1 (difinita artikolo „la”).
FE 27.4: R 16.2 („l”).
FE 27.5 – FE 27.14: R 11.

29. § 28 [R 8: prepozicioj, R 13: direkto kun -n, R 12: neado]

Teksto de FE 28

Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon [FE 28.1]. —||— Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj [FE 28.2]. Ekzemple: por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon „n”; sekve: tie (= en tiu loko), tien (= al tiu loko); tiel same ni ankaŭ diras: “la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon”, kaj la vortoj „ĝardenon”, „tablon” staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en” kaj „sur” tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado); en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n” tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne [FE 28.3]. — Morgaŭ mi veturos Parizon (aŭ en Parizon) [FE 28.4]. — Mi restos hodiaŭ dome [FE 28.5]. — Jam estas tempo iri domen [FE 28.6]. — Ni disiĝis kaj iris en diversajn flankojn: mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren [FE 28.7]. — Flanken, sinjoro! [FE 28.8] —||— Mi konas neniu en tiu ĉi urbo [FE 28.9]. — Mi neniel povas kompreni, kion vi parolas [FE 28.10]. — Mi renkontis nek lin, nek lian fraton (aŭ mi ne renkontis lin, nek lian fraton) [FE 28.11].

Superrigardo

41 FE 28.1: Ripeto de R 8.

FE 28.2-8: Klarigo de R 13 (n-markilo, „akuzativo“ de direkto). FE 28.5-8 –en kontraste al –e (resti dome, iri domen).

FE 28.9-11 klarigas R 12 (forfalo de „ne“, se vorto en la frazo mem havas nean signifon).

30. § 29 [R 14 – „je“ aŭ n-markilo]

Teksto de FE 29

Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion „je“ [FE 29.1]. Sed estas bone uzadi la vorton „je“ kiel eble pli malofte [FE 29.2]. Anstataŭ la vorto „je“ ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio [FE 29.3]. — Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ: mi ridas lian naivecon) [FE 29.4]. — Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi (aŭ: la lastan fojon) [FE 29.5]. — Mi veturis du tagojn kaj unu nokton [FE 29.6]. — Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon) [FE 29.7]. — El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29.8]. Ekzemple, ni povas diri “obei al la patro” kaj “obei la patron” (anstataŭ “obei je la patro”) [FE 29.9]. Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas [FE 29.10]; ekzemple: ni povas diri „pardoni al la malamiko“ kaj „pardoni la malamikon“, sed ni devas diri ĉiam „pardoni al la malamiko lian kulpon“ [FE 29.11].

Dua Libro 1888 (selekto)

Ĉu oni povas diri: helpi la fraton (anstataŭ: al la frato), obei la patron (anstataŭ: al la patro), ridi lian malsaĝecon (anstataŭ: je lia malsaĝeco), plori la perdon (anstataŭ: pro la perdo)? Jes; ĉar se la senco ne montras klare, kian prepozicion ni devas uzi, ni ĉian {de 1888: ĉiam} povas uzi la vorton "je", aŭ la akuzativon sen prepozicio [DL 8.7].

42 FE 29.1: Ripeto de R 14 („je“). FE 29.2: Konsilo pri la uzo de „je“.

43 FE 29.3 – FE 29.11: Akuzativo anstataŭ prepozicio.

44 FE 29.10 – FE 29.11: Malpermeso de „duobla akuzativo“.

31. § 30 [Tabelvortoj, korelativoj]

Teksto de FE 30

la, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu [FE 30.1]. — La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2]. Se ni aldonas al ili la literon „k“, ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu [FE 30.3]. Se ni aldonas la literon „t“, ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu [FE 30.4]. Aldonante la literon „ĉ“, ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu [FE 30.5]. Aldonante la prefikson „nen“, ni ricevas vortojn neajn: nenia, nential, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu [FE 30.6]. —||— Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi“, ni ricevas montron pli proksiman [FE 30.7]; ekzemple: tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8]. Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn“, ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn [FE 30.9]. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj

kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (= kaj tiel plu) [FE 30.10].

Dua Libro 1888 (selekto)

Kia granda brulo! kiu brulas? [DL 8.1]. —||— lu venis; demandu lin, kiu li estas, kaj se li estas tiu, kiun mi atendas, sendu lin al mi; neniun alian mi hodiaŭ volas vidi ... ne, mi decidis alie: sendu ĉiun, kiu ajn li estos [DL 8.4]. —||— lan {de DL-Ald 1888: lam} mi venis al li kaj mi trovis lin libera; tio ĉi min forte mirigis, ĉar kian ajn {de 1888: kiam ajn} mi venas, li ĉian {de 1888: ĉiam} sidas super laboro, kaj li nenian {de 1888: neniam} estas libera [DL 8.5]. — Kiaj vortoj povas esti farataj el la vortoj: „ia“, „ial“, „ian“, „ie“, „iel“, „ies“, „io“, „iom“, „iu“? [DL 8.5]. — La kioman fojon li jam ripetis sian rakonton? [DL 8.6]. — ... [DL 8.7]. — Mi volas aŭ ĉion, aŭ nenion [DL 16.22]. — [pliaj trafoj en DL].

a) Superrigardo

Literaturo (selekto): Hoog, Hendrik Arie de. Du Malsanoj en Esperanto. Kia-ismo - Tiom-Kiom-ismo. Hällabrottet 1954 (antaŭe felietone en Dia Regno 1949-1952; reeld. kiel e-libro en 2001).¹⁴⁹

- 45 Eble surprize, la tabelvortoj parte mankas en UV laŭ stato de 1893 / 1905 kaj estis aldonitaj al ĝi nur per OA 7 (1958), parte mankas en la Ekzercaro (detalojn vd. en la vortara parto BK II). Kiel tuto la F-to traktas la tabelvortojn sufiĉe nesisteme:

FE 30.1 nedifinita	FE 30.3 demanda	FE 30.4 montra	FE 30.5 komuna	FE 30.6 nea
ia – UV (2)	kia - UV	tia – UV	ĉia – UV (1)	nenia – UV (1)
ial - UV	kial - UV	tial – UV	ĉial - OA 7	nenial – OA 7
iam – UV (2)	kiam - UV	tiam – UV	ĉiam - UV	neniam – UV
ie - UV	kie - UV	tie – UV	ĉie – UV (1)	nenie – UV (1)
iel - UV	kiel - UV	tiel – UV	ĉiel – UV (1)	neniel – UV
ies - UV	kies - UV (1)	ties – OA 7	ĉies – OA 7	nenies – UV (1)
io - UV	kio - UV (1)	tio – UV	ĉio - UV	nenio – UV (1)
iom - UV	kiom - UV (1)	tiom – UV (1)	ĉiom – OA 7	neniom – OA 7
iu - UV	kiu - UV	tiu – UV	ĉiu – UV (3)	neniu – UV

- (1) Mankas en ĉiuj lecion-finaj vortlistoj en FE.
- (2) Duoble tradukita en la lecion-finaj vortlistoj de FE 28 kaj FE 30.
- (3) UV havas krome: **ĉiu’j** - tous | all | alle | все | wszyscy [UV].

1. En UV mankas **ties** kaj **ĉial**, **ĉies**, **ĉiom** kaj **nenial**, **neniom**. Ilin – kun difinetoj - aldonis al UV nur OA 7 de 1958.

2. Inverse ja troveblas en UV, sed mankas en la lecion-fina vortlisto de FE 30 (aŭ de iu alia leciono) **tiom** kaj **kies**, **kio**, **kiom** kaj **ĉia**, **ĉie**, **ĉiel** kaj **nenia**, **nenie**, **nenies** kaj **nenio**.

3. Fine **ia** kaj **iam** kaj troviĝas en UV kaj estas eĉ dufoje tradukitaj, nome kaj en la lecion-fina vortlisto de FE 28 kaj (troe denove) en tiu de FE 30.

685

¹⁴⁹ Detalojn vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Du_Malsanoj_en_Esperanto.

- 46 La tabelo de korelativoj estas plena kaj **finita**. Aldono de pliaj, kiel ekzemple la korelativan serion „aliu“, „alies“, „aliam“, „aliom“, „alial“, „aliel“ kaj „alie“, proponitan i.a. de G.F. Makkink (1990), estas kontraŭfundamenta pro jenaj kialoj.¹⁵⁰

b) Fermita listo de korelativoj

- 47 1. La fundamenta radiko estas „ali-“ kaj ne „al-“. La Fundamento ne permesas la enkondukon de nova sinonima radiko (A 8). Do la kunmetaĵoj „al-iu“, „al-ies“ k.t.p. ne eblas.
- 48 2. La karakterizaj korelativaj finaĵoj „-u“, „-es“, „-am“ k.t.p. konsistigas specialan kategorion: Ili en la Universala Vortaro ne havas sendependan ekzistadon, sed estas **nedisigeble**, sen streketoj, alforĝitaj al la radikoj de la „korelativa tabelo“. (Krome, FE 30 ankaŭ ne celas memstarigi la prefiksojn „k“, „t“, „ĉ“, „nen“; ĝi celas nur klarigi la konstruprincipon.)
- 49 Zamenhof klarigas tion en **LR 105 (1907) [Pri neniigi]** jene:

LR 105 (1907) [Pri neniigi]: „Ĉiuj vortoj de la „interrilata tabelo“ konsistas el du partoj: a) radiko, b) karakteriza finiĝo (ekzemple ki-al, ki-o, neni-u, neni-a k.t.p.). Ĉar pro diversaj kazoj, pri kiuj mi ne povas nun paroli detale, la karakterizaj finiĝoj de la diritaj vortoj ne povis esti fiksitaj kiel finiĝoj *sendependaj* kaj *ĝeneralaj*, (ekzemple mi estis devigita preni la finiĝojn „e“ kaj „u“, kiuj kiel sendependaj finiĝoj havis jam alian sencon), tial mi devis alkroĉi ilin *nedisigeble* al la radiko. Tiamaniere ilia uzado *sendependa* (ekzemple en formoj „ali-u“, „ali-es“, „kelk-om“, k.t.p., kiuj per gramatika instinkto estis uzataj de kelkaj Esperantistoj) estas kontraŭregula. ...“ [LR 105. Respondo 14, La Revuo, 1907, Aprilo].

- 50 Eble ekzistas rilato inter tiu LR, donita publike en La Revuo, kun **LR 121 B**, donita en privata letero al H. Sentis en 1906 (?):

„Se la afero dependus de mia volo, mi tre volonte akceptus la formojn „alial“, „aliam“ k.t.p., kiuj efektive estas bonaj; sed bedaŭrinde mi ne povas oficiale doni al ili mian permeson, ĉar tio ĉi prezentus ektruŝon de la Fundamento de nia lingvo, kaj ĉia ektruŝo de la Fundamento estus (en la nuna tempo) paŝo tre danĝera.“

Laŭ Z la serion „alial“ k.t.p. do rajtas aldoni al la Fundamento nur la Akademio laŭ A 8 (formoj novaj). Tio estas ĝusta. La Fundamenta „alie“ signifas „alimaniere“ kaj devus laŭ la propono fariĝi „aliel“, dum la proponita „alie“ signifus „aliloke“.

- 51 La specialan - kaj iom duban - kazon de la du finaĵoj „a“ kaj „o“ Z klarigas en la sama LR 105 jene:

„... Sed en tiuj du kolonoj, kiuj finiĝas per „a“ kaj „o“, la finiĝoj estas ne kondiĉe interrilitaj, sed pure adjektivaj kaj pure substantivaj, kvankam ili, pro unuformeco, estas presataj en la vortaro kun kun la radiko (oni povus tamen tre bone presi ilin ankaŭ sen la finiĝo). Tial la forĵetado de la pure substantiva „o“ kaj ĝia anstataŭigado per diversaj aliaj finiĝoj kaj sufiksoj ŝajnas al mi tre bone permesebla. Kompreneble, se tio ĉi donus ion novan, kontraŭan al la ĝisnunaj kutimoj, ni devus tion ĉi eviti, ĉar absoluta kaj laŭlitera reguleco tion ĉi ne permesus; sed, ĉar la vortoj „neniigi“ kaj „neniigi“ estas jam de longa tempo tre bone konataj kaj uzataj de ĉiuj Esperantistoj, tial mi opinias, ke malpermesi la uzadon de tiu ĉi formo estus tute senbezone. [LR 105. Respondo 14, La Revuo, 1907, Aprilo].

- 52 Pro la nedisigebleco de la karakterizaj korelativaj finaĵoj ili ne disponeblas por krei analogajn formojn; praktike do la nedisigebleco signifas la malpermeson de

685

¹⁵⁰ La sekvantaj argumentoj baziĝas sur Velger, Kontribuoj 1999, ĉap. 12.

analogiumado. Sekve, ankaŭ la kunmetaĵoj „ali-u“, „ali-es“, „ali-am“, „ali-om“ k.t.p. ne eblas. Por ili – cetere – ankaŭ ne ekzistas „efektiva neceseco“ en la senco de A 9.3.

c) Ĉu „kiom“ aŭ „kiom da“

53 Vd. pri la temo LR 125 (1890) en la vortara parto, BK II.

d) FE 30.7-8: La vorto „ĉi“

54 FE 30.7 parolas nur pri aldono de „ĉi“ al la „vortoj montraj“ en la senco de FE 30.4 (tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu). Tio estas tro malvasta formulo. Kombinado kun la „vorto komuna“ „ĉio“ (FE 30.5) same estas laŭregula. Temas pri ellaso de la pleonasma „tio“ en „ĉio tio ĉi“ (LR 104 C de 1889). Detalojn vd. en BK II ĉe „ĉi“.

55 Kiel FE 30.7 eksplicitas, „ĉi“ povas stari **antaŭ aŭ post** la montra vorto, kiun ĝi precizigas (tiu ĉi aŭ ĉi tiu, tie ĉi aŭ ĉi tie). Z tamen konsilas, ke „pro belsoneco ordinare estas preferinde starigi “ĉi” *antaŭ* la montra vorto“ (LR 104 B de 1911, detalojn vd. en BK II). Pri la pozicio de „ĉi“ en „ĉi [tio] ĉio“ aŭ „ĉio [tio] ĉi“ mankas rekomendo. Z ĉiukaze ne malkonsilis „ĉio ĉi“ en LR 104 C.

56 Per la sama klarigo de Z ankaŭ eblas pravigi la uzon de „ĉi“ en kombinoj kiel „ĉi domo“ (el „ĉi tiu domo“), „ĉi sube“ („ĉi tie sube“), k.t.p.

57 La ekzemploj en FE 30.7 kaj la aliaj trafoj en la Fundamento montras, ke „ĉi“ **ne** estas ligita al sia korelativo per **streketo**:

LR 104 B: La uzado de streketo inter la montra vorto kaj “ĉi” (t.e. skribado “tiu-ĉi” aŭ “ĉi-tiu” anstataŭ “tiu ĉi” aŭ “ĉi tiu”) ŝajnas al mi [Z] nur simpla erara kutimo, kiun nenio pravigas. [LR 104 B, Respondo 52, *Oficiala Gazeto*, IV, n-ro 1 (34), 1911, p. 2].

58 Se tiu ĉi tamen alprenas finiĝon aŭ alian vorton, oni ligas „ĉi“ per streketo: „ĉi-tiea“ (FE 30.10).

e) FE 30.9: La vorto „ajn“

59 Ankaŭ la teksto de FE 30.9 estas tro malvasta. „ajn“ eblas ne nur „aldoni al la vortoj demandaj“, sed ankaŭ al la vortoj nedifinitaj (io ajn, iu ajn, ie ajn k.t.p.). Vd. en BK II ĉe „ajn“. Tie ankaŭ LR 103 (1913), per kiu Z konfirmis tion.

32. § 31 [R 11: Ŝanĝo de vortkategorioj, kunmetaĵoj]

Teksto de FE 31

Lia kolero longe daŭris [FE 31.1]. — Li estas hodiaŭ en kolera humoro [FE 31.2]. — Li koleras kaj insultas [FE 31.3]. — Li fermis kolere la pordon [FE 31.4]. — Lia filo mortis kaj estas nun malviva [FE 31.5]. — La korpo estas morta, la animo estas senmorta [FE 31.6]. — Li estas morte malsana, li ne vivos pli, ol unu tagon [FE 31.7]. — Li parolas, kaj lia parolo fluas dolĉe kaj agrable [FE 31.8]. — Ni faris la kontrakton ne skribe, sed parole [FE 31.9]. — Li estas bona parolanto [FE 31.10]. — Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo [FE 31.11]. — Li loĝas ekster la urbo [FE 31.12]. — La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona, ol lia interno [FE 31.13]. — Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro [FE 31.14]. — Kia granda brulo! kio brulas? [FE 31.15] — Ligno estas bona brula materialo [FE 31.16]. — La fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas nun brule varmega [FE 31.17]. — Ĉu li donis al vi jesan respondon aŭ nean? [FE 31.18] — Li eliris el la dormoĉambro kaj eniris en la manĝoĉambron [FE 31.19]. — La birdo ne forflugis: ĝi nur deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton [FE 31.20]. — Por ĉiu

aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero [FE 31.21]. — Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni [FE 31.22]. — Li portas rozokoloran superveston kaj teleroforman ĉapelon [FE 31.23]. — En mia skribotablo sin trovas kvar tirkestoĵoj [FE 31.24]. — Liaj lipharoĵoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoĵoj [FE 31.25].

- 60 FE 31.1 – FE 31.4: koler-o, koler-a, koler-as, koler-e.
- 61 FE 31.5 – FE 31.7: mort-is, mort-a, mort-e.
- 62 FE 31.8 – FE 31.10: parol-as, parol-o, parol-e, parol-ant-o.
- 63 FE 31.11 – FE 31.13: ekster-e, ekster-a, ekster, ekster-o.
- 64 FE 31.14: tuj, tuj-a
- 65 FE 31.15 – FE 31.17: brul-o, brul-as, brul-a, brul-e
- 66 FE 31.18: jes-a, ne-a
- 67 FE 31.19 – FE 31.23: el-iris, en-iris, for-flugis, de-flugis, al-flugis, sur-flugis, aldonas, sen-page, tra-legi, tra-lerni, super-vesto
- 68 FE 31.24 – FE 31.25: kunmetaĵoj verbo-substantivo: skrib-o-tablo, tir-kesto; kunmetaĵoj substantivo-substantivo: lip-haroĵoj, vang-haroĵoj.

33. § 32 [R 11: -ist', da]

Teksto de FE 32

Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas baldaŭ teatrajn manierojn [FE 32.1]. —||— Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto [FE 32.2]. — Diplomiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem [FE 32.3]. — La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian fotografiaĵon al mia patro [FE 32.4]. —||— Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino [FE 32.5]. — Alportu al mi metron da nigra drapo (Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo) [FE 32.6]. — Mi aĉetis dekon da ovoĵoj [FE 32.7]. — Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo [FE 32.8]. — Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj [FE 32.9]. — Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn landojn [FE 32.10]. — Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj [FE 32.11]. — Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj [FE 32.12]. — En la ĉambro sidis nur kelke da homoj [FE 32.13]. — „Da” post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro [FE 32.14].

Dua Libro 1888 (selekto)

–ist: Ne ĉiu instruanto estas instruisto [DL 5.22]. — Ŝi estas la unua baletistino en nia teatro [DL 7.13]. — Kia meĥanikisto faris tiun ĉi maŝinon? [DL 7.14]. — Li estas direktoro en fabriko de tabako [DL 7.15]. — [DL 1888]: La politikisto de nia ministro montras, ke li estas bona diplomatiisto [DL 7.16]. — La lavistino alportis mian tolaĵon: ... [DL 9.5]. — La vilaĝano vendis al la komercisto centon da ovoĵoj [DL 9.10]. — Ili venkos, ĉar ilia militistaro estas glora pro sia disciplino [DL 9.14]. — Virino, kiu sin okupas je kudrado, estas nomata kudristino, kaj ŝia edzo estas nomata kudristinedzo [DL 11.4]. — Je l' deka horo vespere la kortisto fermas la pordegon de l' domo [DL 11.6]. — ... la kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon [DL 11.9]. — ... militistaro ... [DL 11.16]. — ... ŝlosilisto [DL 14.14]. — ... verkisto [DL 14.15]. — La apotekisto estas helpanto de l' kuracisto [DL 14.16]. — La

kuiristo malbonigis la tagmanĝon [DL 14.17]. — ... ŝtelisto ... [DL 16.27]. — Mi iris en la teatron, por aŭdi la gloran kantiston [DL 16.32].

da: Tiu ĉi rivero havas ducent naŭdek kvar kilometrojn da longo [DL 3.5]. — Sendu al mi prunte dekduon da forketoj¹⁵¹ [DL 3.7]. — Jen estas centoj da pomoj [DL 3.10]. — En tiu ĉi lando loĝas tri milionoj kristanoj¹⁵² (aŭ: da kristanoj) [DL 3.11]. — [La katino] ricevos pecon da viando [DL 4.6]. — La konstruota domo kostos multon da mono [DL 5.28]. ... peco da cigaro ... [celita: cigar-stumpo] [DL 6.5.2]. — Mi eltrinkis tutan botelon da vino, ... la botelo estis de brando [DL 6.6]. — ... amaso da malnova feraĵo [DL 9.8]. — ... centoj da ovojn [DL 9.10]. — La nombro da kristanoj estas pli granda, ol la nombro da mahometanoj [DL 9.11].

- 69 La lastaj dek lecionoj FE 32 ĝis FE 42 enhavas ĉefe ekzemplojn pri la esperantaj afiksoj (laŭ stato de 1905, do sen –aĉ kaj –ism). Kontraste al DL 1888 **mankas** ekzemploj por **eks-**. Ne estas klare, ĉu temas pri intenca forstreko aŭ – pli probable – pri forgeso (eks- ja troviĝas en UV). Jen la ekzemploj el DL:

Malpacinte kun sia edzino, li eksedziĝis je ŝi [DL 11.15]. — Li estas eksgeneralo; servinte en la militistaro tridek jarojn, li eksiĝis [DL 11.16].

- 70 FE 32.1: Ripeto de FE 31 pri R 11 – teatr-o-amanto, teatr-o, teatr-a; samtempe ekzemplo pri R 15.2.
- 71 FE 32.2 - FE 32.4: La sufikso **–ist’**.
- 72 FE 32.2 estas samtempe ekzerco pri la litero *ĥ*.
- 73 FE 32.3 samtempe estas interpreta regulo: Elinternaĵoj („skemismo“) laŭ R 11 (diplomati-o – diplomati-isto) kaj eleksteraĵoj („naturalismo“) laŭ R 15 (diplomatio – diplomato) estas egale bonaj. Kp. la ĉapitron „Ekzercaro, tekstspecoj“.
- 74 FE 32.5 - FE 32.14: La prepozicio „**da**“ kontraste al „de“. Kp. la vortaran parton BK II.

34. § 33 [R 11: mal-, -in]

Teksto de FE 33

Mia frato ne estas granda, sed li ne estas ankaŭ malgranda: li estas de meza kresko [FE 33.1]. — Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo [FE 33.2]. — Haro estas tre maldika [FE 33.3]. — La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo [FE 33.4]. — Tiu ĉi malfreŝa pano estas malmola, kiel ŝtono [FE 33.5]. — Malbonaj infanoj amas turmenti bestojn [FE 33.6]. — Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita [FE 33.7]. — Ni forte malestimas tiun ĉi malnoblan homon [FE 33.8]. — La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove malfermis [FE 33.9]. — Rekta vojo estas pli mallonga, ol kurba [FE 33.10]. — La tablo staras malrekte kaj kredeble baldaŭ renversiĝos [FE 33.11]. — Li staras supre sur la monto kaj rigardas malsupren sur la kampon [FE 33.12]. — Malamiko venis en nian landon [FE 33.13]. — Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron [FE 33.14]. —||— La edzino de mia patro estas mia patrino kaj la avino de miaj infanoj [FE 33.15]. — Sur la korto staras koko kun tri kokinoj [FE 33.16]. — Mia fratino estas tre bela knabino [FE 33.17]. — Mia onklino estas bona virino [FE 33.18]. — Mi vidis vian avinon kun ŝiaj kvar nepinoj kaj kun mia nevino [FE 33.19]. — Lia duonpatrino estas mia bofratino [FE 33.20]. — Mi havas

685

¹⁵¹ Pri „forketo“ okazis senco-ŝanĝo. „Forko“ en 1888 signifis la kamparan laborilon, „forketo“ la manĝilon. Nuntempe la manĝilo estas „forke“, la kampara laborilo aŭ „forke“ aŭ „forkego“. DL 3.7 celas la manĝilon.

¹⁵² La esprimo „tri milionoj kristanoj“ ne plu estas konsiderata ĝusta. Nun nur „da kristanoj“.

bovon kaj bovinon [FE 33.21]. — La juna vidvino fariĝis denove fianĉino [FE 33.22].

Dua Libro 1888 (selekto)

mal-: La avo ne volis beni sian nepon, sed li ankaŭ lin ne malbenis [DL 14.18]. — Li ne sole ne helpis min en mia laboro, sed li ankoraŭ min malhelpis, kiom li povis [DL 14.19]. — La malsupra parto de tiu ĉi domo estas alie kolorita ol la supra [DL 14.20]. — Ne legu tiel mallaŭte [DL 14.21]. — Malfermu la pordon! [DL 14.22]. Por via malkonfeso oni duobligos vian punon [DL 15.1].

-in: Mia onklino naskis filinon [DL 14.5]. — La bovo jelaboras la kampon, kaj la bovino donas lakton [DL 14.6]. — La patrino de mia patro estas mia avino [DL 14.7].

75 FE 33.1-14: La prefikso mal-

76 FE 33 15-22: La sufikso -in.

35. § 34 [R 11: -il, -ar]

Teksto de FE 34

La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon [FE 34.1]. — Ĉu vi havas korktirilon, por malŝtopi la botelon? [FE 34.2] — Mi volis ŝlosi la pordon, sed mi perdis la ŝlosilon [FE 34.3]. — Ŝi kombas al si la harojn per arĝenta kombilo [FE 34.5]. — En somero ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en vintro ni veturas per glitveturilo [FE 34.6]. — Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti [FE 34.7]. — Per hakilo ni hakas, per segilo ni segas, per fosilo ni fosas, per kudrilo ni kudras, per tondilo ni tondas, per sonorilo ni sonoras, per fajfilo ni fajfas [FE 34.8]. —||— Mia skribilaro konsistas el inkujo, sablujo, kelke da plumoj, kraĵono kaj inksorbilo [FE 34.9]. — Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34.10]. — En varmega tago mi amas promeni en arbaro [FE 34.11]. — Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava [FE 34.12]. — Sur kruta ŝtuparo li levis sin al la tegmento de la domo [FE 34.13]. — Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron [FE 34.14]. — Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj [FE 34.15].

Dua Libro 1888 (selekto)

-il: Donu al mi kudrilon kaj fadenon, ĉar mi volas alkudri butonon al mia surtuto [DL 14.1]. — Rigardu, kiel la aglo batas kun la flugiloj! [DL 14.2]. — Kovriloj povas esti por la vizaĝo (vizaĝkovriloj), por la litoj (litkovriloj) kaj cetere [DL 14.3]. — Prenu la fosilon kaj fosu tombon [DL 14.4].

-ar: Ili venkos, ĉar ilia militistaro estas glora pro sia disciplino [DL 9.14]. — [DL 1888]: La hararo defalis de lia kapo, kaj mi vidis grandan senharaĵon, kiun li pro malvera honto ĉian {de 1888: ĉiam} tiel zorge kaŝis [DL 9.15].

77 FE 34.1-8: La sufikso -il.

78 FE 34.9-15: La sufikso -ar.

36. § 35 [R 11: -aĵ, -ec, „nelogikaj“ esprimoj]

Teksto de FE 35

Vi parolas sensencaĵon, mia amiko [FE 35.1]. — Mi trinkis teon kun kuko kaj konfitaĵo [FE 35.2]. — Akvo estas fluidaĵo [FE 35.3]. — Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon [FE 35.4]. — Sur la tablo staris diversaj sukeraĵoj [FE 35.5]. — En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj [FE 35.6]. — Via vino estas nur ia abomena acidaĵo [FE 35.7]. — La acideco de tiu ĉi vinagro estas tre malforta [FE 35.8]. — Mi manĝis bongustan ovaĵon [FE 35.9]. — Tiu ĉi granda altaĵo ne estas natura monto [FE 35.10]. — La alteco de tiu monto ne estas tre granda [FE 35.11]. — Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo [FE 35.12]. — Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13]. — Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita frandaĵo [FE 35.14]. —||— La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas ankoraŭ pli granda [FE 35.15]. — Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia beleco kaj boneco [FE 35.16]. — Lia heroeco tre plaĉis al mi [FE 35.17]. — La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj [FE 35.18]. — Mi vivas kun li en granda amikeco [FE 35.19].

DL 1888 (selekto)

-aĵ: La lavistino alportis mian tolaĵon: ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj viŝilojn (oni nomas ĝin tolaĵo, kvankam ne ĉio estas farita el tolo) [DL 9.5]. — Anstataŭ vino li enverŝis en mian glason ian malagrablan acidaĵon, kaj tiun ĉi malklaran fluidaĵon li devigis min eltrinki [DL 9.6]. — Ne ĉia belaĵo estas utila [DL 9.7]. — En la angulo kuŝis amaso da malnova feraĵo [DL 9.8].

-ec: Mi miras la saĝecon kaj la honestecon de tiu ĉi homo [DL 11.1]. — La leĝeco de lia faro ne estas por mi malcerta, ĉar ĉio, kion li faras, estas tute leĝa [DL 11.2]. — Vivu la frateco de l' popoloj [DL 11.3].

- 79** FE 35.1 – FE 35.14: -aĵ; aĵ kontraste al la baza vorto FE 35.6, kontraste al -ec FE 35.8, FE 35.11.
- 80** FE 35.15 – FE 35.19: -ec; -ec kontraste al -aĵ FE 35.18.
- 81** FE 35.13, kiu baziĝas sur DL 9.5 (vd. ĉe -aĵ) samtempe estas interpreta regulo: Pli grava ol „seka logikeco“ estas kutimo. Kp. la ĉapitron „Ekzercaro, tekstspecoj“.

37. § 36 [R 11: ge-, bo-, -id, edz]

Teksto de FE 36

Patro kaj patrino kune estas nomataj gepatroj [FE 36.1]. — Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj [FE 36.2]. — Gesinjoroj N. hodiaŭ vespere venos al ni [FE 36.3]. — Mi gratulis telegrafe la junajn geedzojn [FE 36.4]. — La gefianĉoj staris apud la altaro [FE 36.5]. —||— La patro de mia edzino estas mia bopatro, mi estas lia bofilo, kaj mia patro estas la bopatro de mia edzino [FE 36.6]. — Ĉiuj parencoj de mia edzino estas miaj boparencoj, sekve ŝia frato estas mia bofrato, ŝia fratino estas mia bofratino; mia frato kaj fratino (gefratoj) estas la bogefratoj de mia edzino [FE 36.7]. — La edzino de mia nevo kaj la nevino de mia edzino estas miaj bonevinoj [FE 36.8]. — Virino, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino [FE 36.9]. — La doktoredzino A. vizitis hodiaŭ la gedoktorojn P. [FE 36.10]. — Li ne estas lavisto, li estas lavistinedzo [FE 36.11]. —||— La filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj [FE 36.12]. — La hebreaĵoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo [FE 36.13]. — Ĉevalido estas nematura

ĉevalo, kokido — nematura koko, bovido — nematura bovo, birdido — nematura birdo [FE 36.14].

Dua Libro 1888 (selekto)

ge-: [DL 1888]: Promenante sur la aleo, ni renkontis la gedoktorojn N., kiuj invitis nin al la balo, kiun ili hodiaŭ donas; ni iros kun plezuro, ĉar la gemastroj espereble zorgos, ke la gastoj bone pasigu la tempon [DL 12.9]. — Mi veturos hodiaŭ al miaj geonkloj [DL 12.10].

-bo: La parenco de mia edzo aŭ la edzo de mia parenco, estas mia boparenco [DL 10.8]. — La patro de mia edzino estas mia bopatro [DL 10.9]. — Mi estas la bofrato de Heleno, ĉar ŝi estas la edzino de mia frato; ŝi estas mia bofratino [DL 10.10].

edz: La ĉapisto ne venos, ĉar li estas malsana; se venos lia edzino, donu al ŝi mian ĉapelon; ... [DL 4.5]. — La fraŭlino, kiu estis edzinigota de mia frato, mortis, ne fariĝinte ankoraŭ eĉ lia fianĉino [DL 5.35]. — La parenco de mia edzo aŭ la edzo de mia parenco, estas mia boparenco [DL 10.8]. — La patro de mia edzino estas mia bopatro [DL 10.9]. — Mi estas la bofrato de Heleno, ĉar ŝi estas la edzino de mia frato; ŝi estas mia bofratino [DL 10.10]. — Karolo estas mia nepropa filo (aŭ duonfilo), ĉar mi estas la dua edzo de lia patrino [DL 10.11]. — Virino, kiu sin okupas je kudrado, estas nomata kudristino, kaj ŝia edzo estas nomata kudristinedzo [DL 11.4]. — [DL 1888]: Ŝi ne estas doktorino, sed nur doktoredzino [DL 11.5]. — Malpacinte kun sia edzino, li eksedziĝis je ŝi [DL 11.15].

-id: Li pagis por la kokido tiom, kiom oni ne pagas eĉ por koko [DL 12.11]. — La Napoleonidoj esperas ricevi la tronon de Francujo [DL 12.12].

a) Superrigardo

- 82 Temo de FE 36 estas la (origine nur) familio-rilataj elementoj ge-, bo, edz kaj (la jam origine pli vastsenca) id.

FE 36.1-5: La prefikso **ge-**.

FE 36.6-11: La prefikso **bo-**. La radikon **edz'** Z komence opiniis sufikson. Pro tio ĝi laŭsisteme aperas en FE 36 kune kun la aliaj familio-rilataj vortoj („afiksoj“). Detalojn vd. en la vortara parto BK II.

FE 36.12-14: La sufikso **-id**.

b) La prefikso ge- (FE 36.1-5)

Literaturo (selekto): **Göhl** 1932, § 22. **Breuninger**, H. (1967). Ĉu prefikso « ge » antaŭ singularo? En: GER 1967/11, p. 114 (« geedzo = edz(in)o ». Kun respondo de H. Wingen. - **Papp**, K. (1969). "Ge". En: HdE 1969/11 (1474), p. 3 (pri misuzo de ge-). - Avo [= **Venture**, Alec] (1973). Laŭokazaj lingvaj notoj LVII: [...] „gekonatuloj“. En: BritE 1973:795, p. 132. - Avo [= **Venture**, Alec] (1974). Laŭokazaj lingvaj notoj LVIII: [...] „geurbestroj“. En: BritE 1974:800, p. 214-215. - PAG 1985, § 419. - **Bavant** 2002, § 36. - PIV 2005. - PMEG (2013-06) 38.3.6.

- 83 Signifo kaj fakta apliko de ge- estis plurpaŝe ampleksigitaj. El tiu tendenco ekestis jenaj demandoj:

1. Ĉu uzo de ge- ankaŭ por personoj ne starantaj en la sama linio de parenceco (gefiloj – ĉiuj filoj kaj filinoj de unu familio)? – rekte ligita al tiu demando:
2. Ĉu uzo de ge- ankaŭ por pli ol nur unu vira kaj nur unu virina persono (paro) („geamikoj“ – ĉiuj amikoj kaj amikinoj)?
3. Ĉu uzo de ge- ankaŭ por bestoj („gekolomboj“)?
4. Ĉu uzo de ge- ankaŭ kun –aro („gekolegato“)

5. Ĉu uzo de ge- ankaŭ kun o-formo („gepatro“ – aŭ patro aŭ patrino, kp. germane *Elternteil*)?
6. Ĉu uzo de ge- ankaŭ kun i-formo („geeduki“ – kune eduki knabojn kaj knabinojn)?
7. Ĉu uzo de ge- ankaŭ kun aj-formoj („gekaraj“ – karaj amikoj kaj amikinoj)?
8. Krome la ĝenerala demando de sekso-inkluziviga lingvaĵo ankaŭ koncernas ge- (ĉu „esperantistoj“ signifas „esperantistoj kaj esperantistinoj“ aŭ nur [viraj] esperantistoj?).
- 84** La tradukoj en UV kaj la lecion-fina vortlisto en FE 36 estas samsignifaj en ĉiuj kvin referenc-lingvoj: “de ambaŭ seksoj”. La ekzemploj estas *gepatroj* kaj *gemastroj* (vd. BK II). Ili do estas pli malvastaj ol la difino per la referenc-lingvoj, nome signifas „unu patro kaj unu patrino“, „unu mastro kaj unu mastrino“ (geedza paro de mastro kaj mastrino).
- 85** **1.-2.** Tiel ankaŭ estas en DL 1888. La kunteksto montras, ke „geonkloj“ celas ne ĉiujn onklojn kaj onklojn, sed certa geedza paro de geonkloj. Sama klarigo troveblas en la vortaro de Beaufront (vd. BK II). En EG 1 de 1904 estas notita: **gefratoj**, Geschwister (Bruder und Schwester [= frato kaj fratino; ambaŭ singulare]), malgraŭ FE 36.2 (Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj), kiu klare montras, ke ge- povas indiki grupon kun *almenaŭ* unu vira kaj *almenaŭ* unu virina membro. Tiun uzon Z konfirmis en 1907:
- LR 6 A (1907):** La prefikso *ge* rilatas ne sole al *du* personoj, sed ĝi povas rilati ankaŭ al *multaj* personoj; ĝi signifas simple “de ambaŭ seksoj”. Mi persone ĝis nun uzadis tiun ĉi prefikson ĉiam nur por esprimi ian *ambaŭseksan familian tutajon el personoj starantaj en la sama linio de parenceco*; tial mi diradis ekzemple “gepatroj”, “gemastroj”, “gefratoj”, “genepoj”, “gekuzoj”, “getajloroj” (en la senco de “tajloro kaj lia edzino”); sed ni neniam esprimis ekzemple per “getajloroj” la tutan familion de tajloro, ĉar la gefiloj de tajloro ne staras en la sama linio de parenceco kun la tajloro, kaj mi ankaŭ evitadis diri “gesinjoroj” pri personoj, kiuj ne apartenas al unu familio (mi nomadis ilin “sinjoroj kaj sinjorinoj”). Tamen mi konfesas, ke mi havis nenian kaŭzon, por uzadi la prefikson *ge* sole en la dirita maniero. Ĉar en la fundamenta (universala) vortaro de nia lingvo *ge* signifas simple “de ambaŭ seksoj”, kaj ĉar la uzado de la prefikso en tiu ĉi senco neniam donas malkompreniĝon, tial ni povas tre bone uzi tiun ĉi prefikson en *ĉiuj* okazoj, kiam ni parolas pri ambaŭ seksoj. Sekve se al personaro, kiu konsistas el ambaŭ seksoj, iu sin turnas kun la vorto “gesinjoroj”, li faras nenian eraron, kaj eble mi mem ankaŭ de nun iafoje uzados la prefikson en tiu ĉi senco. [LR 6 A, *La Revuo*, 1907, Februaro].
- 86** **3.** Ekzemplo por kombino de ge- kun **bestonomo** ne troveblas ĉe Z. La ekzemplo „gekolomboj“ el PAG 419.1 kaj la tiea rim. I probable sidas malĝuste. Ĝi venas el Valienne, *Ĉu li?* (1908), kaj tie estas karesa metaforo por la maljuna bopatro kaj lia filino, la ĵus resaniĝanta edzino de la protagonisto. Laŭ la referenc-lingva difino (“de ambaŭ seksoj”) kaj la trafa klarigo de Z oni tamen devas konkludi, ke ge- estas 1. kombinebla kun ĉiuj vortoj indikantaj animalojn (homojn kaj bestojn), kiuj havas naturan sekson, se 2. la grupo konsistas el almenaŭ po unu reprezentanto de ambaŭ seksoj. Distinginda de la demando de **laŭnormeco** estas tiu de **bonstileco**. Kun PAG 419 rim. I ni opinias, ke la „tro ofta uzo de ge en la [ĝenerala] senco ne ŝajnas imitinda. Oni povas diri simple samideanoj, kaj, ĉe alparolo, estas pli elegante: sinjorinoj kaj sinjoroj. Anstataŭ gelernantoj, gekursanoj tute sufiĉas: lernantoj, kursanoj. Ankaŭ ĉe bestonomoj estas nenecesa la prefikso. Sufiĉas: bovoj, ĉevaloj. Gekolomboj nur, se temas pri paro.“

- 87 **Objektoj kaj abstraktaĵoj** sen natura sekso povas ricevi *ge-* nur, se ili en fikcio estas personigitaj, animigitaj. Tiel ekz. la planedoj Venuso kaj Marso povas en fabelo formi geedzan paron de „gesteloj“ (fake pli ĝuste *geplanedoj*, *geastroj*).
- 88 **4.** La dua kondiĉo de la difino donita en 3., nome plurindividueco povas esti plenumita aŭ per *j-*markilo (gekolegoj, gekolegoj k.t.p.) aŭ per alia elemento, kiu enhavas la ideon, ke temas pri du aŭ pliaj individuoj, do precipe per **-aro** (gekolegaro, geamikaro k.t.p.). *Stile* – simile kiel ĉe la grupo 3. - *ge-* ofte estas superflua en tiuj okazoj.
- 89 **5.** La formoj *gepatro*, *geedzo* k.t.p. (**kombino de *ge-* kun *o-*formo**) laŭ la difinoj en UV kaj FE 36 estas laŭnorme ĝustaj, sed ili ne havas la sencon celitan de „iu ajn el la individuoj de malsamaj seksoj“. Laŭ R 11 *gepatro* signifas „patro de ambaŭ seksoj“ aŭ „gea patro“, „patro karakterizita de ambaŭ seksoj“, „ambaŭseksa patro“, „hermafrodita patro“ (kio en zoologia senco ĉe homoj ne ekzistas). Tion pretervidas PMEG 38.3.6:

„Tia uzo [*ge-* plus *-o*, *gepatro*, *geedzo*] tamen ne estas normala, kaj multaj opinias ĝin nelogika kaj neregula. Tiaj vortoj estas tamen kompreneblaj kaj povas esti utilaj. La estonteco montros, ĉu ili akceptiĝos“.

La kriterioj „komprenebla“ kaj „utila“ pro siaj mankanta rekta aplikeco (unue necesas difini „kompreneblaj kaj utila por kiu, en rilato al kio?“) estas eksterfundamentaj. Temas pri regulo nova en la senco de A 8, A 10.4, A 9 (efektiva neceseco), kiu celas suplementi R 11. Tio ŝajnas esti nek necesa nek dezirinda.

- 90 **6.** Formoj kiel „geeduki“, „gedormi“, „gebani“ (ekz. laŭ PIV 2005 kaj PAG 419.rim. II) k.t.p. (***ge-* kun *i-*formo**) celas „kune eduki knabojn kaj knabinojn“, „komuna / kuna dormado / banado de geknaboj“. Tion sencon ili ne havas laŭ R 11, ĉar verboj nek havas naturan (aŭ metaforan) sekson, nek ekzistas pluraj seksoj de verboj. Kontraŭ tio, kion asertas PIV kaj PAG, ili estas kontraŭnorma, malĝusta Esperanto.¹⁵³ Laŭregulaj estas la formoj *gee eduki*, *gee dormi*, *gee bani* aŭ *gea edukado* (edukado por ambaŭ seksoj kune), *gea dormado* (kundormado), *gea banado*.
- 91 **7.** Formoj kiel „gekaraj“, *geestimataj* (***ge-* kun *aj-*formo**) esprimu la signifon de „karaj geamikoj“, „estimataj gesinjoroj“ (ne temas en tiu grupo pri la *aj-*derivaĵoj de *oj-*vortoj laŭ la tipo *gepatroj* → *gepatraj admonoj*, *gepatraj rajtoj* k.t.p., kiuj estas laŭregulaj). Same kiel en la grupoj 4 kaj 5 ankaŭ por tiuj formoj mankas almenaŭ du malsamseksaj individuoj animalaj. Adjektivoj estas senseksaj. Laŭfundamentaj formoj estas *gekaruloj* (aŭ simple *karuloj*), *geestimatoj*, *geestiminduloj* (aŭ *estimataj gesinjoroj*, *estimataj sinjorinoj* kaj *sinjoroj*)
- 92 **8.** La temon de sekso-inkluziviga lingvaĵo koncernas LR 6 B. Detalojn vd. ĉe *-in*.

LR 6 B (1902): ... Kvankam la klubo Aŭroro (ĵus fondita en Sofio) havas ankaŭ virinojn, ĝi tamen devas sin nomi ne *geesperantista*, sed simple *esperantista* [LR 6 B, 1902, PVZ VI, 69].

38. § 37 [R 11: **-an, -estr, -ist, -ul**]

Teksto de FE 37

La ŝipanoj devas obei la ŝipestron [FE 37.1]. — Ĉiuj loĝantoj de regno estas regnantoj [FE 37.2]. — Urbanoj estas ordinaraj pli ruzaj, ol vilaĝanoj [FE 37.3]. — La regnestro de nia lando estas bona kaj saĝa reĝo [FE 37.4]. — La Parizanoj

685

¹⁵³ Ankaŭ PMEG nur malrekomendas ilin: „Tia *GE-*vorto montras, ke io koncernas ambaŭ seksojn, ofte kun ŝerca nuanco. Tiaj vortoj estas nenormalaj, kaj oni ne uzu ilin tro multe.“

estas gajaj homoj [FE 37.5]. — Nia provincestro estas severa, sed justa [FE 37.6]. — Nia urbo havas bonajn policianojn, sed ne sufiĉe energian policestron [FE 37.7]. — Luteranoj kaj Kalvinanoj estas kristanoj [FE 37.8]. — Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj [FE 37.9]. — Li estas nelerta kaj naiva provincano [FE 37.10]. — La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj, la loĝantoj de unu urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj [FE 37.11]. — Nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro [FE 37.12]. —||— La botisto faras botojn kaj ŝuojn [FE 37.13]. — La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn [FE 37.14]. — Ŝteliston neniu lasas en sian domon [FE 37.15]. — La kuraĝa maristo dronis en la maro [FE 37.16]. — Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple transskribas paperojn [FE 37.17]. — Ni havas diversajn servantojn: kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston [FE 37.18]. —||— La riĉulo havas multe da mono [FE 37.19]. — Malsaĝulon ĉiu batas [FE 37.20]. — Timulo timas eĉ sian propran ombron [FE 37.21]. — Li estas mensogisto kaj malnoblulo [FE 37.22]. — Preĝu al la Sankta Virgolino [FE 37.23].

Dua Libro 1888 (selekto)

-an: Sinjoro N. estas senatano [DL 9.9]. — La vilaĝano vendis al la komercisto centon da ovojn [DL 9.10]. — La nombro da kristanoj estas pli granda, ol la nombro da mahometanoj [DL 9.11]. — Ne ĉiu rusujano estas ruso [DL 9.12]. — Mi estas via kunlandano, ĉar mi ankaŭ estas italujano [DL 9.13].

-estr: Via regnestro estas reĝo de Prusujo kaj imperiestro de Germanujo [DL 12.4]. — Se la ŝipestro ordonas, la ŝipanoj devas obei [DL 12.5].

-ist: Mi perdis la ŝlosilon de mia ŝranko, kaj mi devis venigi ŝlosiliston [DL 14.14]. — Valter-Skot' estis glora verkisto [DL 14.15]. — La apotekisto estas helpanto de l' kuracisto [DL 14.16]. — La kuiristo malbonigis la tagmanĝon [DL 14.17].

-ul: Mi estis infano, mi estis knabo, mi estis junulo, mi estis viro, - nun mi estas maljunulo [DL 15.12]. — Mi ne volas vane paroli kun tiu ĉi malsaĝulo [DL 15.13].

a) Superrigardo

93 FE 37.1–12: **-an** kaj **-estr**.

FE 37.13–18: **-ist**.

FE 37.19–23: **-ul**.

b) FE 37.19-23: **-ul**

Literaturo (selekto): Boirac, E. (1914). Pri 'nobelo', 'nobelulo', 'najbaro', 'najbarulo', k.t.p. En: Oficiala Gazeto Esperantista 1914:6:09 (64), p. 206-209 („'patr-ulo' ne signifas 'patro', sed 'ulo rilatanta al la patro', ekz. 'filo, kiu kvazaŭ dependas de sia patro, havante per si mem nenian personecon ... aŭ persono elektita de la patro por lin anstataŭi rilate al la filo ...'. Simile reĝulo ne estas reĝo, sed ulo kiu rilatas al la reĝo (france *les gens du roi*)“ ktp.). - Golden, Bernard (1985). La sekso de "ulo". En: AkSt 1985, p. 49-51. **PMEG** (2013) 38.2.30.

94 La ĉefaj ankoraŭ aktualaj demandoj pri **-ul** estas la sekvantaj. Pri historiaj demandoj (*nobelulo*, *reĝulo*) vd. Boirac 1914.

1. ĉu **-ul** por bestoj (*ronĝuloj*)?

2. ĉu **-ul** por aĵoj (*dumastulo*)?

3. ĉu kombinoj de **-ul** kun participoj (*konato* aŭ *konatulo*)?

4. ĉu **-ul** indikas (viran) sekson?

95 UV kaj la lecionfina vortlisto de FE 37 difinas **ul** jene:

qui est caractérisé par telle ou telle qualité, telle façon d'être; ex. bel' beau - bel'ul' bel homme; mal'jun' vieux - mal'jun'ul' vieillard [UV] [qui = kiu, t.e. persono]
qui est caractérisé par telle ou telle qualité; ex. bela beau - belulo bel homme [FE]
|

person noted for...; e. g. avar' covetous - avar'ul' miser, covetous person [UV]
person noted for...; e. g. avara covetous - avarulo miser, covetous person [FE] |

Person, die sich durch... unterscheidet; z. B. jun' jung - jun'ul' Jüngling; avar' geizig - avar'ul' Geizhals [UV]

Person, die sich durch... unterscheidet; z. B. juna jung - junulo Jüngling |

особа отличающаяся даннымъ качествомъ; напр. bel' красивый - bel'ul' красавецъ; avar' скупой - avar'ul' скряга [особа = persono]

особа, отличающаяся даннымъ качествомъ; напр. bela красивый - belulo красавецъ |

człowiek, posiadający dany przymiot; np. riĉ' bogaty - riĉ'ul' bogacz. [UV]

człowiek, posiadający dany przymiot; np. riĉa bogaty - riĉulo bogacz [FE].

[człowiek = homo, viro; persono = osoba]

- 96 UV kaj FE parolas do pri „kiu“, „persono“ kaj „homo“. Tion konfirmas ĉiuj Fundamentaj ekzemploj (detalojn vd. en BK II):

1. kombinoj kun **a-vortoj**: avarulo, belulo, junulo, malĝentilulino, maljunulo, malnoblulo, malsaĝulo, malsanulo (plus malsanulejo, malsanulisto, malsanemulo, malsanulido, malsanulino, malsanulista), riĉulo, sanulo (plus sanulaĵo), virgulino

2. kombinoj kun **o-vortoj**: garantiulo (UV), paculo

3. kombinoj kun **i-vortoj**: timulo, ronĝulo (OA 9, vd. tuj malsupre)

4. kombinoj kun **aliaj vortklasoj**: neulo, tiamulo, tieulo, traulo

- 97 Sed jam la antaŭfundamenta vortaro de Beaufront (1904), kies presprovaĵojn Z aprobis, transiras la difinon de *persono*:

ul, l'être caractérisé par... Ex. : *Bela*, beau, *belulo*, un bel homme, *belulino*, une belle femme; *sankta*, saint; *sanktulo*, un saint; *ringo*, anneau, *ringula*, un anelé.

l'être, do estaĵo, ne nur homo, kaj la ekzemplo *ringula*, un anelé, t.e. arkitektura faka vorto, ekz. en *colonne anelé*, ringula kolono.

- 98 Samsenca, sed eĉ pli klara estas EG 1 (1904) „sub redaktado de Z“, kiu plivastigas la aplikosferon de –ul jene:

-ul-, *Suffix, Person (manchmal auch Tier oder Sache), die sich durch etwas auszeichnet, durch etwas gekennzeichnet ist, z. B.;* **babili**, schwatzen; **babilulo**, Schwätzer; **blinda**, blind; **blindulo**, Blinder; **antaŭulo**, Vorgänger; **arrito**, Gicht; **arritulo**, Gichtkranker; **dumastulo**, Zweimaster; **unuhufulo**, Einhufer; **svingulo**, Schwengel; **ringula**, geringelt.

Person (manchmal auch Tier oder Sache) signifas „persono (foje ankaŭ besto aŭ aĵo)“ kaj donas la ekzemplojn *unuhufulo* por besto kaj *dumastulo*, *ringula* kaj *svingulo* por aĵoj. En aliaj vortaraj artikoloj troveblas pliaj ekzemploj: **trimastulo**, Dreimaster (Schiff) (ĉe *tri*), **unumastulo**, Einmaster (ĉe *unu*) k.t.p.

- 99 Tiu uzo ankaŭ troveblas en la postfundamenta uzo ĉe Z. Jen ekzemplo el Fab IV por la kombinaĵo de –ul kaj aĵo:

„Oni devis efektive havi spertan okulon, por tuj trovi la ŝipon tie ekstere; tio estis belega **trimastulo**; en tiu momento ĝi ĝuste deŝoviĝis de la rifo kaj troviĝis en la distanco de tri ĝis kvar kabloj de la tero ...“

- 100 OA 9 de 2007 oficialigis *ronĝulo* kun jena difino:

ronĝulo. [OA 9] Tia mamula besto kiel ekz. muso, rato, hamstro, kastoro, sciuro aŭ histriko, kiu havas po du grandajn ĉizilformajn tranĉodontojn en la supra kaj malsupra makzeloj. (*Rodentia*.)

Ĝi krome enhavas la (neoficialan) formon *mam'ul* (ankaŭ en la difinoj de *bizono* kaj *tapiro*) kaj *vir-mamulo* en la difino de *prostato*.

39. § 38 [R 11: -et, -eg, -ĉj, -nj]

Teksto de FE 38

Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da seĝetoj [FE 38.1]. — En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur montetoj [FE 38.2]. — Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3]. — En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj [FE 38.4]. — Li sidas apud la tablo kaj dormetas [FE 38.5]. — Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo [FE 38.6]. — Sur lia vizaĝo mi vidis ĝojan rideton [FE 38.7]. —||— Kun bruo oni malfermis la pordegon, kaj la kaleŝo enveturis en la korton [FE 38.8]. Tio ĉi estis jam ne simpla pluvo, sed pluvego [FE 38.9]. — Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari [FE 38.10]. — Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj [FE 38.11]. —||— Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12].

Dua Libro 1888 (selekto)

-et: Starante sur la supro de l' monteto, kiu estas apud nia domo, li vidis la tutan ĉirkaŭaĵon [DL 12.6]. — Sidante sur seĝo, kaj tenante la piedojn sur benketo, li dormetis [DL 12.7]. — Tre plaĉas al mi la blueta fumo de l' cigaro, kiun vi fumas [DL 12.8].

-ĉj, -nj: Petro kaj Mario estas jam sufiĉe maljunaj, tamen oni ankoraŭ vokas ilin Peĉjo kaj Manjo [DL 10.12]. Aŭĝuĉjo kaj Aŭĝunjo estas bonaj infanoj [DL 10.13].

a) Superrigardo

- 101 FE 38.1–7: **-et**.

FE 38.8–11: **-eg**.

FE 38.12: **-ĉj, -nj**.

b) La karesaj sufiksoj -ĉj, -nj (FE 38.12)

Literaturo (selekto): PAG 415. PMEG 41.

- 102 La aplikebleco de la karesaj sufiksoj estis plurfoje pliampleksigita (detalojn vd. en BK II ĉe -ĉj):

UL 1887: „metitaj post la unuaj 2-5 literoj de vira [virina] propra nomo“

UV 1893: „aldonita al la unuaj 1-5 literoj de vira [virina] propra nomo“

FE ¹1884 / ²1898: „aldonita al la unuaj 1-6 literoj de vira [virina] propra nomo“

LR 15 (1906): „... La „ĉj“ kaj „nj“ estas uzataj nur en nomoj kaj en „patro“ kaj „patrino“; en aliaj okazoj oni karesas per „et“.“

- 103** Pro la seslitera „Vilhel-ĉjo“ kaj la lecionfinaj tradukoj en FE 38.12 validas ties pli vasta difino („1-6 literoj“), ĉar ĝi plene inkluzivas la pli striktan de UV.¹⁵⁴
- 104** Kvankam la Z-a respondo pri *paĉjo* kaj *panjo* rekte kontraŭas la vortumon kaj de UV kaj de FE 38, kiuj parolas nur pri „propraj nomoj“, ĝi estas laŭfundamenta. La F-to enhave nenion volis ŝanĝi, sed nur fari el „silenta interkonsento“ eksplicitan, skriban (A 2, A 3.3, vd. la tieajn komentojn). La F-to krome estas nekompleta. Ĝi intence eksplicitas nur la plej gravajn regulojn kaj aspektojn de la lingvo. Apud la skriba interkonsento reprezentita de la F-to pro tio povas ekzisti **silenta antaŭfundamenta** kaj (esceptokaze) silenta postfundamenta **interkonsento**, vd. ĉe A 8. La de Z konstatita aplikeco de la karesaj sufiksoj al *patro* kaj *patrino* baziĝas sur ĝenerala antaŭfundamenta konsento, ke tiaj formoj estas ĝusta Esperanto, interkonsento, kiu tamen ne trovis esprimon en la F-to mem. Sed ili ja troveblas ekz. en la vortaro Esperanto-Franca de Beaufront (*patro*, père, *paĉjo*, petit père) kaj la Z-a EG 1 (1904 - *patro*, Vater, *paĉjo*, Väterchen, Papa[chen]).
- 105** Dube estas, ĉu la karesaj sufiksoj estas aplikeblaj al pliaj familianoj krom *patro* kaj *patrino*, aŭ eble eĉ al personoj ekster la familio. PAG 415 asertas:

„Ĝi estis poste uzata ankaŭ kun la nomo de familianoj. Ekzemple: [...] *fraĉjo* kaj *franjo* (frato kaj fratino), *oĉjo* kaj *onjo* (onklo kaj onklino), *fiĉjo* kaj *finjo* (filo kaj filino). Oni renkontas ankoraŭ: *amiĉjo* kaj *aminjo* (amiko kaj amikino). Oni povus formi: *knaĉjo* kaj *knano*, *amaĉjo* kaj *amano*, *infaĉjo* kaj *infano* ktp., sed tiuj ĉi formoj apenaŭ estas uzataj.“

Simile PMEG 41, kiu havas i.a. *fiĉjo* kaj *finjo*, *fraĉj*, *onjo*, *avinjo*, kaj PIV 2005 (*oĉjo*, *onjo*).

Ĉiuj tri verkoj tamen ne diskutas la konformecon kun la F-to. Ĉar la nomitaj formoj estas kontraŭaj al la eksplicitaj reguloj de UV kaj FE, oni devus pruvi, ke ekestis eksterfundamenta ĝenerala konsento pri la ĝusteco de tiuj formoj. Dum tekstaro.com ekz. tute ne trovas ekzemplon por „oĉjo“, la formo „avinjo“ estas relative ofta en diversaj kaj diversepokaj verkoj. La difino de PIV („metebla post iu el la ses [ĉe –nj- kvin!] unuaj fonemoj de ... vira nomo de parenceco“) pro tio ŝajnas tro vasta (ĉu ia tia uzo ekzistas ankaŭ ĉe *nepo* kaj *nevo*?).

- 106** Aparta demando estas, ĉu oni kontraŭtekste povas plilarĝigi la apliko-kampon de la karesaj sufiksoj ankaŭ al ge-vortoj („gepaĉjoj“, „geavĉjoj“, „geonĉjoj“).
- 107** Pro la principo de klareco (A 3.3) estas dezirinde, ke la Akademio decidu klaran regulon novan laŭ A 8 kun A 10.4, art. 23 Statuto. Laŭ la modelo de Z en LR 15, la Akademio prefere konkrete listigu la unuopajn ĝustajn formojn (ekz. „aplikeblaj ankaŭ al avo / avino, onklo / onklino“) por fini la dubojn pri la rekomendoj de PAG, PMEG, PIV kaj aliaj verkoj, duboj, kiuj nuntempe ekzistas el la perspektivo de la F-to.

40. § 39 [R 11: -iĝ, -ig]

Teksto de FE 39

En la kota vetero mia vesto forte malpuriĝis; tial mi prenis broson kaj purigis la veston [FE 39.1]. — Li paliĝis de timo kaj poste li ruĝiĝis de honto [FE 39.2]. — Li

685

¹⁵⁴ Malĝusta estas ekz. la klarigo en PAG 415: „Per -ĉjo (vira) kaj -njo (virina) oni formas karesajn nomojn. Laŭ la Fundamento kaj la Z-a uzado, ili gluiĝas post unu el la unuaj kvin literoj de respektive vira aŭ virina antaŭnomo.“ Evidente oni pretervidis FE 38.12 kaj konsultis nur UV. Malpreciza estas PMEG 38.2.6: „Kutime oni konservas ĉirkaŭ 1 ĝis 5 literojn.“

fianĉiĝis kun fraŭlino Berto; post tri monatoj estos la edziĝo; la edziĝa soleno estos en la nova preĝejo, kaj la edziĝa festo estos en la domo de liaj estontaj bogepatroj [FE 39.3]. — Tiu ĉi maljunulo tute malsaĝiĝis kaj infaniĝis [FE 39.4]. —||— Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo [FE 39.5]. — Forigu vian fraton, ĉar li malhelpas al ni [FE 39.6]. — Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono [FE 39.7]. — En la printempo la glacio kaj la neĝo fluidiĝas [FE 39.8]. — Venigu la kuraciston, ĉar mi estas malsana [FE 39.9]. — Li venigis al si el Berlino multajn librojn [FE 39.10]. — Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11]. — Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbeto [FE 39.12]. — Sidigu vin (aŭ sidiĝu), sinjoro! [FE 39.13] — La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39.14].

Dua Libro 1888 (selekto)

-iĝ: Pro la multaj malplezuroj li tute griziĝis [DL 13.6]. — La nombro de l' amikoj de l' lingvo internacia pligrandiĝas senĉese [DL 13.7]. — Koniĝinte je tiu ĉi nobla homo, mi tuj amikiĝis je li [DL 13.8]. Falinte de l' supro de l' arbo, li sidiĝis sur la malsupran branĉon [DL 13.14]. — Kristo reviviĝis [DL 15.4]. — Elirinte el varma ĉambro sur la malvarman korton, ŝi malvarmumis kaj malsaniĝis [DL 15.16].

-ig: Ironte promeni, purigu vian veston [DL 13.1]. — La printempa suno fluidigis la neĝon kaj la glacieron [DL 13.2]. — Ŝi volas fianĉigi mian fraton je ŝia fratino [DL 13.3]. — Dormigu la infanon [DL 13.4]. — La mizero kutimigis lin levi sin el la lito tre frue [DL 13.5]. — Por via malkonfeso oni duobligos vian punon [DL 15.1].

-iĝ / -ig kontraste: Mirinda estas la historio de lia familio: la avo mortis je ia nekomprenebla malsano, havante la aĝon de dudek naŭ jaroj; la avino mortigis sin mem en atako de malprudento; la patro elfalis el fenestro de tria etaĝo kaj mortiĝis; la patrino estis mortigita de ŝia propra servantino [DL 13.9]. — Ĉu la kandelo estis estingita, aŭ ĝi estingiĝis mem? [DL 13.10]. — La knabeto estas ruĝigita de sia patrino, aŭ eble li ruĝigis sin mem? [DL 13.11]. — Ne, li ruĝigis de plezuro, ĉar li estas tre ruĝiĝema [DL 13.12]. — Sidigu la fraton, ĉar sidigi sin mem li ne volas; se li ne povas esti sidigata, submovu seĝon sub liajn piedojn, kaj li kontraŭvole sidiĝos [DL 13.13].

108 FE 39.1 – FE 39.4: -iĝ.

109 FE 39.5 – FE 39.6: -ig.

41. § 40 [R 11: -ad, ek-, -ej, -uj, -ing]

Teksto de FE 40

En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn [FE 40.1]. — La pafado daŭris tre longe [FE 40.2]. — Mi eksaltis de surprizo [FE 40.3]. — Mi saltas tre lerte [FE 40.4]. — Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko [FE 40.5]. — Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin [FE 40.6]. — Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis [FE 40.7]. — Li kantas tre belan kanton [FE 40.8]. — La kantado estas agrabla okupo [FE 40.9]. — La diamanto havas belan brilon [FE 40.10]. — Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo [FE 40.11]. —||— La domo, en kiu oni lernas, estas lernejo, kaj la domo, en kiu oni preĝas, estas preĝejo [FE 40.12]. — La kuiristo sidas en la kuirejo [FE 40.13]. — La kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon [FE 40.14]. — Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo; skatoletto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas

cigarujo; tubeto, en kiun oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo [FE 40.15]. —||— Skatolo, en kiu oni tenas plumojn, estas plumujo, kaj bastoneto, sur kiu oni tenas plumon por skribado, estas plumingo [FE 40.16]. — En la kandelingo sidis brulanta kandelo [FE 40.17]. — En la poŝo de mia pantalono mi portas monujon, kaj en la poŝo de mia surtuto mi portas paperujon [FE 40.18]; pli grandan paperujon mi portas sub la brako [FE 40.18]. — La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo [FE 40.19].

Dua Libro 1888 (selekto)

-ad: Lia malbenado ne ĉesas; sed nenia el liaj malbenoj povas min iom malhelpi [DL 9.1]. — La hieraŭa duhora pafado ne estis por mi tiel terura, kiel la du pafoj, kiujn mi aŭdis hodiaŭ [DL 9.2]. — Li kuris sur la kampon [DL 9.3]. — Li kuradis ĝis li falis [DL 9.4].

-ek: Mi ne povis ne ekplori, kian mi vidis, kiel la malriĉegulo petegis la mastron de l' belega palaco pri peco da pano [DL 11.7]. — Aŭdinte tion ĉi, li ekploris [DL 11.12]. — Ekbruligu kandelon, ĉar estas jam mallume [DL 11.13]. — La tondro estis tiel forta, ke la vitroj de niaj fenestroj ekstremis [DL 11.14].

-ej: Estante en la cigarejo, mi aĉetis dek cigarojn; naŭ el ili mi metis en mian cigarujon kaj unu mi metis en mian cigaringon kaj ekfumis [DL 15.9].

-uj: Mi havas en mia plumujo du plumingojn sen plumoj [DL 15.8]. — La arbo, sur kiu kreskas pomoj, estas nomata pomujo aŭ pomarbo; sed ne ĉia fruktujo estas arbo [DL 15.10]. — Hispanujo estas parto de Eŭropo [DL 15.11].

-ing: Varma fumo estas por mi malutila, tial mi ĉian {de 1888: ĉiam} fumas tra cigaringo [DL 14.12]. — Por ne piki la fingron ĉe l' kudrado, oni portas fingringon [DL 14.13]. — Mi havas en mia plumujo du plumingojn sen plumoj [DL 15.8].

a) Superrigardo

110 FE 40.1 - FE 40.11: -ad.

FE 40.7: ek-

FE 40.12 – FE 40.15: -ej

FE 40.15 – FE 40.17: -ing.

FE 40.15 – FE 40.19: -uj,

b) La elemento ek- (FE 40.7)

111 Vd. la vortaran parton BK II kun LR pri sidiĝi / eksidi kaj rekomendo de la Akademio pri „ekde“.

c) La elemento —ing (FE 40.15-17)

112 Vd. la vortaran parton BK II.

d) La elemento –uj (FE 40.15-19)

Literaturo (selekto): PAG 343-344 (1985). - EVE 5.163-164 (2001). – Artikolan literaturon vd. en EBEA (pli ol 200 trafoj).

113 Jam en UL la elemento –uj havis la **tri signifojn** de kesto aŭ entenilo, frukt- aŭ florporta arbo aŭ arbusto kaj lando aŭ provinco. La ekzemploj en UL estas cigarujo, pomujo kaj Turkujo. Jam DL donas sinonimon por la dua signifo: La arbo, sur kiu kreskas pomoj, estas nomata pomujo aŭ pomarbo; ... [DL 15.10]. La trisignifeco jam troveblas en la praesperanto de 1881. Dum la du unuaj signifoj apenaŭ kaŭzis demandojn, la tria signifo de sufikso por krei landnomojn el la nomo de gento (hispano → Hispanujo [DL 15.11]) ĝis niaepoke estas daŭre disputata,

tiel ke ekzistas apenaŭ plu superrigadebla arego da artikoloj kaj reformproponoj pri la temo.

- 114** Pri la signifoj de entenilo kaj fruktarbo aŭ –arbusto vd. BK II. Pri la signifo „lando“ aŭ „provinco“ vd. la sekvan ĉapitron.

42. –uj kiel indikilo por land- aŭ provincnomoj

a) Superrigardo

- 115** La Akademio publikigis konsilojn, rekomendojn aŭ oficialigojn pri aŭ de landnomoj en 1909, 1922, 1974, 1988, 1989, 2003 kaj 2009.

1909: Prokrasto de decido pri la proponita sufikso –i ĝis apero de raporto pri landnomoj.

1922: Malrekomendo de –io por indiki landnomojn anstataŭ per –ujo (prezica teksto ne jam konata) (ne plu valida).

1974: OA 8 – nuligo de la malrekomendo de 1922 kaj oficialigo de kelkaj land- kaj landannomoj.

1988: Unua decido pri Koreo kaj Egipto (ne plu valida).

1989: Unua Rekomendo pri landnomoj (ne plu valida).

2003: Dua decido pri Koreo kaj Egipto.

2009: Dua Rekomendo pri landnomoj.

- 116** **1909:** Prokrasto de decido pri la proponita sufikso –i ĝis apero de raporto pri landnomoj.

„8. Pri la sufikso *i* por la landnomoj.

Kelkaj proponis, kaj jam uzis la sufikson *i* por la landnomoj anstataŭ *uj* kaj *land*.

Oni diras, ke la senco de *uj* estas eble tro vasta, kaj ke tiu sufikso malbone sonas, almenaŭ por francoj.

Sed oni povas respondi: La senco de *uj* ne estas tro vasta, ĉar ĝi ne naskis ian malkompreniĝon. *Uj* ne tiel malbone sonas, por la aliaj lingvanoj ol por la francoj.

Plie, la sufikso *i* havas grandajn malbonaĵojn: ĝi naskus sennombrajn konfuzojn, kun la jam tre multaj ekzistantaj vortoj, kiuj finiĝas per *i*.

Ĝi pligrandigus la nombron de la akcentitaj *i*, kiujn, ne sole pro klareco, sed ankaŭ pro belsoneco, oni devas prefere malplioftigi.

Cetere, la tuta demando de la landnomoj bezonas apartan ekzamenon, ĝi estis jam esplorita de speciala komisiono, kaj ni povos prokrasti decidon, ĝis tiu komisiono estos liverinta sian raporton.” [OG 1910, p. 321-322]

Ĝis 1909-08-15 nur unu Akademiano „akcept[is], ke la Akademio konsilu la provan uzadon de la sekvantaj neologismoj“ [-i por landnomoj].

- 117** **1922:** Asertita malrekomendo de –io (prezica teksto petita).

118 **1974 (OA 8): C/ Landnomoj**

Konsciante, ke la landnomoj, tiuj tre apartaj propraj nomoj plej ofte jam monde internaciaj, apartenas al du kategorioj de formiĝado: Lando/landanoj kaj homoj/homujo, la Akademio decidis oficialigi kiel ekzemplojn malgrandan liston de radikoj, kiuj estas sendube internaciaj, tradiciaj en nia lingvo, jam akceptitaj de la granda plimulto. De la unua kategorio oni derivas la nomon de la landano per la sufikso -ano; de la dua kategorio oni derivas la nomon de la lando per diversaj rimedoj laŭ la monda internacieco (sufikso -io, vorto lando, ktp.) aŭ per la Fundamenta sufikso -ujo.

1. Oficialigitaj landnomoj

Alĝerio	Islando	Pakistano
Aŭstralio	Kanado	Panamo
Birmo	Kostariko	Paragvajo
Bolivio	Kubo	Peruo
Brazilo	Libano	Polinezio
Ekvadoro	Liberio	Sirio
Gvatemalo	Libio	Sudano
Gvineo	Maroko	Tunizio
Irako	Meksiko	Urugvajo
Irano	Nederlando	Venezuelo
Irlando	Nikaragvo	

2. Oficialigitaj landano-nomoj

albano
arabo
armeno
belgo
bulgaro
dano
estono
etiopo
greko
hungaro
italo
latvo
norvego
rumano
svedo

3. La sufikso -io

La Akademio, konsiderante, ke la Lingva Komitato, kiam ĝi en 1922 malkonsilis la enkondukon de la sufikso -io por formi landnomojn, bazis sian decidon sur la konstato de la tiama uzado;

konstatante, ke nuntempe, malgraŭ tiu oficiala malkonsilo, la uzado de tiu sufikso -io ne malkreskis, sed male disvastiĝis;

memorante la vojon, indikitan de Zamenhof en la Antaŭparolo al la Fundamento por ebligi senrompan evoluon de la lingvo, kaj konsistantan en la propono de formo nova, uzebla paralele kun la malnova formo;

opinias, ke la okazo de la sufikso -io apud la Fundamenta -ujo por ricevi pli internaciajn formojn de landnomoj estas ĝusta apliko de tiu Zamenhofa metodo;

kaj, nuligante la antaŭan malkonsilon de la Lingva Komitato, sed ne ŝanĝante ĝin al rekomendo, lasas al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo.

RIM. Pri tiu teksto, el 43 membroj de la Akademio voĉdonis 41; ne voĉdonis 2; la demandon pri -io jesis 33 kolegoj, neis 5, sin detenis 3.

119 1974: Neoficiala (Aktoj II – Parto Neoficiala)

Fine de plurjara studado pri la landnomoj mi [André Albault] alvenis al kelkaj konkludoj, kiujn mi koncize prezentas ĉi-sube. Tiuj studoj baziĝas sur historia studo de la demando — ĉefe en niaj institucioj — kaj sur kompara studo el 33 lingvoj; el ili 13 estas la 13 plej parolataj en la mondo kaj inkluzivas la ĉinan, la araban, la indonezian, la hindian, la bengalan kaj la japanan; ties parolantoj prezentas pli ol la duonon de la homaro. La 20 aliaj estas ĉefe la aliaj precipaj lingvoj de Eŭropo.

1. Ne eblas starigi “universalan” sistemon, en kiu ĉiuj landnomoj estus derivataj de la landano-nomoj (la primitiva Zamenhofa sistemo de “Holandujo”, “Amerikujo” ktp jam de longe forgesiĝis), nek inverse, kvankam sufiĉe multaj, ĉefe aziaj, lingvoj perfekte praktikas tiun duan sistemon (“itali-homoj”, “rumani-homoj” ktp). Ne eblas, ĉar la internacia praktiko — al kiu aliĝis la Esperanta tradicio — distingas du procedojn de nomado: “lando/landanoj” kaj “homoj/homujo”.

2. La nuna Esperanta sistemo komence estis kompromiso, starigita sub la influo de L. de Beaufront, inter la primitiva Zamenhofa sistemo kaj la internacia duproceda sistemo. Bedaŭrinde tiu kompromiso baziĝis sur etnologia principo: raso donas sian nomon al lando helpe de la sufikso -uj. Sed, kiel atentigis Grosjean-Maupin en memorinda Akademia memuaro, “raso estas mito”. Evidentas, ke la internacia lingvo devas apogiĝi sur lingvaj faktoj, t.e. sur internacieco laŭ la paragrafo 15a de sia Fundamento, kaj ne sur rapide evoluanta mito. Cetere la praktiko kondukis al iom-post-ioma malobservo de tiu etnologia principo fremda al la Fundamento; efektive la ĝermo de tiu malobservo estis jam la dekomenca neapliko por la kelkaj landnomoj, kiuj internacie finiĝis per -land: Holando, Islando ktp (anstataŭ la holandoj, islandoj ktp). Per tiu etnologia principo ni konstruis apartan sistemon, ja duprocedan kiel la internacia, sed propran nur al Esperanto: tion farante, ni malobservis la paragrafon 15an kaj la internaciecon.

3. El la duopo “landnomo/landano-nomo”, la landnomo ĉiam estas la pli internacia. Ekz-e pluraj aziaj lingvoj uzas nur derivaĵojn por nomi la landanon, sed ili konservas senŝanĝa la internacian nomon de la lando: Itali-, Bulgari- ktp. Pli ĝenerale la sufiksoj respondantaj al la Esperanta -an- estas tre diversformaj laŭ la lingvoj, dum la sufikso respondanta al la Fundamenta -uj- ekzistas en ĉiuj lingvoj tra la mondo sub la formo -i-. La fakto, ke tiu internacia -i- ŝtoniĝis en aziaj lingvoj,

kiuj sisteme uzas derivitajn landano-nomojn, ne esence modifas niajn konsiderojn; la landnomoj finiĝantaj per -i- estas monde internaciaj, monde konataj.

4. La tiel nomataj “Akademiaj kondamnoj” de la tiam nova sufikso -io fakte estas bazitaj sur tendenca interpreto de pli frua Akademia teksto, publikigita sub Boirac. Se tiu erara interpreto devus esti ĝusta, tio signifus, ke estas same kondamnindaj diversaj aliaj sufiksoj, i.a. la sufikso -enda, intertempe oficialigita de la Akademio.

5. La sufikso -io- estas plene konforma al la Esperanta strukturo. La fakto, ke ĝi duobligas la sufikson -ujo, neniel faras ĝin kontraŭfundamenta, ne pli ol la sufiksa uzado de -arbo estas kontraŭfundamenta, kvankam ĝi tiel same duobligas tiun saman sufikson. Cetere la Antaŭparolo de la Fundamento klare aludas la metodon de “neologismoj kaj arkaismoj”, per kiu Zamenhof pli ol unu fojon montris, kiel la lingvo povas evolui: la historio demonstras, ke la Esperanto-komunumo ne trouzis tiun metodon! La kazo eĉ estas unika, kaj temas pri sufikso monde konata ekster Esperanto.

6. La sufikso -io nuntempe estas akceptita jam delonge de ĉiuj esperantologoj, almenaŭ por akcesoraj uzoj, cetere plene konformaj al la internacieco, ĉe landnomoj derivitaj ne de landano-nomoj, sed de aliaj nocioj: Alĝerio, Liberio, Kolombio ktp. Al tiuj ĉi ni aldonu nomojn derivitajn, sed nur el etimologia vidpunkto: Mezopotamio, Indonezio, Aŭstrio ktp.

7. La sufikso -io, en pli ĝenerala uzo (Francio, Germanio ktp), ekuzata en Esperanto jam ĉirkaŭ 1900, do jam antaŭ 70 jaroj, estas abunde uzata de pli ol 50 jaroj en ĉiaj Esperantistaj medioj. Certe, multaj aliaj detenas sin de ties uzado pro la konataj “kondamnoj”. Kaj tio estas sekuriga pruvo pri la morala potenco de la Akademio. Aliflanke la persisto de multaj per si mem dubigas pri la praveco de la iam faritaj “kondamnoj”. Efektive, apud multaj individuoj kaj redakcioj, almenaŭ unu internacia organizo, sekvante Hodler, la fondinton de UEA, daŭre uzas nur ĝin kaj rigardas -uj- kiel arkaisman por landnomoj. Evidentas, ke vojo al unueco de nia nomenklaturado povos pasi nur tra unu pordo—levo de la kondamno.

8. Tamen ekzistas diversaj troigoj en la uzado de -io fare de ĝiaj subtenantoj, kaj tiuj troigoj ne estas la samaj ĉe ĉiuj. Estas konsilinde eviti ilin, se ni volas atingi unuecon. Bazo de unueco, post fiasko de la diversaj sistemoj, povas esti nur la monda internacieco, alidire la apliko de la paragrafo 15a! La monda internacieco de tiuj propraj nomoj prezentas rimarkindan unuecon.

Mallonge, la aluditaj troigoj estas ĉefe:

– tendenco krei novan “universalan” sistemon per -i-derivado; ĝi fakte arbitre transigas nomon de unu klaso al alia (ekz-e nepaloj, kanadoj loĝantaj en Nepalo, Kanadio ktp);

– tendenco krei purajn esperantismojn por distingi landnomojn disde samnomaj geografiaj nocioj (ekz-e Panamio, Meksikio anstataŭ Panamo, Meksiko ktp). Landnomoj estas internacie pli gravaj: oni prefere distingu laŭ la maniero proponitaj de la naciaj lingvoj mem (ekz-e per Meksikurbo ktp).

– ignoro de aliaj internaciaj formoj ol -i. Tiuj uzas derivadon ĉefe per -land- aŭ per -istan-. Estas notinde, ke Zamenhof almenaŭ unu fojon uzis derivadon per -mark, ĉe Finn-marko (norvega provinco).

9. Por reatingi unuecon en la nomenklaturado, mi opinias, ke ni devas en unua stadio fari kelkajn paŝojn:

I. –

a) agnoski kiel definitivajn fakte tre multajn radikojn aŭ de landnomoj aŭ de landano-nomoj, ĉar ili estas konformaj kaj al nia tradicio kaj al la internacieco. Mi

volonte aldonus al ili pro simpleco de la prezento tiujn formojn, kiuj estas uzataj nur de parto el la esperantistaro (tiajn mi signas per asterisko), sed estas same absolute internaciaj. Feliĉe tiuj agnoskindaj formoj estas la granda plimulto.

b) atentigi pri kelkaj formoj, kies klasigo estas duba;

c) atentigi pri kelkaj formoj, kiuj ne estis plej taŭge elektitaj laŭ la vidpunkto de la internacieco: plej tipa estas litov, kies internacia formo lituan ekzistas, eĉ en la lituana lingvo sub formo de derivaĵoj ("lituan ísta", "lituan ístika", ktp).

II. –

a) Forigi la kondamnon de la internacia -i-, tamen admonante al uzado konforma al la internacieco: cetere nenion alian oni faras jam nun, kiam oni preferas Skotlando al Skotujo.

b) konsili liberecon de uzado koncerne al la dubaj formoj, tiel ke iom post iom pli taŭgaj formoj enuziĝu, kaj ke Esperanto fariĝu en tiu punkto almenaŭ tiel same internacia, kiel neeŭropaj lingvoj. Almenaŭ, se la esperantistaro tion deziras.

c) proponi provizorajn sed konkretajn formojn por tiuj nomoj, kiuj ĝis nun estas dubaj. Tiuj provizoraj formoj povus esti formitaj aŭ per -land- aŭ eĉ per -uj-. Ekz-e Britio estas nura esperantismo, dum ekzistas tre internacia formo (Britanio); Britujo aŭ Britlando povus tuj esti uzataj de tiuj, kiuj hezitus ekuzi novan formon.

La subskribinto intencas publikigi libron pri tiu temo; ĝi revivigos la pensojn kaj farojn de eminentaj personoj, kiel de Beaufront, Boirac, Cart, Hodler, Privat kaj multaj aliaj, ne parolante pri Zamenhof mem. Ĝi ĵetos fortan lumon sur forgesitajn aŭ ne tre konatajn faktojn, kaj proponos solvon al nia problemo, kune kun nova filozofio pri la Esperanta movado.

D-ro A. Albault¹⁵⁵

120 1988: Unua decido pri Koreo kaj Egipto (ne plu valida).

Vd. ĉe R 15.

121 1989: Unua Rekomendo pri landnomoj (ne plu valida)

Listo de Normaj Landnomoj

Tiu listo limiĝas al la geografiaj radikoj, kiuj estas necesaj por ke ĉiu povu kunmeti la tradukon de la oficialaj ŝtatnomoj de la Ŝtatoj-Membroj de la U.N. Tiu ĉi monda institucio efektive eldonis tian liston entenantan la oficialajn nomojn, kiujn la ŝtatoj donis al si mem: tiujn nomojn ili donis al la tri lingvoj angla, Franca kaj Hispana.

Tio signifas, ke en tiu listo ni ne donas kompleksajn nomojn de ŝtatoj; ekz-e, tie oni ne trovos Germana D.R. sed nur German-ujo / Germanio. Aliparte estas ŝtatoj, kiuj trudis apartaĵojn de sia oficiala nomo al la internacia publiko. Tio klarigas la motivon, pro kiu ni listigis landojn ofte nomatajn Britujo / Britio, Salvadoro kaj Lanko sub jenaj formoj: (Grand-)Britujo / (Grand-)Britio, (El-)Salvadoro kaj (Sri-)Lanko. La interkrampaĵon oni uzos aŭ ne uzos laŭ la grado de oficialeco, kiun oni deziras doni al la teksto. Ĉiuokaze estos ĉiam rekomendinde formi simplajn ano-nomojn: Britoj, Salvadoranoj kaj Lankanoj.

La landnomoj apartenas al du klasoj: la ĉefa klaso estas tiu de Land-o -- Land-anoj; ĝi entenas la grandan plimulton da nomoj. La dua klaso estas akcesora kaj koncernas nur malplimulton da nomoj; ĝi estas la klaso de Hom-oj -- Hom-ujo / Hom-io / Hom-lando.

685

¹⁵⁵ Daŭrigon vd. en <http://www.akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj2/landnomoj.html>.

Fine, ni deklaru, ke tiu listo ne estis establita "ideale". Ni devis kalkuli kun la kutimoj, kiuj establiĝis dum nia centjara historio. Apartan problemon kreis al ni tiaj landnomoj, kiuj en la uzado apartenis al du klasoj; la Akademio devis tranĉi la Gordian nodon, ne profite al unu nacio, sed ja por la monda profito de la tuta lingvo. Ĝi pardonpetas apud tiuj, kiuj -- erare laŭ ni -- sentus sin vunditaj de la faritaj elektoj. Ni nur agis por la bono de la tuta lingvo.

Mallongigoj:

(FdE): la radiko aperas en la Fundamento de Esperanto.

(8): la radiko aperas en la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro.

*) La Letero de l' Akademio, n-ro 7, Aprilo - Majo - Junio 1989.

I. UNUA KLASO DE LANDNOMOJ

(Lando -- Landanoj)

Tiu klaso de neŭtrale geografiaj nomoj (Zamenhof), de kiu oni povas unuece formi la nomon de anoj per la sufikso -anoj, konsistigas la ĉefan klason de landnomoj en Esperanto: ĝi entenas la plej multajn el ili (ĉ. 130 el 165). Plie ĝi obeas al la konstato de Boirac, unua Prezidanto de la Akademio: "La ĉefa kaj plej ĝenerala maniero estas nomi primitive la landon kaj devenigi la nomon de ĝiaj loĝantoj per la sufikso -an ...; la alia maniero... estas dua, akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda" 1.

Afriko (8), Alĝerio (8), Andoro, Angolo, Antigvo, Argentino, Aŭstralio (8), Aŭstrio [2], Bahamoj, Bangladeŝo, Barbado, Barbudo, Barejno, Belizo, Benino, Birmo (8), Bocvano, Bolivio (8), Brazilo (8) [3], Brunejo, Burkino [4], Burundo, Butano, Ĉado, Ĉilio, Domingo [5], Dominiko, Ebur-Bordo, Egipto [6], Ekvadoro (8), Fiĝioj, Filipinoj, Gabono, Gambio [7], Ganao, Grenado, Grenadinoj, Gujano [8], Gvatemalo (8), Gvineo (8) [9], Ĝibutio, Haitio [10], Honduro, Indonezio, Irako (8) Irano (8) [11], Irlando (8), Islando (8), Israelo [12], Jamajko, Jemeno, Jordanio, Kameruno, Kampuĉeo, Kabo-Verdo, Kanado (8), Kataro, Kenjo, Kipro, Kiribato, Kolombio [13], Komoroj, Kongolo, Koreo [14], Kostariko (8), Kubo (8), Kuvajto, (Sri-)Lanko, Laoso, Lesoto, Libano (8), Liberio (8), Libio (8), Liĥtenŝtejno, Luksemburgo, Madagaskaro [15] Malajzio, Malavio, Maldivoj, Malio, Malto, Maroko (8), Maŭricio, Meksiko (8) [16], Monako, Mozambiko, Nauro, Nederlando (8), Nepalo, Neviso, Niĝero, Niĝerio, Nikaragvo (8), Omano, Pakistano (8), Panamo (8), Papuo [17], Paragvajo (8), Peruo (8), Principeo, Ruando, Salomonoj, (El-)Salvadoro, Samoo, San-Marino, Sao-Tomeo, Sejŝeloj, Senegalo [18], Sent-Kristofo, Sent-Lucio, Sent-Vincento, Siera-Leono, Singapuro, Sirio (8), Sovetio [19], Sudano (8), Surinamo, Tajlando [20], Tajvano, Tanzanio, Tobago, Togolo, Tongo, Trinidado, Tunizio (8), Tuvalo, Ugando, Ukrainio [21], Urugvajo (8), Usono [22], Vanuatuo, Vatikano [23], Venezuelo (8), Vjet-Namo, Zairo, Zambio, Zelando, Zimbabvo.

Eksterliste: Groenlando / Gronlando, Siberio.

Piednotoj:

1) Antaŭparolo al la "Plena Vortaro Eo-Franca kaj Eo-Esperanta" (1909)

2) Sed eblos diri: Aŭstro-Hungario. Esence la radiko aŭstr- signifas oriento; ĝi aperas kiel mallongigo de Aŭstrio en kunmetaĵoj.

3) La ĉefurbo estas Braziljo, laŭ la Portugala prononco.

4) Faso (en Burkina Faso) ne tradukiĝas: ĝi signifas hejmlando, patrio. Antaŭe: Supra-Volto.

5) Ni reprenis malnovan nomon, ĉar transskribo de Dominicana konfuziĝus kun anoj de Dominiko. -- Kp. noton 10.

- 6) Ekskluzive uzata en la ĉefverka traduko de Kabe, La Faraono. Ni preferu tiun formon omaĝe al nia granda verkisto.
- 7) Pro peto de la Gambia Prezidento kaj interveno de Senegalo kreiĝis inter la du landoj konfederacio sub la nomo Senegambio (Decembro 1981).
- 8) Gujano, nova nomo de sendependiĝinta ŝtato (Guyana), kun ĉefurbo Georgtaŭno, eks-Brita Gviano (Guiana); apartenas al la regiono de Gvajanoj, kune kun Surinamo (eksa Nederlanda Gviano) kaj la Franca Gviano, krom la Venezuelaj kaj Brazilaj partoj de Gvajanoj.
- 9) Nomo de kvar ŝtatoj, el kiuj tri respublikoj: Res. Gvineo, Res. Gvineo-Bisaŭo (ĉefurbo: Bisaŭo), kaj Ekvatora Gvineo (antaŭe kaj respektive: Franca, Portugala kaj Hispana Gvineoj). La kvara estas monarkio: Papuo-Nov-Gvineo (Vd. noton 17).
- 10) Respubliko Haitio okupas la okcidentan parton de la insulo Hispaniolo, dum la Dominga Respubliko -- la orientan.
- 11) Kun la Persa lingvo (kaj la iama Persujo / Persio).
- 12) Kun la Hebrea(FdE) lingvo.
- 13) Ne konfuzu kun Kolumbio, Usona federala distrikto kun ĉefurbo Vaŝingtono.
- 14) Nomo monde internacia. La Korea etno nomiĝas Hanoj; sinonimo por la lando: Hanlando. Ne konfuzu Hanoj kun Ĥanoj, ĉefgento de Ĉinio.
- 15) Kun la Malagasa lingvo.
- 16) Sed: urbo Meksiko aŭ Meksiko-urbo (H. Ciudad de México; A. Mexico City ...).
- 17) Papuo-Nov-Gvineo rezultas el unuiĝo de Nov-Gvineo sub protekto de Aŭstralio kaj de Papuo, ankaŭ nomita Aŭstralia Nov-Gvineo; cetere la tria parto de la sama insulo estas la Okcidenta Nov-Gvineo, nun Iriano (dependaĵo de Indonezio). En Papu-Nov-Gvineo estas parolataj ĉ. 700 lingvoj kaj unu komuna, la Bislama (Bichelamar aŭ Melanezia piĝino). Tieaj Eŭropanoj parolas Angle.
- 18) Vd. noton 7.
- 19) Nepre utila pro sia derivaĵo: Sovetianoj; ĝi estas mallongigo por Sovet-Unio, kies plena oficiala nomo estas: Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj, kiun oni iafoje skribas sigle: U.S.S.R.
- 20) Iuj Tajoj estas nacioj de aliaj landoj: Birmo, Laoso (Tajlaoj)...
- 21) La landnomo signifas proksimume: landlima lando. Tial estas eraro nomi per ĝi la landanojn.
- 22) Tradicia mallonga nomo por Uniaj / Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko (U.Ŝ.A).
- 23) Teritorio! Sed en Ekleziaj rilatoj kutimas uzadi: Sankta Seĝo Rim. de U.N.).

II. DUA KLASO DE LANDNOMOJ

(Homoj -- Homujo/Homlando ...)

Tiuj landnomoj estas derivaĵoj de landano-nomoj kaj estas diverse formitaj: per sufikse uzataj vortoj (-land-, -[i]stan-, ...) aŭ per sufiksoj (-uj-, -i-). Tiu maniero formi landnomojn "estas dua, akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda" (Boirac [1]). La sufiksa -uj- "servas por elfari nomojn ... de landoj, sed nur kiam oni nomas landon per la nomo de la gento aŭ nacio ĝin loĝanta" (Boirac 1). La sufikso -i- en tiaj kazoj povas anstataŭi la sufikson -uj-, sed principe "nur se tiel ĝi formas internacian nomon" (Cart).

1-a Grupo: sufikso -ujo aŭ sufikso -io

En tiu grupo la du sufiksoj estas egale uzeblaj; estas rekomendinde uzu nur unu saman en difinita teksto.

a) la io-formo estas sendube internacia

Albanujo / Albanio (8), Arabujo / Arabio (8), Belgujo / Belgio (8), Belorusujo / Belorusio, Bulgarujo / Bulgario (8), Ĉeĥoslovakujo / Ĉeĥoslovakio, Etiopujo / Etiopio (8), Francujo / Francio (FdE), Germanujo / Germanio (FdE), Grekujo / Grekio (8), Hispanujo / Hispanio (FdE), Hungarujo / Hungario (8), Italujo / Italio (8), Jugoslavujo / Jugoslavio, Maŭritanujo / Maŭritanio, Mongolujo / Mongolio, Norvegujo / Norvegio (8), Rumanujo / Rumanio (8), Somalujo / Somalio, Svedujo / Svedio (8), Turkujo / Turkio (FdE).

Eksterliste: Armenujo / Armenio, Estonujo / Estonio, Latvujo / Latvio (8), Rusujo / Rusio (FdE).

b) la io-formo estas Slave internacia, sed de Latina deveno

Danujo / Danio (8), Portugalujo / Portugalio.

Eksterliste: Anglujo / Anglio (FdE).

c) la io-formo estas ne internacia pro la uzata radiko

(Grand-)Britujo / (Grand-)Britio, Hindujo / Hindio [24].

ĉ) la io-formo estas ne internacia, ĉar la radiko devus aparteni al la unua klaso: ili apartenas al la arkaika sistemo ("Amerikoj vivas en Amerikujo"). Sed ili estas tradiciaj, de ĉiuj uzataj kaj ne kontestataj.

Ĉinujo / Ĉinio, Japanujo / Japanio [25].

2-a grupo: sufikse uzata vorto -lando

a) la nomo estas sendube internacia

Finnlando, Svazilando.

Eksterliste: Skotlando [26].

b) la nomo estas akceptebla Esperantismo

Pollando, Svislando.

3-a grupo: Sufikse uzata vorto -(i)stano

Afganistano.

Eksterliste: Kirgizistano, Uzbekistano.

Piednotoj:

24) En tiu federala lando estas parolataj ĉ. 14 oficialaj lingvoj ŝtataj (la Hinda, Bengala, Telugua, Marata, Tamila, Urdua, Guĝarata, Malajalama, Kannada, Orija, Panĝaba, Asama, Kaŝmira, Sinda) krom ĉ. 125 aliaj parolataj de 13% de la popolo. Plie du lingvoj estas federalaj: la Angla (parolata de 1% de la popolo) kaj la Hinda (ĉ. 30% de la popolo). Jam de pluraj jarcentoj la lando nomiĝas en la diversaj Hindiaj lingvoj Bharata, aŭ laŭ misformiĝoj de tiu Sanskrita nomo; tiu oficiala nomo liveras sinonimon al nia lingvo: Barato. -- La riveronomo Indo naskis diversajn nomojn: Indonezio, ... kaj Indo-Eŭropa (uzata jam de Cart kaj de Privat), Indo-Irana, ...

25) Sinonimo: Nipono.

26) Sed la Kanada provinco estas Nova-Skotio (Nova Scotia).

Ŝtatnomoj

Surbaze de la normigitaj landnomoj kiu ajn povos mem formi ŝtatnomojn helpante sin per pliaj vortoj troveblaj en la vortaroj. Ekzemple, surbaze de la nomo Germanujo/Germanio, eblos formi la ŝtatnomon Demokratia Germana Respubliko helpante sin per la vortoj demokratia kaj respubliko.

La plej multaj el tiuj "help-vortoj" jam estas Fundamentaj aŭ Oficialaj. Tamen kelkaj eĉ ne estas registritaj en PIV: ili enkondukiĝos per si mem laŭ la kreskanta uzado. Aliaj troviĝantaj en PIV meritis esti oficialigitaj, sed ni kontentiĝos enmeti ilin en anekso al la listo de normigitaj landnomoj: estas ja malfacile antaŭvidi daton de proksima Oficiala Aldono. Fine kelkaj derivitaj vortoj aperos ankaŭ en tiu anekso, kune kun kelkaj propraj nomoj. Ni do havos la jenan liston plurpartan.

A. Vortoj ne-oficialaj aperantaj en PIV

dominio	Islamo	nomarko	soveto
federala	kooperativo	nomarkio	unio

B. Teritorioj regataj de diversaj estroj

(kun la UNo-traduko al A. F. H.)

duk-io	duchy	duché	ducado
emir-io	emirate	émirat	emirato
princ-io	principality	principauté	principado
reĝ-io	kingdom	royaume	reino
sultan-io	sultanate	sultanat	sultania

C. Adjektivoj kun politika senco

(same kun tradukoj al A. F. H.)

federativa	federative	fédératif(ve)	federativo (-a)
socialista	socialist	socialiste	socialisto (-a)
sendependa	independent	indépendant	indipendiente
unia/unuigita/unuiĝinta	united	unu	unido (-a)

Ĉ. Propraj nomoj de dinastioj

(kun tradukoj al A. F. H.)

Haŝima	Hashemite	hachémite	hachemito (-a)
Saŭda	Saudi	saoudite	saudito (-a)

D. Ŝtataj reĝim-nomoj

Ĝamahirio (el la Araba: Jamahiriyah, lando de amasoj)

Komonvelto (el la Angla: Commonwealth, lando de komuna bonfarto)

Por la Akademio, ties Prezidanto,
D-o André ALBAULT

122 2003: Dua decido pri Koreo kaj Egipto.

Vd. ĉe R 15.

123 2009: Dua Rekomendo pri landnomoj.

Vd. en la aldono al BK II.

43. § 41 [R 11: -ebl, -ind, -em, -er]

Teksto de FE 41

Ŝtalo estas fleksebla, sed fero ne estas fleksebla [FE 41.1]. — Vitro estas rompebla kaj travidebla [FE 41.2]. — Ne ĉiu kreskaĵo estas manĝebla [FE 41.3]. — Via parolo estas tute nekompenebla kaj viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble [FE 41.4]. — Rakontu al mi vian malfeliĉon, ĉar eble mi povos helpi al vi [FE 41.5]. — Li rakontis al mi historion tute nekredeblan [FE 41.6]. — Ĉu vi amas vian patron? Kia demando! kompreneble, ke mi lin amas [FE 41.7]. — Mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi mem havos hodiaŭ gastojn [FE 41.8]. —||— Li estas homo ne kredinda [FE 41.9]. — Via ago estas tre laŭdinda [FE 41.10]. — Tiu ĉi grava tago restos por mi ĉiam memorinda [FE 41.11]. —||— Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema [FE 41.12]. — Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo; tamen li estas tre pardonema, li ne portas longe la koleron kaj li tute ne estas venĝema [FE 41.13]. — Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredoblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas [FE 41.14]. —||— Centimo, pfenigo kaj kopeko estas moneroj [FE 41.15]. — Sablero enfalis en mian okulon [FE 41.16]. — Li estas tre purema, kaj eĉ unu pulveron vi ne trovos sur lia vesto [FE 41.17]. — Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon [FE 41.18].

Dua Libro 1888 (selekto)

-ebl: Via parolo estas por mi tute ne kompenebla [DL 10.16]. — Li rakontas aferon tute ne kredeblan [DL 10.17]. — Vi skribas tre nelegeble [DL 10.18]. — Vitro estas travidebla [DL 10.19].

-ind: Mi aŭdis tion ĉi de kredindaj personoj [DL 14.8]. — Mi jam vidis ĉiujn vidindaĵojn de via urbo [DL 14.9]. — Li estas senespere malsana, kaj savi lin povas nur ia miregindaĵo [DL 14.10]. — Li havas bonan koron, sed bedaŭrinde li ne povas fari, kion li volas [DL 14.11].

-em: Mia kolego estas tre kredema: li kredas ĉion, kion oni diras al li [DL 11.17]. — Eduardo estas tre ekkolerema kaj venĝema, kaj lin ofendi estas danĝere [DL 11.18]. — Estu laborema, ŝparema kaj singardema! [DL 11.19]. — La religio diras, ke la animo estas nemortema, kvankam la korpo estas mortema [DL 11.20].

-er: La patro donacis al mi kolektujon, kaj li mem ĵetis en ĝin la unuan moneron [DL 12.1]. — Hieraŭ falis granda hajlo; ĉiu hajlero pezis pli ol kvindek gramojn [DL 12.2]. — La plej malgranda fajrero estas sufiĉa por eksplodigi la pulvon [DL 12.3].

Superrigardo

124 FE 41.1 - FE 41.8: -ebl.

FE 41.9 - FE 41.11: -ind.

FE 41.12 - FE 41.14: -em.

FE 41.15 - FE 41.18: -er.

44. § 42 [R 11: -um; alparolo; resumo: „sano“]

Teksto de FE 41

Ni ĉiuj kunvenis, por preparoli tre gravan aferon; sed ni ne povis atingi ian rezulton, kaj ni disiris [FE 42.1]. — Malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin [FE 42.2]. — Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro [FE 42.3]. — Li donis al mi monon, sed mi ĝin tuj redonis al

li [FE 42.4]. — Mi foriras, sed atendu min, ĉar mi baldaŭ revenos [FE 42.5]. — La suno rebrilas en la klara akvo de la rivero [FE 42.6]. —||— Mi diris al la reĝo: via reĝa moŝto, pardonu min! [FE 42.7] — El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. [FE 42.8] —||— La sufikso « um » ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9]. Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo [FE 42.10]. — Mi volonte plenumis lian deziron [FE 42.11]. — En malbona vetero oni povas facile malvarmumi [FE 42.12]. —||— Sano, sana, sane, sani, sanu, saniga, saneco, sanilo, sanigi, saniĝi, sanejo, sanisto, sanulo, malsano, malsana, malsane, malsani, malsanulo, malsaniga, malsaniĝi, malsaneta, malsanema, malsanulejo, malsanulisto, malsanero, malsaneraro, sanigebla, sanigisto, sanigilo, resanigi, resaniĝanto, sanigilejo, sanigejo, malsanemulo, sanilaro, malsanaro, malsanulido, nesana, malsanado, sanulaĵo, malsaneco, malsanemeco, saniginda, sanilujo, sanigilujo, remalsano, remalsaniĝo, malsanulino, sanigista, sanigilista, sanilista, malsanulista k. t. p. [FE 42.13].

Dua Libro 1888 (selekto)

Alparolo de superuloj: La leteron mi adresis: al lia moŝto sinjoro N.en N.N. [DL 16.29]. — Via barona moŝto, helpu min en mia mizero! [DL 16.30].

-um: Se ni devas uzi ian sufikson, sed la senco ne montras al ni, kian sufikson ni devas preni, ni uzas la sufikson „um“ [DL 15.14]. — Kiu ne plenumas sian promeson, estas malnoblulo [DL 15.15]. — Elirinte el varma ĉambro sur la malvarman korton, ŝi malvarmumis kaj malsaniĝis [DL 15.16].

125 FE 42.7 – FE 42.8: Alparolo de superuloj.

126 FE 42.9 – FE 42.12: -um.

C. Unuopaj aspektoj

I. Interpunkcio

1. Superrigardo

- 1 Ankaŭ pri interpunkcio *ne* ekzistas (devigaj) *reguloj* en iu parto de la F-to, sed *ja modeloj*,¹⁵⁶ nome jenaj interpunkciaj signoj.

nomo	simb.	ekzemplo
punkto	.	k. t. p.; t. e.
	1.	Mi finas do per la jenaj vortoj: 1. pro la unueco de nia afero ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la fundamenton de nia lingvo; [A 11]
dupunkto	:	Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa, ol mia [FE 10.17]. Sed en la praktiko ni (...) devas ... esti tre singardaj kun ĉia « perfektigado » de la lingvo: ... [A 9.2]
tripunkto	...	Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos... [A 6.2]. ... (presi, instrui, prediki, vendi tian aŭ tian varon, konduki aŭton ...) [en la difino de licenc/o, OA 8, kun la signifo k.t.p.]
semikolo	;	ĉiu, [...], povis pensi, ke li vidas la patrinon; ili ambaŭ estis [...] malagrablaj [...] [FE 11.2].
komo	,	Fluanta akvo estas pli pura, ol akvo staranta senmove [FE 22.1].
akcento	˘	Bá-lo. [FG 2]
apostrofo	'	la patr'o'j'n [FG 2 – fr], de l' mond'o [FG 16.2 – fr]
streko	—	Patro kaj frato [FE 5.1]. — Leono estas besto [FE 5.2].
streketo	-	Bá-lo. patro - père ... [FE 5].
oblikva streko	/	patr/o/j/n [FG 2 – pl]
rekta streko		patro - père father Vater отецъ ojciec [FE 5]. patr o j n [FG 2 – ru]
signo de egaleco	=	583 = kvin'cent tri'dek tri [FG 4 – en]
tildo	~	invent/i. [OA 8] Krei, elpensi ion novan per la forto de la spirito: ~i <i>maŝinon</i> , ...
francaj citiloj malferma, ferma	« »	la « Universala Vortaro »; la « Ekzercaro » [A 2.1].

¹⁵⁶ Malprecize „Mi opinias ke la interpunkcio de la Fundmaneto [tiel, legu: Fundamento] ne estas Fundamenta kaj ne devigas. (Ak. Yamasaki Seikô, en *Internacia Ĵurnalisto*. 1993: 4). Kompreneble ĝi estas Fundamenta, ĉar ĝi troviĝas en tiu libro. La demando estas nur, ĉu temas pri devigaj reguloj, „stilo“ aŭ modeloj.

germanaj citiloj malferma, ferma	„“	“Tre volonte, mia bona,”; diris la bela knabino [FE 15.2]. „Mi faras al vi donacon,” daŭrigis la feino, „ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono.” [FE 15.7].
rondaj krampoj malferma, ferma	()	Sed en la praktiko ni (pro kaŭzoj jam multajn fojojn preparolitaj) devas ... esti tre singardaj ... [A 9.2]: ...
	1)	1) Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun ... [A 7.1].
	a)	a) ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco [A 9.3];
elkrio-signo	!	Ho, ne! [A 5.2] Bonan matenon! [FE 10.9] Ĝojan feston! [FE 10.10].
demando-signo	?	Kie estas la libro kaj la krajono? [FE 6.4]
paragrafo-signo	§	§ 2 [FG 2]
asterisko, steleto	*	ironi' [OA 1] * ironie irony Ironie иронія ironja.

- 2 Laŭ Z en 1893 la „objekto ne estas tre grava kaj ne venis ankoraŭ la tempo por difini ... severajn regulojn“:

LR 65 (1893): „La reguloj pri la uzado de la interpunkcioj¹⁵⁷ estas en nia lingvo pli-malpli tiaj samaj, kiel en ĉiuj aliaj lingvoj; sekve ĉiu povas uzadi en Esperanto la interpunkciojn tiel, kiel li uzas ilin en sia nacia lingvo. Estas vere, ke en diversaj *detaloj* la uzado de la interpunkcioj estas malegala en diversaj lingvoj; sed ĉar la objekto ne estas tre grava, tial ni pensas, ke ne venis ankoraŭ la tempo por difini en nia lingvo severajn regulojn por tiuj ĉi detaloj. En tiuj ĉi dubaj detaloj ĉiu povas uzi en Esperanto la interpunkciojn tiel, kiel li uzas ilin en sia nacia lingvo, kaj nur la uzo iom post iom ellaboros por tiuj ĉi negravaj detaloj difinitajn regulojn.“ [LR 65. La Esperantisto, 1893, p. 127].

- 3 Kvankam ekz. jam la Konferenco de Arnhem (pasko 1932) petis la Akademion reguligi la demandon de interpunkciaj signoj, tiu ĉi ĝis nun ne prenis iun decidon (regulon aŭ rekomendon) pri la temo.

2. Uzo de unuopaj interpunkciaj signoj

a) Punkto

- 4 Pliajn ekzemplojn vd. en la vortara parto BK II.

uzado	ekzemploj
fino de frazo	Patro kaj frato. [FE 5.1] - Leono estas besto. [FE 5.2]
indiko de iuj mallongigoj	k. t. p. (= kaj tiel plu) [FE 30.10], t. e. (= tio estas) [FE 14.7]

- 5 [Daŭrigota]

b) Komo

- 6 La uzado de la komo ne estas plene unueca en FE, kiel montras la ekzemploj en la sekvanta tabelo; pliajn vd. en FE kaj la vortara parto BK II.

¹⁵⁷ Nun aŭ „interpunkcio“, aŭ „interpunkciaj signoj“, vd. la diskuton en BK II.

uzado	ekzemploj
disigo de alparolita persono	Ludoviko, donu al mi panon [FE 8.9]. Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro! [FE 10.8] — <i>Same</i> : FE 10.17
antaŭ ĉar	Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki [FE 9.3].
antaŭ kaj (nur ĉe serio de sub-frazoj en frazo)	La libro estas sur la tablo, kaj la kraĵono kuŝas sur la fenestro [FE 6.5]. Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron [FE 9.7]. De la patro mi ricevis libron, kaj de la frato mi ricevis plumon [FE 9.8]. Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo [FE 9.9]. En la tago ni vidas la helan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn [FE 10.13]. — <i>Same</i> : FE 12.12, FE 14.15. — <i>Kontraste</i> : Sur la fenestro kuŝas kraĵono kaj plumo [FE 6.6]. — <i>Tamen</i> : Mi manĝas per la buŝo [komo mankas] kaj flaras per la nazo [FE 8.10].
antaŭ kaj post ke -frazo	Diru al la patro, ke mi estas diligenta [FE 8.3]. — <i>Same</i> : FE 11.2, FE 12.15, FE 15.1
antaŭ kaj post kiam -frazo	En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino ... [FE 15.1]. <i>Same</i> : FE 15.4
antaŭ kiel (en komparado)	Mi estas tiel forta, kiel vi [FE 10.19]. — Kp. ol.
antaŭ kaj post kiu -frazo (relativa frazo)	Jen estas la pomo, kiun mi trovis [FE 6.8]. — <i>Same</i> : FE 11.2 [ĉiu, kiu]. FE 11.3, FE 13.1, FE 15.1
antaŭ ol	Lakto estas pli nutra, ol vino [FE 10.15]. Mi havas pli freŝan panon, ol vi [FE 10.16]. <i>Same</i> : FE 10.17 — Kp. kiel. <i>Tamen</i> : Du homoj povas pli multe fari [komo mankas] ol unu [FE 12.1].
antaŭ kaj post se -frazo	Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj [FE 14.16].
antaŭ sed	La patro ne legas libron, sed li skribas leteron [FE 9.11]. La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka [FE 10.14]. <i>Same</i> : FE 12.2, FE 14.7, FE 14.14
antaŭ tial	Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino ... amis sian ... filinon, ... [FE 13.1].

7 [Daŭrigota]

c) Streketo

8 Por la **divido de vortoj en la skribo** oni uzas laŭ la modeloj de FE 2-3 streketon (-). Pli detale vd. ĉe FE 2.

II. Religia lingvaĵo en Ekzercaro kaj Fundamento

9 FG 3.5: „**pli blanka ol neĝo**“ – En la Biblio blanka estas koloro, kiu estas simbolo de ĝojo (Koĥ 9:8), ĉasto (Jes 1.18) kaj ĉiela gloro (Mar 16:5, Ap 3:5; 19:14). La Biblio akcentas brilon kaj blankecon de estaĵoj venintaj el ĉielo (Jeĥ 9:2; Luk 24:4; Ag 10:30; Ap 4:4), Sanktuloj post purigo de pekoj (Jes 1:18; Psal 51:7) kaj blankigo en sango de la Ŝafido formos blankan sekvantaron de la Venkinto (Ap 3:4s; 7:14).¹⁵⁸

Jen la citaĵoj el la Biblio enhavantaj *blanka* kaj *neĝo*:

685

¹⁵⁸ Biblia Vortaro (1975-1984).

Jes 1.18: Venu, kaj ni faru inter ni juĝan disputon, diras la Eternulo:se viaj pekoj estas sangoruĝaj, ili fariĝos blankaj kiel neĝo; kaj se ili estas kiel skarlato, ili fariĝos kiel lano.

Psal 51:5-7: 5. Mi estas ja naskita en krimo; Kaj en peko gravediĝis per mi mia patrino. 6. Vi amas ja veron en la koro, Kaj en kaŝiteco Vi aperigas al mi saĝon. 7. Senpekigu min per hisopo¹⁵⁹, kaj mi fariĝos pura; Lavu min, kaj mi estos pli blanka ol neĝo.

Z klarigis „pli ... ol“ ne per unu el la 16 frazoj en FE, sed alludis al la Bibliaj Psalmoj. Oni povas interpreti la ekzemplon kiel tre densigitan kaj reduktitan kaŝan preĝon: „Mi konscias, ke mi estas eraranta kaj pekanta homo. Sed vi, mia Dio, kaŝe inspiris min al tiu ĉi verko. Se vi subtenas min, kaj purigas mian koron kaj strebon, mi ne eraris kaj sukcesos.“ Zamenhof petegas Dian subtenon por sia entrepreno, farita kun sincero kaj „vero en la koro“.¹⁶⁰

- 10 **mac'** - azyme | unleavened bread | ungesäuertes Brot {2012 ankaŭ: Matze} | опрѣснокъ | prašny chleb. {KUIR} — [AK] przašny chleb, maca.

III. Eblaj alludoj al personaj kaj familiaj cirkonstancoj

- 11 Mil okcent naŭdek tri [FE 12.10]. – Ekzerco pri numeraloj. La jaro 1893, dum kiu UV kaj FE estis senditaj al la cenzurejo.

Klaro kaj Sofio [FE 38.12]. — Ekzerco pri –nj. Nomoj de la edzino kaj filino.

Li venigis al si el Berlino multajn librojn [FE 39.10]. – Ekzerco pri –ig. Probable Z mem en 1892 /1893.

IV. Cenzuro

Literaturo (selekto): **Sokolov**, Naĥum (1959). La cenzuristo Marko Zamenhof [el la Hebrea tradukis N.Z. Maimon]. En: Nica Literatura Revuo vol. 4, p. 83-89 (kajero 21, 1959). **Ĥvorostin**, Stepan K. (1972). Cara cenzuro kaj Esperanto. En: Scienca Revuo 1972:23:1-2 (93-94), p. 37-46 (Periodo 1887-1904). (Dua parto) en: Scienca Revuo 1972:23:3 (95), p. 79-88 (Periodo 1904-1916, resumo). - **Holzhaus**, Adolf. (1974). L. Zamenhof kaj cara cenzuro. En: Scienca Revuo 1974 n-ro 108, p. 177-209.¹⁶¹

- 12 La publikigaĵoj de Z ĉiam ankaŭ devis atenti pri du praktikaj problemoj: la kostoj kaj la cara cenzuro. Dum por la fruaj broŝuroj la (relative liberala) cenzurejo en Varsovio estis respondeca, postaj verkoj devis esti submetitaj al la (pli strikta) cenzurejo en Peterburgo. Deatlojn vd. en la cit. literaturo.

- 13 La cenzuro estas probable la kialo, kial la Ekzercaro ne havas antaŭparolon. Z ricevis la permeson jam en 1893, sed pro la reformdiskuto de 1894 presigis la broŝuron nur en Septembro de tiu jaro. Se li volus aldoni antaŭparolon, li devus

685

¹⁵⁹ Hisopo - Nekonata vegetaĵo, malgranda kaj bonordora, kreskanta sur muroj (1 Reĝ 5:13). Eble kaporo aŭ specio de sovaĝa majorano. Izraelidoj uzis ĝiajn branĉojn ĉe aspergado de pordoj per sango de ŝafido antaŭ eliro el Egiptio (El 12:22), ĉe ceremonio de purigado de lepruloj kaj iliaj loĝejoj (Lev 14:4.51) kaj ĉe oferoj (Nom 19:6). ... (Biblia Vortaro 1975-1984).

¹⁶⁰ Tre probable multaj el liaj samtempuloj ankoraŭ komprenis la alludon, verŝajne ankaŭ la (katolikaj aŭ judaj) aŭtoroj de Plena Vortaro (PV 1930). Eble ĝi pro tio estas intence ellasita, kiel tro religia lingvaĵo por vortaro de socialistaj „klasbatalantoj“. Ĉiukaze la ekzemplo „pli blanka ol neĝo“ ĝis hodiaŭ mankas eĉ en la posteulo de PV, nome en la nuna PIV 2002, 2005.

¹⁶¹ Artikoloj en la Scienca Revuo estas rete legebla en <https://scienca-revuo.info/>.

refari la cenzuran proceduron. Pro tio li publikigis kvazaŭan antaŭparolon en *La Esperantisto* aperinta en Germanio. [Daŭrigota].

Kvara Libro

**Universala Vortaro,
Akademiaj Korektoj
Oficialaj Aldonoj**

(UV, AK, OA)

A. La Universala Vortaro (UV)

I. Enkonduka teksto al UV

- 1 UV estas enkondukita per jena dufraza teksto en ses lingvoj. La versioj de la kvin referenc-lingvoj estas senŝanĝe transprenita el la „Vortaro Internacia – xy“, unupaĝa folio aldonita al la Unua Libro de 1887 (UL-V). La tradukon de la enkonduko al Esperanto Zamenhof preparis por UV en 1893.

UNIVERSALA VORTARO

DE LA

LINGVO INTERNACIA

ESPERANTO

[UV, titolo]

Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enkonduko 1]. Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, tiel ekzemple la vorto « **frat'in'o** », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enkonduko 2].

Tout ce qui est écrit en langue internationale Esperanto peut se comprendre à l'aide de ce dictionnaire. Les mots qui forment ensemble une seule idée s'écrivent ensemble mais se séparent les uns des autres par de petits traits. Ainsi, par exemple, le mot « **frat'in'o** », qui n'exprime qu'une idée est formé de trois mots, et chacun d'eux se cherche à part.

Everything written in the international language Esperanto can be translated by means of this vocabulary. If several words are required to express one idea, they must be written in one but, separated by commas; e. g. « **frat'in'o** » though one idea, is yet composed of three words, which must be looked for separately in the vocabulary.

Alles, was in der internationalen Sprache Esperanto geschrieben ist, kann man mit Hilfe dieses Wörterbuches verstehen. Wörter, welche zusammen einen Begriff bilden, werden zusammen geschrieben, aber von einander, durch einen senkrechten Strich getrennt; so ist z. B. das Wort « **frat'in'o** », welches einen Begriff bildet, aus drei Wörtern zusammengesetzt, deren jedes besonders zu suchen ist.

Все, что написано на международномъ языкѣ Эсперанто, можно понимать съ помощью этого словаря. Слова составляющія вмѣстѣ одно понятие, пишутся вмѣстѣ, но отдѣляются другъ отъ друга черточкой; такъ напримѣръ слово « **frat'in'o** », составляя одно понятие, сложено изъ трехъ словъ, изъ которыхъ каждое надо искать отдѣльно.

Wszystko co napisano w języku międzynarodowyn Esperanto, można zrozumieć przy pomocy tego słownika. Wyrazy, stanowiące razem jedno pojęcie, pisze się razem, lecz oddziela się króską pionową; tak na przykład wyraz « **frat'in'o** » stanowiący jedno pojęcie, złożony jest z trzech wyrazów, z których każdego należy szukać oddzielnie.

- 2 UL 1887 (en la Zamenhofa traduko de FK 1903) klarigas la „fratino“-ekzemplon jene:

„Tiel ekzemple la devenon de la vorto "fratino", kiu en efektiveco konsistas el tri vortoj : *frat* (frato), *in* (virino), *o* (kio estas, ekzistas) (- kio estas frato-virino = fratino), - [...]. tio, kion [lernanto] nomas finiĝo aŭ prefikso aŭ sufikso, estas tute memstara vorto, kiu ĉiam konservas egalan signifon, tute egale, ĉu ĝi estos uzata en la fino aŭ en la komenco de alia vorto aŭ memstare, ke ĉiu vorto kun egala rajto povas esti uzata kiel vorto radika aŭ kiel gramatika parteto. [...]. [UL 6]“

Plenan citaĵon vd. ĉe R 11 kaj en ĉap. FG A.II.

II. Superrigardo

Literaturo (selekto): **Wüster**, Eugen. La oficiala radikaro (ĝis februaro 1923) kun enkonduko kaj notoj. Berlin; Dresden: Ellersiek & Borel, 1923, 69 p.

- 3 UV baziĝas sur jenaj pli fruaj vortaroj:
- Vortaro de la Unua Libro 1887 (UL)
 - Vortaro Rusa-Internacia 1889 (RE)
 - Meza Vortaro Esperanto-Germana 1889 (MV)
 - Kelkaj malmultaj vortoj unuafoje registrita en UV 1893.
- 4 Ne ĉiuj radikoj en la Fundamento (1905) troveblas en la ĝusta alfabeto pozicio en UV. Se oni volus klasifi trov-lokojn de radikoj laŭ malkreskanta evidenteco aŭ kreskanta „**kaŝiteco**“ oni povus starigi jenan liston:
1. Radikoj en ĝusta alfabeto pozicio en Universala Vortaro (UV 1893)
 2. Radikoj en la vortlistoj fine de la lecionoj 5 - 42 en la Ekzercaro (FE 1898)
 3. Radikoj en FE ekster la lecion-finaj vortlistoj de §§ 5 - 42, precipe do en la ekzemplo-frazoj (ĉiuj propraj nomoj) kaj la „Ekcercoj de legado“ (FE 2 - 4)
 4. Radikoj en UV en malĝusta alfabeto loko
 5. Radikoj en FE en la lecion-finaj vortlistoj de §§ 5 - 42 en malĝusta alfabeto loko
 6. Radikoj en la kvin Fundamentaj Gramatikoj (FG)
 7. Radikoj en la Antaŭparolo (en 1905 ankoraŭ eksterfundamentaj ĝis posta oficialigo)
 8. Radikoj aliloke (du-fraza enkonduko al UV, titoloj)

Tio estas ne enhava rango-listo, sed nur pri la grado de trov-facileco, ĉar principe FG, FE kaj UV estas samrangaj (vd. ĉapitron Fundamento – Enkonduko).

III. Fremdaj vortoj laŭ R 15 FG

- 5 Kiel konsekvenco de R 15 FG plej multaj **internaciismoj** ne estas registritaj en la Universala Vortaro (UV 1893). Ĝi precipe nur registras dubajn kazojn pridiskuteblajn (ekz. „veziro“), sed ne tiujn, kiuj dekomence, senprobleme kaj aŭtomate apartenas al la lingvo internacia (ekz. „sultano“).
- 6 Kiel kohere Zamenhof agis pri tiu punkto, oni vidas, se oni komparas lian vortaron Rusan-Esperantan (RE 1889) kun la UV de 1893. La sekva listo notas ĉiujn esperantaj tradukojn de la rusaj vortoj komencantaj per „A“. La malmultaj vortoj el RE 1889, kiujn Zamenhof transprenis en UV estas signita per plus-signo „+“ kaj grasa skribo. La multegaj internaciismoj, kiujn li ne unuope kaj eksplicite, sed nur grupe transprenis per la ĝenerala regulo de § 15 estas markita per streko „—“. Pro tiu „ĝenerala klaŭzo“ ili estas same „bona kaj pura“ Esperanto kiel la vortoj, kiuj pro mankanta internacia formo („birdo“, „knabo“) devis esti fiksita en UV.

abat +
abon +
abrikot +
 adept —
 admiral —
 adres – FE 42,
 mankas en UV
 advokat —
 aerostat —
 afiŝ —
 agat —
 agent —
 agit —
 agoni —
 akaci —
 akademi —
 akcent —
 akci —
 akciz —
akompan +
 akord —
 aksiom —
 akt —
 aktor —
 akurat —
 akuŝ'ist - UV
 akuŝ'ist'in'
akv'o'melon +
 alabastr —
 album —
 ald —
 ale —
 alegori —
 alfabet – FE 1,
 mankas en UV
 algebr —
 alĥemi —
 alkohol —
 alkov —
 almanak —
 alo —
altar +
 amalgam —
 ambrozi —
 amen —
 amfiteatr —
 amnesti —

analiz —
 analogi —
ananas +
 anekdot —
anĝel +
aniz +
 anker —
 antikrist —
 antikv'ist + antikv'
 antipati —
 antipod'oj —
 apetit —
aplaŭd +
 apopleksi —
 apostol —
 apotek —
 aprikot —
April +
ardez +
arest +
 arĥeologi —
 arĥipelag —
 arĥitekt - UV
 arĥitektur'
 arĥiv —
 ari —
 aristokrat —
 aritmetik —
arleken +
 arme —
 arŝin —
 arteri —
 artileri —
 artist —
 asfalt —
asign +
aspid +
 astrologi —
 astronomi —
atak +
atest +
 atlas —
 atmosfer —
 atom —
 aŭdienc —
 aŭditori —
Aŭgust +

aŭtomat —
 aŭtor - A, mankas en
 UV
 aŭtoritat - A, mankas
 en UV
avid +
azot +
 batal'il'ej —
 bon'odor —
cikoni +
 ĉef'anĝel —
ĉef'episkop +
 dezir'eg' UV dezir'
diamant +
 diplom —
eb'l'e +
episkop +
estr +
farm +
 gangren —
gren'ej +
ĝem +
ha! +
 halebard —
harp +
 hazard —
 hetman —
ho ve! +
ho ve! +
infer +
 insul'ar - UV insul'
 inter'etaĝ —
kaj +
 kapt'o'ŝnur —
 Koran - UV koran
kri +
 lapis —
oranĝ +
pardon +
 publik'a vend' [=
 aŭkcio] --
purpur +
sed +
 skval —
 spekulaci —
tribun +

IV. Propraj nomoj en la Fundamento

- 7 Propraj nomoj povas esti rigardataj kiel **specifa klaso de „fremdaj vortoj“** en la senco de R 15 (vd. la komentojn tie). Propraj nomoj de personoj kaj toponimoj aperas **jam en DL 1888**, nome

Viraj personaj nomoj: Aŭgusto [DL 2.11]. Aŭguĉjo [DL 10.13]. — Cezaro [DL 15.6]. — Eduardo [DL 11.18]. — Georgo [DL 3.6]. — Johano [DL 5.14]. —

Karolo [DL 2.6]. [DL 10.11]. — Kristo [DL 15.4]. kristanoj [DL 9.11]. — Mahometo - mahometanoj [DL 9.11]. — Napoleono - La Napoleonidoj esperas ricevi la tronon de Francujo [DL 12.12]. — Petro. Peĉjo [DL 10.12]. — Valter - Valter-Skot' estis glora verkisto [DL 14.15].

Virinaj personaj nomoj: Aŭgunjo [DL 10.13]. — Ernestino [DL 2.11] — Heleno [DL 10.10]. — Karolino [DL 5.7]. — Mario [DL 2.11]. [DL 10.12]. Manjo [DL 10.12].

Familiaj nomoj:— Valter-Skot' [DL 14.15 – skota verkisto *Walter Scott*, 1771-1832].— (Georgo) Vaŝingtono [DL 3.6].

Toponimoj: Eŭropo [DL 15.11]. — Francujo [DL 12.12]. — Germanujo [DL 12.4]. — Hamburgo [DL 16.16]. — Hispanujo [DL 15.11]. — Prusujo [DL 12.4]. — Rubikono [DL 15.6 - rivero].

- 8 Propraj nomoj en la Fundamento (1905) aperas nek alfabete en UV 1893, nek en la lecion-finaj vort-listoj de FE 1898, sed nur en kelkaj ekzemplo-frazoj kaj „kaŝite“ en UV, la Gramatikoj (*Ŝillero*) kaj la Antaŭparolo. Oficialaj Aldonoj poste konfirmis la Fundamentecon de la propraj nomoj ekster la alfabeto ordo de UV kaj krome aldonis pliajn. Laŭ la stato de OA 9 (2007) jenaj propraj nomoj apartenas al la Vortaro Oficiala. Pliajn detalojn vd. en BK II, kie la nomoj estas troveblaj per la siglo „{NOM}“.

1. Personaj nomoj

a) Viraj personaj nomoj

- 9 **Aleksandro** — Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron [FE 9.7]. — **Aleksandr'** [UV ĉj' {de} {ru} {pl}]. — **Aleksandr'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Antono — El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa [FE 10.20] — **Anton'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Aŭgusto — Aŭgusto estas mia plej amata filo [FE 22.11]. — **Aŭgust'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Ernesto — El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna [FE 10.18]. — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12]. — **Ernest'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Georgo — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19]. — **Georg'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Izrael' - Israël | [angla mankas] | Israel | Израиль | Izrael [UV id']. — **Izraelo** - Israël | [angla mankas] | Israel | Израиль | Izrael [FE 36 id']. La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo [FE 36.13]. — **Izrael'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (vira nomo).

Johano — La mano de Johano estas pura [FE 8.7]. — Mi konas Johanon [FE 8.8]. — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12]. — **Johan'** - John [UV ĉj' {en}]. — **Johan'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Jozefo — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22.3]. — **Jozef'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Ludoviko — Ludoviko, donu al mi panon [FE 8]. — **Ludovik'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Nikodemo — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22.3]. — **Nikodem'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Nikolao — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12]. — **Nikola'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Paŭl' — Paŭ-lí-no [FE 3]. — **Paŭl/o** [OA 8] — [OA 8]: RIM.V. En la 7a O.A. staras kiel Fundamenta la virina antaŭnomo Paŭlino: oni devas rigardi kiel Fundamentan la radikon Paŭl, de kiu ĝi deriviĝas.

Petro — Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj [FE 36.2]. — **Petr'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo). — Kp. „sinjoro Petro“ ĉe familiaj nomoj.

Stefano — Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem [FE 18.13]. — **Stefan'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Teodoro — La rozo apartenas al Teodoro [FE 5.4]. — **Teodor'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Vilhelmo — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12]. — **Vilhelm'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

b) Virinaj personaj nomoj

10 Anno — Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj [FE 36.2]. — **Ann'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (virina antaŭnomo).

Berto — Li fianĉiĝis kun fraŭlino Berto ... [FE 39.3]. — **Bert'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (virina antaŭnomo).

Elizabeto — Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj [FE 36.2]. — **Elizabet'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (virina antaŭnomo)

Emili' - Emili' [UV nj'] {mankas en la angla}. — **Emili'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (virina antaŭnomo).

Henriet' - Henrietta [UV nj' angla]. — **Henriet'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (virina antaŭnomo)

Klaro — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12]. — **Klar'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (virina antaŭnomo)

Mario — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo),

Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12]. — **Mari'** [UV nj'] {mankas en la angla}. — **Mari'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (virina antaŭnomo).

Paŭlino — Paŭ-lí-no [FE 3]. — **Paŭlin'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (virina antaŭnomo).

Sofio — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12]. — **Sofi'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (virina antaŭnomo).

2. Familiaj nomoj

11 **Kalvin'** — Luteranoj kaj Calvinanoj estas kristanoj [FE 37.8]. — **Kalvin'** [OA 7] (vira nomo).

Luter' — Luteranoj kaj Calvinanoj estas kristanoj [FE 37.8]. — **Luter'** [OA 7] (vira nomo).

Petro — Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn (infanojn) [FE 18.10]. — **Rim.:** Kp. la viran personan nomon „Petro“ supre.

Ŝiller'o – Schiller [FG 16 franca (nur tie la traduko), angla, germana kaj pola, mankas en FG 16 rusa]. — **Ŝiller'** [OA 7] (vira nomo)

Vaŝington — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil septcent tridek dua [FE 12].

Zamenhof – L. ZAMENHOF [A, mankas en UV].

3. Religiaj kaj mitologiaj nomoj

12 Pluraj nomoj menciitaj supre en la kategorio „personaj nomoj“ devenas kaj samtempe estas nomoj de Bibliaj personoj, nome Aŭgusto (romia imperiestro), Georgo (sanktulo), Izraelo (patriarko en la Genezo), Johano (evangeliisto), Jozefo (edzo de la Virgulino Mario) k.t.p. Ni rezignas ripeti ilin en tiu ĉi kategorio de religiaj nomoj.

4. Geografiaj nomoj (toponimoj)

13 [Daŭrigota].

Eden' [OA 1] * Eden | Eden | Eden | эдемъ, рай | eden, raj. {RELI} {NOM} — [Beau] Eden.

V. Mezurunuoj en UV

14 Pli detale vd. en BK II, kie ili estas markitaj per la siglo „{MEZ}“:

funt' - livre | pound | Pfund | фунтъ | funt. — **funto** - livre | pound | Pfund | фунтъ | funt [FE 31]. — Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero [FE 31]. o **funt'o da viand'o** - a pound of meat [UV da]

fut' - pied (measure) | foot | Fuss (Mass) | футъ | stopa.

kilogram' – {MEZ} kilogram'o da viand'o - ein Kilogramm Fleisch | килограмъ мяса | kilogram mięsa [UV da].

kilometro — {MEZ} Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo [FE 32.8, mankas en UV]. DL 1888: *Tiu ĉi rivero havas ducent naŭdek kvar kilometrojn da longo* [DL 3.5].—

lod' - demi-ounce | half an ounce | Loth | лоть | łut.

mejl' - mille (measure itinéraire) | mile | Meile | миля | mila.

metro – Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ da frankoj) [FE 14, mankas en UV]. Alportu al mi metron da nigra drapo (Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo) [FE 32].

sekund' - seconde | second | Sekunde | секунда | sekunda. — **sekundo** - seconde | second | Sekunde | секунда | sekunda [FE 12]. — Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj [FE 12.12].

stof' - stofe (measure) | stofe (measure) | Stof (Hohlmass) | штофъ | sztof (miara).

uln' - aune | ell, yard | Elle | локоть | łokieć.

unc' - ounce | ounce | Unze | унція | унсуа.

verst' - verste | verst | Werst | верста | wiorsta.

VI. Majuskloj kaj minuskloj

Literaturo (selekto): **Stojan**. La uzo de grandliteroj. En: Esperanto (UEA) 1924, p. 55. **Christaller**. La majuskloj kaj Esperanto. En: Esperanto-Mondo. Hannover n. 1, 1927, p. 6. - **Lippmann**, Walter. Raporto de la jaro 1928. En: Oficiala Dokumentaro. 20a Universala Kongreso de Esperanto. Antwerpen 1928, p. 111. – Kontribuoj en Akademiaj Studoj (AkSt): **Eichholz** 1983, p. 40-43; Mi, Lorenc' [= **Mee**, Lawrence] 1984, p. 26-27. **Albault**, André (1985). Majuskloj en la Fundamento. En: AkSt 1985, p. 28-30; samtitole en: EspAktuell (GEA) 1995:14:4, p. 12 (pledas por „Angla“ anstataŭ „angla“).

- 15 Eksplicitan regulon pri majuskla aŭ minuskla skribo (uskleco) la Gramatikoj ne havas. Oni devas dedukti el la ekzemploj de Ekzercaro, UV kaj FG. Ili estas nur parte koheraj kaj konsekvencaj pri uskleco.

1. Tagoj, monatoj, sezonoj

- 16 Konsekvencaj ili estas pri la nomoj de tagoj (ĉiuj minusklaj: lundo ...), de monatoj (ĉiuj majuskla: Januaro ...) kaj sezonoj (ĉiuj minusklaj: printempo ...). La majuskloj ĉe monato-nomoj jam troveblas en la Dua Libro de 1888:

- La dek du monatoj de l' kristana jaro estas: Januaro, Februaro, Marto, Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro, Decembro [DL 16.7].

Okul-frapas, ke la francaj tradukoj de la monato-nomoj ĉiuj estas skribitaj majuskle, dum en moderna franca ili estas minusklaj, ekz.:

Septembr' - Septembre {2012: septembre} | September | September | Сентябрь | Wrzesień.

Tio tamen estis la ĝusta ortografio en la 1890-aj jaroj. La nuna uzo preferas minusklajn monato-nomojn en Esperanto.

2. Landanoj kaj adjektivoj derivitaj de etnonomoj

Literaturo (selekto): **Stuttard**, Mason. Pri Majusklado. En: Esperanto (UEA) 1950:43:02 (532), p. 29 (pledas por uzo de majuskloj). **Auld**, William (1950). Pri majuskloj. En: Malgranda Revuo [Svedujo] 1950:8:2, p. 36-38 (Pledas por forigo de ĉiuj majuskloj en Eo per teksto komplete skribite minuskle. Argumentoj: duobla formo de litero ne ekzistas en la araba, nek la latina, danĝero de konfuzo nur ŝajna). **Clapham**, Hugh (1981), Popolnomoj. En: BritE 1981 (840), p. 41 (Pledas por majuskligo de landnomoj kaj ties derivaĵoj). **Eichholz**, Rüdiger (1983). Majuskloj - ankoraŭ ne decidita problemo. En: AkSt 1983, p. 40-43 (repr. el Lumo 1980:somero, p. 11-13).

a) Superrigardo

- 17 Nekonsekvenca la Fundamento estas pri la uskleco de landanoj kaj adjektivoj derivitaj de etnonomoj („Germano“ aŭ „germano“, „la angla reĝino parolas la francan“ aŭ „la Angla reĝino parolas la Francan“). La demando estas diskutata de jardekoj.
- 18 La ĉefaj argumentoj aŭ nur asertoj (ni ellasas asertojn kiel „pli natura“, „pli bela“ k.s.) estas

por majuskla skribo

Z preferis ĝin en sia malfrua verko (Biblio, Fabeloj) kaj ŝanĝis sian pli fruan uzon post zorga konsidero faciligas legadon („Edama fromaĝo“ – „edama fromaĝo“) evitante homonimojn (*angora* kapro, ronda *kuba* ĉapelo, kisi *sardinon*, paroli *senegale*; simile: la *privata* verko [tiu de E. Privat] k.t.p.) kontraŭ „ne aŭdeblas legate“: neniu majusklo aŭdeblas legate, tamen la F-to havas ilin; gesta kaj mimika subteno mankas en skriba teksto el vidpunkto de la Z-a verko, minuskla skribo estas arkaa propranomeco kuŝas en la radiko mem kaj do estas konservinda

por minuskla skribo

ne aŭdeblas legate

la uzo jam decidis favore al minuskloj; majuskla skribo estas arkaa

b) Majuskle skribitaj nomoj de landanoj

- 20 Popol-nomoj tute mankas en UV, sed aperas divers-loke en FE. En la lecion-finaj vortlistoj de FE estas jenaj kvar okazoj de etno-nomoj kun majuskloj¹⁶²:

- **Germano** - *Allemand* | German | *Deutscher* | *Н_мецъ* | *Niemiec* [FE 34].
- *uj* - ... **Turko** *Turc* - Turkujo *Turquie* ... *Turko* *Turk* - Turkujo *Turkey* ktp. (same por germana, rusa kaj pola) (§ 20, p. 104)
- **Hispano** - *Espagnol* - Spaniard - *Spanier* ktp. (§ 34, p. 124)
- **Germano** - *Allemand* - German - *Deutscher* ktp. (§ 34, p. 124)
- **Franco** - *Français* - Frenchman - *Franzose* ktp. (§ 37, p. 128)

La francaj kaj rusaj tradukoj kun majuskloj estas malĝustaj, popol-nomojn oni skribas (kaj en 1896 skribis) minuskle en tiuj du lingvoj, majuskle en angla, germana kaj pola.

c) Minuskle skribitaj nomoj de landanoj

- 21 Kontraŭ ili staras multaj frazoj el la Ekzercaro mem, ekzemple en

- § 16: Ili estas rusoj.
- § 16: **ruso** - *russe* | Russian | Russe | *русский* | rossjanin.
- § 27: La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, ...), do **ne** "Rusoj aŭ Poloj".
- § 27: **polo** - *Polonais* | Pole | Pole | *Полякъ* | Polak.
- § 34: Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron.

685

¹⁶² Al ili referencas Albault en sia „Antaŭvorto al la 10-a eldono“ 1991, vd. supre en la Unua Libro de BK I.

- § 36: La **heb**roj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo.
- § 36: **heb**reo - juif | Jew | Jude | еврей | żyd.
- § 37: Germanoj kaj **fran**coj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj.
- § 40: La rusoj loĝas en Rusujo kaj la **ger**manoj en Germanujo.
- ktp.

Komparu cetere sube kun hebreo kaj ruso (tie malĝuste la minuskloj en la pola!), franco, hispano (tiel malĝuste kiel ĉe germano), polo (same, sed en Esperanto minuskle, ne majuskle kiel ĉe Franco, Germano, Hispano!!). Do oni vidas: ĉio eblas, granda kaoso, neniu kohereco, nenia unueca linio!

d) La „Antaŭvorto“ al la 10-a eldono de la Fundamento

- 22** Kiel la faktoj montras, la supre citita „Antaŭvorto al la 10-eldono“ 1991 de Albault estas misa. La stato de 1963 estu restarigita kaj la „ok korektoj“ forigita el la Fundamenta teksto. Diskuton vd. en la ĉapitro „Fundamento – Enkonduko“.

3. Religiaj festoj kaj personoj

- 23** Malunuece ankaŭ estas skribitaj la nomoj de religiaj festoj. Majuskle skribitaj estas:

- **Anunciaci'** - Annonciation de la Vierge | Annunciation | Verkündigung Mariä | Благовѣщення | Zwiastowanie.
- **Eden'** [OA 1] * Eden | Eden | Eden | эдемъ, рай | eden, raj. {RELI} {NOM} — [Beau] Eden.
- **Epifani-o** [OA 2.1] {RELI} — [EG 2].
- **Evangeli'** [OA 1] * Evangile | Gospel | Evangelium | евангелие | ewangielja. {RELI} — [Beau]. [EG 1].
- **Eŭkaristi-o** [OA 2.1] {RELI} — [Beau]. [EG 1] Eucharistie.
- **Jesu'** [OA 3.2] {en} Jesus | {fr} Jésus | {de} Jesus | {es} Jesus | {pt} Jesus | {it} Gesu | {pl} --- {traduko mankas}. — [Beau].
- **Krist'** - Christ | Christ | Christus | Христосъ | Chrystus. — **Kristo** - Christ | Christ | Christus | Христосъ | Chrystus [FE 37].
- **Mesi'** - Messie | Messiah | Messias | Мессія | Messyasz.
- **Pask'** - Pâques, Pâque | Easter | Ostern | Пасха | Wielkanoc.
- **Pentekost'**
- **Providenc'** [OA 1] * Providence | Providence | Vorsehung | Провидѣние | Opatrzność. — [Kabe].

- 24** Minuskle skribitaj estas:

- **bibli'** [OA 1] * Bible | Bible | Bibel | бензинъ | biblja. — [UL]. Mankas en MV.
- **ĉiel'ir'** [UV ĉiel'] - Ascension | Ascension | Himmelfahrt Christi | Вознесение Господне | Wniebowstąpienie. — *Ĉiel'ir'* Himmelfahrt Christi [MV] {majuskle}.
- **koran'** - Coran | Coran | Koran | Коранъ | Koran. — [RE 1889], [MV]: Koran' {majuskle}.
- **krist'nask'** - Noël | Christmas | Weihnachten | Рождество Христово | Boże Narodzenie [UV Krist'].
- **pap'** - pape | pope | Papst | папа (Римскій) | papież.

4. Honoraj titoloj

- 25** Honoraj titoloj kutime estas skribita majuskle. En VO troveblas

- **Eminenc'** [OA 3.2] {en} Eminence (title) | {fr} Eminence (titre) | {de} Eminenz | {es} Eminencia | {pt} Eminencia {legu: Eminência} | {it} Eminenza | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 1] **eminenc-o**, Eminenz (Titel).

- 26 La diversaj Oficialaj Aldonoj diversmaniere traktas la uzon de majuskloj kaj minuskloj, iafoje eĉ prezentante ĉiun elementon kun komenca majusklo, vd. la ĉapirton pri OA.
- 27 Laŭ AV „apenaŭ eblas sencohave paroli pri oficiala majuskleco de elemento, kaj tial ĉiuj elementoj estas en la Akademia Vortaro baze listigataj en neŭtrala tutmajuskla formo“ kaj ne „kalkulata kiel parto de la oficiala formo de elemento“. Tiu aserto tamen estas tro vasta, kiel montras la vort-klasoj, pri kiu ja ekzistas unueca uzo (propraj nomoj de personoj, lando- kaj monat-nomoj k.t.p.)

VII. Vortoj uzataj ĝenerale en pluralo

Literaturo (selekto): **PMEG** 8.2.2 (2013-06-14).

- 28 En multaj lingvoj ekzistas tri specoj de vortoj laŭ la vidpunkto de ebla unu- aŭ plurnombreco. Multaj vortoj povas esti „normale“ uzataj en singularo kaj pluralo (infano → infanoj); aliaj kutime estas uzataj *nur* en singularo (tie ĉi nomataj „singularvortoj“), ankoraŭ aliaj *nur* en pluralo (tie ĉi nomataj „pluralvortoj“). La tri kategorioj estas malsamaj en diversaj lingvoj:

ekzemplo	ambaŭnombreca	nur singulara	nur plurala
pantalon' [UV]	(eo) pantalon-o, -oj (de) Hose, Hosen		(en) trousers
okul'vitr'	(de) Brille, Brillen		(eo) okulvitroj
feri'	(eo) ferio [malofte, kutime feria tago], ferioj		(de) Ferien
feliĉ'		(de) Glück	
Nederland'		(eo) Nederlando	(en) Netherlands

- 29 En la Vortaro Oficiala ekzistas nur malmultaj ekzemploj por tiaj vortoj. Fundamenta estas *pantalone*, Oficiala *kastanjeto* kaj *ferio*.

- 30 - pantalon | pantalono, | Hosen | брюки | spodnie. — **pantalone** - pantalon | pantalons, trousers | Hosen | брюки | spodnie [FE 40]. En la poŝo de mia pantalone mi portas monujon, kaj en la poŝo de mia surtuto mi portas paperujon [FE 40].

-- La korekto de FE al *pantaloons* (plurale) estas ĝusta, ne ekzistas singularo de tiu historia kaj nuntempe ĝenerale ne plu uzata vorto. La Akademia Korekto (AK) de 1914 sugestas „legu: *trousers* (sen la arkaa *pantaloons*)“. Nek FE 40, nek AK tamen korektis la germanan tradukon: Devas esti *Hose* (singularo), ne *Hosen* (pluralo), ĉar en la germana la vorto ja havas singularon.

- 31 **ŝak'** - échecs (jeu) | chess | Schachspiel | шахматы | szachy {LUD}. — [AK] Schach (*Spiel*). — [RE]. [EG 1] **ŝak-o**, Schach[spiel]; **-a tabulo**, Schachbrett. — **Lingva Respondo 1901**: La nomoj de ŝako estas: ... *Schach* ŝako (aŭ ŝak!) ... [LR 19. Let. al Th. Thorsteinsson (1901), O.V. p. 522]. Z per tio ripetas al nova esperantisto la kutimon de E-isto Jan. 1892, p. 16: „Problemo de ŝako ...“. — **Rim.**: Plurale „ŝakoj“ ĉe [Beau], [Kabe] k.a.

- 32 Ekzemploj de kutime plurale uzataj terminoj estas: *lipharoj*, *okulharoj*, *okulvitroj*, *bonmoroj*, *belartoj*.

- 33 En la antaŭfundamenta, sed Zamenhofa EG 1 (1904) estas pluraj geografiaj nomoj en pluralo:

montaroj: Alpoj, Andoj, Apeninoj, Karpatoj, Pireneoj.
markoloj: Dardaneloj.
insularoj: Antiloj, ŝeroj.
lando: Unuigitaj Ŝtatoj

La listo de Rekomendataj Landnomoj (Akademio 2009) havas krome jenajn nomojn de landoj, kies teritorio konsistas el insuloj:

Bahamoj, Filipinoj, Maldivoj, Marŝaloj, Salomonoj, Sejŝeloj
fine la landonomon: Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj.

VIII. Enhavaj (semantikaj) ŝanĝoj

- 34** Klasika ekzemplo¹⁶³ pri enhava (semantika) ŝanĝo estas "forko" (§ 14), iam la laborilo de la fojnisto, dum la manĝilo estis "forketo", poste tamen inversigite: forko nun estas la manĝilo, forkego la laborilo:

[DL 1888]: Sendu al mi prunte dekduon da forketoj [DL 3].

§ 14: Mi aĉetis dekduon (aŭ dek-duon) da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj. — **forko** - fourchette | fork | Gabel | вилы, вилка | widły, widelec.

§ 34: Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo.

- 35** Pliaj ekzemploj (detalojn vd. en la vortara parto, BK II): biciklo, interpunkcio.

IX. Mallongigoj en la Fundamento

Literatur (selekto): **Hauptenthal**, Reinhard. **Pabst**, Bernhard. Berlina Vortaro de Mallongigoj, Sigloj kaj Akronimoj de Esperanto (BVM). Berlin 2015.

1. Superrigardo

- 36** Reguloj pri mallongigoj ne ekzistas en la F-to. Ĝi enhavas nur du oficialajn mallongigojn: „**t. e.** (= tio estas)“ [FE 14.7]. kaj „**k. t. p.** (= kaj tiel plu)“ [FE 30.10]. (detalojn vd. BK II). „t. e.“ jam troviĝas en DL 7.1 de 1888 kaj la samjara DL-Ald 2.1.

- 37** LR 66 B de 1893 jam notas mallongigojn por naŭ esprimoj:

LR 66 B (1893): „La signifo de la mallongigoj estas: t. e. = tio estas; k. c. = kaj ceteraj; k. t. p. = kaj tiel plu; e. = ekzemple; s-ro = sinjoro; d-ro = doktoro; frl. aŭ f-ino = fraŭlino; s-rino = sinjorino, n-ro = numero.“ (LR 66 B. Esperantisto 1893, p. 96 = PVZ III, 110].

Ne plu kutimaj estas „e.“ (nun „ekz.“), „frl.“ (nun „f-ino“) kaj „s-rino“ (nun „s-ino“).

- 38** La Konferenco de Arnhem (pasko 1932) petis la AdE oficiale reguligi kelkajn demandojn ligitajn al mallongigoj. Tio ĝis nun ne okazis. En oficialaj dokumentoj de la Akademio troveblas (apud multaj aliaj) i.a. jenaj (neoficialaj) mallongigoj.

mallongigo	signifo	komento
A	angla lingvo	Aktoj II, p. 14; ISO-kodaĵo „en“.
B.R.O.	Baza Radikaro Oficiala	Aktoj II, p. 28; alternative BRO
ĉ.	ĉirkaŭ	OA 8 en la difino de „skio“
dipl. inĝ.	diplomita inĝeniero	Aktoj II, p. 7
d-rino	doktorino	Aktoj II, p. 7
d-ro	doktoro	Aktoj II, p. 6
ekz.	ekzemple, ekzemploj	OA 9 en la difino de „minusklo“

685

¹⁶³ Vd. jam la noton de Albault 1963, p. xx.

ekz-e	ekzemple	OA 8 en la difino de „radiatoro“
F	franca lingvo	Aktoj II, p. 14; ISO-kodaĵo „fr“
fig.	figurative	OA 6.2 en la difino de „grego“
f-ino	fraŭlino	Aktoj II, p. 7
G	germana lingvo	Aktoj II, p. 14; ISO-kodaĵo „de“
H	hispana lingvo	Aktoj II, p. 14; ISO-kodaĵo „es“
I	itala lingvo	Aktoj II, p. 14; ISO-kodaĵo „it“
i.a.	inter aliaj, interalie	OA 8, en la difino de „nilono“
inĝ.	inĝeniero	Aktoj II, p. 7
k.a.	kaj aliaj	OA 8 en la difino de „reflekti“
kp.	komparu	OA 8 en la difino de „luko“
k.s.	kaj simile	OA 8 en la difinoj de „hangaro“ kaj „ŝoforo“
ktp	kaj tiel plu	OA 8 en la difinoj de „situo“ kaj „sorgo“. Fundamenta estas k. t. p. (FE 30.10)
lekt.	lektoro	Aktoj II, p. 7
m.	mortis aŭ mortinta	Aktoj II, p. 9
mag.	magistro	Aktoj II, p. 6
no.	numero	Aktoj II, titolo; pli kutima n-ro, ankaŭ n.
O.A.	Oficiala Aldono	Aktoj II, p. 11; alternative OA
p.	paĝo(j)	Aktoj II, p. 28
P	portugala lingvo	Aktoj II, p. 14; ISO-kodaĵo „pt“
pp	parolante pri	OA 8 en la difinoj de „preskribi“ kaj „reflekti“; transprenita el PIV 1970
p-ro	pastro	Aktoj II, p. 7
prof.	profesoro	Aktoj II, p. 6
rim.	rimarko	Aktoj II, p. 11
RIM.	rimarko	OA 8 en la difino de „kaskedo“
resp.	respektive	OA 8 en la difinoj de „minus“ kaj „plus“
S.A.T.	Sennacieca Asocio Tutmonda	Aktoj II, titolo; alternative SAT
s-ro	sinjoro	Aktoj II, p. 6
U.E.A.	Universala Esperanto-Asocio	Aktoj II, titolo; alternative UEA
UEA	Universala Esperanto-Asocio	OA 9 en la difino de „kodo“
U.V.	Universala Vortaro	Aktoj II, p. 11; alternative UV
v.	vidu	Aktoj II, p. 11; alternative „vd.“
vol.	volumo	Aktoj II, p. 28

2. Akronimoj

Literaturo (selekto): **Golden**, Bernard. Bibliografio de la verkoj de Bernard Golden pri mallongigoj, sigloj kaj akronimoj en Esperanto. En: Akademias studoj 1988-1990, p. 321. - **Wulff**, Jürgen. Das Esperanto-Dschungelbuch - kleiner Führer durch den Esperanto-Dschungel von Abkürzungen und Begriffen. 2a eld. Hamburg 1994, 22 p.

a) Superrigardo

- 39** Akronimo estas „vorto konsistanta el la komencliteroj de kompleksa nomo komerca, scienca, politika ktp, precipe uzata, kiam la tuto formas prononceblan vorton“ (PIV 2005). En Esperanto oni povas distingi du specojn. Akronimoj formitaj en aliaj lingvoj kaj transprenitaj kiel fremdvortoj laŭ R 15, ekz.: **lasero** (el la angla

laser), **modemo** (OA 9, el la angla *modulator-demodulator* → *modem*, uzata de 1958). **radaro** (angle *radar*), **Unesko** (siglo laŭ la angla UNESCO).

b) Akronimoj formitaj surbaze de esperantaj vortoj.

40 Ekzemploj de origine esperantaj akronimoj en VO estas

aidoso (OA 9) - el akirita imun-deficita sindromo, a-i-do-so.

Usono (OA 9) – el Unuigitaj Ŝtatoj de Nordameriko, u-so-no

41 Ekster VO estas multaj pliaj (eblaj) akronimoj. Ofte oni tamen ne scias, ĉu temas pri mallongigo aŭ akronimo. Tiel ekzemple GEA (Germana Esperanto-Asocio) foje estas legata „go-e-a“ (mallongigo), foje „ge-a“ (akronimo); GEJ (Germana Esperanto-Junularo) foje „gej“, foje „go-e-jo“. Jen pliaj ekzemploj el la konvencioj de la periodaĵo *Monato*.¹⁶⁴ „M“ signifas laŭ nia (diskutinda) opinio leginda kiel mallongigo, „A“ kiel akronimo, „M, A“ aŭ „A, M“ kiel ambaŭ kun prefero al la unue nomita.

siglo	M, A	signifo
AL	M	Araba Ligo
AU	M	Afrika Unio
ABE	M, A	Afrika Banko por Evoluo
ASAN	A	Asocio de Sudorient-Aziaj Nacioj
BR	M	Brita Regno (<i>Commonwealth</i>)
EEA	M	Eŭropa Ekonomia Areo
EFSF	M	Eŭropa Fonduso por Stabiligo Financa
ELKA	A	Eŭropa Liber-Komerca Asocio
EU	M	Eŭropa Unio
ĜKDK	M	Ĝenerala Konvencio pri Dogano kaj Komerco
IAE	M	Internacia Asocio por Evoluigo
IAEA	M	Internacia Atom-Energia Agentejo
IBRE	M, A	Internacia Banko por Rekonstruo kaj Evoluigo
ICAO	M, A	Internacia Civil-Avia Organizaĵo
IFK	M	Internacia Financa Korporacio
ILO	A	Internacia Labor-Organizaĵo
IMF	M	Internacia Mona Fonduso
IOMK	M	Interregistara Organizaĵo por Marafera Konsultado
IPTEJ	A	Internacia Pun-Tribunalo por Eksa Jugoslavio
IRA	M	Irlanda Respublikisma Armeo
ITU	M, A	Internacia Telekomunika Unio
KE	M	Konsilio de Eŭropo
KKG	M	Kunlabora Konsilio de la Golfo
KŜ	M	Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj
KUNKE	A	Konferenco de UN pri Komerco kaj Evoluigo
MOK	M, A	Monda Organizaĵo pri Komerco

685

¹⁶⁴ http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_konv.php (2014-08).

MOM	M, A	Monda Organizaĵo pri Meteologio
MOS	M, A	Monda Organizaĵo pri Sano
MOT	M, A	Monda Organizaĵo pri Turismo
NALKA	A	Nord-Amerika Liber-Komerca Asocio
NATO	A	Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo
OAPEL	A	Organizaĵo de Arabaj Petrol-Eksportaj Landoj
OAS	M, A	Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj
OAU	M	Organizaĵo por Afrika Unueco
OEKE	A	Organizaĵo por Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo
OIK	M, A	Organizaĵo de la Islama Konferenco
ONA	M, A	Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo
OPEL	A	Organizaĵo de Petrol-Eksportaj Landoj
OSKE	M	Organizaĵo pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo
SAEK	M, A	Sud-Afrika Evolu-Komunumo
SKM	M	Suda Komuna Merkato
UN	M	Unuiĝintaj Nacioj
Unesko	A	Organizaĵo de UN por Edukado, Scienco kaj Kulturo
UNIDO	A	Organizaĵo de UN pri Industria Disvolvado
UPU	M, A	Universala Poŝta Unio

42 [Daŭrigota].

X. Vortinternaj ellasoj (aŭtomobilo – aŭto)

43 Aparta grupo estas vortoj laŭ la titolo citita modelo „aŭt(omobil)o“. Pliaj ekzemploj:¹⁶⁵

plena formo	statuso de la plena formo	mallonga formo	statuso de la mallonga formo
aŭtomobilo	OA 1	aŭto	OA 8
fotografajo	FE 32.4	foto	OA 9
kinematografio	OA 8 (en la dif.)	kino	OA 8
omnibuso, aŭtobuso	OA 1, OA 8	buso	neoficiala
taksametra aŭtomobilo	neoficiala	taksio	OA 9

Al tiuj okazoj aldoniĝas kelkaj fruaj landnomoj, kie la elemento „land“ elfalis:

Perulando [Z, LR 18 A, let. al Fruictier (1902), OV p. 426] → Peruo [OA 8]

Sudanlando [Rhodes 1908, 527] → Sudano [OA 8].

DL 1888 krome havas: tagmanĝi ← tagmezmanĝi [DL 16.10].

44 Supozeble similaj okazoj estas la sekvantaj formoj; tamen ankoraŭ necesas detala analizo. E = uzita en la Ekoturisma vortareto. Mon = uzita en la periodaĵo „Monato“ (Belgio), Ondo = en „La Ondo de Esperanto“ (Rusio).

685

¹⁶⁵ Prenitaj el **Lippmann**, Walter. Raporto de la Direktoro de la Gramatika Sekcio. [Jarraporto 1932]. En: Lingva Kritiko vol. 1 (1932) n. 8 (Sept), p. [3] = [31]. Tie ankoraŭ – malsame kiel en la posta OA 8 – kino = kinematografiejo, do la konstruaĵo, kie oni prezentas filmojn, ne la filmarto, kiel en OA 8.

baza vorto	derivaĵo	mallongigo	ekzemploj
biologi-o (OA 1)	biologi-a	bio (logi-a)	bioagrikulturo (Mon), biodizelino (Mon), bioenergio (Mon), biogaso (Mon), bioindustrio (Mon), bionafto (E), bioprodukto (Mon), bioritmo (E), biosintezo (Mon), bioteknologio (Mon), biovino k.m.a.
elektronik-o (OA 8)	elektronik-a	e (lektronik-a)	e-komercio, e-libro, e-PIV
ekologi-o (OA 9)	ekologi-a	eko (logi-a)	ekobredado (E), ekokonscienco, ekokultur(ad)o (E), ekonutraĵo (E), ekopartio, ekoturismo (E) k.m.a.
geografi-o (FE 3)	geografi-a	geo (grafi-a)	geobiologio, geobotaniko, geosciencoj, geosfero, geostrategio, geozoologio k.m.a.
maksimumo (OA 3)	maksimum-a	maksi (mum-a)	maksibotelo, maksijupo
minimumo (OA 3)	minimum-a	mini (mum-a)	minidisko, minijupo
socialismo	socialism-a	soc (ialism-a)	soc-ekonomio, soclando (Ondo)

XI. Idiotismoj kaj esperantismoj

- 45** Idiotismo aŭ idiomaĵo laŭ PIV 2005 estas „sintagmo propra al iu idiomo, sen sintaksaj similaĵoj en aliaj idiomoj“. Ekzemplo estas „**el'rigard'i**“, arkaa paŭso de la germana aus'seh'en“ (*kiel belege la vestoj elrigardis!*¹⁶⁶), nun „aspekti“. Ili estas relative oftaj en fruaj tekstoj de Z, do ankaŭ en la Fundamento. Jam en 1905 Z skribis pri ili:

LR 44 (1905) [Pri idiotismoj en Esperanto]: La esprimon *vidiĝi* anstataŭ *elrigardi* mi trovas tute bona. Mi esperas, ke iom post iom ĉiuj idiotismoj malaperos kaj cedos sian lokon al esprimoj tute logikaj [legu: raciaj] kaj internaciaj. Tamen laŭ mia opinio ni devas fari tian anstataŭigadon nur en tia okazo, se ni povas tion ĉi fari tute *oportune*; sed en okazo, se ni por ia idiotismo *ne* trovos pli bonan esprimon pure logikan [legu: racian], tio ĉi ne devas nin ĉagreni; kaj la idiotismo povas tute oportune resti kiel “esperantismo”, se ĝi nur estos komune *akceptata*. [LR 44. Let. al Couturat. *Lingvo Internacia*, 1905, p. 545].

- 46** Pliaj ekzemploj

idiotismo, paŭso de	germana	alternativo / komento
ĉef'e [Z] ¹⁶⁶	haupt'säch'lich	precipe
ĉef'urb'o [Z] ¹⁶⁷	Haupt'stadt'	regurbo (sidejo de la registraro): La regurbo de Nederlando estas Hago, la ĉefa urbo Amsterdamo.
el'don'i [A 3.3]	heraus'geb'en	editori de lat. <i>ex</i> kaj <i>dare</i> (el kaj doni); la germana estas paŭso de la latina
el'lern'i [A 5.4]	aus'lern'en	finlerni

685

¹⁶⁶ Tekstaro montras du trafojn ĉe Z: „Volapuk pereis **ĉefe** pro unu grava eraro ...“ (Paroladoj UK 7, 1911 - Antverpeno) kaj „... ĝi estis kaŭzita **ĉefe** de la bona manĝaĵo ...“ (Fab. 4).

¹⁶⁷ „...ni ĉiujare kunvenas en la **ĉefurbo** de Esperantujo ...“ (Paroladoj UK 3, 1907 – Kembriĝo) k.m.a.

el'met'i [UV met']	aus'stell'en	eksponi, ekspozicii de lat. <i>ex kaj ponere</i> , (el kaj meti); la germana estas paŭso de la latina prononc'i [OA 3.1]
el'parol'i [UV parol]	aus'sprech'en	
el'pend'aj'o [UV pend']	Aus'häng'e'schild	
el'pens'i [UV pens']	aus'denk'en	inventi
el'spez'i [UV spez']	aus'geb'en	
mult'e'nomb'r'o	Viel'zahl'	LR 107 (1907); pluralo
en sekvo de [FK 218]	in Folge von	„sekve de“ aŭ simple „pro“
venas de [FK 218]	kommt daher	sinonimo de <i>entsteht</i> <i>dadurch</i> , „ekestas, ĉar“
ver'ŝajn'e [Z] ¹⁶⁸	wahr'schein'lich	probable

XII. La referenc-lingvoj de la Fundamento

1. Superrigardo

47 La referenc-lingvoj de la Fundamento estas laŭ la ordo de apero en la Gramatikoj, la lecion-finaj vortlistoj en FE kaj la UV la franca, angla, germana, rusa kaj pola. Laŭ la kronologio (aperdato de la Unua Libro) la ordo tamen estas jena:

1. rusa, 1-a eld.
2. rusa, 2-a eld.
3. pola
4. germana
5. franca
6. angla, praeld. (St.)
7. angla, eld. (G.)

Ekir-punkto de la interpreto kutime estu la traduko al la rusa kiel ĝi estis uzata en la 1880-aj kaj 1890-aj jaroj. Ĉu la posta pozicio apartenas al la pola aŭ la germana ĝis nun ne estas klara, ĉar mankas detal-studoj. Kiom koncernas la germanajn tradukojn oni ĉiukaze devas konsideri, ke la germana de Zamenhof jam estis malmoderna kaj arkaa fine de la 19-a jarcento. Li skribis germanan el la unua triono de tiu jarcento. Por kompreni, kion li volis esprimi, oni do devas referenci al vortaroj kaj enciklopedioj de tiu epoko, detale vd. la ĉapitron „La germana de Zamenhof“. Sur la lastaj pozicioj de interpreta valoro ĝenerale sekvas la franca kaj fine la angla. Tio tamen estas tre ĝeneraligita observo kaj povas dependi de la konkreta okazo kaj de specifa esperanta radiko.

2. La franca

48 La franca estis nur la kvara moderna fremd-lingvo de Zamenhof post la rusa (ĉefa), la jida, pola kaj germana. Ekzistas tri-era „korekto-ŝtuparo“ de 1898, 1901 kaj 1914 pri la francaj tradukoj en UV.

a) La Ekcerzaro 1898 kiel korektilo de UV

49 Dum UV kun la solaj esceptoj de vipero / vipuro restis neŝanĝitaj de 1893, Zamenhof plibonigante ŝanĝis la Ekzercaron, inter la unua eldono de 1894 kaj la dua de 1898. La tria kaj kvara estas senŝanĝaj represoj de la dua eldono, kiu fariĝis Fundamenta en 1905. Ĉar Zamenhof uzis la preparon de la 2-a eld. de FE

685

¹⁶⁸ Ofta ĉe Z. Tekstaro montras 28 trafojn de „verŝajn-“, ekz. „Se ne ekzistus tiu eraro, ..., Volapuk neniam pereus kaj ni ĉiuj nun **verŝajne** parolus volapuke.“ (Paroladoj UK 7, 1911 - Antverpeno).

ankaŭ por plibonigi la tieajn francajn tradukojn, UV kaj FE tiu-punkte ne plu estas identaj. Jen tipa ekzemplo, kie al la traduko de „grava“ estas aldonita *important*:

- UV 1893: **grav'** - grave | important | wichtig | важный | ważny.
- FE 1898: **grava** - grave, important | important | wichtig | важный | ważny [§ 22].

b) La vortaro Esperanta-Franca de Louis de Beaufront 1901

50 Louis de Beaufront korespondis kun Zamenhof pri dubaj kazoj en la UV kaj parte tre detale en formo de „lingvaj respondoj“ klarigis ilin en sia vortaro Esperanto-Franca de 1901 (antaŭparolo de 1899). Ĉar la korespondado perdiĝis, ne estas konate, kiugrade la klarigoj troveblaj en la vortaro de de Beaufront estas zamenhofaj aŭ bofrontaj. Malgraŭ tio, ofte estas helpe pri dubaj kazoj de la franca konsulti la vortaron de de Beaufront. Pri **grav'** ĝi havas:

- **grav**, grave, important. **graveco**, importance, gravité.

c) La Akademiaj Korektoj 1914

51 Liaj klarigoj poste ofte estis transprenitaj en la Akademiaj Korektoj (AK) de la francaj tradukoj. Jen la ekzemplo de **grav'**

- **grav**, grave, important.

d) „La franca tra rusa binoklo“

Literaturo: Cherpillod, André. La Zamenhofa Radikfarado. 1990.

52 Multaj Fundamentaj elementoj, kiuj havas francan fasadon, tamen eble ne estas prenitaj rekte el la franca, sed kiel rusa (aŭ pola) fremd-vorto. En tiaj okazoj la interpreto deiru de la signifo de la rusa fremd-vorto, ne de la franca etimo. Okaze de diferencoj inter ambaŭ, ĝenerale estas pli probabla, ke Zamenhof celis la rusan (aŭ polan), ne la francan signifon (semantikoj). Tion eblas dedukti el la paralela fenomeno de transskribo al Esperanto surbaze de rusaj aŭ polaj fremd-vortoj. Jen kelkaj ekzemploj pri „la franca tra rusa binoklo“.

aa) Transskribo de franca „oi“ [wa]

53 Franca „oi“ (foje, sed ne regule) estas transskribita al esperanta „ua“ pro rusa „ua“ kaj pola „ya“. Al la citaĵoj el la Vortaro Oficiala (esperanta – franca – rusa – foje pola) estas aldonita proksimuma transskribo de la rusa traduko al latina alfabeto en rektaj krampoj [..]:

- **buduar**-o [OA 1] - boudoir – будуар [buduar]
- **ekspluat**-i [OA 2] [Beaufront 1902] - exploiter - эксплуатировать
- **memuar**-o (Z 1912¹⁶⁹) - memoire - мемуары [memuar] (en la rusa signifas: memor-libro)
- **repertuar**-o [OA 1] [Jürgensen 1904] - repertoire – репертуар [repertuar]
- **trotuar**-o [UV] [RE 1889] - trottoir – тротуар [trotuar] - trotuar, chodnik
- **tualet**-o [UV] [RE 1889] - toilet – туалет [tualet] – tualeta
- **vual**-o [UV] [RE 1889] - voile – вуаль [vual] - wual, zasłona

54 La transskribo de franca „oi“ [wa] per esperanta „ua“ tamen estas nur unu el ses diversaj metodoj uzitaj de Zamenhof. Jen kion Cherpillod skribas pri la transskribo de nura franca „oi“¹⁷⁰:

Franca **OI** [wa] → **OI**, aŭ **OJ**, aŭ **OE**, aŭ **O**, aŭ **E**, aŭ **UA** (neniu preciza regulo)

685

¹⁶⁹ Zamenhof. Gentoj kaj Lingvo Internacia. Memuaro. Aparta eldono 1912 de la Esperanto-Propaganda Instituto en Leipzig. N-roj 1-15.

¹⁷⁰ Cherpillod, La Zamenhofa Radikfarado, 1990, p. 18.

- **OI**: foire - foiro, soif - soifo
- **OJ**: fois - fojo, foin - fojno, coin - kojno, voie - vojo
- **OE**: point - poento
- **O**: croiser - krozi, toile - tolo
- **E**: Artois - arteza, voiture - veturi (itale vettura)
- **UA**: exploiter - ekspluati, mémoire - memuaro, trottoir - trotuaro (ruse тротуаръ, [pole trotuar]), toilette - tualetto (ruse туалетъ, pole tualeta), voile - vualo (ruse вуаль, pole wual).

bb) Aliaj transskriboj el la franca tra la rusa kaj / aŭ pola

- 55** Similaj observoj pri la „franca OI en rusa vesto UA“ eblas ĉe multaj aliaj transskriboj. Jen kelkaj malmultaj pliaj ekzemploj:¹⁷¹

Franca **ŒU** → esperanta **E** aŭ **O**:

- **manovr**-i - manœuvrer - маневрировать, sed манёвр.

Franca **-ILL** [j] → esperanta **LJ** laŭ la slava kutimo:

- **buljon**-o - bouillon - ruse: бульон [buljon] - pole: buljon

Franca **-ILL** [ij] → esperanta **L** laŭ la rusa:

- **vanil**-o - vanille [ij] - germana: Vanille [il-le] - rusa: ваниль [i] - pola: wanilia.

- 56** Tre abundan liston de tiaj transskribaj mekanismoj aplikataj (neregule) de Zamenhof oni trovas en la verko *La Zamenhofa Radikfarado* de André Cherpillod (1990). En la kunteksto pri interpretado de la preciza signifo de Fundamentaj radikoj sufiĉas konsciiĝi, ke oni okaze devas kompreni vorton malgraŭ ĝia franca fasado ne laŭ la franca, sed laŭ la rusa aŭ pola signifoj, kiuj ne nepre estis identaj fine de la 19-a jarcento. Tipaj ekzemploj estas *menuaro* kaj *muĝi*.

3. La angla

- 57** La angla estas la referenc-lingvo, kiun Zamenhof plej malbone regis. En la Antaŭparolo de 1905 li eĉ atentigas pri tio: „Tial la legantoj ne miru, ke ili trovas en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la «Universala Vortaro» {de 1893} [A 4.2].

a) Ĉu brita aŭ usona angla?

- 58** Detala analizo de la angla en la Fundamento kaj la Oficialaj Aldonoj ĝis nun mankas. Ŝajnas, ke plej multaj tradukoj al la angla uzas la britan variaĵon, sen ke tio estus tute senescepta kaj kohera, nek en la Fundamento, nek en OA 1. Tiu impresio tamen baziĝas sur nur kelkaj hazardaj trovoj.

b) Ĉu brita –our aŭ usona –or (harbour / harbor)?

- 59** Jenaj ekzemploj estas citindaj:

- **fam**' - bruit | fame, rumour | ... {brita –our, do ne usone rumor}.
- **fervor**' - zèle, ferveur | zeal, ardour | ... {brita –our, do ne usone ardor}.
- **haven**' - port, hâvre | port, harbour ... {brita –our, do ne usone harbor}.

Vd. tamen:

- **honor**' - honorer | honor | ... {la verbo to honor laŭ la usona variaĵo}.
- **honor**'o - honneur | honour | ... {la substantivo honour (subst.) laŭ la brita variaĵo}.

685

¹⁷¹ Ekzemploj laŭ Cherpillod, Zamenhofa Radikfarado, 1990.

- **humor'** - humeur (caractère) | humor | ... | humor. — **humoro** - humeur | humor | ... | humor [FE 31]. — [AK] {en} temper, humor. {en UV kaj FE la usona variaĵo humor}
- **komplez'** - complaisance | favor, liking | — [AK] {en} favour, kindness.

Plia ekzemplo el OA 1:

- **akvarel'** [OA 1] aquarelle | aquarelle, water colours ... {brita –our, do ne usone color}.

c) Ĉu brita –re aŭ usona –er (centre / center)?

60 Troveblas jenaj ekzemploj en OV:

- **centr'** [OA 1] * centre | centre | ... {brita centre, do ne usona center}.

Tamen:

- **metr'** [OA 1] * metre | meter | ... {usona meter, do ne brita metre}

d) Ĉu brita –ise aŭ usona –ize (criticise / criticize)?

61 En la Fundamento estas uzata nur la brita formo kun –ise, dum en la Akademiaj Korektoj kaj en Aldonoj 1 kaj 3 oni trovas jen la britan, jen la usonan formon.

Ekzemploj por brita –ise (ordigita laŭ dato de oficialigo):

- **bapt'** - baptiser | baptise | ... {brita –ise, do ne usona –ize}
- **kaŭteriz'** - cautériser | cauterise | ...
- **kon'** - connaître | know (by experience or study), recognise | ...
- **kritik'** - critiquer | critick, criticise | ...
- **mobiliz'** [OA 1] mobiliser | mobilise | ...
- **Kateĥiz'**, **katekiz'** [OA 3.2] to catechise | ...

Ekzemploj por usona –ize (ordigita laŭ dato de oficialigo):

- **karakteriz'** [OA 1] * caractériser | characterize | ... {usona –ize, do ne brita –ise}
- **organiz'** [OA 1] * organiser | organize | ... {usona –ize, do ne brita –ise}
- **kon'** - connaître | know (by experience or study), recognise | ... — **koni** - connaître | know, recognise | ... [FE 8]. — [AK] know, recognize, be acquainted with.
- **Centraliz'** [OA 3.2] to centralize, ... {usona –ize, do ne brita –ise}
- **Narkot-i** (trans.) [OA 4] narcotiser | to narcotize | ... {usona –ize, do ne brita –ise}

e) Usonismoj en la Fundamento

62 Escepto-kaze oni trovas usonismojn en la Fundamento, precipe en UV 1893. Kutime ili estas ŝanĝitaj al brita uzo en la 2-a eldono de la Ekzercaro de 1898 (komparu supre la saman mekanismon pri la francaj tradukoj):

- **aŭtun'** - automne | fall (of the year) | ... — **aŭtuno** - automne | autumn | ... [FE 32].
- **kok'** - coq | rooster | ... — **koko** - coq | cock | ... [FE 33].

Kontraste vidu la britan terminon en

- **ministr'** [OA 1] * ministre | minister (of state) | ... {do ne usone secretary (of state)}.

f) Korektoj de la anglaj tradukoj en la Ekzercaro

63 Jam Albault en sia prilaboro de la Fundamento en 1963¹⁷² konstatis:

Ĝis publikigo de la Fundamento aperis kvar eldonoj de la Ekzercaro. ...: la dua eldono (1898), poste reproduktita senŝanĝe (...), enkondukis multajn korektojn en la tradukoj, precipe en la anglaj. Sed la Universala Vortaro ne estis paralele modifita, tiel ke en la Fundamento tiuj du partoj ne konkordas inter si.

Jen kelkaj hazardaj ekzemploj el §§ 5, 6 kaj 15:

- UV 1893: san' - sain, en santé | healthy | gesund | здоровый | zdrowy.
- FE 1898: sana - sain, en santé | well, healthy | gesund | здоровый | zdrowy

„well“ aldoniĝis en la angla rubriko.

UV 1893: **flor'** - fleurir | flourish | blühen | цв_сти | kwitnąć. — **flor'o** - fleur | flower, bloom | Blume | цв_токъ | kwiat.

- FE 1898: **floro** - fleur | flower | Blume | цв_ть, цв_токъ | kwiat

„bloom“ forfalis en la angla rubriko.

- UV 1893: **kolomb'** - pigeon, colombe | dove | Taube | голубь | gołąb'.
- FE 1898: **kolombo** - pigeon | dove | Taube | голубь | gołąb'.

„colombe“ forfalis en la angla rubriko.

- UV 1893: matur' - mûr | ripe | reif | зр_лый | dojrzały.
- FE 1898: matura - mûr | mature, ripe | reif | зр_лый | dojrzały.

„mature“ aldoniĝis en la angla rubriko.

- UV: ĝentil' - gentil, poli | gentle | höflich | в_жливый | grzeczny.
- FE: ĝentila - gentil, poli | polite, gentle | höflich | в_жливый | grzeczny [§ 15].

4. La germana

a) Latina kaj fraktur-skribo

64 Nur la germana Gramatiko estas skribita en la tiu-epoke „normala“ fraktur-skribo, dum la Ekzercaro kaj la Universala Vortaro uzas la tiam „fremdan“ latinan skribon. § 1 FE pri la alfabeto uzas ambaŭ. Tia paralela uzo de du skriboj estis kutima en la germana de la dua duono de la 19-a jarcento ĝis transiro al latina skribo en 1941 (pri kiu vd. malsupre).

b) Mankanta pres-tipo „ß“ en la Varsovia presejo

65 La Varsovia presejo en 1893 evidente ne disponis pri la speciala litero „ß“ de la germana kaj unuece anstaŭigis ĝin per „ss“ en FE kaj UV, dum ĝi estas laŭ la tiamaj ortografiaj reguloj ĝuste uzata en la germana Gramatiko.

c) La ortografia reformo de 1901

66 En 1901 okazis ortografia reformo de la germana. Tamen Zamenhof intence ne ŝanĝis la tradukojn al la germana skribita en la ortografio de 1893 (Antaŭparolo 4.2). La germana, kiun uzas la Fundamento aperinta en 1905, estas skribita laŭ la malnova ortografio de antaŭ 1901. Kvankam en tiu jaro okazis konferenco, kiu ŝanĝis la ortografion, la Fundamento ignoris tiun evoluon kaj restis ĉe la malnova sistemo. La eble plej tipaj ŝanĝoj (inter aliaj) estas tiuj:

685 _____

¹⁷² Senŝanĝa represo 1991, p. 15.

- muta -h- forfalis en -th-, do Redetheile en 1901 fariĝis Redeteile (tamen restis malmoderne en la Fundamento)
- la verba finaĵo -iren fariĝis -ieren (kun -e- indikanta, ke temas pri longa -i-), same la adjektiva -irbar [FG-de B.4: "undeklinierbar"] → -ierbar: de 1901 ĝuste "undeklinierbar".
- Hülfe [FG-de B.3] → de 1901: Hilfe
- multaj -c- en latin-devenaj fremd-vortoj fariĝis -k-: Adjectiv → Adjektiv, decliniren → deklinieren, aŭ -z- Citrone → Zitrone, xx

d) La transiro de fraktur-skribo al latinaj literoj ekde 1941

- 67 Laŭ decido de Hitler de la 3-a de januaro 1941 Germanio transiru de la fraktur-skribo al latinaj literoj. Baldaŭ poste oficialaj instancoj de la nazia partio kaj de la ŝtato, same kiel gazetoj produktitaj por distribuo en eksterlando ne plu uzis la ĝistiaman skribon, sed la novan „normalan germanan skribon“, baze speco de la latina. „Dekreto pri la nura instruado de la latina skribo kiel nova „normala germana skribo“ de la 1-a de septembro 1941¹⁷³ preskribis, ke ekde la lernojaro 1941/1942 germanaj lernejoj nur plu instru latinan skribon. Iom post iom tiu decido finis la preskaŭ ducentjaran paralelan uzon de fraktur- kaj latina skribo en Germanio. La skribo uzita en la germana Gramatiko fariĝis arkaa.

e) La ortografia reformo de 1996

- 68 Post preskaŭ 100 jaroj okazis plia ortografia reformo en 1996. Laŭ ĝi ni intertempe rajtas skribi "Alfabet" anstataŭ aŭ samrange kun "Alphabet" [G-de A], la germana do iom esperantiĝis (Delphin → Delfin → delfeno).

f) La germana de Zamenhof

- 69 Kiam Zamenhof verkis la diversajn partojn de la Fundamento, li uzis formojn de la germana ofte jam tiuepoke eksmodaj kaj malaktuala. Relative facile estas konstateble je multaj vortoj, ke lia germana estas tiu de la unua duono de la 19-a jarcento, ne tiu de la dua duono. Pli malfacile estas diri, ĉu Zamenhof uzis la varianton de la germana parolita en la (prusa-germana) nordo aŭ tiun de la german-regiona sudo, parolita precipe en aŭstra Vieno.

aa) Fine de la 19-a jarcento jam malaktuala germana de Zamenhof

- 70 Ekzemploj estas „selbänder“ (R 4 FG) kaj „Vezir“ (UV).

bb) Ĉu prusa aŭ aŭstra germana ĉe Zamenhof?

- 71 La demando pri la variaĵo de la germana, kiun Zamenhof uzis, ne estas klare respondebla. Troveblas kaj ekzemploj por nord-germana (prusa) kaj por sud-germana (aŭstra) uzo. La formo **ne** uzata en la Fundamento tie ĉi aperas en kurbaj krampoj {..}.

Esperanto	nord-germana	sud-germana
kamen'tub'	Schornstein	{Rauchfang}
plen'aĝ'	{volljährig}	mündig
sabat'	Sonnabend	{Samstag}
ŝtup'ar'	Treppe	{Stiege}
stup'	Hede	?

685

¹⁷³ Erlass zur alleinigen Unterrichtung der lateinischen Schreibrift als neuer „deutscher Normalschrift“ (Dekreto pri la sola instruado de la latina skribo kiel nova „germana norm-skribo“).

g) Korektoj de la germanaj tradukoj en la Ekzercaro

- 72 Kiel francajn kaj precipe anglajn tradukojn, Zamenhof ankaŭ korektis germanajn vortojn, registritajn en UV, en FE 1898. Ni ĉiam plibonigo sukcesis, kiel montras la ekzemplo de *prepozici'*:

prepozici' - préposition | preposition | Vorwort, Präposition | предлогъ | przyimek.
– **prepozicio** - préposition | preposition | Vorwort | предлогъ | przyimek [FE 27]. — Anstataŭ „la” oni povas ankaŭ diri „l’ ” (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo) [FE 27]. Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj. ... tiel same ni ankaŭ diras: “la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon”, kaj la vortoj „ĝardenon”, „tablon” staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en” kaj „sur” tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton ... en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n” tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne. [FE 28]. Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion „je”. Anstataŭ la vorto „je” ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio. [FE 29].

UV tradukas prepozici' al la germana per *Vorwort* kaj *Präposition* (nuntempe apenaŭ iu ankoraŭ uzas "Präposition", se li volas esprimi "antaŭparolo" = Vorwort). FE 1898 havis 50:50-ŝancon, sed anstataŭ forlasi "Vorwort", ĝi erare forlasis "Präposition". Sed en la teksto-ekzemploj ĉiam kaj ekskluzive temas pri prepozicio en la senco de la gramatika fak-vorto *Präposition*! Neniel disputeble la traduko per "Vorwort" (antaŭparolo) en tiu kunteksto estas malĝusta kaj estis tia jam en 1898.

5. La rusa

- 73 Post la revolucio de 1917 okazis ortografia reformo de la rusa per dekreto de la 10-a de oktobro 1918 („Декрет о введении новой орфографии” - „*Dekreto pri la Enkonduko de nova Ortografio*”). Ĝi i.a. forigis plurajn literojn. Detalojn vd. en la vortara parto BK II.

6. La pola

a) De Krakova uzo (UV 1893) al Varsovia uzo (FE 1898)

- 74 Detala studo pri la uzo de la pola en la Fundamento ne estas konata. Sekvas kelkaj observoj, kiuj tamen estas nepre kontrolendaj fare de kompetenta parolanto de la pola.
- 75 Inter 1887 kaj 1905, kiam Zamenhof verkis la diversajn partojn de la Fundamento, ne ekzistis pola ŝtato, kiu efikus unuecigi pri „oficiala” varianto de la pola. La plej disvastigitaj formoj estis la uzo de Varsovio (tiuepoke al Rusio) kaj de Krakovo (tiuepoke al Aŭstrio-Hungario). Zamenhof ŝanĝis la polajn tradukojn en UV 1893 laŭ krakova uzo („historja”) al varsovia uzo en FE 1898 („historja”). Post la **ortografia reformo de la pola en 1936** la nuna formo estas „historia”. Simile oni antaŭreforme skribis *Marja*, *historja*, *Anglja* en la pola de Varsovio kaj *Marya*, *historya*, *Anglya* en la pola de Krakovo. Laŭ la nuna ortografio oni skribas *Maria*, *historia* kaj *Anglia*.

b) Ŝanĝoj de polaj vortoj je –y aŭ -j en la Fundamento

- 76 Jen la kompleta listo de la polaj vortoj je –y aŭ -j, troveblaj en la Fundamento. La unua formo estas tiu trovebla en UV 1893, la dua tiu en FE 1898, la tria la nuntempa. La ofta „[—]” signifas „traduko mankas”. Nur malmultaj radikoj el UV 1893 ankaŭ aperas en FE 1898.

cikori' - cykorya → [—] → cykoria {BOT}.
diplomatío - [—] → dyplomacia → dyplomacia [FE 32, mankas en UV].
gvardi' - gwardya → [—] → gwardia.
hemi' - chemia → chemia [FE 32] → chemia.
histori' - historia → historja [FE 10] → historia.
kancelari' - kancelarya → [—] → kancelarja.
litani' - litanja → [—] → litania.
Mesi' - Messyasz → [—] → Mesjasz {RELI}.
misi' - misya → [—] → misja.
mister' - misterya → [—] → misteria.
naci' - naród, nacya → naród, nacja [FE 27] → naród.
korporaci' - korporacya, cech → [—] → korporacja.
ofic'ej' - biuro, kancelarya → [—] → kancelarja.
parti' - partya → [—] → partia.
polic' - policya → policya [FE 37] → policja.
porci' - porcya → [—] → porcja.
premi' - premia → [—] → premia.
profesi' - profesya → [—] → profesja.
provinc' - prowincya → prowincya [FE 37] → prowincja.
redakci' - redakcyo → [—] → redakcja.
restoraci' - restauracya → [—] → restauracja.
seri' - serya → serya [FE 30] → seria.
situaci' - sytuacya, położenie → [—] → sytuacja.
staci' - stacya → [—] → stacja.
ŝtof' - sztof (miara) → materja, materjał [FE 14] → materia, materiał.
Turk'uj' - Turcya [UV uj'] → Turcya [FE 20 uj'] → Turcja.
unc' - uncya → [—] → uncja.

77 La vorto *diplomatío* mankas en UV kaj estas nur enkondukita en FE 32, kie ĝi ricevis la modernan formon kun -j-, ne kun -y-.

78 La vorto *chemia* ja aperas ambaŭloke, sed ĉiam restis senŝanĝa kun -i-. La formon *nacya* [UV] → *nacja* [FE 27], Zamenhof same korektis kiel *historia* → *historja* [FE 10] → *historia*. Li tamen nek faris ĉe *policya* → *policja* [FE 37] → *policja*, nek ĉe *prowincya* → *prowincja* [FE 37] → *prowincja*. Ĉu pretervido? Neŝanĝita fine ankaŭ *Turcya* [UV uj'] → *Turcya* [FE 20 uj'] → *Turcja*. Ĉe **ŝtof'** la Ekzercaro enkondukas tute novan tradukon. Anstataŭ la germanismon *sztof* (de *Stoff*), *materja* kaj *materjał*, ambaŭ kun (moderna?) -j- anstataŭ -y-, simile kiel *dyplomacia*. Inter 1893 kaj 1898 ni do trovas du evidentajn ŝanĝojn (*historja*, *nacja*), tri nove enkondukitajn kun j-skribo (*diplomacia*, *materja* kaj *materjał*) kaj tri neŝanĝojn (*policja*, *prowincja*, *Turcja*).

XIII. Aliaj lingvoj kun ebla influo sur la VO

Literaturo (selekto): **Vilborg**, Ebbe. Etimologia Vortaro [EVE]. **Cherpillod**, André. *Konciza Etimologia Vortaro*. Roterdamo 2003.

79 Ekzistas abunda literaturo, ĉu kaj kiugrade lingvoj aliaj ol la kvin referenc-lingvoj influis la esperantan vortaron. La plej gravaj „kandidatoj“ estas la jida, hebrea, latina, antikva greka kaj Volapuko. Sed krome estas lingvoj kiel la litova¹⁷⁴ kaj eĉ la okcitana, kies ebla influo al iu lingvoelemento de Esperanto estis kaj estas diskutata. La problemo estas distingi nuran hazardan koincidon (ekz. zulusa *mi* = esperanta *mi*) de konscia imito de iu lingva modelo fare de Zamenhof. Albault jam en 1961 atentigis pri surprizaj paraleloj inter Esperanto kaj la okcitana (vd.

685

¹⁷⁴ Z. loĝis en la litova urbeto Veisiejai post la medicina ekzameno kiel juna kuracisto de 1885-02 ĝis 1885-05 (ĉ. 4 monatojn)..

malsupre) kaj argumentas, ke eĉ se Z certe ne „sciis“ la okcitanan, li eble studis tiuepoke aperintan (1878) vortaron „provencan-francan“. Tiu pripenso eĉ pli validas por lingvoj kiel la hispana, itala aŭ portugala. Malsupre ni donas kelkajn malmultajn indikojn pri tiuspeca etimologia fakliteraturo de Esperanto, ordigita laŭ lingvonomoj.

- 80 Intime rilata al la ĵus menciita literaturo estas tiu – simile abunda – pri la demando de la personaj lingvo-konoj de Zamenhof.

1. Greka antikva

Literaturo (selekto): **Vilborg**, Ebbe (1961). Esperantigo de grekaj nomoj. En: Esperantologio 1961:2:2, p. 152-158. - **Albault**, André (1966). Provo de transskribo de du semidaj lingvoj (hebrea kaj araba) kaj de la greka lingvo. En: Biblia Revuo 1966:5, p. 25-35.

- 81 [daŭrigota]

2. Jida

Literaturo (selekto): **Gold**, David L. "Towards a Study of Possible Yiddish and Hebrew Influence on Esperanto". En: Szerdahélyi, Istvan (red.). *Miscellaneous Interlinguistics* (Budapest: Tankönyvkiadó). 1980, p. 300-367. — **Piron**, Claude (elfrancigis: Doron Modan). Kontribuajo al la Studo pri la Influoj de la Jida sur Esperanton. En: Jewish Language Review, 4, 1984.¹⁷⁵ — **Cherpillod**, André. Leksikaj Vagadoj. La Blanchetière 2012. **Cherpillod**, André. Etimologiaj Vagadoj. La Blanchetière 2012.

a) Esperanta f-, jida f-, germana pf-

- 82 Kontraste al asertoj en la malnova literaturo, nuntempe estas ĝenerale akceptite, ke iuj esperantaj vortoj je **f-** venas de la jida je **f-** pli ĝuste ol de la germana je **pf-**. Ekzemploj:

Esperanto	Jida (en transskribo)	latina	Germana
f-	f-		pf-
fajfi	fayfən		pfeifen
flegi	flegən		pfliegen
funto	funt		Pfund
fosto	fost		Pfosten
fuŝi	fuŝən		pfuschen

Kontraŭekzemplo nur **pfenigo** de germana *Pfennig*.

b) Esperanta –aj-, jida –ay-

- 83 Jen kelkaj ekzemploj:

Esperanto	Jida (en transskribo)	Germana
-aj-	-ay-	-ei-, -eu-
fajfi	fayfən	pfeifen
fajro	fayer	Feuer (angle: fire)

c) Esperanta –ej-, jida –ey-

- 84 Jen kelkaj ekzemploj:

685 _____

¹⁷⁵ Ankaŭ en <http://me.in-berlin.de/~maxnet/esperanto/piron/jida.htm>.

Esperanto -ej- hejti	Jida (en transskribo) -ey- heycen	Germana -ei- [prononco /aj/] heizen
-----------------------------------	--	--

3. Hebrea

Literaturo (selekto): Vd. supre ĉe „Jida“. Aldone: **Albault**, André (1966). Provo de transskribo de du semidaj lingvoj (hebrea kaj araba) kaj de la greka lingvo. En: Biblia Revuo 1966:5, p. 25-35.

4. Hispana

Literaturo (selekto): **Golden**, Bernard. Principoj por la esperantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj. En: Serta 1987, p. 235-257.

- 85 Z asertas en FE 34.14: „Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron.“ Pro ĝia konkreteco („vortaro hispana-germana“, ne hispana-franca, -rusa aŭ io alia) estas tre probable, ke tiu ekzerco-frazo ne estas iu inventaĵo, sed redonas la realon.

5. Latina

Literaturo (selekto): **Wüster**, Eugen. Principoj por Transskribo de (Grekaj-) Latinaj Substantivoj en Esperanton. En: Enciklopedia Vortaro. Leipzig 1923, p. [46]-[66].

- 86 [daŭrigota]

6. Litova

Literaturo (selekto): **Brozovič**, Dalibor (1959). Zamenhof kaj la litova lingvo. En: Nuntempa Bulgario 1959:12, p. 10-11 (reago al Albault en NBulg 1959:09, p. 15). - **Trunte**, Hartmut (1971). Ĉu la litova lingvo influis Esperanton? En: Esperanto (UEA) 1971/6, p. 104-105. - **Poška**, A. (1971). Povus esti, ke Zamenhof konis iom el la litova. En: Esperanto (UEA) 1971/6, p. 105 («Sendube, ke la litova lingvo estis iom al li konata.» Konfirmas aserton de Trunte pri influoj de la litova sur Esperanton. Eventuala influo je kelkaj punktoj: sufikso -op; tuj; -aŭ; direkta akuzativo ĉe adverbo; -u; direkta akuzativo ĉe substantivo). - **Poška**, A. (1981). Litovaĵoj en Esperanto-gramatiko. En: Filologo 1981:18, p. 6 (Kp. samtitole en Interlingvistiko. Esperantologio. (Kunmetis Violin Oljanov) 1985, p. 85). - **Vaitilavičius**, Adomas (1985). Deveno de la sufikso -ul. En: Interlingvistiko. Esperantologio 1985 (Litovaj sufiksoj -ul kaj -uol havas tute saman signifon kiel esperanta -ul kaj estas tre produktivaj en la litova kaj tre raraj en aliaj etnaj lingvoj). – Pliajn trafojn pri „litov“ serĉu en EBEA.

7. Okcitana

Literaturo (selekto): Albault, André (1961). Etimologio, pra-Esperanto kaj Mistrala lingvo - Metodo de la "koncidoj". En: Esperantologio 1961:2, p. 87-92.

8. Volapuko

Literaturo (selekto): **Schleyer**, Johann Martin. Volapük – Die Weltsprache. Entwurf einer Universalsprache für alle Gebildeten der ganzen Erde. Sigmaringen 1880 (Nachdruck Hildesheim, Zürich, New York 1982). - **Golden**, Bernard (1985). Influo de volapuko sur la ĝermanan komponanton de Esperanto. En: Haupenthal, Reinhard (red.). Li kaj Ni. 1985, p. 401-414.

- 87 En 1907 Zamenhof asertis jenon:

LR 145 B (1907): „Kreante mian lingvon, mi ne sciis Volapük, ĉar ĝi tiam ankoraŭ ne ekzistis. Pri la diversaj projektoj mi eksciis nur tiam, kiam Esperanto estis jam tute preta.“ [1907, PVZ VIII 44].

La unua libro de Volapuko, „Volapük – Die Weltsprache“, aperis en 1880.

88 [daŭrigota]

B. La Akademijaj Korektoj de la Universala Vortaro

I. Ekesto kaj interpreta valoro

- 1 Dum la 1-a Universala Kongreso (UK) en 1905 estis fondita la Lingva Komitato (LK), dum la 4-a UK en Dresdeno en 1908 la Akademio de Esperanto (AdE). Ĝi ekokupiĝis pri la korekto de la tradukoj de la vortoj en UV al la referenc-lingvoj franca, angla, germana, rusa kaj pola laŭ decido de la 2-a UK en Ĝenevo en 1906. La laboroj estis pretaj en 1914, sed pro la milito povis esti publikigitaj nur en 1922 (franca kaj angla) kaj 1923 (germana, rusa, pola). Almenaŭ pri la rusaj AK oni laboris ankoraŭ post 1918 kaj (parte) adaptis la rusajn tradukojn al la nova ortografio enkondukita en tiu jaro:

Lingvo	AK de	Aperjaro
franca	Louis de Beaufront, Th. Cart, Horace Huet (raportisto al la LK en 1911)	1922
angla	Adela Schafer, Joseph Rhodes, Ellis Millidge	1922
germana	Leopold Elb, Paul Christaller, Schefer	1923
rusa	S. Obruĉev (red.), Avilov, Kofman	1923
pola	Antoni Grabowski (red.), K. Bein (red.)	1923

- 2 Tiuj tradukoj al la kvin referenc-lingvoj estas eksterfundamentaj, kvankam ili aperas en UV kaj pro tio en la Fundamento mem. Ili ne partoprenas en la protekto de netuŝebleco, kiun donas la Fundamento al la esperant-lingva parto. Ja la Fundamento neniel povas influi tiajn eksteresperantajn faktorojn kiel la referenc-lingvoj. La AK do same estas eksterfundamentaj. Ili tamen donas valorajn interpret-helpon de samtempuloj pri la preciza signifo de la fundamentaj esperantaj vortoj (radikoj) (nur) en la UV 1893.

II. Pri la unuopaj Akademijaj Korektoj

1. Francaj AK (1914 / 1922)

- 3 Grava antaŭlaboro por la francaj AK estas la vortaro Esperanto-Franca (1901) de De Beaufront, kiu tamen mem transiris al Ido en 1907, tiel ke Huet anstataŭ De Beaufront raportis al la LK en 1911. Malgraŭ tio, multaj korektoj fidele sekvas la klarigojn kaj rekomendojn de De Beaufront el 1901.

2. Anglaj AK (1914 / 1922)

- 4 La anglaj korektantoj Joseph Rhodes (1856-1920) kaj Edward Alfred Millidge (1865-1941) paralele al la AK verkis vortarojn angla-esperantan (Rhodes 1908) kaj esperanta-anglan (Millidge 1912), kiujn indas konsulti en dubaj kazoj kiel interpret-helpon.

3. Germanaj AK (1914 / 1923)

- 5 La plej grava kontribuinto estis Paul Christaller (1860-1950), de kiu aperis epok-fara vortaro Germana-Esperanta en 1910. Christaller do laboris samtempe pri ambaŭ projektoj, germanaj AK kaj propra vortaro. Pro tio la Christaller-vortaro povas servi kiel interpret-helpon por la germanaj AK.
- 6 La germanaj AK jam uzas la reformitan ortografion de la germana de 1901 (vd. la ĉapitron „La referenc-lingvoj de la Fundamento“). Tio tamen ne okazas sisteme kaj ĉie, sed nur, se pro iu alia kialo estas proponita konkretigo aŭ ŝanĝo de germana traduko en vortara artikolo de UV. Nur por modernigi la ortografion germanaj tradukoj ne estas korektitaj.

4. Rusaj AK (1914 / 1923)

- 7 La *Antaŭparolo* al la rusaj AK, subskribita de S. Obruĉev, estas datita "Moskvo, 10 MAR 23". Plej multaj „korektoj“ estas disambiguoj de plursencaj rusaj vortoj, senco-klarigoj per aldono de sinonimo(j) ktp. Se iuj ŝanĝoj (plej ofte aldonoj) en la rusaj tradukoj okazas, la rusaj AK ripetas la tradukon en la UV, sed ne laŭlitere, sed skribante la vorton laŭ la nova rusa ortografio de 1918. Jen kelkaj ekzemploj. Plej ofte estas forfalo de la litero ъ vortfine (аббатъ → аббат), foje anstataŭo de ѣ per е (чѣмъ → чем):

abat' - abbé | abbot | Abt | аббатъ | opat. — [AK] аббат, игумен, настоятель. — [RE].

aĝ' - âge | age | Alter | вѣкъ, возрастъ | wiek. — [AK] возраст. — [UL].

akar' - mite | mite | Milbe | клещъ, червь | kleszcz, ślepak. {ZOO} — [AK] acare, mite, ciron | mite (*insect*) | клещ.

apr' - sanglier | wild boar | Eber | боровъ, вепрь, кабанъ | wieprz. {ZOO} — [AK] кабан, вепрь | dzik.

... ktp.

leŭtenant' - lieutenant | lieutenant | Lieutenant | поручикъ | porucznik, lejtnant. {MIL} — [AK] поручик, лейтенант.

... ktp.

ol - que (dans une comparaison) | than | als | чѣмъ | niż. — **ol** - que (dans une comparaison) | than | als | чѣмъ | niż [FE 10]. — [AK] чем (при сравнит, степени).

- 8 El tiuj ortografiaj modernigoj ni devas konkludi, ke oni almenaŭ pri la rusaj AK ankoraŭ laboris post 1914, eĉ post 1918, ĉar kompreneble oni ne povis antaŭscii en 1914, ke en 1918 okazos ortografia reformo.

5. Polaj AK (1914 / 1923)

- 9 Ankaŭ la polaj korektantoj Antoni Grabowski (1857-1921) kaj Kazimierz Bein (1872–1959) samtempe kun la laboroj pri la AK verkis proprajn vortarojn. Ambaŭ aperis en 1910, la pola-esperanta de Grabowski kaj la difinvortaro de Kabe.

C. Oficialaj Aldonoj (OA 1909-2007)

Literaturo (selekto): Referencojn kaj detalojn pri la Oficialaj Aldonoj vidu en La Letero de l'Akademio, n-ro 12 (Julio - Aŭgusto - Septembro 1990), p. 4. **Küick**, Andreas. Oficialaj lingvoelementoj de Esperanto (OLEO). Rechtenfleth: Aŭtoro 2008.

I. Superrigardo

- 1 Inter 1909 kaj 2007 aperis ĝis nun naŭ Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro (OA). Krome estis akceptitaj tri Decidoj pri Aldono (DA) de unuopaj elementoj („vortoj“) al la UV, nome de **analog'** (1923), **mis'** (1929) kaj **end'** (1953). OA 2 ĝis 6 (1919-1934) estas disigitaj en po du partoj.

OA / DA	jaro	Referenc-lingvoj - difinoj											Rimarkoj
		dif	fr	en	de	ru	pl	es	pt	it	ca	la	
F-to	1905	—	X	X	X	X	X	—	—	—	—	—	
1	1909	—	X	X	X	X	X	—	—	—	—	—	
2.1	1919	O	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	torso; 5 dif.
2.2	1919	—	X	X	X	—	—	—	—	—	—	—	torso
3.1	1921	—	X	X	X	—	X	X	X	X	—	—	
3.2	1921	—	X	X	X	—	X	X	X	X	—	—	
DA	1923	X	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	analog'
4	1929	O	X	X	X	—	—	X	X	X	X	—	dif. ĉe 23 vortoj
DA	1929	X	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	mis'
5.1	1934	X	X	X	X	—	X	X	—	X	—	—	
5.2	1934	X	X	X	X	—	X	X	—	X	—	—	
6.1	1934	X	X	X	X	—	X	X	—	X	—	—	
6.2	1934	X	X	X	X	—	X	X	—	X	—	—	
DA	1953	X	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	end'
7	1958	X	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	
8	1974	X	X	X	X	—	—	X	—	X	—	X	latinaj sciencaj nomoj
9	2007	X	—	—	—	—	—	—	—	—	—	X	latinaj sciencaj nomoj

- 2 Tradicie kaj en multaj vortaroj, precipe en Plena Ilustrita Vortaro (1970, 2002, 2005), oni distingas inter „fundamentaj“ kaj „oficialaj“ vortoj (t.e. lingvo-elementoj). Al la „fundamentaj vortoj“ apartenas laŭ tiu tradicio ĉiuj esperantaj lingvo-elementoj troveblaj en unu el la kvar partoj de la Fundamento laŭ la stato de 1905, trovebla

do en la UV, la Ekzercaro, la Antaŭparolo aŭ la Gramatikoj. Kontraste oni parolas pri „oficiala vorto“, se temas pri lingvoelemento, „kiun la Akademio de Esperanto aŭ la antaŭa Lingva Komitato decidis aldoni al la Universala Vortaro“¹⁷⁶.

- 3 Tiu tradicia distingo inter fundamentaj kaj oficialaj vortoj insinuas, ke la fundamentaj havus pli altan interpretan kvaliton ol la oficialaj. Ĝi kreas la impreson ĉe la publiko, ke la oficialaj lingvo-elementoj, do tiuj, kiujn Lingva Komitato aŭ Akademio aldonis al la UV post 1905, havus nur duan rangon malantaŭ la fundamentaj, sed ne estus samrangaj. Tiu ĝenerala impresio estas fortigita ankaŭ pro la fakto, ke ĝis hodiaŭ ekzistas nur libroforma eldono de la Fundamento laŭ la stato de 1905, kio en la kazo de la UV signifas laŭ la stato de 1893. Ne ekzistas libro-forma eldono de la Fundamento laŭ la stato de 2007, nome Fundamento, en kies UV estas integrita ĉiuj vortelementoj aldonitaj al la UV per la naŭ Oficiala Aldonoj kaj la tri unu-elementaj aldonoj. Ekstas do la demando, ĉu la klasika vort-trezoro de UV 1893 havas pli altan rangon ol la poste inter 1909 kaj 2007 aldonita vort-trezoro.
- 4 [Daŭrigota].

II. La 1-a Oficiala Aldono de 1909 (OA 1)

Literaturo (selekto): **Cart**, Theophile (1909): Unua Oficiala Aldono al Universala Vortaro. En: *Esperantista Dokumentaro*. Kajero dek-tria. Paris: Esperantista Centra Oficejo 1909, p. 7-31.

1. Enkonduko

- 5 La unua aldono aperis en 1909. Kvar jarojn antaŭe la Fundamento estis akceptita kiel leĝo de Esperanto kadre de la Bulonja Deklaracio. La unua aldono ampleksas 806 „novajn“ lingvoelementojn kaj 55 lingvoelementoj, kiuj jam aperis en la Fundamento aŭ Antaŭparolo al ĝi, sed ekster la ĝusta alfabeto ordo de UV (detalojn vd. malsupre). Ĝi estas la plej ampleksa OA aperita ĝis nun kaj la sola aperita, dum Zamenhof ankoraŭ vivis.

2. Prezent-maniero

- 6 Laŭaspekto OA 1 sekvas la modelon de la Universala Vortaro. De la Esperanto-vorto estas donita nur la radiko sen la vort-kategoria finaĵo. Sekvas tradukoj en la francan, anglan, germanan, rusan kaj polan laŭ jena ekzemploj:

abism' [OA 1] * abime {pres-eraro, legu: abîme} | abyss | Abgrund | пропасть, бездна | przeraść.

abort' [OA 1] * avorter | abort, miscarry | abortieren | выкинуть (недоноска) | poronić.

ktp. ĝis

zodiak' [OA 1] * zodiaque | zodiac | Zodiakus, Tierkreis | зодіакъ | zodiak.

zuav' [OA 1] * zouave | zouave | Zuave | зуавъ | żuaw.

- 7 Sola escepto al tiu prezent-maniero estas la elemento **aĉ'**. Por ĝi estas donita esperantlingva difino, dum tradukoj mankas:

aĉ' [OA 1] * *sufikso por montri malŝatan, malestiman sencon.*

3. La francaj tradukoj en OA 1

- 8 La presisto ne uzis francajn majusklaajn literojn kun diakritoj, sed anstataŭe la simplajn majusklojn sen akcento-signoj. Plej ofte temas pri „E“ anstataŭ „É“, ekzemple:

685

¹⁷⁶ Vd. www.akademio-de-esperanto.org/akademia_vortaro/klarigoj.html (2011-08-24).

Evangelii' [OA 1] * Evangile {legu: Evangile} | Gospel | Evangelium | евангеліе | ewangielja.

4. La anglaj tradukoj en OA 1

- 9 Studo pri la anglaj tradukoj en OA 1 ne estas konata al ni. Ni petas vian kunlaboron.

5. La germanaj tradukoj en OA 1

- 10 La germanaj tradukoj en OA 1 ĝenerale estas bonaj, ĉiukaze pli bonaj ol tiuj en UV. Same kiel UV, sed malsame kiel la germana Gramatiko, ĝi uzas la tiu-epoke „fremdan“ latinan, anstataŭ la tiam kutimanaktur-skrifton. OA 1 jam uzas la novan ortografion de post 1901. Pro la dua ortografia reformo de 1996 kelkaj (malmultaj) vortoj intertempe fariĝis forme arkaaj aŭ paralela nova formo estas allasata. Okaze (tamen ne sisteme) ni atentigas pri tio en la vortaro per notoj en pintaj krampoj laŭ la skemo „{de 1996 ankaŭ: ...}“, ekzemple:

fantazi' [OA 1] * fantaisie | fancy, fantasy | Phantasia {de 1996 ankaŭ: Fantasia} | фантазія | fantazja.

- 11 La presisto evidente disponis nek pri la germanaj majuskulaj literoj kun umlaŭto (Ä, Ö, Ü) nek pri la germana „akra s“ (ß) kaj pro tio transskribis:

ĝusta	tio estas	OA 1
Ä	A – umlaŭto	Ae
Ö	O – umlaŭto	Oe
Ü	U – umlaŭto	Ue
ß	„akra s“	ss

- 12 Pri la majuskloj ni atentigas en la vortaro per notoj en pintaj krampoj laŭ la skemo „{legu: ...}“, ekzemple:

etiologi' [OA 1] * étiologie | etiology | Aetiologie {legu: Ätiologie} | этіологія | etjologia.

- 13 La transskribo de „ß“ per „ss“ en Germanio kaj Aŭstrio estis ortografie malĝusta inter 1901 kaj 1996, dum en Svislando ĝi jam antaŭe estis allasita. De 1996 ĝi estas la sola ortografie ĝusta formo ankaŭ en Germanio kaj Aŭstrio, tiel ke noto ne necesas. Ekzemplo:

fiask' [OA 1] * fiasco | fiasco | Fiasko, Misserfolg | фіаско | fjasko.

En 1909 „Misserfolg“ (ne „Misserfolg“ kiel transskribita en OA 1), de 1996 ĝusta „Misserfolg“. Same Schlusstück (ĉe final') en 1909 Schlußstück, de 1996 Schlusstück, ktp.

En Germanio kaj Aŭstrio daŭre malĝusta, ankaŭ post la dua ortografia reformo de 1996, estas „ss“ anstataŭ „ß“ post longaj vokaloj. En Svislando „ss“ en tiu pozicio tamen estas allasita. Ekzemplo:

podagr' [OA 1] * goutte (méd.) | gout | Podagra, Fussgicht {legu: Fußgicht} | ...

Pri tio ni atentigas en la vortara parto laŭ la supra skemo.

- 14 Kelkaj germanaj tradukoj post pli ol cent jaroj estas arkaaj kaj apenaŭ plu uzataj. Okaze (tamen ne sisteme) ni atentigas pri tio en la vortaro per notoj en ondaj krampoj laŭ la skemo „{ark[aa], 2012: ...}“, „2012“ signifante „kutima formo en la jaro 2012“, ekzemple:

estrاد' [OA 1] estrade | estrade, platform | Estrade {ark., 2012: Podium, Podest}, Rednerbühne | эстрада | estrada.

6. La rusaj tradukoj en OA 1

- 15 Kiel en UV ankaŭ la rusaj tradukoj en OA 1 de 1909 uzas la malnovan ortografion de antaŭ 1918, ekzemple do havas la literojn „ѣ“ (пѣхота {de 1918: пехота} – infanterio), „ѡ“ (афоризмъ {de 1918: афоризм} - aforismo) kaj „ї“ (агонія {de 1918: агония} - agonio). Pri pliaj detaloj vd. la sekcion „La rusa en la Fundamento“.

7. La polaj tradukoj en OA 1

- 16 Studo pri la polaj tradukoj en OA 1 ne estas konata al ni. Kelkajn indikojn oni trovas en la sekcio „La pola en la Fundamento“. Ni petas vian kunlaboron.

8. La neklara noto ĉe *astrolog'* (fako-aganto-paroj)

Literaturo: Waringhien, Gaston. En: *Scienca Revuo* vol. 7, n-ro 28 (1955), p. 137-143 (141).

- 17 Preparinte OA 7, Waringhien en 1955 atentigis pri la demando jene:

Sub la vorto *astrolog'* kuŝas efektive jena piednoto: „**Same, agronom', antropolog' k.t.p.**” Ĉu tio signifas, ke apud ĉiu oficiala radiko finiĝanta per –nomi' aŭ per –logi' oni devas rigardi ankaŭ oficiala la respondan radikon finiĝantan per –nom' kaj per –log' kaj montrantan la aganton? Tia senco ŝajnas esti kontraŭdirita de la komenca Klariga Noto, kiu asertas: “Oni tute ne intencis doni plenajn seriojn ... Se, ekzemple, oni citis la vorton “diplomato” kaj ne “diplomatío”, tio tute ne signifas, ke la vorto “diplomatío” ne estas akceptinda. Per analogio oni tute prave uzos ĝin kaj ĝi trovos lokon en alia listo ...”. Jen probable, kial Wüster ne konsideris tiun piednoton. Cetere, se oni akceptus ĝin, oni ne vidas, kial ĝi ne taŭgas ankaŭ por la radikoj finiĝantaj per la elementoj –grafi', –krati', –mani', –mati', pati'. –urgi' kaj zofi', al kiuj ankaŭ respondas nomoj de agantoj sen i (geografo, demokrato, megalomano, diplomato, homeopato, dramaturgo, teozofo ktp.).

Tamen estus dezirinde havi la oficialan opinion de nia Akademio pri tiu punkto, kaj pli precize, pri jenaj tri demandoj:

Ĉu la piednoto de la Unua O.A. signifas, ke ĉiu agantnomo finiĝanta per –nom' aŭ –log' estas oficiala, se la responda sciencnomo kun –nomi' aŭ 'logi' estas tia? Se jes, ĉu oni ne devas etendi tiun regulon al la aliaj analogaj pseŭdo-sufiksoj? Aŭ ĉu ne estus pli simple oficialigi nur la tiuspecajn agantonomojn kaj krome unu sufikson –i-, kun la signifo de “abstrakta sed ne matematika okupiĝo de la koncerna aganto”?

- 18 OA 7 fine solvis la demandon tiel, ke ĝi ne kreis regulon, sed eksplicite enlistigis ĉiun unuopan elementon, kiun ĝi volis oficialigi (vd. ĉe OA 7). Tiu interpreto kaj agad-maniĝo estas ĝusta. La noto ne estas sufiĉe prezica en la senco de A 3.3 („por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi“) por esti rekte aplikebla regulo (principo de klareco). Tion montras la demandoj de Waringhien. La Klariga Noto al OA 1, citita de Waringhien, estas malpreciza. Kaj *diplomatío* kaj *diplomato* estis Fundamentaj jam en 1905 pro FE 32.3: „Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato ...“, eĉ se ambaŭ vortoj mankas en UV, ĉar ili estas dekomence parto de Esperanto pro R 15. OA 1 – kaj poste denove OA 7 – nur konfirmis tion, ordig-cele aldonante la vortojn el FE al UV. Ne necesis motivigi tiun per ia „analogio“.

III. La 2-a Oficiala Aldono de 1919 (OA 2)

Literaturo (selekto): Cart, Theophile (1919). Dua Oficiala Aldono al Universala Vortaro. En: *Esperantista Dokumentaro*. Kajero trideka. Paris: Esperantista Centra Oficejo, 1919, p. 3-12.¹⁷⁷

1. Superrigardo

- 19 La dua aldono (OA 2) estis preta en 1914, tamen pro la milito aperis nur en 1919.¹⁷⁸ Ĝi ampleksas 587 lingvo-elementojn. Aliĝas kvar vortoj, kiuj jam troveblas en la Fundamento aŭ Antaŭparolo al ĝi, nome *dogmo*, *miliono*, *paradokso* kaj *projekto*.¹⁷⁹ La lingvo-elementoj prezentiĝas en la formo de radiko plus finaĵo en du listoj. Ambaŭ uzas „naturan“ usklecon, komparu ekzemple: *Eŭkaristi-o* / *eŭnuk-o*. En la unua listo mankas tradukoj, dum en la dua listo la vortoj estas tradukitaj al franca, angla kaj germana.
- 20 Ekster la du listoj, sed en la sama dokumento *Cart 1919*, estis oficialigita la elemento *ism'* en 1919, pri kiu vd. apartan sekcion.

2. Unua listo de OA 2 (OA 2.1)

- 21 En la **unua listo** (OA 2.1) estas donitaj 476 vortoj („internaciaj vortoj, kiuj laŭ § 15 de l' Fundamento estas Esperantaj“). Tradukojn de tiuj ĉi vortoj OA 2 ne notas. Kelkaj vortoj havas klarigojn pri fako (ekz. (*bot.*) – botaniko, (*poezio*) ktp.) aŭ apliko-sfero (ekz. (*fig.*) – figurativa). Jen specimenoj:

acil-o [OA 2]

aftalin-o [OA 2]

agit-i (*fig.*) [OA 2]

ali-o (*bot.*) [OA 2]

basen-o (*de haveno, de fontano, de maro, k. t. p.*) [OA 2]

- 22 **ĝin-o** (trinkaĵo) [OA 2]

- 23 Listo de la uzataj esperantaj mallongigoj mankas en OA 2. Temas pri jenaj elementoj:

Mallongigo	Signifo
(<i>anat</i>)	anatomio
(<i>arĥ</i>)	arĥitekturo
(<i>bot.</i>)	botaniko
(<i>ekl.</i>)	eklezio
(<i>farm.</i>)	farmacio
(<i>fig.</i>)	figurativa
(<i>filoz.</i>)	filozofio
(<i>fin.</i>)	financo aŭ financaj aferoj (?)
(<i>fiz.</i>)	fiziko
(<i>fiziol.</i>)	fiziologio
(<i>geom.</i>)	geometrio
(<i>gr.</i>)	gramatiko

685

¹⁷⁷ Cit. laŭ OLEO 2008, kies informoj formas la bazon de la ĉi-tiea priskribo.

¹⁷⁸ Mallonga historio de la Lingvaj Institucioj, en: Aktoj 1963-1967. Kp. ankaŭ jenan noton el la kajero de Januaro 1920 de la Oficiala Gazeto: „Dua oficiala aldono al Universala Vortaro. — Ni publikigis, en la kolekto « Esperantista Dokumentaro », eldonita de la Esperantista Centra Oficejo, la Duan Oficialan Aldonon al Universala Vortaro, verkitan de la Komisiono pri Komuna Vortaro, kies direktoro kaj raportinto estas S-ro Th. CART, ano de la Akademio. Tiu publikigaĵo konsistas el 16-paĝa broŝuro, kiun ni vendas unu frankon kaj duono. [OG 7a jaro, n. 10 (76) 1920, p. 156].

¹⁷⁹ Vd. ankaŭ la mencion en la Sepa Aldono de 1958.

(gram.)	gramatiko
(hist.)	historio
(ĥem.)	ĥemio
(jur.)	juro
(kartl.)	kartlud(ad)o (?)
(min.)	mineralo aŭ mineralogio (?)
(milit.)	militaj aferoj (?)
(muz.)	muziko
(teatr.)	teatro, teatraj aferoj (?)
(trans.)	transitiva
(trig.)	trigonometrio
(versf.)	versfarado
(zool.)	zoologio

Aldoniĝas mallongigoj en la referenc-lingvoj, ekzemple en la germana *Math.* por *Mathematik*. Vd. la liston en BK II.

- 24 Jenaj kvin vortoj en OA 2.1 estas koncize, sed sufiĉe precize difinitaj en Esperanto:

barak-o (*domaĉo*) [OA 2]
ignor-i (*ŝajnigi nescion*) [OA 2]
konkret-a (*ne abstrakta*) [OA 2]
major-o (*batalionestro*) [OA 2]
tog-o (*romana vesto*) [OA 2]

Kontraste aliaj klarigoj en krampoj servas nur por senambiguigo, ekz. **ĝin-o** (*trinkaĵo*) aŭ **lama-o** (*pastro*).

- 25 La jam per la Unua Aldono oficialigita radikoj *prozodi'* estis oficialigita denove, kredeble pro pretervido:

prozodi' [OA 1] prosodie | prosody | Prosodie | прозодія | prozodja. — **prozodi-o** [OA 2]

- 26 La malneto de la unua listo troviĝas en Oficiala Gazeto Esperantisto, datita 25 Decembro 1913 (6-a jaro, n-ro 6 (61), p. [137]-143) sub la titolo „Lingva Komitato – Oficialaj decidoj kaj komunikoj - Preparaj Dokumentoj“. Piednoto 1 ĉe la listo-titolo tekstas:

„La tradukoj en la kvin lingvoj de l' U.V. estos poste publikigataj, por pliprecizigi la internacian signifon.“

Tio intenco ne plenumiĝis pro la unua mond-milito kaj OA 2.1 restis torso.

- 27 La prepara listo prikomentas 60 elementojn en piednotoj laŭ jena ekzemplo:

- liberal-a (39) – Cf. [t.e. komparu] *liber*, U.V.

- 28 La prepara listo estas konsiderinde pli longa ol la poste akceptita kaj publikigita listo. Pri la proceduro oni legas sur p. 143:

„Ĉar la Akademio decidis proponi tiun liston de internaciaj vortoj al la anoj de la Lingva Komitato, ni konigas tiun decidon, laŭ regulo 22 de nia Regularo.

Pri ĝi, ĉiu ano de la Komitato devas voĉdoni, laŭ nia Regularo. Se ĝi ne estas malaprobata de pli ol unu triono de la Komitato, ĝi fariĝos oficiala.

La malaprobo povos signifi, ke la Lingva Komitato deziras pluan ekzamenon de kelkaj el la vortoj entenantaj en la listo.“

- 29 Tiel fakte okazis kaj laŭ tiu sistemo de malaproba forstreko fare de triono de l' membroj de LK multaj proponitaj vortoj estis elĵetitaj. Jen kiel specimeno komparo de la prepara kaj definitiva listo de litero L. El 17 proponitaj vortoj nur ok estis aprobitaj, naŭ forstrekitaj.

Prepara listo de 1913	Listo aprobita en 1919	Notoj
lagun-o	lagun-o	—
lakon-a	—	—
lama-o (<i>pastro</i>)	lama-o (<i>pastro</i>)	—
latin-a	—	—
latinism-o	—	—
latrin-o	—	—
laŭteniso	—	[OA 9]: tenis/o
laureat-o (38)	laureat-o	(38) Cf. <i>laŭr</i> , U.V.
legat-o	legat-o	—
legitim-i	—	[OA 3.2]
liberal-a (39)	liberal-a	(39) Cf. <i>liber</i> , U.V.
liberalism-o	—	De 1919 liberal-ism-o
lingvistiko-o (40)	—	(40) Cf. <i>lingv</i> , U.V. —
litr-o	litr-o	—
logaritm-o	logaritm-o	—
logograf-o	logograf-o	—
lokaliz-i (41)	—	(41) Cf. <i>lok</i> , U.V.
Sume proponita:	Aprobita	Ne aprobita:
	17	8
		9

- 30 Ne estas klaraj la kialoj, kial ekz. relative ofta vorto kiel **latin-a** estis forstrekitaj (ĉu pro latin-o?), dum randa vorto kiel **logograf-o** oficialigita. Rezulto ĉiukaze estas iu hazarda kaj nesistema miŝmaŝo. Inter la naŭ neaprobitaj nur **legitim-i** estis du jarojn poste oficialigita en OA 3 de 1921, **liberalism-o** pro la oficialigo de **-ism** en 1919 nuntempe interpretebla kiel **liberal-ism-o**. La arkaismon **laŭtenis-o** OA 9 en 2007 oficialigis en la moderna formo **tenis/o**. La aliaj ses, inter ili eĉ baza vorto kiel **lakon-a** atendas oficialigon ĝis nun.
- 31 OA 2.1 uzas unu vorton en la mallongaj difinoj, kiu mem ne jam estas oficiala, nome „romana“ en la artikolo „**tog-o** (*romana vesto*)“. Nek **roman'** nek la urbonomo **Rom'** kaj pro tio **rom'an'** estas oficialaj. *Romana* (maj. aŭ min.) Rilata al la antikvaj Romanoj: la *Romana cemento* (hidraŭlika); la *Romana* (latinida) *fundamento de nia lingvo*². Rim. Pro la eblaj konfuzoj kun **roman** estas pli bone konservi la komencan majuskulon ĉe **Romano, Romana**.

3. Dua listo de OA 2 (OA 2.2)

- 32 En la **dua listo** (OA 2.2) estas 110 „komune uzataj vortoj oficialigitaj de la Akademio“. Ĉe la vortoj de la dua listo estas donitaj tradukoj en la francan, anglan kaj germanan laŭ jena modelo:
- **abnegaci-o** [OA 2] abnégation | abnegation | Entsagung
 - **abrupt-a** [OA 2] brusque | abrupt | schroff
- 33 La dua listo krome enhavas atentigon, ke pro malfacilaĵoj de la presejo pri la rusa alfabeto la tradukoj en la rusan kaj polan poste aperos en aparta broŝuro. Tio tamen ŝajne neniam okazis, almenaŭ tia publikigaĵo ne estas konata.¹⁸⁰ Evidente estis planite, ke OA 2.2 havu la saman prezento-manieron kiel UV kaj OA 1. Ĝi tamen restis torso kun nur tri referenc-lingvoj.

685

¹⁸⁰ Vd. OLEO.

34 OA 2.2 enhavas kelkajn malmultajn kunmetaĵojn, kiel ekz.

tram-o [OA 2.2] rail creux | tram (rail) | Tramschiene

- **tramveturil-o** [OA 2.2] voiture de tramway | tramcar | Tramwagen
- **tramvoj-o** [OA 2.2] tramway | tramway | Trambahn

35 La malneto de la dua listo troviĝas en Oficiala Gazeto Esperantisto, datita 25 Januaro 1914 (6-a jaro, n-ro 7 (62), p. 150-154) sub la titolo „Lingva Komitato – Oficialaj decidoj kaj komunikoj - Preparaj Dokumentoj“. Piednoto 1 ĉe la listo-titolo tekstas:

„La pola kaj rusa tradukoj estos poste aldonataj.“

Tio intenco ne plenumiĝis pro la unua mond-milito kaj OA 2.2 restis same torso kiel OA 2.1.

36 La prepara listo finiĝas per la sama teksto pri la proceduro (malaprobo per forstreko, p. 150) kiel tiu citita supre pri OA 2.1 (Oficiala Gazeto p. 143). Tamen okazis relative malmultaj malaprobaj. Ĉiuj ses vortoj proponitaj sub la litero L ekzemple fariĝis oficialaj, kiel proponitaj. Kelkaj hazardaj ekzemploj de forstrekoj estas

- A: **abiturient-o** (oficialigita poste per OA 4), **arbitraci-o** (OA 3)
- B: neniuj forstrekoj
- C: **cirkul-i** (OA 3)
- Ĉ, D, E: neniuj forstrekoj
- F: **feŭdal-a** (dum feŭd-o samloke estis akceptita)
- G: **goelet-o** – goélette | schooner | Goelette (2012: Schoner), iu speco de malpeza, dumasta vel-ŝipo (**skuno**).

Resume do de A ĝis G nur kvin forstrekoj, inter kiuj tri estis oficialigitaj poste.

IV. La sufikso *ism'* (1919)

Literaturo (selekto): **Cart**, Theophile (1919): Dua Oficiala Aldono al Universala Vortaro. En: *Esperantista Dokumentaro*. Kajero trideka. Paris: Esperantista Centra Oficejo 1919.

1. Superrigardo

37 Laŭ Cart 1919, sed ekster la du listoj OA 2.1 kaj OA 2.2 preparitaj jam en 1913 / 1914, „La sufikso *ISM'* (teorio, sistemo, doktrino, skolo, partio, celado, kaj analogiaj {legu: analogaj} sencoj) estas oficiale akceptita.“ La decido tekstas:

„La sufikso *ISM'* (teorio, sistemo, doktrino, skolo, partio, celado, kaj analogiaj sencoj) estas oficiale akceptita. Necese estas rimarkigi, ke tio tute ne signifas, kiel ŝajnas opinii du aŭ tri aprobantoj, ke, forprenante la finaĵojn *ism'*, oni ĉiam ricevas esperantan radikon aŭ rajtas krei ĝin kun speciala signifo. Tio ĉi ne estas pli vera por la vortoj atavismo, feminismo, optimismo, pesimismo, silogismo, solecismo, sofismo, turismo, k. t. p., ol tio estus – forprenante la finaĵojn *ist'*, *in'*, *il'*, *ul'*, *an'*, k. t. p., – por la vortoj feministo, optimisto, sofisto, turisto, balzamino, doktrino, vazelino, bacilo, asimili, okulo, formulo, banano, turbano, sultano, k. t. p. En ĉiuj tiuj ĉi vortoj la silaboj *ism'*, *ist'*, *in'*, k. t. p. estas konsiderotaj ne kiel esperantaj sufiksoj, sed kiel finaĵoj, ĉu internaciaj ĉu de l' devena lingvo, kiujn, laŭ Zamenhofa modelo, oni ne volas kripligi.“

38 La vorto **skolo** en la difino de **ism'** estis oficialigita nur du jarojn poste, nome en OA 3.2 de 1921. La radikon **analogi'(o)**, uzata en la difino, oni ŝanĝis al **analog'(a)** en 1923, kaj **analogi'** laŭ la volo de la Akademio ne plu estu oficiala (publikigita en cirkulero de la 12-a de Majo 1923 kaj konfirmita per OA 7).

2. Preparaj dokumentoj

- 39 Pri la „sufikso ISM“ la Akademio pridemandis la Lingvan Komitato jam en marto 1914 per jena decido, publikigita en la rubriko „Preparaj dokumentoj“ en Oficiala Gazeto Esperantista, 6-a jaro, nr-o 9 (64) 1914, p. 202 kaj datita „25 Marto 1914“:

„Konsiderante, ke la grek-latina sufikso *ism* ([greka formo], *ismus*) estas plene internacia, laŭ senco sufiĉe klare difinita (teorio, sistemo, doktrino, skolo, partio, celado, kaj analogiaj sencoj):

Ke aliparte, ĝi estas komune uzata – kaj de l'komenco estis uzata – de ĉiuj esperantistoj, ĉu verkistoj, ĉu vortaristoj, kun la supre montrita signifo;

La Akademio proponas:

Ke la sufikso *ism* estu aldonita (laŭ regulo 15 de Oficiala Gramatiko) al la oficiala listo de l'esperantaj sufiksoj.

N.B. – Komprenebla en multaj vortoj, *ism* (kiel *ist* en *turisto*, *sofisto*, *meĥanisto*, *egoisto*, k.t.p.; *in* en *doktrino*, *rutino*, *termino*, *febrino*, *turbino*, k.t.p.; *ul* en *regulo*, *okulo*, *formulo*, k.t.p.; *an* en *turbano*, *sultano*, *organo*, *tirano*, k.t.p.) estas ne propra esperanta sufikso, sed simple internacia, laŭ regulo 15 tute allasebla, finaĵo. Tiaj vortoj estas: *turismo*, *sofismo*, *meĥanismo*, *egoismo*, *idiotismo*, k.t.p.

Tiun decidon de la Akademio, ni komunikas al la Lingva Komitato por konsulto.

Pri ĝi, ĉiuj anoj de la Lingva Komitato devas voĉdoni. Se ĝi ne estas malaprobata de pli ol unu triono de la Lingva Komitato, ĝi fariĝos oficiala.

Ni ricevos la voĉdonojn ĝis la 5-a de julio 1914.“

3. Kritiko

- 40 Estas rimarkinde, ke la propono submetita al voĉdonado ja nomas kelkajn ekzemplojn, tamen sen specifi ties statuson (ĉu Fundamenta kiel *sofismo*, ĉu el OA 1, ĉu tiutempe neoficiala kiel meĥanismo-o [OA 8]). Anstataŭe ĝi nur ĝenerale asertas, ke „[ism’] estas komune uzata – kaj de l'komenco estis uzata – de ĉiuj esperantistoj, ĉu verkistoj, ĉu vortaristoj, kun la supre montrita signifo“.

- 41 Estas krome rimarkinde, ke la difino nur maleksplicite kaj – se entute – nur en la kategorio „analog[i]aj sencoj“ kovras kunmetaĵojn de la tipo lingv’ plus ism’ (angl-ism-o, german-ism-o, rus-ism-o ktp.).

- 42 Ĝi ankaŭ ne tuŝas la demandon, ĉu kelkaj el la vortoj oficialigitaj kiel radikoj en la Fundamento kaj en OA 1 devas esti nove interpretitaj kiel kunmetaĵoj (**arĥaism’** – [A, mankas en UV] aŭ arĥa-ism-o de la baza formo arĥa-a, **egoism’** [OA 1] aŭ ego-ism-o de la baza formo ego-o, **magnetism’** [OA 1] aŭ magnet-ism-o de la baza formo magnet-o, **ŝovinism-o** aŭ ŝovin-ism-o de la baza formo Ŝovin-o [familia nomo], krome **meĥanisto-o** [OA 8] aŭ meĥan-ist-o de la baza formo meĥan-a).

- 43 Sekvas listo de ĉiuj ismo-vortoj en la Vortaro Oficiala. Entute temas pri 44 vortoj, de kiuj oni unue devas forstrekigi tri "falsajn parencojn", nome vortojn, kie -ism- klare estas parto de la radikoj kaj ne baziĝas sur la iama grek-latina sufikso:

- **abism’** [OA 1] * abime {pres-eraro, legu: abîme} | abyss | Abgrund | пропасть, бездна | przepaść.
- **prism’** [OA 1] prisme | prism | Prisma | призма | pryzmat.
- **rism’** [OA 1] * rame (de papier) | ream | Ries (Papier) | стопа (бумаги) | ruza. {MEZ} — [JÜ].

- 44 Restas la sekvaj 41, ordigitaj laŭ jaroj de eniro en VO, interne de la sama jaro laŭ alfabeto. Kelkaj estas pli aĝaj, ekz. **sofismo** troviĝas jam en la Dua Libro de 1888.

Videblas, ke en UV aperas neniuj ismaĵoj, **arĥaism'** kaj **sofism'** ja troveblas en la Fundamento, sed ekster UV. En OA 1 de 1909 estas sep. Plej multaj estas en OA 2 de 1919, do samtempe kun la oficialigo de **ism'**. Inter tiuj plej multaj aperas sen tradukoj en la unua „Definitiva listo de internaciaj vortoj, kiuj laŭ § 15 de l' fundamento estas esperantaj“ [OA 2.1], nur unu (**turism'**) en la dua „Definitiva listo de komune uzataj vortoj oficialigitaj de la akademio“ [OA 2.2]. En la postmilitaj estas nur **mekanism'** (OA 8) kaj **eŭfemism'** (OA 9), la aliaj estas kunmetaĵoj (**burokrat-ism-o**, **skolt-ism-o**).

1905 (Fundamento)

- **arĥaism'** – [A, mankas en UV] Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo [A 8.2]. Sed, prezentante parton de la fundamento, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, ... [A 8.3]. — **arĥaism'** [OA 8] = vorto aŭ esprimo ne plu uzata en la komuna lingvo. — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo.
- **sofismo** — So-fis-mo [FE 3, mankas en UV]. Sofismo [FE 4]. — **sofism'** [OA 1] sophisme | sophism | Sophismus | софизмъ | sofizmat. — **sofism'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7].

1909 (Unua Oficiala Aldono)

- **aforism'** [OA 1] * aphorisme | aphorism, maxim | Aphorismus | афоризмъ | aforyzm.
- **egoism'** [OA 1] * egoisme {evidente pres-eraro, legu égoïsme} | egoism | Egoismus, Eigenliebe | эгоизмъ | egoizm.
- **magnetism'** [OA 1] magnetisme | magnetism | Magnetismus | магнетизмъ | magnetyzm.
- **organism'** [OA 1] * organisme | organism | Organismus | организмъ | organizm.
- **paroksism'** [OA 1] * paroxysme | paroxysm | Paroxysmus | пароксизмъ | paroksyzm. {MED}
- **patriotism'** [OA 1] * patriotisme | patriotism | Patriotismus | патриотизмъ | patryjotyzm.
- **ŝovinism'** [OA 1] * chauvinisme | chauvinism | Chauvinismus | шовинизмъ | szowinizm.

1919 (Dua Oficiala Aldono)

- **anakronism-o** [OA 2.1]
- **atavism-o** [OA 2.1]
- **ateism-o** [OA 2.1] {RELI}
- **dualism-o** [OA 2.1]
- **feminism-o** [OA 2.1]
- **monoteism-o** [OA 2.1]
- **neologism-o** [OA 2.1]
- **nepotism-o** [OA 2.1]
- **nihilism-o** [OA 2.1]
- **optimism-o** [OA 2.1]
- **ostracism-o** [OA 2.1] {JUR} {HIST}
- **panteism-o** [OA 2.1]
- **pesimism-o** [OA 2.1]
- **politeism-o** [OA 2.1] {RELI}

- **racionalism-o** [OA 2.1]
- **reŭmatism-o** [OA 2.1]
- **silogism-o** [OA 2.1]
- **solecism-o** [OA 2.1]
- **spiritualism-o** [OA 2.1]
- **teism-o** [OA 2.1] {RELI}
- **turism-o** [OA 2.2] tourisme | touring | Reisesport {(ark.) 2012: Tourismus}

1921 (Tria Oficiala Aldono)

- **Idealism'** [OA 3.2] idealism | idéalisme | Idealismus | idealismo | idealismo | idealismo | idealizm.
- **Idiotism'** [OA 3.2] idiom (lingual peculiarity) | idiotisme | Idiotismus | idiotismo | idiotismo | idiotismo | idjotyzm.
- **Imperialism'** [OA 3.2] imperialism | impérialisme | Imperialismus | imperialismo | imperialismo | imperialismo | --- {pola traduko mankas}.
- **Judaism'** [OA 3.2] judaism | judaïsme | Judentum | judaismo | judaismo | judaismo | judaizm.
- **Naturalism'** [OA 3.2] naturalism | naturalisme | Naturalismus | naturalismo | naturalismo | naturalismo | naturalizm.
- **Pacifism'** [OA 3.2] pacifism | pacifisme | Pacifismus | pacifismo | pacifismo | pacifismo | --- {pola traduko mankas}.
- **Realism'** [OA 3.2] realism | réalisme | Realismus | realismo | realismo | realismo | --- {pola traduko mankas}.

1974 (Oka Oficiala Aldono)

- **meĥanizm/o, mekanism/o.** [OA 8] Sistema de organoj aŭ pecoj, kiuj kunefikas en maŝino aŭ aparato, aŭ en biologia proceso, por atingi difinitan rezulton. — A. mechanism; F. mécanisme; G. Mechanismus, Getriebe, Vorrichtung; H. mecanismo; I. congegno, meccanismo; P. mecanismo. — [OA 8] II.A.1. Estas oficialigitaj la du jenaj duformaj vortoj: mekanismo / meĥanismo kaj monarĥio / monarkio.

2007 (Naŭa Oficiala Aldono)

- **burokrat/ism/o** [OA 9] **1** Sistema de (kvazaŭa) regado fare de la burokrataro; administra sistemo, en kiu la burokratoj **1** havas tro da povo aŭ influo. **2** (malŝate) La procedo-troigaj tendencoj de burokrato **2**; sistema flegado aŭ apogado de tiaj tendencoj.
- **eŭfemism/o.** [OA 9] Evitvorto, evitesprimo. Vorto aŭ esprimo uzata por mildeco anstataŭ diraĵo, kiu povas esti rigardata kiel tro kruda, tro malagraba, tro sankta aŭ simile: “*kuŝi*” estas eŭfemismo por “*seksumi*”; “*etna purigado*” estas eŭfemismo por “*popolmurdo*”; la vorto “*necesejo*” estas eŭfemismo.
- **skolt/ism/o.** [OA 9] La idearo de la skolta movado; tiu movado mem.

V. La 3-a Oficiala Aldono de 1921 (OA 3)

Literaturo (selekto): Grosjean-Maupin, Emile (1922): Tria Oficiala Aldono al Universala Vortaro. En: Oficiala Gazeto Esperantista, vol. 8, N-ro 5-6 (82-83). Paris: Esperantista Centra Oficejo 1922, p. 153-164.

1. Superrigardo

- 45** Laŭ la Akademia Vortaro [12] aperis la tria aldono [3] en 1921. Ĝi ankaŭ estis publikigita en Oficiala Gazeto Esperantista, datita 25 Januaro 1922, 8-a jaro, n-ro

5-6 (82-83), p. 153-164). Ĝi ampleksas 203 lingvo-elementojn plus la radikon **jur'** (pri ĝi vd. malsupre). Kiel en OA 2 ili estas prezentitaj en du partoj:

- „radikoj propre Esperantlingvaj au propriĝintaj“;
- „internaciaj radikoj uzeblaj laŭ la regulo 15“.

46 Kiel en la UV kaj en OA 1, sed malsame kiel en OA 2, ankau en la tria aldono estas listigitaj nur la radikoj sen la vort-kategoriaj finaĵoj. Ĉiu kap-vorto (titolo de vortara artikolo) komenciĝas per majuskla litero, ekz. **Abdik'**, **Absorb'** ktp. De la radikoj estas donitaj tradukoj en maksimume sep lingvoj: en la angla, franca, germana, hispana, portugala, itala kaj pola (sed ne rusa), laŭ jena modelo:

- **Feri'** [OA 3.2] holidays | vacances | Ferien | vacaciones | feria | feria, vacanza | wakacje.

Okaze troveblas nur tradukoj en la unuajn el la sep referenc-lingvoj, jen ekzemple nur al angla, franca, germana kaj hispana:

- **Aeroplan'** [OA 3.2] aeroplan | aéroplane | Flugzeug | aeroplano k. t. p.

jen mankas traduko al la portugala, pola aŭ al alia lingvo:

- **Admiralitat'** [OA 3.2] admiralty | amirauté | Admiralität | almirantia | almirantado | ammiragliato | ---

2. Ortografiaj misoj en la referenc-lingvoj hispana, portugala kaj pola

a) Averti pri malĝustaj diakritoj

47 En OA 3 estas atentigite pri manko de kromsignoj en la hispanaj kaj polaj tradukoj. Tia manko cetere estas rimarkebla ankaŭ okaze de kelkaj italaj kaj portugalaj vortoj. La averto tekstas:

„Ĉiun radikon sekvas seplingvaj tradukoj laŭ la jena ordo:

ANGLA – FRANCA – GERMANA – HISPANA – PORTUGALA – ITALA – POLA

La signo — montras, ke la traduko mankas.

Pro neesto ĉe la presisto de tiaj apartaj literoj, la hispanaj kaj polaj supersignitaj literoj estas anstataŭigitaj per sensupersignitaj literoj.“

b) Misoj en la hispana

48 La ĉefaj, plurfoje ripetitaj misoj en la **hispanaj tradukoj** estas jenaj:

Hispanaj vortoj en OA 3.2 je	ekzemplo en OA 3.2	legu ĝuste
-acion	administracion, civilizacion	administración, civilización (-ación)
-ia	anarquia	anarquía (-ía)
-elago	archipelago	archipiélago (-élago)
-ologo	arqueologo	arqueólogo (-ólogo)

c) Misoj en la portugala

49 La portugala estas uzata kiel referenc-lingvo de la Vortaro Oficiala en OA 3 de 1921, OA 4 de 1929 kaj OA 8 de 1974. Okazis pluraj ortografiaj reformoj de la portugala, kiuj okaze arkaigas ankaŭ tiu-lingvaj tradukojn en la nomitaj Aldonoj. Ne ĉiuj reformoj estis aplikeblaj samtempe en Portugalio, Brazilo kaj la aliaj portugal-lingvaj landoj en Afriko kaj Azio, tiel ke dum certa tempo ekzistis variaĵoj.

La plej gravaj reformoj estas de 1945, 1971 kaj 1990, la laste menciita aplikebla en Portugalio kaj Brazilo de 2009.

- 50 La ĉefaj ortografiaj misoj en la portugaliaj tradukoj en OA 3.2 estas jenaj:

Portugalaj vortoj en OA 3.2 je	ekzemplo en OA 3.2	legu ĝuste
-aĉao, foje -acion	civilizacion, declaraĉao, decoraĉao	civilizaĉao, declaraĉao, decoraĉao (-aĉao)
-encia	decadencia	decadência (-ência)

- 51 La reformo de 1990/2009 i.a. forigis „silentajn literojn“, tiel ke anstataŭ *acĉao* aŭ *optimo*, oni nun skribas *aĉao* kaj *ótimo*. Simile nun:

- **Absorb'** [OA 3.1] ... | ocupar {de 2009: ocupar} todo, absorver | ...
- **Akcesor'** [OA 3.2] ... | accessorio {legu: acessório; de 2009: acessório} | ...
- **Reaksi'** [OA 3.2] ... | reacĉao {legu: reacĉao; de 2009: reacĉao} | ...

Aliaj ŝanĝoj estas ekzemple:

- **Pamflet'** [OA 3.2] ... | pamphleto {2012: panfleto} | ...

Sistema kontrolo ĝis nun tamen ne okazis en la Dua Parto de la Komentario.

d) Misoj en la itala

- 52 La itala estas uzita kiel referenc-lingvo en OA 3 ĝis 6 (1921-1935) kaj 8 (1974).

- 53 La malmultaj ortografiaj misoj en la italiaj tradukoj en OA 3 estas jenaj:

Italaj vortoj en OA 3.2 je	ekzemplo en OA 3.2	legu ĝuste
-a	citta	città

e) Misoj en la pola

- 54 La ĉefaj ortografiaj misoj en la polaj tradukoj estas jenaj:

Polaj vortoj en OA 3.2 je	ekzemplo en OA 3.2	legu ĝuste
-ac (infinitivo de verboj)	deponowac	deponować (-ać)
-l- anstataŭ strekita – l -:	szkola	szkoła
ł -		

f) Vortoj kun esperant-lingvaj difinoj

- 55 Tri el la oficialaj lingvoelementoj (*Abdik'*, *Abund'* kaj *Kariol'*) estas krome difinitaj en Esperanto:

Abdik'	demeti la reĝecon
Abund'	malmanka
Kariol'	durada simpla norvega veturilo

- 56 La radiko *norveg-*, uzata en la difino de *kariol-*, en 1921 estis nek Fundamenta, nek Oficiala elemento. Ĝin oficialigis nur OA 8 en 1974 en la formo „**norvego** [OA 8]“.

- 57 La Tria Aldono, subskribita de „Prof. E[mile] Grosjean-Maupin, Direktanto de la Sekcio pri la Komuna Vortaro“ finiĝas per jena Noto:

„Iom multaj L.K. anoj rimarkigis, ke la formo de kelkaj el la internaciaj radikoj, kiuj konsistigas la duan parton de la 3a Aldono, enhavas pezajn senutilajn pseŭdosufiksojn kaj ne estas la plej bona; ekz.: APELACI', EMOCI', ERUDICI', KONVERSACI', REVELACI', SUGESTI', k.t.p.“

Mi [t.e. Grosjean-Maupin] jam detale respondis al tiu ĉi rimarkigo en mia raporto al la Praha Kongreso [de 1921]; tamen estas taŭge, ke mi tie ĉi ankoraŭ memorigu miajn kolegojn, 1-e ke, preparante la 3an Aldonon, mi ne rajtis elekti mem la formojn, kiujn mi opiniis plej bonaj, sed devis enmeti nur la sole aŭ plej multe uzitajn formojn; 2-e ke la mallaŭdataj formoj estas nur TOLEREBLAJ kaj UZEBLAJ internaciaj formoj, sed tute NE estas DEVIGAJ; 3-e ke tiuj, kiuj ne aprobas la cititajn formojn, plene rajtas uzi aliajn pli mallongajn aŭ pli taŭgajn, egale internaciajn, formojn, kiuj kredeble iom post iom venkos kaj forpuŝos la malpli taŭgajn.“ [elstarigoj tiel en la originalo, Oficiala Gazeto p. 164]

g) La radiko *jur'*

- 58 La radiko **jur'** aperas en §§ 2 kaj 4 de la Ekzercaro („ekzerco de legado“) en la formo **juristo**. Ĝi estis poste oficialigita per OA 1 kiel **jurist'**. OA 3.2 oficialigis la formon **Jur'**, OA 8 fine oficiale konstatis, ke **jur'** estas Fundamenta, do ne „nur“ oficiala.

jur' – [mankas en UV] — **Jur'** [OA 3.2] jurisprudence, science of law, law | science du droit, droit | Jurisprudenz, Jura | jurisprudencia, derecho (ciencia) | direito (sciencia) | giurisprudenza | --- {pola traduko mankas}. . — **jur/o** (3) {deklarita Fundamenta en} [OA 8].

• **juristo** — Ju-ris-to [FE 2, mankas en UV]. Juristo [FE 4]. — **jurist'** [OA 1] * juriste | jurist | Jurist | юристъ | prawnik.

VI. La 4-a Oficiala Aldono de 1929 (OA 4)

Literaturo (selekto): Grosjean-Maupin, Emile (1929): Kvara Aldono al U. V. - Oficiala Listo. En: Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio. Paris, Esperantista Centra Librejo, Kajero I (Junio 1929), 4-8, kaj Kajero II (Februaro 1930), p. 25-29.

a) Superrigardo

- 59 La kvara aldono (OA 4) aperis en 1929. Ĝi ampleksas 118 lingvo-elementojn. La kvara aldono prezentas la oficialajn lingvo-elementojn en nur unu listo. Tamen, tiu listo aperis dufoje, nome en „**Kajero I**“ de **1929** kaj „**Kajero II**“ de **1930**. En ambaŭ kajeroj la lingvo-elementoj estas prezentitaj kiel radikoj kun finaĵo, malsame do al la prezento en UV kaj OA 1 ĝis OA 3. La kap-vortoj ĉiuj komenciĝas per „*ne-natura*“ majusklo (*Abstin-i, Abiturient-o*), tiel ke ne eblas fari konkludojn pri la uskleco de la radikoj en OA 4. Malsame kiel la unuaj tri Aldonoj, la Kvara estas la unua, kiu ne traktas lingvo-elementojn jam enestantaj en la Fundamento ekster la alfabeto de UV. La Fundamentecon de tiuj radikoj la Akademio oficiale konstatis nur en la Sepa kaj Oka Aldonoj de 1958 kaj 1974 respektive. Kelkaj vortoj en OA 4 estas signitaj per malpreciza fontindiko pri zamenhofeco (^z).

b) Ekesto kaj prepar-laboroj

- 60 La Kvara Aldono baziĝas sur la proponoj enestantaj en Grosjean-Maupin, Emile (ĉ. 1929): *Kvara Aldono al U. V. (Proponata Listo)*. Paris, Centra Presejo Esperantista.¹⁸¹ La Proponata Listo tamen entenas 30 vortojn pli ol la posta oficiala listo.

c) Prezento-maniero

- 61 En „**Kajero I**“ de **1929** estas donitaj tradukoj en la francan, anglan kaj germanan kaj ĉe 23 vortoj ankaŭ Esperantlingvaj difinoj laŭ jenaj modeloj
- **Abstin-i**, [OA 4] être abstinent ; to abstain ; enthaltsam sein, abstinent leben.

685

¹⁸¹ Kück, OLEO, 2008, p. 11 ss, p. 41.

- **Abiturient-o**, [OA 4] élève ayant terminé ses études secondaires, bachelier ; top-form boy in secondary school, who obtained his leaving-certificate examination ; Abiturient ; mezgrada lernanto, kiu finis la gimnazian kursaron, sukcese plenuminte la koncernan ekzamenon.
- 62** En „**Kajero II**“ de **1930** estas listigitaj la samaj vortoj kaj tradukoj en la hispanan, italan, portugalan kaj katalunan kaj ripeto de la jam en „**Kajero I**“ menciitaj esperantlingvaj difinoj. Kredeble pro eraro oni tamen forgesis tiun ripeton okaze de la vorto *Plur-aj*.
- **Abstin-i**, [OA 4] essere astinente ; abstenerse, guardar abstinentia ; abster-se ; ésser abstemi.
 - **Abiturient-o**, [OA 4] studente secundario che ha superato l'esame di maturita ; bachiller ; bacharel ; batxiller ; mezgrada lernanto, kiu finis la gimnazian kursaron, sukcese plenuminte la koncernan ekzamenon.
- 63** **Kombino** de la du „**Kajeroj**“ donas vortarajn artikolojn laŭ jenaj skemoj:
- Vortara artikolo **sen** difino en Esperanto kun tradukoj al franca, angla, germana, itala, hispana, portugala kaj kataluna:
- **Abstin-i**, [OA 4] être abstinent | to abstain | enthaltsam sein, abstinent leben | essere astinente | abstenerse, guardar abstinentia | abster-se | ésser abstemi.
- Vortara artikolo **kun** difino en Esperanto kaj tradukoj al la samaj lingvoj:
- **Abiturient-o**, [OA 4] élève ayant terminé ses études secondaires, bachelier | top-form boy in secondary school, who obtained his leaving-certificate examination | Abiturient | studente secundario che ha superato l'esame di maturita | bachiller | bacharel | batxiller | mezgrada lernanto, kiu finis la gimnazian kursaron, sukcese plenuminte la koncernan ekzamenon.
- 64** Pri la font-indiko „zamenhofa“ (^z) la prepara dokumento „Proponata Listo“ de Grosjean-Maupin (sen jaro)¹⁸² klarigas: „Preskaŭ ĉiuj proponataj radikoj estas Zamenhofaj. Estas signifaj per ^z nur tiuj, pri kies formo oni povas heziti“. Ekzemplo estas:
- **Knar-i**^z, [OA 4] grincer (plume, roue, porte) | to creak (of a wheel, door, hinge, pen) | knarren | stridere | rechinar (puerta, rueda, pluma) | chiar (ferindo o ouvido) | grinyolar, cruixir.
- Knari* estas el la germanaj vortaroj de Zamenhof / Jürgensen (sen jaro, 1-a eldono ĉ. 1904), ĉiuj nur „redaktitaj“ de Zamenhof¹⁸³. Kiel la tradukoj montras, ĝi ne estas „fremda“ (internacia) vorto laŭ R 15 FG kaj do bezonas fiksadon laŭ alineo 7 de la Antaŭparolo.
- 65** Malpli evidente estas la neceso por la indiko de zamenhofeco tamen ĉe aliaj vortoj, ĉar oni apenaŭ povas „heziti pri ilia formo“, vd. ekzemple:
- **Kinin-o**^z, [OA 4] quinine | quinine | Chinin | chinino | quinina | quinino | quinina. (same el la 1-a eldono de la vortaro Esperanto-Germana de Zamenhof / Jürgensen) aŭ
 - **Imun-a**^z, [OA 4] immunisé (méd.) | immune | seuchenfest {2012 prefere: immun} | immune (med.) | inmune | imune | inmune (el la 2-a eld. de la Jürgensen-vortaro Esperanto-Germana).

685

¹⁸² Grosjean-Maupin, Emile (ĉ. 1929): *Kvara Aldono al U. V. (Proponata Listo)*. Paris, Centra Presejo Esperantista.

¹⁸³ Por detaloj vd. Wüster, Zamenhof-Radikaro, 1927.

66 Nete malĝusta estas la indiko pri zamenhofeco ĉe **Konker-i**^z. Zamenhof uzis la formojn *almiliti* (UV) aŭ *militakiri*. Konkeri estas el Boirac 1909.¹⁸⁴ Ĝia plej granda tiuepoka „rivalo“ estis **konkiri** el la vortaro de Kabe de 1910.

67 Resume la uzo aŭ neuzo de la indiko^z en OA 4 ŝajnas esti nek tre konsekvenca kaj sistema, nek fidinda.

d) La referenc-lingvoj de la Kvara Aldono

aa) La Germana

68 La pariza presejo de la Esperantista Centra Librejo evidente ne disponis pri la germana litero „ß“ kaj anstataŭigis ĝin per „ss“, vd. ekzemple

- **Kolizi-i**, [OA 4] entrer en collision | ... | zusammenstossen {legu: zusammenstoßen} | ...
- **Komision-o**, [OA 4] ... | Ausschuss | ...: de 1901 ĝis 1996 „Ausschuß“, de 1996 „Ausschuss“.

69 La germanaj tradukoj estas forte elinternaj. En 2012 ofte aŭ la eleksteraj internaciismoj estas paralele uzeblaj aŭ eĉ pli kutimaj, vd. ekzemple

- **Intelekt-o**, [OA 4] ... | Verstand, Erkenntnisvermögen {2012 ankaŭ: Intellekt} | ... (*Intellekt* estas paralele uzebla)
- **Komision-o**, [OA 4] ... | Ausschuss {2012 ankaŭ: Kommission} | ... (*Ausschuss* kaj *Kommission* estas paralele uzeblaj)
- **Fikci-o**, [OA 4] fiction | fiction | Erdichtung {2012 prefere: Fiktion} | ... (*Erdichtung* en 2012 estas nekutima, moderna uzo estas *Fiktion*)
- **Imun-a**^z, [OA 4] ... | seuchenfest {2012 prefere: immun} | ... (*seuchenfest* estas ne plu kutima arkaismo, en 2012 oni kutime diras *immun*).

bb) La Kataluna

70 La kataluna estas uzata kiel referenc-lingvo de la Vortaro Oficiala nur en la Kvara Aldono. Ĉiuj supersignoj de katalunaj vortoj tie estas dekstrakornaj, eĉ se iuj estu maldekstrakornaj laŭ la nuna ortografio:

- **Alo-o**, [OA 4] aloès (bot.) | aloe | Aloe (Pflanze) | aloe | áloe | aloes | áloe {legu: àloe}.
- **Aŭtonom-a**, [OA 4] ... | autónom {legu: autònom}.

VII. La elemento „mis-“ (1929)

Literaturo (selekto): Pri la prefikso "mis" (1910). I. Propono al la Akademio de S-ro Georg Eysel. II. Respondo de la Prezidanto de la Akademio [E. Boirac]. III. Raporto de la Direktoro de la Komisio pri Gramatiko [A. Grabowski]. En: Oficiala Gazeto 1910, p. 220-222. **Setälä**, Vilho (1918). La prefikso mis-. En: Esperanta Finnlando 1918:11 (nov), p. 25.

71 AV komentas: „Laŭ neoficiala parto de Aktoj de la Akademio 1963-1967 (paĝo 8) la elemento MIS/ (prefikso) apartenas al 4OA. Sed en 4OA tamen ne menciigis MIS/. Efektive MIS/ estis aldonita al UV aparte en la sama jaro, en kiu aperis 4OA, la jaro 1929. La rezultoj de la apartaj voĉdonoj pri 4OA kaj pri MIS/ eĉ estis anoncitaj en la sama cirkulero: “Akademio kaj Lingva Komitato – Rezultato de la diversaj balotoj – Majo 1929”. La prefikso MIS/ do ja estas oficiala, sed ĝi ne apartenas al 4OA.“

72 La prefikson „mis-“ la Akademio diskutis **jam en 1910** pro la propono de iu sinjoro Georg Eysel. Al li la tiama prezidanto **Boirac** nome de la Akademio respondis:

685

¹⁸⁴ Antaŭe jam ĉe Sentis 1906, detale vd. Vilborg, Etimologia Vortaro, vol. 3 (1993), p. 52.

„... Mi devas respondi al Vi ke tiu sama peto estis jam prezentita al la Akademio dum la pasinta jaro. Sed la Akademio ĝenerale opiniis, ke ĝia rolo ne devas esti enkonduki mem, per simpla aprioria decido, novajn vortojn aŭ afiksojn en la lingvon Esperanto. Ĝia rolo, laŭ ĝia deklaro antaŭ la Dresdena kongreso [UK 4 1908], devas nur konsisti en la kontrolado de la evolucio de la lingvo. Sekve, ĝi povas nur konstati la novajn vortojn aŭ formojn, kaj ilin sankcii, se la uzado montris, ke ili estas taŭgaj, kaj ĝenerale akceptitaj de ĉiuj.

Vi estas do tute libera uzi la preĥkson « mis », se tiu novaĵo saĝas al vi utila, same kiel oni jam uzis la sufikson « aĉ », antaŭ ol ĝi estis oficiale akceptita. Kiam la uzado de tiu prefikso fariĝos sufiĉe ĝenerala, tiam la Akademio povos ankaŭ sankcii ĝin.“

- 73 A. **Grabowski**, en 1910 „Direktoro de la Komisiono pri Gramatiko“, aldonis jenan avertan „**Raporton**“:

„Tute konsentante kun la opinio de la sinjoro Prezidanto pri la rolo de nia Akademio ĉe la enkonduko de novaj radikoj, ankaŭ mi opinias ke la proponanto estas tute libera uzi la prefikson « mis » je sia propra respondeco. Sed por ne kaŭzi konfuzon en nia lingvo, S-ro Eysel devas esti certa, ke li estos facile komprenata de la tuta Esperantistaro.

Pri la lasta punkto mi havas gravan dubon, ĉar kvankam du popolaj grupoj eble facile komprenus la signifon de la novaj vortoj kun « mis », la triono de la eŭropanoj, la slavoj, konas nek la prefikson, nek ion similan. Do la prefikso ne povas esti nomata internacia [do laŭ Grabowski „nova vorto“ en la senco de A 7].

Sed internacieco ne estas nepre kondiĉo de bona afikso; sufiĉas, ke ĝi estu klare difinita [kp. simile por prepozicioj R 14.1]. Bedaŭrinde la proponanto ne donas precizan difinon, kiu komprenigus al la slavoj la signifon de la citataj de li ekzemploj; la « mis » estas en ili tre diverssenca kaj la difino « malkorekta aŭ io simila », ne permesas diveni ĉie la ĝustan senco de la derivaĵo. Tiun-ĉi [tiel, kun streketo] malfacilon ne forigus ankaŭ la difinoj de la aŭtoroj de Ido: miss, unrichtig, verkehrt, wrongly, de travers. La slavoj estus devigitaj lerni la derivaĵojn kun « mis » kiel radikojn, dum la germanoj uzus la prefikson laŭ la modeloj de sia lingvo en multaj, tute malsamaj sencoj. Io simila estis en volapük [tiel, minuskle], kies aŭtoro por la germana sufikso « nis » enkondukis en sian lingvon la sufikson « nüp » (aŭ ion similan), kaj poste uzis ĝin por traduki la vortojn *Gefängnis* (malliberejo) kaj *Zeugnis* (atesto).

Ĉu konsiderante tion la enkonduko de « mis » en Esperanton estus efektiva pliperfektigo kaj plifaciligo de nia lingvo? [kriterio el A 9]

Pri la vorto « diskredit » uzata en la Fundamenta Krestomatio¹⁸⁵ mi permesas al mi turni la atenton de S-ro Eysel, ke ĝi ne estas derivaĵo esperanta, sed radiko internacia, aplikita laŭ § 15 de nia Fundamento; komparu: *diskreditiren* (germane), *to discredit* (angle), *screditare* (itale), *discréditer* (france), *diskreditirovat*, (ruse), *dyskredytować* (pole), k. t. p. Sekve ĝi estas senpere komprenebla al la popoloj germanaj, romanaj kaj slavaj.“

- 74 Malgraŭ tio en la Aprila numero 1910 aperis jena mallonga noto:

685

¹⁸⁵ „Se oni diras al vi : "tiu aŭ alia esperantisto aŭ societo esperantista en tro granda sed ne prudenta fervoro faris ian falsan paŝon kaj ridindigis aŭ diskreditigis per tio ĉi vian tutan aferon", tiam respondu: ...“ (Esenco kaj Estonteco ... en FK).

„10. — Pri la prefikso MIS.

Tiu prefikso, kun la senco de malbone, malprave, maltrafe, estas forte aprobita de kelkaj Akademianoj, kaj estas jam uzita en la Revuo. Ĝi estus tre oportuna, por eviti longajn kunmetitajn vortojn, aŭ eĉ hibridajn vortaĉojn kiel disproporcio, diskreditigi, k. t. p. Plie, tiu prefikso povas naski nenian konfuzon.“ [OG 1910:04, p. 322]

Ĝis 1909-08-15 ses Akademianoj senkondiĉe kaj aldone unu plia nur por teknika uzo „akcept[is], ke la Akademio konsilu la provan uzadon de la sekvantaj neologismoj“ [de la sufikso „mis-“].

VIII. La 5-a Oficiala Aldono de 1934 (OA 5)

1. Fontoj de OA 5 de 1934 kaj OA 6 de 1935

- 75** La samspecaj OA 5 de 1934 kaj OA 6 de 1935 estis publikigitaj en diversaj fontoj.¹⁸⁶ Ankaŭ la „Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio 1935“¹⁸⁷ listigas la lingvo-elementojn oficialigitajn per OA 5 kaj krome la 21 lingvo-elementojn oficialigitajn per OA 6. En tiu jarlibro la listo aperas en du partoj: „Vortoj aldonitaj al la Universala Vortaro“ kaj „Teknikaj Vortoj enkondukitaj en la Komunan Vortaron“. Tamen en la jarlibro ne estas menciite, ĉu unuopa vorto apartenas al la Kvina au Sesa Aldono. Krome en la jarlibro mankas la difinoj. Anstataŭe estas menciite, ke la „esperante redaktitaj difinoj estas entenitaj en la n-ro 9 de la 'Oficialaj Sciigoj' (Majo 35) disdonita al la L. K.-anoj kaj esperantaj gazetoj.“ Pro tio eblas konkludi, ke temas pri la difinoj de la vortoj de kaj la Kvina Aldono kaj Sesa Aldono. Tia dokumento, ja kun la numero 9, sed kun la tempoindiko „Aprilo 1935“, tamen entenas nur la lingvo-elementojn de la Sesa Aldono kaj iliajn tradukojn kaj difinojn.
- 76** Dum la titolo de **OA 5.1** kaj **OA 6.1** („Vortoj aldonitaj al la Universala Vortaro“) estas klara en la senco de A 7 / A 10.4, ne estas evidente, kio signifas tiu de **OA 5.2** / **OA 6.2** („Teknikaj Vortoj enkondukitaj en la Komunan Vortaron“). „Teknika“ estas tiuepoka termino por „faka“, kontraste al „ĝenerallingva“, do „komuna“. Tiu distingo tamen estas fremda al UV kaj la cetera Vortaro Oficiala ekster OA 5 kaj 6. La Antaŭparolo distingas nur inter „oficiala“ kontraste al „privata“. La „Fundamenta semaforo“ distingas inter „vortoj fremdaj“ (R 15), „novaj vortoj“ (A 7) kaj „formoj novaj“ (A 8). Sed la vortoj de OA 5.2 kaj 6.2 ne apartenas nur al unu kategorio, ĉefe ne estas nur vortoj fremdaj laŭ R 15, kiel montras la listetoj:

OA 5.2: aviado (R 15), bremsa (A 7), pilo (R 15 aŭ A 7).

OA 6.2: arbusto (A 7), gramofono (R 15), grego (A 7).

2. OA 5 de 1934

- 77** La Kvina Aldono (OA 5) aperis en 1934. Ĝi ampleksas 8 lingvo-elementojn, prezentitajn en la du ĵus nomitaj partoj.

685

¹⁸⁶ Tiuj kaj la sekvaj klarigoj preskaŭ laŭvorte transprenitaj el Kück, OLEO, 2008, kiu nomas jenajn fontojn: Bastien, Louis; Rollet de l'Isle, Maurice. Kvina Oficiala Aldono al Universala Vortaro. Oficialaj sciigoj de la Akademio N-ro 4. Paris: Centra Presejo Esperantista 1934. Bailey, William; Rollet de l'Isle, Maurice. Sesa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro. Oficialaj sciigoj de la Akademio, N-ro 9. Paris: Centra Presejo Esperantista 1935.

¹⁸⁷ Esperantista Akademio (eld.). Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio 1935. Paris: Esperantista Centra Librejo, 1935, p. 38-40 (cit. laŭ OLEO).

- 78** Ili estas difinitaj en Esperanto kaj krome tradukitaj al la angla, franca, germana, hispana, itala kaj pola. La kap-vortoj estas – maloportune kaj „nenature“ - skribitaj nur per majuskloj laŭ jena modelo:

PLAGIATO [OA 5.1] Nelojala faro de tiu, kiu prezentas sub sia propra nomo verkon au parton de verko, kies aŭtoro li ne estas | plagiarism | plagiat | geistiger Diebstahl | plagio | plagiat | plagjat.

PILO [OA 5.2] (*fiziko*) *Fonto de elektra energio, uzanta la transformigon de kemia energio* | (electric) pile | pile (électrique) | galvanische Säule | pila (eléctrica) | pila elettrica | baterja galvaniczna..

IX. La 6-a Oficiala Aldono de 1935 (OA 6)

1. Fontoj de OA 5 de 1934 kaj OA 6 de 1935

- 79** Pri la fontoj de OA 6 vd. la enkondukan komenton ĉe OA 5.

2. OA 6 de 1935

- 80** OA 6 aperis en 1935. Ĝi ampleksas 21 lingvoelementojn. Same kiel OA 5, ankaŭ OA 6 konsistas el jenaj partoj, pri kiuj vd. ĉe OA 5:

- „Oficialaj Vortradikoj aldonitaj al Universala Vortaro“ [OA 6.1] kaj
- „Teknikaj Vortradikoj enkondukitaj en la Komunan Vortaron“ [OA 6.2].

- 81** OA 6 uzas la samajn referenc-lingojn kiel OA 5, nome ekzistas tradukoj en la anglan, francan, germanan, hispanan, italan kaj polan kaj krome esperantlingvaj difinoj. Same kiel en OA 5 la kap-vortoj estas skribitaj nur per majuskloj laŭ jena modelo:

ANGORO [OA 6.1] 1-e: *Malsaneca sento de sufoko kun korpremateco*; 2-e: *Sento de sufoko, kaŭzata de timego, maltrankvileco* | {en} anguish | {fr} angoisse | {de} (Quälende, Herzens-, Todes-) Angst | {es} angustia | {it} angoscia | {pl} duszność, tesknota.

X. La elemento „end“ (1952)

- 82** Pri „end“ la Akademio diskutis jam en **1910** (OG 1910, p. 321).

7. — Pri la sufikso END.

Oni proponas, kaj kelkaj jam uzis la sufikson *end*, kun la senco « kiu estas por fari », « kiu devas esti farata », Ekz.: solvenda problemo (kiu ne estas eble solvinda, kaj ankaŭ eble estos neniam solvota).

Tiun sencon, ĝi havas efektive en la matematika vorto: dividendo.

La enkonduko de tiu sufikso naskus konfuzojn kun kelkaj ekzistantaj vortoj: agendo, lavado, legendo, pretendo.

En multaj okazoj, ĝi estas senutila aŭ ne diferencanta je *ind*.

En aliaj okazoj, ĝi apenaŭ diferencas de *ot*, kiu, cetere, en oftaj cirkonstancoj estas ne tre ĝuste uzata.

Oni eble povus ankaŭ anstataŭigi ĝin per *por*. Ekz.: porsolva, pordigesta, porestinga.

Se oni akceptos ĝin, oni eble devos precizigi ĝian sencon, kaj rezervi ĝin por la spirita kaj nemateria devigo.

« Oni precipe devas doni pri la senco de tiu sufikso, klaran difinon, facile distingeblan unuflanke de *ind* kaj duaflanke de *ot*, ĉar oni ne forgesu, ke estas ĉiam proporcie pli malfacile elekti inter tri formoj ol inter du. » (Evstiféieff.)

Ĉiuokaze, ŝajnas, ke tiu sufikso povus esti pli bone enkondukata de filozofoj kaj sciencistoj, en iliaj spertaj uzadoj kaj la praktiko mem montros, ĉu oni provos ankaŭ enkonduki ĝin poste en la komunan uzadon.

83 En 1952 –end estis oficialigita, vd. la tekston de la decido en BK II.

XI. La 7-a Oficiala Aldono de 1958 (OA 7)

1. Ĝeneralaj informoj

84 La Sepa Aldono (OA 7) aperis en 1958.¹⁸⁸ Ĝi celis precipe konsolidiĝi kaj ordigi la ĝistiaman Fundamentan kaj Oficialan vorto-stokon kaj pro tio temas pri jeno:

- ĝi deklaris Fundamentajn diversajn elementojn troveblajn en la Fundamento ekster la alfabeto ordo de la UV (liternomojn, tabel-vortojn mankantajn en la Fundamento, vortojn el la Antaŭparolo, proprajn nomojn el la Ekzercaro kaj la Gramatikoj k.a.)
- ĝi deklaris Oficialajn diversajn aganto-nomojn apartenantaj al sciencoj deklaritaj Oficialaj en pli fruaj Aldonoj, laŭ la skemo „agronomi’ (OA 1) [la scienco] → agronom’ (OA 7) [la sciencisto = agronomiisto]“.

85 Laŭ la Sepa Aldono „*Fundamenta* estas vorto trovebla en la 'Fundamento de Esperanto'“, kaj „*Oficiala* estas vorto aldonita al la 'Universala Vortaro' per decido de la Akademio aŭ de la antaŭa Lingva Komitato.“

86 Estas rimarkinde, ke laŭ la sepa aldono *Fundamentaj* estas ankaŭ tiuj vortoj, kiuj troviĝas nur en la Antaŭparolo al la Fundamento, ĉar ĝin la Sepa Aldono rigardas ankaŭ kiel parton de la Fundamento, almenaŭ rilate al la vortmaterialo. La principan demandon pri la formala „leĝ-dona“ statuso de la Antaŭparolo OA 7 tamen neniel tuŝas. Troviĝas neniu argumento por aŭ kontraŭ la malsamaj opinioj pri tiu demando klarigita supre je sekcio xx.

2. Deklaroj pri Fundamenteco

a) Liternomoj

87 En la sepa aldono ĉiuj 28 **liternomoj** a ĝis z estas deklaritaj Fundamentaj kaj difinitaj laŭ la skemo:

- „**a** = nomo de la litero a, unua litero de la Esperanta alfabeto“;
- „**ŭo** = nomo de la litero ŭ, dudeksa litero de la Esperanta alfabeto“;
- „**zo** = nomo de la litero z, dudekoka litero de la Esperanta alfabeto“.

88 Estas rimarkinde, ke la **liternomo ŭo** estas la sola okazo el ĉiuj Fundamentaj kaj oficialaj lingvoelementoj, kie la 26-a litero ne staras post vokalo. La en iuj Fundamentaj aŭ oficialaj radikoj troviĝantaj literkombinoj *aŭ* kaj *eŭ* en ĉiuj aliaj okazoj estas diftongoj. Por diskuto vd. la komentojn ĉe FG 0.

b) Tabel-vortoj

89 En la Sepa Aldono estas donitaj ankaŭ la difinoj de jenaj ok radikoj (vortoj), kiuj same estas deklaritaj Fundamentaj:

685

¹⁸⁸ Akademio de Esperanto (eld.). Sepa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro. Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto N-ro 1. [Sen loko] Decembro 1958.

- “**arĥaism'** = vorto aŭ esprimo ne plu uzata en la komuna lingvo
- [...]
- **ĉial** = el ĉia kaŭzo, motivo
- **ĉies** = apartenanta al ĉiu
- **ĉiom** = tutkvante
- [...]
- **diplomati'** = arto, profesio kaj aro de la diplomatoj
- [...]
- **nenial** = el nenia kaŭzo, motivo
- **neniom** = nulkvante
- [...]
- **ties** = apartenanta al tiu

c) Fundamentaj vortoj ekster la ĝusta alfabeto vico de la UV

- 90** Krome estas deklaritaj Fundamentaj jenaj 47 radikoj. Interkrampe OA 7 citas la numeron de la Oficiala Aldono, en kiu la koncerna radiko estas listigita. La precizajn trov-lokojn en la Fundamento oni trovas en la vortara parto de tiu ĉi komentario:

absolut' (1); aktiv' (1); alfabet' (1); autor' (1); autoritat' (1); bal' (1); centim' (1); diplomat' (1); dogm' (2); doktor' (1); dokument' (1); energi' (1); fi (1); fizik' (1); fotograf' (1); geograf' (1) {laŭ OA 8 pres-eraro: estu geografi}; ide' (1); instituci' (1); kilometr' (1); kompetent' (1); kongres' (1); kontrol' (1); kopek' (1); literatur' (1); metr' (1); milion' (2); naiv' (1); paradoks' (2); paralel' (1); patent' (1); pfenig' (1); prefiks' (1); princip' (1); projekt' (2); rezultat' (1); sankci' (1); scen' (1); sistem' (1); sofism' (1); special' (1); sufiks' (1); teatr' (1); telegraf' (1); teori' (1); tragedi' (1); valor' (1); zoologi' (1).

aa) Propraj nomoj

- 91** En la Fundamento **propraj nomoj** de individuaj personoj (ekz. „Zamenhof“) kaj urboj (ekz. „Berlino“) tute ne aperas en UV, sed ja en ĉiuj aliaj partoj de la Fundamento. Laŭ OA 7 la sekvaj 35 propraj nomoj estas Fundamentaj. OA 7 tre resume difinas ilin en krampoj ekz. per „(vira antaŭnomo)“, „(urbnomo)“ ktp. La precizajn trov-lokojn en la Fundamento oni trovas en la vortara parto de tiu ĉi komentario:

angl' (nomo de ano de popolo)
Ann' (virina antaŭnomo)
Anton' (vira antaŭnomo)
August' (vira antaŭnomo)
Berlin' (urbnomo)
Bert' (virina antaŭnomo)
Bulonj' (urbnomo)
Elizabet' (virina antaŭnomo)
Ernest' (vira antaŭnomo)
Esperant' (nomo de lingvo)
Eŭrop' (nomo de kontinento)
franc' (nomo de ano de popolo)
Georg' (vira antaŭnomo)
german' (nomo de ano de popolo)
hebre' (1-a Oficiala Aldono; nomo de ano de popolo)
hispan' (nomo de ano de popolo)
Jozeŝ' (vira antaŭnomo)
Kalvin' (vira nomo)
Klar' (virina antaŭnomo)

London' (urbonomo)
Ludovik' (vira antaŭnomo)
Luter' (vira nomo)
Nikodem' (vira antaŭnomo)
Nikola' (vira antaŭnomo)
Pariz' (urbonomo)
Paulin' (virina antaŭnomo)
Petr' (vira antaŭnomo)
pol' (nomo de ano de popolo)
rus' (nomo de ano de popolo)
Sofi' (virina antaŭnomo)
Stefan' (vira antaŭnomo)
Ŝiller' (vira nomo)
Teodor' (vira antaŭnomo)
Vaŝington' (vira nomo)
Vilhelm' (vira antaŭnomo)

- 92** Ankaŭ la sekvaj 10 propraj nomoj, kiuj troviĝas ekster la alfabeto vico en la Universala Vortaro, estas Fundamentaj laŭ la Sepa Aldono (interkrampe: difinoj donitaj de OA 7). La precizajn trov-lokojn en la Fundamento oni trovas en la dua parto de tiu ĉi komentario:

Aleksandr' (vira antaŭnomo)
Emili' (virina antaŭnomo)
Henriet' (virina antaŭnomo)
Izrael' (vira nomo)
Johan' (vira antaŭnomo)
Mari' (virina antaŭnomo)
Miĥael' (vira antaŭnomo)
Nov-Jork' (urbonomo)
turk' (nomo de ano de popolo)
Varsovi' (urbonomo)

d) Deklaroj pri Oficialeco

- 93** OA 7 deklaras 31 vortojn Oficialaj. Temas pri grek-devenaj agantnomoj rilate al nomoj de scienco aŭ similo, kiuj jam antaŭe estis oficialigitaj, ekz. *biolog'* kiu apartenas al *biologi'*, jam oficialigita per OA 1. La ekzemplo montras, ke nur la radikoj sen kategori-indika finaĵo aŭ tradukoj estas donitaj.
- 94** Granda parto de OA 7 traktas unuafoje en la ĝistiam aro de aldonoj pri tiaj radikoj, kiuj kaj estis oficialigitaj per iu el la antaŭaj aldonoj kaj aperas en la Fundamento aŭ Antaŭparolo al ĝi. ??
- 95** La per la sepa aldono oficialigitaj 31 vortoj estas prezentitaj en du grupoj de 16 (eltiro: figurajho 9) kaj 15 radikoj. Ili rilatas al jam antaŭe oficialigitaj grek-devenaj vortoj sciencaj aŭ similaj. La vortoj de la unua grupo estas kompreneblaj kiel difinitaj laŭ la skemo:
- oficiala agantnomo = sciencnomo-radiko-isto, ekz. biologo = biologiisto.
- 96** La unua grupo koncernas vorto-parojn laŭ la skemo **-olog'** → **-ologi'** plus la solan agronom' → agronomi'. En krampoj OA 7 nomas tiun aldono, per kiu la rilata vorto scienca aŭ simila jam antaŭe estis oficialigita:

agronom' (1); antropolog' (1); biolog' (1); entomolog' (2); etimolog' (2); etiolog' (1); fiziolog' (1); genealog' (2); grafolog' (1); meteorolog' (2); mineralog' (2); mitolog' (1); ornitolog' (3); paleontolog' (2); patolog' (2); zoolog' (1).

- 97 La dua grupo traktas vorto-parojn laŭ la skemo **-graf'** → **-grafi'** plus kelkajn aliajn. La radiko *aŭtokrat'* estis - evidente nekonscie - oficialigita duan fojon per la Sepa Aldono, ĉar la respektiva vorto *aŭtokrat-o* jam antaŭe estis oficialigita per la Dua Aldono de 1919. Jen la radikoj de la dua grupo:
- aŭtokrat' (2); bibliograf' (2); biograf' (2); etnograf' (2); geograf' (1); geometr' (1); homeopat' (1); kartograf' (2); kosmograf' (2); oligarĥ', oligark' (3); paleograf' (2); plutokrat' (3); teokrat' (2); tipograf' (1); topograf' (2).
- 98 La **Oka Aldono** (1974) daŭrigis tiun „ordigadon“ de la Vortaro Oficiala alstrebitan de OA 7 kaj decidis: „Estas oficialigitaj jenaj vortoj: aristokratio, demokratio, fotografio, litografio kiel paruloj al la Fundamenta fotografi kaj al la Oficialaj: aristokrato, demokrato kaj litografi.“ (OA 8, II.B.5.).
- 99 La **Naŭa Aldono** (2007) oficialigis pliajn radikojn, kiuj finiĝas per etimologie grekaj sufiksoj je -i (pseŭdosufiksoj), kiuj servas al distingo de fako-aganto-paroj. OA 9 tiun fenomenon tamen ignoras kaj denove rompas la ordon, kreitan per OA 7 kaj OA 8, tiel ke nun ree estas nekompletaj paroj.
- 100 Ĉe *burokrat-* [OA 9] mankas la internaciismo (FG-15-vorto) *burokrati-*; anstataŭe OA 9 oficialigis la derivaĵojn *burokrat-aro* kaj *burokrat-ismo*. Simile OA 9 **ne** oficialigis *radiografi-o* (trovebla ekz. en GD 1955), sed anstataŭe *radiograf-i* (paralele al *fotografi* kaj *litografi*) tiel ke la ideo de *radiografi-o* estu esprimita per *radiograf-ado* aŭ *~aĵo*.
- 101 Al *demografi-* [OA 9] mankas la aganto *demograf-* (= demografi-isto), al *ekologi-* la aganto *ekolog-* (= ekologi-isto), al *etnologi-* *etnolog-* (= etnologi-isto), al *ideologi-* *ideolog-* (= ideologi-isto). Uzante nur la Vortaron Oficialan oni de 2007 ja rajtas diri etimolog-o [OA 2], sed diru etnologi-isto [OA 9] anstataŭ simple etnolog-o (R 15). Ĉu la praktiko tiun preferon de OA 9 sekvos, restas observe, sed estas tre dube.
- 102 Oni povas regroupigi la oficialigitajn vorto-parojn laŭ la ses grek-devenaj finaĵoj jene:

	Persono, aganto (-i'ist') [OA 1] [OA 2] [OA 3] [OA 9]	Scienco, fako (radiko finiĝas per -i') [OA 7] [OA 8] [OA 9]
1.	-arĥ' / -ark'	-arĥi' / --arki'
1.1	oligarĥ', oligark' [OA 3]	oligarĥi', oligarki' [OA 3]
2.	-krat	-krati'
2.1	aristokrat' [OA 1]	aristokrati' [OA 8]
2.2	aŭtokrat' [OA 2]	aŭtokrati' [OA 7]
2.3	burokrat/o [OA 9]	—
2.4	demokrat' [OA 2]	demokrati' [OA 8]
2.5	homeopat' [OA 1]	homeopati' [OA 7]
2.6	plutokrat' [OA 3]	plutokrati' [OA 7]
2.7	teokrat' [OA 2]	teokrati' [OA 7]
3.	-graf'	-grafi'
3.1	bibliograf' [OA 2]	bibliografi' [OA 7]
3.2	biograf' [OA 2]	biografi' [OA 7]
3.3	—	demografi/o [OA 9]
3.4	etnograf' [OA 2]	etnografi' [OA 7]
3.5	fotograf' [FE] [OA 1] {verbo}	fotografi' [OA 8]
3.6	geograf' [OA 1]	geografi' [OA 7]
3.7	kartograf' [OA 2]	kartografi' [OA 7]
3.8	kosmograf' [OA 2]	kosmografi' [OA 7]

	Persono, aganto (-i'ist') [OA 1] [OA 2] [OA 3] [OA 9]	Scienco, fako (radiko finiĝas per -i') [OA 7] [OA 8] [OA 9]
3.9	litograf' [OA 1] {verbo}	litografio [OA 8]
3.10	paleograf' [OA 2]	paleografi' [OA 7]
3.11	radiograf/i [OA 9] {verbo}	—
3.12	tipograf' [OA 1]	tipografi' [OA 7]
3.13	topograf' [OA 2]	topografi' [OA 7]
4.	-metr'	-metri'
4.1	geometr' [OA 1]	geometri' [OA 7]
5.	-olog' / -alog'	-ologi' / -alogi'
5.1	antropolog' [OA 1]	antropologi' [OA 7]
5.2	biolog' [OA 1]	biologi' [OA 7]
5.3	—	ekologi/o [OA 9]
5.4	entomolog' [OA 2]	entomologi' [OA 7]
5.5	etimolog' [OA 2]	etimologi' [OA 7]
5.6	etiolog' [OA 1]	etiologi' [OA 7]
5.7	—	etnologio [OA 9]
5.8	fiziolog' [OA 1]	fiziologi' [OA 7]
5.9	genealog' [OA 2]	genealogi' [OA 7]
5.10	grafolog' [OA 1]	grafologi' [OA 7]
5.11	—	ideologi/o [OA 9]
5.12	meteorolog' [OA 2]	meteorologi' [OA 7]
5.13	mineralog' [OA 2]	mineralogi' [OA 7]
5.14	mitolog' [OA 1]	mitologi' [OA 7]
5.15	ornitolog' [OA 3]	ornitologi' [OA 7]
5.16	paleontolog' [OA 2]	paleontologi' [OA 7]
5.17	patolog' [OA 2]	patologi' [OA 7]
5.18	zoolog' [OA 1]	zoologi' [OA 7]
6.	-nom'	-nomi'
6.1	agronom' [OA 7]	agronomi' [OA 1]

Nota: Al stereofoni/o [OA 9] ne ekzistas aganto-parulo, al pankreat/o [OA 9] kaj telepati/o [OA 9] ili ne estas kutimaj.

XII. La 8-a Oficiala Aldono de 1974 (OA 8)

a) Superrigardo

103 Laŭ la Akademia Vortaro [12] la Oka Aldono (OA 8) aperis en 1974⁷. Ĝi havas tri ĉefajn temojn:

- Ĝi kompletigas la „ordigan“ laboron de OA 7 kaj en unua parto deklaras Fundamentajn pliajn radikojn ekster la ĝusta alfabeto de UV, kiujn OA 7 pretervidis.
- En dua parto ĝi deklaras Oficialajn 200 „novajn“ vortojn. El ili estas 32 landnomoj kaj 15 landano-nomoj.
- Fine ĝi oficiale nuligas Akademian malkonsilon de 1922 pri la uzo de la sufikso **-i** por landnomoj kaj lasas la preferon inter **-i** kaj **-uj** al la uzo.

b) Deklaroj pri Fundamenteco

104 Jenaj vortoj estas deklaritaj Fundamentaj. Interkrampe estas indikita la antaŭa Aldono, per kiu estis oficialigita la koncerna radiko. La precizajn trov-lokojn en la Fundamento oni trovas en la vortara parto:

adres/o (1); centr/o (1); frank/o (1); general/o (1); jur/o (3); ĵurnal/o (1); kilogram/o (1); material/o (1); metal/o (1); muzik/o (1); oficial/a (1); tekst/o (1).

- 105** Krome en la Oka Aldono estas deklarite, ke Fundamentaj estas la vorto **deino** kaj krome la propraj nomoj **Zamenhof** kaj **Paul/o**.
- 106** La vorto **deino** troveblas en FE 2 (Ekzercaro de legado); aŭ ĝi devenas de pra-Esperanta radiko (de') aŭ temas pri pres-eraro (celita estis *feino*). Ĉar laŭdifine „eraroj“ ne ekzistas en la Fundamento, ĝi tamen estas ĝusta Esperanto, sed arkaa. Diskuton vd. en la ĉapitro „Eraroj“ en la Vortaro Oficiala“.
- 107** **Paŭ/o** kun la afikso *-in-* kiel **Paulin'**, jam estis deklarita Fundamenta en la Sepa Aldono. La Akademia Vortaro [12] ne kunnombros la vorton *deino* en la statistiko de Fundamentaj lingvo-elementoj. Tial same estas procedite tie ĉi.
- 108** Pri la propraj nomoj *Vashington*, *Nov-Jork* kaj *Zamenhof* laŭ OA 8 „temas pri neesprimita licenco al la 16a Regulo pri apostrofado de substantivoj, licenco, laŭ kiu ĉe propraj nomoj povas esti forlasata ne nur la finaĵo de l' substantivo, sed ankaŭ la apostrofo mem.“ Diskuton vd. ĉe R 16.

c) Deklaro pri Oficialeco

aa) Ĝeneralaj vortoj

- 109** La vortoj estas prezentitaj en „natura“ uskleco kun kategori-indika finaĵo kaj per difino en Esperanto kaj tradukoj en la anglan, francan, germanan, hispanan, italan kaj portugalan. De ses vortoj el botaniko kaj zoologio estas krome donitaj la scienc-latinaj terminoj. Jen specimenoj:

animal/o. [OA 8] Komuna vorto por bestoj kaj homoj, opone al vegetaloj kaj mineraloj. — A. animal (as opposed to vegetable or mineral), F. animal, G. Lebewesen, H. animal, I. animale, P. animal.

cep/o. [OA 8] Legomo, specio el la genro ajlo, kulturata por sia bulbo (*Allium cepa*). — A. onion, F. oignon (légume), G. Zwiebel, H. cebolla, I. cipolla, P. cebola.

- 110** [daŭrigota]

XIII. La 9-a Oficiala Aldono de 2007 (OA 9)

- 111** OA 9 enhavas enkondukon, kiu pluraspekte lezas la preskribojn de la Antaŭparolo (A). En ĝia teksto ni enmetis krom numeradon de la alineoj („[1]“ -„, [9]“) ruĝajn notojn, kiuj referencas al *niaj* komentoj malsupre.

Enkonduko

[1] La Akademio de Esperanto prezentas en tiu ĉi Naŭa Oficiala Aldono 209 radikojn, kiujn ĝi decidis oficialigi.

[2] Kiam la Akademio oficialigas radikon, tio formale signifas, ke ĝi aldonas tiun radikon al la Universala Vortaro, kiu estas parto de la Fundamento de Esperanto. Tio tamen ne signifas, ke la radiko fariĝas Fundamenta, ĉar Fundamentaj estas nur tiuj elementoj, kiuj troviĝas en la origina netuŝebla Fundamento.¹ Praktike tia oficialigo havas la karakteron de forta rekomendo. Devige gvidi la lingvouzon la Akademio nek povas, nek volas, sed ĝi esperas, ke ĝiajn rekomendojn la uzantoj de la lingvo atentos kaj trovos utilaj.

[3] En antaŭaj Oficialaj Aldonoj la radikoj kaj vortoj estis klarigitaj precipe per tradukoj en naciajn lingvojn, ĉefe en la kvin naciajn lingvojn de la Fundamento, sed ankaŭ en aliajn lingvojn. Sed oni uzis ankaŭ difinojn en Esperanto, precipe en la Aldonoj Sepa kaj Oka. En tiu ĉi Naŭa Aldono la Akademio elektis uzi nur difinojn en Esperanto sen tradukoj nacilingvaj, opiniante, ke nia lingvo nun estas sufiĉe matura por povi difini siajn proprajn vortojn. Multajn el la difinoj akompanas helpaj ekzemploj.

[4] La oficialaj difinoj inkluzivas ĝenerale nur la kernajn sencojn de la koncernaj vortoj. Multaj vortoj havas pliajn neoficialajn uzojn, kiuj diversmaniere baziĝas sur la kernaj sencoj. Tio povas esti ekzemple sencoj fakaj aŭ figuraj. En kelkaj okazoj ni tamen mencias ankaŭ fakajn sencojn aparte atentindajn aŭ klarigindajn, kaj iafoje ankaŭ notindajn uzojn figurajn.

[5] En la difinotekstoj ni uzas nur elementojn Fundamentajn kaj oficialajn (eventuale oficialigitajn en tiu ĉi Aldono). La solaj esceptoj estas kelkaj malmultaj propraj nomoj en ekzemploj kaj notoj.²

[6] Grava celgrupo estas la vortaristoj, al kiuj ni rekomendas prezenti unuavice la oficialajn sencojn de la koncernaj vortoj. Tiujn la vortaristoj tamen povas kompletigi per pliaj sencoj neoficialaj laŭ la celo kaj bezonoj de la koncerna vortaro. Kompreneble neniel necesos citi niajn difinojn laŭvorte. Gravas la intencitaj ideoj.

[7] Ni provis verki la difinojn per tiel facila lingvaĵo, ke ili taŭgu ankaŭ por ordinaraj lingvouzantoj. La difinoj tamen enhavas laŭbezone ankaŭ aldonajn precizigajn detalojn, kiuj celas unuavice fakulojn kaj vortaristojn, ekzemple sciencajn (ne-Esperantajn) nomojn de bestoj kaj vegetaĵoj, kaj internaciajn landokodaĵojn laŭ la kodo ISO 3166. En kelkaj lokoj la strebo al facila lingvaĵo kaj la evitado de neoficialaj radikoj necesigis elekton de esprimoj, kiujn fakuloj eble trovas neuzindaj. Temas ekzemple pri krustulo anstataŭ krustaco, penikŝimo anstataŭ penicilo, kaj sangoĉelo anstataŭ globulo. Tion oni ne komprenu kiel kritikon kontraŭ la respondaj fakaj esprimoj.

[8] Ĉe verboj la transitivecon (kaj ĝenerale la frazokonstruadon) ni montras nur per ekzemploj.

[9] La Direktoro volas aparte danki al nia korespondanto Sylla Chaves³, kiu preparis la originajn listojn de kandidatovortoj, kaj kiu provizis nin per multe da aldona materialo, el kiu espereble baldaŭ rezultos pluaj Oficialaj Aldonoj.

[10] La Naŭa Oficiala Aldono estis aprobita de la Akademio en Marto 2007. Voĉdonis 33 el 45 Akademianoj (pli ol du trionoj). La limo por aprobo estis do 17 jesaj voĉoj (duono el ĉiuj voĉdonintoj). La kandidataj radikoj ricevis inter 33 kaj 23 jesojn. Sekve estis oficialigitaj ĉiuj 209 radikoj kun siaj respektivaj difinotekstoj.⁴

La Direktoro de la Sekcio
pri la Ĝenerala Vortaro,
Bertilo Wennergren

112 Noto 1, en [2]: La aserto „Tio tamen ne signifas, ke la radiko fariĝas Fundamenta“ ne estas akordigebla kun la preskriboj de A 7.2 kaj A 10.4, pri kiuj vd. la ĉapitron pri la Antaŭparolo:

„...kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio *enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel « Aldonon al la Fundamento »* [A 7.2].

„... ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidos *pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj ...* [A 10.4]“

La F-to nemiskompreneble klarigas, ke oficialigitaj vortoj ekhavas tute la saman statuson de „eterne ĝusta Esperanto“ kiel vortoj oficialigitaj jam en 1905. OA-vortoj estas samrangaj kun UV-vortoj. Detalan diskuton vd. en la ĉapitro „Antaŭparolo“.

113 Noto 2, en [5]: Por preciza listo vd. la ĉapitron „„Kaŝitaj“ neoficialaj vortoj en la Vortaro Oficiala“.

- 114 Noto 3**, en [9]: Sylla Chaves (1929-2009) estis brazila UN-oficisto, verkisto, pedagogo, aktivulo en la brazila Esperanto-movado kaj membro de la Akademio de 1986 ĝis 1996.
- 115 Noto 4**, en [10]: La informoj pri la voĉdonoj ne sufiĉas por sendube scii, ke la Akademio ne lezis sian propran statuton, nome art. 23 pri la proceduro (la tekston vd. en la ĉapitro „Akademio“). Por oficialigo de novaj vortoj en la senco de A 7 sufiĉas du triona partopreno kaj absoluta (t.e. simpla) plimulto de la voĉdonantoj (tie ĉi 33 el 45, do pli ol du trionoj; duono de 33, do minimume 17, vd. art. 23.2). Sed por oficialigo de „formo nova“ en la senco de A 8 „la aprobo de almenaŭ du trionoj de ĉiuj membroj estas necesa“ (art. 22.3), do de 30 Akademianoj.
- 116** En OA 9 estas almenaŭ tri „formoj novaj“ (A 8-vortoj), nome
- **beletr-**, nova formo sinonima al la unuradika **beletristik-** (OA 1) kaj
 - **koment-**, nova formo sinonima al la unuradika **komentari-** (UV).
 - **sugest-**, nova formo sinonima al la unuradika **sugesti-** (OA 3.2).
- Ĉar la enkonduko ne klarigas, ĉu **beletr-**, **koment-** kaj **sugest-** ricevis minimume 30 voĉojn, povas esti, ke ili estis „aprobitaj“ kontraŭstatute.
- 117** Sendepende de la preciza voĉdona rezulto pri tiuj tri vortoj validas jeno: La propono de formoj novaj laŭ A 8 estas la plej forta kaj tranĉa mezuro, tuŝanta la unuecon de la lingvo. Pro tio la F-to donis tiun rajton *monopole* al „aŭtoritata centra institucio“ (A 8.1, A. 9.4), kontraste al la proponado de novaj vortoj, per kiuj *ĉiu* esperantisto povas „riĉigadi la lingvon“ (A 7.1). Krome la F-to preskribis apartajn kondiĉojn por enkonduko de formoj novaj, nome „troa neoportuneco“ de la formo malnova (A 8.1), „efektiva neceseco“ por la formo nova (A 9.3) kaj „matura prijuĝado“ pri la „perfektigado“ (A 9.4). Fine la Statuto spegulas tiun eksterordinarecon de la mezuro laŭ A 8.1, A 10.4, postulante aparte grandan plimulton de du trionoj, kontraste al la kutime sufiĉa simpla plimulto (art. 23).
- 118** El tiuj preskriboj sekvas devo de la Akademio aparte zorge prezenti ĝiajn motivojn por proponado de formo nova. Ĝi devas eksplicite, kial laŭ ĝi la apartaj kondiĉoj estas plenumitaj kaj pro la principo de klareco (A 3.3) eksplicite komuniki ilin. Tiel la Akademio ankaŭ regule agis en la pasinteco, vd. ekz. la decidojn de OA 8 pri la „modernaj formoj“ kun ark- anstataŭ la malnovaj kun arĥ-. Io tia tute mankas pri **beletr-**, **koment-** kaj **sugest-**. Eĉ pli – OA 9 eĉ ne montras, ĉu la malsamaj kategorioj de „aprobitaj“ vortoj entute estis ekkonitaj antaŭ la voĉdonado, kiu laŭ Fundamento kaj Statuto necese devis okazi en du grupoj, formoj novaj laŭ A 8 (dutriona plimulto) kaj ĉiuj aliaj (simpla plimulto).
- 119** La procedura manko ne plu estas forigebla. Neniu povas scii, ĉu la rezulto de la voĉdonado estus alia, se ĉiuj Akademianoj konsciiĝus pri la specialaj cirkonstancoj ligitaj al tiuj tri vortoj antaŭ la voĉdonado. La regularo necese postulas, ke la diskuto pri tiuj tri formoj estas ripetota, la necesaj motivoj vortumotaj kaj poste nove voĉdonotaj. Sen tio, la tri formoj novaj **ne fariĝis Fundamentaj**.

D. Baza Radikaro Oficiala (BRO 1975)

Literaturo: Aktoj II (1968-1974). Oficiala Bulteno 10. s.l.: s.j. [dato de la antaŭparolo 1975-06-03], p. 28-54.

- 120** BRO estas verko de la Akademio pri la plej lernindaj, ĉar plej ofte uzataj vortoj. Ĝi klasifikas ilin en naŭ oftec-grupoj de nepre lernindaj vort(element)oj (grupo 1) ĝis ne tiom ofte uzataj, kiuj tamen ankoraŭ apartenas al la „baza“ (kerna) vorttrezoro (grupo 9). Ĉefa cel-grupo estas verkantoj de lerniloj (lernolibroj, vortaroj). BRO faciligu al ili elekti kaj prezenti tiujn vortojn, kiujn la lernanto plej multe bezonos kaj de kiuj li plej multe profitos. Tiun (pedagogian) aspekton de BRO BK ne komentas.
- 121** BRO estas publikigita en la „Parto Oficiala“ de Aktoj II, rekte post la teksto de OA 8. Ĝi tamen ne estas parto de tiu Oficiala Aldono. Nek ĝi mem esprimas tion, nek OA 8. Male en la antaŭparolo al Aktoj II la prezidanto G. Waringhien skribas je 1975-06-03:

„La broŝuro konsistas el du partoj: la unua entenas la oficialajn tekstojn, laŭstatute voĉdonitajn de la Akademio, la dua la neoficialajn, kiuj, kvankam siatempe komunikitaj al la Akademio kiel indaj je ties konsidero, ne estis submetitaj al formala voĉdono.

En la unua parto troviĝas, krom diversaj administraciaj informoj¹⁸⁹: 1° La Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro. 2° La Baza Radikaro Oficiala. Tiuj du dokumentoj celas precipe interharmoniigi kaj oportune klasigi nian oficialan vorttrezoron, tiel ke ĝi pli fidele respegulu la efektivan uzadon de la lingvo, kaj faru ĝian instruadon pli metoda kaj racia. 3° La Rekomendoj de la Akademio pri la ĝusta uzado de la reflektivaj pronomo kaj adjektivo kaj pri la senco de „po“. ...“

Temas do pri memstara verko celanta, „oportune klasigi nian oficialan vorttrezoron“, sed sendependa de OA 8.

- 122** La Antaŭparolo de Waringhien distingas inter oficialaj dokumentoj, „submetitaj al formala voĉdono“, kaj neoficialaj, „ne submetitaj al formala voĉdono“. En la lasta alineo ĝi tamen notas:

„Pro la ŝparado postulata de la nuntempaj cirkonstancoj kaj pro la amplekso de la dokumento mi ne donas la ciferojn de ĉiujn voĉdonoj nek la nomojn de la voĉdonintoj: mi nur diru, ke tiujn oficialajn tekstojn voĉdonis ĉiujfoje konsiderinda plimulto, ordinare supera al la du trionoj de la membroj.“

Ĝuste estas, ke BRO enhavas neniun oficialan informon pri la „laŭstatuta voĉdono“ kaj ties rezulto.

- 123** Antaŭ la vortlistoj de BRO en naŭ oftec-kategorioj estas metita „Enkonduko“, subskribita nur de „La Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, D-ro A. Albault“, do nek de la prezidanto, nek de iu alia membro de la tiama estraro de la Akademio.¹⁹⁰
- 124** La Enkonduko al BRO havas jenan strukturon:

I. Celoj kaj principoj [p. 28-30]

II. Starigo-Procedo de la Baza Radikaro Oficiala [p. 31-34]

685

¹⁸⁹ Temas pri informoj pri ŝanĝo de la Statuto, konsisto de la membraro kun adresoj k.t.p.

¹⁹⁰ Laŭ Aktoj II, p. 6 la estraro dum la raporta periodo 1968-1974 kaj en Majo 1975 konsistis el G. Waringhien (prezidanto), la vicprezidantoj P. Neergaard kaj A.D. Atanasov kaj la sekretario R. Bernard.

III. Modifado de la primitiva listo [p. 34-37]

IV. Aliaj laboroj faritaj de la Akademio okaze de la starigo de B.R.O. [p. 37-38]

La tri unuaj partoj koncernas la starigon de la oftec-listo. La kvara parto tekstas:

„IV. ALIAJ LABOROJ faritaj de la Akademio okaze de la starigo de B.R.O.

A. KATEGORIECO DE LA RADIKOJ

Oni scias, ke la Akademio paralele studis la vortfaradon kaj establis tekston de “Konstatoj” (“Aktoj de la Akademio” 1963-67). Tiuj konstatoj agnoskas, ke la Universala Vortaro kaj ties Oficialaj Aldonoj ne estis redaktitaj kun la celo fiksi la signifokategoriojn de la radikoj. Tiun kategorion nerekte fiksas la uzado ĉe Zamenhof kaj la bonaj aŭtoroj.

Tamen por la grandega plimulto de la radikoj tiu kategorio estas evidenta: arbo, elefanto, patro, tablo estas substantivaj; bela, granda, nobla, tenera estas adjektivaj; bati, fari, marŝi, ridi estas verbaj. En ili la finaĵo, vidpunkte de la signifo, estas senutila, pleonasma. Nur por kelkaj dekoj da radikoj eblas heziti; kaj por tiuj dubaj okazoj la alternativo plej ofte konsistas en tio, ĉu temas aŭ ne temas pri verbaj radikoj.

Por tion decidi, ni apogis nin sur la § 3, 2 de la Rekomendoj pri vortfarado (“Aktoj” p. 69¹⁹¹), kiu tekstas:

“2) kun radiko de verba kategorio la finaĵo -o havas la signifon de ago kaj konkreta manifestiĝo aŭ rezulto de tiu ago; ekz-e: la kuro, la danco, la konstruo. Kontraste, aĵ montras ion konkretan estigitan de la ago, dum ad havas la signifon de ago konsiderata en sia daŭro; ekz-e: la dancado, la konstruado, la konstruaĵo.”

Rezultas el tiu teksto, ke, se o-derivaĵo de radiko supozita verba neniam povas signifi agon, ĝi tutsimple ne estas verba radiko.

Ekzemple, floro, pako, urino neniam signifas agon, sed male ion tute konkretan; sekve la radikoj flor/, pak/, urin/ ja ne estas verbaj sed substantivaj. Plie de tiuj substantivaj radikoj tute logike kaj facile deriviĝas la verboj flori, paki, urini. Kaj tio plene respondas al la preskriboj de Zamenhof en siaj vortaroj rusa, germana kaj franca kaj ankaŭ al la uzado ĉe la bonaj aŭtoroj.

Ni notu tie ĉi, ke, por fiksi tiujn kategoriojn, la Akademio sin apogis, krom sur la oficialaj dokumentoj, ankaŭ sur la laboroj de Eugen WÜSTER, kiel ni jam diris en I.

B. OFICIALECO DE LA RADIKOJ

Estis de tre alta intereso konstati, ke nur en la tri lastaj grupoj de B.R.O. enestis radikoj neoficialaj, kiam la laboro estis entreprenita.

La Akademio opiniis, ke estus pli bone, se la koncernaj radikoj konsistigus parton de la 8-a Oficiala Aldono, kaj ĝi do entreprenis ankaŭ la prilaboron de tia oficialigo. Tio cetere per si mem ŝtopos grandegan breĉon inter la oficiala vortaro kaj la vortaro efektive uzata en la nuna lingvo.

En la Grupo 7 estis 4 neoficialaj radikoj: aŭtobuso, drato, filmo, oferti.

En la Grupo 8 estis ĉirkaŭ 40 kaj en la Grupo 9 ĉirkaŭ 140.

C. DISKUTO PRI KELKAJ VORTOJ

Okaze de la preparo de B.R.O. la Akademio estis frontita kun diversaj leksikologiaj problemetoj. La rezultoj de tiuj diskutoj jam parte aperis en la Aktoj kaj parte

aperas jen en aparta ĉapitro de la 8-a Oficiala Aldono, jen kiel piednotoj en B.R.O. mem, depende de la naturo aŭ graveco de la rimarkigoj.

La Direktoro de la Sekcio
pri la Ĝenerala Vortaro,
D-ro A. Albault.“

125 **Komentoj:** [Daŭrigota].

126 La „piednotoj en B.R.O.“, kiuj koncernas „diversajn leksikologiajn problemetojn“ estas jenaj:

vorto, elemento	BRO, pn.	teksto de la piednoto
ad	1, 2	ad estas dukategoria: -o kaj i. — RIM.: dukategoriajn radikojn ni nombras nur unu fojon.
almoz-	8, 1	Almozo = moneroj, panpeco ktp... ricevitaj pro petado el favorkoruloj; derivaĵo: almozi = almozpeti.
arm-	6, 1	Arm/ estas dukategoria: -o kaj -i. Zamenhof: “Ne servas larmo anstataŭ arm”. Sekve arm estas sinonimo de la pli kutima armilo (kiu cetere nur lame deriviĝas de armi).
-aŭ	1, 4	Laŭ Zamenhof -aŭ estas finaĵo “neŭtrala kaj difinita” (“Letero pri la deveno de E-o”). Malgraŭ diversaj provoj, tiu finaĵo neniam elfalas kaj aliflanke ĝi donas agrablan varion de la vortfinaĵoj.
buĝet-	9, 1	Buĝeto, proleto = modernaj formoj de budĝeto, proletario.
ĉef-	1, 1	Derivaĵoj: ĉefo: preskaŭsinonimo de estro; ĉefa: sinonimo de precipa.
daŭr-	4, 2	Nul: nombro 0, radiko uzata sen finaĵo en kalkuloj, nombrado... La derivaĵoj sekvas la ordinarajn regulojn, sed neniel la regulojn proprajn al la numeraloj: nulo (Fundamento): nomo de la cifero (= nenia kvanto); nula: neniakvanta, ne ekzistanta.
degel-	8, 7	Degeli = deiĝi el gela stato; konsiderebla kiel derivaĵo de gelo.
domaĝ-	7, 8	Domaĝi signifas timi bedaŭrindaĵon, timi malutili.
fabrik-	8, 2	Fabriko estas ejo; la angla “Akademia Korekto” (F-to, 9-a eld., p.253) estas erara.
fac-	9, 2	Facio: la derivaĵo faceto estas Fundamenta.
fald-	7, 1	Fald/ estas dukategoria: -o kaj -i.
fals-	6, 6	Fals/ estas dukategoria: -a kaj -i. Falsa ne identas al malvera.
farun-	7, 2	Faruno, neniel farino, troviĝas jam en la unua eldono de U.V. kaj Zamenhof mem ĉiam uzis nur ĝin. Sekve, entute nur du vortoj suferis pro preseraro: vipero de la unua eldono de U.V. fariĝis vipuro jam en la dua (Vd. 8-an Of.Ald. kaj: A. Albault. La Fundamenta serpento. “Scienca Revuo”, Vol. 18, n°3, p. 81-88); platino de la “Unua Libro” fariĝis plateno jam en la unua eldono de U.V., sed ja restis platino en la Zamenhofs traduko de la “Unua Libro” en la “Fundamenta Krestomatio” (Vd.: A. Albault. Unika konflikto inter niaj du Fundamentoj. “Scienca Revuo”, Vol. 23, n°6, p.189-196).
fiks-	5, 5	Fiks/: estas dukategoria: -a kaj -i.
firm-	6, 7	Ekzistas homonima radiko: firmo = komerca entrepreno.
fos-	6, 2	Fos/ estas dukategoria: -o kaj -i.
frost-	7, 3	Frostoj esence estas malvarma blankaĵo; derivaĵoj: frosta (vetero), frostas.
geografi-	9, 3	Geografio: en la 7-a Of.Ald. geograf/ estas preseraro por geografi/.

ignor-	9, 5	Ignori = intence, konscie ne doni atenton.
interes-	3, 1	Interes/ estas dukategoria: -o kaj -i.
kav-	7, 4	Kavo estas malplenaĵo.
kemio	8, 3	Kemio, mekaniko, mekanismo = modernaj formoj de: ĥemio, meĥaniko, meĥanismo.
komplik-	9, 6	Kompliki. Derivaĵo: komplika, preskaŭ sinonimo de "komplikanta", povas ankaŭ signifi: "rilata al kompliko"; ĝia uzado en signifo de komplikita (Zamenhofa vorto) estas nekonsilinda.
korekt-	9, 7	Korekti. Derivaĵo: korekta signifas "rilata al korektado" (aŭ ankaŭ: korektanta); oni ne misuzu ĝin en la signifo de ĝusta, laŭregula.
kovr-	4, 5	Zamenhof uzis la resuman formon kovro por signifi "kovraĵo, kovrilo, kovranta objekto ktp". Oni evitu tiun formon por montri agon.
kurb-	7, 5	Kurbo estas linio (nek rekta, nek konsistanta el rektaj partoj, laŭ P.I.V.)
kutim-	4, 3	La derivita verbo kutimi laŭregule signifas havi kutimon; la signifo akiri kutimon jam delonge arkaikiĝis.
lig-	4, 4	Lig/ estas dukategoria: -o kaj -i. Plie ligo havas metaforan signifon (ekz-e, en "Ligo de Nacioj").
litr-	7, 6	Kaj derivaĵoj: decilitro, centilitro, hektolitro ...; decimetro, centimetro, milimetro, dekametro, kilometro.
mekanik-	8, 3	Kemio, mekaniko, mekanismo = modernaj formoj de: ĥemio, meĥaniko, meĥanismo.
mekanism-	8, 3	Kemio, mekaniko, mekanismo = modernaj formoj de: ĥemio, meĥaniko, meĥanismo.
metr-	7, 6	Kaj derivaĵoj: decilitro, centilitro, hektolitro ...; decimetro, centimetro, milimetro, dekametro, kilometro.
min-	8, 4	Mino = a) kavaĵo, b) eksplodkesto (Vd. P.I.V.)
monat-	5, 4	Same kiel en la Fundamento ni donas la monatinomojn kun majuskloj, sed la tagnomojn kun minuskloj: ambaŭ serioj estas sur la limo inter propraj kaj komunaj nomoj, sekve oni havas liberon uzi majusklojn aŭ ne.
nul	4, 1	Nul: nombro 0, radiko uzata sen finaĵo en kalkuloj, nombrado... La derivaĵoj sekvas la ordinarajn regulojn, sed neniel la regulojn proprajn al la numeraloj: nulo (Fundamento): nomo de la cifero (= nenia kvanto); nula: neniakvanta, ne ekzistanta.
okup-	3, 2	Okupi: vd. Lingvaj Respondoj (1962, n° 110).
orient-	9, 8	Orienti estas iom libera derivaĵo de oriento (Grupo 6).
original-	8, 5	Originalo (laŭ Zamenhof kaj laŭ la Unua Of.Ald., konforma al lingvoj angla, franca, germana, rusa, pola) = a) Primitiva manuskripto aŭ verko, kontraste kun kopioj, tradukoj... ; b) Homo ne imitanta aliajn, stranga. - Derivaĵo: originala, ekz-oj: a) "tio estas nur kopio de la originala pentraĵo" b) "ŝi estis en ĉio originala infano, silenta kaj pensanta". RIM.: ne konfuzu originala kun origina.
pak-	5, 1	Laŭregula derivaĵo: paki = fari pakon, paketon aŭ pakaĵon.
perfekt-	8, 6	Perfekta: plie uziĝas aparta gramatika termino: perfekto.
pez-	5, 6	Laŭregula derivaĵo: pezi = esti peza, havi pezon (t.e. la abstraktan kvaliton de io peza).
pik-	6, 8	Ekzistas homonima radiko: piko = unu el la kvar emblemoj de ludkartoj.
plant-	6, 3	Plant/ estas dukategoria: -o kaj -i.

polur-	6, 4	Poluro estas surfaca brilo, ricevita per frotado.
prolet-	9, 1	Buĝeto, proleto = modernaj formoj de budĝeto, proletario.
prunt-	5, 2	Prunto, speco de neformala kontrakto (ktp., vd. P.I.V.); ĝi estas dudirekta kontrakto (por la donanto, por la prenanto) same kiel kredito kaj aliaj kontraktoj; de ĝi deriviĝas: prunte = per prunto (per tia kontrakto) kaj prunti = manifestiĝi per prunto, do la verbo restas same neŭtralsignifa kaj povas esti precizigita per esprimoj kiel deprunti, alprunti, aŭ pruntepreni/ pruntedoni. . . (vd. Fundamento, 9-a eld., p.334).
rul-	5, 3	Rulo/ruli: homonimaj radikoj. Rulo estas cilindroforma objekto. Kp.: firma/firmo kaj piki/piko.
sem-	6, 5	Semo estas parto de frukto aŭ floro. Derivaĵoj : sema = rilata al semo; semi = disĵeti semojn.
spez-	6, 9	Spezi signifas transigi monon de konto al alia.
strek-	7, 7	Streko estas linio lasita de skribilo aŭ alia pinta objekto per unu movo sur surfaco.
taks-	7, 9	Taksi = deklari valora ktp; takso = deklaro, opinio pri la valoro de io. Ekzistas la homonimo takso—ŝajne nerekomendinda—signifanta “depago . . .” (Vd. P.I.V.).
teĥnik-	9, 4	Teĥniko, tekniko egale apartenas al la 3-a Of.Ald.
teknik-	9, 4	Teĥniko, tekniko egale apartenas al la 3-a Of.Ald.
un'	1, 3	La eliziita formo un' estas tolerebla en nombrado kaj en ordonaj esprimoj el la tipo de: “un'! du! un'! du!” en ekzercoj dancaj, gimnastikaj, militistaj, ks.
vari-	8, 8	Varii. La derivaĵo vario povas signifi nur: ago varii, ago prezenti diversajn ŝanĝiĝojn. Sekve oni evitu ĝian uzon en signifo de: variaĵo, speco, varietato.

127 La klarigaj piednotoj havas diversajn karakterojn. Parte ili nur atentigas pri la Vortaro Oficiala (ekz. teĥnik- / teknik- → OA 3), speciale pri la samtempa OA 8 (ekz. fac-), aŭ referencas al la literaturo (farun-, okup-), parte ili donas novajn difinojn (ekz. kav- [UV], polur- [UV], spez- [UV]), parte ili reinterpretas Fundamentajn vortojn (facet- → fac'et-), parte ili faras asertojn pri la vortkunmetado (litro, metro kaj iliaj „derivaĵoj“) parte ili unuvide ŝajnas esti tolerdeklaroj (un' anstataŭ unu „tolerebla“ en certaj cirkonstancoj).

128 La plej prioritata celo de la F-to estas la unueco inter esperantistoj (A 1.1 kaj multloke). Por ĝin atingi havas servan funkcion i.a. la principoj de netuŝebleco, klareco kun la citaddevo kaj laŭjureco kun la malpermeso de arbitraj kaj surprizaj decidoj kaj la devo al motivigo (pri ĉiuj vd. la ĉap. pri la Antaŭparolo). La Akademio agadas kiel „aŭtoritata institucio“ (ACI) nur, se ĝi baziĝas sian rezonadon sur tiuj devigaj principoj (vd. la ĉap. pri la Akademio).

129 La piednotaj klarigoj en BRO lezas ĉiujn tiujn principojn en diversaj gradoj. Rezulte ili ne estas oficialaj, devigaj voldeklaroj de aŭtoritata institucio, sed privataj atendigoj de grupo de esperantistoj, aganta kiel privatuloj, tute egale ĉu ili aperas en la „Parto Oficiala“ aŭ ne (malĝusta nomado ne forigas mankon, oni devas eltrovi la „veran sencon“, vd. A 4.3). Detaloj:

un'	1, 3	„tolerebla en nombrado kaj en ordonaj esprimoj“ – formo nova en la senco de A 8; tolerdeklaro celas forigi la stigmon de „kontraŭfundamenteco“ prepare al posta oficialigo (vd. ĉe A 8). Formoj novaj estas la plej gravaj atencoj kontraŭ la unueco de Esperanto; ACI pro tio devas elmontri, ke ĝi konsideris tion kaj klare kaj nemiskompreneble elstarigi tion kiel ĝi faris samtempe ekz. pri prolet- (OA 8). La „gravecon“ de rimarkigo difinas la F-to; la Akademio ne povas anstataŭigi ties juĝon laŭ
-----	------	--

sia propria arbitra bontrovo.
[Daŭrigota].

E. Unuopaj Aspektoj de la Vortaro Oficiala

I. „Eraroj“ en la Vortaro Oficiala

- 1 Laŭdifine „eraroj“ ne ekzistas en la Fundamento pro la principo de netuŝebleco („La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj“, A 4.4, vd. la diskuton tie). [Daŭrigota].

II. „Kaŝitaj“ neoficialaj vortoj en la Vortaro Oficiala

- 2 Vortoj uzataj en difinoj de vortoj oficialigitaj, ne aŭtomate ankaŭ fariĝas oficialaj. Tiuj "kaŝitaj" vortoj jam tre frue ekzistis en VO. Ekz. OA 3.2 en 1921 oficialigis **Kariol'** i.a. per la difino „durada simpla norvega veturilo“. La vorto **norveg-** tamen estis oficialigita nur poste per OA 8 (1974). En OA 8 mem tiaj „kaŝitaj“ vortoj estas plej oftaj, ĉar la difinoj estis simple transprenitaj el PIV 1970¹⁹².
- 3 „Kaŝitaj“ vortoj per la apero en difinoj **ne** fariĝas oficialaj. La Akademio eksplicite decidas nur pri la kap-vortoj de la vortaraj artikoloj. Ĝi nome fiksas la formon (fasadon) de vorto kaj almenaŭ unu signifon. Ambaŭ kune per la oficialigo fariĝas „eterne ĝusta“ Esperanto. La Akademio povas libere decidi, kiel ĝi fiksas formon kaj signifon de vorto, ĝi nur devas obei la principon de klareco („por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, A 3.3). La fiksado de la signifo povas okazi ĉu per tradukoj al referenc-lingvoj, ĉu per difinoj, ĉu per simboloj aŭ formuloj el kemio, matematiko, muziko, mon-sistemoj aŭ aliaj fakoj, ĉu per ciferoj (OA 9, kp. R 4) per aliaj eksterfundamentaj referenc-sistemoj (ekz. ISO-normoj, scienc-latina nomenklaturado en biologio kaj zoologio k.t.p.).
- 4 Tio sekvas el jenaj konsideroj. Ne estas duboj, ke la tradukoj al la kvin referenc-lingvoj en la Fundamento ne ĝuas la statuson de neŝanĝebleco. Ĝin povas havi nur la esperantaj vortoj. Samo validas ankaŭ por la fremdlingvaj tradukoj de esperantaj vortoj en la diversaj OA. Analoge oni devas prijuĝi la difinojn en la OA. Same kiel la tradukoj al aliaj lingvoj ili estas nur ilo por komprenigi la fiksitajn lingvo-elementojn, nome la aldonotan vorton. Nur ĝi ekhavas la statuson de oficiala vorto. Tio sekvas ankaŭ el komparo kun OA 2, kiu konsistas grandparte nur el la oficialigontaj vortoj, plej ofte sen iu aldonita informo kiel tradukoj aŭ difino.
- 5 Inverse, la fakto, ke la Akademio difinas oficialigitajn vortojn per neakademia(j) vorto(j) ne ŝanĝas ties formalan statuson de oficiala vorto. La volo de la Akademio oficialigi iun vorton celas nur al tiu vorto mem, ĝia formo kaj almenaŭ unu deduktebla signifo. La Fundamento ne havas kaj la Akademio neniam kreis regulojn, laŭ kiuj formalaj metodoj oficialigo okazas. La Akademio estas rajtigita elekti la laŭ sia opinio plej oportunan metodon, ekz. nur radikoj sen pliaj indikoj (ekz. OA 2), radikoj kun nura indiko de la fakoj (OA 2), nur tradukoj (UV, OA 1), nur difinoj (OA 1, OA 9), difinoj kaj tradukoj (OA 5, OA 6, OA 8) difinoj kaj simboloj (OA 9). Pro tio - ekzemple - la vorto **lap/o** (OA 8) ja estas oficiala, kvankam en ĝia difino aperas eĉ tri vortoj nek Oficialaj nek Fundamentaj.
- 6 Kelkajn malmultajn radikojn OA 9 (2007) poste oficialigis, nome:
beton-o, jam trovebla en: central/o [OA 8], poste oficialigita per [OA 9].
boac-o, jam trovebla en: sled/o [OA 8], poste oficialigita per [OA 9].
genr-o, en: cep/o [OA 8], plastr/o [OA 8] (genra), viper/o [OA 8], poste [OA 9].
iks-o, en: ekrano [OA 8] (iks-radia), poste oficialigita per [OA 9].
rotaci-o, en: riveluo [OA 8], poste oficialigita per [OA 9].
ŝtorm-o, en: tempest/o. [OA 8], poste oficialigita per [OA 9].

685

¹⁹² Albault, Enkonduko al OA 8.

Krome OA 9 enkondukas tri pliajn novajn kaŝitajn elementojn, nome **Euklid-**, **Karol-** kaj **UEA** (vd. malsupre). Aldone ekzistas la vorto **Rom-** el OA 2 (ĉe togo, vd. supre).

7 Jen la kompleta listo de „kaŝitaj“, **ne** jam oficialigitaj vortoj en la Vortaro Oficiala:

A-Ĉ

arkti-o, en: **lap/o**. [OA 8] Specio de arktio kun alkroĉigemaj globaj kapituloj (Arctium lappa).

aerostat-o, en: **hangar/o**. [OA 8] Granda ŝirmejo esence formita el metalĉarpenta tegmento subtenata de metalaj fosto kaj uzata por enteni fojnon, kulturmaŝinojn, aviadilojn, aerostatojn, k.s.

agr-o.

• **agr-a**, en: **traktor/o**. [OA 8] Potenca motorveturilo uzata por tiri agrajn maŝinojn aŭ ŝarĝveturilojn.

akustik-o, en: **GRAMOFONO** [OA 6.2] (Akustiko) Aparato kiu, per disko, reproduktas sonojn.

arbed-o, en: **heĝ/o**. [OA 8] Barilo el interplektitaj arbedoj.

Budh-o.

budh-ism-o, en: **lotus/o**. [OA 8] 1/ [...]; 4/ la hinda ~o, nimfeaco, sankta signo de la budhismo (Nelumbium speciosum).

D-E

deputit-o, en: **interpelaci/i**. [OA 8] (Se paroli pri deputito en parlamento) publike demandi al ministro por ricevi klarigojn pri agoj de la registaro.

dipter-a, en: **moskit/o**. [OA 8] Komuna nomo por pikantaj dipteraj insektoj, precipe el la familio de kuledoj.

edr-o.

• **plur-edr-o**, en: **vertic/o**. [OA 8] Sekcopunkto de la du lateroj de angulo, ankaŭ se la angulo apartenas al plurlatero aŭ al pluredro.

ekvinoks-o.

• **ekvinoks-a**, en: **longitud/o**. [OA 8] La angula distanco, mezurata laŭ la ekvatoro, inter la meridiano de loko kaj la origina meridiano, nome la Grenviĉa meridiano por la teraj ~oj, kaj la meridiano de la printempa ekvinoksa punkto por la ĉielaj ~oj.

elektron-o, en: **elektronik/o**. [OA 8] Scienco pri la fenomenoj estigataj de liberaj elektronoj kaj tekniko uzanta tiajn fenomenojn.

entjer-o, en: **multiplik/i**. [OA 8] Fari ~on, t.e. el du nombroj A kaj B, nomataj ~ato kaj ~anto, ricevi trian P nomatan produkto; la produkto P de la du entjeroj A kaj B estas la adicio de B nombroj, ĉiuj egalaj al A.

Eŭklid-o.

• **Eŭklid-a**, en: **algoritm/o** [OA 9] [...] Eŭklida algoritmo, [...].

F-Ĝ

fluoresk-a, en: **ekran/o**. [OA 8] Surfaco, kiu haltigas diversajn radiojn aŭ substancojn, ĉu por ŝirmi kontraŭ ilia efiko (kamena ~o; iks-radia ~o el plumbo), ĉu por videbligi ilin (kineja ~o, fluoreska ~o).

glucid-o, en: **glukoz/o**. [OA 8] Tipa glucido, kun dolĉa gusto, trovebla en kelkaj fruktoj (ekz. vinbero); C₆H₁₂O₆; plej ofta en la sukeroj, ĝi estas komponanto de tre multaj hidrolizeblaj glucidoj.

Grenviĉ-o.

• **Grenviĉ-a**, en: **longitud/o**. [OA 8] La angula distanco, mezurata laŭ la ekvatoro,

inter la meridiano de loko kaj la origina meridiano, nome la Grenviĉa meridiano por la teraj ~oj, kaj la meridiano de la printempa ekvinoksa punkto por la ĉielaj ~oj.

H-Ĵ

hemisfer-o, en: **Aŭstrali/o**. La kontinento de la suda hemisfero okcidente de Pacifiko.

• **nordhemisfera**, en: **Azi/o**. [OA 8] La nordhemisfera kontinento, kiu okcidente limas Eŭropon kaj Afrikon.

hidroliz-i, en: **glukoz/o**. [OA 8] Tipa glucido, kun dolĉa gusto, trovebla en kelkaj fruktoj (ekz. vinbero); C₆H₁₂O₆; plej ofta en la sukeroj, ĝi estas komponanto de tre multaj hidrolizeblaj glucidoj.

K

kapacit-o, en: **tonel/o**. [OA 8] Unuo de volumeno, uzata por mezuri la internan kapaciton de ŝipo: la internacia ~o valoras 2,83m³.

kapitul-o, en: **lap/o**. [OA 8] Specio de arktio kun alkroĉiĝemaj globaj kapituloj (*Arctium lappa*).

Karol-o, en: **minusk/o** [OA 9] minuskla skribo Karolida [t.e. t.n. uncialo, skribo uzita inter la 4a kaj 8a jc. (malgranda skribo nur per majuskloj)]

kinematografi-o, en: **kin/o**. [OA 8] Kinematografio, filmarto.

klorofil-o, en: **vegetal/o**. [OA 8] Ĉiu membro de unu el la du regnoj de vivuloj, karakterizita per ĉelparietoj el celulozo, havanta la funkciojn de sinnutrado kaj reprodukto, kaj plej ofte posedanta klorofilon.

konvoj-o, en: **trajn/o**. [OA 8] 1. [...]. 3/ Veturilaro, kiu transportas ĉion, kion la trupoj bezonas por vivi kaj batali (= proviza veturilaro, militista konvojo, loĝistika servo).

kuled-oj aŭ **kul-ed-oj**, en: **moskit/o**. [OA 8] Komuna nomo por pikantaj dipteroj insektoj, precipe el la familio de kuledoj.

L

legumenac-oj, en: **lotus/o**. [OA 8] Nomo de pluraj vegetaloj, nome: 1/ la greka ~o, legumenaco uzata kiel furaĝo; [...].

loĝistik-o.

• **loĝistika**, en: **trajn/o**. [OA 8] 1. [...]. 3/ Veturilaro, kiu transportas ĉion, kion la trupoj bezonas por vivi kaj batali (= proviza veturilaro, militista konvojo, loĝistika servo).

Lotofag-oj, en: **lotus/o**. [OA 8] Nomo de pluraj vegetaloj, nome: 1/ [...]; 2/ la nordafrika ~o, arbo el kies nigra kaj malmola ligno oni fabrikis flutojn kaj kies fruktojn manĝis la Lotofagoj, specio el zizifoj (*Zizyphus lotus*); 3/ [...].

M-N

makromolekul-a aŭ **makro-molekul-a**, en: **plast/o**. [OA 8] Genra nomo de makromolekulaj sintezaj materioj, transformeblaj per diversaj procedoj ordinare uzantaj varmon kaj premon.

mini-o, en: **farb/o**. [OA 8] Materio, ordinare likva, uzata por ŝmiri surfacon en la intenco ĝin ŝirmi aŭ ĝin kolorigi: ~o el minio; blanke~ita kradaĵo.

Nil-o.

• **Nil-a**, en: **lotus/o**. [OA 8] Nomo de pluraj vegetaloj, nome: 1/ [...]; 3/ la egipta ~o, nimfeo ankaŭ nomata Nila lilio (*Nymphæa lotus*, *N.caerulea*); 4/ [...].

nimfe-o, en: **lotus/o**. [OA 8] Nomo de pluraj vegetaloj, nome: 1/ [...]; 3/ la egipta ~o, nimfeo ankaŭ nomata Nila lilio (*Nymphæa lotus*, *N.caerulea*); 4/ [...].

nimfeac-o aŭ **nimfe-ac-o**, en: **lotus/o**. [OA 8] 1/ [...]; 4/ la hinda ~o, nimfeaco, sankta signo de la budhismo (*Nelumbium speciosum*).

nitrogen-o, en: **nilon/o**. [OA 8] Nitrogenhava sinteza kombinaĵo, analoga al la plastoĵ, el kiu oni faras i.a. specon de artefarita silko.

O-P

Oceani-o, eble ankaŭ **Ocean-i-o**, en: Pacifik/o. [OA 8] La Oceano inter Ameriko, Azio kaj Oceanio.

ortant-o, en: **reflekt/i**. [OA 8] (pp surfaco de korpo) Fari, ke trafanta lumradio, sonondo k.a. ne penetru en iun surfacon, sed ŝanĝu sian direkton al direkto simetria rilate al la ortanto ĉe la trafpunkto.

pariet-o, en: **luk/o**. [OA 8]. [...] 2/ en ŝipo: a) sur la ferdeko: ferdeko~o (Kp. ferdekpordo); b) ĉe la ŝeloparieto: ŝipo~o (tre ofte ronda); [...]. Ankaŭ en: **vegetal/o**. [OA 8] Ĉiu membro de unu el la du regnoj de vivuloj, karakterizita per ĉelparietoj el celulozo, havanta la funkciojn de sinnutrado kaj reprodukto, kaj plej ofte posedanta klorofilon.

produkt-o, en: **multiplik/i**. [OA 8] Fari ~on, t.e. el du nombroj A kaj B, nomataj ~ato kaj ~anto, ricevi trian P nomatan produkto; la produkto P de la du entjeroj A kaj B estas la adicio de B nombroj, ĉiuj egalaj al A.

proviand-o, en: **distribu/i**. [OA 8] Disdoni al ĉiu laŭ ĝia destino: ~i leterojn, laboron, provianton.

psik-o, en: **nervoz/a**. [OA 8] Havanta facile eksciteblan maltrankviliĝeman psikon.

R-Ŝ

refren-o, en: **kanzon/o**. [OA 8] Versaĵo, plej ofte gaja, sprita aŭ moka, konsistanta el egalaj strofoj finiĝantaj per refreno kaj destinita esti kantata.

Rom'. en: **tog-o** (*romana vesto*) [OA 2.1].

selekt-i, en: **bred/i**. [OA 8] 1. [...]. 2. Pli bonigi kulturformojn de plantoj kaj bestoj produktante novajn per krucado aŭ selekto.

speci-o, en: **cep/o**. [OA 8] Legomo, specio el la genro ajlo, kulturata por sia bulbo (*Allium cepa*). **lap/o**. [OA 8] Specio de arktio kun alkroĉiĝemaj globaj kapituloj (*Arctium lappa*). **lotus/o**. [OA 8] Nomo de pluraj vegetaloj, nome: 1/ [...]; 2/ la nordafrika ~o, arbo el kies nigra kaj malmola ligno oni fabrikis flutojn kaj kies fruktojn manĝis la Lotofagoj, specio el zizifoj (*Zizyphus lotus*); 3/ [...].

svis-o

• **svis-a**, en: [OA 8] II.A.RIM.II. **federacio** (svisa federacio).

T-Z

televizi-o, en: **televiĉi/i**. [OA 8] Vidi per televizio.

UEA, en: **kod/o** [OA 9] 1 [...]. 2 Kodaĵo: poŝta kodo; UEA-kodo; [...].

valv-o, en: **fac/o**. [OA 8] Ordinare, ebena parto de surfaco de objekto, limita de pli-malpli difinita figuro; ~o de glitvalvo, de martelo, de amboso, de ostoj.

zizif-o, en: **lotus/o**. [OA 8] Nomo de pluraj vegetaloj, nome: 1/ [...]; 2/ la nordafrika ~o, arbo el kies nigra kaj malmola ligno oni fabrikis flutojn kaj kies fruktojn manĝis la Lotofagoj, specio el zizifoj (*Zizyphus lotus*); 3/ [...].

8 Aldoniĝas jena listo de neportaj simboloj kaj sigloj uzataj en OA 9

Alfabetoj fremdaj

Δ, δ ĉe delt/o (greka alfabeto)

Q, q ĉe ku/o (latina alfabeto)

X, x ĉe iks/o (latina alfabeto)

Y, y ĉe ipsilon/o, katapult/o (latina alfabeto)

Ciferoj

40,08 ĉe kalci/o (atommaso)

1,33 ĉe kurz/o

28,09 ĉe silici/o (atommaso)

ISO-kodaĵo (ŝtatoj)

GB ĉe brit/o

CN ĉe ĉin/o

IL ĉe Israel/o

JP ĉe japan/o

US ĉe Uson/o

Kemiaj simboloj

Ca ĉe kalci/o

Si ĉe silici/o

Kemiaj formuloj

$C_6H_3(OH)_2-CH(OH)-CH_2-NH-CH_3$ ĉe adrenalin/o [OA 9]

$CH_3-CO-O-C_6H_4-COOH$ ĉe aspirin/o

Muzikaj simboloj

♭ ĉe bemol/o

♯ ĉe dies/o

Scienc-latina nomenklaturado de botaniko kaj zoologio

Amoeba, Entamoeba ĉe ameb/o

Bison bison, Bison bonasus ĉe bizon/o

Persea americana ĉe avokad/o

Rangifer tarandus ĉe boac/o

k.m.a.

- 9 Simile venonta OA povus ekzemple ankaŭ uzi la internaciajn simbolojn de monunuoj, al kiuj OA 9 ne referencas. Mankas:

€ ĉe eŭr/o [OA 9]

\$ ĉe dolar' [OA 1], kurz/o [OA 9]

£ (aŭ £) ĉe pund/o [OA 9]

k.t.p.

Por diskuto vd. R 15.

Kvina Libro

Zamenhofa Stilo
Misinterpretoj de la Fundamento

(Z)

A. Zamenhofa lingvaĵo

Literaturo (selekto): **Itô** Kanzi (ps. Ludovikito). **PVZ** (la filologie plej kompleta kaj fidinda eldono de la plena verkaro de Zamenhof). **Wüster**, Eugen; **Kirschke**, Paul. Zamenhof-radikaro kun derivaĵoj kaj fontindikoj. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn, **1927**. 84, [4] p. Enhavas jam la rezultojn de pli fruaj konkordancoj, pri kiuj vd. la Berlinan Komentitan Bibliografion de Vortaroj en Esperanto (BKB 2015). — **Waringien**, Gaston. Leteroj de Zamenhof. 2 vol. Paris 1948. **Nomura** Rihej. Zamenhofa Ekzemplaro – La uzado de vortoj kaj esprimoj el la verkoj de D-ro L. L. Zamenhof. Nagoya: Nagoja Esperanto-Centro **1989**. xxi, 512 p. (Konkordanco kun indiko de trovlokoj en la verkaro de Z.).

1. Superrigardo

- 1 Laŭ A 3.6 „la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero - povas rigardadi [la lingvo-uzon de Zamenhof] kiel modela“. La sama ideo ankaŭ troviĝas en BD 4.6: „...pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.“ La vort-rilataj aspektoj de la Zamenhofa „stilo“ estas klarigitaj per Wüster 1927 kaj Nomura 1989.
- 2 En tiu ĉi ĉapitro ni donas kelkajn bazajn informojn pri kelkaj verkoj, ofte referencitaj kiel lingvaj modeloj de Zamenhofa stilo. Liajn vortarojn kaj Lingvajn Respondojn (LR) ni traktas en la ĉapitro „La Fundamento – Enkonduko“ – „Eksterfundamentaj interpret-helpoj“ en la Unua Libro.

2. Diversaj Gradoj de Zamenhofeco

Literaturo (selekto): **Wüster**, Eugen. Zamenhofa radikaro. Leipzig 1929. **Waringien**, G[aston] (1933). Kritika 'aparato' de la Zamenhofa Hamleto. En: Lingva Kritiko 1933:1:21 (dec.), p. [2-3] (Komparo de la 1a eld. Nurnbergo: W. Tümmel 1894 kaj de la 2a Parizo: Hachette 1902, senŝanĝe repr. 5a Parizo: Hachette 1909. Beaufront rajtis "laŭplaĉe korekti ĉian verkon de la 'Aprobita Kolekto' " kaj faris tion ankaŭ pri Hamleto en la Hachette-eldonoj).

a) Superrigardo

- 3 Laŭ BD 4.6 kun A 3.6 la verkoj de Z estas „nur verkoj privataj“ (do ne devigaj), kiujn la esperantistoj tamen – „se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero“ - povas rigardadi kiel modelaj. Unue do necesas konstati, ĉu verko estas Zamenhofa aŭ ne.
- 4 Ekzistas **diversaj gradoj de Zamenhofeco**: Verkoj rekte verkitaj de li (ekz. la vortaroj RE 1889 kaj ER 1910, UL, DL k.m.a.), aliaj nur redaktitaj aŭ aprobitaj de li (ekz. artikoloj en *La Esperantisto* aŭ FK 1903), antaŭ- kaj postfundamentaj, tekstoj prozaj kaj poeziaj, verkoj rekte celantaj lingvan respondon (ekz. LR) aŭ enhavantaj lingvan modelon nur rande (la tradukoj, la paroladoj).
- 5 Libro kaj paroladoj dekomence estis adresita al publiko, leteroj aŭ poŝtkartoj ofte nur al privataj ricevontoj. Oni rajtas supozii, ke ne ĉiuj tekstoj estas verkitaj per la sama (lingva) zorgo. Ĉe privataj leteroj – ekzemple – mankas posta reviziado kaj kontrollegado. La tekstspeco pro tio povas influi la lingvo-interpretan valoron de Zamenhofa teksto.

b) Fundamenta Krestomatio (FK 1903)

Literaturo (selekto): Kritika eldono: Waringhien, Gaston (Ed.) (1992). Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto. Rotterdam : Universala Esperanto-Asocio., 18 eld. 1992. 446 p.¹⁹³ – 17a eld. Rickmansworth 1954, senŝanĝa foto-repr. 1969.

Enkonduko: Haupenthal, Reinhard (1967). Enkonduko en la Fundamentan Krestomation. En: Okcident-Germana Revuo 1967:4, p. 31 [I.]; 5, p. 40 [II.]; 6, p. 48 [III.] – I. La diversaj eldonoj. II. La kontribuintoj. La fontoj. III La fontoj.

- 6 FK estas antaŭfundamenta kolektiva verko, aperinta en Aprilo 1903, kun prozaj kaj poeziaj tekstoj originalaj kaj tradukitaj inter 1887 kaj 1903. En LR 145 A (1906) Z respondis demandon je la propra aŭtoreco jene.

LR 145 A (1906) [La Zamenhofaj artikoloj en la FK]: „Ekzercoj. – La novaj vestoj de la reĝo. – La virineto de maro. – Anekdotoj (pliparte de mi). – La hejmo de la metiisto. – La karaj braceletoj. – Bagateloj (pliparte de mi). – Fingra kalendaro. – El la poŝto. – La loĝejoj de la termitoj. – Kronika katara konjunktivito. – El la unua libro de la lingvo Esperanto. – Plena gramatiko de Esperanto. – Al la historio de la provoj de lingvoj tutmondaj de Leibnitz ĝis la nuna tempo. – Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia.“ [Pk. al Pierre Corret, Decembro 1906. OV, p. 537]

- 7 **Komentoj:** La respondo estas nekompleta kaj koncernas nur la prozajn tekstojn. Paĝoj 298-313 krome enhavas 17 poemojn originalajn kaj tradukitajn. La paĝoj-indikoj referencas al la 17a eld. 1954 / 1969. [kompletigota]:

teksto	paĝoj	komentoj
I. Ekzercoj		
Ekcercoj	1-16	Vd. nun FE
II. Fabeloj kaj legendoj		
La novaj vestoj de la reĝo	17-22	Fabelo trad. el Andersen
La virineto de maro	33-57	Fabelo trad. el Andersen
III. Anekdotoj		
Anekdotoj	58-85	
IV. Rakontoj		
La hejmo de la metiisto	100-108	Trad.
La karaj braceletoj	133-136	Rakonto
V. El la vivo kaj sciencoj		
Bagateloj	169-190	Trad. de mallongaj sciigoj en gazetoj ¹⁹⁴
Fingra kalendaro	197-202	Trad.
El la poŝto	202-210	Trad.
La loĝejoj de la termitoj	210-215	Trad. de faka artikolo (zoologio)
Kronika katara konjunktivito	217-222	Trad. de ĉ. 1903 el germana lernolibro de oftalmologio (medicino),
VI. Artikoloj pri Esperanto		
El la unua libro de la lingvo Esperanto	228-239	Trad. de UL 1887 (originale en la kvin referenc-lingvoj), ĉ. 1903
Plena gramatiko de Esperanto	239-241	Same

685

¹⁹³ Vd. Haupenthal, Reinhard (1993). Unu el la lastaj servoj de Waringhien. En: Iltis-Forumo 1993:5:2, p. 53-55 (recenzo pri la nova 18a eld. de la FK 1992).

¹⁹⁴ La lasta „bagatelo“, titolita „Internacia universitato de memlernuloj“ (p. 190-197), estas subskribita de „Jan Janowski“.

Al la historio de la provoj de lingvoj tutmondaj de Leibnitz ĝis la nuna tempo	241-252	Eseo verkita originale en Esperanto
Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia	253-297	Same, publike legita en 1900

VII. Poezio

La Espero, La Vojo k.t.p.	298-313	17 poemoj originalaj kaj tradukitaj el div. jaroj
El Hamleto	383-421	Trad. el Ŝekspiro, originalo de 1894

VIII. Aldono

Preĝo sub la verda standardo	439-440	Poemo originala
------------------------------	---------	-----------------

- 8 Pri la lingvaĵo en la FK Z atentigas en la Antaŭparolo al la Kvian Eldono (Junio 1907), ke „dum la trarigardado mi trovis diversajn esprimojn, kiuj siatempe [do antaŭ Aprilo 1903] ŝajnis al mi bonaj, sed kiuj nun al mi ne plaĉas kaj kiujn mi volonte ŝanĝus“. Li tion tamen ne faris ĉar „severa konstanteco estas multe pli grava, ol plena perfekteco“ (vd. la kompletan tekston en la ĉap. „Prauloj de la Antaŭparolo“; samtempe LR 146 A). Krome li atentigas pri malunueca uzo de formoj kiel „Kanaduĵo“ kaj „Kanado“ k.t.p.

- 9 [Daŭrigota]

c) Fabeloj de Andersen

- 10 Aparte malfacile konstatebla estas la grado de Zamenhofeco ĉe la kvar volumoj de la tradukoj de l' Fabeloj de Andersen, kiuj aperis nur postmorte (1917), nome en 1923 (Fab. I), 1926 (Fab. II) kaj 1932 (Fab. III) kaj [?] (Fab. IV).

Jen listo de la 104 fabeloj. Nur malmultaj aperis jam antaŭ la morto de Z. La simbolo „(=)“ signifas „laŭvorte identa en la kolekto kun la versio pli frue publikiginta“ (vd. ekz. n-ron 42).

Titolo	Fabeloj (n-ro)	Pli fruaj trovlokoj	font-indikoj
1. Abio	II, 9		
2. Abocolibro	IV, 2		
3. Anĝelo	II, 6		
4. Anneto	IV, 10		
5. Avineto	II, 14		
6. "Bela"	IV, 15		
7. Bildo el kastelremparo	II, 21		
8. Birdo Fenikso	III, 4		
9. Bona humoro	III, 14		
10 Ĉe la plej ekstrema maro	III, 24		
11 Cigna nesto	III, 13		
12 Cikonioj	I, 16		
13 "Ĉio sur sian ĝustan lokon!"	III, 16		
14 Dano <i>Holger</i>	II, 19		
15 Dekdu per la poŝto	IV, 20		
16 Dio de dormo	II, 2		
17 Dorna vojo de la honoro	III, 28		
18 Du fratoj	IV, 18		
19 Du pavimbatiloj	III, 23		
20 Ekzistas diferenco	III, 7		
21 El fenestro en <i>Vartou</i>	II, 22		

22 Elfo de la rozo	II, 3		
23 Elinjo-fingreto	I, 5		
24 En la lasta tago	III, 11		
25 Estas tute certe	III, 12		
26 Fajrilo	I, 1		
27 Feliĉa familio	II, 29		
28 Filino de la marĉa reĝo	IV, 3		
29 Flikilo	II, 12		
30 Floroj de la malgranda Ida	I, 4		
31 Fluganta kofro	I, 15		
32 Folio el la ĉielo	III, 20		
33 Galoŝoj de feliĉo	I, 10		
34 Ĝardeno de la paradizo	I, 14		
35 Guto da akvo	II, 28		
36 Historio	III, 5		
37 Historio de la jaro	III, 10		
38 Historio de unu patrino	III, 1		
39 Historio el la dunoj	IV, 16		
40 <i>lb</i> kaj malgranda kristino	III, 26		
41 Infana babilado	IV, 11		
42 Infano en la tombo ∞ La	IV, 13 (=)	Revuo	1907, 401
43 lo	III, 34		
44 Johanĉjo-malsaĝulo	III, 27		
45 Juda knabino	III, 29		
46 Kion la patro faras, estas ĉiam	IV, 22		
ĝusta			
47 Knabineto kun alumetoj	II, 20		
48 Knabino, kiu paŝis sur panon	IV, 8		
49 Koboldo ĉe la butikisto	III, 17		
50 Kolo de botelo	III, 30		
51 Kolumo	III, 2		
52 Konkurso de saltado	II, 17		
53 Kora sufero	III, 15		
54 Korta koko kaj ventkoko	IV, 14		
55 Kupra porko	I, 17		
56 Kuristoj	IV, 4		
57 La vento rakontas pri	IV, 7		
Valdemaro <i>Doe</i> kaj pri liaj			
filinoj			
58 Lasta perlo	III, 22		
59 Lasta sonĝo de maljuna	IV, 1		
kverko			
60 Lekanto	I, 11		
61 Ligo de amikeco	I, 18		
62 Lino	III, 3		
63 Malbela anasido	II, 8		
64 Malbona princo	IV, 6		
65 Malbonkondata knabo	I, 6		
66 Malgranda Niko kaj granda	I, 2		
Niko			
67 Malgranda <i>Tuk</i>	II, 25		
68 Malnova domo	II, 27		
69 Malnova preĝeja sonorilo	IV, 19		
70 Malnova strata lanterno	II, 23		
71 Malnova tomba ŝtono	III, 8		

72 Monteto de elfoj	II, 15		
73 Muta libro	III, 6		
74 Najbaraj familioj	II, 24		
75 Najtingalo ∞ La	II, 7 (=)	Revuo	1907, 353
76 Neĝa reĝino	II, 10		
77 Neĝulo	IV, 23		
78 Nokta ĉapo de fraŭlo	III, 33		
79 Novaj vestoj de la reĝo ∞ La	I, 9	E-isto	1892, 9-12
	(=)	FK	1903, 17-22
80 Ombro ∞ La	II, 26 (rev.)	DL	1889, § 17
81 Paŝtistino kaj kamentubisto	II, 18		
82 Paŝtisto de porkoj	II, 4		
83 Peco da perlovico	IV, 12		
84 Persista stana soldato	I, 12		
85 Plej bela rozo de la mondo	III, 9		
86 Poligono	II, 5		
87 Post jarmiloj	III, 18		
88 Pupludisto	IV, 17		
89 Reĝidino sur pizo	I, 3		
90 Rozo de la tombo de Homero	II, 1		
91 Ruĝaj ŝuoj	II, 16		
92 Sambuka virineto	II, 11		
93 Ŝi estis tute sentaŭga	III, 21		
94 Sonorila profundo	IV, 5		
95 Sonorilo	II, 13		
96 Sovaĝaj cigoj	I, 13		
97 Ŝparmonujo	III, 25		
98 Sterkskarabo	IV, 21		
99 Ŝtono de la saĝuloj	III, 31		
10 Sub la saliko	III, 19		
10 Supo el kolbasaj bastonetoj	III, 32		
10 Turgardisto <i>O/e</i>	IV, 9		
10 Virineto de maro ∞ La	I, 8	E-isto	1889, 20-23, 1890, 38-39, 45-48, 50- 51, 58-59; Paris: Hachette 1907
		FK	1903, 33-57
10 Vojkamarado	I, 7		

B. Kelkaj misinterpretoj kaj devioj de la Fundamento

I. Superrigardo

Literaturo (selekto): **Blanke**, Detlev. Internationale Plansprachen. Berlin [Ost] 1985.

- 1 La ĉefa celo de la Fundamento estas gardi la lingvan unuecon kaj la unuecon inter la lingvanoj. Kvankam ĝi tiun celon en historia perspektivo de 120 jaroj akcepteble atingis, ĉiam ankaŭ ekestis reformprojektoj, **devioj** kaj „skoloj“. La plej sukcesa kaj plej konata estas la dissplitiĝo *Ido* (1907), kiu evoluis al memstara planlingvo. Aliaj nuntempe estas nur plu historiaj kuriozaĵoj, ekzemple *Esperantido* (1917), kiu atingis nenian socian bazon. Malpli ambiciaj estis proponoj reformi nur iujn malmultajn aspektojn de Fundamenta Esperanto. Aparte oftaj estis proponoj celantaj ŝanĝon de la alfabeto (literaro). Praktike tio kutime signifis anstataŭigon de la ses diakritaj literoj per iuj aliaj (ekz. O.E.O. 1978, vd. tuj poste). Seriozan ŝancon sukcesi en la socia realo neniu el tiuj proponoj havis kaj probable ankaŭ estonte ne havos. Tro evidente ili portas signon sur la frunto, ke „tio ne plu estas Esperanto“.
- 2 Pli „danĝeraj“ por la lingva unueco estas **skoloj**, kiuj propagandas iujn lingvajn ecojn, asertante agi ene de la limoj difinitaj de la Fundamento kaj konforme kun ĝi, dum ili fakte redifinas aŭ ignoras ĝin. Komuna trajto de tiaj skoloj estas, ke por la ĝenerala publiko ne estas *tuj kaj senprobleme* videble, ke temas pri ekster- aŭ kontraŭfundamentaj devioj. En 2015 diskutojn kaŭzas nur plu la t.n. „bonlingvismo“ (vd. tuj malsupre), malofte ankoraŭ sia antagonisto, „iltismo“ aŭ „piĉismo“. Ĉiuj aliaj „skoloj“ perdis siajn protagonistojn kaj kun ili sian eĥon inter la esperantistoj (ekz. la t.n. „Analiza Skolo“). La sekvaj subĉapitroj traktas la plej konatajn skolojn el la perspektivo de la Fundamento.

II. Optimala Esperanto-Ortografio (O.E.O., 1978)

Literaturo (selekto): **Lienhardt**, Albert. Optimala Ortografio de la internacia lingvo Esperanto. Mulhouse 1978.

- 3 Temas pri unu el multaj proponoj, (ĉefe) anstataŭigi la esperantajn diakritajn literojn per sendiakritaj. Iun socian sukceson ĝi ne atingis. Eĉ ne unu verko, verkita laŭ la reform-sistemo OEO, estas konata.

III. Analiza Skolo (1973, 1985)

Literaturo (selekto): **Mimó** Espinalt, Luis. Kompleta lernolibro de regula Esperanto. Analiza Skolo. Sabadell: La aŭtoro 1973, 191 p. - **Schulz**, Richard. Pledo por unueca lingvo. Paderborn: Esperanto-Centro 1985, 287 p. – **Ŝulco**, Rikardo. Sur la vojoj de la Analiza Skolo. Esperantologia esearo. Paderborn: Esperanto-Centro: 1987, 279 p. - **Mimó** Espinalt, Luis: Kompleta lernolibro de regula Esperanto. Analiza Skolo. Komplementa volumo [verkita de Rikardo Ŝulco kaj Hermano Bermano]. Paderborn: Esperanto-Centro 1989, 163 p.

- 4 La **Analiza Skolo** estis grupo de Esperanto-gramatikistoj ĉirkaŭ la kataluna gramatikisto Luis Mimó Espinalt (esperantigita Ludoviko Mimoo, 1913-1986) kaj poste la germana gimnazia instruisto de la franca lingvo Richard Schulze (esperantigita Rikardo Ŝulco, 1906-1997), kiu disvolvis novan interpreton de la Fundamento. La bazon de la Analiza Skolo kreis Mimoo en la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj per diversaj lernolibroj kaj gramatikoj de Esperanto. Liaj instruoj tamen nur iom vaste disvastiĝis en la 1980-aj jaroj per la libroj kaj artikoloj de Ŝulco. Ties publikigaĵojn eldonis la iama Esperanto-Centro en Paderborn gvidata de

Hermann Behrmann (esperantigita Hermano Bermanno), tiel ke ĝi atingis la ĝeneralan Esperantan publikon.

- 5 Dum tiuj jardekoj la gvida interpreto de la Fundamento estis la klasika „filologia“ interpreto de Waringhien kaj Kalocsay, kiel ĝi estas trovebla en ties t.n. „Plena Gramatiko“ (PG, 1-a eld. 1935, 2-a 1938, 3-a 1958), kiu de la 4-a eld. 1980 nomiĝas "Plena Analiza Gramatiko" (PAG; 5-a 1985). Kritikante la klarigojn de PG/PAG pri diversaj gramatikaj demandoj de Esperanto, Mimoo kaj Ŝulco denove fokusiĝis al la Fundamento kaj evoluigis propran interpreton. Centra elir-punkto estis la diskuto pri la funkcio de la pasivaj participoj, la tiel nomita „ata/ita-demando“, arde disputita en la 1950-aj kaj 1960-aj jaroj.
- 6 La **celoj** de la Analiza Skolo en la iom patosa lingvaĵo de Ŝulco estas, „ke la Lingvo Internacia nun pli konata sub Esperanto nepre estu stabila, firma, nevaria sur sia Fundamento, perfekta en sia simpleco, por ke ĝi ne disdialektiĝu nek degeneru sub influo de modlemaj tendencoj aŭ de tradiciaj aŭ alilingvaj miskutimoj“ („Pledo por unueca lingvo“). Ĝi per tio kritikis la laŭaserte „tro naturalisman“ interpreton de PG/PAG kaj akcentas la karakteron de Esperanto kiel planita lingvo: „En la Lingvo Internacia, lingvo origine arta, fundamentita sur pura racio, ne estas tiom sekvenda la uzo, kiom la logika analizo, kiu ĉiukaze donas ĝustan solvon“.
- 7 Laŭ la **doktrino** de la „Analiza Skolo“, formulita de Ŝulco (1987, 1991), la Internacia Lingvo baziĝas sur du principoj:
 - Nur la dekksesregula Fundamenta Gramatiko kaj la Universala Vortaro konsistigas la „bazan kodon“ de Esperanto; la Ekzercaro kaj Antaŭparolo jam estas apliko de la baza kodo kaj do havas malpli altan norman statuson ol la du aliaj partoj de la Fundamento.
 - Al tiu ĉi baza kodo estas aplikenda la „logiko“.Laŭ Ŝulco (1985) la „Kvinlingva Gramatiko vere permesas per apliko de la logiko determini la tutan lingvon ĝis la plej lastaj detaloj.“
- 8 En la praktiko sin bazante sur tiuj tezoj ĝi **instruas** i.a.:
 - la decido de la Akademio de Esperanto sub Waringhien favore al la t.n. "aspektismo" de la pasivaj participoj kiel instruate de PG/PAG estus malĝusta, "tempisma" interpreto ĝusta;
 - nur virinaj nomoj je -ino estus laŭfundamentaj, la Varenĝenaj virinaj nomoj je -a kontraŭfundamentaj;
 - "dank´ al" anstataŭ "danke al" estus evitenda;
 - propraj nomoj estu laŭeble esperantigitaj;
 - "tiel/kiel" komparas manierojn de verbaj agoj, "tiom/kiom" komparas gradojn de ecoj aŭ manieroj;
 - "rapidkuro" estus kontraŭfundamenta, devus esti "rapida kuro", ĉar adjektivo ne povus esti flankelemento;
 - k.a.
- 9 **Kritikojn** la „Analiza Skolo“ spertis kaj de adeptoj de la klasika „filologia“ interpreto de la Fundamento kaj de la adeptoj de la t.n. „norma esperantologio“ (interpreto de la Fundamento laŭ jursciencaj metodoj, vd. malsupre) ĉirkaŭ Helmut Welger. La kritiko celis kaj la supre menciitajn centrajn tezojn kaj unuopajn instruojn de Mimoo kaj Ŝulco. Jen kelkaj ekzemploj:
 - **Arnold**, Manfred (1987). La perdiĝonta honoro de iu Virrikardo Ŝ. kaj la problemoj de la propraj nomoj. Der esperantist 1987, p. 141
 - **Wennergren**, Bertil (1988). Analizo de la analiza skolo. Speciala Cirkulero 1988 (Majo), n-ro 54, p. 3-29

- **Golden**, Bernard (1989). Enkonduka raporto de esplorado pri la Analiza Skolo. Esperanto Aktuell 8a jaro, 1989, n-ro 4, p. 15-18
 - **Eichholz**, Rüdiger (1990). Ĉu flanka elemento ne povas esti adjektivo? Akademiaj Studoj 1988-90, p. 209-212
 - **Golden**, Bernard (1991). Subnorma lingvouzo de la Analiza Skolo. Fenomeno 23a jaro 1991, n-ro 1 (Jan.), p. 7-8
 - **Mattos**, Geraldo (1999). Esenco kaj estonteco de la Fundamento de Esperanto. Esperantologio. Esperanto Studies 1a jaro 1999, n-ro 1, p. 21-37.
- 10 Welger** eble plej detale kaj profunde kritikis ĝin („Norma Esperantologio“ 1999). Nek estas pravigebla la tezo, ke la Ekzercaro havas malpli altan rangon ol la Fundamenta Gramatiko kaj la Universala Vortaro, nek estas difinita la malklara nocio de „logiko“, nek kiel oni solvu koliziojn inter unuopaj reguloj de la Fundamento. Tio havas praktikajn konsekvencojn: la aserto, ke tiel/kiel nur povas esprimi manierojn, nur estas ĝuste, se oni ignoras la Ekzercaron kaj la antaŭfundamentan silentan interkonsenton de la esperantistoj.
- 11** La centra eraro de la Analiza Skolo estas, ke ĝi - kontraŭ la klara teksto de BD 4.3 kaj A 10.3 – komplete forŝovas la Antaŭparolon. Ties rekte aplikeblajn kriteriojn pri „ĝusta“ kaj „bona“ Esperanto ĝi anstataŭigas per neklara kriterio de „logiko, komuna al ĉiuj homoj“. Tamen ne pri logiko temas, sed pri interkonsento, „kontrakto“ pri boneco-kriterioj.

IV. Iltismo, Piĉismo

Literaturo (selekto):

- 12** Kritika analizo de Iltismo el la vidpunkto de konformeco al la Fundamento ne estas konata. [Daŭrigota].

V. Meta-gramatika interpreto (1990)

Literaturo: **Makkink**, Gerrit François. Nia Fundamento sub Lupeo. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo 1990.

Kritiko: **Welger**, Helmut. Kritikaj rimarkoj pri kelkaj aktualaj variantoj de Esperanto. Marburg 1999.

- 13** En sia verko *Nia Fundamento sub lupeo* (1990) la nederlanda biologo kaj ornitologo G.F. Makkink (1907-2006) donas tiam novan „spiritan“ aŭ „metagramatikan“ interpreton de la Fundamento. Lia kerna ideo estas, ke la Fundamento estas nur fragmento, ekstera fasado de pli kompleta gramatiko kaŝita malantaŭ ĝi. Per interpreto de la „spirito“ de la videblaj partoj li klopodas „rekonstrui“ la nevideblan metagramatikan kompletan, sur kiu la fragmento liaopinie baziĝas. La spirito de Esperanto konsistas laŭ Makkink en jenaj dek principoj: natureco, internacieco, simpleco, reguleco, kohero, klareco, logikeco, libereco, neceso kaj sufiĉo, bonsoneco.
- 14** Kvankam lia interpreto estas pensiga kaj kontentigi klarigas kelkajn pridiskutitajn punktojn, ĝi prave ne ĝeneraliĝis. Welger 1999 elmontras kelkajn nekoheraĵojn kaj dubindajn konsekvencojn. La plej grava kritiko kontraŭ la „spirita interpreto“ estas, ke ĝi ne sufiĉe baziĝas sur la Fundamenta tekstaro kaj – simile kiel la Analiza Skolo - komplete ignoras la preskribojn de la Antaŭparolo. Iu – prave aŭ malprave – ekkonita spirito kun parte kontraŭstaraj principoj vastege malfermas la pordon al ĉiuspeca interpretado „arbitra laŭ persona bontrovo“ (A 3.1). La rekte aplikeblajn, konkretajn kriteriojn de la Antaŭparolo ĝi anstataŭigas per dek abstraktaj principoj, kiuj ĉiuj bezonas konkretigon por esti aplikeblaj. Per tio ĝi samtempe preskaŭ komplete ignoras la historiajn kondiĉojn, en kiuj ekestis la Fundamento, kaj ties preparajn dokumentojn.

VI. Bonlingvismo (1989)

Literaturo (selekto): Piron, Claude. La bona lingvo“. 1a eld. Vieno 1989, 109 p., 2a rev. eld. Vieno 1997, 111 p.¹⁹⁵ - Lowenstein¹⁹⁶, Anna (2010): Pri la principoj de La Bona Lingvo. Mesaĝo (4-a de Septembro 2010) al la retforumo *la bona lingvo*.¹⁹⁷ (5-a de Septembro 2010). - Corsetti, Renato. La Fundamento sen peno sed kun prudento. Enkonduko al „Simplaj Samsignifaj Vortoj“. 2012-06.25. Rete konsultebla en www.bonalingvo.org¹⁹⁸ (2014-08).

Kritiko: Kück, Andreas.

a) Superrigardo

- 15 La nuntempe plej influ-havan misinterpreton de la Fundamento propagandas la grupo, kiu nomas sin anoj de la „**bona lingvo**“, „grupo de geamikoj laborantaj por simpla Esperanto“ („bonlingvanoj“), ĉirkaŭ la geedzoj Rento Corsetti (1941-) kaj Anna Lowenstein (1951-), en 2014 ambaŭ membroj de la Akademio. La nomo de la grupo referencas al la broŝuro de la svisa psikologo, lingvisto kaj Esperanto-verkisto Claude Piron (1931-2008) „La bona lingvo“ (1989, 21997).
- 16 La ĉefa intereso kaj aktivado de la bonlingvanoj estas **leksikologia**. Ili strebas laŭeble eluzi la kunmetajn eblecojn de Esperanto laŭ R 11 (skemismo, **elinternismo**) kaj kritikas kaj malfavoras „neologismojn“, ĉu fremdajn vortojn laŭ R 15, novajn vortojn laŭ A 7 aŭ formojn novajn laŭ A 8 (naturalismo, **eleksterismo**). Ekzemploj de unuopaj subtemoj de bonlingvisma vortfarado estas duoblaj literoj („Anno“), fako-aganto-paroj (geologio – geologo / geologiisto) k.a.
- 17 La grupo verkas liston de „Simplaj Samsignifaj Vortoj“ (SSV), surbaze de diskutoj per e-mesaĝoj en la retforumo „la bona lingvo“¹⁹⁹. SSV estas publikigita en la retejo www.bonalingvo.org²⁰⁰. Bonlingvanoj aktive partoprenas en publikaj privortaj diskutoj, ĉefe en Internet-forumoj (ekz. en la Vikipedio, Reta Vortaro k.m.a.), sed ankaŭ en presitaj periodaĵoj kaj ene de la Akademio.
- 18 La **motivoj** de bonlingvanoj estas gardi aŭ (re-) akiri „facilecon“ de la esperanta leksiko per radik-ŝparemo. La **socia** egalisma **idealo** fone de bonlingvismo estas eviti aŭ redukti „disniveligon“ (diglosion) de la lingvo inter eŭropeca „altklasa“ aŭ faka lingvaĵo, kiu uzas multajn grek- kaj latin-devenajn vortojn, kaj ĉiutaga, familia kaj neklerula lingvaĵo. Pro tio la grupo pledas ekzemple por la „simplaj“ „malsimpatio“ aŭ „malinklino“ anstataŭ la eŭropeca klerula „antipatio“; por „sennoma“ anstataŭ „anonima“ k.t.p.²⁰¹
- 19 Krome iuj anoj de bonlingvismo pledas por landnomoj je –ujo anstataŭ je –io (Italujo anstataŭ Italio k.t.p.).²⁰² Tiun aspekton – se entute ĝi estas propre „bonlingvisma“ – ni ne traktas ĉi tie.
- 20 La *principoj* de bonlingvismo estas **kontraŭaj al** la preskriboj de la Bulonja Deklaracio (BK), la **Antaŭparolo** (A) kaj **§ 15 FG** (R 15). Bonlingvismo rifuzas

685

¹⁹⁵ Ambaŭ eldonoj estas ankaŭ konsulteblaj en la retejo <http://rano.org/piron/> (2014-08).

¹⁹⁶ La ortografio de la nomo estas malunueca; foje estas uzata Lowenstein (kun –o-), foje Löwenstein (kun –ö-).

¹⁹⁷ <http://groups.google.de/group/la-bona-lingvo/msg/8a3818d87ac928d0?hl=eo>.

¹⁹⁸ http://www.bonalingvo.org/index.php?title=Enkonduko_al_la_libro_kun_la_vortolistoj. (2014-08).

¹⁹⁹ <http://groups.google.de/group/la-bona-lingvo?hl=eo>, grupestro: Renato Corsetti.

²⁰⁰ http://www.bonalingvo.org/index.php/Simplaj_samsignifaj_vortoj, posedanto geedzoj Corsetti / Lowenstein.

²⁰¹ Ekzemploj laŭ Corsetti 2012.

²⁰² Vd. ekz. Löwenstein, Anna (red.). Rusoj loĝas en Rusujo – landnomoj en Esperanto. Milano 2007, 95 p. (Dek ses aŭtoroj argumentas por la uzo de -ujo por landonomoj).

apliki tiun normaron, devigan por „ĝusta“ (t.e. Fundamenta) Esperanto. Pro tio ĝi kreas **variaĵon de Esperanto**. Tiu konstato inkluzivas, ke multaj unuopaj vorto-proponoj, trovitaj per *apliko* de la misaj principoj de bonlingvistoj tamen (hazarde) ja estas konformaj al Fundamenta Esperanto.

b) Principoj de bonlingvismo

- 21 La teoria analizo de la propra pozicio fare de bonlingvanoj estas ĝis nun nedetala kaj malprofunda. Ĉefe troveblas referencoj al la verko de Piron. Ŝajne en Aŭgusto 2014 ne ekzistas iu memprezento en presita formo. Lowenstein (2010) kompilis „principoj[n] sur kiuj ni Bonlingvanoj bazas nian agadon“²⁰³, kiu aperis tamen nur kiel e-mesaĝo en la grupa ret-forumo. Corsetti verkis enkondukon al SSV (2012), legeblan en sia retejo (vd. supre ĉe „literaturo“). Manke de aliaj tekstoj, ni supozas, ke tiuj du spegulas la aŭtentikan pozicion de la du ĉefaj reprezentantoj de bonlingvismo kaj de iliaj adeptoj (de nun ĉi tie markita per „BonL“).

aa) Lowenstein, „Principoj“ (2010)

- 22 Lowenstein skribas:

„1. Oni ne aprobu novan radikon, se jam ekzistas radiko kiu tradicie esprimas la saman koncepton (ekz. 'eosto' anstataŭ 'oriento').

2. [...].

3. Se ekzistas pluraj radikoj por la sama koncepto, oni uzu tiun, kiu estas Fundamenta aŭ oficialigita (ekz. 'vinbero', ne 'uvo').

4. Por medicinaj kaj sciencaj terminoj, oni prefere uzu Esperantajn radikojn anstataŭ grekaj kaj latinaj (ekz. 'koro' anstataŭ 'kardio-') [...]

Aparta teknika uzo ne estu preteksto por enkonduko de nova radiko en la ĝeneralan lingvo-uzon. [...] mi opinias, ke subtenantoj de La Bona Lingvo apenaŭ bezonas tiun regulon. Ni apliku ĝin nur por novaj konceptoj, kiuj vere ne jam havas nomon en Esperanto (ekz. 'modemo'). Sed plej ofte eĉ novaj konceptoj estas esprimeblaj per la jam ekzistantaj rimedoj de la lingvo.“ —

- 23 **Komentoj:** La Fundamento distingas inter (deviga) **regulo**, (analogiebla) **modelo** kaj (rekomendinda) **stilo**. En la „principoj“ de Löwenstein (BonL-principoj) ne pri ĉiuj estas eksplicite dirite, ĉu ili volas esti nuraj rekomendoj pri vort-elekta stilo aŭ devigaj reguloj, kiuj decidas pri „ĝusta“ aŭ „malĝusta“. La F-to vortumas rekomendojn i.a. jene

- „estas pli bone“ (R 15.2),
- oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se ..., oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, ... [FE 27.5].
- Anstataŭ „la“ oni povas ankaŭ diri „l“ ... [FE 27.4].
- „oni uzu prefere“

Pri rekomendo do temas, se estas prezentataj almenaŭ du laŭregulaj, do ĝustaj, eblecoj kaj esprimata prefero por unu el ili.

- 24 **N-ro 4 BonL** pri medicinaj kaj sciencaj terminoj estas tia (privata, do ne oficiala) rekomendo („oni prefere uzu“). Tio ne lezas la devigajn regulojn de BD kaj A, male BD 4.5 eksplicite permesas tion („Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, ...“).

685

²⁰³ Lowenstein, Anna (2010): Pri la principoj de La Bona Lingvo. Mesaĝo (4-a de Septembro 2010) al la retforumo *la bona lingvo*. <http://groups.google.de/group/la-bona-lingvo/msg/8a3818d87ac928d0?hl=eo> (5-a de Septembro 2010).

- 25** La alineo pri „aparta teknika uzo“ (BonL 4.2) malklare parolas pri „novaj radikoj“, sed donas la ekzemplon de la oficiala – do de 2007 Fundamenta - vorto „modemo“ (OA 9). Tiu ĉi estas „vorto fremda“ en la senco de R 15. Ke BonL 4 temas pri tiu regulo ankaŭ supozigas la ekzemplo de „kardio-“. La lasta frazo („esprimeblaj per la jam ekzistantaj rimedoj“) montras, ke BonL 4 parolas pri la rilato inter formoj dekomence ĝusta Esperanto laŭ R 15 kaj kunmetitaj vortoj laŭ R 11. Ambaŭ normoj prezentas du el la tri „kolonoj de la relativa facileco de Esperanto“ (vd. supre la klarigojn pri UL). La F-to ne enhavas regulon pri ia prioritato inter ambaŭ. Male: Por la specifa kazo de la fako-aganto-paroj ĝi eksplicite nomas ambaŭ samrangajn: „Diplomatiiston [kunmetaĵo laŭ R 11] oni povas ankaŭ nomi diplomato [transprenita formo laŭ R 15] ...“ [FE 32.3] (detalojn vd. supre ĉe FG 15).
- Se BonL 4.2 volas esti regulo, ĝi estas kontraŭfundamenta. Allasebla ĝi estas kiel (privata, do ne deviga) rekomendo pri stilo.
- 26** **BonL 3** tekstas: „Se ekzistas pluraj radikoj [?!] por la sama koncepto, oni uzu tiun, kiu estas Fundamenta aŭ oficialigita (ekz. 'vinbero', ne 'uvo')“. La teksto kaj la ekzemplo ne harmonias; „vin'ber'o“ (UV) estas kunmetita vorto, ne radiko. La radiko „uv'o“ estas „nova vorto“ en la senco de A 7 kaj laŭ tiu regulo normkonforme uzebla paralele al la Fundamenta kunmetaĵo. BonL 3 probable celas „Se ekzistas pluraj vortoj ...“ Se estas tiel, same temas pri nura privata rekomendo.
- 27** Simile malpreciza kaj malklara estas **BonL 1**. Ĉu per „oni“ ĝi celas la proprajn adeptojn aŭ la Akademion? Ĉu per „nova radiko“ ĝi celas „formon novan“ en la senco de A 8.1, kion probable ligas la ekzemplo de „oriento – eosto“? Se temas pri A 8.1, kion signifas „aprobi“? A 8.1 preskribas: „Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova“. Ĉu BonL 1 celas forigi tiun preskribon de A 8.1? Tio estus kontraŭfundamenta. Ankaŭ se ĝi volas esti nur rekomendo, ĝi - laŭ la decida vortumo – havus la saman kontraŭfundamentan efikon. Se ĝi estus legeble kiel „laŭeble ne aprobi“, ĝi estus superflua, ĉar jam ekzistas la „bremso“ de A 9.3 („efektiva neceseco“). Se oni fine devus kompreni ĝin kiel memlimigo de la Akademiano Lowenstein, ĝi ankaŭ estus kontraŭfundamenta kaj kontraŭ la Statuto de la Akademio. Ligita al la rajto proponi kaj por paralela uzo rekomendi formon novan estas la devo en ĉiu unuopa kazo konsideri eblan troan neoportunecon de vorto aŭ regulo. Ĝenerala apriora rezigno je tiu rajto praktike signifas bojkoton de la Akademijaj taskoj kaj plenumas la kondiĉojn por eksigo en la senco de art. 13 de la Statuto.
- 28** El la perspektivo de la F-to oni devas **resume** konstati, ke la „principoj de bonlingvismo“, kiel ilin priskribas Lowenstein 2010, ignoras la Fundamentajn kategoriojn pri vortoj por novaj konceptoj (R 15, A 7, A 8), la samrangecon de kunmetaĵoj laŭ R 11 kaj enkorpiĝoj laŭ R 15 kaj fine la distingon inter (deviga) regulo kaj (imitinda) rekomendo. Pro tio la „principoj“ estas tre malklaraj kaj ne sendube ebligas konstati, ĉu ili volas esti reguloj aŭ nuraj rekomendoj pri stilo. Se ili volas esti reguloj, ili pluraspekte estas kontraŭfundamentaj. Kiel nedevigaj privataj rekomendoj ili estas allaseblaj.
- 29** La malklareco mem tamen lezas la Fundamentan principon de klareco (A 3.3), kiu „efektive“ (analogie al A 9.3) devas esti obeata kaj tial malpermesas „fuĝon en malklarecon“. La argumentado de „bonlingvistoj“ en privortaj diskutoj montras, ke praktike multaj komprenas la „principojn“ kiel regulojn. Tiun interpreton sugestas jam nur la vorto „principoj“ mem (do ne „rekomendoj“). Ĝin konfirmas ankaŭ la analizo de la „Enkonduko al SSV“ de Corsetti (2012 – vd. tuj poste). Ĉe la averaĝa publiko, kiu fidus je la aparta kono de la Akademianoj Lowenstein kaj Corsetti pri

la Fundamento, devas ekesti la impresoj, ke temas pri reguloj. Ĉu (subjektive) intencite aŭ ne, tiu (objektive kaj „efektive“ ekestanta) impresoj ĉe adeptoj kaj publiko faras la **bonlingvaj** „**principoj**“ **kontraŭfundamentaj**. Ili atencas la unuecon de la lingvo (A 1.1 kaj multloke), ĉar ili semas dubojn pri sennombraj tute ĝustaj kaj tradicie agnoskitaj vortoj kaj formoj, inter ili eĉ ne malmultaj Fundamentaj kaj oficialaj (ekzemplojn vd. tuj malsupre).

bb) Corsetti, „Enkonduko al SSV“ (2012)

30 [Daŭrigota].

cc) Kelkaj ekzemploj el SSV (stato 2014-08)

31 La resumon de kontraŭfundamenteco konkludendan el la tekstoj de Lowenstein kaj Corsetti konfirmas multaj praktikaj aplik-ekzemploj en SSV. La signo "→" post iu vorto signifas, ke SSV **malrekomendas** tiun vorton, kaj proponas ke oni anstataŭe uzu unu el la esprimoj dekstre de "→". La signon "~" SSV uzas por nura propono de **alternativoj**, sen nepre malrekomendo. La komentoj de BK indikas la oficialan statuson de vorto, laŭeble fruan trovlokon en Esperanto (RE 1889, EG 1 – 1904) kaj la vortkategorion (vorto fremda laŭ R 15, nova vorto laŭ A 7, formo nova laŭ A 8). Jam nur tiuj kelkaj ekzemploj montras, ke SSV malrekomendas multajn vortojn, kiuj dum pli ol cent jaroj estis rigardataj kiel ĝusta kaj bona Esperanto aŭ eĉ proponas „alternativan“ formon novan (ĥalifo).

SSV	komentoj
kalif·o ~ ĥalif·o	OA 2.1, EG 1; ĥalifo = formo nova (A 8)
kantin·o [zam] → (labor·ist·a) manĝ·ej·o	EG 1
karo·o (<i>kart-ludo</i>) ~ romb·o, kvadrat·o	UV, RE, A 7.
kartograf·o [7oa] ~ map·ist·o	OA 7, R 15
kartografi·o [2oa] ~ map·scienc·o, map·far·ad·o	OA 2, EG 1, R 15
kasaci·i → leĝ·e nul·ig·i	EG 1, R 15
kil·o (<i>en ŝipo</i>) → fund·a ŝip·trab·o	EG 1, R 15

Berlina Komentario - BK I

„Kiel oni diras en ‚ĝusta kaj bona’ Esperanto?“ – Plej multajn respondojn al tiu centra demando de instruado ni trovas en la verko „Fundamento de Esperanto“. Ĝia unua eldono estas de 1905, ĝia aktuala stato de 2007. La Unua Parto de la **Berlina Komentario** sisteme klarigas ĉiujn demandojn ĉirkaŭ la ĉefa normo de Esperanto pri „ĝusta“ kaj „bona“, troveblajn en la „Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo“, en la Antaŭparolo, Gramatiko kaj Ekzercaro de la Fundamento. La Komentario plie enkondukas en la Akademiajn Korektojn kaj la Oficialajn Aldonojn kaj elmontras rolon kaj taskojn de la Akademio. Kune kun la vort-orientita „Dua Parto pri la Vortaro Oficiala“ tiel ekestas plena sistema konsult-verko pri ĉiuj demandoj ĉirkaŭ la „lingvo-konstitucio“ de Esperanto. Tiu ĉi dua eldono de la ĝenerala parto estas forte ampleksigita kaj traktas multajn temojn ne jam troveblajn en la unua eldono. Ambaŭ volumoj kune estu utila helpilo por instruistoj, progresintaj lernantoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri ĝusta Esperanto.

Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto

- Unua Parto: Antaŭparolo, Gramatiko, Ekzercaro. 2-a eld. 2014
- Dua Parto: Vortaro Oficiala (Universala Vortaro). 4-a eld. 2014

Pri la aŭtoro

Bernhard Pabst estas juristo kaj vivas en Berlino. Li komentis la Vortaron Oficialan de Esperanto kaj publikigis multajn detal-studojn pri la Fundamento.